
ALLAN KARDEC



ISMAEL GOMES BRAGA
El la franca lingvo tradukis

# LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO

# La Evangelio
# laŭ Spiritismo



Allan Kardec

# La Evangelio laŭ Spiritismo

ENHAVANTA

la eksplikadon de la moralaj maksimoj de la Kristo, ilian konformecon kun Spiritismo kaj ilian aplikadon al la diversaj situacioj de la vivo

de **ALLAN KARDEC**

aŭtoro de "La Libro de la Spiritoj"

*Neskuebla fido estas nur tiu,*
*kiu povas rekte rigardi la racion*
*en ĉiuj aĝoj de la homaro.*

Eldonfako de

BRAZILA SPIRITISMA FEDERACIO
Rua Souza Valente, 17
20941 — Rio-de-Ĵanejro-RJ — Brazilo

**3ª eldono en Esperanto**

*De la 6ª ĝis la 10ª ekzempler-milo*

Kovrilo de CECCONI

El la franca lingvo tradukis Esperanten:
ISMAEL GOMES BRAGA

08-AA; 001.5-O; 10/1980

*Copyright 1946 by*
FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA
*(Brazila Spiritisma Federacio)*
Av. L-2 Norte, Q. 603 – Conjunto F
70830 — Brazilio, DF — Brazilo

*Kompostado, fotolitografio kaj ofset-preso de*
*Presejo de la Eldona Fako de FEB*
*Rua Souza Valente, 17*
*20941 — Rio, RJ — Brazilo*
*C.G.C. nº 33.644.857/0002-84 I.E. nº 81.600.503*

PRESITA EN BRAZILO
*Impresso no Brasil*

# TABELO DE LA ENHAVO


Al la Legonto ............ 19
Antaŭparolo ............ 25
*Enkonduko* ............ 27

I. Celo de tiu ĉi verko ............ 27
II. Aŭtoritateco de la Spiritisma Doktrino ............ 30
III. Historiaj notoj ............ 39
IV. Sokrato kaj Platono, pioniroj de la kristana ideo kaj de Spiritismo ............ 45
Resumo de la doktrino de Sokrato kaj Platono ............ 47

Ĉap. I: **Mi ne venis, por detrui la leĝon** ............ 57
Moseo ............ 57
La Kristo ............ 59
Spiritismo ............ 61
Kuniĝo de la scienco kun la religio ............ 62
*Instruoj de la Spiritoj* ............ 63
La nova epoko ............ 63

Ĉap. II: **Mia regno ne estas el tiu ĉi mondo** ............ 69
La estonta vivo ............ 69
La reĝeco de Jesuo ............ 71
La vidpunktoj ............ 72
*Instruoj de la Spiritoj* ............ 74
Surtera reĝeco ............ 74

Ĉap. III: **Estas multe da loĝejoj en la domo de mia Patro** ........ 77
Diversaj statoj de l' animo en la vaganteco ........ 77
Diversaj kategorioj de loĝataj mondoj ........ 78
Destino de la tero. Kaŭzoj de la homaj afliktoj ........ 79
*Instruoj de la Spiritoj* ........ 80
Malsuperaj mondoj kaj superaj mondoj ........ 80
Mondoj p or kulpelaĉeto kaj por provoj ........ 84
Transiĝaj mondoj ........ 85
Progresado de la mondoj ........ 87

Ĉap. IV: **Neniu povos vidi la regnon de Dio, se li ne naskiĝos denove** ........ 89
Reviviĝo kaj reenkarniĝo ........ 90
Ligiloj de familio, fortigataj de la reenkarniĝo kaj rompataj de l' unusoleco de l' ekzistado ........ 96
*Instruoj de la Spiritoj* ........ 99
Limoj de l' enkarniĝo ........ 99
Neceso de l' enkarniĝo ........ 100

Ĉap. V: **Feliĉaj la afliktitoj** ........ 103
Justeco de l' afliktoj ........ 103
Nunaj kaŭzoj de l' afliktoj ........ 104
Antaŭaj kaŭzoj de l' afliktoj ........ 107
Forgeso de la pasinteco ........ 111
Motivoj de rezignacio ........ 112
Memmortigo kaj frenezeco ........ 114
*Instruoj de la Spiritoj* ........ 117
Bone kaj malbone suferi ........ 117
La malbono kaj ties forigilo ........ 118
La feliĉo ne estas el tiu ĉi mondo ........ 120
Perdo da amataj personoj. Antaŭtempaj mortoj ........ 122
Se li estus bona homo, li estus mortinta ........ 124
La memvolaj turmentoj ........ 125
La reala malfeliĉo ........ 126
La melankolio ........ 127
Memvolaj provoj. La vera punvesto ........ 128

Ĉu oni devas meti finon al la provoj de sia proksimulo? ... 130
Ĉu estas permesate mallongigi la vivon de malsanulo, kiu suferas sen espero de resaniĝo? ... 132
Memofero de la vivo ... 133
Profito el la suferoj por aliulo ... 134

Ĉap. VI: **La konsolanta Kristo** ... 135
La malpeza jugo ... 135
La promesita Konsolanto ... 136
*Instruoj de la Spiritoj* ... 137
Regado de la Spirito de Vero ... 137

Ĉap. VII: **Feliĉaj la malriĉaj en Spirito** ... 141
Kion oni devas kompreni kiel "malriĉaj en spirito" ... 141
Kiu sin altigas, tiu estos malaltigita ... 143
Misteroj kaŝitaj al la saĝuloj kaj al la prudentuloj ... 145
*Instruoj de la Spiritoj* ... 147
Fiero kaj humileco ... 147
Misio de l' inteligenta homo sur la tero ... 153

Ĉap. VIII: **Feliĉaj tiuj, kiuj havas puran koron** ... 155
Simplanimeco kaj korpureco ... 155
Pekado per la penso. Adulto ... 157
Vera pureco. Manoj nelavitaj ... 158
Skandaloj. Se via mano estas objekto de skandalo, fortranĉu ĝin ... 160
*Instruoj de la Spiritoj* ... 163
Lasu la malgrandajn infanojn veni al mi ... 163
Feliĉaj tiuj, kiuj havas la okulojn fermitaj ... 165

Ĉap. IX: **Feliĉaj tiuj, kiuj estas mildaj kaj pacamaj** ... 169
Ofendoj kaj perforto ... 169
*Instruoj de la Spiritoj* ... 171

La afableco kaj la dolĉeco ... 171
La pacienco ... 171
Obeemo kaj rezignacio ... 172
Kolero ... 173

Ĉap. X: **Feliĉaj tiuj, kiuj estas kompatemaj** ... 177
Pardonu, por ke Dio pardonu vin ... 177
Interkonsenti kun siaj kontraŭuloj ... 178
La ofero plej agrabla al Dio ... 180
Ne juĝu, por ke vi ne estu juĝataj. Kiu estas senpeka, tiu ĵetu la unuan ŝtonon ... 181
*Instruoj de la Spiritoj* ... 183
Pardono de l' ofendoj ... 183
La indulgemo ... 186
Ĉu estas permesate admoni aliajn; rimarkigi la neperfektaĵojn de aliaj; diskonigi la malfortan flankon de aliulo? ... 189

Ĉap. XI: **Ami sian proksimulon kiel sin mem** ... 191
La plej granda ordono ... 191
Redonu al Cezaro tion, kio apartenas al Cezaro ... 193
*Instruoj de la Spiritoj* ... 194
La Leĝo de Amo ... 194
La egoismo ... 199
La fido kaj la karito ... 201
Karito al la krimuloj ... 202
Ĉu oni devas riski sian vivon por malbonfaranto? ... 203

Ĉap. XII: **Amu viajn malamikojn** ... 205
Pagi per bono la malbonon ... 205
La elkarniĝintaj malamikoj ... 208
Se iu frapas al vi la dekstran vangon, turnu al li ankaŭ la alian ... 210
*Instruoj de la Spiritoj* ... 211
La venĝo ... 211

La malamo ........................................................ 213
La duelo ........................................................ 213

Ĉap. XIII: **Via maldekstra mano ne sciu, kion donas via dekstra mano** ........................................ 221
Fari la bonon sen parado ................................ 221
La kaŝitaj malfeliĉoj ...................................... 223
La kodranto de la vidvino ................................ 225
Inviti la malriĉulojn kaj la kriplulojn ............ 227
*Instruoj de la Spiritoj* ........................................ 228
Materia karito kaj morala karito .................... 228
La bonfarado .................................................. 231
La kompato .................................................... 240
La orfoj .......................................................... 241

Ĉap. XIV: **Respektu vian patron kaj vian patrinon** ..... 245
Fila amo .......................................................... 245
Kiu estas mia patrino kaj kiuj estas miaj fratoj? ........................................................ 248
Korpa parenceco kaj spirita parenceco .......... 250
*Instruoj de la Spiritoj* ........................................ 251
Maldankemo de l' infanoj kaj ligiloj de familio .......... 251

Ĉap. XV: **Ekster karito, nenia savo** ................................ 257
Kio estas necesa, por esti savita. Parabolo de la bona Samariano ........................................ 257
La plej granda ordono .................................... 260
Bezono de karito laŭ Sankta Paŭlo ................ 261
Ekster la Eklezio, nenia savo. Ekster la vero, nenia savo .................................................... 262
*Instruoj de la Spiritoj* ........................................ 263
Ekster karito, nenia savo ................................ 263

Ĉap. XVI: **Oni ne povas servi Dion kaj Mamonon** ........ 265
Savo de la riĉuloj ............................................ 265
Gardi sin kontraŭ la avareco .......................... 266
Jesuo ĉe Zakĥeo ............................................ 266

Parabolo de la malbona riĉulo ........................................ 267
Parabolo de la talantoj ........................................ 268
Providenca utileco de la riĉeco. Provoj de la riĉeco kaj de la mizero ........................................ 269
Malegaleco de la riĉeco ........................................ 271
*Instruoj de la Spiritoj* ........................................ 273
La vera posedaĵo ........................................ 273
Uzado de la riĉeco ........................................ 275
Seninteresiĝo pri la surteraj havaĵoj ........................................ 278

Ĉap. XVII: **Estu perfektaj** ........................................ 285
Karakteroj de la perfekteco ........................................ 285
La virta homo ........................................ 286
La bonaj spiritistoj ........................................ 289
Parabolo de la semisto ........................................ 291
*Instruoj de la Spiritoj* ........................................ 292
La devo ........................................ 292
La virto ........................................ 293
Superuloj kaj malsuperuloj ........................................ 295
La homo en la mondo ........................................ 297
Zorgu la korpon kaj la Spiriton ........................................ 298

Ĉap. XVIII: **Multaj vokitaj kaj malmultaj elektitaj** ...... 301
Parabolo de l' edziĝa festo ........................................ 301
La mallarĝa pordo ........................................ 304
Ne ĉiuj, kiuj diras: Sinjoro! Sinjoro! eniros en la regnon de la ĉielo ........................................ 306
Oni postulos multon de tiu, kiu multon ricevis ............ 308
*Instruoj de la Spiritoj* ........................................ 309
Oni donos al tiu, kiu havas ........................................ 309
Oni ekkonas la kristanon laŭ liaj verkoj ...................... 311

Ĉap. XIX: **La fido translokas montojn** ............................ 315
Potenco de la fido ........................................ 315
La religia fido. Kondiĉoj de la neskuebla fido ............ 317
Parabolo de la forvelkinta figarbo ................................ 319
*Instruoj de la Spiritoj* ........................................ 321

La fido, kiel patrino de l' espero kaj de la karito .......... 321
La dia fido kaj la homa fido ........................................ 321

Ĉap. XX: **La laboristoj de la lasta horo** ........................... 325
*Instruoj de la Spiritoj* ........................................................ 326
La lastaj estos unuaj ................................................... 326
Misio de la spiritistoj .................................................... 328
La laboristoj de la Sinjoro ............................................ 330

Ĉap. XXI: **Estos falsaj Kristoj kaj falsaj profetoj** ......... 333
Oni konas la arbon laŭ la frukto .................................. 333
Misio de la profetoj ..................................................... 334
La miregindaĵoj de la falsaj profetoj ............................ 334
Ne kredu al ĉiu Spirito ................................................ 336
*Instruoj de la Spiritoj* ........................................................ 337
La falsaj profetoj ........................................................ 337
Karakterizaĵoj de la vera profeto ................................. 339
La falsaj profetoj en la vaganteco ................................ 341
Jeremia kaj la falsaj profetoj ........................................ 344

Ĉap. XXII: **Ne disigu tion, kion Dio kunigis** .................... 347
Nerompebleco de l' edziĝo ........................................... 347
Eksedziĝo .................................................................... 349

Ĉap. XXIII: **Stranga moralo** ................................................ 351
Kiu ne malamas sian patron kaj sian patrinon ............. 351
Forlasi sian patron, sian patrinon kaj siajn infanojn ................................................................ 353
Lasu al la mortintoj la zorgon enterigi siajn mortintojn ........................................................... 355
Mi ne venis alporti la pacon, sed la disigon ................ 356

Ĉap. XXIV: **Ne metu la lampon sub la grenmezurilon** ............................................................. 363
La lampo sub la grenmezurilo. Kial Jesuo parolas per paraboloj ................................................ 363
Ne iru sur vojon de nacianoj ....................................... 367

Ne la sanuloj bezonas kuraciston, sed la malsanuloj ........ 368
Kuraĝo de la kredo ........ 370
Porti sian krucon. Kiu volos savi sian animon, tiu ĝin perdos ........ 371

Ĉap. XXV: **Serĉu, kaj vi trovos** ........ 373
Helpu cin mem, la ĉielo cin helpos ........ 373
Rigardu la birdojn de la ĉielo ........ 375
Ne afliktiĝu por posedi oron ........ 378

Ĉap. XXVI: **Donace vi ricevis, donace vi donu** ........ 381
Kapablo sanigi ........ 381
Pagataj preĝoj ........ 383
Vendistoj elpelitaj el la templo ........ 383
Senpaga mediumeco ........ 383

Ĉap. XXVII: **Petu, kaj vi ricevos** ........ 387
Kvalitoj de la preĝo ........ 387
Efikeco de la preĝo ........ 388
Agado de la preĝo. Transsendo de la penso ........ 391
Kompreneblaj preĝoj ........ 395
Pri la preĝo por la mortintoj kaj la suferantaj Spiritoj ........ 396
*Instruoj de la Spiritoj* ........ 399
Maniero preĝi ........ 399
Feliĉo, kiun la preĝo alportas ........ 401

Ĉap. XXVIII: **Kolekto da spiritistaj preĝoj** ........ 403
Antaŭparolo ........ 403
I. Ĝeneralaj preĝoj ........ 405
La Sinjora preĝo = Patro Nia ........ 405
Spiritistaj kunvenoj ........ 412
II. Preĝoj por la preĝanto mem ........ 418
Al la gardanĝeloj kaj al la protektantaj spiritoj ........ 418

Por forigi malbonajn Spiritojn ............................... 421
Por peti korektiĝon de malvirto ............................. 422
Por peti forton kontraŭ tento ................................. 423
Dankpreĝo pro venko kontraŭ tento ...................... 424
Por peti konsilon .................................................... 425
En la afliktoj de la vivo .......................................... 426
Dankpreĝo pro ricevita favoro ............................... 426
Preĝo de submetiĝo kaj rezignacio ........................ 427
En minacanta danĝero ............................................ 429
Dankpreĝo post forsavo de danĝero ...................... 430
En la momento ekdormi ......................................... 430
Kiam oni antaŭvidas proksima sian morton .......... 431

III. Preĝoj por aliaj ...................................................... 434
Por afliktito ............................................................. 434
Dankpreĝo pro bonfaro ricevita de alia ................. 435
Por niaj malamikoj kaj por tiuj, kiuj deziras al ni malbonon ..................................... 435
Dankpreĝo pro bono konsentita al niaj malamikoj ......................................................... 436
Preĝo por la malamikoj de Spiritismo ................... 437
Preĝo por ĵusnaskita infano .................................... 439
Por agonianto ......................................................... 441

IV. Preĝoj por tiuj, kiuj jam ne estas sur la tero ................................................................ 442
Por ĵusmortinto ...................................................... 442
Por la personoj, kiujn oni amas ............................. 445
Por suferantaj animoj, kiuj petas preĝojn .............. 447
Por mortinta malamiko .......................................... 449
Por krimulo ............................................................ 449
Por sinmortiginto ................................................... 450
Por la pentantaj Spiritoj ......................................... 451
Por la harditaj Spiritoj ........................................... 452

V. Por la malsanuloj kaj la obseditoj .......................... 455
Por la malsanuloj ................................................... 455
Por la obseditoj ...................................................... 457

Aldono I ......................................................................... 463
Aldono II ........................................................................ 469

# AL LA LEGONTO

Tiu ĉi libro venkis la provon de la Tempo, kiu ĉion banalan detruas kaj nur taŭgajn kreaĵojn konservas. Ties unua eldono aperis en Parizo, en Aprilo de la jaro 1864 kaj la plej novaj, laŭ mia scio, en Rio-de-Ĵanejro: la 31a eldono, en Januaro 1946, 15000 ekzempleroj; la 32a, en Januaro 1947, 15000 ekz.; la 33a, en Februaro 1947, 1000, sur luksa papero; la 34a, nun en Julio 1947, 15000 ekzempleroj.

La eminentan Aŭtoron mi ne bezonas prezenti, ĉar tion jam lerte faris Prof. Porto Carreiro Neto en sia bonega traduko de *"La Libro de la Spiritoj"*, ankaŭ verkita de Allan Kardec. Mi diru nur, ke en Brazilo la plej ŝatata verko de tiu Aŭtoro estas *"La Evangelio laŭ Spiritismo"*, kvankam ĉiuj liaj libroj estas tre estimataj kaj ofte represataj.

Pri la sukceso de liaj libroj en aliaj landoj mi nun ne posedas informojn. Pri l' akcepto de Kardec ĉe spiritistaj esperantistoj, mi nenion devas diri, ĉar vi facile divenos; mi nur menciu el Esperantujo la nespiritistojn, kiuj bonvenigis lin kiel verkiston kaj scienciston. Mi transskribas nur tri respektindajn recenzojn de neŭtraluloj pri *"La Libro de la Spiritoj"*.

*"Heroldo de Esperanto"*, de la 1a de Aŭgusto 1946, recenzis:

*Prenante ĉi tiun libron en la manon, oni konstatas unuavice ĝian dikecon kaj ĝian bonkvalitecon: la bindo estas fortikega, kvazaŭ destinita por la eterneco, la papero bona, la preso klara kaj agrabla al la okulo. Kaj eklegante, oni tuj estas surprizata ankaŭ de la bonega lingvo. Jen denove nia samideano kaj lingvakomitatano Prof. Porto Carreiro Neto faris laŭdindan laboron.*

*La libro enhavas "la principojn de la spiritisma doktrino pri la senmorteco de la animo, la naturo de la spiritoj kaj ties rilatoj kun la homoj, la moralaj leĝoj, la nuntempa vivo, la estonta vivo kaj la estonteco de la homaro, laŭ la instruado de la superaj spiritoj pere de pluraj mediumoj". La temo ne estas simpla, ĉar religie-filozofia, kaj por ordinara leganto tia volumego jam pro sia amplekso povas ŝajni nedigestebla kaj teda. Sed, dank' al la klara aranĝo, kaj precipe dank' al la divido de la ĉefa parto en (1018!) demandoj kaj respondoj, la legado ne lacigas. Kompreneble oni legos tian verkon ne seninterrompe de la komenco ĝis la fino, kiel emocian amrakonton aŭ kiel streĉan kriminalan romanon, sed ĉapitro post ĉapitro, demando post demando, daŭrigante nur post profunda primedito kaj spirita digesto de la antaŭe legita.*

*Nenion mi diros pri la spiritualisma filozofio kaj spiritisma doktrino, pri kiuj oni povas same tiom diskuti kaj disputi kiom pri iu alia filozofia aŭ religia sistemo. La komunumo de la spiritistoj estas sufiĉe multnombra en nia tempo; sed pri la esenco kaj veraj celoj de spiritismo regas multloke tre strangaj opinioj kaj miskomprenoj. "La Libro de la Spiritoj" bonege taŭgas por ĝustigi tiujn opiniojn kaj por forigi la miskomprenojn. En tiu senco la libro povas utili al ĉiu, egale ĉu li konsentas aŭ rifuzas la doktrinojn en ĝi pritraktitajn.*

*M.*

*"Esperanto Internacia"*, en Septembro 1946, diris:

*Allan Kardec estis sciencisto, kiu interesiĝis pri la kuriozaj kaj ŝajne neklarigeblaj fenomenoj, kiuj multloke sin manifestis kaj ofte terurigis la homojn, kiuj nomis ilin supernaturaj. Al tiu esploro li dediĉis sian analizemon kaj sian kompetenton, kaj ĉi tiu verko estas la rezulto. Ĝi estis la unua vere grava verko pri la temo kaj servis siatempe kiel unuiga faktoro kaj deirpunkto por la posta elvolviĝo de la movado, kiu akceptis ĝin kiel gravan inspiritan verkon. Por milionoj da homoj en ĉiuj mondpartoj ĉi tiu verko ankoraŭ estas akceptata, flanke de la Biblio, kiel morala apogo kaj*

*fonto de inspiro. En tiu rilato ĝi rajtas rekonon kiel grava religia verko kaj ni povas saluti ĝian aperon en Esperanto.*

*Angla amiko mia, kiu loĝis kelkan tempon en monaĥejo en Tibeto por tie ricevi instruon pri la Budhisma doktrino, miris pri la intereso kaj — kelkrilate — admiro, kiujn la monaĥoj montris pri la Kristanismo kaj oni admonis lin, ke inter religioj ne povas esti konkuro, ĉar ĉiuj vojoj kondukas al la Vero. Mi memoris tion legante ĉi tiun verkon, ĉar en ĝi troviĝas iom de tiu grandanimeco, de tiu toleremo kaj kompreno pri la vasta horizonto de la homa vivo. La aŭtoro ne predikas dogmojn nek ritojn, sed prezentas en formo de dialogo — demandoj kaj respondoj — inter si kaj, laŭ pretendo, estuloj en la spirita mondo, sufiĉe klaran superrigardon super la tutan kampon de la homaj rilatoj kun komentario pri la etikaj valoroj de tiuj rilatoj.*

*Sekve de miaj antaŭaj recenzoj pri spiritismaj libroj, iu korespondanto, erare kredante ke mi estas spiritisto, skribis por averti min pri tiu "verko de la diablo". Precipe post tralego de ĉi tiu verko, mi devos ŝanĝi mian opinion pri lia Satana Moŝto. Li nepre devas esti stultulo, ĉar obeante la saĝajn admonojn kaj sekvante la alte moralajn principojn de "La Libro de la Spiritoj", oni tute certe ne trafus en la diablan reton!*

*La demandoj kaj respondoj faras tre stimulan debaton kaj iuj eble miros, ke verko pri spiritismo dediĉas tiom da spaco al aferoj materiaj, teraj, precipe el la fakoj fizika kaj biologia. Interese estas legi, ekzemple, ke en 1857 (la dato de la unua eldono) mediumo en tranco povis respondi, ke la materio konsistas ne el pluraj elementoj, sed "El unu sola primitiva elemento", kaj ke la diversaj proprecoj de la materio "...estas modifoj, kiujn la molekuloj ricevas ĉe sia kuniĝo kaj en difinitaj kondiĉoj". Ankaŭ: "...nenio estas malplena: kion vi kredas malplenaĵo, tio estas okupita de materio, kiun ne atingas viaj sentumoj kaj viaj aparatoj:"! Kiom da fojoj en la lastaj jardekoj ni aŭdis niajn fizikistojn diri similan!*

*Kiel okazis ĉe aliaj religioj kaj doktrinoj, simile ĉe la spiritismo; kun la tempo okazis devojiĝoj kaj skismetoj, kaj la studanto rimarkos, ke la doktrino de Kardec estas pli*

*parenca al tiu de Teozofio ol multaj sektoj de spiritistoj nuntempe akceptas. Precipe tio estas vera pri la Brita skolo, kiu ne akceptas la doktrinon pri ripetataj enkorpiĝoj por la perfektiĝado de la animo, sed kredas, ke la animo atingas perfektecon per plenumo de diversaj laboroj en la spirita mondo mem* (*).

*Tamen la verko traktas detale pri la senmorteco de la animo, la naturo de la spiritoj, la naturaj leĝoj, la nuntempa vivo kaj la estonta, kaj la estonteco de la homaro, do, iom vasta tereno!*

---

(*) Mi petas permeson al la Estimata Recenzisto por klarigi, ke, se mi ne eraras, ŝajnoj trompis lin. Religio ja naskiĝas el la buŝo de unu sola Profeto aŭ Fondanto kaj iom post iom dividiĝas en sektojn kaj ekleziojn laŭ la kompreno pli-malpli neperfekta de la kredantoj. Post jarmiloj ekzistas plej malsamaj sektoj el la primitiva religio, naskita en absoluta unueco. Pri tio la Recenzisto pravas; sed ne tia estas la vojo de Spiritismo.

Tute male, Spiritismo naskiĝas ĉie kaj ĉiam, el la buŝoj kaj plumoj de plej diversaj mediumoj, empirie, en plej malsamaj skoletoj kaj sektoj; nur nun iom post iom ĝi paŝas al unueco, simile al scienco, kiu nur post tre longa observado de faktoj atingas unuecon bazitan sur ĝia sperto pri la samaj faktoj ĉie kaj ĉiam.

La Usona-Brita Spiritisma Skolo, kies ĉefa filozofo estis la usonano Andrew Jackson Davis, dum ĝiaj unuaj jardekoj, naskiĝis 5-6 jarojn pli frue, ol la Franca Skolo, kies kodiginto estis Allan Kardec. Davis ne akceptis la doktrinon de reenkarniĝoj kaj ĝis nun lia Skolo malfavoras tiun instruon; sed la plej rimarkindaj mediumoj nun en Anglujo instruas tute klare tiun doktrinon, kaj iom post iom la Brita-Usona kunfandiĝos kun la Franca Skolo de Kardec.

Pli streĉa observado de la faktoj rajtigas konkludi, ke tiuj diversaj sektoj, kvankam tre malrapide, kliniĝas al unueco. Eĉ se mi eraras, kaj tiuj sektoj neniam venos al unueco, almenaŭ tute certe estas, ke tia unueco neniam ekzistis en pasintaj tempoj. La spiritisma movado estas tre nova; ekzistas detalaj dokumentoj, per kiuj oni povas konstati, ke ĝis nun ĝi neniam havis unuecon, tamen, ke ĝi progresadas senĉese.

Mia persona konvinko estas, ke nur post plena disvastigo de iu mondlingvo ĉe la spiritistoj, en la tuta mondo, en malproksima estonteco, la doktrinoj de Spiritismo atingos unuecon, ĉar nur tiam ĉiuj lernantoj ekkonos mondskale ĉiujn faktojn kaj ilin povos konstante komparadi. — **La Tradukinto.**

*La rimarkigoj, kiujn mi faris en antaŭa recenzo pri la aparte eldonita "Enkonduko" ankaŭ ĉi tie validas* (*)*. Mi senhezite diras, ke laŭ vidpunkto pure lingva, ĉi tiu verko estas la plej kontentiga verko, kiun mi ĝis nun legis en Esperanto. La stilo estas simpla kaj klare komprenebla, kaj la frazoj portas la stampon de instruiteco kaj ŝato pri la plej ĝusta vorto por atingi la bezonatan nuancon. Mi ne dubas, ke la tradukado postulis kompetenton preter la ordinara, kaj rigoran kontroladon por tiel brile sukcesi. La rezulto estas libro, pri kiu iu ajn literaturo povus esti fiera. Por la Esperanta, ĝia valoro estas netaksebla. La preso kaj papero estas bonaj kaj la tuto faras belan imponan volumon.*

MASON STUTTARD

*Franca Esperantisto*, en Aprilo de 1947:

*Jen alia tradukaĵo, kiun mi emas recenzi nur laŭ lingva vidpunkto. Ĉiuj spiritistoj konas la libron, pli ĝuste libregon, ĝi estas kvazaŭ la biblio de la spiritisma doktrino. Ĉiu samideano scivolema pri la transmondo aĉetu ĉi tiun libron, li certe ne bedaŭros tion eĉ se li decide malkonsentos kun la opinioj tie esprimitaj. Sed kiu deziras starigi esperantan bibliotekon konsistantan nur el lingve modelaj, plej pure zamenhofaj verkoj, tiu nepre akiru al si ĉi tiun tradukon pri kiu mi faras senrezervan laŭdon.*

*La aktivaj brazilaj eldonistoj sciigis, ke tiu teksto estis elektita, sekve de konkurso, el la tri plej bonaj tradukoj prezentitaj, post zorga komparado de ĉiu frazo kun la originalo.*

---

(*) Li tiam interalie skribis: "**pri unu afero mi estas tre kontenta: la lingvo estas modela. Malofte oni povas en la nuna tempo legi Esperanton tiel simplastilan kaj klare kompreneblan. La tro modesta tradukinto meritas ĉian laudon kaj se — kiel sajnas tre verŝajne — oni eldonos la tutan** Libron, **kondiĉe ke la stilnivelo restos la sama, gi estos valora kontribuo al la Esperanta literaturo** (El "Esperanto Internacia", Majo, 1946). — La Tradukinto.

*Per kia magio, niaj brazilaj amikoj sukcesis eldonigi je supre menciita malmultekosta prezo, tiom valoran, fakan verkon?*

MARCEL DELCOURT

Post tiuj seriozaj opinioj de eminentaj recenzistoj pri l' unua libro de Allan Kardec, aperinta en Esperanto, oni facile komprenos, kial mi tradukis tiun ĉi mondfaman verkon kaj ĝin prezentas nun al miaj samideanoj. Mi rigardas ĝin kiel gravan tutmondan religian verkon, destinitan al granda estonteco ankaŭ en nia lingvo. Eble mi ŝajnas tro kuraĝa pro tia entrepreno, tasko ja ne facila por mi, sed mi havis la paciencan helpadon de du eminentaj samideanoj, kiuj perfekte posedas ambaŭ lingvojn kaj kuraĝigis min, nome S-ro A. Caetano Coutinho kaj Prof. Porto Carreiro Neto. Tiuj kleraj esperantistoj pacience korektis mian tradukon en komparado kun la originala teksto.

Se vi atente legos tiun ĉi libron, esperebla vi konsentos kun mi, ke la Esperanta literaturo devas posedi tian verkon.

Rio-de-Ĵanejro, la 14an de Julio 1947.
(60ª datreveno de la apero de Esperanto.)

*La Tradukinto*

## ANTAŬPAROLO [*]

*La Spiritoj de l' Eternulo, kiuj estas la Anĝeloj de la ĉielo, kvazaŭ grandega armeo, kiu ekmoviĝas, kiam ĝi ricevas ordonon por tio, disvastiĝas sur la tuta supraĵo de la tero* [**]*; similaj al steloj, kiuj falas el la ĉielo, ili venas lumigi la vojon kaj malfermi la okulojn al la blindaj. Laŭ la vero, mi diras al vi, alvenis la tempo, kiam ĉiuj aferoj devas esti restarigataj en sia vera senco por disigi la mallumon, konfuzi la fierulojn kaj glori la justulojn.*

*La grandaj voĉoj de la ĉielo estas kvazaŭ sono de trumpeto, kaj la ĥoroj de l' anĝeloj kunvenas. Homoj, ni invitas vin al la dia koncerto; viaj manoj tenu la liron; viaj voĉoj unuiĝu, kaj en sankta himno ili etendiĝu kaj vibradu de unu al la alia ekstremo de l' universo.*

*Homoj, fratoj, kiujn ni amas, ni estas apud vi; amu vi ankaŭ unuj aliajn, kaj diru el la fundo de via koro,*

---

[*] La Aŭtoro opiniis, ke li devas meti, kiel antaŭparolon, tiun komunikaĵon subskribitan de La Spirito de Vero, ĉar ĝi samtempe resumas la veran karakteron de Spiritismo kaj la celon de ĉi tiu verko.

[**] Pro respekto al la originala teksto, mi skribis ĉiam **tero**, per malgranda komenclitero, eĉ kiam ĝi estas la nomo de nia Planedo. Tian tradicion mi trovis ankaŭ en la Biblio.

**Spirito**, per granda komenclitero, estas "Nemateria kaj senmorta homa animo" kaj **spirito**, per malgranda komenclitero, estas "Tuto de la homaj mensaj kapabloj" (Laŭ **Plena Vortaro**) — **La Tradukinto.**

*kontentigante ĉiun volon de la Patro, kiu estas en la ĉielo: Sinjoro! Sinjoro! kaj vi povos eniri en la regnon de la ĉielo.*

LA SPIRITO DE VERO

# ENKONDUKO

## I. CELO DE TIU ĈI VERKO

Oni povas dividi la enhavaĵon de l' Evangelioj en kvin partojn: I. *La ordinaraj agoj de la vivo de la Kristo*; II. *La mirakloj*; III. *La antaŭdiroj*; IV. *La paroloj, prenitaj de la Eklezio por fundamento de ĝiaj dogmoj*; V. *La morala instruado*. Se la kvar unuaj partoj estis temoj de kontraŭdiroj, la lasta restis neskuebla. Antaŭ tiu dia kodo eĉ la nekredanto kliniĝas; ĝi estas la kampo, kie ĉiaj kultoj povas kolektiĝi, standardo, sub kiu ĉiuj povas stari, kiaj ajn estas iliaj kredoj, ĉar ĝi neniam estis temo por la religiaj disputoj, ĉiam kaj ĉie naskitaj el demandoj pri dogmoj. Se la sektoj estus diskutintaj la moralan instruadon de l' Evangelioj, ili tie trovus sian propran kondamnon, ĉar ili alligiĝas pli al la mistika ol al la morala parto, kiu postulas de ĉiu homo la reformon de si mem. Por la homoj individue, ĝi estas regularo de konduto, ampleksanta ĉiujn cirkonstancojn de la privata aŭ de la publika vivo, la principon de ĉiuj sociaj interrilatoj, fonditaj sur la plej severa justeco; ĝi estas, fine, kaj super ĉio, la sekura gvidilo al la estonta feliĉo, angulo de la vualo levita de sur la estonta vivo. Tiu parto estas la ekskluziva objekto de tiu ĉi verko.

Ĉiuj admiras la evangelian moralon; ĉiuj proklamas ĝiajn sublimecon kaj neceson, sed multaj tion faras sen antaŭekzameno, nur laŭ tio, kion ili aŭdis, aŭ pro fido

al iuj maksimoj, kiuj fariĝis proverboj; sed malmultaj konas ĝian fundon, pli malmultaj ankoraŭ ĝin komprenas kaj scias ĉerpi ĝiajn konsekvencojn. La kaŭzo de tio kuŝas grandaparte en la malfacileco, kiun prezentas la legado de l' Evangelio, nekomprenebla por la plej granda nombro. La alegoria formo, la intenca mistikeco de la parolmaniero, igas la plimulton el la homoj legi la Evangelion nur pro konscienca devo, same kiel ili legas preĝojn sen kompreno, tio estas, senfrukte. La maksimoj de moralo dissemitaj tie ĉi kaj tie, envolvitaj en la amaso da aliaj temoj, preterpasas nerimarkate; tial estas neeble preni ilian tutecon kaj fari ilin objekto de apartaj legado kaj meditado.

Vere oni verkis traktatojn de evangelia moralo, sed ilia aranĝo en moderna literatura stilo senigas la Evangelion je la primitiva naiveco, kiu faras samtempe ĝiajn ĉarmon kaj aŭtentikecon. La samo okazas pri l' eltranĉitaj maksimoj, reduktitaj al la plej simpla formo de proverboj; ili fariĝas tiam nuraj aforismoj, kiuj perdas parton de siaj valoro kaj intereso, pro manko de l' akcesoraĵoj kaj de la cirkonstancoj, en kiuj ili estis diritaj. Por eviti tiujn maloportunaĵojn, mi kunigis en tiun ĉi verkon la artikolojn, kiuj povas formi, por precize diri, la universalan moralan kodon, sen distingo de kulto; en la citaĵoj, mi konservis ĉion, kio estis utila al la disvolviĝo de l' ideo, kaj fortranĉis nur la aferojn fremdajn al la temo. Krome, ni skrupule respektis la originalan tradukon de Sacy, same kiel la dividon en paragrafojn (*). Sed, anstataŭ ligi nin al ia kronologia ordo, neebla kaj sen reala utilo en tia temo, ni grupigis kaj metode klasigis la maksimojn laŭ ilia naturo, en tia maniero, ke ili venas kiel eble unuj el la aliaj. La mencio

(*) Por la Esperanta teksto mi uzis la eldonon de la Brita kaj Alilanda Biblia Societo, kiun la kristanaj esperantistoj prave tre estimas. — **La Tradukinto.**

de la numeroj de la ĉapitroj kaj paragrafoj permesas konsulti la ordinarajn klasifikojn, se oni tion deziras.

Se tiu ĉi estus nur materiala laboro, ĝi tamen estus utila; la ĉefa afero estus ĝin fari komprenebla por ĉiuj per la ekspliko de la malklaraj esprimoj kaj ia elvolviĝo de ĉiuj sekvoj, por la celo apliki la instruojn al ĉiaj situacioj de la vivo. Tion mi provis fari kun la helpo de la bonaj Spiritoj.

Multaj punktoj en la Evangelio, en la Biblio kaj ĝenerale en la religiaj verkoj, estas nekompreneblaj; multaj ŝajnas eĉ neraciaj, nur pro manko de la ŝlosilo por kompreno de ilia vera senco; tiu ŝlosilo estas tuta en Spiritismo, kiel jam povis konvinkiĝi tiuj, kiuj ĝin serioze studis, kaj kiel oni rekonos ankoraŭ pli bone en la estonteco. Spiritismo troviĝas ĉie en la antikva tempo kaj en ĉiuj aĝoj de la homaro. Ĉie oni trovas ĝiajn postsignojn: en la skribaĵoj, en la kredoj kaj sur la monumentoj; tial, se ĝi malfermas novajn horizontojn por la estonteco, ĝi ĵetas lumon ne malpli vivan sur la misterojn de la pasinteco.

Kiel kompletigaĵon de ĉiu regulo, ni aldonis iujn instruojn elektitajn el inter la instruoj, diktitaj de la Spiritoj en diversaj landoj kaj per malsamaj mediumoj. Se tiuj instruoj estus elirintaj el unu sola fonto, ili povus suferi personan influon aŭ influon de la medio, dum la diverseco de l' originoj pruvas, ke la Spiritoj donas siajn instruojn ĉie, kaj ke por tio neniu havas privilegion (*).

---

(*) Sendube ni povus doni pri ĉiu temo pli grandan nombron da komunikaĵoj, ricevitaj en multe da aliaj urboj kaj spiritistaj centroj, ol tiujn, kiujn ni citas; sed antaŭ ĉio ni devis eviti la monotonecon de la senutilaj ripetadoj kaj limigi nian elekton al tiuj, kiuj laŭ la fundo kaj la formo pli speciale eniras en la kadron de tiu ĉi verko, kaj ni rezervis por posta publikigo la komunikaĵojn, kiuj ne povis trovi lokon tie ĉi.

Pri la mediumoj, ni nomis neniun el ili: la plej multaj petis, ke ni ne menciu iliajn nomojn, kaj tial ne decis fari esceptojn.

Tiu ĉi verko estas por la uzado de ĉiuj; ĉiu povas el ĝi ĉerpi la rimedojn, por alkonformigi sian konduton al la moralo de la Kristo. La spiritistoj cetere tie trovos aplikojn, kiuj koncernas speciale ilin. Dank'al la komunikiĝoj, starigitaj de nun en konstanta maniero inter la homoj kaj la nevidebla mondo, la evangelia leĝo, instruata de la Spiritoj mem al ĉiuj nacioj, ne plu estos morta litero, ĉar ĉiu ĝin komprenos kaj estos senĉese instigata ĝin praktikadi laŭ la konsiloj de la gvidantaj Spiritoj. La instruoj de la Spiritoj estas vere *la voĉo el la ĉielo*, kiu venas porti lumon al la homoj kaj ilin inviti al la *plenumado de l' Evangelio*.

## II. AŬTORITATECO DE LA SPIRITISMA DOKTRINO

### Universaleco de l' instruado de la Spiritoj

Se la spiritisma doktrino estus pure homa koncepto, ĝi havus kiel garantion nur la klerecon de tiu, kiu ĝin estus konceptinta; nu, neniu sur la tero povus havi pravan pretendon posedi sola la absolutan veron. Se la Spiritoj, kiuj revelaciis ĝin, estus manifestiĝintaj al unu sola homo, nenio garantius ĝian originon, ĉar estus necese kredi je la vorto de tiu, kiu diris, ke li ricevis de ili la instruojn. Akceptante de lia flanko perfektan sincerecon, li povus plej multe konvinki la personojn de sia ĉirkaŭaĵo; li povus havi sektanojn, sed li neniam povus kunvenigi la tutan mondon·

Cetere la nomoj de la mediumoj nenian valoron aldonus al la verkoj de la Spiritoj; ilia apero estus do nura kontentigo de memamo, kiun la vere seriozaj mediumoj neniel atentas; ili komprenas, ke, ĉar estas pure pasiva ilia rolo, la valoro de la komunikaĵoj neniel altigas ilian personan meriton, kaj ke estus infanaĵo fieri pri inteligenta laboro, al kiu oni donis nur mekanikan helpon.

Dio volis, ke la nova Revelacio alvenu al la homoj per vojo pli rapida kaj pli aŭtentika; tial Li komisiis al la Spiritoj porti ĝin de unu poluso al la alia, manifestiĝante ĉie, donante al neniu la ekskluzivan privilegion aŭdi ilian parolon. Unu homo povas esti trompata, povas trompi eĉ sin mem; sed ne tiel povas esti, kiam milionoj vidas kaj aŭdas la samon : tio estas garantio por ĉiu kaj por ĉiuj. Cetere oni povas malaperigi unu homon, sed oni ne povas malaperigi amasojn; oni povas bruligi librojn, sed oni ne povas bruligi Spiritojn; nu, se oni bruligus ĉiujn librojn, la fonto de la doktrino restus tamen neelĉerpebla, tial ke ĝi ne estas sur la tero, ke ĝi elŝprucas ĉie, kaj ĉiu povas ĉerpi el ĝi. Se mankus homoj por ĝin disvastigi, restus ĉiam la Spiritoj, kiuj atingas ĉiujn, dum neniu homo povas ilin atingi.

Efektive, la Spiritoj mem faras la propagandon, kun la helpo de sennombraj mediumoj, kiujn la Spiritoj instigas en ĉiuj lokoj. Se ili havus unu solan interpretiston, eĉ se tiu estus tre favorata, Spiritismo estus apenaŭ konata; tiu sama interpretisto, al kiu ajn klaso li apartenus, estus objekto de malfavoro por multaj personoj; ne ĉiuj nacioj akceptus lin, dum la Spiritoj, komunikiĝante ĉie, ĉe ĉiuj popoloj, en ĉiuj sektoj kaj partioj, estas akceptataj de ĉiuj. Spiritismo ne havas naciecon; ĝi troviĝas ekster ĉiuj apartaj kultoj; ĝi ne estas trudata de iu socia klaso, ĉar ĉiu povas ricevi mem instruojn de siaj parencoj kaj amikoj el la posttombejo. Estas necese, ke estu tiel, por ke ĝi povu voki ĉiujn homojn al frateco; se ĝi ne estus sur neŭtrala kampo, ĝi nutrus, anstataŭ kvietigi, la malkonsentojn.

Tiu universaleco de l' instruado de la Spiritoj faras la forton de Spiritismo; ĝi estas ankaŭ la kaŭzo de ĝia tiel rapida disvastiĝo; dum la voĉo de unu sola homo, eĉ kun la helpo de la presarto, postulus jarcentojn, antaŭ ol atingi la orelojn de ĉiuj, jen miloj da voĉoj,

samtempe aŭdataj sur ĉiuj punktoj de la tero, por proklami la samajn principojn kaj ilin egale transdoni al la malplej, kiel al la plej kleraj, por ke neniu estu nefavorita. Neniu el la aliaj doktrinoj, aperintaj ĝis hodiaŭ, ĝuis tian superecon. Se do Spiritismo estas vero, ĝi ne timas la malbonan volon de la homoj, nek la moralajn revoluciojn, nek la materiajn renversegojn de la globo, ĉar neniu el tiuj aferoj povas atingi la Spiritojn.

Sed tiu ne estas la sola supereco, rezultanta el ĝia escepta pozicio; Spiritismo en tio trovas ĉiopovan garantion kontraŭ la skismoj, kiujn povus naski ĉu la ambicio de iuj homoj, ĉu la reciprokaj kontraŭdiroj de iuj Spiritoj. Tiuj kontraŭdiroj certe estas rifo, sed ĝi portas en si mem la kuracilon apud la malsano.

Oni scias, ke la Spiritoj, sekve de la diferencoj, ekzistantaj en iliaj kapabloj, neniel posedas individue la tutan veron; ke ne estas permesite al ĉiuj penetri en iujn misterojn; ke ilia scio estas proporcia al ilia puriĝogrado; ke la ordinaraj Spiritoj ne scias pli ol la homoj, kaj eĉ scias malpli ol iuj homoj; ke ekzistas inter ili, same kiel inter la homoj, vantuloj kaj falsaj kleruloj, kiuj opinias, ke ili scias, kion ili ja ne scias; estas sistememuloj, kiuj prenas siajn personajn ideojn kiel la veron; fine, ke nur la Spiritoj de la plej alta ordo, kiuj estas plene elmateriiĝintaj, tute seniĝis je la surteraj ideoj kaj antaŭjuĝoj; sed oni scias ankaŭ, ke la trompemaj Spiritoj ne havas la skrupulon ŝirmi sin sub prunteprenitaj nomoj, por trudi siajn utopiojn. El tio rezultas, ke pri ĉio, kio estas ekster la ekskluzive morala instruado, la malkaŝoj, kiujn ĉiu povas ricevi, havas individuan karakteron sen ia aŭtentikeco; tiaj revelacioj devas esti konsiderataj personaj opinioj de tiu aŭ tiu alia Spirito, kaj estus malprudente ilin facilanime akcepti kaj disvastigi kiel absolutajn veraĵojn.

Sen kontraŭdiro, la unua kontrolo estas la racio, al kiu estas necese submeti senescepte ĉion, kio venas de la Spiritoj; ĉiu teorio en evidenta kontraŭdiro kun la komuna saĝo, kun severa logiko kaj kun pozitivaj certaĵoj, kiujn oni jam posedas, kvankam subskribita de tre respektinda nomo, devas esti forĵetata. Sed tiu kontrolo en multaj okazoj estas nekompleta, sekve de la nesufiĉa klereco de iuj personoj kaj de l' inklino de multaj akcepti sian propran opinion kiel unikan juĝanton de la vero. En tia okazo, kion faras la homoj, ne havantaj en si mem absolutan fidon? Ili prenas la opinion de la plej granda nombro; la opinio de la plimulto estas ilia gvidilo. Tiel oni devas agi koncerne la instruadon de la Spiritoj, ĉar ili mem liveras al ni la rimedojn por tio.

La akordo inter la instruoj de la Spiritoj estas do la plej bona kontrolo; sed estas ankaŭ necese, ke ĝi efektiviĝu en difinitaj kondiĉoj. La malplej sekura el ĉiuj estas tiu, en kiu la sama mediumo demandas plurajn Spiritojn pri iu duba punkto; estas evidente, ke se li troviĝas sub la influo de obsedo, aŭ se li rilatas kun iu mistifikanta Spirito, tiu Spirito povas doni al li la saman instruon kaj subskribi diversajn nomojn. Ne estas ankaŭ sufiĉa garantio la unuformeco, kiun oni povas ricevi per la mediumoj de unu sola grupo, ĉar ili povas esti sub la sama influo.

*La sola serioza garantio de l' instruado de la Spiritoj estas la akordo, ekzistanta inter la malkaŝoj spontanee faritaj, pere de granda nombro da mediumoj fremdaj inter si, kaj en diversaj landoj.*

Oni komprenas, ke ni ne parolas tie ĉi pri komunikaĵoj, koncernantaj negravajn interesojn, sed pri tio, kio estas ligita kun la principoj mem de la doktrino. La sperto pruvas, ke, kiam iu nova principo devas esti eldirata, ĝi estas *spontanee* instruata samtempe en diversaj

lokoj kaj en maniero egala, se ne laŭ la formo, almenaŭ laŭ la fundo. Se do plaĉas al iu Spirito formuli strangan sistemon, bazitan nur sur liaj ideoj kaj ekster la vero, oni povas esti certa, ke tiu sistemo restos *ĉirkaŭlimigita* kaj falos antaŭ la instruoj, donataj ĉie en aliaj lokoj; pri tio oni havas jam plurajn ekzemplojn. Tiu konsento faligis ĉiujn partiajn sistemojn, aperintajn ĉe l' origino de Spiritismo, kiam ĉiu klarigis la fenomenojn laŭ sia maniero, kaj antaŭ ol oni konis la leĝojn, laŭ kiuj fariĝas la rilatoj inter la mondo videbla kaj la mondo nevidebla.

Tia estas la bazo, sur kiu mi apogas min, kiam mi formulas iun principon de la doktrino; ne tial, ke io estas konforma al miaj ideoj, mi ĝin rigardas kiel veran; mi ne arogas al mi esti la superega arbitracianto de la vero, kaj al neniu mi diras: "Kredu je tiu afero, ĉar mi tion asertas al vi". Mia opinio ne estas en miaj propraj okuloj pli ol persona opinio, kiu povas esti ĝusta aŭ falsa, ĉar mi ne estas malpli erarema ol iu ajn alia. Ne ankaŭ tial, ke iu principo estas al mi instruita, ĝi estas por mi vero, sed tial, ke ĝi ricevis la sankcion de la konsento ĝenerala.

En mia pozicio, ricevante la komunikaĵojn de preskaŭ mil seriozaj spiritistaj grupoj, dissemitaj sur la plej diversaj punktoj de la globo, mi kapablas vidi la principojn, sur kiuj tiu akordo sidas; tiu observado min gvidis ĝis la hodiaŭa tago, kaj ankaŭ ĝi min gvidos en la novaj kampoj, kiujn Spiritismo estas vokita esplori. Efektive, jam de kelka tempo mi rimarkas, en la komunikaĵoj venantaj el diversaj flankoj, tiel el Francujo kiel el aliaj landoj, ke Spiritismo estas ironta novan vojon per mal-kaŝoj de tute speciala naturo kaj ke sonis la horo, ke ĝi faru paŝon antaŭen. Tiuj malkaŝoj, ofte faritaj per duonvortoj, forpasis nerimarkitaj de multaj el tiuj, kiuj ilin ricevis; multaj aliaj kredis sin ties solaj posedantoj.

Se mi prenus ilin izolitaj, ili estus por mi senvaloraj, sed ilia koincido donas al ili altan gravecon, kiun oni povos juĝi poste, kiam estos veninta la momento doni ilin en la grandan lumon de la publikiĝo, ĉar tiam ĉiu memoros, ke li ricevis instruojn en la sama senco. Ĝuste tiu ĝenerala movado, kiun mi observas kaj kiun mi studas kun la helpo de miaj spiritaj gvidantoj, helpas min juĝi la oportunecon fari ion aŭ deteni min.

Tiu universala kontrolo estas garantio por la estonta unueco de Spiritismo kaj nuligos ĉiajn reciproke kontraŭajn teoriojn. En ĝi estonte oni serĉos la kriterion de la vero. Kio faris la sukceson de la doktrino formulita en *"La Libro de la Spiritoj"* kaj en *"La Libro de la Mediumoj"*, estas tio, ke ĉiu povas ĉie ricevi rekte de la Spiritoj la konfirmon pri tio, kion ili enhavas. Se de ĉiuj lokoj la Spiritoj estus venintaj ilin kontraŭdiri, tiuj libroj jam de longe havus la sorton de ĉiuj fantaziaj ideoj. Eĉ la apogo de la gazetaro ne estus savinta ilin de pereo, dum sen tiu apogo, ili tamen rapide trabatis al si vojon, ĉar ili havis la apogon de la Spiritoj, kies bonvolemo kompensis, eĉ superis la malvolonton de la homoj. Tiel okazos kun ĉiuj ideoj, venantaj de la Spiritoj aŭ de la homoj, kaj kiuj ne povas elteni la provon de tiu kontrolo, kies potencon neniu povas nei.

Ni supozu do, ke plaĉus al iuj Spiritoj dikti, sub iu ajn titolo, libron en kontraŭa senco; ni eĉ supozu, ke kun malamika intenco kaj por la celo senkreditigi la doktrinon, la malicemo aperigus apokrifajn komunikaĵojn; kian influon povus havi tiuj skribaĵoj, se ili estas el ĉiuj lokoj kontraŭdirataj de la Spiritoj? Unue oni devas sekuriĝi per la aliĝo de la Spiritoj, antaŭ ol lanĉi sistemon en ilia nomo. De la sistemo de unu sola ĝis la sistemo de ĉiuj, estas tia sama distanco, kia de l' unuo ĝis la senfino. Kion povas ĉiuj argumentoj de la kalumniantoj kontraŭ la opinio de l' amasoj, kiam milionoj da

amikaj voĉoj, elirantaj el la spaco, venas al ĉiuj punktoj de la globo kaj en la sinon de ĉiu familio, por fervore kontraŭataki la misfamigantojn? Ĉu jam la sperto pri tio ne konfirmis la teorion? Kio fariĝis el ĉiuj tiuj publikigaĵoj, kiuj devis, laŭdire, neniigi Spiritismon? Kiu el ili sukcesis haltigi ĝian marŝon? Ĝis la hodiaŭa tago oni ne rigardis la temon el tiu vidpunkto, nediskuteble unu el la plej gravaj; ĉiu kalkulis je si mem, ne kalkulante je la Spiritoj.

La principo de interkonformeco estas ankaŭ garantio kontraŭ la modifoj, kiujn la sektoj, dezirantaj alproprigi al si Spiritismon por sia profito, povus trudi al ĝi, por konformigi ĝin al sia plaĉo. Kiu provos deturni ĝin de ĝia providenca celo, tiu malsukcesos, pro la tre simpla motivo, ke la Spiritoj, per la universaleco de sia instruado, faligos ĉian modifon kontraŭan al la vero.

El ĉio tio eliras la jena ĉefa vero: iu ajn, kiu volus meti sin kontraŭ la fluo de l' ideoj starigitaj kaj sankciitaj, povus certe okazigi malgrandan lokan konfuzon dum momento, sed neniam regi la tutaĵon, eĉ en la nuna tempo, kaj des malpli en la estonteco.

El tio eliras la kompreno, ke la instruoj, donataj de la Spiritoj pri punktoj ankoraŭ ne klarigitaj de la doktrino, ne povas esti leĝo, dum ili restas izolitaj; sekve, ke tiuj instruoj devas esti akceptataj kun ĉiuj rezervoj kaj nur kiel informoj.

Tial estas necese uzi la plej grandan singardon en la publikigo de tiuj instruoj; kaj se oni opinias konsilinde ilin publikigi, oni devas prezenti ilin nur kiel individuajn opiniojn, pli aŭ malpli akcepteblajn, sed iel ajn bezonantajn konfirmon. Tiun konfirmon estas necese atendi, antaŭ ol prezenti iun principon kiel absolutan veraĵon, se oni ne volas esti akuzata pri facilanimeco aŭ pri senpripensa kredemo.

La superaj Spiritoj en siaj malkaŝoj agas kun grandega saĝo; ili pritraktas la grandajn demandojn de la doktrino nur iom post iom, laŭmezure kiel la intelekto estas kapabla kompreni veraĵojn de pli alta ordo, kaj kiam la cirkonstancoj estas favoraj al la publikigo de nova ideo. Tial ili ne ĉion diris en la komenco, kaj ne ĉion diras ankoraŭ hodiaŭ, neniam cedante al la senpacienco de la personoj, kiuj volas rikolti la fruktojn antaŭ ties maturiĝo. Estus do senutile voli anticipi la tempon, difinitan de la Providenco por ĉiu afero, ĉar tiam la vere seriozaj Spiritoj tute rifuzas sian kunlaboradon; sed la frivolaj Spiritoj, malmulte zorgante pri la vero, al ĉio respondas; tial, pri ĉiuj antaŭtempaj demandoj, stariĝas ĉiam kontraŭdiraj respondoj.

La supraj principoj neniel rezultas el ia persona teorio, sed ili estas la nepra sekvo de la kondiĉoj, en kiuj la Spiritoj manifestiĝas. Estas evidente, ke, se iu Spirito diras ion en iu loko kaj milionoj da Spiritoj diras la kontraŭon en aliaj lokoj, la problableco de la vero ne povas sidi ĉe tiu, kiu estas sola aŭ preskaŭ sola en sia opinio; nu, pretendi esti prava, sola kontraŭ ĉiuj, estus tiel mallogike ĉe unu Spirito, kiel ĉe unu homo. La vere saĝaj Spiritoj, kiam ili ne sentas sin sufiĉe informitaj pri iu demando, *neniam* fermas ĝin en absoluta maniero; ili deklaras, ke ili traktas la temon nur el sia vidpunkto, kaj ili mem konsilas atendi konfirmon.

Kvankam iu ideo estas granda, bela kaj justa, ne estas tamen eble, ke tuj de la komenco ĝi kunvenigu ĉiujn opiniojn. La rezultantaj konfliktoj estas eĉ necesaj, por pli klare aperigi la veron, kaj estas utile, ke ili okazu en la komenco, por ke la falsaj ideoj estu flanken metitaj. La spiritistoj, kiuj havis ioman timon pro la konfliktoj, estu do trankvilaj. Ĉiaj izolaj pretendoj falos per la forto de l' okazantaĵoj, antaŭ la granda kaj potenca kriterio de l' universala kontrolo.

*Ne al la opinio de unu sola homo oni aliĝos*, sed al la unuanima voĉo de la Spiritoj; ne unu homo, *ĉu mi, aŭ alia*, fondos la spiritisman ortodoksecon; ne ankaŭ unu Spirito, trudanta sin al iu ajn, sed ja la tuto de la Spiritoj, manifestiĝantaj sur la tuta tero laŭ ordono de Dio; tie estas la esenca karaktero de la spiritisma doktrino; tie kuŝas ĝia forto, tie ĝia aŭtoritateco. Dio volis, ke Lia leĝo sidu sur neskuebla bazo, kaj tial Li ne ripozigis ĝin sur la malforta kapo de unu sola homo.

Antaŭ tiu potenca areopago, kiu ne konas intrigojn, ĵaluzajn konkurojn, sektojn, aŭ naciojn, rompiĝos ĉiaj kontraŭaĵoj, ĉiaj ambicioj, ĉiaj pretendoj je individua superregado, kaj *ni mem ankaŭ rompiĝus, se ni volus anstataŭigi ĝiajn superegajn dekretojn per niaj propraj ideoj*; nur ĝi fermos ĉiujn diskutatajn demandojn, silentigos ĉiujn skismetojn, rekonos pravecon ĉe tiu, kiu pravas, aŭ kontraŭe. Antaŭ tiu impona akordo de ĉiuj *voĉoj el la ĉielo*, kiom valoras la opinio de unu homo aŭ de unu Spirito? Malpli ol guto da akvo, kiu perdiĝas en la oceanon, malpli ol infana voĉo, sufokita de l' uragano.

La universala opinio estas la superega juĝisto, kiu eldiras la lastan decidon; ĝi estiĝas el ĉiuj individuaj opinioj. Se unu el ĉi tiuj estas vera, ĝi influas sur la pesilon nur per sia pezo propra. Se unu el ili estas falsa, ĝi ne povas pezi pli, ol ĉiuj aliaj. En tiu vastega kontribuado, la individuoj forviŝiĝas, kaj tie estas nova malsukceso por la homa fiero.

Tiu harmonia tutaĵo jam bildiĝas; nu, tiu ĉi jarcento ne forpasos, antaŭ ol ĝi elstaros kun sia tuta brilego, por forviŝi ĉiajn necertaĵojn, ĉar de nun ĝis tiam potencaj voĉoj estos ricevintaj la mision esti aŭdataj, por kunvenigi la homojn sub la saman standardon, kiam la kampo estos sufiĉe antaŭpreparita. Ĝis tiam, iu, kiu ŝanceliĝas inter du kontraŭaj sistemoj, povas observi, kiun direkton iras la ĝenerala opinio: tio estas certa signo de la direkto, elektita de la plimulto el la Spiritoj

pri la diversaj punktoj, pri kiuj ili komunikiĝas; tio estas ne malpli certa signo, montranta, kiu el ambaŭ sistemoj venkos.

## III. HISTORIAJ NOTOJ

Por bone kompreni iujn pecojn de l' Evangelioj, estas necese koni la signifon de pluraj vortoj, kiuj ofte estas tie uzataj kaj kiuj karakterizas la staton de la moroj de la juda socio en tiu epoko. Jam ne havante por ni la saman sencon, tiuj vortoj ofte estas misinterpretataj kaj ĝuste ili lasas ian necertecon. La kompreno de ilia signifo cetere klarigas la veran sencon de kelkaj maksimoj, kiuj unuavide ŝajnas strangaj.

**Esenianoj**, juda sekto fondita proksimume en la jaro 150 antaŭ Jesuo Kristo, en la tempo de la Makabeoj, kaj kies membroj, loĝantaj en kvazaŭaj monakejoj, formis inter si ian moralan kaj religian asocion. Ili distingiĝis per dolĉaj moroj kaj severaj virtoj, instruadis la amon al Dio kaj al la proksimulo, la senmortecon de l' animo, kaj kredis je la reviviĝo. Ili vivadis en fraŭleco, malaprobis la sklavecon kaj la militon, havis komunajn havaĵojn kaj laboradis en la terkulturo. Kontraŭaj al la voluptamaj Sadukeoj, kiuj neis la senmortecon, kaj al la Fariseoj, rigoraj pri l' eksteraj formalaĵoj, ĉe kiuj la virto estis nur ŝajno, la Esenianoj neniun partion prenis en la kvereloj, kiuj dividis tiujn du sektojn. Ilia maniero de vivado alproksimiĝis al la vivo de l' unuaj kristanoj, kaj la principoj de moralo, kiujn ili praktikis, igis multajn personojn pensi, ke Jesuo apartenis al tiu sekto antaŭ la komenco de sia publika misio. Certe li konis ĝin, sed nenio pruvas, ke li estis ĝia membro, kaj ĉio, kion oni skribis pri tiu temo, estas hipoteza [*].

---

[*] **La Morto de Jesuo**, laŭdire skribita de eseniana frato, estas libro apokrifa, verkita por la celo defendi opinion, kaj enhavas en si mem la pruvon de sia moderna origino.

**Fariseoj** (el la hebrea lingvo *Parasch* = divido, apartigo). La tradicio formis gravan parton de la juda teologio; ĝi konsistis el kolekto da sinsekvaj interpretoj, donitaj pri la senco de la Sanktaj Skriboj kaj kiuj fariĝis nepre kredindaj dogmoj. Tio estis, inter la leĝistoj, temo de senfinaj diskutadoj, plej ofte nur pro demandoj pri vortoj aŭ pri formoj, laŭ la maniero de la teologiaj disputoj kaj subtilaĵoj de la mezepoka skolastiko. El tiuj interpretoj naskiĝis pluraj sektoj, el kiuj ĉiu pretendis havi la monopolon de la vero; kiel preskaŭ ĉiam okazas, tiuj sektoj funde malamis unuj aliajn. Inter tiuj sektoj, la plej influhava estis tiu de la Fariseoj, kiuj havis kiel ĉefon *Hillel* (*), judan leĝiston, naskitan en Babilono, fondinton de fama skolo, kie oni instruadis, ke nur al la Skribaĵoj oni ŝuldas fidon. Lia naskiĝo estis proksimume en la jaro 200 aŭ 180 antaŭ la Kristo. La Fariseoj estis persekutataj en diversaj epokoj, precipe dum la regadoj de Hirkan, ĉefpastro kaj reĝo de la judoj, de Aristobulo kaj de Aleksandro, reĝo de Sirio; tamen tiu ĉi lasta redonis al ili iliajn honorojn kaj havaĵojn, kaj tiel ili reakiris sian potencon kaj ĝin konservis ĝis la *ruino de Jerusalem*, en la jaro 70 de la kristana erao, kiam ilia nomo malaperis pro la disiĝo de la judoj.

La Fariseoj aktive partoprenis en la religiaj disputoj; sklavemaj observantoj de l' ekstera plenumado de la kulto kaj de la ceremonioj, plenaj de arda zorgo por prozelitismo, malamikoj de reformoj, ili paradis grandan severecon de principoj; sed sub ŝajno de zorgega pieco, ili kaŝis diboĉajn kutimojn, multan fieron kaj, super ĉio, grandegan amon al regado. La religio estis por ili pli

---

(*) Ni ne konfuzu tiun Hillelon kun lia samnomulo, kiu vivis 200 jarojn post li kaj kiu fondis la tolereman kaj amplenan socian sistemon, konatan laŭ lia nomo — Hilelismo —, pri kiu skribis D-ro Zamenhof. — **La Tradukinto.**

ĝuste rimedo por alveni al superregado, ol objekto de sincera kredo. Ili havis nur la eksteraĵojn kaj la paradon de la virto; sed per tio ili havis grandan influon super la popolo, al kiu ili aspektis kvazaŭ sanktaj homoj; tial ili estis tre potencaj en Jerusalem.

Ili kredis, aŭ almenaŭ deklaris kredi, al la Providenco, al la senmorteco de l' animo, al la eterneco de la suferoj kaj al la reviviĝo de la mortintoj (Ĉap. IV, § 4). Jesuo, kiu ŝatis antaŭ ĉio la simplecon kaj la kvalitojn de la koro, kiu preferis, en la leĝo, *la spiriton, kiu vivigas, ol la literon, kiu mortigas,* diligente penadis dum sia tuta misio, por senmaskigi ilian hipokritecon kaj sekve havis ĉe ili furiozajn malamikojn; tial la Fariseoj alligiĝis al la ĉefpastroj, por ribeligi la popolon kontraŭ li kaj lin pereigi.

**Impostistoj.** Oni tiaj nomis, en la antikva Romo, la kavalirojn de la regnaj farmimpostoj, komisiitajn por la enkasigo de l' impostoj kaj ĉiuspecaj rentoj, tiel en Romo mem, kiel en la aliaj partoj de l' Imperio. Ili estis similaj al la ĝeneralaj farmuloj kaj *trajtantoj* de l' antikva reĝimo en Francujo, kiaj ekzistas ankoraŭ en kelkaj landoj. La riskoj, al kiu ili estis elmetataj, igis ignori la riĉecon, kiun ofte ili akiris kaj kiu, ĉe multaj el ili, estis produkto de kontraŭleĝaj postuloj kaj de skandalaj profitoj. La nomo "impostisto" etendiĝis poste al ĉiuj, kiuj administris ŝtatajn financojn kaj al la malsuperaj agentoj. Hodiaŭ tiu vorto estas uzata en malbona senco, por nomi la neskrupulajn financistojn kaj agentojn de negocoj; oni diras kelkfoje: "Avida kiel impostisto; riĉa kiel impostisto", parolante pri fiorigina riĉeco. Sub la roma superregado, la imposto estis tio, kion la judoj plej malfacile akceptis, kaj tio, kio kaŭzis ĉe ili la plej grandan koleron; ĝi okazigis plurajn ribelojn

kaj oni faris ĝin religia demando, ĉar oni rigardis ĝin kiel ion kontraŭan al la leĝo. Oni eĉ formis potencan partion, ĉe kies kapo estis iu Jehuda, alnomita la Gaŭlonido, kaj kiu starigis la rifuzon al la impostopago kiel principon. La judoj do abomenis la impostopagon kaj sekve ĉiujn homojn, komisiatajn por ricevi ĝin; tial ilia abomeno kontraŭ la impostistoj ĉiurangaj, inter kiuj oni povis trovi personojn tre estimindajn, sed kiuj, pro siaj funkcioj, estis malestimataj, same kiel tiuj, kiuj vizitadis ilin kaj kiuj estis konfuzataj en la sama mallaŭdo. La altrangaj judoj opiniis kompromiti sin, havante kun ili intimajn rilatojn.

**Nazoreoj**, nomo donita, laŭ la antikva leĝo, al judoj, kiuj ĵure promesis konservi perfektan purecon, aŭ dum la tuta vivo, aŭ dum difinita tempo. Ili devis gardi ĉastecon, abstini je likvoroj kaj konservi sian hararon. Ŝimŝon, Samuel kaj Johano, la Baptisto, estis nazoreoj.

Poste la judoj donis tiun nomon al la unuaj kristanoj, por aludi al Jesuo el Nazaret. Ĝi estis ankaŭ nomo de hereza sekto dum la unuaj jarcentoj de la kristana erao, sekto, kiu, same kiel la Ebionidoj, el kiuj ĝi akceptis kelkajn principojn, miksis la formalaĵojn de Moseismo kun la kristanaj dogmoj. Tiu sekto malaperis en la kvara jarcento.

**Pordistoj** estis impostkolektistoj de malalta rango, precipe komisiataj por ricevi la impostojn de eniro en la urbojn. Iliaj funkcioj estis pli-malpli la sama, kiel tiuj de niaj doganistoj kaj ricevistoj de akcizoj; ili partoprenis en la ĝenerala malestimo al ĉiuj impostistoj. Tial en la Evangelio oni ofte trovas la nomon *impostisto*, ligitan kun la ideo pri *personoj de malbona vivo*; sed tiu kvalifiko neniel kuntrenis la ideon pri diboĉuloj aŭ

pri fiuloj; ĝi estis esprimo de malestimo, sinonimo de malbonmoruloj, ne indaj kunvivi ĉe honestaj homoj.

**Sadukeoj**, juda sekto, kiu formiĝis proksimume en la jaro 248 antaŭ la Kristo; tiel nomita laŭ la nomo de ĝia fondinto Cadok. La sadukeoj ne kredis al la senmorteco de l' animo, nek al la reviviĝo, nek al bonaj kaj malbonaj anĝeloj. Tamen ili kredis al Dio, sed, nenion atendante post la morto, ili servis al Dio nur celante materiajn rekompencojn, ĉar laŭ ilia kredo la Providenco limiĝis nur al tio; ankaŭ la kontentigo de la sentumoj estis en iliaj okuloj la precipa celo de la vivo. Koncerne la Skribaĵojn, ili tenis sin nur al la antikva leĝo, ne akceptante la tradicion nek ian ajn interpretadon. Ili lokis la bonajn agojn kaj la puran kaj simplan plenumadon de la leĝo pli alten, ol la eksteraĵojn de la kulto. Ili estis, kiel oni vidas, la materialistoj, la deistoj kaj la sensualistoj de tiu epoko. Tiu sekto estis ne multnombra, sed ĝi enkalkulis gravajn personojn kaj fariĝis politika partio ĉiam kontraŭa al la Fariseoj.

**Samarianoj**. Post la skismo de la dek triboj, Samario fariĝis la ĉefurbo de la apartiĝinta reĝolando de Izrael. Detruita kaj rekonstruita plurfoje, ĝi estis, sub regado de la romanoj, la ĉefurbo de Samario, unu el la kvar ŝtatoj de Palestino. Herodo, alnomita la Granda, beligis ĝin per luksaj monumentoj kaj, por flati Aŭguston, donis al ĝi la nomon *Aŭgusta*, en greka lingvo *Sébaste*.

La samarianoj estis preskaŭ ĉiam en milito kontraŭ la reĝoj de Judujo. Profunda malamo, ekde la disiĝo, konstante regis inter la du popoloj, kiuj evitis ĉiajn interrilatojn. La samarianoj, por fari la disecon pli profunda kaj ne bezoni veni al Jerusalem por la solenado de la religiaj festoj, konstruis sian propran templon kaj

enkondukis iujn reformojn; ili akceptis nur la Pentateŭkon [(*)], kiu enhavas la leĝon de Moseo, kaj malakceptis ĉiujn ceterajn librojn, poste aldonitajn al ĝi. Iliaj sanktaj libroj estis skribataj per hebreaj literoj de la plej malproksima antikveco. En la okuloj de l' ortodoksaj judoj, ili estis herezuloj, kaj tial malestimataj, anatemataj kaj persekutataj. La antagonismo de la du nacioj havis do kiel solan principon la malakordon de la religiaj opinioj, kvankam iliaj kredoj havis la saman originon; ili estis la tiamaj *protestantoj.*

Oni trovas ankoraŭ hodiaŭ samarianojn en kelkaj landoj de l' Oriento, precipe en Naplusa kaj Jafo. Ili obeas la leĝon de Moseo kun pli da severeco, ol la aliaj judoj, kaj geedziĝas nur inter si mem.

**Sinagogo** (el la greka lingvo *Synagogé*, kunveno, kongregacio). En Judujo estis unu sola templo, tiu de Salomono, en Jerusalem, kie oni solenadis la grandajn ceremoniojn de la kulto. La judoj tien iris ĉiujn jarojn en pilgrimado por la precipaj festoj, kiaj la Pasko, Konsekrado kaj Festo de la Laŭboj. Jesuo kutime iradis Jerusalemon okaze de tiuj festoj. La aliaj urboj ne havis templojn, sed sinagogojn, konstruaĵojn, kie la judoj kunvenis ĉiusabate por fari publikajn preĝojn, sub la direktado de la plejaĝuloj, de la skribistoj aŭ de la leĝistoj; oni tie legadis pecojn el la sanktaj libroj, kiujn oni klarigis kaj komentariis. Ĉiu povis partopreni en tiuj komentarioj; jen kial Jesuo, ne estante pastro, instruadis en la sinagogoj ĉiusabate.

Post la ruino de Jerusalem kaj la disiĝo de la judoj, la sinagogoj servas al la judoj, en la urboj, kie ili loĝas, kiel temploj, por soleni la kulton.

---

(*) **Pentateŭko** = la kvin unuaj libroj de la Biblio kune: Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj, Readmono. — **La Tradukinto**.

**Skribistoj**, nomo donita unue al la sekretarioj de la reĝoj de Judujo kaj al iuj provizumestroj de la judaj armeoj; poste tiu nomo estis uzata speciale por la leĝistoj, kiuj instruis la leĝon de Moseo kaj ĝin interpretis por la popolo. Ili estis solidaraj kun la Fariseoj, kun kiuj ili dividis la principojn kaj la antipation kontraŭ la reformoj; tial Jesuo ilin konfuzis en la sama mallaŭdo.

**Terapeŭtoj** (el la greka lingvo *therapeŭtaj*, formita de *therapeŭejn*, servi, kuraci, tio estas, servistoj de Dio aŭ kuracistoj); judaj sektanoj, samtempuloj de la Kristo, loĝantaj precipe en Aleksandrio, en Egiptujo. Ili havis multajn rilatojn kun la Esenianoj, kies principojn ili praktikis; same kiel ĉi tiuj lastaj, ili dediĉis sin al la praktikado de ĉiuj virtoj. Ilia nutraĵo estis ekstreme simpla. Dediĉataj al la fraŭleco, al la meditado kaj al la soleca vivado, ili formis veran religian ordenon. Filono, juda platona filozofo en Aleksandrio, estis la unua, kiu parolis pri la Terapeŭtoj; li faras el ili sekton el Judismo. Eŭzebo, Sankta Hieronimo kaj aliaj pastroj opinias, ke ili estis kristanoj. Egale, ĉu ili estis judoj aŭ kristanoj, estas evidente, ke, same kiel la Esenianoj, ili prezentis unuigan strekon inter Judismo kaj Kristanismo.

## IV. SOKRATO KAJ PLATONO, PIONIROJ DE LA KRISTANA IDEO KAJ DE SPIRITISMO

El la fakto, ke Jesuo eble konis la sekton de l' Esenianoj, estus eraro konkludi, ke li ĉerpis el ĝi sian doktrinon, kaj ke, se li vivus en alia medio, li instruus aliajn principojn. La grandaj ideoj neniam eksplodas subite; la ideoj, kiuj kuŝas sur la vero, ĉiam havas pionirojn, kiuj parte preparas la vojojn; poste, kiam la tempo alvenas, Dio sendas iun kun la misio resumi, kunordigi kaj kompletigi tiujn disajn elementojn, kaj

formi el ili korpon. Tiamaniere, ne alvenante abrupte, la ideo trovas ĉe sia apero spiritojn tute pretajn por ĝin akcepti. Tiel fariĝis kun la kristana ideo, kiu estis antaŭsentata plurajn jarcentojn antaŭ Jesuo kaj la Esenianoj, kaj kies ĉefaj pioniroj estis Sokrato kaj Platono (*).

Sokrato, same kiel la Kristo, nenion skribis, aŭ almenaŭ lasis neniun skribaĵon; same kiel Jesuo, li ankaŭ spertis la morton de la krimuloj, viktimo de la fanatikeco, ĉar li atakis la tradiciajn kredojn kaj starigis la virton super la hipokriteco kaj la ŝajnigo de la formoj, unuvorte, ĉar li kontraŭbatalis la religiajn antaŭjuĝojn. Same kiel Jesuo estis akuzita de la Fariseoj kiel koruptanto de la popolo per siaj instruoj, tiel ankaŭ Sokrato estis akuzita de la Fariseoj de sia tempo, ĉar Fariseoj ekzistis en ĉiuj epokoj, kiel koruptanto de la junularo, proklamante la dogmon de l' unueco de Dio, de la senmorteco de l' animo kaj de l' estonta vivo. Same kiel la doktrinon de Jesuo ni konas nur per skribaĵoj de liaj disĉiploj, ni konas la doktrinon de Sokrato nur per la skribaĵoj de lia disĉiplo Platono. Ni opinias utile resumi tie ĉi la punktojn plej elstarajn de tiu doktrino, por montri ĝian akordon kun la principoj de Kristanismo.

Al tiuj, kiuj vidos en tiu komparo ian profanadon kaj pretendos, ke ne povas esti egaleco inter la doktrino de idolano kaj la doktrino de la Kristo, ni respondos, ke la doktrino de Sokrato ne estis idolana, ĉar ĝia celo estis kontraŭbatali idolanismon; ke la doktrino de Jesuo, pli kompleta kaj pli purigita, ol la doktrino de Sokrato,

---

(*) Ni, esperantistoj, konas tiun principon en la mondlingva ideo. Dum tri jarcentoj aperis pioniroj ĝis Johano Martin Schleyer, kiu estis nia Johano, la Baptisto, kaj fine junulo solvis la problemon. La morala supereco de Zamenhof pruvis lian altan Mision. Nun la ideo venkis la mondon kaj ne gravas, ĉu la fina formo de la lingvo estas la nuna aŭ alia, iam aperonta. — **La Tradukinto**.

nenion povas perdi el la komparo; ke la dia misio de la Kristo ne povus el tio esti malplivalorigita; cetere, ke ili apartenas al la historio kaj ne povas esti forviŝitaj. La homo venis al punkto, kiam la lumo eliras per si mem de sub la grenmezurilo; li estas matura por ĝin rigardi en la vizaĝon; des pli malbone por tiuj, kiuj ne kuraĝas malfermi la okulojn. La tempo venis, por ke oni rigardu la aferojn grandamplekse kaj de alte, kaj ne plu el la malvasta, malgrandioza vidpunkto de l' interesoj de sektoj kaj de kastoj.

Tiuj ĉi citaĵoj cetere pruvos, ke, se Sokrato kaj Platono antaŭsentis la kristanan ideon, en ilia doktrino oni trovas ankaŭ la fundamentajn principojn de Spiritismo.

## Resumo de la doktrino de Sokrato kaj Platono

I. *La homo estas* enkarniĝinta animo. *Antaŭ sia enkarniĝo, ĝi ekzistis kunigita kun ĉeftipoj, kun la ideoj de la vero, de la bono kaj de la belo; kiam ĝi enkarniĝas, ĝi apartiĝas de la ĉeftipoj, kaj,* rememorante sian pasintecon*, ĝi estas pli aŭ malpli turmentata de la deziro reveni al tiu tempo.*

Oni ne povas pli klare esprimi la distingon kaj la sendependecon de l' inteligenta principo kaj de la materia principo; cetere tiu estas la doktrino pri l' antaŭekzistado de l' animo; pri la malpreciza intuicio, kiun ĝi konservas pri alia mondo, al kiu ĝi aspiras reveni; pri ĝia vivado post la morto de la korpo; pri ĝia eliro el la spirita mondo por enkarniĝi, kaj pri ĝia reeniro en tiun saman mondon post la morto; fine, ĝi estas la ĝermo de la doktrino pri la defalintaj Anĝeloj.

II. *La animo devojiĝas kaj konfuziĝas, kiam ĝi uzas la korpon, por konsideri iun objekton; ĝi havas kapturniĝojn, kvazaŭ ĝi estus ebria, ĉar ĝi alligiĝas al aĵoj ŝanĝemaj pro*

*sia propra naturo; sed kiam ĝi rigardas sian propran esencon, ĝi estas direktata al tio, kio estas pura, eterna, senmorta, ĉar ĝia naturo mem estas ja tia sama, ĝi tie restas alligita tiel longe, kiel ĝi povas; tiam ĝiaj devojiĝoj ĉesas, ĉar ĝi estas unuigita kun tio neŝanĝema, kaj tiun staton de l' animo oni nomas* saĝeco.

Tiel, la homo, kiu konsideras la aferojn triviale, el vidpunkto materia, kreas al si iluziojn; por konsideri la aferojn kun ĝusteco, li devas ilin vidi de supre, tio estas, de spirita vidpunkto. La vera saĝulo devas do iamaniere izoli la animon for de la korpo, por vidi per la okuloj de la Spirito. Tion saman instruas Spiritismo. (Ĉ. II, § 5.)

III. *Tiel longe kiel ni havos nian korpon, kaj nia animo estos ŝlosita en tiu putremaĵo, neniam ni posedos la objekton de niaj deziroj: la veron. Efektive, la korpo kreas al ni mil malhelpojn pro la bezono, en kiu ni troviĝas, zorgi pri ĝi; plie, la korpo plenigas nin per deziroj, per apetitoj, per timoj, per mil kimeroj kaj per mil stultaĵoj, en tia maniero, ke kun la korpo estas neeble esti saĝa eĉ dum unu momento. Sed se ne estas eble pure koni ion, dum la animo estas kunigita kun la korpo, el du aferoj unu estas certa: aŭ ni neniam konos la veron, aŭ ni konos ĝin post la morto. Liberigite el la frenezo de la korpo, ni tiam konversacios, kiel estas prave esperi, kun homoj same liberaj, kaj ni konos per ni mem la esencon de l' aĵoj. Tial la veraj filozofoj ekzerciĝas por morti, kaj la morto ŝajnas al ili neniel timinda.* ("La Ĉielo kaj la Infero", *1a parto, ĉ. II; 2a parto, ĉ. I.*)

Jen la principo de la kapabloj de l' animo, nebuligitaj de l' organoj de la korpo, kaj tiu de la disvolviĝo de la kapabloj post la morto. Sed tie ĉi temas nur pri l' eminentaj animoj, jam purigitaj; ne estas same kun la nepuraj animoj.

IV. *La nepura animo, en tiu stato, estas peza kaj altirata denove al la videbla mondo pro teruro al tio, kio estas nevidebla kaj nemateria; ĝi tiam vagadas, oni diras, ĉirkaŭ*

*la monumentoj kaj la tomboj, apud kiuj oni kelkfoje vidas terurmienajn fantomojn, kiaj devas esti la figuroj de l' animoj lasintaj la korpon, ankoraŭ ne tute puraj, kaj konservantaj ion el la materia formo, kiu faras ilin percepteblaj. Tiuj ne estas la animoj de la bonuloj, sed de la malbonuloj, kiuj estas devigataj vagadi, ĝis la apetitoj propraj al la materia formo, al kiuj ili sin donadis, altiras ilin en iun korpon; kaj tiam ili sendube reprenas tiujn samajn morojn, kiuj, dum ilia vivo, estis objekto de iliaj preferoj.*

Ne nur la principo de la reenkarniĝo estas tie ĉi klare esprimita, sed ankaŭ la stato de l' animoj, kiuj troviĝas ankoraŭ sub la regado de la materio, estas priskribita tiel, kiel Spiritismo ĝin montras en la manifestiĝoj de la Spiritoj. Estas tie ankaŭ dirite, ke la reenkarniĝo en materian korpon estas sekvo de la nepureco de l' animo, dum la elpurigitaj animoj estas liberaj de reenkarniĝo. Spiritismo nenion alian diras; ĝi aldonas nur, ke la animo, kiu prenis bonajn decidojn en sia vaganteco kaj kiu havas akiritajn konojn, kunportas, ĉe la renaskiĝo, malpli da malbonaĵoj, pli da virtoj kaj pli da intuiciaj ideoj, ol ĝi havis en sia antaŭa ekzistado; kaj ke ĉiu enkarniĝo markas do por ĝi novan intelektan kaj moralan progreson. (*La Ĉielo kaj la Infero*, 2a parto: *Ekzemploj.*)

V. *Post nia morto, la genio (*daimon*, demono), kiu estis difinita por nin gvidi dum nia vivo, venigas nin en lokon, kie kunvenas ĉiuj, kiuj devas esti kondukataj al la* Hadeso*, por tie esti juĝataj. La animoj, loĝintaj en la* Hadeso *la necesan tempon, estas rekondukataj al tiu ĉi vivo en* multnombraj kaj longaj periodoj.

Tio estas doktrino pri la Gardanĝeloj, aŭ protektantaj Spiritoj, kaj pri la sinsekvaj reenkarniĝoj post intertempoj pli aŭ malpli longaj en vaganteco.

VI. *La demonoj plenigas la spacon, kiu apartigas la ĉielon de la tero; ili estas la ligilo, kiu kunigas la Grandan Tuton kun ĝi mem. La dioj neniam rekte komunikiĝas kun la homo; nur pere de la demonoj la dioj interrilatas kaj interparolas kun li, ĉu dum dormo, ĉu dum maldormo.*

La vorto *daimon*, el kiu oni faris la vorton "demono", ne havis malbonan sencon dum la antikveco, kiel ĉe la modernuloj; oni ne uzis ĝin ekskluzive pri malicaj estuloj, sed pri ĉiuj Spiritoj ĝenerale, inter kiuj oni distingis la superajn Spiritojn, nomatajn "dioj", kaj la malpli altajn Spiritojn, aŭ precize dirite *demonoj*, kiuj komunikiĝis rekte kun la homoj. Spiritismo ankaŭ diras, ke la Spiritoj loĝatigas la spacon; ke Dio komunikiĝas kun la homoj nur pere de la puraj Spiritoj, komisiataj por transsendi al la homoj la diajn volojn; ke la Spiritoj komunikiĝas kun la homoj dum la maldormo kaj dum la dormo. Anstataŭigu la vorton *demono* per la vorto *Spirito*, kaj vi havos la spiritisman doktrinon; uzu la vorton *anĝelo*, kaj vi havos la kristanan doktrinon.

VII. *La konstanta zorgo de la filozofo* (tia, kia lin komprenis Sokrato kaj Platono) *estas havi la plej grandan zorgon pri l' animo, malpli por tiu ĉi vivo, kiu estas nur momento, ol kun rigardo al la eterneco. Se la animo estas senmorta, ĉu ne estas saĝe vivadi celante la eternecon?*

Kristanismo kaj Spiritismo instruas la samon.

VIII. *Se la animo estas nemateria, ĝi devas iri, post tiu ĉi vivo, en mondon ankaŭ nevideblan kaj nematerian, kaj la korpo, diseriĝante, revenas al la materio. Estas necese nur klare distingi la animon puran, vere nematerian, kiu nutras sin, kiel Dio, per scio kaj pensoj, de l' animo* pli aŭ malpli *makulita de materiaj malpuraĵoj, kiuj malebligas al ĝi altiĝi al Dio kaj ĝin tenas en la lokoj de ĝia surtera loĝejo.*

Kiel oni vidas, Sokrato kaj Platono perfekte komprenis la diversajn gradojn da senmateriiĝo de l' animo; ili insistis pri la malsameco de situacioj, kiu rezultas por la animoj de ties *pli aŭ malpli* granda pureco. Tion, kion ili diris per intuicio, Spiritismo pruvas per multenombraj ekzemploj, kiujn ĝi metas sub niajn okulojn. (*La Ĉielo kaj la Infero*, 2a parto.)

IX. *Se la morto estus la diseriĝo de la tuta homo, ĝi estus granda gajno por la malbonuloj; post la morto, ili estus liberigitaj samtempe el la korpo, el la animo kaj el la malvirtoj. Kiu ornamis sian animon, ne per fremda juvelaro, sed per sia propra, nur tiu povos trankvile atendi la horon de sia foriro al la alia mondo.*

Alivorte, tio signifas, ke la materialismo, kiu proklamas la neniaĵon post la morto, estus la nuligo de ĉia morala respondeco postmorta kaj sekve instigilo al la malbono; ke la malbonulo havas ĉion por gajni el la neniaĵo; ke nur la homo, kiu seniĝis je siaj malvirtoj kaj riĉiĝis per virtoj, povas trankvile atendi la vekiĝon en la alia vivo. Spiritismo montras al ni, per la ekzemploj, kiujn ĝi ĉiutage metas sub niajn okulojn, kiel dolora estas por malbonulo la transiro de unu vivo al la alia, la eniro en la estontan vivon. (*La Ĉielo kaj la Infero*, 2a parto, ĉ. I.)

X. *La korpo konservas bone markitaj la postesignojn de la zorgoj, kiujn oni havis por ĝi aŭ de l' akcidentoj, kiujn ĝi suferis; estas same pri l' animo; kiam ĝi estas senigita je la korpo, ĝi portas la evidentajn trajtojn de sia karaktero, de siaj inklinoj kaj la postesignojn de ĉiuj agoj, kiujn ĝia vivo stampis sur ĝi. Tiel, la plej granda malfeliĉo, kiu povas okazi al la homo, estas iri en la alian mondon kun la animo ŝarĝita per krimoj. Ci vidas, Kalikles, ke nek ci, nek Polus, nek Georgias, scius pruvi, ke ni devas havi alian konduton, kiu estos al ni utila, kiam ni estos tie transe.*

*El tiom da diversaj opinioj, la sola, kiu restas neskuebla, estas,* ke estas pli bone ricevi ol fari maljustaĵon*, kaj ke antaŭ ĉiuj aferoj oni devas klopodi ne por ŝajni virta homo, sed esti virta homo.* (Interparolado de Sokrato en la malliberejo kun siaj disĉiploj.)

Tie ĉi oni trovas tiun ĉefpunkton, hodiaŭ konfirmitan de l' observado, ke la animo ne purigita konservas la ideojn, la inklinojn, la karakteron de la pasioj, kiujn ĝi havis sur la tero. Ĉu tiu maksimo: *Pli bone estas ricevi ol fari maljustaĵon* ne estas tute kristana? Tiu estas la sama penso, kiun Jesuo esprimis per tiu ĉi figuro: "Se iu frapas al vi sur unu vangon, prezentu al li ankaŭ la alian". (Ĉ. XII, §§ 7, 8.)

XI. *El du aferoj unu: aŭ la morto estas la absoluta detruo, aŭ ĝi estas la paso de l' animo en alian lokon. Se ĉio estingiĝas, la morto estos kiel unu el tiuj maloftaj noktoj, kiujn ni pasigas sen sonĝo kaj sen iu ajn konscio pri ni mem. Sed, se la morto estas nur ŝanĝo de loĝejo, la paso en lokon, kie la mortintoj devas kunveni, kia feliĉo estos tie renkonti tiujn, kiujn oni konis! Mia plej granda plezuro estus ekzameni de proksime la tieajn loĝantojn kaj distingi, kiel tie ĉi, tiujn, kiuj estas saĝaj, de tiuj, kiuj opinias esti, sed ne estas saĝaj. Sed estas tempo, ke ni disiĝu, mi por morti, vi por vivi.* (Sokrato al siaj juĝintoj.)

Laŭ Sokrato, la homoj, kiuj vivis sur la tero, renkontiĝas post la morto kaj rekonas unuj aliajn. Spiritismo montras, ke ili daŭrigas siajn iamajn interrilatojn kaj, sekve, ke la morto ne estas interrompo, nek ĉeso de la vivo, sed transformo sen malkontinueco.

Se Sokrato kaj Platono konus la instruojn, kiujn la Kristo donis kvincent jarojn poste, kaj la instruojn, kiujn la Spiritoj donas nun, ili ne estus parolintaj alimaniere. En tio estas nenio surpriziga, se oni konsideras,

ke la grandaj veraĵoj estas eternaj kaj ke la altaj Spiritoj devis koni tiujn veraĵojn, antaŭ ol veni sur la teron, kien ili alportis tiujn principojn; ke Sokrato, Platono kaj la grandaj filozofoj de ilia tempo eble troviĝis, poste, en la nombro de la homoj, kiuj helpis la Kriston en ties dia misio, kaj ke ili estis pli kapablaj ol aliaj, kompreni liajn sublimajn instruojn; fine, ke ili eble estas hodiaŭ iuj el la Spiritoj, komisiitaj por instrui al la homoj tiujn samajn veraĵojn.

XII. *Oni neniam devas pagi maljustaĵon por maljustaĵo, nek fari malbonon al iu, kiu ajn estas la malutilo, kiun oni faris al ni. Malmultaj personoj tamen akceptos tiun principon, kaj tiuj, kiuj ĝin malakceptos, nur malestimos unuj aliajn.*

Ĉu tiu ne estas la principo de karito, kiu instruas al ni ne redoni malbonon per malbono kaj pardoni niajn malamikojn?

XIII. Laŭ la fruktoj oni ekkonas la arbon. *Estas necese kvalifiki ĉiun agon laŭ tio, kion ĝi naskas: nomi ĝin malbona, kiam el ĝi venas malbono, kaj bona, kiam ĝi naskas bonon.*

Tiu maksimo: "Laŭ la fruktoj oni ekkonas la arbon", estas plurfoje dirata kun tiu sama teksto en la Evangelio.

XIV. *La riĉeco estas granda danĝero. Ĉiu homo, kiu amas la riĉecon, ne amas sin mem, nek tion, kio apartenas al li, sed amas ion, kio estas pli fremda ol tio, kio apartenas al li. (Ĉ. XVI.)*

XV. *La plej belaj preĝoj kaj la plej belaj oferoj plaĉas malpli al Dio ol virta animo, kiu penas simili al Li. Estus tre grave, se la dioj havus pli da estimo al niaj oferaĵoj ol*

*al nia animo; per tiu rimedo, la plej kulpaj povus altiri al si ilian favoron. Sed ne, vere saĝaj kaj justaj estas nur tiuj, kiuj per siaj vortoj kaj agoj plenumas siajn devojn al la dioj kaj al la homoj. (Ĉ. X, §§ 7, 8.)*

XVI. *Mi nomas malvirta homo tiun vulgaran amanton, kiu amas la korpon prefere ol la animon: Amo estas ĉie en la naturo, kiu invitas nin apliki nian intelekton; oni trovas ĝin eĉ en la movado de l' astroj. Amo sola ornamas la naturon per siaj riĉaj tapiŝoj; amo ornamas kaj fiksas sian loĝejon tie, kie ĝi trovas florojn kaj parfumojn. Ankaŭ nur amo donas pacon al la homoj, kvietecon al la maro, silenton al la ventoj kaj dormon al la doloro.*

La amo, kiu devas kunigi la homojn per frateca ligilo, estas sekvo de tiu teorio de Platono pri l' universala amo, kiel leĝo de la naturo. Sokrato diris, ke "la amo ne estas dio nek mortulo, sed granda demono", tio estas, granda Spirito, prezidanta la universalan amon, kaj precipe tiu parolo estis al li imputita kiel krimo.

XVII. *La virto ne povas esti instruata; ĝi venas kiel donaco de Dio al tiuj, kiuj ĝin posedas.*

Tio estas proksimume la kristana doktrino pri la graco; sed, se la virto estas donaco de Dio, ĝi estas favoro, kaj do oni povas demandi, kial ĝi ne estas donacita al ĉiuj; aliflanke, se ĝi estas donaco, ĝi estas sen merito por tiu, kiu ĝin posedas. Spiritismo estas pli klara; ĝi diras, ke tiu, kiu posedas la virton, akiris ĝin per siaj klopodoj en sinsekvaj ekzistadoj, liberigante sin iom post iom de siaj malperfektaĵoj. La graco estas la forto, per kiu Dio favoras la bonvoleman homon, por ke ĉi tiu senigu sin je la malbono kaj faru la bonon.

XVIII. *Natura inklino en ĉiu el ni estas percepti malpli multe niajn kulpojn, ol la kulpojn de aliaj.*

La Evangelio diras: "Vi vidas la lignereton en la okulo de via proksimulo, kaj vi ne vidas la trabon, kiu estas en via propra okulo". (Ĉ. X, §§ 9, 10.)

XIX. *Se la kuracistoj malsukcesas en la plimulto el la malsanoj,* tio okazas tial, ke ili traktas la korpon sen la animo*; nu, se la tuto ne troviĝas en bona stato, estas neeble, ke iu parto fartu bone.*

Spiritismo donas la ŝlosilon de l' interrilatoj inter la animo kaj la korpo, kaj pruvas, ke estas senĉesa reagado de unu sur la alian. Tiel ĝi malfermas novan vojon al la scienco; montrante al la scienco la veran kaŭzon de iuj afekcioj, Spiritismo donas al ĝi la rimedojn por ilin kontraŭbatali. Kiam la scienco kunkalkulos la agadon de la spirita elemento en la ekonomio, ĝi malsukcesos malpli ofte.

XX. *Ĉiuj homoj, ekde l' infaneco, faras multe pli da malbono ol da bono.*

Tiu parolo de Sokrato tuŝas la demandon pri superregado de la malbono sur la tero. Tiu demando estas nesolvebla sen la konado de la plureco de la mondoj kaj la destino de la tero, kie loĝas tre malgranda parto de la homaro. Nur Spiritismo donas ĝian solvon, kiu estas elvolvita en la ĉapitroj III, IV kaj V de tiu ĉi verko.

XXI. *Saĝa ci estas, se ci ne kredas, ke ci scias tion, kion ci ne scias.*

Tio estas adresata al la personoj, kiuj kritikas ion, pri kio ili ne scias eĉ la unuan vorton. Platono kompletigas tiun penson de Sokrato, dirante: "Unue ni penu per paroloj fari ilin pli honestaj, se tio estos ebla; se ne, *ni ne zorgu pri ili*, kaj ni serĉu nur la veron. Ni klopodu

instrui nin mem, sed ni ne kalumniu unuj aliajn". Tiel devas agi la spiritistoj koncerne siajn kontraŭdirantojn sincerajn aŭ malsincerajn. Se Platono reviviĝus hodiaŭ, li trovus la aferojn preskaŭ tiaj, kiaj ili estis en lia tempo, kaj povus uzi la saman parolon. Sokrato ankaŭ trovus personojn, kiuj mokus lian kredon al la Spiritoj kaj traktus lin kiel frenezulon, same kiel lian disĉiplon Platono.

Ĉar li instruis tiujn principojn, Sokrato unue estis ridindigita, poste akuzita pri malpieco kaj kondamnita trinki cikuton. La grandaj novaj veraĵoj ribeligas kontraŭ si la interesojn kaj la antaŭjuĝojn, kiujn ili ofendas, kaj ne povas firmigi sin sen bataloj kaj martiroj.

## ĈAPITRO I

# MI NE VENIS, POR DETRUI LA LEĜON

La tri revelacioj: Moseo; la Kristo; Spiritismo, Kuniĝo de la scienco kun la religio. **Instruoj de la Spiritoj**: La nova epoko.

*1. Ne pensu, ke mi venis, por detrui la leĝon aŭ la profetojn; mi venis, ne por detrui, sed por plenumi. Vere mi diras al vi: Ĝis la ĉielo kaj la tero forpasos, nek unu joto nek unu streketo forpasos de la leĝo, ĝis ĉio plenumiĝos.* (Mateo, 5:17-18.)

### Moseo

2. Estas du malsamaj partoj en la mosea leĝo: la leĝo de Dio, ricevita sur la monto Sinaj, kaj la civila aŭ disciplina leĝo, starigita de Moseo; unu estas neŝanĝebla; la alia, konforma al la kutimoj kaj al la karaktero de la popolo, varias kun la tempo.

La leĝo de Dio estas formulita en la jenaj dek ordonoj:

I. *Mi estas la Eternulo, via Dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta, el la domo de sklaveco. Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi. Ne faru al vi idolon, nek bildon de io, kio estas en la ĉielo supre aŭ sur la tero malsupre aŭ en la akvo sub la tero; ne kliniĝu antaŭ ili kaj ne servu ilin; ĉar Mi, la Eternulo, via Dio, estas Dio severa, kiu la malbonagon de la patroj punas sur la idoj en la tria kaj*

*kvara generacioj* [*] *ĉe Miaj malamantoj, kaj kiu faras favorkoraĵon por miloj al Miaj amantoj kaj al la plenumantoj de Miaj ordonoj.*

II. *Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo, via Dio; ĉar la Eternulo ne lasos senpuna tiun, kiu malbonuzas Lian nomon.*

III. *Observu la tagon sabatan, ke vi tenu ĝin sankta, kiel ordonis al vi la Eternulo, via Dio.*

*— Dum ses tagoj laboru kaj faru ĉiujn viajn aferojn; sed la sepa tago estas sabato de la Eternulo, via Dio; faru nenian laboron, nek vi, nek via filo, nek via filino, nek via sklavo, nek via sklavino, nek via bovo, nek via azeno, nek ia via bruto, nek via fremdulo, kiu estas inter viaj pordegoj; por ke ripozu via sklavo kaj via sklavino, kiel vi. Kaj memoru, ke vi estis sklavo en la lando Egipta, kaj la Eternulo, via Dio, elkondukis vin el tie per mano forta kaj per brako etendita; pro tio ordonas al vi la Eternulo, via Dio, observi la tagon sabatan.*

IV. *Respektu vian patron kaj vian patrinon, kiel ordonas al vi la Eternulo, via Dio; por ke longe daŭru via vivo, kaj por ke estu al vi bone sur la tero, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi.*

V. *Ne mortigu.*

VI. *Kaj ne adultu.*

---

[*] Ĉi tie ni kopias la tradukon de D-ro Zamenhof. Ĝi, same kiel la latina "Vulgata" kaj la Brazila Eldono de la Biblio, diras: "... punas sur la idoj en la tria kaj kvara generacioj..." La angla kaj la tradukoj de Figueiredo kaj Almeida tekstas: "...punas sur la idoj **ĝis** la tria kaj kvara generacioj..."

Tiu **ĝis** anstataŭ **en** estas evidenta eraro. Supozeble, tiuj ortodoksaj tradukintoj ne trovis sencon en la frazo, ĉar ili ne komprenas la leĝon pri reenkarniĝoj, kaj opiniis, ke la puno falas sur la unuan, la duan, la trian, la kvaran generaciojn. Sed tie estas vualita la instruo pri la reenkarniĝoj: la kulpaj Spiritoj reenkarniĝas en la tria kaj kvara generacioj kaj ricevas la punojn pro la pekoj faritaj de ili mem, ne de iliaj patroj. En la unua kaj dua generacioj ili ankoraŭ ne reenkarniĝis. Dio ne punas senkulpan pranepon de pekinto, sed la pekinton mem en nova enkarniĝo. Sekve, la traduko de Zamenhof estas fidela. Nekredantoj al la reenkarniĝa doktrino ne povas kompreni tiun kaj multajn aliajn instruojn de la Biblio. — **La Tradukinto**.

VII. *Kaj ne ŝtelu.*

VIII. *Kaj ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston.*

IX. *Kaj ne deziru la edzinon de via proksimulo.*

X. *Kaj ne deziru la. domon de via proksimulo, nek lian kampon, nek lian sklavon, nek lian sklavinon, nek lian bovon, nek lian azenon, nek ion, kio apartenas al via proksimulo* (*).

Tiu leĝo estas de ĉiuj tempoj kaj de ĉiuj landoj, kaj tial ĝi havas dian karakteron. Ĉiuj aliaj leĝoj estis dekretitaj de Moseo, pro la neceso bridi per la timo popolon nature malkvietan kaj sendisciplinan, ĉe kiu li devis kontraŭbatali enradikiĝintajn malbonajn kutimojn kaj antaŭjuĝojn, ĉerpitajn el la servuteco en Egiptujo. Por doni aŭtoritatecon al siaj leĝoj, li devis atribui al ili dian originon, same kiel faris ĉiuj leĝdonintoj ĉe la primitivaj popoloj; la aŭtoritato de la homo devis apogi sin sur la aŭtoritato de Dio; sed nur la ideo pri iu terura Dio povis impresi malklerajn homojn, en kiuj la konscienco kaj la sento de rekta justeco estis ankoraŭ malmulte elvolviĝintaj. Estas evidente, ke Tiu, kiu metis en Siajn ordonojn: "Ne mortigu; ne agu malutile kontraŭ via proksimulo", ne povus kontraŭdiri Sin mem kaj krei la devon de ekstermado. La leĝoj ekskluzive moseaj havis do esence provizoran karakteron.

## La Kristo

3. Jesuo ne venis, por detrui la leĝon, tio estas, la leĝon de Dio; li venis, por plenumi ĝin, tio estas, por

(*) El "Readmono", 5:6-21; laŭ la traduko de L. L. Zamenhof. La Dek Ordonoj aperas ankaŭ en "Eliro", 20:2-17, sed tie la redaktado ne estas precize la sama kaj mankas la naŭa ordono; tial ni preferis la tekston en "Readmono". — **La Tradukinto**.

ĝin elvolvi, montri ĝian veran signifon kaj ĝin alkonformigi al la grado da progreso de la homoj; tial oni trovas en tiu leĝo la principon de la devoj al Dio kaj al la proksimulo, la bazon de lia doktrino. Koncerne la leĝojn de Moseo mem, Jesuo, kontraŭe, profunde ŝanĝis ilin, tiom en la fundo, kiom en la formo. Li konstante bataladis kontraŭ la ekscesoj de l' eksteraj formalaĵoj kaj la falsaj interpretoj, kaj li ne povus pli profunde ilin reformi, ol reduktante ilin al la jena ordono: "Amu Dion super ĉiuj aĵoj kaj vian proksimulon kiel vin mem", kaj aldirante: *tio estas la tuta leĝo kaj la profetoj.*

Per ĉi tiuj paroloj: "Ĝis la ĉielo kaj la tero forpasos, nek unu joto, nek unu streketo forpasos de la leĝo, ĝis ĉio plenumiĝos", Jesuo intencis diri, ke estas necese, ke la leĝo de Dio ricevu sian tutan plenumon, tio estas, estu praktikata sur la tuta tero, en sia pureco, kun ĉiuj elvolviĝoj kaj ĉiuj sekvoj; ĉar, al kio utilus la starigo de tiu leĝo, se ĝi devus esti la privilegio de iuj homoj aŭ de unu sola popolo? Ĉiuj homoj estas filoj de Dio kaj rajtas sendistinge ricevi la saman prizorgadon.

4. Sed la rolo de Jesuo ne estis nur tiu de nura morala leĝdonanto, sen alia aŭtoritato ol la parolo; li venis plenumi la profetajn antaŭdirojn, kiuj anoncis lian venon. Li havis sian aŭtoritatecon el la escepta naturo de sia Spirito kaj el sia dia misio. Li venis, por instrui al la homoj, ke la vera vivo ne estas sur la tero, sed en la regno de la ĉielo; instrui al ili la vojon, kiu tien kondukas, la rimedojn por sin reharmoniigi kun Dio, kaj antaŭinstrui ilin pri la marŝo de l' okazontaĵoj, por la plenumo de la homaj destinoj. Tamen li ne diris ĉion, kaj pri multaj punktoj li nur ĵetis la ĝermon de la veraĵoj, kiujn, li mem deklaris, ne povus ankoraŭ esti komprenataj. Li parolis pri ĉio, sed per paroloj pli aŭ malpli klare esprimitaj; por la kapto de la kaŝita senco de iuj

paroloj, estis necese, ke novaj ideoj kaj novaj konoj venu doni la ŝlosilon, kaj tiuj ideoj ne povus veni, antaŭ ol la homa Spirito estus atinginta difinitan gradon da matureco. La scienco devis potence kunlabori por la naskiĝo kaj elvolviĝo de tiuj ideoj. Estis do necese doni al la scienco la tempon por progresi.

## Spiritismo

5. *Spiritismo* estas la nova scienco, veninta revelacii al la homoj, per nerefuteblaj pruvoj, la ekziston kaj la naturon de la spirita mondo, kaj ĝiajn rilatojn kun la korpa mondo. Spiritismo jam montras ĝin al ni, ne kiel supernaturaĵon, sed kontraŭe, kiel unu el la vivantaj kaj senĉese agantaj fortoj de la naturo, kiel la fonton de amaso da fenomenoj, ĝis nun ne komprenataj kaj tial forlasataj en la regionoj de fantazio kaj de mirindaĵoj. Pri tiuj faktoj la Kristo plurfoje parolis en diversaj cirkonstancoj, kaj multaj aferoj anoncitaj de li restis nekompreneblaj aŭ estis false interpretitaj, ĉar la fenomenoj ankoraŭ ne estis komprenataj. Spiritismo estas la ŝlosilo, per kies helpo ĉio facile klariĝas.

6. La Leĝo en la Malnova Testamento estas personigita en Moseo; en la Nova Testamento ĝi estas personigita en la Kristo; Spiritismo estas la tria revelacio de la leĝo de Dio, sed ĝi ne estas personigita en iu individuo, ĉar ĝi estas la frukto de l' instruado donata, ne de unu homo, sed de la Spiritoj, kiuj estas *la voĉoj el la ĉielo*, sur ĉiuj punktoj de la tero, per sennombra amaso da perantoj. Ĝi estas iamaniere kolektiva estulo, konsistanta el la aro de l' estuloj de la spirita mondo, ĉiu el kiuj venas alporti al la homoj la tributon de sia klereco, por konatigi al ili tiun mondon kaj la sorton, kiu ilin tie atendas.

7. Same kiel la Kristo diris: "Mi ne venis, por detrui la leĝon, sed por plenumi ĝin", Spiritismo simile diras: "Mi ne venis, por detrui la kristanan leĝon, sed por ĝin plenumi". Ĝi instruas nenion kontraŭan al la instruado de la Kristo, sed ĝi elvolvas, kompletigas kaj klarigas, per vortoj kompreneblaj por ĉiuj, tion, kio estas dirita nur en alegoria formo. Ĝi venas plenumi, en la antaŭdiritaj tempoj, tion, kion la Kristo anoncis, kaj prepari la plenumon de l' estontaj aferoj. Ĝi estas do verko de la Kristo, kiu mem prezidas, kiel li antaŭanoncis, la renoviĝon, kiu nun efektiviĝas, kaj preparas la regnon de Dio sur la tero.

## Kuniĝo de la scienco kun la religio

8. La scienco kaj la religio estas la du leviloj de la homa intelekto; unu konigas la leĝojn de la materia mondo, la alia la leĝojn de la morala mondo; sed *unuj kaj aliaj havas la saman principon, kiu estas Dio*, kaj ne povas sin reciproke kontraŭdiri; se ili neas unu alian, unu estas nepre malprava kaj la alia estas prava, ĉar Dio ne povas voli detrui Sian propran verkon. La neakordigebleco, kiun oni kvazaŭ vidas inter tiuj du ordoj da ideoj, troviĝas en nesufiĉa observado kaj en troa ekskluzivemo de ambaŭ flankoj; el tiu ekskluzivemo venas konflikto, kiu naskas nekredemon kaj netoleremon.

La tempo venis, kiam la instruoj de la Kristo devas esti kompletigitaj; kiam la vualo, intence ĵetita sur iujn partojn de tiu instruado, devas esti levita; kiam la scienco, ĉesante esti ekskluzive materialisma, devas kunkalkuli la spiritan elementon, kaj kiam la religio ne plu malatentos la organikajn kaj neŝanĝeblajn leĝojn de la materio; nun, tiuj du fortoj — scienco kaj religio — helpante unu alian kaj marŝante interkonsente, donos unu al alia sian apogon. Tiam la religio, ne plu ricevante

la kontraŭdiron de la scienco, akiros neskueblan potencon, ĉar ĝi estos en akordo kun la racio, kaj oni ne povos kontraŭmeti al ĝi la nerezisteblan logikon de la faktoj.

La scienco kaj la religio ĝis nun ne povis interkompreniĝi, ĉar ĉiu el ili rigardis la aferojn el sia ekskluziva vidpunkto kaj reciproke sin forpuŝis. Mankis io por okupi la malplenan spacon, kiu apartigis ilin, mankis kuniga streketo por ilin kunligi; tiu streketo estas la konado de la leĝoj, kiuj kontrolas la spiritan mondon kaj ties rilatojn kun la korpa mondo, leĝoj tiel neŝanĝeblaj kiel la leĝoj, kiuj kontrolas la movadon de l' astroj kaj la ekziston de l' estuloj. Kiam tiuj rilatoj estos konfirmitaj per la sperto, nova lumo fariĝos: la kredo turnos sin al la racio, la racio nenion mallogikan trovos en la kredo, la materialismo estos venkita. Sed en tio, same kiel en ĉio, estas personoj, kiuj restas malantaŭe, ĝis ili estas kuntrenataj de la ĝenerala movado, kiu ilin frakasas, se ili volas kontraŭstari, anstataŭ iri kun ĝi. Tuta morala revolucio efektiviĝas en la nuna momento kaj prilaboras la mensojn; post ellaborado dum pli ol dek ok jarcentoj, ĝi komencas sian plenumiĝon kaj signos novan epokon por la homaro. Estas facile antaŭvidi la sekvojn de tiu revolucio; ĝi devas alporti, en sociaj rilatoj, neeviteblajn modifojn, al kiuj neniu havos la povon kontraŭstari, ĉar ili estas en la planoj de Dio kaj elvenas el la leĝo de la progreso, kiu estas unu el la leĝoj de Dio.

INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

## La nova epoko

9. Dio estas unika, kaj Moseo estas la Spirito, kiun Dio sendis en misio por konigi Lin, ne nur al la

hebreoj, sed ankaŭ al la idolanaj popoloj. La hebrea popolo estis la instrumento, kiun Dio uzis por fari Sian revelacion per Moseo kaj per la profetoj, kaj la suferoj de tiu popolo celis frapi la okulojn kaj faligi la vualon, kiu kaŝis Dion antaŭ la homoj.

La ordonoj de Dio, donitaj per Moseo, portas la ĝermon de la plej ampleksa kristana moralo; la komentarioj de la Biblio malvastigas ilian signifon, ĉar, praktikata laŭ sia tuta pureco, la kristana moralo ne estus tiam komprenata; tamen la dek ordonoj de Dio restis, malgraŭ ĉio, kiel ĉefa paĝo de la Biblio, kiel ia lumturo, kiu devis lumigi al la homaro la vojon trairotan.

La moralo instruita de Moseo estis konforma al la stato de progreso de la popoloj, kiujn ĝi intencis rebonigi, kaj tiuj popoloj, duonsovaĝaj koncerne la perfektiĝon de l' animo, ne estus komprenintaj, ke oni povas adori Dion alimaniere ol per bruloferoj, nek ke estas necese pardoni malamikon. Ilia intelekto, ŝatinda el materia vidpunkto kaj eĉ laŭ la artoj kaj sciencoj, estis tre malmulte disvolviĝinta pri moraleco, kaj ne konvertiĝus sub la regado de tute spirita religio; estis necesa la reprezentado duonmateria, kian havis tiam la hebrea religio. La bruloferoj parolis al iliaj sentumoj, dum la ideo pri Dio parolis al ilia Spirito.

La Kristo estis la iniciatinto de la plej pura, de la plej sublima moralo; de l' evangelia kristana moralo, kiu devas renovigi la mondon, realproksimigi inter si la homojn kaj ilin interfratigi; kiu devas ŝprucigi el ĉiuj koroj la kariton kaj la amon al la proksimulo, kaj krei inter ĉiuj homoj komunan solidarecon; fine, kiu devas transformi la teron kaj ĝin fari loĝejo por Spiritoj pli altaj ol tiuj, kiuj nun loĝas sur ĝi. Tia estas la leĝo de la progreso, al kiu la naturo estas submetita kaj kiu plenumiĝas, kaj *Spiritismo* estas la levilo, kiun Dio uzas por progresigi la homaron.

La tempo venis, kiam la moralaj ideoj devas elvolviĝi, por ke efektiviĝu la progresado, kiu estas en la planoj de Dio; la moralaj ideoj devos sekvi la saman vojon, kiun laŭiris la ideoj pri libereco, kiuj estis ilia anoncanto. Sed oni ne kredu, ke tiu elvolviĝo efektiviĝos sen bataloj; ne, por alveni al maturiĝo, la moralaj ideoj bezonas skuojn kaj diskutojn, por ke ili altiru la atenton de la vulgarularo; kiam tio estos atingita, la beleco kaj la sankteco de la moralo frapos la intelektojn, kaj ĉi tiuj alligiĝos al scienco, kiu donas al ili la ŝlosilon de l' estonta vivo kaj malfermas al ili la pordojn de l' eterna feliĉo. Moseo malfermis la vojon; Jesuo daŭrigis la laboron; Spiritismo ĝin finos. (*Izraelida Spirito*, Mulhouse, 1861.)

10. Unu tagon, Dio per Sia neelĉerpebla karito permesis al la homo vidi la veron trapenetri la mallumon; tiu tago estis la veno de la Kristo. Post la viva lumo, la mallumo revenis; la mondo, post alternativoj de vero kaj malhelo, perdiĝis denove. Tiam, similaj al la profetoj de la Malnova Testamento, la Spiritoj ekparolis kaj ekavertis vin: la mondo skuiĝas ĉe siaj bazoj; la tondro bruegos; estu firmaj!

Spiritismo havas dian karakteron, ĉar ĝi ripozas sur la leĝoj de la naturo, kaj kredu ja, ke ĉio, kio havas dian karakteron, havas grandan kaj utilan celon. Via mondo estis perdiĝanta; la scienco, elvolviĝinte je la kosto de la moralo, kondukante vin nur al la materia bonstato, fariĝis profita al la spirito de la mallumo. Vi scias, kristanoj, la koro kaj la amo devas marŝi kune kun la scienco. La regno de la Kristo, ve! post dek ok jarcentoj, kaj malgraŭ la sango de tiom da martiroj, ankoraŭ ne venis. Kristanoj, revenu al la Majstro, kiu volas savi vin. Ĉio estas facila al tiu, kiu kredas kaj amas; la amo plenigas lin per neesprimebla ĝojo. Jes, miaj infanoj, la mondo estas skuita; la bonaj Spiritoj

tion diras abunde al vi; fleksiĝu sub la blovado, anoncanta la uraganon, por ke vi ne estu renversataj; tio estas, preparu vin, kaj ne estu similaj al la malprudentaj virgulinoj, kiuj estis kaptitaj malprovizitaj, ĉe l' alveno de la fianĉo.

La pretiĝanta revolucio estas pli morala ol materia; la grandaj Spiritoj, diaj senditoj, alblovas fidon, por ke vi ĉiuj, klerigitaj kaj ardaj laboristoj, aŭdigu vian humilan voĉon; ĉar vi estas la sablero; sed sen sableroj ne estus montoj. Tiel, do la vortoj "Ni estas malgrandaj" ne plu havu sencon por vi. Al ĉiu sia misio, al ĉiu sia laboro. Ĉu la formiko ne faras la konstruaĵon de sia societo, kaj nepercepteblaj animaletoj ne starigas kontinentojn? La nova krucmilito estas komencita; apostoloj de l' universala paco kaj ne de milito, modernaj sanktaj Bernardoj, rigardu kaj marŝu antaŭen: la leĝo de la mondoj estas la leĝo de la progreso. (*Fénelon*. Poitiers, 1861.)

11. Sankta Aŭgusteno estas unu el la plej grandaj vulgarigantoj de Spiritismo; li manifestiĝas preskaŭ ĉie; la kaŭzon de tio ni trovas en la vivo de tiu granda kristana filozofo. Li apartenas al tiu vigla falango de la Patroj de l' Eklezio, al kiuj Kristanismo ŝuldas siajn plej solidajn fundamentojn. Kiel multaj, li estis eltirita el la idolanismo, ni pli bone diru, el la plej profunda malpieco, de la brilego de la vero. Kiam meze de siaj diboĉoj, li sentis en la animo tiun strangan vibradon, kiu lin revokis al li mem kaj igis lin kompreni, ke la feliĉo estas aliloke, ne en la malvigligaj kaj pasemaj plezuroj; kiam, fine, sur sia vojo al Damasko, li aŭdis, li ankaŭ, la sanktan voĉon krii: "Saŭlo, Saŭlo, kial vi persekutas min?" li ekkriis: "Dio mia! Dio mia! pardonu min, mi kredas, mi estas kristano!" kaj de tiam li fariĝis unu el la plej firmaj subtenantoj de l' Evangelio. Oni

povas legi en la famaj konfesoj, kiujn al ni postlasis tiu eminenta Spirito, la karakterizajn kaj samtempe profetajn parolojn, kiujn li eldiris post la morto de Sankta Monika: *"Mi estas konvinkita, ke mia patrino revenos, por viziti min kaj doni al mi konsilojn, revelaciante al mi tion, kio atendas nin en la estonta vivo"*. Kia instruo en tiuj vortoj, kaj kia brilega antaŭvido pri la estonta doktrino! Tial hodiaŭ, vidante la horon alveni por la disvastigo de la vero, kiun li iam antaŭsentis, li fariĝis ties arda propagandisto kaj, por tiel diri, disdividas sin, por respondi al ĉiuj, kiuj vokas lin. (*Erasto*, disĉiplo de Paŭlo. Parizo, 1863.)

*Rimarko.* Ĉu Sankta Aŭgusteno venas do renversi, kion li konstruis? Certe ne; sed kiel tiom da aliaj, li vidas per la okuloj de la Spirito, kion li ne vidis kiel homo. Lia animo liberigita vidas novajn lumojn; ĝi komprenas, kion ĝi antaŭe ne komprenis; novaj ideoj malkaŝis al ĝi la veran sencon de iuj paroloj; sur la tero li juĝis aferojn laŭ la konoj, kiujn li posedis, sed kiam nova lumo por li fariĝis, li povis pli funde juĝi; tial li devis fornei sian kredon al la inkubaj kaj sukubaj (*) Spiritoj kaj sian anatemon, ĵetitan sur la teorion de l' antipodanoj. Nun, kiam Kristanismo aperas al li laŭ sia tuta pureco, li povas, pri iuj punktoj, pensi alimaniere ol dum sia vivado, ne ĉesante tamen esti la kristana apostolo; li povas, sen forĵuro de sia kredo, fariĝi propagandisto de Spiritismo, ĉar li tie vidas la plenumiĝon de l' antaŭdiritaj aferoj. Tion proklamante hodiaŭ, li nur rekondukas nin al pli certa kaj pli logika interpretado de la tekstoj. Tiele agas ankaŭ aliaj Spiritoj, kiuj estas en simila pozicio.

(*) **Inkubaj kaj Sukubaj Spiritoj**. Iama katolika kredo je diabloj, kiuj prenadis la formojn respektive de viroj kaj virinoj, por kuniĝi kun aliseksaj homoj. — **La Tradukinto**.

## ĈAPITRO II

# MIA REGNO NE ESTAS EL ĈI TIU MONDO

La estonta vivo. La reĝeco de Jesuo. La vidpunktoj. **Instruoj de la Spiritoj:** Surtera reĝeco.

*1. Pilato do reeniris en la palacon, kaj alvokis Jesuon, kaj diris al li: "Ĉu vi estas la reĝo de la Judoj? — Jesuo respondis:* Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo; *se mia regno estus el ĉi tiu mondo, miaj servantoj bataladus, por ke mi ne transdoniĝu al la Judoj; sed nun mia regno ne estas el ĉi tie.*

*Pilato demandis lin: Ĉu vi do estas reĝo? Jesuo respondis: Vi diras ke mi estas reĝo. Por tio mi naskiĝis kaj venis en la mondon, ke mi atestu pri la vero. Ĉiu, kiu estas el la vero, aŭskultas mian voĉon.* (Johano, 18:33, 36, 37)

## La estonta vivo

2. Per ĉi tiuj paroloj, Jesuo klare aludas *la estontan vivon*, kiun li en ĉiuj cirkonstancoj prezentas kiel la celon, kiun la homaro estas trafonta, kaj kiu devas esti la objekto de la precipaj zorgoj de la homo sur la tero; ĉiuj liaj maksimoj rilatas al tiu granda principo. Sen la estonta vivo, efektive, la plimulto el liaj instruoj pri moralo havus nenian pravon de ekzisto; tial, kiuj ne kredas je l' estonta vivo kaj opinias, ke li nur parolis pri la nuna vivo, tiuj ne komprenas liajn maksimojn aŭ ilin trovas infanecaj.

Tiu dogmo povas do esti konsiderata kiel la akso de l' instruado de la Kristo; tial ĝi estas lokita kiel unu el la unuaj en la kapon de tiu ĉi verko, ĉar ĝi devas esti la cela punkto de ĉiuj homoj; nur ĝi povas pravigi la anomaliojn de la surtera vivo kaj ilin akordigi kun la justeco de Dio.

3. La Judoj havis nur malprecizajn ideojn koncerne la estontan vivon; ili kredis je l' anĝeloj, kiujn ili rigardis kiel privilegiitajn estulojn en la kreitaro, sed ili ne sciis, ke la homoj povos iam fariĝi anĝeloj kaj partopreni en ties feliĉo. Laŭ la Judoj, la obeado al la leĝoj de Dio estus rekompencata per la bonaĵoj de sur la tero, per la superregado de ilia nacio, per venkoj kontraŭ iliaj malamikoj; la popolaj malfeliĉegoj kaj la malvenkoj estus la puno pro la malobeo al la leĝoj. Moseo ne povis pri tio diri multe al malklera popolo el paŝtistoj, kiu devis esti tuŝata antaŭ ĉio per la aferoj de tiu ĉi mondo. Poste Jesuo venis revelacii al ili, ke ekzistas alia mondo, kie la justeco de Dio estas plenumata; tiun mondon li promesas al tiuj, kiuj observas la ordonojn de Dio, kaj tie la bonuloj trovos sian rekompencon; tiu mondo estas lia regno; tie li estas en sia tuta gloro, kaj tien li estis revenonta, kiam li forlasos la teron.

Tamen Jesuo, konformigante sian instruadon al la stato de la homoj de sia epoko, ne opiniis sia devo doni al ili plenan lumon, kiu konfuzus, anstataŭ prilumi ilin, ĉar ili ĝin ne komprenus; li limigis sin je tio, ke li iamaniere prezentis la estontan vivon kiel principon, kiel leĝon de la naturo, kiun neniu povas eviti. Ĉiu kristano do nepre kredas je la estonta vivo; sed la ideo, kiun multaj faras pri ĝi, estas malpreciza, nekompleta kaj, tial, falsa pri pluraj punktoj; por multaj, tio estas nur kredo sen absoluta certeco; el tio venas la duboj kaj eĉ la nekredemo.

Spiritismo venis, por kompletigi pri tiu punkto, kiel pri multaj aliaj, la instruadon de la Kristo, nun, kiam la homoj estas maturaj, por kompreni la veron. Kun Spiritismo, la estonta vivo ne plu estas nur kredinda dogmo, hipotezo; ĝi estas materia realaĵo, pruvita per la faktoj, ĉar la vidatestantoj venas priskribi ĝin en ĉiuj ĝiaj fazoj; tiamaniere, ne nur dubo ne plu estas ebla, sed la plej simpla intelekto povas prezenti ĝin al si sub ĝia vera aspekto, kiel oni prezentas al si landon, pri kiu oni legas detalan priskribon; nu, tiu priskribo de l' estonta vivo estas tiel detala, la kondiĉoj de ekzistado feliĉa aŭ malfeliĉa de tiuj, kiuj tie troviĝas, estas tiel raciaj, ke oni estas devigita konfesi, ke ne povas esti alie, kaj tiel evidentiĝas la vera justeco de Dio.

## La reĝeco de Jesuo

4. Ke la regno de Jesuo ne estas el tiu ĉi mondo, tion ĉiuj komprenas; sed ĉu li ne havas ian reĝecon ankaŭ sur la tero? La titolo reĝo ne ĉiam kuntrenas la praktikadon de materia povo; ĝi estas donata per unuanima konsento al iu, kies genio lin lokas en la unuan rangon de iu ordo da ideoj, kiu mastras sian jarcenton kaj influas en la progreso de la homaro. En tiu senco oni diras: La reĝo aŭ la princo de la filozofoj, de la artistoj, de la poetoj, de la verkistoj, ktp.

Ĉu reĝeco, naskita de persona merito, rekonata de la posteularo, ofte ne estas pli aŭtoritata, multe pli granda ol la reĝeco de iu, kiu portas diademon? Ĝi estas nepereema, dum ĉi tiu lasta estas ludilo de la sorto-ŝanĝoj; ĝi estas ĉiam benata de la estontaj generacioj, dum la alia kelkafoje estas malbenata. La surtera reĝeco finiĝas kun la vivo; la morala reĝeco regas ankoraŭ, kaj precipe, post la morto. Ĉu kun tiu titolo Jesuo ne estas reĝo pli pova ol multaj aliaj potenculoj? Li estis do

prava, kiam li diris al Pilato: "Mi estas reĝo, sed nun mia regno ne estas el tiu ĉi mondo."

## La vidpunktoj

5. La klara kaj preciza ideo, kiun oni faras pri l' estonta vivo, donas neskueblan fidon je l' estonteco, kaj tiu fido havas gravegajn sekvojn por la moraligo de la homoj, tial ke ĝi tute ŝanĝas *la vidpunkton, el kiu la homoj rigardas la surteran vivon.* Por homo, kiu sin lokas per la penso en la spiritan vivon, kiu estas senfina, la enkorpa vivo estas nur trairo, mallonga restado en sendanka lando. La sortoŝanĝoj kaj la ĉagrenoj de la vivo ne estas pli ol interokazaĵoj, kiujn li akceptas kun pacienco, ĉar li scias, ke ili estas mallongedaŭraj kaj devas esti sekvataj de pli feliĉa stato; la morto jam havas nenion timigan; ĝi jam ne estas la pordo al la neniaĵo, sed la pordo al la liberigo, kiu malfermas al la ekzilito la eniron en restadejon de feliĉo kaj paco. Sciante, ke li staras en provizora kaj ne definitiva loko, li akceptas la zorgojn de la vivo kun pli da indiferenteco, kaj el tio venas al lia Spirito trankvileco, kiu mildigas la amarecon de la vivo.

Pro la simpla dubo pri l' estonta vivo, la homo ligas ĉiujn siajn pensojn al la surtera vivo; necerta pri l' estonteco, li ĉion donas al la nuna tempo; ne vidante bonaĵojn pli valorajn, ol tiuj de sur la tero, li estas kvazaŭ infano, kiu nur volas siajn ludilojn; por akiri tiujn bonaĵojn, li ĉion faras; la perdo de la plej malgranda el tiuj bonaĵoj estas al li tre dolora; elreviĝo, neplenumita espero, nekontentigita ambicio, maljustaĵo ricevita, la fiero aŭ la vantemo vundita, estas turmentoj, kiuj faras la vivon ĉiama angoro, *kaj tiel la homo trudas al si mem veran torturadon en ĉiuj momentoj.* Ĉar li prenas sian vidpunkton el la surtera vivo, en kies centro

li estas lokita, ĉio ricevas ĉirkaŭ li vastajn proporciojn; la malbono, kiu lin atingas, same kiel la bono, kiu apartenas al aliaj, ĉio akiras en liaj okuloj grandan gravecon. Al iu, kiu estas interne de urbo, ĉio ŝajnas granda: ne nur la altranguloj, sed ankaŭ la monumentoj; sed se li suriros monton, homoj kaj aĵoj ŝajnos al li tre malgrandaj.

Tiel okazas al tiu, kiu rigardas la surteran vivon el vidpunkto de l' estonta vivo: la homaro, kiel la steloj sur la ĉiela arkaĵo, perdiĝas en la senlima spaco; li ekrimarkas tiam, ke granduloj kaj malgranduloj estas konfuzitaj kvazaŭ formikoj sur terbulo; ke proletarioj kaj potenculoj estas de sama staturo, kaj li kompatas tiujn unutagulojn, kiuj faras tiom da penoj por akiri lokon, kiu ilin altigas tiel malmute kaj kiun ili konservos tiel mallongan tempon. Tiel, la graveco, alligita al la surteraj havaĵoj, estas kontraŭproporcia al la kredo je l' estonta vivo.

6. Se ĉiuj tiel pensus, oni diros, neniu okupus sin plu pri l' aferoj sur la tero, ĉio tie disfalus. Ne; la homo intuice serĉas sian komfortecon kaj kvankam kun la certeco resti nur mallongan tempon en iu loko, li tamen volas tie esti kiel eble plej bone aŭ malplej malbone; neniu persono, trovinte dornon sub sia mano, ĝin ne fortirus, por ne esti pikita. Nu, la deziro je la komforteco devigas la homon plibonigi ĉiujn aferojn, ĉar li estas puŝata de l' instinkto de la progreso kaj de la memkonservado, entenataj en la leĝoj de la naturo. Li laboras do pro bezono, pro inklino kaj pro devo, kaj per tio li plenumas la planojn de la Providenco, kiu lin metis sur la teron por tiu celo. Nur tiu, kiu zorgas pri l' estonteco, alligas al la nuna tempo nur relativan gravecon kaj facile konsoliĝas pri siaj malsukcesoj, pensante pri la destino, kiu lin atendas.

Dio ne kondamnas do la surterajn ĝuojn, sed la trouzon de tiuj ĝuoj je malprofito por la aferoj de l' animo; kontraŭ tiu trouzo estas avertataj tiuj, kiuj aplikas al si mem la parolon de Jesuo*: "Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo".*

Tiu, kiu identiĝas kun la estonta vivo, estas simila al riĉa homo, kiu perdas malgrandan sumon kaj ne maltrankviliĝas pro tio; tiu, kiu ligas ĉiujn siajn pensojn nur al la surtera vivo, estas kiel malriĉulo, kiu perdas ĉiujn siajn havaĵojn kaj falas em malesperon.

7. Spiritismo larĝigas la penson kaj malfermas al ĝi novajn horizontojn; anstataŭ tiu limigita kaj bagatelema vidado, kiu koncentrigas la penson sur la nunan vivon, kiu faras el la momento, pasigata sur la tero, la solan kaj malfortan akson de l' eterna estonteco, Spiritismo montras, ke tiu ĉi vivo estas nur ĉenero de la harmonia kaj grandioza tutaĵo de la verko de la Kreanto; ĝi montras la solidarecon, kiu interligas ĉiujn ekzistadojn de la sama estulo, ĉiujn estulojn de la sama mondo kaj la estulojn de ĉiuj mondoj; tiel ĝi donas bazon kaj pravon de ekzisto al la universala frateco, dum la doktrino pri la kreado de l' animo en la momento de naskiĝo de ĉiu korpo faras ĉiujn estulojn fremdaj unuj al aliaj. Tiu solidareco de la partoj de unu sama tuto klarigas tion, kio estas neklarigebla, se oni konsideras unu solan punkton. Tiun tutaĵon en la tempo de la Kristo la homoj ne povus kompreni, kaj tial li difinis tiun instruon por alia tempo.

INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

## Surtera reĝeco

8. Kiu pli bone ol mi povas kompreni la verecon de ĉi tiuj vortoj de Nia Sinjoro: "Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo?" La malhumileco pereigis min sur la

tero; kiu do komprenus la neniecon de la regnoj en tiu ĉi mondo, se mi tion ne komprenus? Kion mi kunportis el mia surtera reĝeco? Nenion, absolute nenion; kaj kvazaŭ por fari pli terura la lecionon, ĝi ne sekvis min ĝis la tombo! Reĝino mi estis inter la homoj, kiel reĝino mi esperis eniri en la regnon de la ĉieloj. Kia elreviĝo! kia humiligo, kiam, anstataŭ esti ricevita kiel suverenino, mi vidis pli alte ol mi, ja multe pli alte ol mi, homojn, kiujn mi juĝis tre malgrandaj kaj kiujn mi malŝatis, ĉar ili ne havis nobelan sangon! Ho! tiam mi komprenis la senutilecon de la honoroj kaj de la altaj rangoj, kiujn ni serĉas kun tiom da avideco sur la tero!

Por prepari al si lokon en tiu regno, estas necesaj la abnegacio, la humileco, la karito en sia tuta ĉiela praktikado, la bonvolemo por ĉiuj; oni ne demandas vin, kio vi estis, kian rangon vi okupis, sed pri la bono, kiun vi faris, pri la larmoj, kiujn vi forviŝis.

Ho! Jesuo, ci tion diris, cia regno ne estas el tiu ci mondo, ĉar estas necese suferi por alveni al la ĉielo, al kiu la ŝtupoj de trono kondukas neniun; nur la plej penigaj vojetoj de la vivo tien kondukas; serĉu do la vojon tra la rubusujoj kaj la dornoj, kaj ne inter la floroj.

La homoj kuras post la surterajn bonaĵojn, kvazaŭ ili devus konservi ĉi tiujn por ĉiam; sed tie ĉi ne plu estas iluzio; ili baldaŭ konstatas, ke ili kaptis nur ombron, kaj neglektis la solajn bonaĵojn solidajn kaj daŭrajn, la solajn, kiuj utilas al li en la ĉiela restadejo, la solajn, kiuj povas malfermi la ĉielan enirejon.

Kompatu tiujn, kiuj ne gajnis la regnon de la ĉielo; helpu ilin per viaj preĝoj, ĉar la preĝo alproksimigas la homon al la Plejaltulo; ĝi estas la ligilo inter la ĉielo kaj la tero: ne forgesu tion. (*Unu el la Reĝinoj de Francujo.* Le Havre, 1863)

# ĈAPITRO III

## ESTAS MULTE DA LOĜEJOJ EN LA DOMO DE MIA PATRO

Diversaj statoj de l' animo en la vaganteco. Diversaj kategorioj de loĝataj mondoj. Destino de la tero. Kaŭzoj de la surteraj afliktoj. **Instruoj de la Spiritoj:** Malsuperaj mondoj kaj superaj mondoj. Mondoj por kulpelaĉetoj kaj por provoj. Transiĝaj mondoj. Progresado de la mondoj.

1. *Ne maltrankviliĝu via koro; vi kredas al Dio, kredu ankaŭ al mi.* En la domo de mia Patro estas multe da loĝejoj; *se ne tiel estus, mi dirus al vi; mi iras, por pretigi por vi lokon. Kaj se mi iros kaj pretigos por vi lokon,* mi revenos *kaj ricevos vin al mi mem, por ke vi ankaŭ estu tie, kie mi estas.* (Johano 14:1-3.)

### Diversaj statoj de l' animo en la vaganteco

2. La domo de la Patro estas la universo; la diversaj loĝejoj estas la mondoj, kiuj cirkulas en la senfina spaco kaj donas al la enkarniĝintaj Spiritoj loĝejojn respondajn al ilia grado da progreso.

Sendepende de la diverseco de la mondoj, tiuj paroloj povas esti komprenataj ankaŭ pri la feliĉa aŭ malfeliĉa stato de la Spirito en la vaganteco. Laŭ tio, se li estas pli aŭ malpli purigita kaj liberigita de la materiaj ligiloj, la medio, kie li troviĝas, la aspekto de l' aĵoj, la sensacioj, kiujn li spertas, la perceptoj, kiujn li havas,

diversas senlime; dum unuj ne povas malproksimiĝi de la sfero, kie ili vivis, aliaj altiĝas kaj trairas la spacojn kaj la mondojn; dum kulpaj Spiritoj vagadas en mallumo, la feliĉuloj ĝuas brilegantan helecon kaj la subliman spektaklon de la senlima spaco; dum, fine, la malbonulo, turmentata de konsciencriproĉoj kaj de ĉagrenoj, ofte sola, sen konsolo, apartigita de l' objektoj de sia amo, ĝemas sub la ĉirkaŭpremo de la moralaj suferoj, la justulo, en la societo de tiuj, kiujn li amas, ĝuas la dolĉecon de neeldirebla feliĉo. Tiel ankaŭ estas diversaj loĝejoj, kvankam ili ne estas ĉirkaŭlimigitaj nek fikse lokitaj.

## Diversaj kategorioj de loĝataj mondoj

3. El la instruado donata de la Spiritoj rezultas, ke la diversaj mondoj estas en kondiĉoj tre malsimilaj unuj de l' aliaj laŭ la grado da progreso aŭ da malsupereco de siaj loĝantoj. Inter ili estas mondoj, kies loĝantoj estas materie kaj morale malsuperaj, ol tiuj de la tero; aliaj staras en la sama rango, aliaj estas pli aŭ malpli altgrade superaj ol la tero en ĉiuj rilatoj. En la malsuperaj mondoj la ekzistado estas tute materia, la pasioj suverene regas, la morala vivo preskaŭ tute ne ekzistas. Laŭmezure kiel la morala vivo elvolviĝas, la influo de la materio malgrandiĝas en tia maniero, ke en la mondoj plej progresintaj la vivo estas, por tiel diri, tute spirita.

4. En la interaj mondoj estas miksaĵo el bono kaj malbono, al kiuj pli efikas unu aŭ la alia, laŭ la grado da progreso. Kvankam absoluta klasifiko de la diversaj mondoj ne povas esti farata, oni tamen povas, laŭ ilia stato kaj destino, baziĝante sur la plej kontrastaj nuancoj, dividi ilin en ĝenerala maniero jene: la primitivaj mondoj, destinataj al la unuaj enkarniĝoj de la homa animo; la mondoj por kulpelaĉetoj kaj provoj,

kie la malbono regas super la bono; la transiĝaj mondoj, kie la animoj, havantaj ankoraŭ kulpojn por elaĉeti, ĉerpas novajn fortojn, plene ripozante de siaj penoj; la mondoj feliĉaj, kie la bono superas la malbonon; la ĉielaj aŭ diaj mondoj, restadejo de la purigitaj Spiritoj, kie la bono tute plene regas. La tero apartenas al la kategorio de la mondoj por kulpelaĉeto kaj provoj, tial la homo tie estas senĉese turmentata de tiom da afliktoj.

5. La Spiritoj, enkarniĝintaj en iu mondo, ne estas al ĝi alligitaj por ĉiam kaj ne plenumas tie ĉiujn fazojn de la progreso, kiujn ili devas trairi, por veni al la perfekteco. Kiam ili atingis en iu mondo la gradon da progreso, kiun tiu mondo ebligas, ili pasas al mondo pli progresinta kaj tiel plu, ĉiam antaŭen, ĝis ili atingos la staton de puraj Spiritoj. Tiuj mondoj estas restadejoj, en kiuj la Spiritoj trovas la elementojn de progreso proporciajn al ilia propra grado da evoluado. Por ili estas rekompenco pasi al mondo de pli alta ordo, kiel estas puno plilongigi la restadon en mondo malfeliĉa, aŭ esti forpelitaj en mondon ankoraŭ pli malfeliĉan ol tiu, kiun ili estas devigataj forlasi, kiam ili obstinas en la malbono.

## Destino de la tero. Kaŭzoj de la homaj afliktoj

6. Oni miras trovante sur la tero tiom da malico kaj da maldelikataj pasioj, tiom da afliktoj kaj da malsanoj de ĉiuj specoj, kaj el tio oni konkludas, ke la homa genro estas kompatinda. Tiu juĝo devenas de la malvasta vidpunkto, en kiun oni sin metas, kaj kiu donas falsan ideon pri la tutaĵo. Estas necese konsideri, ke sur la tero oni ne vidas la tutan homaron, sed nur tre malgrandan parton de ĝi. Efektive, la homa genro ampleksas ĉiujn estulojn dotitajn per racio, kiuj loĝatigas

la sennombrajn mondojn de l' universo; nu, kio estas la loĝantaro de la tero kompare kun la tuta loĝantaro de tiuj mondoj? Multe malpli ol la loĝantaro de vilaĝeto kompare kun la loĝantaro de tuta granda imperio. La materia kaj morala situacio de la surtera homaro jam nenion havas mirigan, se oni konsideras la destinon de la tero kaj la naturon de ties loĝantoj.

7. Oni havus tre falsan ideon pri la loĝantaro de granda urbo, se oni ĝin juĝus laŭ la loĝantaro de mizeraj kaj malpuraj kvartaloj. En malsanulejo oni vidas nur malsanulojn kaj kriplulojn; en punlaborejo oni vidas ĉiajn hontindaĵojn kaj ĉiajn malvirtojn kunigitajn; en nesalubraj regionoj, la plimulto el la loĝantoj estas palaj, malsanemaj, suferantaj. Nu, oni imagu la teron kvazaŭ antaŭurbon, malsanulejon, malliberejon, nesalubran regionon, ĉar ĝi estas samtempe ĉio tio, kaj oni komprenos, kial la afliktoj estas pli multaj ol la ĝuoj, ĉar oni ne sendas en hospitalon la bonfartantojn, nek en malliberejon tiujn, kiuj ne agis malbone; kaj la malsanulejoj kaj la karceroj ne estas lokoj por plezuro.

Nu, same kiel en urbo la tuta loĝantaro ne troviĝas en hospitaloj aŭ en malliberejoj, tiel la tuta homaro ne vivas sur la tero; kiel oni eliras el la hospitalo, kiam oni estas kuracita, kaj el la malliberejo, kiam oni finas sian puntempon, tiel la homo ŝanĝas la teron je mondoj pli feliĉaj, kiam li estas kuracita de siaj moralaj malsanoj.

### INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

## Malsuperaj mondoj kaj superaj mondoj

8. La klasifikado laŭ mondoj malsuperaj kaj mondoj superaj estas pli relativa ol absoluta; iu mondo estas malsupera aŭ supera kompare kun tiuj, kiuj troviĝas pli alte aŭ malalte ol ĝi en la progresa skalo.

Prenante la teron kiel punkton por komparo, oni povas havi ideon pri la stato de malsupera mondo, supozante ties loĝantojn en la grado de la sovaĝaj rasoj aŭ de la barbaraj nacioj, kiujn oni ankoraŭ trovas sur la tero kaj kiuj estas restaĵoj el ĝia primitiva stato. En la malplej progresintaj mondoj, ili havas la homan formon, sed sen ia beleco; iliajn instinktojn tie ne moderigas iu ajn sento de delikateco aŭ de bonvolemo, nek plej malgranda koncepto pri justeco aŭ maljusteco; tie perforto estas la sola leĝo. Sen industrio, sen inventoj, la loĝantoj pasigas sian vivon perlaborante sian nutraĵon. Tamen Dio ne forlasas iun ajn el Siaj kreitoj; en la fundo de la mallumo de l' intelekto, kuŝas, pli aŭ malpli elvolviĝinta, latenta, la malpreciza intuicio pri iu superega Estulo. Tiu instinkto sufiĉas, por fari ilin superaj unuj ol aliaj kaj por prepari la naskiĝon de vivo pli plena; ĉar ili ne estas degraditaj estuloj, sed kreskantaj infanoj.

Inter tiuj malsuperaj kaj la plej altaj gradoj estas sennombraj ŝtupetoj, kaj en la Spiritoj puraj, senmateriiĝintaj kaj brilegantaj de gloro, oni malfacile povus rekoni tiujn, kiuj animis tiujn primitivajn estulojn, same kiel en la matura homo oni apenaŭ rekonus la embrion.

9. En la mondoj, venintaj al iu supera grado, la vivkondiĉoj materiaj kaj moralaj estas tute aliaj, ol tiuj sur la tero. La formo de la korpo estas ĉiam, ĉie, la homa formo, sed beligita, perfektigita kaj precipe purigita. La korpo havas nenion el la surtera materieco kaj sekve ne estas elmetita al la bezonoj, nek al la malsanoj, nek al la difektiĝoj, kiujn naskas la superregado de la materio; la sentumoj, pli delikataj, havas perceptojn, kiujn sur la tero la maldelikateco de l' organoj sufokas; la specifa malpezeco de la korpo faras la transportiĝon rapida kaj facila; anstataŭ pene sin treni

sur la tero, ĝi glitas, por tiel diri, sur la supraĵo, aŭ ŝvebas en la atmosfero sen alia peno krom sia volo, tiel, kiel oni reprezentas la anĝelojn, aŭ kiel la antikvuloj imagadis la animojn en la Elizeaj Kampoj. La homoj konservas laŭ sia volo la trajtojn de siaj pasintaj migradoj kaj aperas al siaj amikoj tiaj, kiaj ilin konis la amikoj, sed disradiantaj ian dian lumon, transfiguriĝintaj pro l' internaj impresoj, kiuj estas ĉiam superaj. Anstataŭ palaj vizaĝoj, malvigligitaj de suferoj kaj pasioj, la intelekto kaj la vivo radias per tiu brilego, kiun la pentristoj esprimis per la nimbo aŭ la aŭreolo de la sanktuloj. La malmulta rezisto, kiun la materio prezentas al la Spiritoj jam tre progresintaj, faras la elvolviĝon de la korpo rapida kaj la infanaĝon mallonga aŭ preskaŭ nula; la vivado, libera de la zorgoj kaj angoroj, estas proporcie multe pli longa ol sur la tero. Principe, la longeco de la vivo estas proporcia al la grado da progreso de la mondoj. La morto tie tute ne kunportas la abomenindaĵojn de la putriĝo; anstataŭ teruri, ĝi estas konsiderata kiel feliĉa aliformiĝo, ĉar en tiuj mondoj ne ekzistas la dubo pri l' estonteco. Dum la vivo la animo, ne estante enfermita en densa materio, disradias kaj ĝuas klarvivadon, kiu metas ĝin en staton de preskaŭ konstanta libereco kaj permesas al ĝi la liberan transsendon de la penso.

10. En tiuj feliĉaj mondoj, la ĉiam amikajn interrilatojn de la popoloj neniam malserenigas la ambicio submeti sian najbaron, nek la milito, kiu estas ĝia sekvo. Ne ekzistas mastroj, nek sklavoj, nek denaskaj privilegiuloj; nur la morala kaj la intelekta supereco starigas diferencon inter la kondiĉoj kaj donas superregadon. La aŭtoritato esta ĉiam respektata, ĉar ĝi estas donata nur al la merito kaj uzata ĉiam kun justeco. *La homo ne penas altigi sin super la homo, sed super si mem* per sia perfektiĝado. Lia celo estas alveni

al la rango de la puraj Spiritoj, kaj tiu senĉesa deziro ne estas turmento, sed nobla ambicio, kiu igas lin studadi kun fervoro por ilin egali. Ĉiuj delikataj kaj altaj sentoj de la homa naturo tie troviĝas pligrandigitaj kaj purigitaj; la malamo, la malnoblaj ĵaluzoj, la abomena avideco de l' envio tie estas nekonataj; ligilo de amo kaj frateco kunigas ĉiujn homojn; la pli fortaj helpas la pli malfortajn. Ili posedas pli aŭ malpli da havaĵoj, tiom, kiom ili estas akirintaj per sia inteligento, sed neniu suferas mankon de ia bezonaĵo, ĉar neniu tie troviĝas en kulpelaĉeto; unuvorte, malbono tie ne ekzistas.

11. En via mondo, vi bezonas la malbonon por senti la bonon, vi bezonas nokton por admiri la lumon, la malsanon por ŝati la sanon. En tiuj mondoj kontrastoj ne estas necesaj; la eterna lumo, la eterna beleco, la eterna trankvileco de l' animo havigas eternan ĝojon, kiun ne nebuligas la angoroj de la materia vivo, nek la kontakto kun la malbonuloj, kiuj tien ne povas eniri. Jen, kion la homa Spirito pli malfacile komprenas; li estis sprita por pentri la turmentojn de l' infero, sed li neniam povis prezenti al si la ĝojojn de la ĉielo; kial tio? Tial ke, estante malsupera, li spertis nur punojn kaj afliktojn kaj neniel perceptis la ĉielan lumon; li povas do paroli nur pri tio, kion li konas; sed laŭmezure kiel li altiĝas kaj puriĝas, lia horizonto heliĝas, kaj li komprenas la bonon, kiu estas antaŭ li, kiel li komprenis la malbonon, kiu restis post li.

12. Tamen tiuj feliĉaj mondoj ne estas privilegiitaj, ĉar Dio ne estas partiema por iu ajn el Siaj infanoj; Li donas al ĉiuj la samajn rajtojn kaj la samajn rimedojn por tien alveni; Li igas ilin ĉiujn eliri el la sama punkto, Li ne favoras unujn pli ol la aliajn; la unuaj rangoj estas atingeblaj por ĉiuj; tiujn rangojn ili devas konkeri per sia laboro; ili povas tien alveni kiel eble plej frue, aŭ

povas restadi dum centoj da jarcentoj en la malaltaĵoj de la homeco. (*Resumo de l' instruado de ĉiuj superaj Spiritoj.)*

## Mondoj por kulpelaĉeto kaj por provoj

13. Kion mi diru al vi pri mondoj por kulpelaĉeto, krom tio, kion vi jam scias? Ĉar sufiĉas al vi konsideri la teron, sur kiu vi loĝas. La supereco de l' intelekto ĉe granda nombro de ĝiaj loĝantoj montras, ke ĝi ne estas primitiva mondo, destinita al la enkarniĝo de Spiritoj, ĵus elirintaj el la manoj de l' Kreanto. La denaskaj kvalitoj, kiujn ili kunportas, estas pruvo, ke ili jam vivadis kaj ke ili plenumis kelkan progreson; sed ankaŭ multenombraj malvirtoj, al kiuj ili estas inklinaj, estas montro de granda morala malperfekteco; tial Dio metis ilin sur sendankan teron, por ke ili tie elaĉetu siajn kulpojn per peniga laborado kaj per la ĉagrenoj de la vivo, ĝis ili estos meritintaj transiri en mondon pli feliĉan.

14. Tamen, ne ĉiuj Spiritoj, enkarniĝintaj sur la tero, estas tien senditaj por kulpelaĉeto. La rasoj, kiujn vi nomas sovaĝaj, estas Spiritoj, kiuj apenaŭ eliris el la infaneco kaj kiuj estas tie, se tiel diri, en edukado kaj por elvolviĝo per la kontakto kun Spiritoj pli progresintaj. Tuj poste venas la duoncivilizitaj rasoj, konsistantaj el tiuj samaj Spiritoj en progresado. Tiuj estas, en ia maniero, la indiĝenaj rasoj de la tero, kiuj grandiĝis iom post iom dum longaj jarcentaj periodoj; el tiuj rasoj kelkaj povis atingi la intelektan perfektecon de la plej kleraj popoloj.

Ĉe tiuj progresemaj rasoj la Spiritoj en kulpelaĉeto estas ekzotikaj sur la tero, se oni povas tiel diri; ili jam vivadis en aliaj mondoj, el kiuj ili estis elpelitaj sekve de sia obstinado en la malbono kaj tial, ke ili tie

estis kaŭzo de malordo por la bonuloj; ili estas ekzilitaj, por kelka tempo, ĉe Spiritoj malpli progresintaj, kiujn ili havas kiel mision antaŭenigi, ĉar ili kunportis elvolviĝintan intelekton kaj la ĝermon de akiritaj konoj; tial la punataj Spiritoj troviĝas ĉe la plej inteligentaj rasoj; pro sama motivo, por tiuj rasoj la ĉagrenoj de la vivo havas pli da amareco, ĉar en ili estas pli da sentemeco, kaj ili pli suferas ĉagrenojn, ol la primitivaj rasoj, kies moralaj sentoj estas pli obtuzaj.

15. La tero prezentas do unu el la tipoj de mondoj por kulpelaĉeto, kies diverseco estas senlima, sed kiuj havas kiel komunan karakteron servi kiel loko de ekzilo al la Spiritoj ribelemaj kontraŭ la leĝo de Dio. Tie la Spiritoj devas batali samtempe kontraŭ la malvirteco de la homoj kaj kontraŭ la severeco de la naturo, duobla, peniga laboro, kiu kreskigas samtempe la kvalitojn de la koro kaj tiujn de l' intelekto. Tiel Dio, laŭ Sia boneco, faras la punon mem profito por la progresado de la Spirito. (*Sankta Aŭgusteno.* Parizo, 1862.)

## Transiĝaj mondoj

16. Inter la steloj, kiuj trembrilas en la lazura arkaĵo, kiom da mondoj estas, kiel la via, difinitaj de la Sinjoro por kulpelaĉetoj kaj provoj! Sed estas ankaŭ aliaj pli mizeraj kaj aliaj pli bonaj, same kiel estas mondoj provizoraj, kiujn oni povas nomi "transiĝaj". Ĉiu planeda aro, turnmoviĝanta en la spaco ĉirkaŭ komuna fokuso, kuntrenas primitivajn mondojn, mondojn de ekzilo, de transiĝo kaj de feliĉo. Oni jam parolis al vi pri mondoj, kien la ĵus naskita animo estas lokata, kiam, nesciante ankoraŭ pri bono kaj malbono, ĝi povas marŝi al Dio, mastrante sin mem, dank'al sia libera volo; estis dirite al vi pri l' ampleksaj kapabloj, kiujn la animo posedas, por fari la bonon; sed, ho ve! multaj falas, kaj Dio,

ne volante ilin neniigi, permesas al ili iri en tiujn mondojn, kie, tra sinsekvaj reenkarniĝoj, ili puriĝas, sin reformas, kaj de kie ili revenos indaj je la gloro, kiu estas al ili destinata.

17. La transiĝaj mondoj servas por transiro inter la mondoj de kulpelaĉeto kaj la mondoj feliĉaj. La animo, kiu pentas, trovas tie la trankvilon kaj la ripozon kaj kompletigas sian puriĝon. Sendube en tiuj mondoj la homo estas ankoraŭ submetita al leĝoj, kiuj kontrolas la materion; la homaro tie spertas viajn sensaciojn kaj dezirojn, sed ĝi estas liberigita el la senbridaj pasioj, kies sklavoj vi estas; tie la malhumileco ne silentigas la koron, ne plu estas la envio, kiu torturas, ne plu la malamo, kiu sufokas; la vorto "amo" estas skribita sur ĉiuj fruntoj; perfekta justeco regas la sociajn rilatojn; ĉiuj agnoskas Dion kaj penas aliri al Li, plenumante Liajn leĝojn.

Tamen tie ankoraŭ ne ekzistas la perfekta feliĉo, sed nur la aŭroro de la feliĉo. La homo tie estas ankoraŭ karna kaj tial elmetita al sortoŝanĝoj, de kiuj estas liberaj nur la estuloj tute senmateriiĝintaj; li devas ankoraŭ venki provojn, sed tiuj ne havas la akrajn angorojn de la kulpelaĉeto. Kompare kun la tero, tiuj mondoj estas tre feliĉaj, kaj multaj inter vi ĝojus tie restadi, ĉar tio estus la trankvilo post la uragano, la resaniĝado post kruela malsano; tamen la tiea homo, malpli absorbita per la materiaj aferoj, antaŭvidas la estontecon pli bone ol vi; li komprenas, ke la Sinjoro promesas aliajn ĝojojn al tiuj, kiuj fariĝas indaj je ili, kiam la morto denove falĉos iliajn korpojn por la naskiĝo de la vera vivo. Tiam la liberigita animo ŝvebos super ĉiuj horizontoj; ne plu la materiaj kaj maldelikataj sentumoj, sed la sentumoj de ĉiela kaj pura perispirito, enspiranta la emanaĵojn de Dio mem meze de la parfumoj de amo kaj karito, kiuj eliĝas el Lia sino.

18. Sed, ve! en tiuj mondoj la homo estas ankoraŭ erarema, kaj la Spirito de la malbono tie ne tute perdis sian povon. Ne antaŭeniri estas retropaŝi, kaj se la homo ne firme staras sur la vojo de la bono, li povas refali en la mondojn por kulpelaĉeto, kie lin atendas novaj kaj pli teruraj provoj.

Rigardu do tiun lazuran arkaĵon, en la nokto, en la horo de ripozo kaj preĝo, kaj el tiuj sennombraj sferoj, brilantaj super viaj kapoj, demandu vin mem, kiuj kondukas al Dio, kaj preĝu al Li, por ke unu el la transiĝaj mondoj malfermu al vi sian sinon post la kulpelaĉeto sur la tero. (*Sankta Aŭgusteno.* Parizo, 1862.)

## Progresado de la mondoj

19. La progreso estas unu el la leĝoj de la naturo; ĉiuj estaĵoj kaj estuloj, senanimaj aŭ animhavaj, laŭ la boneco de Dio, estas submetitaj al tiu leĝo, ĉar Li volas, ke ĉio grandiĝu kaj prosperu. La detruado mem, kiu ŝajnas al la homoj la fino de ĉio ekzistanta, estas nur rimedo por alveni per transformado al stato pli perfekta, ĉar ĉio mortas por renaskiĝi, kaj nenio perdiĝas en la neniiĝon.

Samtempe kiel la vivantaj estuloj morale progresas, la mondoj, en kiuj ili loĝas, materie progresas. Kiu povus sekvi iun mondon en ĝiaj diversaj fazoj post la momento, kiam aglomeriĝis la unuaj atomoj, kiuj ekformis ĝin, tiu ĝin vidus supreniri skalon senĉese progresantan, sed tra nesenteblaj gradoj ĉe ĉiu generacio, kaj doni al ĝiaj loĝantoj restadejon pli agrablan, laŭmezure kiel la loĝantoj mem antaŭeniras sur la vojo de la progreso. Tiel, paralele marŝas la progreso de la homo, de l' animaloj, liaj helpantoj, de la vegetaĵoj kaj de la loĝejo, ĉar nenio estas senmova en la naturo. Kiel granda kaj inda je la majesteco de la Kreanto

estas tiu ideo! kaj kontraŭe, kiel malgrandioza kaj neinda je Lia potenco estas la ideo, kiu centrigas Lian prizorgadon kaj Lian providencon en la neperceptеblan sableron, kiu esta via tero, kaj limigas la homaron al la nemultaj homoj, kiuj loĝas sur ĝi!

La tero, laŭ tiu leĝo, troviĝis materie kaj morale en stato malsupera ol tiu, en kiu ĝi estas hodiaŭ, kaj atingos en tiu duobla rilato gradon pli altan. Ĝi alvenis al unu el siaj periodoj de transformado, kiam anstataŭ mondo por kulpelaĉeto ĝi fariĝos transiĝa mondo; tiam la homoj sur ĝi estos feliĉaj, ĉar la leĝo de Dio tie regos. (*Sankta Aŭgusteno*. Parizo, 1862)

Ĉapitro IV

## NENIU POVOS VIDI LA REGNON DE DIO, SE LI NE NASKIĜOS DENOVE

Reviviĝo kaj reenkarniĝo. Ligiloj de familio, fortigataj de la reenkarniĝo kaj rompataj de l' unusoleco de l' ekzistado. **Instruoj de la Spiritoj**: Limoj de l' enkarniĝo. Neceso de la enkarniĝo.

1. *Kaj Jesuo, veninte en la regionojn de Cezarea Filipi, demandis siajn disĉiplojn, dirante: Kiu, diras la homoj, ke mi, la Filo de homo, estas? Kaj ili diris: Laŭ iuj: Johano, la Baptisto; laŭ aliaj: Elija, kaj laŭ aliaj: Jeremia, aŭ unu el la profetoj. Li diris al ili: Sed vi, kiu vi diras, ke mi estas? Kaj responde Simon Petro diris: Vi estas la Kristo, la Filo de la vivanta Dio. Kaj Jesuo responde diris al li: Feliĉa vi estas, Simon Bar-Jona; ĉar ne karno kaj sango tion malkaŝis al vi, sed mia Patro, kiu estas en la ĉielo.* (Mateo, 16:13-17)

2. *Kaj la tetrarĥo Herodo aŭdis pri ĉio, kio fariĝis; kaj li embarasiĝis, ĉar iuj diris, ke Johano leviĝis el la mortintoj; kaj aliaj, ke Elija aperis, kaj aliaj, ke unu el la antikvaj profetoj releviĝis. Kaj Herodo diris: Johanon mi senkapigis, sed kiu estas ĉi tiu, pri kiu mi aŭdas tiujn aferojn? Kaj li deziris vidi lin.* (Luko, 9:7-9)

3. (Post la transfiguriĝo). *Kaj liaj disĉiploj demandis lin, dirante: Kial do diras la skribistoj, ke Elija devas veni antaŭe? Kaj li responde diris: Vere Elija venas antaŭe, kaj restarigos ĉion; sed mi diras al vi, ke Elija jam venis,*

*kaj oni ne konis lin, sed faris al li ĉion, kion ili volis. Tiel ankaŭ la filo de la homo estas suferonta sub ili. Tiam la disĉiploj komprenis, ke li parolis al ili pri Johano, la Baptisto.* (Mateo, 17:10-13)

## Reviviĝo kaj reenkarniĝo

4. La reenkarniĝo apartenas al la judaj dogmoj sub la nomo de *reviviĝo*; nur la Sadukeoj, kiuj opiniis, ke ĉio finiĝas ĉe la morto, ne kredis al ĝi. La ideoj de la judoj pri tiu punkto, same kiel pri multaj aliaj, ne estis klare difinitaj, ĉar ili havis nur malprecizajn kaj nekompletajn nociojn pri l' animo kaj ĝia kuniĝo kun la korpo. Ili kredis, ke homo jam vivinta povas reviviĝi, ne komprenante la precizan manieron, kiel tio povas efektiviĝi; ili nomis per la vorto *reviviĝo* tion, kion Spiritismo nomas pli prave *reenkarniĝo*. Efektive, la *reviviĝo* supozigas la revenon de mortinta korpo al la vivo, pri kio la scienco pruvas, ke ĝi estas materiale neebla, precipe tiam, kiam la elementoj de tiu korpo estas jam de longe diserigitaj kaj sorbitaj. La *re-enkarniĝo* estas la reveno de l' animo aŭ Spirito al la enkorpa vivo, sed en alian korpon, estigitan speciale por ĝi, kaj tiu korpo havas nenion komunan kun la iama korpo. La vorto *reviviĝo* povis do esti aplikata al Lazaro, sed ne al Elija, nek al aliaj profetoj. Se laŭ ilia kredo do Johano, la Baptisto, estis Elija, la korpo de Johano ne estis tiu de Elija, ĉar oni estis vidinta Johanon infano, kaj oni konis liajn gepatrojn. Johano povus do estis Elija *reenkarniĝinta*, sed ne *reviviĝinta*.

5. *Estis viro el la Fariseoj, nomata Nikodemo, ĉefo inter la Judoj; tiu venis al li nokte, kaj diris al li: Rabeno, mi scias, ke vi estas instruisto, veninta de Dio; ĉar neniu povas fari tiujn signojn, kiujn vi faras, se Dio ne estas kun li. Jesuo respondis kaj diris al li: Vere, vere, mi diras al vi: Se homo ne estas denove naskita, li ne povas vidi la regnon*

*de Dio. Nikodemo diris al li: Kiel povas homo naskiĝi, kiam li estas maljuna? ĉu li povas eniri denove en la ventron de sia patrino kaj naskiĝi? Jesuo respondis: Vere, vere, mi diras la vi: Se homo ne estas naskita el akvo kaj la Spirito, li ne povas eniri en la regnon de Dio. Tio, kio naskiĝas el la karno, estas karno; kaj tio, kio naskiĝas el la Spirito, estas Spirito. Ne miru, ke mi diris al vi: Vi devas esti denove naskitaj. La vento blovas, kie ĝi volas, kaj ĝian voĉon vi aŭdas, sed vi ne scias, de kie ĝi venas kaj kien ĝi iras; tia estas ĉiu, kiu estas naskita de la Spirito. Nikodemo respondis kaj diris al li: Kiel povas tio fariĝi? Jesuo respondis kaj diris al li: Vi estas instruisto en Izrael, kaj ĉu vi ne scias tion? Vere, vere, mi diras al vi: Kion ni scias, tion ni parolas, kaj kion ni vidis, tion ni atestas; kaj vi homoj ne akceptas nian ateston. Se mi aferojn surterajn diris al vi, kaj vi ne kredas, kiel vi kredos, se mi diros enĉielajn?* (Johano, 3:1-12)

6. La penso, ke Johano, la Baptisto, estis Elija, kaj ke la profetoj povis revivi sur la tero, troviĝas en pluraj lokoj de l' Evangelioj, precipe en tiuj transskribitaj supre (§§ 1, 2, 3). Se tiu kredo estus eraro, Jesuo ne preterlasus kontraŭbatali ĝin, kiel li batalis kontraŭ tiom da aliaj; tute kontraŭe, li aprobis ĝin per sia tuta aŭtoritateco, kaj ĝin starigis kiel principon kaj kiel nepran kondiĉon, kiam li diris: *"Se homo ne estas denove naskita, li ne povas vidi la regnon de Dio*"; kaj li insistis, aldonante: "*Ne miru, ke mi diris al vi: Vi devas esti denove naskitaj*".

7. Tiuj ĉi vortoj: "*Se homo ne estas naskita el akvo kaj Spirito*" estis interpretitaj en la senco de la reformo per la akvo de la bapto; sed la primitiva teksto estis nur: *Ne renaskiĝas el la akvo kaj la Spirito*, dum en iuj tradukoj, kie estis *el la Spirito*, oni anstataŭigis per *el la Sankta Spirito*, kio jam ne estas la sama penso.

Ĉi tiu ĉefa punkto rezultas el la unuaj komentarioj pri la Evangelio, kiel iam estos konstatite sen ia dubo (*).

8. Por kompreni la veran sencon de tiuj vortoj, oni devas atenti la signifon de la termino *akvo*, kiu ne estas tie uzita en sia propra senco.

La konoj de la anktivuloj pri la fizikaj sciencoj estis tre neperfektaj; ili kredis, ke la tero eliĝis el la akvoj, kaj tial ili rigardis la *akvon* kiel la absolutan generantan elementon; tial en Genezo estas legate: "La spirito de Dio ŝvebis super la akvo; estu firmaĵo inter la akvo; kolektiĝu la akvo de sub la ĉielo en unu lokon, kaj aperu la sekaĵo; la akvo aperigu moviĝantaĵojn, vivajn estaĵojn, kaj birdoj ekflugu super la tero, sub la ĉiela firmaĵo."

Laŭ tiu kredo, la akvo fariĝis la simbolo de la materia naturo, same kiel la Spirito estis la simbolo de l' intelekta naturo. Tiuj ĉi vortoj: "Se la homo ne renaskiĝas el la akvo kaj el la Spirito, aŭ en akvo kaj en Spirito", signifas do: "Se la homo ne renaskiĝas kun sia korpo kaj sia animo." Ĝuste en ĉi tiu senco ili estis komprenataj en la komenco.

Cetere tiu interpreto estas pravigata de jenaj vortoj: *Tio, kio naskiĝas el la karno, estas karno; kaj tio, kio naskiĝas el la Spirito, estas Spirito*. Tie ĉi Jesuo faras klaran distingon inter la Spirito kaj la korpo. *Tio, kio naskiĝas el la karno, estas karno*, klare signas, ke *nur* la

---

(*) La traduko de Osterwald estas konforma al la primitiva teksto; ĝi diras **ne renaskiĝas el la akvo kaj el la Spirito**; la traduko de Sacy diras: **el la Sankta-Spirito**; la traduko de Lamennais: **el la Spirito Sankta**. – Noto de Allan Kardec.

La Esperanta traduko, kiun ni tie ĉi uzas por ĉiuj citaĵoj, estas konforma al la primitiva teksto, ĉar ĝi ne diras **Sankta**, sed simple **Spirito**.

Ankaŭ la oficiala traduko de l' Angla Eklezio kaj la nova Brazila Eldono diras nur **Spirito** (Johano, 3:5) – **La Tradukinto**.

korpo originas el la korpo, kaj ke la Spirito estas sendependa de la korpo.

9. *La vento* (*) *blovas, kie ĝi volas; kaj ĝian voĉon vi aŭdas, sed vi ne scias, de kie ĝi venas kaj kien ĝi iras*: oni povus kompreni, ke temas *pri la Spirito de Dio*, kiu donas la vivon al tiu, al kiu Li volas, aŭ pri *l' animo de la homo*; en ĉi tiu lasta senco, "*Vi ne scias, de kie ĝi venas kaj kien ĝi iras*" signifas, ke oni ne scias, kio estis, nek kio estos la Spirito. Se la Spirito, aŭ animo, estus kreita samtempe kun la korpo, oni scius, de kie li venas, ĉar oni konus lian komencon. Kia ajn estas la interpreto, tiu teksto konfirmas la principon de la antaŭekzisto de l' animo kaj, sekve, de la plureco de la ekzistadoj.

10. *Kaj de post la tagoj de Johano, la Baptisto, ĝis nun, la regno de la ĉielo estas perfortata, kaj perfortuloj kaptas ĝin. Ĉar ĉiuj profetoj kaj la leĝo profetis ĝis Johano. Kaj se vi volas tion ricevi,* tiu estis Elija, kiu estis venonta. *Kiu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu.* (Mateo, 11:12-15)

11. Se la principo de la reenkarniĝo, esprimita en la Evangelio laŭ Sankta Johano, povis esti laŭvorte interpretita en senco pure mistika, ne sama okazas pri jena peco el la Evangelio laŭ Sankta Mateo, kiu permesas neniun konfuzon: *tiu estis Elija, kiu estis venonta*; ĉi tie ne estas figuro, nek alegorio: ĝi estas pozitiva aserto.

– "De post la tagoj de Johano, la Baptisto, ĝis nun, la regno de la ĉielo estas perfortata." Kion signifus tiuj paroloj, se Johano, la Baptisto, ankoraŭ vivis en tiu momento? Jesuo klarigas la vortojn, dirante: "Kaj se

---

(*) En la Esperanta traduko estas **vento** anstataŭ "spirito". – **La Tradukinto**.

vi volas tion ricevi, tiu estis Elija, kiu estis venonta." Nu, ĉar Johano ne estis alia ol Elija, tial Jesuo aludas al la tempo, kiam Johano vivis kun la nomo Elija. "Ĝis nun, la regno de la ĉielo estas perfortata", estas ankoraŭ aludo al perforto de la Mosea leĝo, kiu ordonis la ekstermadon de la malfideluloj, por ke la elektita popolo havu la Promesitan Landon, la Paradizon de la Hebreoj, dum, laŭ la nova leĝo, oni gajnas la ĉielon per karito kaj dolĉeco.

Poste li aldonas: *Kiu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu*. Tiuj ĉi paroloj, tiel ofte ripetataj de Jesuo, klare diras, ke ne ĉiuj havis kapablojn, por kompreni iujn veraĵojn.

12. *Reviviĝos Viaj mortintoj, miaj kadavroj releviĝos. Vekiĝu kaj ĝoju vi, kuŝantaj en la tero; ĉar roso sur la kreskaĵoj estas Via roso, kaj la tero elĵetos la mortintojn.* (Jesaja, 26:19)

13. Tiu ĉi peco de la teksto de Jesaja estas ankaŭ tute klara: "Reviviĝos Viaj mortintoj". Se la profeto intencus paroli pri la spirita vivo, se li volus diri, ke tiuj, kiujn oni mortigis, ne estas mortaj kiel Spiritoj, li estus dirinta: *ili vivas ankoraŭ*, kaj ne *ili reviviĝos.* En spirita senco, tiuj vortoj estus malsaĝaj, ĉar ili subkomprenigus interrompon de la vivo de l' animo. En la senco de *morala reformo*, ili estus la neo de l' eternaj punoj, ĉar ili starigas kiel principon, ke ĉiuj *mortintoj reviviĝos.*

14. *Sed homo mortas kaj malaperas; kiam la homo finiĝis, kie li estas? Kiam homo mortas, ĉu li poste povas reviviĝi? Dum la tuta tempo de mia batalado mi atendus, ĝis venos mia forŝanĝo.* (Ijob, 14:10,14.)

15. La principo de la plureco de l' ekzistadoj estas klare esprimita en tiuj vortoj. Oni ne povas supozi, ke Ijob volis paroli pri la rebonigo per la akvo de la bapto,

kiun li certe ne konis. "*Kiam homo mortas, ĉu li poste povas reviviĝi*?" La ideo morti unu fojon kaj reviviĝi kuntrenas la ideon morti kaj reviviĝi plurajn fojojn. La traduko de la greka eklezio estas ankoraŭ pli klara, se tio estas ebla. Ĝi tekstas: "Finante la tagojn de mia *surtera ekzistad*o, mi atendos, ĉar *mi revenos ĉi tien*", tio estas, mi revenos al la surtera ekzistado. Tio estas tiel klara, kiel se iu dirus: "Mi eliras el mia domo, sed mi revenos en ĝin."

"Dum la tuta tempo de mia batalado, mi atendus ĝis venos mia forŝanĝo." Evidente, Ijob volas paroli pri la batalado, kiun li tenas kontraŭ la ĉagrenoj de la vivo; li atendas sian ŝanĝon, tio estas, li rezignacias. En la greka traduko, *mi atendos* ŝajnas prefere aplikiĝi al nova ekzistado: "Kiam mia surtera ekzistado estos finita, mi atendos, ĉar mi revenos al ĝi." Ijob laŭŝajne lokas sin, post sia morto, en la intertempon, kiu apartigas unu ekzistadon de l' alia, kaj diras, ke tie li atendos sian revenon.

16. Ne estas dubo do, ke, sub la nomo *reviviĝo*, la principo de la reenkarniĝo estis unu el la fundamentaj kredoj de la Judoj; ke ĝi estas konfirmita de Jesuo kaj de la profetoj en formala maniero; kaj de tio sekvas, ke nei la reenkarniĝon estas nei la parolojn de la Kristo. Liaj paroloj iam estos la aŭtoritato pri tiu punkto, kiel pri multaj aliaj, kiam oni senpartie pripensos pri ili.

17. Sed al tiu aŭtoritato, el la religia vidpunkto, aldoniĝas, el la filozofia vidpunkto, la aŭtoritato de la pruvoj, rezultantaj el la observado de la faktoj; kiam ekde l' efikoj oni volas supreniri al la kaŭzoj, la reenkarniĝo aperas kiel absoluta neceso, kiel esence propra al la homeco, unuvorte, kiel leĝo de la naturo; ĝi evidentiĝas per siaj rezultatoj kvazaŭ materiale, kiel la kaŝita motoro montriĝas per sia movado; nur ĝi povas diri al la homo,

*de kie li venas, kien li iras, kial li estas sur la tero*, kaj pravigi ĉiajn anomaliojn kaj ĉiajn ŝajnajn maljustaĵojn, kiujn la vivo prezentas [*].

Sen la principo de l' antaŭekzisto de l' animo kaj de la plureco de l' ekzistadoj, la plimulto el la maksimoj de l' Evangelio estas nekomprenebla; tial ili naskis tiom da antagonismaj interpretoj; tiu principo estas la ŝlosilo, kiu ja redonas al la maksimoj ilian veran sencon.

## Ligiloj de familio, fortigataj de la reenkarniĝo kaj rompataj de l' unusoleco de l' ekzistado

18. La ligiloj de familio neniel estas detruataj de la reenkarniĝo, kiel pensas iuj personoj; male, ili estas fortigataj kaj restreĉataj; la kontraŭa principo ilin ja detruas.

La Spiritoj formas en la spaco grupojn aŭ familiojn, interplektitajn per amo, simpatio kaj simileco de inklinoj. Tiuj Spiritoj, feliĉaj esti kune, serĉas unuj aliajn; la enkarniĝo nur momente apartigas ilin, ĉar, reenirinte en la vagantecon, ili denove renkontas unuj aliajn, kiel amikoj, revenintaj post vojaĝo. Ofte ili eĉ akompanas unuj aliajn en sia enkarniĝo, kaj ĉi tie ili kolektiĝas en unu sama familio, aŭ en unu sama rondo, por la celo kune labori por sia reciproka progresado. Se unuj enkarniĝis kaj aliaj ne, ĉiuj tamen estas kunigitaj per la penso; la liberaj zorgas pri la malliberaj; la pli progresintaj klopodas, por progresigi la aliajn. Post ĉiu ekzistado ili ĉiuj faris paŝon sur la vojo de la perfektiĝo; ju malpli alligitaj ili estas al la materio, des pli granda ilia reciproka amo ĝuste tial, ke dank' al ĝia pli granda

---

[*] Por elvolviĝo de la dogma de la reenkarniĝo, vidu "La Libron de la Spiritoj", dua parto, ĉ. IV. kaj V.; "Kio estas Spiritismo" ĉ. II, de Allan Kardec; "La Plurecon de l' Ekzistadoj", de Pezzani.

subtileco tiun amon jam ne konfuzas egoismo nek la nuboj de la pasioj. Tiel ili povas do trapasi senliman nombron da enkorpaj ekzistadoj sen ia ajn rompo de ilia reciproka amo.

Estu bone komprenate, ke ni parolas tie ĉi pri la reala amo, de animo al animo, la sola, kiu postvivas la detruadon de la korpo, ĉar la estuloj, alligitaj sur la tero nur per la sentumoj, havas nenian motivon, por serĉi unu la alian en la mondo de la Spiritoj. Daŭraj estas nur la spiritaj inklinoj; la karnaj inklinoj estingiĝas kun la kaŭzo, kiu ilin naskas; nu, tia kaŭzo ne ekzistas en la mondo la de Spiritoj, sed la animo ekzistas ĉiam. Koncerne la personojn, kuniĝintajn nur por ia intereso, tiuj vere nenio estas unu por la alia; la morto ilin disigas sur la tero kaj en la ĉielo.

19. La alligiteco kaj la korinklino, ekzistantaj inter parencoj, estas signo de l' antaŭa simpatio, kiu alproksimigis ilin; tial oni diras pri persono, kies karaktero, gustoj kaj inklinoj havas nenian similecon kun tiuj de liaj, aŭ ŝiaj, parencoj, ke li, aŭ ŝi, ne apartenas al la familio. Tion dirante, oni esprimas veron pli grandan, ol kiel oni kredas. Dio permesas en la familioj tiujn enkarniĝojn de Spiritoj antipatiaj aŭ fremdaj, por la duobla celo, ke ili servu kiel provo por unuj kaj kiel rimedo de progreso por aliaj. Ĉar la maliculoj iom post iom perfektiĝas en la kontakto kun la bonuloj per la zorgoj, kiujn ili ricevas de ĉi tiuj lastaj; ilia karaktero mildiĝas, iliaj moroj puriĝas, la antipatioj estingiĝas; tiel efektiviĝas la kunfandiĝo de la diversaj kategorioj de Spiritoj, same kiel sur la tero kunfandiĝas la rasoj kaj popoloj.

20. La timo al la senfina grandiĝado de la parencaro, sekve de la reenkarniĝo, havas egoisman fundon; ĝi nur pruvas, ke oni ne sentas amon sufiĉe larĝan, por ampleksi grandan nombron da personoj. Ĉu patro,

kiu havas plurajn infanojn, amas ilin malpli, ol se li havus nur unu? Sed la egoistoj trankviliĝu, tia timo ne havas fundamenton. El la fakto, ke iu homo havis dek enkarniĝojn, ne sekvas, ke li trovos en la mondo de la Spiritoj dek patrojn, dek patrinojn, dek edzinojn, kaj proporcian nombron da infanoj kaj da aliaj parencoj; li tie retrovos ĉiam la samajn objektojn de sia amo, kun kiuj li sur la tero rilatis per ligiloj de malsamaj naturoj aŭ, eble, de la sama naturo.

21. Ni vidu nun la sekvojn de la doktrino kontraŭ la reenkarniĝo. Tiu doktrino nepre nuligas la antaŭekziston de l' animo; ĉar la animoj estus kreataj samtempe kiel la korpo, nenia antaŭa ligilo ekzistus inter ili; ili estus tute fremdaj unuj al la aliaj; la patro estus fremda al sia filo; la parenco ĉe la familioj, sekve de tio, estus limigita nur al la korpa parenceco, sen ia spirita ligilo. Estus do nenia motivo, por ke iu gloru sin, ke li havis kiel prapatrojn eminentajn personojn. Laŭ la reenkarniĝa doktrino, prapatroj kaj posteuloj eble estis konatoj unuj de aliaj, eble vivis kune, amis unuj aliajn, kaj troviĝas kune denove por restreĉigi siajn simpatiajn ligilojn.

22. Tio pri la pasinteco. Pri l' estonteco, laŭ la fundamentaj dogmoj, elfluantaj el la ne-reenkarniĝo, la sorto de l' animoj estas neŝanĝeble fiksita post unu sola ekzistado. La definitiva fiksado de la sorto rezultigas la ĉeson de ĉiu progreso, ĉar, se fariĝas iu ajn progreso, jam ne estas definitiva sorto; laŭ tio, se ili bone aŭ malbone vivis, la animoj iras tuj en la loĝejon de la feliĉuloj aŭ en la eternan inferon; *ili estas do tuj apartigataj por ĉiam kaj sen ia espero iam realproksimiĝi*, kaj tial, patroj, patrinoj kaj infanoj, edzoj kaj edzinoj, fratoj, fratinoj, amikoj, neniam estas certaj revidi unuj aliajn: tio estas la plej absoluta rompo de la ligiloj de familio.

Per la reenkarniĝo kaj la progreso, kiu estas ĝia sekvo, ĉiuj, kiuj sin reciproke amis, retrovos unuj aliajn sur la tero kaj en la spaco, kaj kune gravitos al Dio. Se iuj falis sur la vojon, tiuj malfruigas sian progreson kaj sian feliĉon, sed la espero neniel perdiĝas; helpataj, kuraĝigataj kaj subtenataj de tiuj, kiuj amas ilin, ili iam eliros el la ŝlimejo, en kiun ili falis. Per la reenkarniĝo, fine, ekzistas porĉiama solidareco inter la enkarniĝintoj kaj la elkarniĝintoj, kaj de tiu solidareco venas plistreĉiĝo de l' amligiloj.

23. Resume, kvar alternativoj prezentiĝas al la homo pri lia posttomba estonteco: 1-e, la neniiĝo, laŭ la materialisma doktrino; 2-e, la ensorbiĝo en la universalan tutaĵon, laŭ la panteisma doktrino; 3-e, la individueco kun definitiva fikseco de la sorto, laŭ la doktrino de la Kristanaj Eklezioj; 4-e, la individueco kun senlima progresado, laŭ la spiritisma doktrino. Laŭ la du unuaj, la ligiloj de familio estas rompataj ĉe la morto, kaj al la animoj restas nenia espero retrovi unuj aliajn; laŭ la tria, la animoj havas la eblon de reciproka revido, kondiĉe, ke ili iru en la saman medion, kaj tiu medio povas esti tiel la infero, kiel la paradizo; laŭ la plureco de l' ekzistadoj, kiu estas nedisigebla de l' iom-post-ioma progresado, estas certeco pri la kontinueco de la rilatoj inter homoj, kiuj amis unuj aliajn, kaj ĝuste tio formas la veran familion.

INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

## Limoj de l' enkarniĝo

*24. Kiuj estas la limoj de l' enkarniĝo?*

Por precize paroli, la enkarniĝo ne havas klare difinitajn limojn, se oni konsideras nur la envolvaĵon,

kiu konsistigas la korpon de la Spirito, ĉar la materieco de tiu envolvaĵo maldensiĝas, laŭmezure kiel la Spirito puriĝas. En iuj mondoj, pli progresintaj ol la tero, ĝi estas malpli densa, malpli peza kaj pli delikata, kaj sekve elmetita al malpli da ŝanĝoj; en pli alta grado ĝi estas travidebla kaj preskaŭ fluideca; grado post grado ĝi maldensiĝas kaj fine konfuziĝas kun la perispirito. Laŭ la mondo, kien la Spirito estas vokata vivadi, li prenas envolvaĵon taŭgan pro la naturo de tiu mondo.

La perispirito mem ricevas sinsekvajn transformiĝojn; ĝi fariĝas pli kaj pli etereca ĝis plena puriĝo ĉe perfektaj Spiritoj. Se specialaj mondoj estas difinitaj, kiel stacioj, por tre progresintaj Spiritoj, ĉi tiuj ne estas alligitaj tie, kiel en la malsuperaj mondoj; ilia stato de libereco permesas al ili translokiĝon ĉien, kien vokas ilin la misioj al ili konfiditaj.

Se oni konsideras la enkarniĝon el la materia vidpunkto, tiel kiel ĝi efektiviĝas sur la tero, oni povas diri, ke ĝi estas limigita en la malsuperaj mondoj; dependas do de la Spirito liberiĝi pli aŭ malpli rapide de tiuj malsuperaj mondoj, laborante por sia puriĝo.

Oni devas ankaŭ konsideri, ke en la vaganteco, tio estas, en la intertempo inter du enkorpaj ekzistadoj, la situacio de Spirto rilatas kun la naturo de la mondo, ĉe kiu lin tenas lia grado da progreso. En la vangateco li estas do pli aŭ malpli feliĉa, libera kaj komprenpova, laŭ sia pli aŭ malpli granda senmateriiĝo. (*Sankta Ludoviko*. Parizo, 1859.)

## Neceso de l' enkarniĝo

25. *Ĉu la enkarniĝo estas puno, kaj nur kulpaj Spiritoj estas submetataj al ĝi?*

La paso de la Spiritoj tra la enkorpa vivo estas necesa, por ke ili povu plenumi, per helpo de materia

agado, la planojn, kies plenumon Dio konfidis al ili. Ĝi estas necesa al ili mem, ĉar la aktiveco, al kiu ili estas devigataj, helpas la elvolviĝadon de l' intelekto. Estante suverene justa, Dio donas egalan taskon al ĉiuj Siaj infanoj; tial Li donas al ĉiuj la saman deirpunkton, la saman kapablecon, *la samajn devojn kaj la saman liberecon de agado*; ĉiu privilegio estus prefero, kaj ĉiu prefero estus maljustaĵo. Sed la enkarniĝo estas por ĉiuj Spiritoj nur provizora stato; ĝi estas tasko, kiun Dio trudas al ili ĉe la komenco de ilia vivo, kiel unua provo de l' uzado, kiun ili faros el sia libera volo. Kiuj plenumas tiun taskon kun fervoro, tiuj venkas rapide kaj malpli pene la unuajn gradojn de sia inicado kaj pli frue ĝuas la frukton de siaj klopodoj. Kontraŭe, kiuj faras malbonuzon de la libereco, kiun Dio donas al ili, tiuj malfruigas sian progresadon; kaj laŭ sia obstineco, ili povas senlime bezoni reenkarniĝon; tiam la enkarniĝo estas puno. *(Sankta Ludoviko.* Parizo, 1859.)

26. *Rimarko.* Vulgara komparo pli bone komprenigos tiun diferencon. Lernanto komencas la studon de iu scienco nur post kiam li trapasis la serion de la studkursoj, kiuj tien kondukas. Kia ajn estas la penado, kiun tiuj kursoj postulas, ili estas rimedo por veni al celo, kaj ne puno. La diligenta lernanto mallongigas la vojon kaj trovas sur ĝi malpli da dornoj; alie okazas al tiu, kies neglektemo kaj maldiligenteco devigas lin fari denove iujn klasojn. Ne la laboro de la kurso estas puno, sed la devigo rekomenci la saman laboron.

Tiel okazas al la homo sur la tero. Por la Spirito de la sovaĝulo, kiu apenaŭ troviĝas en la komenco de la spirita vivo, la enkarniĝo estas rimedo por elvolvi lian intelekton; sed por la klera homo, kies morala sento estas larĝe elvolviĝinta kaj kiu estas devigita refari la etapojn de enkorpa vivo plena de angoroj, dum li povus esti jam atinginta la celon, tio estas puno pro la neceso,

en kiu li troviĝas, plilongigi sian restadon en mondoj malsuperaj kaj malfeliĉaj. Kontraŭe, kiu laboras aktive por sia morala progresado, tiu povas, ne nur mallongigi la daŭron de la materia enkarniĝo, sed transpaŝi per unu sola fojo la intergradojn, kiuj apartigas lin de la superaj mondoj.

Ĉu la Spiritoj ne povus enkarniĝi unu solan fojon sur la sama glogo kaj plenumi siajn plurajn ekzistadojn en malsamaj sferoj? Tia opinio estus akceptebla nur, se ĉiuj homoj sur la tero starus ĝuste sur la sama nivelo morala kaj intelekta. La diferencoj inter ili, ekde la sovaĝulo ĝis la civilizita homo, montras, kiujn ŝtupojn ili devas supreniri. Cetere la enkarniĝo devas havi utilan celon; nu, kian utilon havus la nedaŭraj enkarniĝoj de l' infanoj, kiuj mortas en frua aĝo? Ili estus suferintaj sen profito por ili mem kaj por aliaj: Dio, kies leĝoj estas superege saĝaj, faras nenion senutilan. Per la reenkarniĝo sur la sama globo Li volis, ke la samaj Spiritoj, denove en kontakto unuj kun aliaj, trovu la okazon ripari siajn reciprokajn malbonagojn; per iliaj antaŭaj rilatoj, Li cetere volis fondi la ligilojn de familio sur spirita bazo kaj apogi sur natura leĝo la principojn de solidareco, de frateco kaj de egaleco.

ĈAPITRO V

# FELIĈAJ LA AFLIKTITOJ

Justeco de l' afliktoj. Nunaj kaŭzoj de l' afliktoj. Antaŭaj kaŭzoj de l' afliktoj. Forgeso de la pasinteco. Motivoj de rezignacio. Memmortigo kaj frenezeco. **Instruoj de la Spiritoj**: Bone kaj malbone suferi. La malbono kaj ties forigilo. La feliĉo ne estas el tiu ĉi mondo. Perdo de amataj personoj. Antaŭtempaj mortoj. Se li estus bona homo, li estus mortinta. La memvolaj turmentoj. La reala malfeliĉo. La melankolio. Memvolaj provoj. La vera punvesto. Ĉu oni devas meti finon al la provoj de sia proksimulo? Ĉu estas permesate mallongigi la vivon de malsanulo, kiu suferas sen espero de resaniĝo? Memofero de la vivo. Profito el la suferoj por aliulo.

1. *Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron. Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili satiĝos. Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutitaj pro justeco, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo* (Mateo, 5:5, 6, 10).

2. *Feliĉaj estas vi malriĉuloj, ĉar via estas la regno de Dio. Feliĉaj estas vi, kiuj nun malsatas, ĉar vi satiĝos. Feliĉaj estas vi, kiuj nun ploras, ĉar vi ridos.* (Luko, 6:20-21).

*Sed ve al vi riĉuloj! ĉar vi jam ricevis vian konsolon. Ve al vi satigitaj! ĉar vi malsatos. Ve al vi, kiuj nun ridas! ĉar vi malĝojos kaj ploros.* (Luko, 6:24-25).

## Justeco de l' afliktoj

3. La rekompencoj, kiujn Jesuo promesas al la afliktitoj de sur la tero, povas efektiviĝi nur en la estonta

vivo; sen la certeco pri l' estonteco, tiuj maksimoj estus sensencaĵo, eĉ pli ol sensencaĵo, ili estus trompo. Eĉ kun tiu certeco oni malfacile komprenas la utilecon suferi, por esti feliĉa. Oni diras: tio estas, por ekhavi pli da merito; sed oni demandas sin mem, kial do unuj suferas pli ol la aliaj; kial unuj naskiĝas en mizero kaj la aliaj en riĉeco, nenion farinte por pravigi siajn respektivajn poziciojn; kial al unuj nenio sukcesas, dum al aliaj ĉio ŝajnas rideti? Sed tio, kion oni ankorau malpli komprenas, estas vidi la bonaĵojn kaj la malbonaĵojn tiel malegale dividitaj inter la virto kaj la malvirto; vidi virtajn homojn suferi apud malvirtuloj, kiuj prosperas. La fido je l' estonteco povas konsoli kaj havigi paciencon, sed ĝi ne klarigas tiujn anomaliojn, kiuj ŝajnas nei la justecon de Dio.

Aliflanke, se oni akceptas Dion, oni povas koncepti Lin nur kun la ekstrema grado de ĉiuj perfektaĵoj; Li nepre havas tutan povon, tutan bonecon, ĉar sen tio Li ne estus Dio. Se Dio estas superege bona kaj justa, Li ne povas agi kaprice nek partie. *La sortobatoj de la vivo havas do ian kaŭzon, kaj ĉar Dio estas justa, tiu kaŭzo devas ja esti justa.* Jen io, pri kio ĉiu devas bone konvinkiĝi. Dio metis la homojn sur la vojon al tiu kaŭzo per la instruoj de Jesuo, kaj hodiaŭ, ilin juĝante sufiĉe maturaj por ĝin kompreni, Li revelacias ĝin plene per Spiritismo, tio estas, per la *parolo de la Spiritoj.*

## Nunaj kaŭzoj de l' afliktoj

4. La suferoj de la vivo estas de du specoj, aŭ, se oni preferas, el du tre malsamaj fontoj, kiujn oni devas distingi: unuj havas sian kaŭzon en la nuna vivo, la aliaj ekster tiu ĉi vivo.

Serĉante la fonton de la surteraj malbonaĵoj, oni rekonas, ke multaj el ili estas natura sekvo de la karaktero kaj de la konduto de tiuj, kiuj ilin elportas.

Kiom da homoj falas pro sia propra kulpo! Kiom da ili estas viktimoj de sia neantaŭvidemo, de sia fiero kaj de sia ambicio!

Kiom da personoj ruiniĝas pro manko de ordo, de persistemo, pro malbona konduto aŭ tial, ke ili ne sciis limigi siajn dezirojn!

Kiom da edziĝoj malfeliĉaj, ĉar ili estis bazitaj sur ia intereso aŭ vantemo, kaj la koro en ili neniel estis kunkalkulita!

Kiom da malpaciĝoj, kiom da pereigaj kvereloj oni povus eviti kun pli da modereco kaj malpli da ofend-iĝemo!

Kiom da malsanoj, rezultantaj el la malsobreco kaj el ĉiuspecaj ekscesoj!

Kiom da gepatroj estas malfeliĉaj pro siaj infanoj ĉar ties malbonajn inklinojn ili ne kontraŭbatalis en la komenco! Pro malforteco aŭ indiferenteco, ili lasis elvolv-iĝi en la infanoj la ĝermojn de fiero, de egoismo kaj de stulta vantamo, kiuj sekigas la koron: poste, rikoltante, kion ili semis, ili miras kaj ĉagreniĝas pro ties sendankeco kaj manko de respekto.

Ĉiuj, kies koron vundas la suferoj de la vivo, mal-varme demandu sian konsciencon; ili iom post iom iru returne al la fonto de la malbonaĵoj, kiuj ilin turmentas, kaj ili vidu, ĉu plej ofte ili ne povas diri: *Se mi estus farinta, aŭ se mi ne estus farinta, tian aferon, mi ne troviĝus en tia situacio.*

Kiun do la homo respondigu por ĉiuj tiuj afliktoj, krom si mem? Sekve, en multaj okazoj, la homo estas la forĝanto de siaj propraj malfeliĉoj; sed, anstataŭ konfesi tion, li trovas pli simple, malpli humilige por sia vantamo, akuzi la sorton, la Providencon, la malfavoran ŝancon, sian malbonan stelon, dum lia malbona stelo estas lia malzorgemo.

Tiaspecaj malbonaĵoj sen ia dubo rimarkinde kontribuas al la nombro de la suferoj de la vivo; la homo evitos ilin, kiam li penados reformiĝi tiel morale, kiel intelekte.

5. La homa leĝo atingas iujn kulpojn kaj punas ilin; la kondamnito povas do rekoni, ke li suferas la sekvon de tio, kion li faris; sed la leĝo ne atingas kaj ne povas atingi ĉiajn kulpojn; ĝi frapas precipe tiujn kulpojn, kiuj alportas malprofiton al la socio, kaj ne tiujn, kiuj malutilas nur la kulpulojn mem. Sed Dio volas la progreson de ĉiuj kreitoj; tial Li ne lasas senpuna ian deflankiĝon for de la rekta vojo; ne estas unu sola kulpo, eĉ se tre malgrava, unu sola malobeo al Lia leĝo, kiu ne havos neprajn kaj neeviteblajn sekvojn pli aŭ malpli bedaŭrindajn; el tio sekvas, ke en la malgrandaj aferoj, same kiel en la grandaj, la homo estas ĉiam punata pro sia peko. La suferoj, kiuj estas sekvo de la peko, estas admono al li, ke li erare agis; la suferoj donas al li sperton, sentigas al li la diferencon inter bono kaj malbono kaj la bezonon korekti sin, por eviti en la estonteco tion, kio estis por li fonto de ĉagrenoj; sen tio li havus nenian motivon por korekti sin mem. Fidante je la senpuneco, li malfruigus sian progreson kaj sekve sia estontan feliĉon.

Sed la sperto kelkfoje venas iom tro malfrue, kiam la vivo jam estas misuzita kaj malserenigita, kiam la fortoj estas elĉerpitaj kaj la malbonaĵo estas neriparebla. Tiam la homo lamentas, dirante: "Se en la komenco de la vivo mi scius, kion mi scias nun, kiom da eraraj paŝoj mi estus evitinta! *Se mi povus rekomenci,* mi agus tute alie; sed ne plu estas tempo!" Tiel, kiel la mallaborema metiisto diras: "Mi perdis mian tagon", li ankaŭ diras: "Mi perdis mian vivon"; sed, same kiel por la metiisto la suno releviĝos la sekvantan tagon kaj permesos al li kompensi la perditan tempon, por la homo ankaŭ,

post la nokto de la tombo, lumos la suno de nova vivo, en kiu li povos profiti la sperton de la pasinteco kaj siajn bonajn decidojn por la estonteco.

## Antaŭaj kaŭzoj de l' afliktoj

6. Sed, se kelkaj malbonoj, en tiu ĉi vivo, havas kiel kaŭzon la homon mem, ekzistas aliaj, al kiuj, almenaŭ laŭŝajne, li estas tute fremda, kaj kiuj lin frapas kvazaŭ fatale. Tiaj, ekzemple, la perdo de l' amataj estuloj, la malapero de la subtenantoj de familio; tiaj ankaŭ la akcidentoj, kiujn nenia antaŭvidemo povis eviti; ekonomiaj malsukcesoj, kiuj spitas ĉiajn zorgojn de la singardemo; la naturaj plagoj; fine, la denaskaj kriplaĵoj, precipe tiuj, kiuj malebligas al tiom da malfeliĉuloj la rimedojn perlabori sian vivon: misformaĵoj, idioteco, kreteneco, kc.

Tiuj, kiuj naskiĝas en tiaj kondiĉoj certe nenion faris en tiu ĉi vivo por meriti, sen kompenso, la bedaŭrindan sorton, kiun ili ne povis eviti, kiun ili estas senpovaj por ŝanĝi per si mem, kaj kiu metas ilin sub la arbitron de la publika kompato. Kial do estuloj tiel malfeliĉaj, dum ĉe ilia flanko, sub la sama tegmento, en la sama familio, aliaj estas favorataj en ĉiaj manieroj?

Fine, kion diri pri l' infanoj, kiuj mortas en frua aĝo kaj konis de la vivo nur la suferojn? Jen problemoj, kiujn nenia filozofio povis iam solvi, anomalioj, kiujn nenia religio povis pravigi kaj kiuj estus la neo de la Boneco, de la Justeco kaj de la Providenco de Dio, laŭ la hipotezo, ke la animo estus kreita samtempe kun la korpo kaj ke ĝia sorto estus neŝanĝeble fiksita post kelkmomenta restado sur la tero. Kion ili faris, tiuj animoj, kiuj ĵus eliris el la manoj de la Kreanto, por suferi tiom da ĉagrenoj en ĉi tiu mondo kaj meriti en

la estonteco iun rekompencon aŭ punon, se ili ne povis fari bonon, nek malbonon?

Tamen, laŭ la aksiomo, ke *ĉiu efiko havas ian kaŭzon*, tiuj ĉagrenoj estas efikoj, kiuj devas havi ian kaŭzon; kaj se oni akceptas Dion justan, tiu kaŭzo devas do esti justa. Nu, la kaŭzo antaŭiras ĉiam la efikon, kaj se ĝi ne troviĝas en la nuna vivo, ĝi devas esti antaŭa je tiu ĉi vivo, tio estas, aparteni al iu antaŭa ekzistado. Aliflanke, ĉar Dio ne povas puni pro farita bono, nek pro ne farita malbono, se ni estas punataj, ni do faris malbonon; se ni ne faris malbonon en tiu ĉi vivo, ni ĝin faris en alia. Tiun alternativon ne estas eble eviti, kaj la logiko montras, en kiu flanko estas la justeco de Dio.

La homo ne estas do ĉiam punata, aŭ plene punata, en sia nuna ekzistado, sed li neniam sin tiras el la sekvo de siaj kulpoj. La prosperado de malbonulo estas nur momenta, kaj se siajn kulpojn li ne elpagas hodiaŭ, li ja ilin elpagos morgaŭ, dum tiu, kiu suferas, elaĉetas sian pasintecon. La malfeliĉo, kiu, unuavide, ŝajnas nemeritita, havas do sian pravon de ekzisto, kaj kiu suferas, tiu povas ĉiam diri: "Pardonu min, Sinjoro, ĉar mi pekis."

7. La suferoj pro antaŭaj kaŭzoj estas ofte, kiel la suferoj pro nunaj kulpoj, la natura sekvo de eraro farita; tio estas, obeante rigoran justecon, laŭmerite disdonatan, la homo suferas tion, kion li igis aliajn suferi; se li estis malmolkora kaj nehumana, li povos esti siavice traktata severege kaj senkompate; se li estis malhumila, li povos naskiĝi en la plej humiliga kondiĉo; se li estis avara, aŭ egoista, aŭ se li misuzis sian riĉecon, li povos esti senigita je la vivrimedoj; se li estis malbona filo, li povos suferi pro la konduto de siaj infanoj, ktp.

Tiel, per la plureco de l' ekzistadoj kaj per la destino de la tero kiel kulpelaĉeta mondo, estas klarigitaj la

anomalioj, kiujn prezentas la disdivido de la feliĉo kaj de la malfeliĉo inter la bonuloj kaj la malbonuloj sur la tero. Tiu anomalio ŝajnas ekzisti nur tial, ke oni havas sian vidpunkton nur el la nuna vivo; sed, se oni leviĝas per la penso, tiel, ke oni ampleksas tutan serion da ekzistadoj, oni vidas, ke ĉiu ricevas laŭ sia merito, sen elkalkulo de tio, kio estas farata al li en la mondo de la Spiritoj, kaj ke la justeco de Dio neniam estas interrompata.

La homo neniam devas forgesi, ke li troviĝas en malsupera mondo, al kiu li estas tenata nur de siaj malperfektaĵoj. Ĉe ĉiu bato de la sorto, li devas diri al si, ke, se li apartenus al mondo pli progresinta, tio ne okazus al li, kaj ke dependas de li ne plu reveni ĉi tien, se li laboros por sia pliboniĝo.

8. La ĉagrenoj de la vivo povas esti trudataj al Spiritoj obstinaj aŭ treege malkleraj, por ke ili plenscie faru elekton; sed tiuj ĉagrenoj estas libere elektataj kaj akceptataj de la *pentintaj* Spiritoj, kiuj volas ripari la malbonon, kiun ili faris, kaj provi pli bone konduti. Tiel agas iu, kiu, fuŝinte sian taskon, petas rekomenci ĝin, por ne perdi la profiton de sia laboro. Tiuj ĉagrenoj estas do samtempe kulpelaĉeto de la pasinteco, kiun ili punas, kaj provoj por la estonteco, kiun ili preparas. Ni danku Dion, kiu, laŭ Sia Boneco, donas al la homo la eblon ripari siajn erarojn kaj lin ne kondamnas senrimede pro l' unua kulpo.

9. Tamen oni ne devas opinii, ke ĉiu sufero elportata en tiu ĉi mondo estas nepra montro de difinita kulpo; ili ofte estas simplaj provoj, kiujn elektis la Spirito, por fini sian puriĝon kaj plirapidigi sian progreson. Tiel, la kulpelaĉeto estas ĉiam provo, sed la provo ne ĉiam ests kulpelaĉeto; se provoj kaj kulp-

elaĉetoj estas ĉiam signo de ia malsupereco, ĉar kio estas perfekta, tio ne plu bezonas esti elprovata. Iu Spirito povas do esti atinginta difinitan gradon de alteco, sed, dezirante progresi plu, li petas ian mision, ian taskon, en kiu ju pli peniga estos la batalo, des pli granda estos lia rekompenco, se li fine venkos. Tiaj estas precipe tiuj personoj kun nature bonaj instinktoj, nobla animo, superaj denaskaj sentoj, kiuj laŭŝajne nenion malbonan kunportis el sia antaŭa ekzistado kaj kiuj eltenas kun rezignacio tute kristana la plej grandajn dolorojn, petante Dion, ke ili povu suferi senmurmure. Kontraŭe, oni povas konsideri kulpelaĉeto la afliktojn kiuj instigas murmurojn kaj puŝas la homon al ribelo kontraŭ Dio.

La sufero, kiu ne instigas murmurojn, povas sendube esti kulpelaĉeto, sed ĝi montras, ke ĝi estas memvole elektita, kaj ne trudita, kaj pruvas fortan decidon, kio estas signo de progreso.

10. La Spiritoj povas aspiri al la perfekta feliĉo nur tiam, kiam ili estas puraj: ĉiu makulo malpermesas al ili eniri en la feliĉajn mondojn. Tiaj estas la pasaĝeroj de ŝipo atakita de pesto, al kiuj la eniro en urbon estas malpermesata, ĝis ili estos elpurigitaj. En siaj diversaj enkorpaj ekzistadoj la Spiritoj iom post iom liberiĝas de siaj malperfektaĵoj. La provoj de la vivo progresigas, kiam oni bone eltenas ilin; kiel kulpelaĉetoj, ili forviŝas la kulpojn kaj purigas; ili estas medikamento, kiu purigas la vundon kaj resanigas la malsanulon; ju pli grava estas la malsano, des pli energia devas esti la kuracilo. Kiu multe suferas, tiu devas konfesi, ke li havis multon elaĉetotan, kaj ĝoji esti baldaŭ resanigita; dependas de lia rezignacio fari profita tiun suferon, kaj ne perdi ties frukton per murmuroj, ĉar, sen rezignacio, li devus rekomenci.

## Forgeso de la pasinteco

11. Vane oni pretendas, ke la forgeso estas baro, por ke iu profitu sian sperton el antaŭaj ekzistadoj. Se Dio trovis konvene ĵeti vualon sur la pasintecon, tio devas do esti utila. Efektive, la memoro pri la pasinteco estus tre maloportuna; en iuj okazoj ĝi povus treege humiligi nin; aŭ, kontraŭe, ekzalti nian fieron, kaj tial kateni nian liberan volon; en ĉiuj okazoj ĝi nepre malordigus la sociajn interrilatojn.

La Spirito renaskiĝas ofte en la sama medio, kie li jam vivis, kaj troviĝas en interrilato kun la samaj personoj, por kompensi la malbonon, kiun li okaze faris al ili. Se li rekonus en ili la samajn homojn, kiujn li malamis, lia malamo eble revekiĝus; kaj ĉiuokaze li sentus sin humiligita antaŭ tiuj, kiujn li iam ofendis.

Dio donis al ni, por ke ni pliboniĝu, ĝuste tion, kio estas al ni bezona kaj povas al ni sufiĉi: la voĉon de la konscienco kaj niajn instinktajn inklinojn; Li formetis tion, kio povus malutili al ni.

Naskiĝante, la homo kunportas tion, kion li akiris; li naskiĝas tia, kia li faris sin; ĉiu ekzistado estas por li nova deirpunkto; malmulte interesas lin scii, kio li estis antaŭe: se li estas punata, tio pruvas, ke li faris malbonon; liaj nunaj malbonaj inklinoj montras, kion li ankoraŭ korektu en si, kaj sur tion li devas koncentri sian tutan atenton, ĉar el tio, kion li plene korektis, restas nenia postesigno. La bonaj decidoj, kiujn li prenis estas la voĉo de la konscienco, kiu atentigas lin al tio, kio estas bono aŭ malbono, kaj donas al li forton malcedi al la tentoj.

Cetere tiu forgeso fariĝas nur dum la enkorpa vivo. Reenirante en spiritan vivon, la Spirito rericevas la memoron pri sia pasinteco: estas do nur momenta interrompo, same kiel en la vivo okazas dum la dormo, kio

ne malebligas en la morgaŭa tago memori, kion oni faris en la hieraŭa kaj antaŭaj tagoj.

Kaj ne nur post la morto la Spirito reakiras la memoron pri sia pasinteco; oni povas diri, ke li neniam ĝin perdas, ĉar la sperto pruvas, ke eĉ enkarniĝinta, dum la dormo de la korpoj, kiam la Spirito ĝuas kelkan liberecon, li konscias siajn antaŭajn agojn; li scias, kial li suferas kaj ke li juste suferas; la memoro forviŝiĝas nur dum la ekstera vivo, dum la vivo de rilatoj kun la socio. Sed manke de preciza memoro, kiu povus esti al li dolora kaj malhelpi liajn sociajn interrilatojn, li ĉerpas novajn fortojn el tiuj momentoj de libereco de l' animo, se li scias profiti tiujn momentojn.

## Motivoj de rezignacio

12. Per jenaj vortoj: *Feliĉaj la afliktitoj, ĉar ili estos konsolataj,* Jesuo montras samtempe la kompenson, kiu atendas tiujn, kiuj suferas, kaj la rezignacion, kiu igas beni la suferon kiel komencon de resaniĝo.

Tiuj vortoj povas ankaŭ esti tradukataj jene: Vi devas konsideri vin feliĉaj pro la sufero, ĉar viaj doloroj en tiu ĉi mondo estas pago de la ŝuldo de viaj pasintaj kulpoj, kaj tiuj doloroj, se elportataj pacience sur la tero, ŝparas al vi jarcentojn da sufero en la estonta vivo. Vi devas do esti kontentaj, ke Dio malgrandigas vian ŝuldon, permesante al vi kvitiĝi nun, kio certigas al vi trankvilecon en la estonteco.

La homo suferanta estas simila al ŝuldanto, kiu devas pagi grandan sumon kaj al kiu la kreditoro diras: "Se vi pagos ankoraŭ hodiaŭ centonon de via ŝuldo, mi kvitigos vin ankaŭ de la restaĵo, kaj vi estos libera; se vi ne faros tion, mi persekutos vin, ĝis vi estos paginta la lastan kodranton". Ĉu la ŝuldanto ne estus feliĉa suferi ĉiuspecajn bezonojn por liberigi sin, pagante nur centonon

de sia ŝuldo? ĉu anstataŭ plendi pri sia kreditoro, li ne restos al li tre danka?

Tia estas la senco de ĉi tiuj vortoj: Feliĉaj la afliktitoj, ĉar ili estos konsolataj"; ili estas feliĉaj, ĉar ili pagas, kaj post la pago ili estos liberaj. Sed se, tute pagante unuflanke, aliflanke oni faras novan ŝuldon, oni neniam alvenos al liberiĝo. Nu, ĉiu nova kulpo pligrandigas la ŝuldon, ĉar ĉia kulpo kuntrenas nepran, neeviteblan punon; se tio ne estas hodiaŭ, ĝi estos morgaŭ; se ne en la nuna vivo, certe en alia. Inter tiuj kulpoj, estas necese meti en la unuan rangon la malsubmetiĝon al la volo de Dio; do, se en la afliktoj oni murmuras, se oni ilin ne akceptas kun rezignacio kaj kiel ion, kion oni meritas, se oni akuzas Dion pri maljusteco, oni faras novan ŝuldon, kiu perdigas la profiton, kiun oni povus ricevi el la sufero; tial estos necese rekomenci tute same, kiel se al kreditoro, kiu nin turmentas, ni parte pagus, sed al kiu ĉe ĉiu partopago ni denove prunteprenus.

Ĉe sia eniro en la mondon de la Spiritoj, la homo estas ankaŭ kiel laboristo, kiu prezentas sin en la tago de la pago. Al unuj la mastro diros: "Jen la pago por viaj labortagoj"; al aliaj, al la feliĉuloj de sur la tero, al tiuj, kiuj vivis en senfareco, kiuj igis sian feliĉon konsisti en la kontentigoj de sia memamo kaj en la mondaj ĝuoj, li diros: "Nenio estas al vi asignita, ĉar vi jam ricevis via salajron sur la tero. Reiru kaj rekomencu vian taskon."

13. La homo povas mildigi aŭ pligrandigi la amarecon de siaj provoj laŭ la maniero, kiel li rigardas la surteran vivon. Des pli multe li suferas, ju pli longa li vidas la daŭron de la sufero; nu, kiu lokas sin en la vidpunkto de la spirita vivo, tiu ampleksas per unu rigardo la enkorpan vivon; li vidas ĝin kiel punkton en

la senlimo, komprenas ĝian mallongecon kaj rekonas, ke tiu dolora momento tre rapide forpasos; la certeco pri proksima estonteco pli feliĉa lin subtenas kaj kuraĝigas, kaj, anstataŭ plendi, li dankas le ĉielon pri la doloroj, kiuj lin progresigas. Kontraŭe, al tiu, kiu vidas nur la enkorpan vivon, ĉi tiu ŝajnas senfina, kaj la doloro pezas sur li per sia tuta pezo. La rezultato de tiu unua maniero rigardi la vivon estas malpliigi la gravecon de la suferoj ĉimondaj, admoni la homon moderigi siajn dezirojn kaj kontentiĝi per sia pozicio, ne enviante la pozicion de aliaj, malpliakrigi la moralan impreson de la malsukcesoj kaj elreviĝoj, kiujn li trapasas; el ĝi li ĉerpas trankvilon kaj rezignacion utilajn al la sano tiel de la korpo, kiel de l' animo, dum per la envio, la ĵaluzo kaj la ambicio, li memvole kondamnas sin al turmento kaj pliigas la afliktojn kaj la ĉagrenojn de sia mallonga ekzistado.

## Memmortigo kaj frenezeco

14. La trankvilo kaj la rezignacio, ĉerpitaj el la maniero rigardi la surteran vivon kaj el la fido je l' estonteco, donas al la Spirito serenecon, kiu estas la plej bona antaŭgardilo kontraŭ *la frenezeco kaj la memmortigo.* Efektive, la plimulto el la okazoj de frenezeco certe originas el la afekcio naskita de la suferoj, kiujn la homo ne kuraĝas elteni; nu, se, konsiderante la ĉimondajn aferojn tiel, kiel Spiritismo igas rigardi ilin, li ricevas indiferente, eĉ ĝoje, la malsukcesojn kaj la elreviĝojn, kiuj en aliaj cirkonstancoj lin malesperigus, estas evidente, ke tiu forto, kiu lin lokas super la okazantaĵojn, antaŭgardas lian prudenton kontraŭ batoj, kiuj, alie, ĝin afekcius.

15. La samo pri la memmortigo; se oni esceptas tiujn okazojn, kiuj fariĝas ĉe ebrieco aŭ frenezeco kaj

kiujn oni povas nomi senkonsciaj, estas nediskuteble, ke, kiaj ajn estas la apartaj motivoj, ĉiam la kaŭzo estas malkontenteco; nu, kiu havas certecon, ke li estas malfeliĉa nur unu tagon kaj ke bonaj tagoj sekvos, tiu facile akiras paciencon; li malesperas nur, se li ne vidas finon por siaj suferoj. Kio alia efektive estas homa vivo kompare kun la eterno, krom multe malpli ol unu tago? Sed por tiu, kiu ne kredas je l' eterneco, kiu opinias, ke ĉio finiĝas kun la vivo, se lin subpremas ĉagrenoj kaj afliktoj, ĉi tiuj ĉesas nur ĉe la morto; nenion esperante, li trovas tute nature, eĉ tre logike, mallongigi siajn suferojn per memmortigo.

16. La nekredemo, la simpla dubo pri l' estonteco, unuvorte, la materialismaj ideoj, estas la plej grandaj instigantoj al la memmortigo; ili donas la *moralan malkuraĝon.* Kaj kiam scienculoj, apogante sin sur la aŭtoritato de sia scio, penas pruvi al siaj aŭdantoj aŭ legantoj, ke ĉi tiujn nenio atendas post morto, ĉu ili ne kondukas tiujn al la sekvo, ke, se tiuj personoj estas malfeliĉaj, nenio restas pli bona ol memmortigo? Kion ili povus diri por deturni tiujn homojn de tiu sekvo? Kian kompenson ili povas prezenti? Kian esperon ili povas promesi? Nenion alian ol la neniiĝon. De tio oni devas konkludi, ke, se la neniiĝo estas la sola heroa rimedo, la sola perspektivo, pli bone estas fali tuj en ĝin, ol poste, por tiel suferi dum tempo malpli longa.

La disvastiĝado de la materialismaj ideoj estas do veneno, kiu inokulas en grandan nombron da homoj la penson pri la memmortigo, kaj la apostoloj de tiuj ideoj prenas sur sin teruran respondecon. Kun Spiritismo la dubo ne estas akceptebla kaj la aspekto de la vivo ŝanĝiĝas; la kredanto scias, ke la vivo daŭras plu senlime post la tombo, sed en kondiĉoj tute aliaj; de tio venas pacienco kaj rezignacio, kiuj tute nature deturnas

la penson for de la memmortigo; de tio venas, unuvorte, la *morala kuraĝo.*

17. Spiritsmo donas ankoraŭ en ĉi tiu rilato alian rezultaton ankaŭ tre pozitivan kaj eble pli decidigan. Ĝi montras al ni la memmortigintojn venantajn mem raporti pri sia malfeliĉa situacio kaj pruvi, ke neniu senpune malobeas la leĝon de Dio, kiu malpermesas al la homo mallongigi sian vivo. Inter la memmortigintoj estas iuj, kies sufero, kvankam ne eterna, tamen ne estas malpli terura kaj estas tia, ke ĝi pri tiu ago igus pripensi iun ajn, kiu havus la tenton foriri de tiu ĉi mondo, antaŭ ol Dio tion ordonis. Spiritisto havas do por kontraŭpezilo al la penso pri memmortigo plurajn motivojn: la *certecon* pri estonta vivo, en kiu li *scias,* ke li estos des pli feliĉa, ju pli malfeliĉa kaj rezignaciema li estis sur la tero; la *certecon*, ke, mallongigante sian vivon, li venos al rezultato ĝuste kontraŭa al tiu, kiun li esperis; ke li liberigas sin de unu malbono, sed enretiĝas en alia pli malbona, pli longa, pli terura; ke li eraras, se li opinias, mortigante sin, iri pli frue en la ĉielon; ke la memmortigo estas malhelpo al tio, ke li kuniĝu en la alia mondo kun la objektoj de sia amo, kiujn li esperis tie retrovi; de ĉio tio venas la sekvo, ke la memmortigo, donante al li nur disreviĝojn, estas kontraŭa al liaj propraj interesoj. Tial la nombro da memmortigoj malebligataj de Spiritismo estas tre granda, kaj el tio oni povas konkludi, ke, kiam ĉiuj estos spiritistoj, ne plu okazos konsciaj memmortigoj. Komparante do la rezultatojn de la doktrinoj materialisma kaj spiritisma el la sola vidpunkto de la memmortigo, oni konstatas, ke la logiko de unu kondukas al la memmortigo, dum la logiko de l' alia deklinas de ĝi, kaj tion la sperto konfirmas.

## INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

### Bone kaj malbone suferi

18. Kiam la Kristo diris: "Feliĉaj la afliktitoj, la regno de la ĉielo apartenas al ili", li ne aludis tiujn, kiuj suferas ĝenerale, ĉar ĉiuj, kiuj estas en tiu ĉi mondo, suferas, ĉu sur trono aŭ sur pajlo; sed, ve! malmultaj bone suferas; malmultaj komprenas, ke nur la provoj bone eltenitaj povas konduki ilin al la regno de Dio. La senkuraĝiĝo estas kulpo; Dio rifuzas al vi konsolojn, se al vi mankas kuraĝo. La preĝo estas subteno por la animo, sed ĝi ne sufiĉas: estas necese, ke ĝi estu apogita sur vivanta fido al la boneco de Dio. Ofte estis dirite al vi, ke Li ne metas pezan ŝarĝon sur malfortajn ŝultrojn; sed la ŝarĝo estas proporcia al la fortoj, same kiel la rekompenco estos proporcia al la rezignacio kaj al la kuraĝo; la rekompenco estos pli bela, ol kiel la aflikto estas dolora; sed estas necese meriti tiun rekompencon, kaj ĝuste pro tio la vivo estas plena de ĉagrenoj.

La militisto, ne sendita al la batalo, ne estas kontenta, ĉar la ripozo sur la kamparo ne donas al li okazojn por avanco; estu do kiel la militisto, kaj ne deziru ripozon, kiu farus senenergia vian korpon kaj malvigla vian animon. Ĝoju, kiam Dio sendos vin en la batalon. Tiu batalo ne estas la fajro de la milito, sed la amaraĵoj de la vivo, dum kies daŭro kelkfoje estas necesa pli da kuraĝo ol en sangsoifa milito, ĉar iu, kiu firme staras antaŭ malamiko en milito, ne malofte fleksiĝas sub la premo de morala doloro. La homo ne ricevas rekompencon por tiu speco de kuraĝo, sed Dio rezervas al li kronojn kaj gloran lokon. Kiam vin alsaltos motivo de doloro aŭ de ĉagrenoj, klopodu por superi ĝin, kaj kiam vi estos sukcesintaj mastri la impetojn de la malpacienco, de la

kolero aŭ de la malespero, diru kun prava kontenteco: "Mi estis la pli forta."

*Feliĉaj la afliktitoj* povas do esti komprenata jene: Feliĉaj tiuj, kiuj havas la okazon pruvi sian fidon, sian persistemon kaj sian submetiĝon al la volo de Dio, ĉar ili havos la centoblon de la ĝojo, kiu al ili mankas sur la tero, kaj post la laboro venos la ripozo. (*Lacordaire.* Le Havre, 1863.)

### La malbono kaj ties forigilo

19. Ĉu via tero estas ia loko de ĝojo, ia paradizo de ĝuoj? Ĉu la voĉo de la profeto jam ne resonas en viaj oreloj? Ĉu li ne avertis, ke estos ploroj kaj grincado de dentoj por tiuj, kiuj naskiĝos en tiu ĉi valo de plorado? Vi, kiuj venas tie vivadi, atendu bruligantajn larmojn kaj amarajn dolorojn, kaj ju pli akraj kaj profundaj estas viaj doloroj, des pli rigardu la ĉielon kaj benu la Sinjoron, tial ke Li volis elprovi vin!... Homoj! ĉu vi konos la potencon de via Mastro nur tiam, kiam Li resanigos la vundojn de via korpo kaj kronos viajn tagojn per feliĉo kaj ĝojo? Ĉu vi do rekonos Lian amon nur tiam, kiam Li ornamos vian korpon per ĉiuj gloroj kaj redonos al ĝi brilon kaj blankecon? Imitu tiun, kiu estis donita al vi kiel ekzemplo; alveninte al la lasta ŝtupo de la malŝato kaj de la mizero, li kuŝas sur sterko kaj diras al Dio: "Sinjoro! mi konis ĉiujn plezurojn de la riĉeco, kaj Vi reduktis min al la plej profunda mizero; dankon, dankon, mia Dio, ke Vi volis elprovi Vian servanton!" Ĝis kiam viaj rigardoj haltos ĉe la horizontoj strekitaj de la morto? Kiam via animo decidos fine salti trans la limojn de la tombo? Sed eĉ se vi devus plori kaj suferi dum tuta vivo, kio estus tio kompare kun la eterneco de gloro, destinita al tiu, kiu eltenis la provon kun fido, amo kaj rezignacio? Serĉu do konsolojn por viaj malfeliĉoj en la estonteco, kiun Dio

preparas al vi, kaj la kaŭzon de viaj malfeliĉoj en via pasinteco; kaj vi, kiuj plej suferas, konsideru vin la feliĉuloj de sur la tero.

En la stato de elkarniĝintoj, kiam vi ŝvebis en la spaco, vi elektis vian provon, ĉar vi kredis vin sufiĉe fortaj por ĝin elteni; kial murmuri nun? Vi, kiuj petis riĉecon kaj gloron, vi volis lukti kontraŭ la tento kaj ĝin venki. Vi, kiuj petis batali per la Spirito kaj la korpo kontraŭ la malbono morala kaj fizika, vi sciis, ke ju pli kruda estos la provo, des pli glora estos la venko, kaj ke, se vi venkos, eĉ se via karno devos esti ĵetita sur sterkon, el ĝi elflugos ĉe la morto animo kun luma blankeco, repurigita per la bapto de kulpelaĉeto kaj de sufero.

Kian kuracilon do preskribi al tiuj, trafitaj de kruelaj obsedoj kaj de akraj malfeliĉaĵoj? Nur unu estas efika, nome la fido, la peto al la ĉielo pri helpo. Jes, ĉe l' atako de viaj plej kruelaj suferoj, via voĉo kantu al la Sinjoro, kaj la anĝelo, apud la kapo de via lito, per sia mano montros al vi la signon de la savo kaj la lokon, kiun vi iam okupos... La fido estas la rimedo certa kontraŭ la sufero; ĝi montras ĉiam la horizontojn de la senlimo, antaŭ kiuj la kelkaj tagoj mallumaj de la nuna tempo forviŝiĝas. Ne demandu do nin, kiun kuracilon estas necese uzi kontraŭ tia ulcero aŭ tia vundo, kontraŭ tia tento aŭ tia provo; memoru, ke tiu, kiu kredas, estas forta per rimedo de la fido, kaj ke tiu, kiu dum unu sekundo dubas pri ĝia efikeco, estas tuj punata, ĉar en la sama momento li sentas la korŝirajn angorojn de l' aflikto.

La Sinjoro markis per Sia sigelilo ĉiujn, kiuj kredas al Li. La Kristo diris al vi, ke per la fido oni translokas montojn, kaj mi diras al vi, ke tiu, kiu suferas kaj havas la fidon por subtenilo, estos metata sub ĝian protekton kaj ne plu suferos; la momentoj de la plej fortaj doloroj

estos por li la unuaj notoj de ĝojo de l' eterneco. Lia animo tiel malligiĝos de la korpo, ke, dum tiu ĉi tordiĝos pro konvulsioj, ĝi ŝvebos en la ĉielaj regionoj, kantante kun la anĝeloj himnojn de danko kaj gloro al la Sinjoro.

Feliĉaj tiuj, kiuj suferas kaj ploras! iliaj animoj estu en ĝojo, ĉar Dio verŝos sur ilin abundon da favoroj. (*Sankta Aŭgusteno,* Parizo, 1863.)

### La feliĉo ne estas el tiu ĉi mondo

20. Mi ne estas feliĉa! La feliĉo ne estas farita por mi! ĝenerale ekkrias la homo en ĉiuj sociaj pozicioj. Tio, miaj karaj filoj, pruvas pli bone, ol ĉiuj eblaj rezonadoj, la verecon de jena maksimo de La Predikanto: "La feliĉo ne estas el tiu ĉi mondo." Efektive, nek la riĉeco, nek la povo, eĉ ne la floranta juneco, estas esencaj kondiĉoj de la feliĉo; mi diras plie: eĉ ne la kuniĝo de tiuj tri kondiĉoj tiel sopirataj, ĉar oni senĉese aŭdas, ĉe la plej privilegiaj klasoj, personojn de ĉiuj aĝoj, kiuj amare plendas pri sia situacio.

Ĉe tiu konstato, estas nekompreneble, ke la laborantaj kaj pene vivantaj klasoj envias tiel avide la pozicion de tiuj, kiuj ŝajnas favoritaj de la riĉeco. En tiu ĉi mondo, kiom ajn oni klopodas, ĉiu havas sian apartan kvanton da laboro kaj da mizero, siajn suferojn kaj elreviĝojn, kiel lotaĵon. De tio estas facile veni al la konkludo, ke la tero estas loko de provoj kaj de kulpelaĉetoj.

Tiel do, kiuj predikas, ke la tero estas la sola loĝejo de la homo kaj ke nur tie, kaj en unu sola ekzistado, estas al li permesite atingi la plej altan gradon de ĉiuj feliĉoj, kiujn lia naturo ebligas, tiuj eraras kaj erarigas siajn aŭskultantojn, ĉar estas pruvite per miljara observado, ke tiu ĉi globo nur escepte prezentas la kondiĉojn necesajn al la plena feliĉo de l' individuo.

Kiel ĝeneralan tezon oni povas aserti, ke la feliĉo estas utopio, al kies persekutado la generacioj unu post alia sin ĵetas, neniam sukcesante ĝin atingi; ĉar, se homo saĝa estas maloftaĵo en tiu ĉi mondo, homo absolute feliĉa ne estas pli ofta ol saĝulo.

Tio, en kio konsistas la feliĉo sur la tero, estas afero tiel mallongedaŭra por la homo, kiu ne estas gvidata de la saĝeco, ke por unu jaro, unu monato, unu semajno da plena kontenteco, la tuta resto de l' ekzistado estas sinsekvo da amaraĵoj kaj elreviĝoj; kaj rimarku, miaj karaj filoj, ke mi parolas tie ĉi pri la feliĉuloj de sur la tero, pri tiuj enviataj de la popolamasoj.

Sekve, se la surtera restadejo estas difinita por la provoj kaj kulpelaĉetoj, estas necese akcepti, ke aliloke ekzistas loĝejoj pli favoritaj, kie la Spirito de la homo, kvankam ankoraŭ katenita al materia karno, tamen plene spertas la ĝuojn proprajn al la homa vivo. Jen, kial Dio semis en via kosma turnamaso tiujn belajn superajn planedojn, al kiuj viaj klopodoj kaj viaj inklinoj iam gravitigos vin, kiam vi estos sufiĉe purigitaj kaj perfektigitaj.

Tamen ne deduktu el miaj vortoj, ke al la tero estas destinite esti por ĉiam malliberejo; certe ne! ĉar el la efektiviĝintaj progresoj vi povas facile dedukti la estontajn progresojn, kaj el la sociaj pliboniĝoj akiritaj vi povas antaŭvidi novajn kaj pli fruktodonajn pliboniĝojn. Tia estas la grandega tasko, kiun devas plenumi la nova doktrino, revelaciita al vi de la Spiritoj.

Tiel do, miaj karaj filoj, sankta konkuremo vin kuraĝigu, kaj ĉiu el vi energie seniĝu je la malnova homo. Vi ĉiuj devas dediĉi vin al la disvastigo de tiu Spiritismo, kiu jam komencas vian rebonigon mem. Estas via devo igi viajn fratojn partopreni en la radioj de la sankta lumo. Al la laboro do, miaj tre karaj filoj! En

tiu solena kuniĝo, ĉiuj viaj koroj aspiru tiun grandiozan celon, prepari por la estontaj generacioj mondon, kie la feliĉo ne estos plu vana vorto. (*Francisko-Nikolao-Magdalena,* kardinalo *Marlot*, Parizo, 1863.)

## Perdo de amataj personoj. Antaŭtempaj mortoj.

21. Kiam la morto venas falĉi en viaj familioj, forprenante sen ia konsidero la junulojn antaŭ ol la maljunulojn, vi ofte diras: Dio ne estas justa, ĉar Li estingas la vivon al tiu, kiu estas forta kaj havus brilan estontecon, sed konservas tiujn, kiuj jam vivadis longajn jarojn plenajn de elreviĝoj; ĉar Li forportas tiujn, kiuj estas utilaj, kaj lasas tiujn, kiuj jam taŭgas por nenio; ĉar Li disŝiras la koron de patrino, senigante ŝin je senkulpa estulo, kiu estis ŝia tuta ĝojo.

Homoj, en ĉi tiu rilato vi devas leviĝi pli alten ol la surtera vivo, por kompreni, ke ofte la bono estas tie, kie vi kredas, ke vi vidas la malbonon, la saĝa antaŭvidemo tie, kie vi kredas, ke vi vidas la blindan fatalecon de la destino. Kial mezuri la dian justecon laŭ la via? Ĉu vi povas pensi, ke la Mastro de la mondoj volus, el simpla kaprico, trudi al vi kruelajn dolorojn? Nenio fariĝas sen ia inteligenta celo, kaj, kio ajn okazas, ĉio havas sian pravon de ekzisto. Se vi pli bone ekzamenus ĉiujn dolorojn, kiuj vin frapas, vi trovus ĉiam la dian pravecon, la rebonigan kaŭzon, kaj viaj mizeraj interesoj estus flanka afero, kiun vi forĵetus sur la lastan planon.

Kredu al mi, la morto estas preferinda, post dudekjara enkarniĝo, ol tiuj hontindaj diboĉaj ekscesoj, kiuj vundas honorindajn familiojn, rompas la koron de patrino kaj blankigas antaŭtempe la harojn al la gepatroj. La frua morto estas ofte granda bono, konsentita de Dio al tiu, kiu foriras, kaj kiu tiel liberiĝas de la ĉagrenoj

de la vivo, aŭ de la delogoj, kiuj eble lin trenus al la pereo. Kiu mortas en floranta aĝo, tiu neniel estas viktimo de la fatalo; tio okazas, ĉar Dio pensas, ke ne bone estas, ke tiu homo restu plu sur la tero.

Estas terura malfeliĉo, vi diras, ke vivo tiel plena de esperoj estas tiel frue rompita! Pri kiaj esperoj vi volas paroli? ĉu pri l' esperoj de sur la tero, ke tiu, kiu foriras, povus brili, trabati al si vojon kaj riĉiĝi? Ĉiam tiu mallarĝa vido, nekapabla altiĝi super la materio! Ĉu vi scias, kia estus la sorto de tiu vivo tiel plena de esperoj laŭ via opinio? Kiu diras al vi, ke ĝi ne estus superŝutita per amaraĵoj? Ĉu vi kalkulas do kiel nenion la esperojn je l' estonta vivo, kaj preferas la esperojn je la nedaŭra vivo, kiun vi trenas sur la tero? Ĉu vi opinias do pli valora ian rangon ĉe la homoj ol ĉe la feliĉaj Spiritoj?

Ĝoju, anstataŭ lamenti, kiam plaĉas al Dio repreni unu el Siaj infanoj el tiu valo de plorado. Ĉu ne estas egoismo deziri, ke li tie restu por suferi kun vi? Ho! tiun doloron oni komprenas ĉe tiu, kiu ne havas fidon kaj kiu vidas en la morto eternan apartiĝon; sed vi, spiritistoj, vi scias, ke la animo pli bone vivas senigita je sia korpa envolvaĵo; patrinoj, vi scias, ke viaj tre amataj infanoj estas apud vi; jes, ili troviĝas tute proksime de vi; iliaj fluidecaj korpoj ĉirkaŭas vin, iliaj pensoj vin protektas, via memoro pri ili ĝojigas ilin; sed ankaŭ viaj malpravaj doloroj afliktas ilin, ĉar tiuj doloroj montras mankon de fido ĉe vi kaj estas ribelo kontraŭ la volo de Dio.

Vi, kiuj komprenas la spiritan vivon, aŭskultu la batojn de via koro, vokanta viajn amatojn, kaj se vi preĝos al Dio, ke Li benu ilin, vi sentos tiun konsolon, kiu sekigas la larmojn, tiujn grandajn aspirojn, kiuj montros al vi la estontecon, promesitan de la suverena

Mastro. (*Sanson,* eksmembro de la Spiritisma Societo de Parizo, 1863.)

**Se li estus bona homo, li estus mortinta.**

22. Vi ofte diras, parolante pri malbona homo, kiu saviĝas de danĝero: *"Se li estus bona homo, li estus mortinta."* Nu, dirante tion, vi esprimas veraĵon, ĉar ofte okazas, ke Dio donas pli longan provon al Spirito, apenaŭ komencinta progresi, ol al bonulo, kiu ricevas, kiel rekompencon por sia merito, la gracon, ke lia provo estu kiel eble malplej longa. Tamen, kiam vi uzas tiun aksiomon, vi tute ne suspektas, ke vi diras blasfemon.

Se mortas bona homo, kies najbaro estas malbonulo, vi rapidas diri: *"Estus pli bone, se estus tiu alia."* Vi estas en granda eraro, ĉar tiu, kiu foriras, finis sian taskon, kaj tiu, kiu restas, eble eĉ ne komencis la sian. Kial vi volus do, ke la malbonulo ne havu la tempon fari sian taskon, kaj ke la alia restu alligita al la tero? Kion vi dirus pri malliberulo, kiu estus fininta sian puntempon kaj kiun oni restigus plu en la karcero, dum oni donus liberecon al iu, kiu ne rajtus ricevi ĝin? Sciu do, ke por la Spirito la vera libereco rezultas el la rompo de la ligiloj de la korpo, kaj ke, dum vi estas sur la tero, vi troviĝas en sklaveco.

Alkutimiĝu ne mallaŭdi tion, kion vi ne povas kompreni, kaj kredu, ke Dio estas justa en ĉiuj aferoj; ofte tio, kio ŝajnas al vi malbono, estas bono; sed viaj kapabloj estas tiel limigitaj, ke la pleneco de la granda tutaĵo elglitas el viaj malakraj sentumoj. Penu eliri per la penso el via mallarĝa sfero, kaj laŭmezure kiel vi leviĝos, la graveco de la materia vivo malgrandiĝos antaŭ viaj okuloj, ĉar tiu vivo aperos al vi nur kiel okazeto en la senfina daŭrado de via spirita ekzistado, la sola vera ekzistado. (*Fénelon.* Sens, 1861.)

## La memvolaj turmentoj

23. La homo senĉese kuradas post la feliĉon, kiu ankaŭ senĉese forflugas de li, ĉar senmiksa feliĉo ne ekzistas sur la tero. Tame, malgraŭ la sortoŝanĝoj, kiuj formas la neeviteblan akompanantaron de tiu ĉi vivo, li povas almenau ĝui relativan feliĉon, sed li serĉas ĝin en la pereemaj aferoj, ĉiuj ŝanĝemaj, tio estas, en la materiaj ĝuoj, anstataŭ serĉi en la ĝuoj de l' animo, kiuj estas antaŭgustumado de la nepereemaj ĉielaj ĝuoj; anstataŭ serĉi la *pacon de la koro,* solan realan feliĉon sur la tero, li avidas ĉion, kio povas lin agiti kaj konfuzi; kaj, stranga afero, ŝajnas, ke li intence kreas al si turmentojn, kiujn li devus nur eviti.

Ĉu ekzistas pli grandaj turmentoj ol tiuj, kiujn kaŭzas la envio kaj la ĵaluzo? Por la enviema kaj la ĵaluzema neniam estas ripozo: ili estas ĉiam en febro; tio, kion ili ne havas, sed kion la aliaj posedas, kaŭzas al ili sendormemon; la sukcesoj de iliaj konkurantoj donas al ili kapturniĝon; ilia konkurado celas ĉiam nur eklipsi iliajn ĉirkaŭantojn; ilia tuta ĝojo estas nur instigi en aliaj malsaĝuloj, kiel ili, la rabion de la ĵaluzo, kiu posedas ilin mem. Kompatindaj malsaĝuloj, efektive, kiuj ne pensas, ke eble morgaŭ ili devos forlasi ĉiujn tiujn amuzilojn, kies avidemo venenas ilian vivon! Ne al ili aplikiĝas jenaj vortoj: "Feliĉaj la afliktitoj, ĉar ili estos konsolataj", ĉar la zorgoj de la ĵaluza kaj enviema homo ne estas el tiuj, kiuj havas kompenson en la ĉielo.

Kiom da turmentoj, kontraŭe, ŝparas al si la homo, kiu scias kontentiĝi per sia havo, kiu vidas sen envio, kion li ne havas, kiu ne penas ŝajni pli, ol li estas! Li estas ĉiam riĉa, ĉar se li rigardas malsupren, anstataŭ rigardi supren, li vidas ĉiam personojn, kiuj posedas ankoraŭ malpli ol li; li estas kvieta, ĉar li ne kreas al

si ĥimerajn bezonojn, kaj ĉu la kvieteco meze de l' uragano de la vivo ne estas ja feliĉo? (*Fénelon.* Lyon, 1860.)

### La reala malfeliĉo

24. Ĉiuj parolas pri malfeliĉo, ĉiuj ĝin sentas kaj pensas, ke ili konas ĝian multforman karakteron. Mi venas diri al vi, ke preskaŭ ĉiuj eraras kaj ke la reala malfeliĉo neniel estas tio, kion la homoj, aŭ pli bone, la malfeliĉuloj, supozas. Ili vidas ĝin en la mizero, en la senfajra kameno, en la minacanta kreditoro, en lulilo forlasita de la ridetanta anĝelo, en la larmoj, en la ĉerko, kiun oni sekvas kun senĉapela kapo kaj rompita koro, en la angoro de la perfido, en la nudigo de la fiero, kiu volis envolvi sin en purpuro kaj kiu apenaŭ kaŝas sian nudecon sub la ĉifonoj de la vantamo; ĉiuj tiuj kaj ankoraŭ multaj aliaj aferoj estas nomataj malfeliĉo en la homa lingvo. Jes, tio estas malfeliĉo por tiuj, kiuj vidas nur la nuntempon; sed la vera malfeliĉo troviĝas en la sekvoj de iu afero, pli ĝuste ol en la afero mem. Diru al mi, ĉu iu okazaĵo, kiun oni opinias feliĉa en la momento de ĝia fariĝo, sed kiu havas pereigajn sekvojn, ne estas ja pli malfeliĉa ol iu alia, kiu komence kaŭzas grandan ĉagrenon, sed kiu fine portas la bonon. Diru al mi, ĉu uragano, kiu rompas viajn arbojn, sed purigas la aeron, dispelante la malsanigajn miasmojn, kiuj kaŭzus la morton, ne estas pli ĝustadire bono ol malbono.

Por juĝi ion, oni devas vidi ĝiajn sekvojn; tiel, por taksi tion, kio reale estas feliĉo aŭ malfeliĉo por la homo, ni devas transpaŝi la limojn de tiu ĉi vivo, ĉar ja tie la sekvoj manifestiĝas; nu, ĉio, kion la homo nomas malfeliĉo laŭ sia mallarĝa vidado, ĉesas kun la surtera vivo kaj trovas sian kompenson en la estonta vivo.

Mi konigos al vi la malfeliĉon sub nova formo, sub bela kaj flora formo, kiun vi akceptas kaj deziras

per ĉiuj fortoj de viaj animoj, vivantaj en iluzio. La malfeliĉo estas la ĝojo, la plezuro, la tumulto, la vana agitado, la freneza kontentigo de la vantamo, kiuj silentigas la konsciencon, kiuj subpremas la agadon de la penso, kiuj konfuzas la homon pri lia estonteco; la malfeliĉo estas la opio de la forgeso, kiun vi arde deziras.

Esperu, vi, kiuj ploras! tremu, vi, kiuj ridas, ĉar via korpo estas kontenta! Neniu trompas Dion; neniu homo evitas sian destinon; kaj la provoj, tiuj kreditoroj pli senkompataj ol la hundaro malkatenita de la mizero sekrete observas vian iluzian ripozon kaj subite enprofundigas vin en la agonion de la vera malfeliĉo, de la malfeliĉo, kiu surprizas la animon, moligitan de l' indiferenteco kaj de l' egoismo.

Spiritismo klarigu viajn intelektojn kaj remetu en ilian realan lumon la veron kaj la eraron, tiel strange kripligitajn de via blindeco! Tiam vi agos kiel bravaj soldatoj, kiuj, anstataŭ fuĝi antaŭ la danĝero, preferas la luktojn en la riskplenaj bataloj, ol la pacon, kiu ne povas doni gloron nek promocion. Ne gravas al la soldato, ke en la konfuzego de la batalo li perdas siajn armilojn, siajn pakaĵojn kaj siajn vestojn, se li eliras kiel venkinto kovrita per gloro! Ne gravas al homo, kiu havas fidon al la estonteco, lasi sur la kampo de batalo de la vivo sian riĉecon kaj sian mantelon el karno, kondiĉe, ke lia animo eniru radianta en la ĉielan regnon. (*Delphine de Girardin.* Parizo, 1861.)

## La melankolio

25. Ĉu vi scias, kial ia malpreciza malĝojo kelkfoje kaptas vian animon kaj igas vin trovi la vivon amara? Ĝi devenas de tio, ke via Spirito, aspirante la feliĉon kaj liberecon, sed katenite al la korpo, kiu enkarcerigas lin, lace konsumiĝas pro vanaj penoj por

liberiĝi. Sed, vidante, ke tiuj penoj estas senutilaj, li falas en senkuraĝecon, kaj la korpo ricevas la influon de tiu senkuraĝeco; malvigleco, laciĝo kaj kvazaŭa apatio ekposedas vin, kaj vi sentas malfeliĉon.

Kredu al mi, rezistu energie al tiuj impresoj, kiuj malfortigas vian volon. Tiuj aspiroj al pli bona vivo estas denaskaj en la Spirito de ĉiu homo, sed ne serĉu ĝin sur la tero; kaj nun, kiam Dio sendas al vi Siajn Spiritojn, por instrui vin pri la feliĉo, kiun Li destinas por vi, atendu pacience la anĝelon de la liberigo, kiu venas helpi vin rompi la ligilojn, kiuj tenas vian Spiriton en kaptiteco. Pensu, ke vi devas plenumi, dum via provo sur la tero, mision, pri kiu vi neniel konscias, aŭ dediĉante vin al via familio, aŭ plenumante diversajn devojn, kiujn Dio konfidis al vi. Kaj se, dum la daŭro de tiu provo, kvitigante vin de via tasko, vi vidas la zorgojn, la maltrankvilojn, la ĉagrenojn torente fali sur vin, estu fortaj kaj kuraĝaj, por ilin elteni. Brave kontraŭstaru ilin; ili estas nedaŭraj kaj kondukos vin al la amikoj, kiujn vi priploras kaj kiuj, ĝojante pro via alveno inter ilin, etendos al vi la brakojn, por konduki vin al loko, kien ne eniras la surteraj ĉagrenoj. (*Francisko de Ĝenevo.* Bordeaux.)

## Memvolaj provoj. La vera punvesto.

26. Vi demandas, ĉu estas permesate al la homo mildigi siajn provojn. Tiu ĉi demando kondukas nin al la jena: Ĉu estas permesate al dronanto klopodi por savi sin? ĉu al iu, en kiun penetris dorno, ĝin eltiri? ĉu al malsanulo voki kuraciston? La celo de la provoj estas ekzercadi la intelekton tiom, kiom la paciencon kaj la rezignacion; iu homo povas naskiĝi en peniga kaj embarasa pozicio, speciale por trudi al si la serĉadon de rimedoj, por venki la malfacilaĵojn. La merito konsistas en tio, ke oni eltenu sen murmuro la sekvojn de la

neeviteblaj malbonaĵoj, ke oni persistu en la batalado, ke oni ne malesperu antaŭ fiasko, sed ne en ia senkuraĝiĝo, kiu estus pli mallaboremo ol virto.

Tiu demando kondukas nin al alia. Se Jesuo diris: "Feliĉaj la afliktitoj", ĉu estas merito serĉi afliktojn por fari pli doloraj siajn provojn per memvolaj suferoj? Al tio mi respondas tute klare: Jes, ĝi estas granda merito, kiam la suferoj kaj la seniĝoj havas la bonon de la proksimulo kiel celon, ĉar tio estas karito per sinofero; ne, kiam la celo estas la suferanto mem, ĉar tio estas egoismo pro fanatikeco.

Tie ĉi estas necese fari gravan distingon: koncerne vin mem, kontentiĝu per la provoj, kiujn Dio sendas al vi, kaj ne pligrandigu la ŝarĝon kelkfoje jam tiel pezan. Akceptu ilin sen murmuro kaj kun fido: nur tion Li postulas de vi. Ne malfortigu vian korpon per senutilaj seniĝoj kaj sencelaj torturoj, ĉar vi bezonas ĉiujn viajn fortojn, por plenumi vian mision de laboro sur la tero. Memvole torturi kaj martirigi vian korpon estas malrespekti la leĝon de Dio, kiu donas al vi rimedojn por ĝin subteni kaj fortikigi; senbezone ĝin malfortigi estas vera memmortigo. Uzu, sed ne trouzu: tia estas la leĝo; la trouzo de la plej bonaj aferoj alportas al la homo punon per siaj neeviteblaj sekvoj.

Estas alie pri la suferoj, kiujn la homo trudas al si, por mildigi la suferojn de sia proksimulo. Se vi suferas malvarmon kaj malsaton, por varmigi kaj satigi iun, kiu bezonas varmon kaj nutraĵon, kaj se via korpo suferas, jen la memofero benata de Dio. Vi, kiuj lasas viajn parfumitajn buduarojn, por iri en la haladzan mansardon porti konsolon; vi, kiuj malpurigas viajn delikatajn manojn kuracante vundojn; vi, kiuj maldormas por garde sidi ĉe la lito de malsanulo, kiu estas via frato nur per Dio; fine, vi, kiuj konsumas vian sanon en la praktikado de bonaj agoj, jen via punvesto, vere benata punvesto,

ĉar la mondumaj ĝuoj ne sekigis vian koron; vi ne malvigliĝis en la sino de la forkonsumantaj plezuroj de la riĉeco, sed vi ja fariĝis konsolantaj anĝeloj de la senhavaj malriĉuloj.

Sed vi, kiu foriras for de la mondo, por eviti ĝiajn tentojn kaj vivadi en izoleco, kia estas via utileco sur la tero? kie estas via kuraĝo en viaj provoj, se vi fuĝas el la batalo, forkuras el la milito? Se vi volas punveston, surmetu ĝin sur vian animon kaj ne sur vian korpon; humiligu vian Spiriton kaj ne vian karnon; skurĝu vian fieron; ricevu senplende la humiligojn; batu vian memamon; rigidiĝu kontraŭ la doloro de l' insulto kaj de la kalumnio, pli korŝira ol la fizika doloro. Jen la vera punvesto, kies vundoj estos konsiderataj favore al vi, ĉar ili atestos vian kuraĝon kaj vian submetiĝon al la volo de Dio. (*Unu Gardanĝelo.* Parizo, 1863.)

## Ĉu oni devas meti finon al la provoj de sia proksimulo?

*27. Ĉu oni devas meti finon al la provoj de sia proksimulo, kiam oni povas, aŭ ĉu oni devas, pro respekto al la planoj de Dio, lasi al la provoj liberan kuron?*

Ni jam diris kaj rediris al vi tre ofte, ke vi estas sur tiu ĉi planedo por kulpelaĉeto, por kompletigi viajn provojn, kaj ke ĉio, kio okazas al vi, estas sekvo de viaj antaŭaj ekzistadoj, rento de la ŝuldo, kiun vi devas pagi. Sed tiu penso naskas ĉe iuj personoj pripensojn, kiujn estas necese kontraŭbatali, ĉar ili povas havi pereigajn efikojn.

Iuj pensas, ke, se oni estas sur la tero por kulpelaĉeti, estas necese, ke la provoj iru sian vojon. Iuj eĉ kredas, ke ne nur oni nenion devas fari por mildigi ilin, sed ke, kontraŭe, oni devas kunlabori por ilin fari pli profitaj,

intensigante ilin. Tio estas granda eraro. Jes, viaj provoj devas ja sekvi la vojon, kiun Dio difinis por ili, sed ĉu vi konas tiun vojon? Ĉu vi scias, ĝis kiu punkto ili devas iri, kaj ĉu via favorkora Patro ne diris al la sufero de tiu aŭ de tiu alia el viaj fratoj: "Ci ne iros plu!"? Ĉu vi scias, ĉu Lia providenco ne elektis vin, ne kiel turmentilon, por pligravigi la suferojn de la kulpulo, sed kiel balzamon, por cikatri la vundojn, kiujn Lia justeco malfermis? Ne diru do, kiam vi vidas unu el viaj fratoj frapita: Tio estas la justeco de Dio, estas necese, ke ĝi sekvu sian vojon; sed kontraŭe diru: Ni vidu, kiajn rimedojn nia kompatema Patro metis en miajn manojn, por mildigi la suferadon de mia frato. Ni vidu, ĉu miaj moralaj konsoloj, mia materia apogo, miaj konsiloj, povos helpi lin venki tiun provon kun pli da energio, da pacienco kaj da rezignacio. Ni ja vidu, ĉu Dio metis en miajn manojn la rimedojn por ĉesigi tiun suferon; ĉu Li donis al mi ankaŭ kiel provon, eble kiel kulpelaĉeton, haltigi la malbonon kaj ĝin anstataŭigi per la paco.

Helpu do ĉiam unu alian en viaj respektivaj provoj, kaj neniam rigardu vin mem kiel turmentilojn; kontraŭ tiu penso vigle staru ĉiu sentema homo, precipe ĉiu spiritisto; ĉar spiritisto, pli bone ol aliaj, devas kompreni la senliman bonecon de Dio. La spiritisto estu ĉiam konvinkita, ke lia tuta vivo devas esti praktikado de amo kaj de sindonemo; ke, kion ajn li faros, por kontraŭi la decidojn de la Sinjoro, tiuj decidoj plenumiĝos. Li povas do sentime fari ĉiujn klopodojn, por mildigi la amarecon de la kulpelaĉeto, sed li estu certa, ke nur Dio povas ĝin haltigi aŭ ĝin plilongigi, laŭ tio, kiel Dio mem juĝas oportune.

Ĉu la homo ne montrus treegan fieron, se li pretendus havi la rajton, por tiel diri, turni la armilon en la vundo? pligrandigi la dozon da veneno en la internaĵo

de la suferanto, sub preteksto, ke tia estas lia kulpelaĉeto?

Ho! rigardu vin mem ĉiam kiel instrumenton, elektitan por ĝin ĉesigi. Ni resumu tie ĉi: vi estas sur la tero por elaĉeti kulpojn; sed vi ĉiuj, senescepte, devas fari ĉiajn klopodojn, por mildigi la kulpelaĉeton de viaj fratoj, laŭ la leĝo de amo kaj karito. (*Bernardeno,* protektanta Spirito. Bordeaux, 1863.)

### Ĉu estas permesate mallongigi la vivon de malsanulo, kiu suferas sen espero de resaniĝo?

*28. Homo estas en agonio, potencata de kruelaj suferoj; oni scias, ke lia stato estas senesperiga; ĉu estas permesate ŝpari al li kelkajn momentojn da angoro, plirapidigante lian finon?*

Kiu donus al vi la rajton antaŭjuĝi la decidojn de Dio? Ĉu Li ne povas konduki iun al la bordo de fosaĵo, el kie Li fortiros la homon, por devigi tiun ĉi reveni al si mem kaj havi aliajn pensojn? Kvankam la vivo de mortonto atingis sian ekstremon, neniu povas diri kun certeco, ke ties lasta horo venis. Ĉu la scienco neniam eraris pri tiuj antaŭdiroj?

Mi bone scias, ke estas okazoj, kiujn oni povas rigardi kiel senesperigajn; sed, se oni havas nenian fonditan esperon de definitiva reveno al la vivo kaj al la sano, ĉu oni ne konas sennombrajn ekzemplojn de tio, ke en la momento ellasi la lastan spiron, la malsanulo revigliĝas kaj reakiras siajn kapablojn dum kelkaj momentoj? Nu! tiu horo de graco, kiu estas donata al li, povas esti por li la plej grava; ĉar vi ne scias la pripensojn, kiujn lia Spirito eble faris dum la agonio, kaj kiajn turmentojn povas al li ŝpari ekfulmo de pento.

La materialisto, kiu vidas nur la korpon kaj neniel alkalkulas la animon, ne povas kompreni tiujn aferojn;

sed la spiritisto, kiu scias, kio okazas post la tombo, konas la prezon de la lasta penso. Mildigu la lastajn suferojn tiom, kiom estos al vi eble; sed gardu vin, ke vi ne mallongigu la vivon, eĉ por unu minuto, ĉar tiu minuto povos ŝpari multajn larmojn en la estonteco. (*Sankta Ludoviko.* Parizo, 1860.)

## Memofero de la vivo

*29. Ĉu tiu, kiu estas naŭzita de la vivo, sed ne volas tranĉi ĝin, estas kulpa, se li serĉas la morton sur batalkampo, kun la penso fari sian morton utila?*

Ĉu la homo sin mem mortigas, aŭ donas al alia la okazon mortigi lin, la celo estas ĉiam mallongigi la vivon, kaj sekve estas memmortigo en la intenco, se ne en la ago. La penso, ke lia morto servos al io, estas iluzio; tio estas nur preteksto, por kolorigi lian agon kaj senkulpigi ĝin antaŭ liaj propraj okuloj; se li serioze havus la deziron servi sian landon, li klopodus vivi, ĝin defendante, kaj ne morti, ĉar, kiam li mortas, li neniel povas servi ĝin. La vera sindonemo konsistas en tio, ke li ne timu la morton, kiam lia vivo devas esti utila, spitu la danĝeron, faru antaŭe kaj sen bedaŭro la oferon de sia vivo, se tio estas necesa; sed la *antaŭdecidita intenco* serĉi la morton, malŝirmante sin antaŭ danĝero, eĉ por fari servon, nuligas la meriton de l' ago. (*Sankta Ludoviko.* Parizo, 1860.)

*30. Homo elmetas sin al minaca danĝero, por savi la vivon al unu el siaj similuloj, antaŭsciante, ke li mem pereos; ĉu tio povas esti rigardata kiel memmortigo?*

Se lia ago ne kuntrenas intencon serĉi la morton, ĝi ne estas memmortigo, sed sindonemo kaj abnegacio, eĉ se li havus la certecon perei. Sed, kiu povas havi tiun

certecon? Kiu diras, ke la Providenco ne rezervas neatenditan rimedon de savo por la plej danĝera momento? Ĉu Li ne povas savi eĉ tiun, kiu estas en la faŭko de kanono? Ofte la Providenco povas voli, ke la provo de rezignacio estu puŝata ĝis la lasta limo, kaj tiam ia neatendita cirkonstanco deturnas la fatalan frapon. (*Sankta Ludoviko.*)

**Profito el la suferoj por aliulo.**

*31. Ĉu tiuj, kiuj akceptas siajn suferojn kun rezignacio pro submetiĝo al la volo de Dio kaj celante sian estontan feliĉon, ne laboras nur por si mem, kaj ĉu ili povas fari siajn suferojn utilaj al aliaj?*

Tiuj homoj povas esti materie kaj morale utilaj al aliaj. Materie, se, per laboro, rezignoj kaj memofero, kiujn ili trudas al si, ili kunlaboras por la materia komforteco de siaj proksimuloj; morale, per la ekzemplo, kiun ili donas, de sia submetiĝo al la volo de Dio. Tiu ekzemplo de la potenco de la spiritisma fido povas instigi la malfeliĉulojn al rezignacio, ilin savi de la malespero kaj de ties estontaj pereigaj sekvoj. (*Sankta Ludoviko.* Parizo, 1860.)

ĈAPITRO VI

# LA KONSOLANTA KRISTO

La malpeza jugo. La promesita Konsolanto. **Instruoj de la Spiritoj**: Regado de la Spirito de la Vero.

## La malpeza jugo

1. *Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos. Metu sur vin mian jugon, kaj lernu ĉe mi, ĉar mi estas milda kaj korhumila; kaj vi trovos ripozon por viaj animoj. Ĉar mia jugo estas facila, kaj mia ŝarĝo estas malpeza.* (Mateo, 11:28-30)

2. Ĉiuj suferoj: mizeroj, elreviĝoj, fizikaj doloroj, perdo de karaj estuloj, trovas sian konsolon en la fido al la estonteco, en la konfido al la justeco de Dio, kiujn la Kristo venis instrui al la homoj. Kontraŭe, la homon, kiu nenion atendas post tiu ĉi vivo, aŭ simple dubas, la afliktoj trafas per sia tuta pezo, kaj nenia espero venas mildigi ties amarecon. Jen, kio igis Jesuon diri: Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos.

Tamen Jesuo metas kondiĉon al sia helpo kaj al la feliĉo, kiun li promesas al la afliktitoj; tiu kondiĉo troviĝas en la leĝo, kiun li instruas; lia jugo estas la observado de tiu leĝo; sed tiu jugo estas malpeza kaj tiu leĝo estas dolĉa tial, ke la leĝo de Jesuo trudas kiel devon la amon kaj la kariton.

## La promesita Konsolanto

3. *Se vi min amas, vi observos miajn ordonojn. Kaj mi petos la Patron kaj Li donos al vi alian Parakleton, por ke li restadu kun vi por ĉiam; tiu estas la Spirito de la vero, kiun la mondo ne povas akcepti, ĉar ĝi lin ne vidas nek konas; vi lin konas, ĉar li restadas kun vi kaj estos en vi. Sed la Parakleto, la Sankta Spirito, kiun la Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi.* (Johano, 14:15-17, 26.)

4. Jesuo promesas alian konsolanton: tiu estas la *Spirito de Vero,* kiun la mondo ankoraŭ ne konas, ĉar ĝi ne estas matura por lin kompreni. La Patro lin sendos, por instrui ĉiujn aferojn kaj por rememorigi tion, kion la Kristo diris. Se do la Spirito de Vero estis venonta poste, por instrui ĉiujn aferojn, ni konkludas, ke la Kristo ne ĉion diris; se li venas rememorigi tion, kion la Kristo diris, oni do ĝin forgesis aŭ miskomprenis.

Spiritismo venas, en la difinita tempo, plenumi la promeson de la Kristo: la Spirito de Vero prezidas ĝian starigon; ĝi revokas la homojn al la obeado je la leĝo; ĝi instruas ĉiujn aferojn, komprenigante tion, kion la Kristo instruis nur per paraboloj. La Kristo admonis: "Kiuj havas orelojn por aŭdi, tiuj aŭdu"; Spiritismo venas malfermi la okulojn kaj la orelojn, ĉar ĝi parolas sen figuroj kaj sen alegorioj; ĝi levas la vualon, intence lasitan sur iuj misteroj; ĝi venas fine alporti superegan konsolon al la mizeruloj de sur la tero kaj al ĉiuj suferantoj, donante pravan kaŭzon kaj utilan celon al ĉiuj doloroj.

La Kristo diris: "Feliĉaj la afliktitoj, ĉar ili estos konsolataj"; sed kiel senti sin feliĉa pro la sufero, se oni ne scias, kial oni suferas? Spiritismo montras la kaŭzon de la suferoj en la antaŭaj ekzistadoj kaj en la

misio de la tero, kie la homo elaĉetas sian pasintecon; ĝi montras la celon de la suferoj, kiujn ĝi prezentas kiel utilajn krizojn, kiuj alportas la resaniĝon, kaj kiel purigorimedon, kiu certigas la feliĉon dum la estontaj ekzistadoj. La homo komprenas, ke li meritis suferi, kaj li trovas la suferon justa; li scias, ke tiu sufero helpas lian progreson, kaj li ĝin akceptas senmurmure, kiel laboristo akceptas la laboron, kiu certigas al li la salajron. Spiritismo donas al li neskueblan fidon al la estonteco, kaj la korŝira dubo ne plu havas povon sur lia animo; ĝi igas la homon vidi la aferojn de tiel alte, ke la surteraj suferoj perdiĝas en la vasta kaj belega horizonto, kiun li ampleksas, kaj la perspektivo de la feliĉo, kiu lin atendas, donas al li paciencon, rezignacion kaj kuraĝon iri ĝis la fino de la vojo.

Tiel Spiritismo efektivigas tion, kion Jesuo diris pri la promesita Konsolanto; konon de l' aferoj, per kiu la homo scias, de kie li venas, kien li iras, kaj kial li estas sur la tero; ĝi revokas la homon al la veraj principoj de la leĝo de Dio, kaj lin konsolas per la fido kaj la espero.

## INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

### Regado de la Spirito de Vero

5. Mi venas, kiel iam, al la devojiĝintaj filoj de Izrael, alporti al vi veron kaj disbati la mallumon. Aŭskultu min. Spiritismo, kiel iam mia parolo, devas atentigi la nekredantojn al tio, ke super ili regas la neŝanĝebla vero; la Dio bona, la Dio granda, kiu ĝermigas la planton kaj levas la ondegojn. Mi revelacias la dian doktrinon; kiel rikoltisto, mi ligis en garbojn la bonon dissemitan en la homaro, kaj mi diris: Venu al mi, vi ĉiuj, kiuj suferas!

Sed la sendankaj homoj deturniĝis de la vojo rekta kaj larĝa, kiu kondukas al la regno de mia Patro, kaj prenis la malglatajn vojetojn de la malpieco. Mia Patro ne volas neniigi la homan rason; Li volas, ke, helpante unuj aliajn, mortintoj kaj vivantoj, tio estas mortintoj laŭ la karno, ĉar morto ne ekzistas, vi kunlaboru unuj kun la aliaj kaj ke ne plu la voĉo de la profetoj kaj de l' apostoloj, sed la voĉo de tiuj, kiuj jam ne estas sur la tero, admonu: Preĝu kaj kredu! ĉar la morto estas la reviviĝo, kaj la vivo estas provado elektita, dum kiu la virtoj, kiujn vi okaze kulturadis, kreskos kaj disvolviĝos kiel la cedro.

Malfortaj homoj, kiuj komprenas la mallumon de viaj intelektoj, ne forpuŝu la torĉon, kiun la dia boneco metas en viajn manojn, por lumigi vian vojon kaj vin rekonduki, perditajn infanojn, al la sino de via Patro.

Mi estas tro tuŝita de kompato al viaj suferoj, al via grandega malforteco, por ne etendi helpeman manon al la malfeliĉaj devojiĝintoj, kiuj, vidante la ĉielon, falas en la abismon de l' eraro. Kredu, amu, meditu pri l' aferoj revelaciataj al vi; ne miksu la lolon kun la bona grajno, utopiojn kun veraĵoj.

Spiritistoj! amu, jen la unua admono; instruu vin, jen la dua. Ĉiuj veraĵoj troviĝas en Kristanismo; la eraroj, enradikiĝintaj en ĝi, havas homan originon; kaj jen el trans la tombo, kiun vi opiniis la neniiĝo, voĉoj krias al vi: Fratoj! nenio pereas: Jesuo Kristo estas la venkanto de la malbono, estu venkantoj de la malpieco. (*La Spirito de Vero.* Parizo, 1860.)

6. Mi venas instrui kaj konsoli la neniohavajn malfeliĉulojn; mi venas diri, ke ili levu sian rezignacion al la nivelo de siaj provoj; ili ploru, ĉar la doloro estis sanktigita en la ĝardeno de l' Olivarboj; sed li esperu,

ĉar la konsolantaj anĝeloj ankaŭ venos sekigi iliajn larmojn.

Plugistoj, fosu vian sulkon; rekomencu morgaŭ la krudan laboron de hodiaŭ; la laboro de viaj manoj liveras la surteran panon al viaj korpoj, sed viaj animoj ne restas forgesitaj; kaj mi, la dia ĝardenisto, kulturas ilin en la silento de viaj pensoj, kiam la horo de ripozo sonos, kiam la teksaĵo elglitos el viaj manoj kaj viaj okuloj fermiĝos antaŭ la lumo, vi sentos aperi kaj ĝermi en vi mian altvaloran semon. Nenio perdiĝas en la regno de nia Patro, kaj viaj ŝvitoj, viaj afliktoj formas la trezoron, kiu vin riĉigos en la superaj sferoj, kie la lumo anstataŭas la mallumon kaj kie la plej nuda el vi ĉiuj estos eble la plej brila.

Vere mi diras al vi, kiuj portas siajn ŝarĝojn kaj helpas siajn fratojn, tiuj estas miaj tre amataj; instruu vin mem en la altvalora doktrino, kiu detruas la eraron de la ribeloj kaj konigas al vi la subliman celon de la homa provado. Same kiel la vento balaas la polvon, la blovo de la Spiritoj forviŝu viajn ĵaluzojn kontraŭ la riĉuloj de la mondo, kiuj ofte estas tre mizeraj, ĉar iliaj provoj estas pli danĝeraj ol la viaj. Mi estas kun vi, kaj mia apostolo intruas vin. Trinku el la vivanta fonto de l' amo kaj preparu vin, sklavoj de la vivo, por iam ĵeti vin, liberaj kaj ĝojantaj, en la sinon de Tiu, kiu kreis vin malfortaj, por fari vin perfektigeblaj, kaj kiu volas, ke vi mem prilaboru vian molan argilon, por ke vi mem estu la farantoj de via senmorteco. (*La Spirito de Vero.* Parizo, 1861.)

7. Mi estas la granda kuracisto de l' animoj, kaj mi venas alporti la kuracilon, kiu devas vin resanigi; la malfortuloj, la suferantoj kaj la malsanuloj estas miaj preferataj filoj, kaj mi venas savi ilin. Venu do al mi, vi ĉiuj, kiuj suferas estas ŝarĝitaj, kaj vi estos

malŝarĝitaj kaj konsolataj; ne serĉu aliloke forton kaj konsolon, ĉar la mondo estas senpova por ilin doni. Dio faras al viaj koroj superan alvokon per Spiritismo; aŭskultu ĝin. Malpieco, mensogo, eraro, nekredemo estu elradikitaj el viaj dolorantaj animoj; ili estas monstroj, kiuj elsuĉas vian plej puran sangon kaj faras en vi vundojn preskaŭ ĉiam mortigajn. En la estonteco, humilaj kaj submetitaj al la Kreanto, vi praktiku la dian leĝon. Amu kaj preĝu; estu obeemaj al la Spiritoj de la Sinjoro; voku Lin el la fundo de via koro; tiam Li sendos al vi Sian Filon tre amatan, por instrui vin kaj diri al vi ĉi tiujn bonajn vortojn: Jen mi estas; mi venas al vi, ĉar vi min vokis. (*La Spirito de Vero.* Bordeaux, 1861.)

8. Dio konsolas la humilulojn kaj donas al ili la forton, kiun ili petas de Li. Lia potenco kovras la teron, kaj ĉiam apud larmon Li metis ian balzamon. La sinoferado kaj la abnegacio estas senĉesa preĝado kaj enhavas profundan instruon; la homa saĝeco loĝas en tiuj du vortoj. Ĉiuj suferantaj Spiritoj povu kompreni ĉi tiun veron, anstataŭ plendi kontraŭ siaj doloroj, la moralaj suferoj, kiuj estas destinitaj por vi sur la tero. Prenu do kiel devizon la jenajn du vortojn: *sinoferado* kaj *abnegacio,* kaj vi estos fortaj, ĉar ili resumas ĉiujn devojn, kiujn de vi postulas la karito kaj la humileco. La sento de la plenumita devo donos al via Spirito ripozon kaj al vi rezignacion. La koro batos pli bone, la animo sereniĝos kaj la korpo ne sentos malfortiĝon, ĉar ju pli profunde atingita estas la Spirito, des pli forta sentas sin la korpo. (*La Spirito de Vero.* Le Havre, 1863.)

ĈAPITRO VII

# FELIĈAJ LA MALRIĈAJ EN SPIRITO

Kion oni devas kompreni kiel **malriĉaj en spirito**. Kiu sin altigas, tiu estos malaltigita. Misteroj kaŝitaj al la saĝuloj kaj prudentuloj. **Instruoj de la Spiritoj**: Fiero kaj humileco. Misio de l' inteligenta homo sur la tero.

## Kion oni devas kompreni kiel "malriĉaj en spirito"

1. *Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo*. (Mateo, 5:13.)

2. La nekredantoj mokis jenan maksimon: *Feliĉaj la malriĉaj en spirito*, kiel multajn aliajn aferojn, ne komprenante ĝin. Kiel malriĉajn en spirito, Jesuo ne aludas la malinteligentajn, sed la humilajn homojn: li diris, ke la regno de la ĉielo esta el ĉi tiuj kaj ne el la fieruloj.

La kleraj kaj spritaj homoj, laŭ la rigardmaniero de la mondo, havas ordinare tiel altan opinion pri si mem kaj pri sia supereco, ke ili rigardas la diajn aferojn kiel neindajn je ilia atento; iliaj rigardoj, koncentrigitaj sur iliaj personojn, ne povas leviĝi al Dio. Tiu inklino, kredi sin superaj ol ĉio, kondukas ilin al la neado de ĉio, kio, troviĝante pli alte ol ili, povus ilin malgrandigi, kaj eĉ al la neado de Dio; aŭ, se ili konsentas akcepti Dion, ili malakceptas unu el Liaj plej belaj atributoj: Lian providencan agadon sur la aferojn de tiu ĉi mondo, kon-

vinkite, ke ili solaj sufiĉas, por bone regi la mondon. Prenante sian propran intelekton kiel mezuron de l' universa intelekto, kaj juĝante sin kapablaj ĉion kompreni, ili ne povas kredi al la ebleco de tio, kion ili ne komprenas; kiam ili deklaras ion, siajn juĝojn ili konsideras senapelaciaj.

Ili rifuzas akcepti la ekziston de la nevidebla mondo kaj de ia eksterhoma potenco, ne tial, ke ĝi estas pli alta ol ilia komprenpovo, sed ĉar ilia fiero ribelas kontraŭ la ideo de io, super kio ili ne povas leviĝi; ĉar tia ideo devigas ilin malsupreniri de sia piedestalo. Tial ili havas nur ridetojn de malŝato pri ĉio, kio ne apartenas al la mondo videbla kaj tuŝebla; ili atribuas al si mem tro da spriteco kaj da scio, por kredi al aferoj taŭgaj, laŭ ilia opinio, por personoj *simplaj*, kaj konsideras la homojn, kiuj akceptas serioze tiajn aferojn, kiel *malriĉajn en spirito*.

Tamen, kion ajn ili diras, ili devos eniri, kiel la ceteraj, en tiun nevideblan mondon, kiun ili mokas; tie iliaj okuloj malfermiĝos kaj ili rekonos sian eraron. Sed Dio estas justa kaj ne povas ricevi kiel egalajn laŭ merito iun, kiu malkonfesis Lian potencon, kaj iun alian, kiu humile submetiĝis al Liaj leĝoj, nek doni al ambaŭ egalajn premiojn.

Dirante, ke la regno de la ĉielo apartenas al la simplaj, Jesuo volis esprimi, ke neniu estas tie akceptata sen *la simpleco de la koro kaj la humileco de la Spirito*; ke la malklerulo, posedanta tiujn kvalitojn, estos preferata ol la klerulo, kiu kredas pli al si ol al Dio. En ĉiuj cirkonstancoj li lokas la humilecon en la kategorion de la virtoj, kiuj alproksimigas al Dio, kaj la fieron inter la malvirtojn, kiuj forigas la homon de Dio; kaj tio pro tre komprenebla motivo, nome ka la humileco estas ago de submetiĝo al Dio, dum la fiero estas ribelo kontraŭ Li. Pli valoras do, por la estonta feliĉo de la

homo, esti *malriĉa en spirito*, kiel la mondo tion komprenas, kaj riĉa per moralaj kvalitoj.

### Kiu sin altigas, tiu estos malaltigita

3. *En tiu horo la disĉiploj venis al Jesuo, dirante: Kiu do estas la plej granda en la regno de la ĉielo? Kaj alvokinte al si infanon, li starigis ĝin meze de ili, kaj diris: Vere mi diras al vi: se vi ne turniĝos kiel infanoj, vi neniam eniros en la regnon de la ĉielo.* Kiu do humiligos sin, kiel ĉi tiu infano, tiu estas la plej granda en la regno de la ĉielo. *Kaj kiu akceptos unu tian infanon en mia nomo, tiu akceptas min.* (Mateo, 18:1-5.)

*4. Tiam venis al li la patrino de la filoj de Zebedeo, kun siaj filoj, adorkliniĝante kaj farante al li peton. Li diris al ŝi: Kion vi volas? Ŝi diris al li: Ordonu, ke ĉi tiuj miaj du filoj povu sidi, unu dekstre de vi kaj la dua maldekstre, en via regno. Sed Jesuo responde diris: Vi ne scias, kion vi petas. Ĉu vi povas trinki la kalikon, kiun mi trinkos? Ili diris al li: Ni povas. Li diris al ili: Mian kalikon vi ja trinkos; sed sidi dekstre de mi kaj maldekstre, tion doni ne apartenas al mi, sed ĝi estas por tiuj, por kiuj ĝi estas preparita de mia Patro. Kaj aŭdante, la dek indignis kontraŭ la du fratoj. Sed Jesuo, alvokinte ilin al si, diris: Vi scias, ke la regantoj de la nacioj kondutas kiel sinjoroj super ili, kaj iliaj granduloj ekzercas aŭtoritaton super ili. Ne tiel estos inter vi; sed* kiu volas esti granda inter vi, tiu estu via servanto; kaj kiu volas esti la unua inter vi, tiu estu via servisto; *same kiel la Filo de homo venis, ne por esti servata, sed por servi, kaj por doni sian vivon kiel elaĉeton por multaj.* (Mateo, 20:20-28.)

*5. Kaj kiam li eniris en sabato en la domon de unu reganto de la Fariseoj, por manĝi panon, ili lin observis. Kaj li parolis parabolon al la invititoj, vidinte, kiel ili elektas la ĉefajn sidlokojn; li diris al ili: Kiam vi estas invitita de iu al edziĝa festo, ne sidiĝu en la ĉefa loko, por ke ne okazu, ke iu, pli honorinda ol vi, estas de li invitita;*

*kaj tiu, kiu invitis vin kaj lin, venos, kaj diros al vi: Cedu lokon al ĉi tiu; kaj tiam vi komencos kun honto preni la lastan lokon. Sed kiam vi estos invitita, iru kaj sidiĝu en la lasta loko; kaj tiel, kiam venos tiu, kiu vin invitis, li diros al vi: Amiko, iru pli alten; tiam vi havos honoron antaŭ ĉiuj, kiuj sidas kun vi.* Ĉar ĉiu, kiu sin altigas, estos humiligita, kaj kiu sin humiligas, tiu estos altigita. (Luko, 14:1, 7:11.)

6. Tiuj ĉi maksimoj estas sekvoj de la principo de humileco, kiun Jesuo ne ĉesas prezenti kiel esencan kondiĉon de la feliĉo promesita al la elektitoj de la Sinjoro, kaj kiun li formulis per jenaj paroloj: "Feliĉaj la malriĉaj en spirito, ĉar al ili apartenas la regno de la ĉielo". Li prenas infanon kiel tipon de la simpleco de koro kaj diras: "La plej granda en la regno de la ĉielo estas tiu, kiu humiliĝos kaj *fariĝos malgranda kiel infano*"; tio estas, kiu havos nenian pretendon pri supereco aŭ neeraremo.

La sama fundamenta penso troviĝas en ĉi tiu alia maksimo: *"Kiu volas esti granda inter vi, tiu estu via servanto"*, kaj ankoraŭ en jena: *"Kiu malaltigas sin, tiu estos altigita; kaj kiu altigas sin, tiu estos malaltigita"*.

Spiritismo venas konfirmi tiun teorion per la ekzemplo, montrante al ni, ke, en la mondo de la Spiritoj, grandaj estas tiuj, kiuj estis malgrandaj sur la tero, kaj ofte, ke tre malgrandaj estas tiuj, kiuj estis la plej grandaj kaj potencaj sur la tero. Ĉar, mortinte, la unuaj kunportis tion, kio sola faras la veran grandecon en la ĉielo kaj ne perdiĝas: la virtojn; dum la aliaj devis lasi tion, kio faris ilian grandecon sur la tero kaj kion oni ne kunportas en la alian vivon, nome: riĉaĵojn, titolojn, gloron, naskiĝon; havante nenion alian, ili venas en la alian mondon senigitaj de ĉio, kiel la savitoj de ŝiprompiĝo, kiuj ĉion perdis, eĉ siajn vestojn; ili konservis nur la fieron, kiu faras ilian novan pozicion pli humiliga,

ĉar ili vidas pli alte ol ili, brilantajn de gloro, tiujn, kiujn ili piedpremis sur la tero.

Spiritismo montras al ni alian aplikon de la dirita principo en la sinsekvaj enkarniĝoj; per ĉi tiuj, efektive, la homoj, kiuj estis la plej altaj en unu ekzistado, estas malaltigitaj ĝis la lasta rango en sekvanta ekzistado, se ilin regis fiero kaj ambicio. Ne serĉu do la unuajn lokojn sur la tero, nek metu vin pli alten ol la aliaj, se vi ne volas esti devigitaj malsupreniri; serĉu, kontraŭe, la plej malaltan kaj modestan lokon, ĉar Dio ja scios doni al vi alian pli altan en la ĉielo, se vi ĝin meritos.

## Misteroj kaŝitaj al la saĝuloj kaj al la prudentuloj

7. *En tiu tempo Jesuo ekparolis kaj diris: Mi vin gloras, ho Patro, Sinjoro de la ĉielo kaj la tero, ke tion Vi kaŝis for de la saĝuloj kaj prudentuloj, kaj malkaŝis al infanoj.* (Mateo, 11:25.)

8. Povas ŝajni strange, ke Jesuo dankas Dion, ke Li revelaciis tiuj aferojn *al la simplaj kaj al la malgrandaj*, kiuj estas la malriĉaj en spirito, kaj kaŝis ilin *al la saĝaj kaj prudentaj*, pli kapablaj, laŭ la ŝajno, ilin kompreni. Tio estas tial, ke oni devas kompreni, ke la unuaj estas la humiluloj, kiuj humiliĝas antaŭ Dio, kaj ne opinias sin superaj ol ĉiuj aliaj; kaj la duaj estas la *malhumiluloj*, fieraj pro sia monda scio, kiuj kredas sin saĝaj, ĉar ili neas la ekziston de Dio aŭ traktas Lin, kvazaŭ Dio estus ilia egalulo, se ili volonte ja konsentas Lian ekziston; ĉar, en la antikveco, *saĝa* estis sinonimo de klera. Tial Dio lasas al ili la serĉadon de la sekretoj de la tero kaj revelacias la sekretojn de la ĉielo al la simplaj kaj humilaj, kiuj kliniĝas antaŭ Li.

9. Tio sama okazas hodiaŭ al la grandaj veraĵoj revelaciitaj de Spiritismo. Iuj nekredantoj miras, ke la

Spiritoj faras tiel malmulte da peno por konvinki ilin; tio estas tial, ke la Spiritoj prefere atentas la homojn, kiuj serĉas la lumon bonfide kaj humile, ol tiujn, kiuj opinias, ke ili posedas la tutan lumon kaj kiuj eble pensas, ke Dio devus senti Sin plej feliĉa konduki ilin al Si, ĉar tiel Li pruvus al ili, ke Li ja ekzistas.

La potenco de Dio manifestiĝas en la plej malgrandaj aferoj same, kiel en la plej grandaj; Li ne metas la lumon sub la grenmezurilon, ĉar Li ĉien disverŝas ĝin torente; blindaj estas do tiuj, kiuj ne vidas ĝin. *Dio ne volas perforte malfermi iliajn okulojn, ĉar plaĉas al ili teni la okulojn fermitaj.* Ilia vico venos, sed estas necese, ke antaŭe ili sentu la angorojn de la mallumo kaj *agnosku Dion, ne la hazardon, en la mano, kiu frapas ilian fieron*. Dio uzas, por venki la nekredemon, la rimedojn, kiuj konvenas al Li, laŭ la individuoj; la nekredantoj ne rajtas ordoni, kion Dio devas fari, kaj diri al Li: Se Vi volas konvinki min, Vi devas agi en tia aŭ en tia alia maniero, en tiu momento preferinde, ol en tiu alia, ĉar tiu momento estas pli oportuna al mi.

La nekredantoj ne miru do, se Dio kaj la Spiritoj, kiuj estas la plenumantoj de Lia volo, ne submetiĝas al iliaj postuloj. Ili demandu sin mem, kion ili dirus, se la lasta el iliaj servistoj volus ion ajn ordoni al ili.

Dio trudas kondiĉojn kaj ne akceptas tiujn, kiujn oni volus altrudi al Li. Dio favore aŭskultas la homojn, kiuj humile sin turnas al Li, sed ne tiujn, kiuj opinias sin superaj ol Li.

10. Ĉu Dio, oni demandas, ne povus frapi ilin persone per tondraj signoj, antaŭ kiuj eĉ la plej obstina nekredanto devus kliniĝi? Sendube Li tion povus, sed kian meriton ili havus, kaj cetere ĉu tio utilus? Ĉu oni ne vidas ilin ĉiutage rifuzi la evidentecon kaj ja diri: eĉ se mi vidus, mi ne kredus, ĉar mi *scias*, ke tio ne estas

ebla? Se ili rifuzas rekoni la veron, iliaj Spiritoj ne estas do maturaj por kompreni ĝin, nek iliaj koroj por senti ĝin. *La fiero estas la katarakto, kiu malklarigas ilian vidadon*; al kio utilas prezenti la lumon al blindulo? Unue estas necese forigi la kaŭzon de la malsano; tial, kiel lerta kuracisto, Dio punas unue la fieron. Li ne forlasas tamen Siajn devojiĝintajn infanojn; Li scias, ke pli malpli baldaŭ iliaj okuloj malfermiĝos, sed Li volas, ke la homoj tion faru memvole; kaj tiam, venkite de la turmentoj de la nekredemo, ili per si mem ĵetiĝos en Liajn brakojn, kaj, kiel la erarinta filo, petos de Li pardonon.

## INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

### Fiero kaj humileco

11. La paco de la Sinjoro estu kun vi, miaj karaj amikoj! Mi venas al vi, por kuraĝigi vin sekvi la bonan vojon.

Al la mizeraj Spiritoj, kiuj iam loĝis sur la tero, Dio donis la mision veni instrui vin. Li estu glorata por la favorkoreco, kiun Li faras al ni, permesante, ke ni helpu vian pliboniĝon. La Sankta Spirito lumigu al mi kaj helpu min fari mian parolon komprenebla por ĉiuj! Vi, enkarniĝintoj, kiuj estas elprovataj kaj serĉas lumon, la volo de Dio helpu min por ĝin briligi antaŭ viaj okuloj!

La humileco estas virto tre forgesita inter vi; la grandaj ekzemploj de humileco, kiuj estas donitaj al vi, estas tre malofte sekvataj, kaj tamen, ĉu sen humileco vi povas esti karitemaj al via proksimulo? Ho ne, ĉar tiu sento samniveligas la homojn; ĝi diras al ili, ke ili estas fratoj, ke ili devas ami unuj aliajn, kaj admonas ilin al la bono. Sen humileco, vi ornamas vin per virtoj, kiujn vi ne havas, kvazaŭ vi portus veston, por kaŝi kriplaĵojn de via korpo. Pensu pri tiu, kiu savis nin;

pensu pri lia humileco, kiu faris lin tiel granda kaj kiu lokis lin super ĉiuj profetoj.

La fiero estas la terura kontraŭulo de la humileco. Se la Kristo promesis la regnon de la ĉielo al la plej malriĉaj, tio estas tial, ke la surteraj granduloj pretendas, ke titoloj kaj riĉaĵoj estas rekompencoj donitaj al iliaj meritoj kaj ke ilia esenco estas pli pura, ol tiu de malriĉulo; ili kredas, ke tio estas ŝuldata al ili, kaj tial, kiam Dio reprenas tion de ili, ili akuzas Lin pri maljusteco. Ho! ridindeco kaj blindeco! Ĉu Dio distingas inter vi laŭ la korpoj? Ĉu la envolvaĵo de malriĉulo ne estas la sama, kia tiu de riĉulo? Ĉu la Kreanto faris du specojn de homoj? Ĉio, kion Dio faras, estas granda kaj saĝa; ne atribuu al Li la ideojn, kiujn naskas viaj malhumilaj cerboj.

Ho riĉulo, dum ci dormas sub ciaj orumitaj baldakenoj, ŝirmite kontraŭ la malvarmo, ĉu ci ne scias, ke miloj el ciaj fratoj, kiuj valoras tiom kiom ci, kuŝas sur pajlo? Ĉu la malfeliĉulo, kiu suferas pro malsato, ne estas cia egalulo? Ĉe tiu ĉi vorto, cia fiero ribelas, mi ja scias; ci konsentos doni al li almozon, sed premi al li frate la manon, neniam! "Kio! ci diras; mi, nobelsanga, grandulo sur la tero, mi estus egala al tiu mizerulo kovrita per ĉifonaĵoj! Vana utopio de laŭdiraj filozofioj! Se ni estus egalaj, kial Dio lokis lin tiel malalte kaj min tiel alte?"

Vere, viaj vestoj neniel similas; sed vi ambaŭ senvestigu vin: kia diferenco estos tiam inter vi? La nobeleco de la sango, ci diros; sed la ĥemio neniam trovis diferencon inter la sango de grandsinjoro kaj tiu de plebano; inter la sango de mastro kaj tiu de sklavo. Kiu diras al ci, ke ankaŭ ci jam ne estis mizerulo, kiel li? Ke ci iam ne petis almozon? Ke ci neniam ĝin petos al tiu sama, kiun ci malŝatas hodiaŭ? Ĉu la riĉaĵoj estas eternaj? Ĉu ili ne finiĝas samtempe kun la korpo,

pereema envolvaĵo de cia Spirito? Ho! revenu la humileco al ci! ĵetu fine rigardon al la realaĵoj de tiu ĉi mondo, al tio, kio faras la grandiĝon kaj malaltiĝon en la alia mondo; memoru, ke la morto ne indulgos cin, kiel ĝi indulgas neniun; ciaj titoloj ne gardos cin kontraŭ la morto; ĝi povos frapi cin morgaŭ, hodiaŭ, post unu horo; kaj se ci enprofundiĝas en cian fieron, ho! tiam mi bedaŭras cian sorton, ĉar ci estos kompatinda!

Malhumililoj! kio vi estis, antaŭ ol esti nobeloj kaj potenculoj? Eble vi estis pli malaltaj, ol la lasta el viaj servistoj. Klinu do viajn fierajn fruntojn, kiujn Dio povas malaltigi en la momento, kiam vi ilin levas plej alten. Ĉiuj homoj estas egalaj en la dia pesilo; nur la virto distingas ilin antaŭ la okuloj de Dio. Ĉiuj Spiritoj estas el unu sama esenco, kaj el sama pasto estas kneditaj ĉiuj korpoj; ĉi tiujn viaj titoloj kaj viaj nomoj neniom ŝanĝas; la korpo restas en la tombo; titoloj kaj nomoj neniel kontribuas al tio, ke vi ĝuu la feliĉon promesitan al la elektitoj; karito kaj humileco estas la titoloj de nobeleco de l' elektitoj.

Kompatinda kreito! ci estas patrino, ciaj infanoj suferas; ili havas malvarmon; ili malsatas; ci iras, kurbigite sub la pezo de cia kruco, humiliĝi por havigi al ili pecon da pano. Ho! mi kliniĝas antaŭ ci; kiel noble sankta kaj granda ci estas antaŭ miaj okuloj! Esperu kaj preĝu; la feliĉo ne apartenas ankoraŭ al tiu ĉi mondo. Al la kompatindaj subpremitoj, fidantaj al Li, Dio donas la regnon de la ĉielo.

Kaj ci, junulino, kompatinda infano ĵetita al la laboro, al la manko de vivnecesaĵoj, kial ci havas tiajn malgajajn pensojn? kial plori? Cia rigardo leviĝu pie kaj serene al Dio: al la birdetoj Li donas nutraĵon; fidu al Li, kaj Li ne forlasos cin. La bruo de la festoj, la plezuroj de la mondo batigas cian koron; ci ankaŭ volus ornami per floroj cian kapon kaj miksiĝi kun la feliĉuloj de

sur la tero; ci diras al ci mem, ke ci povus, kiel tiuj virinoj pasantaj preter ci senzorgaj kaj ridantaj, esti ankaŭ riĉa. Ho! silentu, infano! Se ci scius, kiom da larmoj kaj doloroj estas kaŝitaj sub tiuj broditaj vestoj, kiom da ploroj estas sufokitaj sub la bruado de tiu gaja orkestro, ci preferus cian modestan rifuĝejon de la malriĉeco. Restu pura antaŭ la okuloj de Dio, se ci ne volas, ke cia gardanĝelo resupreniru al Li, kun la vizaĝo kaŝita sub la blankaj flugiloj, kaj lasu cin kun ciaj konsciencriproĉoj, sen gvidanto, sen subtenanto en tiu ĉi mondo, kie ci estos perdita, atendante cian punon en la alia.

Kaj vi ĉiuj, kiuj suferas maljustaĵojn de la homoj, estu indulgemaj por la kulpoj de viaj fratoj, konsiderante, ke vi ankaŭ ne estas senriproĉaj: tio estas karito, sed ĝi estas ankaŭ humileco. Se vi suferas pro kalumnioj, klinu la frunton sub tiun provon. Kian valoron havas por vi la kalumnioj de la mondo? Se via konduto estas pura, ĉu Dio ne povas vin rekompenci? Elteni kuraĝe la humiligojn, venantajn de la homoj, signifas esti humila kaj rekoni, ke nur Dio estas granda kaj potenca.

Ho mia Dio, ĉu estas necese, ke la Kristo revenu duan fojon sur la teron, por instrui al la homoj Ciajn leĝojn, kiujn ili forgesas? Ĉi li devos denove elpeli el la templo la vendistojn, kiuj malpurigas Cian domon, lokon nur por preĝo? Kaj kiu scias, ho homoj, se Dio farus al vi tiun favorkoraĵon, eble vi malkonfesus la Kriston, kiel iam; la Kriston vi nomus blasfemanto, ĉar li frakasus la fieron de la modernaj Fariseoj; eble vi devigus lin denove surgrimpi la vojon al Golgota.

Kiam Moseo iris al la monto Sinaj, por tie ricevi la ordonojn de Dio, la popolo de Izrael, lasita al si mem, forlasis la veran Dion; viroj kaj virinoj donis sian oron kaj siajn juvelojn, por konstrui idolon, kiun ili komencis adori. Civilizitaj homoj, vi faras kiel ili; la Kristo lasis

al vi sian doktrinon; li donis al vi la ekzemplon de ĉiuj virtoj, kaj ĉion vi forlasis, ekzemplojn kaj regulojn; per viaj pasioj vi faris al vi ian Dion laŭ via plaĉo: laŭ unuj, teruran kaj sangavidan, laŭ aliaj, senzorgan pri la interesoj de la mondo. La Dio, kiun vi elpensis, estas ankoraŭ la bovido el oro, kiun ĉiu alkonformigas al siaj gustoj kaj ideoj.

Rekonsciiĝu, miaj fratoj, miaj amikoj; la voĉo de la Spiritoj tuŝu viajn korojn; estu grandanimaj kaj karitemaj sen parademo, tio estas, faru la bonon kun humileco; ĉiu malkonstruu iom post iom da altarojn, kiujn vi ĉiuj starigis al la malhumileco, unuvorte, estu kristanoj, kaj vi havos la regnon de la vero. Ne plu dubu pri la boneco de Dio, kiam Li donas al vi tiom da pruvoj pri ĝi. Ni venas prepari la vojon por la plenumo de la profetaj antaŭdiroj. Kiam la Sinjoro pli grandioze manifestos al vi Sian indulgemon, la ĉiela sendito trovu ĉe vi nur unu solan granda familion; viaj koroj, dolĉaj kaj humilaj, estu indaj aŭdi la dian parolon, kiun li venos alporti al vi; la elektito trovu sur sia vojo nur palmojn disĵetitajn, kiel pruvon pri via reveno al bono, al karito, al frateco; tiam via mondo fariĝos la surtera paradizo. Sed, se por vi restos nesentebla la voĉo de la Spiritoj senditaj por purigi, renovigi vian civilizitan socion, riĉan je sciencoj kaj tamen tiel malriĉan je bonaj sentoj, ve! al vi restos nur plori pri via sorto. Sed ne, ne estos tiel; revenu al Dio, via Patro, kaj tiam ni ĉiuj, kiuj kunhelpas por la plenumo de Lia volo, ni ekkantos la himnon de dankoj, por danki la Sinjoron por Lia neelĉerpebla boneco, kaj por glori Lin por la jarcentoj de jarcentoj. Tiel estu. (*Lacordaire*. Constantine, 1863.)

12. Homoj, kial vi plendas pri la malfeliĉegoj, kiujn vi mem amasigis sur viaj kapoj? Vi malakceptis la sanktan kaj dian moralon de la Kristo; ne estu do surprizitaj, ke la kaliko de la maljustaĵoj estas superbordiĝanta ĉien.

La maltrankvilo ĝeneraliĝas; kiun alian kulpigi, ol vin mem, kiuj penas senĉese dispremi unuj aliajn? Vi ne povas esti feliĉaj sen reciproka bonvolemo, kaj ĉu la bonvolemo povus ekzisti kune kun la fiero? La malhumilo, jen la fonto de ĉiuj viaj ĉagrenoj; diligente penadu do por ĝin detrui, se vi ne volas eternigi ĝiajn pereigajn sekvojn. Unu sola rimedo prezentiĝas al vi por tio, sed tiu rimedo estas nepre efika: ĝi estas preni kiel neŝanĝeblan regulon de via konduto la leĝon de la Kristo, leĝon, kiun vi aŭ malakceptis aŭ kies interpreton vi falsis.

Kial vi pli ŝatas tion, kio brilas kaj ĉarmas la okulojn, ol tion, kio tuŝas la koron? Kial la malvirto ĉe la riĉuloj estas la celo de viaj flataĵoj, dum vi havas nur malestiman rigardon al la vera merito ĉe senfamuloj? Kiam diboĉa riĉulo kun ruinigitaj korpo kaj animo sin prezentas ie, ĉiuj honoraĵoj estas por li, dum oni apenaŭ konsentas doni protekteman saluton al virta homo, kiu vivas per sia laboro. Kiam la estimo, per kiu oni traktas la homojn, estas mezurata laŭ la pezo de la oro, kiun ili posedas, aŭ la nomo, kiun ili portas, kian intereson povas ili havi korekti sin?

Okazus kontraŭe, se la orumita malvirto estus skurĝata de la publika opinio, same kiel la malvirto vestita per ĉifonoj; sed la fiero estas indulgema por ĉio, kio ĝin flatas. Jarcento de avideco kaj mono, vi diras. Sendube, sed kial vi lasis la materiajn bezonojn superregi la forton de la komuna saĝo kaj de la prudento? Kial ĉiu volas altiĝi super sia frato? Hodiaŭ la socio suferas la sekvojn de tio.

Ne forgesu, tia stato de l' aferoj estas ĉiam signo de morala dekadenco. Kiam la aroganteco atingas la ekstremajn limojn, tio estas signo de proksima falo, ĉar Dio ĉiam frapas la fierulojn. Se Li kelkfoje lasas ilin supreniri, tiel Li agas, por doni al ili la tempon pripensi kaj korektiĝi sub la frapoj, kiujn de tempo al tempo Li

donas al ilia fiereco por averti ilin; sed, anstataŭ malaltiĝi, ili ribelas; tiam, kiam la mezurilo estas superplena, Li tute renversas ilin, kaj ilia falo estas des pli terura, ju pli alten ili supreniris.

Kompatinda homa raso, kies egoismo difektis ĉiujn vojojn, reprenu tamen kuraĝon; laŭ Sia senlima indulgemo, Dio sendas al ci potencan kuracilon por ciaj malsanoj, neatenditan helpon al cia senhaveco. Malfermu la okulojn al la lumo: jen estas la animoj de tiuj, kiuj ne plu vivas sur la tero, kiuj venas revoki cin al ciaj veraj devoj; ili diros al ci, kun la aŭtoritato de la sperto, kiom senvaloraj antaŭ la eterneco estas la vantamo kaj honoroj en via mallonga ekzistado; ili diros al ci, ke tie estas plej granda tiu, kiu estas la plej humila inter la malgranduloj de sur la tero; ke tiu, kiu plej multe amis siajn fratojn, estos ankaŭ la plej amata en la ĉielo; ke la surteraj potenculoj, se ili malbonuzis sian aŭtoritaton, estos devigitaj obei siajn servistojn; ke la karito kaj la humileco, fine, tiuj du fratinoj, irantaj kun interplektitaj manoj, estas la plej efikaj rimedoj, por akiri favoron antaŭ la Eternulo. (*Adolfo*, episkopo de Alger. Marmande, 1862.)

## Misio de l' inteligenta homo sur la tero

13. Ne fieriĝu por tio, kion vi scias, ĉar tiu scio havas limojn tre mallarĝajn en la mondo, sur kiu vi loĝas. Ni supozu, ke vi estas unu el la plej eminentaj inteligentuloj sur ĉi tiu globo: nenian rajton vi havas esti fiera pro tio. Se Dio, en Siaj planoj, decidis, ke vi naskiĝu en medio, kie vi povis pligrandigi vian intelekton, tion Li faris, ĉar Li volas, ke vi uzu ĝin por la bono de ĉiuj; tio estas misio, kiun Li donis al vi, metante en viajn manojn la instrumenton, per kies helpo vi povas viavice elvolvi la malmulte kreskintajn intelektojn kaj ilin gvidi al Dio. Ĉu la speco de l' instrumento ne mon-

tras, por kio ĝi utilas? Ĉu ŝpato, kiun ĝardenisto metas en la manojn de sia helpanto, ne montras al ĉi tiu, ke li devas plugi la teron? Kaj kion vi dirus, se tiu laboristo, antataŭ plugi, levus sian plugetilon por frapi sian mastron? Vi dirus, ke tio estas terura, kaj ke li meritas esti maldungita. Nu, ĉu ne estas same pri tiu, kiu uzas sian intelekton, por detrui la ideon pri Dio kaj la Providenco inter siaj fratoj? Ĉu li ne levas kontraŭ sia mastro la plugetilon, kiu estas donita al li por la preparado de la grundo? Ĉu li rajtas ricevi la promesitan salajron, kaj ne meritas, kontraŭe, esti elpelita el la ĝardeno? Li estos elpelita, ne dubu pri tio, kaj trenos mizerajn ekzistadojn, plenajn de humiligoj, ĝis li kliniĝos antaŭ Tiu, al kiu li ĉion ŝuldas.

La intelekto estas riĉa per meritoj por la estonteco, sed kondiĉe, ke oni uzu ĝin por bono; se ĉiuj homoj dotitaj per intelekto uzus ĝin laŭ la celoj de Dio, la tasko de la Spiritoj, progresigi la homaron, estus facila; bedaŭrinde multaj homoj faras el ĝi instrumenton de fiero kaj de pereo por si mem. La homo misuzas sian intelekton kiel ĉiujn aliajn kapablojn, kaj tamen instruoj ne mankas al li por averti lin, ke potenca mano povas repreni de li tion, kion ĝi donis al li. (*Ferdinando*, protektanta Spirito. Bordeaux, 1862.)

ĈAPITRO VIII

# FELIĈAJ TIUJ, KIUJ HAVAS PURAN KORON

Simplanimeco kaj korpureco. Pekado per la penso. Adulto. Vera pureco. Manoj nelavitaj. Skandaloj. Se via mano estas objekto de skandalo, fortranĉu ĝin. **Instruoj de la Spiritoj**: Lasu la malgrandajn infanojn veni al mi. Faliĉaj tiuj, kiuj havas la okulojn fermitaj.

## Simplanimeco kaj korpureco

1. *Feliĉaj estas la kore puraj, ĉar ili vidos Dion.* (Mateo, 5:8.)

2. *Kaj oni venigis al li infanojn, por ke li tuŝu ilin; kaj la disĉiploj admonis ilin. Sed Jesuo, vidinte tion, indignis, kaj diris al ili:* Lasu la infanojn veni al mi*; ne malhelpu ilin, ĉar el tiaj estas la regno de Dio. Vere mi diras al vi: Kiu ne akceptos la regnon de Dio kiel infano, tiu neniel eniros en ĝi. Kaj li prenis ilin en siaj brakoj, kaj benis ilin, metinte la manojn sur ilin.* (Marko, 10:13-16.)

3. La pureco de la koro estas nedisigebla de la simplanimeco kaj de la humileco; ĝi forigas ĉian ideon pri egoismo kaj fiero; tial Jesuo prenas la infanecon kiel emblemon de tiu pureco, kiel li ĝin prenis kiel emblemon de humileco.

Tiu komparo povas ne ŝajni ĝusta, se oni konsideras, ke la Spirito de infano povas esti tre maljuna, kaj, renaskiĝante, li alportas al la enkorpa vivo la malper-

fektaĵojn, je kiuj li ankoraŭ ne seniĝis en siaj antaŭaj ekzistadoj; nur iu Spirito, veninta al la perfekteco, povus doni al ni la tipon de la vera pureco. Sed la komparo estas ĝusta el la vidpunkto de la nuna vivo; ĉar, ankoraŭ ne povinte manifesti ian malvirteman inklinon, la infano reprezentas por ni la senkulpecon kaj senmalicecon; tial Jesuo ne diris, ke la regno de Dio estas *el ili*, sed *el tiaj*; ĝi konsistas el estaĵoj *tiaj, kiaj* estas la infanoj.

4. Se la Spirito de infano jam vivadis, kial do li ne montriĝis, ekde ties naskiĝo, tia, kia li estas? Ĉio estas saĝa en la verkoj de Dio. La infano bezonas la specialajn zorgojn, kiajn nur la patrina amo povas doni al ĝi, kaj tiu amo grandiĝas pro la malforteco kaj naiveco de l' infano. Por patrino, ŝia infano estas ĉiam anĝelo, kaj estas necese, ke tiel estu, por ke ĝi kaptu ŝian sindonemon; ŝi ne povus havi por ĝi la saman inklinon, se, anstataŭ la naivan ĉarmon, ŝi trovus en ĝi, sub la trajtoj de infano, viran karakteron kaj ideojn de matura homo, kaj des malpli, se ŝi konus ĝian pasintecon.

Cetere estas necese, ka la aktiveco de l' inteligenta principo estu porporcia al la malforteco de la korpo, kiu ne povus elteni tro grandan aktivecon de la Spirito, kiel oni konstatas ĉe la individuoj tro frumaturaj. Jen kial ĉe l' alproksimiĝo de sia enkarniĝo la Spirito, konfuziĝas kaj iom post iom perdas la konscion pri si mem; dum kelka tempo li estas en kvazaŭa dormo, dum kiu ĉiuj liaj kapabloj troviĝas en latenta stato. Tiu transiĝa stato estas necesa, por ke la Spirito havu novan deirpunkton kaj forgesu, en sia nova ekzistado, ĉion, kio povus malhelpi lin. Tamen lia pasinteco reagas sur lin; li renaskiĝas pli granda, morale kaj intelekte pli forta, subtenata kaj helpata de l' intuicio, kiun li konservas pri l' akirita sperto.

Ekde la naskiĝo liaj ideoj iom post iom reprenas sian impulson, laùgrade kiel disvolviĝas la organoj, kaj pro tio oni povas diri, ke dum siaj unuaj jaroj la Spirito vere estas infana, ĉar ankoraù dormetas la ideoj formantaj la fundon de lia karaktero. Dum la tempo kiam liaj instinktoj somnolas, li estas pli fleksebla, kaj, ĝuste pro tio,

pli sentema por impresoj povantaj ŝanĝi lian naturon kaj lin progresigi, kio plifaciligas al la gepatroj la plenumon de la ilin koncernanta tasko.

La Spirito do dumtempe surmetas la veston de senkulpeco, kaj Jesuo asertas la veron, kiam, malgraù la antaùekzisto de la animo, li prenas infanon kiel simbolon de pureco kaj simpleco.

**Pekado per la penso. Adulto**

5. *Vi aŭdis, ke estas dirite: Ne adultu; sed mi diras al vi, ke ĉiu, kiu rigardas virinon, por deziri ŝin, jam adultis je ŝi en sia koro.* (Mateo, 5:27-28.)

6. La vorto *adulto* tie ĉi ne devas esti komprenata en sia ekskluziva kaj propra senco, sed en senco pli ĝenerala; Jesuo ofte uzadis ĝin, per pliampleksigo de ĝia senco, por signi la malbonon, la pekon kaj iun ajn malbonan penson, kiel, ekzemple, en tiu ĉi teksto: "Ĉar kiu hontos pri mi kaj miaj paroloj antaŭ ĉi tiu *adultema kaj peka* generacio, pri tiu ankaŭ hontos la Filo de homo, kiam li venos en la gloro de sia Patro kun la sanktaj anĝeloj." (*Marko*, 8:38.)

La vera pureco ne estas nur en la agoj; ĝi estas ankaŭ en la penso, ĉar, kiu havas puran koron, tiu tute ne pensas pri malbono; tion volis diri Jesuo: li kondamnas la pekon, eĉ per la penso, ĉar ĝi estas signo de malpureco.

7. Tiu principo per si mem kondukas al la jena demando: *Ĉu oni suferas la sekvojn de malbona penso eĉ en la okazo, se ĉi tiu donas nenian efikon*?

Tie ĉi estas necese fari gravan distingon. Laŭmezure kiel la animo, ekirinta malbonan vojon, progresas en la spirita vivo, ĝi kleriĝas kaj iom post iom seniĝas je siaj malperfektaĵoj, laŭ la pli aŭ malpli granda fervoro, kiun ĝi montras, dank’al sia libera volo. Ĉia malbona penso estas do rezultato de la malperfekteco de l' animo; sed laŭ la deziro, kiun ĝi havas, purigi sin, tiu malbona penso mem fariĝas por ĝi motivo, por ke ĝi progresu, ĉar la animo ĝin energie elpelas; tio montras ĝian klopodon por forviŝi makulon; ĝi ne cedos, se prezentiĝos la okazo kontentigi malbonan deziron; kaj ĝi sentos sin pli forta kaj pli ĝoja pro sia venko.

Kontraŭe, la animo, kiu ne prenis bonajn decidojn, serĉas la okazojn kaj, se ĝi ne plenumas malbonan agon, tio ne estas efiko de ĝia volo, sed manko de oportuna okazo; ĝi estas do tiel kulpa, kiel se ĝi estus plenuminta la agon.

Resume, ĉe la persono, kiu la malbono eĉ ne ekpensas, la progreso estas efektivigita; ĉe la persono, al kiu venas tiu penso, sed kiu ĝin forpelas, la progreso estas efektiviĝanta; ĉe tiu persono, fine, kiu havas tiun penson kaj kiu ĝin plezure konservas, la malbono ankoraŭ ekzistas kun sia tuta forto; ĉe l' unua la laboro estas farita, ĉe la dua ĝi estas farata, ĉe la tria ĝi estas farota. Dio, justa, konsideras ĉiujn tiujn gradojn, por la respondeco de la homo pri siaj agoj kaj pensoj.

## Vera pureco. Manoj nelavitaj

8. *Tiam alvenis al Jesuo el Jerusalem Fariseoj kaj skribistoj, dirante: Kial viaj disĉiploj transpaŝas la tradicion de la antaŭuloj? Ĉar ili ne lavas siajn manojn, kiam ili manĝas panon.*

*Kaj li responde diris al ili: Kial vi ankaŭ transpaŝas la ordonon de Dio per via tradicio? Ĉar Dio diris: Respektu vian patron kaj vian patrinon; kaj: Kiu malbenas sian patron aŭ sian patrinon, tiu nepre mortu. Sed vi diras: Se iu diros al sia patro aŭ al sia patrino: Oferdono estu tio, per kio vi povus profiti de mi, tiu ne devas respekti sian patron aŭ sian patrinon. Kaj vi vantigis la vorton de Dio per via tradicio. Ho hipokrituloj, bone profetis Jesaja pri vi, dirante:*

*"Ĉi tiu popolo honoras min per siaj lipoj, sed ilia koro estas malproksime de mi. Sed vane ili Min adoras, instruante kiel doktrinojn ordonojn de homoj."*

*Kaj alvokinte al si la homamason, li diris al ili: Aŭskultu kaj komprenu: Ne tio, kio eniras en la buŝon, profanas la homon; sed kio eliras el la buŝo, tio profanas la homon. Tiam veninte, la disĉiploj diris al li: Ĉu vi scias, ke la Fariseoj ofendiĝis, kiam ili aŭdis tiun diron?*

*Sed li responde diris: Ĉiu kreskaĵo, kiun mia ĉiela Patro ne plantis, estos elradikigita. Lasu ilin; ili estas blindaj kondukantoj de blinduloj. Kaj se blindulo kondukos blindulon, ambaŭ falos en fosaĵon.*

*Kaj Petro responde diris al li: Klarigu al ni tiun parabolon.*

*Kaj li diris: Ĉu vi ankaŭ estas eĉ ankoraŭ sen kompreno? Ĉu vi ne konscias, ke ĉio, eniranta en la buŝon, pasas en la ventron kaj estas elĵetata en apartan lokon? Sed tio, kio eliras el la buŝo, elvenas el la koro, kaj profanas la homon. Ĉar el la koro eliras malvirtaj pensoj, mortigoj, adultoj, malĉastaĵoj, ŝteloj, falsatestoj, blasfemoj: jen tio, kio profanas la homon, sed manĝi kun manoj nelavitaj ne profanas la homon.* (Mateo, 15:1-20.)

9. *Kaj dum li parolis, unu Fariseo invitis lin matenmanĝi kun li; kaj li eniris kaj sidiĝis. Kaj la Fariseo, ekvidinte, miris, ke li ne lavis sin antaŭ la matenmanĝo. Kaj la Sinjoro diris al li: Vi Fariseoj purigas la eksteron de kaliko kaj plado, sed via interno estas plena de rabado kaj malvirto. Malsaĝulo! Ĉu Tiu, kiu faris la eksteron, ne faris ankaŭ la internon?* (Luko, 11:37-40.)

10. La Judoj estis neglektintaj la verajn ordonojn de Dio, por alligi sin al la praktikado de la reguloj starigitaj de la homoj, kaj pri la streĉa observado de tiuj reguloj ili faris al si skrupulon; la fundo, tre simpla, fine estis malaperinta sub la komplikeco de la formo. Tial, ke estis pli facile observi eksterajn agojn, ol morale reformi sin mem, *lavi al si la manojn, ol purigi sian koron*, la homoj kreis al si iluzion kaj opiniis sin kvitaj al Dio, ĉar ili konformiĝis al tiuj formalaĵoj, tamen restante tute samaj, kiaj ili estis, ĉar oni instruis al ili, ke Dio ne postulas pli ol tion. Tial la profeto diris: *"Sed vane ili min adoras, instruante kiel doktrinojn ordonojn de homoj."*

Tiel okazis ankaŭ pri la morala doktrino de la Kristo, kiu fine estis metita en duan rangon; el tio rezultas, ke multaj kristanoj, laŭ la ekzemplo de la antikvaj Judoj, kredas, ke ilia savo estas pli certa per la eksteraj agoj, ol per la praktikado de la moralo. Al tiuj aldonoj, faritaj de la homoj, Jesuo aludas per jenaj vortoj: *"Ĉiu kreskaĵo, kiun mia ĉiela Patro ne plantis, estos elradikigita."*

La celo de la religio estas konduki la homon al Dio; nu, la homo venos al Dio nur tiam, kiam li estos perfekta; do, ĉia religio, kiu ne plibonigas la homon, ne atingas sian celon; la religio, pri kiu oni kredas, ke oni povas sur ĝi apogi sin por fari la malbonon, aŭ estas falsa aŭ falsita pri sia fundamento. Tia estas la rezultato en ĉiuj religioj, kies formo superas la fundon. La kredo al la efikeco de l' eksteraj signoj estas senvalora, se ĝi ne antaŭhaltigas murdojn, adultojn, ŝtelojn, kalumniojn, iajn ajn malutilojn al la proksimulo en iu ajn maniero.

Tiaj religioj faras supersticâjn, hipokritajn aŭ fanatikajn, sed ne faras bonajn homojn.

Ne sufiĉas do havi la ŝajnojn de la pureco; estas necese havi la purecon de la koro.

## Skandaloj. Se via mano estas objekto de skandalo, fortranĉu ĝin

11. *Ve al la mondo pro la faliloj! Ĉar estas necese, ke venu faliloj, sed ve al tiu homo, per kiu la falilo venas! Kaj se via mano aŭ via piedo faligas vin, detranĉu ĝin kaj forĵetu ĝin de vi: estas bone por vi eniri en la vivo kripla aŭ lama prefere ol, havante du manojn aŭ du piedojn, esti enĵetita en eternan fajron. Kaj se via okulo faligas vin, elŝiru ĝin kaj forĵetu ĝin de vi; estas bone por vi eniri en la vivon unuokula prefere ol, havante du okulojn, esti enĵetita en Gehenan de fajro.* (Mateo, 18:7-9.)

12. En vulgara senco, *skandalo* (*) signifas ĉian agon, kiu frapas la moralon aŭ la dececon en videbla maniero. La *skandalo* implikas ĉiam la ideon pri ia bruado. Multaj personoj kontentiĝas per tio, ke ili evitas la *skandalon*, ĉar ilia fiero suferus pro ĝi, ilia ŝatateco defalus ĉe la homoj; se nur iliaj hontindaj agoj ne estas konataj, tio sufiĉas, por ke ilia konscienco estu trankvila. Tiuj estas, laŭ la paroloj de Jesuo: "tomboj blankigitaj ekstere, sed plenaj de putraĵo en la interno; vazoj purigitaj ekstere, sed interne malpuraj".

En la evangelia senco, la signifo de la vorto *skandalo*, tiel ofte uzata, estas multe pli ampleksa; tial oni ne komprenas ĝian sencon en iuj okazoj.

Ĝi estas ne nur tio, kio ofendas la konsciencon de aliaj, sed ankaŭ ĉio, rezultanta el la malvirtoj kaj malperfektaĵoj de la homoj, ĉiu malbona reago de individuo al individuo kun aŭ sen postsekvoj. La skandalo, en tiu ĉi okazo, *estas la efektiva rezultato de la morala malbono*.

13. *Estas necese, ke venu faliloj en la mondon*, diris Jesuo, ĉar la homoj, pro tio ke ili estas malperfektaj sur la tero, estas inklinaj fari malbonon, kaj malbonaj arboj donas malbonajn fruktojn. Per tiuj vortoj oni komprenu do, ke la malbono estas sekvo de la malperfekteco de la homoj, sed ne, ke ili havas la devon fari ĝin.

14 *Estas necese, ke la falilo venu*, ĉar, estante en kulpelaĉetado sur la tero, la homoj punas sin mem per la kontakto kun siaj malvirtoj, kies unuaj viktimoj ili

---

(*) La vorton "skandalo" en la **Latina Vulgata** kaj aliaj tradukoj de la Biblio, la plej novaj tradukoj esprimas per "falilo". En la bonega kaj tre nova traduko en portugalan lingvon, farita en Brazilo kaj konata kiel "Brazila Eldono", aperas **"tropeço"** , kiu estas precize "falilo" kiel en la Esperanta eldono, kiun ni tie ĉi kopias. – **La Tradukinto.**

mem estas, kaj tiel ili fine komprenas la malbonaĵojn de la malvirtoj. Kiam ili estos lacaj de suferado pro la malbono, ili serĉos rimedon ĉe la bono. La reagado de tiuj malvirtoj sufiĉos do kiel puno por unuj kaj kiel provo por la aliaj; tiel Dio eltiras la bonon el la malbono, kaj la homoj mem utiligas la malbonajn aŭ forĵetindajn aĵojn.

15. Se tiel estas, oni diros, la malbono estas necesa kaj daŭros ĉiam; ĉar, se ĝi malaperus, Dio jam ne disponus povan rimedon por puni la kulpulojn; estas senutile peni plibonigi la homojn. Sed, se ne estus plu kulpuloj, punoj jam ne estus necesaj. Ni supozu, ke la homaro aliformiĝos kaj ekkonsistos el virtaj homoj, neniu penos fari malbonon al sia proksimulo, kaj ĉiuj estos feliĉaj, ĉar ili estos bonaj. Tia estas la stato de la progresintaj mondoj, el kiuj la malbono estas forigita; tia estos la stato de la tero, kiam ĝi estos sufiĉe progresinta. Sed dum unuj mondoj progresas, aliaj estiĝas, loĝataj de primitivaj Spiritoj, kaj tiuj novaj mondoj estas ankaŭ uzataj kiel loĝejo, ekzilejo kaj kulpelaĉetejo por la neperfektaj Spiritoj ribelemaj, obstinantaj en la malbono, elpelitaj el la mondoj, kiuj fariĝis feliĉaj.

16. *Ve al tiu homo, per kiu la falilo venas*! Tio signifas, ke, ĉar malbono estas ĉiam malbono, tiu, kiu kontraŭvole servis kiel instrumento de la dia justeco, tiu, kies malbonaj instinktoj estis utiligitaj, eĉ tiel praktikis la malbonon kaj devas esti punata. Tial, ekzemple, sendanka infano estas puno aŭ provo por la patro, kiu suferas pro tio, ĉar tiu patro mem eble estis malbona filo kaj suferigis sian patron; tial li ricevas egalan repunon; sed pro ĉi tiu fakto la filo ne estas pardoninda kaj devos esti punata siavice per siaj propraj infanoj aŭ alimaniere.

17. *Kaj se via mano aŭ via piedo faligas vin, detranĉu ĝin kaj forĵetu ĝin de vi.* Energia figuro, kiu estus absurda, se prenita laŭlitere, kaj kiu simple signifas, ke estas necese detrui en si mem ĉian kaŭzon de skandalo, tio estas, de malbono; elradiki el sia koro ĉian senton malpuran kaj ĉian malvirtan inklinon; tio ankaŭ signifas, ke pli bone estus por homo havi unu manon fortranĉita, ol se tiu mano estus por li instrumento por malbona ago; se li estus senigita je la vidpovo, prefere ol se la okuloj alportus al li malbonajn pensojn. Jesuo nenion diris absurdan por iu ajn, kiu kaptas la alegorian kaj profundan sencon de liaj paroloj; sed multaj esprimoj ne povas esti komprenataj sen la ŝlosilo, kiuj Spiritismo proponas por ilia deĉifrado.

## INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

### Lasu la malgrandajn infanojn veni al mi

18. La Kristo diris: "Lasu la malgrandajn infanojn veni al mi". Tiuj vortoj, profundaj laŭ sia simpleco, ne enhavis en si ian simplan alvokon al la infanoj, sed ankaŭ al la animoj, kiuj treniĝas en la malaltaj rondoj, kie la malfeliĉo ne konas esperon. Jesuo vokis al si la intelektan infanaĝon de la homa kreitaro: la malfortulojn, la sklavojn, la malvirtulojn; li nenion povis instrui al la infanoj laŭ la korpo, implikitaj en la materio, submetitaj al la jugo de l' instinkto kaj ne apartenantaj ankoraŭ al la supera ordo de la racio kaj de la volo, kiuj plenumiĝas ĉirkaŭ ili kaj por ili.

Jesuo volis, ke la homoj venu al li kun la konfido de tiuj malgrandaj estuloj de ŝanceliĝantaj paŝoj, kies alvoko konkerus por li la korojn de la virinoj, kiuj estas ĉiuj patrinoj; tiel li submetis la animojn al sia milda kaj mistera aŭtoritateco. Li estis la torĉo, kiu disbatas la mallumon, la klariono, kiu sonigas la veksignalon; li

estis la iniciatinto de Spiritismo, kiu siavice devas voki, ne la malgrandajn infanojn, sed la bonvolemajn homojn. La forta agado estas komencita; la afero jam ne estas pri instinkta kredo kaj meĥanika obeado; estas necese, ke la homo sekvu la inteligentan leĝon, kiu montriĝas al li laŭ sia universaleco.

Miaj tre amataj, jen la tempo, kiam, klarigite, la eraroj estos veraĵoj; ni instruos al vi la veran sencon de la paraboloj, kaj ni montros al vi la potencan inter-respondecon, kiu ligas tion, kio estis, kun tio, kio estas. Vere mi diras al vi: la manifestiĝado de la Spiritoj pli-vastigas la horizonton; kaj jen ĝia sendito, kiu brilos kiel la suno sur la supraĵo de la montoj. (*Johano, la Evangeliisto*. Parizo, 1863.)

19. Lasu la malgrandajn infanojn veni al mi, ĉar mi posedas la lakton, kiu fortikigas la malfortulojn. Lasu veni al mi tiujn, kiuj, timemaj kaj malfortaj, bezonas apogon kaj konsolon. Lasu veni al mi la neklerulojn, por ke mi ilin instruu; lasu veni al mi ĉiujn, kiuj suferas, la amason da afliktitoj kaj da malfeliĉuloj: mi konigos al ili la grandan rimedon, kiu mildigas la suferojn de la vivo, la sekreton por resanigo de iliaj vundoj! Kia estas, miaj amikoj, tiu potenca balzamo, posedanta tian ĉio-kuracantan efikon, tiu balzamo, kiu estas aplikata al ĉiuj vundoj de la koro kaj ilin fermas? Ĝi estas amo, karito! Se vi posedas tiun dian fajron, kion vi timas? Vi diros ĉe ĉiuj momentoj de via vivo: Mia Patro, fariĝu Via volo, ne la mia; se al Vi plaĉas elprovi min per la doloroj kaj per la ĉagrenoj, estu glorata, ĉar nur por mia bono, mi tion scias, Via mano pezas sur mi. Se al Vi plaĉas, Sinjoro, kompati Vian malfortan kreiton, doni al lia koro la permesitajn ĝojojn, estu ankaŭ glorata; sed konsentu, ke la dia amo ne malvigliĝu en lia animo kaj ke senĉese lia animo venigu al Viaj piedoj la voĉon de sia dankemo!

Se vi havos amon, vi havos ĉion dezirindan sur la tero, vi posedos la multvaloran perlon, kiun nek la okazaĵoj, nek la malboneco de tiuj, kiuj malamas kaj persekutas vin, povos forrabi de vi. Se vi havas amon, vi estos metintaj viajn trezorojn tien, kie vermoj aŭ rusto ne povos ilin atingi, kaj vi vidos nesenteble forviŝiĝi de via animo ĉion, kio povas makuli ĝian purecon; vi sentos, ke la pezo de la materio malgrandiĝas tago post tago kaj ke, simile al birdo, kiu ŝvebas en la aero kaj ne plu memoras la teron, vi supreniros senĉese, ĝis via animo ekzaltita povos satiĝi de sia elemento de vivo en la sino de la Sinjoro. (*Protektanta Spirito*. Bordeaux, 1861.)

## Feliĉaj tiuj, kiuj havas la okulojn fermitaj (*)

20. Miaj bonaj amikoj, kial vi vokis min? Ĉu por ke mi surmetu la manojn sur ĉi tiun kompatindan suferantinon kaj sanigu ŝin? Ve! kia sufero, bona Dio! Ŝi perdis la vidpovon kaj mallumo fariĝis por ŝi. Kompatinda filino! ŝi preĝu kaj esperu; mi neniel scias fari miraklojn sen la volo de Dio. Ĉiujn resaniĝojn, kiujn mi povis havigi kaj kiuj estas konigitaj al vi, atribuu nur al Tiu, kiu estas Patro de ni ĉiuj. En viaj afliktoj, rigardu do ĉiam la ĉielon; kaj diru el la fundo de via koro: "Mia Patro, resanigu min, sed konsentu, ke mia malsana animo resaniĝu pli frue, ol mia korpo; mia karno estu punata, se necese, por ke mia animo leviĝu al Vi tiel blanka, kiel ĝi estis, kiam Vi kreis ĝin." Post tiu preĝo, miaj bonaj amikoj, kiun la bona Dio aŭdos ĉiam, forto kaj kuraĝo estos donitaj al vi, kaj eble ankaŭ la resaniĝo, kiun vi nur timeme petis, kiel rekompenco por via abnegacio.

(*) Tiu ĉi komunikaĵo estas donita pri blinda persono, por kiu oni vokis la Spiriton de J. B. Vianney, paroĥestro en Ars.

Sed tial, ke mi estas tie ĉi, en kunveno, kie oni precipe studas, mi diros al vi, ke tiuj, kiuj estas senigitaj je la vidpovo, devus konsideri sin kiel la feliĉulojn de la kulpelaĉeto. Memoru, ke la Kristo diris, ke estas bone elŝiri al si okulon, se ĝi estas malbona, kaj ke estus pli bone ĵeti ĝin en la fajron, ol se ĝi fariĝus kaŭzo de via pereo. Ve! kiom da homoj estas sur via tero, kiuj iam malbenos en mallumo la fakton, ke ili vidis la lumon! Ho! jes, feliĉaj estas tiuj, kiuj en kulpelaĉeto estas frapitaj ĉe la vidpovo! iliaj okuloj ne estos motivo de skandalo kaj falo; tiuj povas plene vivi per la vivo de l' animoj; ili povas vidi pli ol vi, kiuj vidas klare... Kiam Dio permesas al mi malfermi la palpebron de unu el tiuj kompatindaj suferantoj kaj redoni al li la lumon, mi diras la mi mem: Kara animo, kiel bedaŭrinde, ke ci ne konas ĉiujn ĝuojn de la Spirito, kiu vivas per meditado kaj amo! ci ne petus vidi figurojn malpli purajn kaj malpli dolĉajn, ol tiuj, kiujn ci povas vidi en cia blindeco.

Ho! feliĉa la blindulo, kiu volas vivi kun Dio; pli feliĉa, ol kiel vi estas tie ĉi, li sentas la feliĉon, li ĝin tuŝas, li vidas la animojn kaj povas suprenflugi kun ili en la spiritajn sferojn, kiujn eĉ la elektitoj de via tero ne povas vidi. Malfermitaj, la okuloj estas ĉiam pretaj konduki la animon en pekon; fermitaj okuloj, kontraŭe, estas ĉiam pretaj suprenirigi la animon al Dio. Kredu al mi, miaj bonaj kaj karaj amikoj, la senlumeco de l' okuloj estas ofte la vera lumo de la koro, dum la vidpovo estas ofte la malluma anĝelo, kiu kondukas al morto.

Kaj nun kelkaj vortoj al ci, mia kompatinda suferantino: esperu kaj estu kuraĝa! Se mi dirus al ci: Mia filino, ciaj okuloj malfermiĝos, kiel ĝoja ci estus! sed kiu scias, ĉu tiu ĝojo ne pereigus cin? Fidu al la bona Dio, kiu faris la feliĉon kaj permesas la malĝojon! Mi

faros por ci ĉion, kio estos al mi permesita; sed, ciavice, preĝu kaj precipe pensu pri ĉio, kion mi ĵus diris al ci.

Antaŭ ol mi foriros, vi ĉiuj, tie ĉi kunvenintaj, ricevu mian benon. (*Vianney, paroĥestro en Ars*. Parizo, 1863.)

21. *Rimarko.* Kiam aflikto ne estas sekvo de agoj dum la nuna vivo, estas necese serĉi ĝian kaŭzon en antaŭa vivo. Tio, kion oni nomas la kapricoj de la sorto, estas nenio alia, ol la efikoj de la justeco de Dio. Dio ne trudas maljustajn punojn; Li volas, ke inter kulpo kaj puno estu ĉiam rilato. Se, laŭ Sia boneco, Li ĵetis vualon sur niajn pasintajn agojn, Li tamen nin metas sur la vojon, dirante: "Kiu per glavo mortigas, tiu per glavo pereos"; paroloj, kiujn oni povas jene traduki: "Oni estas ĉiam punata laŭ sia peko". Se do iun turmentas la perdo de la vidpovo, ĉi tiu estis ja por li kaŭzo de falo. Eble li ankaŭ estis kaŭzo de la perdo de aliula vidpovo; eble iu blindiĝis pro eksceso de laboro trudita de li, aŭ sekve de kruelaĵoj, de manko de zorgoj, ktp, kaj tiam li spertas egalan punon. Eble li mem, pentinte, elektis tiun kulpelaĉeton kaj aplikis al si jenan parolon de Jesuo: "Se via okulo estas kaŭzo de via falo, elŝiru ĝin."

ĈAPITRO IX

# FELIĈAJ TIUJ, KIUJ ESTAS MILDAJ KAJ PACAMAJ

Ofendoj kaj perfortoj. **Instruoj de la Spiritoj**: La afableco kaj la dolĉeco. La pacienco. Obeemo kaj rezignacio. La kolero.

## Ofendoj kaj perfortoj

1. *Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron.* (Mateo, 5:5 .)

2. *Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj.* (Sama, 9.)

3. *Vi aŭdis, ke estas dirite al la antikvuloj: Ne mortigu, kaj kiu mortigos, tiu estos en danĝero de juĝado; sed mi diras al vi, ke kiu koleras kontraŭ sia frato, tiu estos en danĝero de juĝado; kaj kiu diros al sia frato:* Raka*, tiu estos en danĝero de sinedrio; kaj kiu diros:* Malsaĝulo*, tiu estos en danĝero de Gehena de fajro.* (Sama, 21, 22.)

4. Per ĉi tiuj maksimoj Jesuo faras leĝon el dolĉeco, el mildeco, el afableco kaj el pacienco; li do kondamnas perforton, koleron kaj eĉ ĉian malĝentilan esprimon de iu kontraŭ siaj similuloj. *Raka* estis ĉe la Hebreoj malŝata vorto, kiu signifis *sentaŭgulo*, kaj kiun oni

ekparolis kraĉante kaj flanken turnante la kapon. Lia parolo estas ankoraŭ pli severa, ĉar li minacas per la fajro de l' infero ĉiun, kiu diros al sia frato: *Malsaĝulo*.

Estas evidente en tio, kiel en ĉiuj cirkonstancoj, ke la intenco pligravigas la kulpon; sed kial simpla parolo povas havi tian gravecon, ke ĝi meritus tian severan malaprobon? Tial, ke ĉia ofenda vorto esprimas senton kontraŭan al la leĝo de amo kaj de karito, kiu devas regi la interrilatojn de la homoj kaj teni inter ili konkordon kaj unuecon; estas atenco kontraŭ la reciproka bonvolemo kaj la frateco; nutras malamon kaj malfavoremon; fine tial, ke post la humileco antaŭ Dio, la karito al la proksimulo estas la unua leĝo de ĉiu kristano.

5. Sed, kion Jesuo volis do esprimi per jenaj vortoj: "Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron", se li admonis la homojn rezigni la ĉimondajn havaĵojn kaj promesis al ili la ĉielajn havaĵojn?

Atendante la bonaĵojn de la ĉielo, la homo bezonas tiujn de la tero por vivi; li nur atentigas, ke oni ne alligu pli da graveco al la lastaj, ol al la nunaj.

Per tiuj vortoj li volis diri, ke ĝis hodiaŭ la bonaĵoj de la tero estas akaparitaj de la perfortuloj malprofite por la mildaj kaj pacamaj homoj; ke al ĉi tiuj ofte mankas la vivrimedoj, dum la aliaj posedas superflue; li promesas, ke justeco estos farita *al ili tiel sur la tero, kiel en la ĉielo*, ĉar ili estos nomataj filoj de Dio. Kiam la leĝo de amo kaj de karito estos la leĝo de la homaro, ne plu ekzistos egoismo; la malforta kaj la pacama ne plu estos ekspluatataj kaj subpremataj de la forta kaj de la perfortema. Tia estos la stato de la tero, kiam, laŭ la leĝo de la progreso kaj la promeso de Jesuo, ĝi estos fariĝinta mondo feliĉa, sekve de la forpelo de la malbonuloj.

INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

## La afableco kaj la dolĉeco

6. La bonvolemo por siaj similuloj, frukto de l' amo al la proksimulo, naskas la afablecon kaj la dolĉecon, kiuj estas ilia manifestiĝo. Tamen oni ne devas ĉiam fidi je la ŝajnoj; la edukiteco kaj la mondumaj decreguloj povas havigi al la homo ian surtavolaĵon de tiuj kvalitoj. Kiom da homoj estas, kies ŝajna afableco estas nur porekstera vesto, kies bela tranĉo kaŝas iliajn internajn misformaĵojn! La mondo estas plena de tiuj personoj, *kiuj estas dolĉaj, kondiĉe ke neniu ilin kolerigu, sed kiuj mordas ĉe l' unua kontraŭaĵo*; kies lango, el oro, kiam ili parolas antaŭ vi, fariĝas venena sago, kiam vi forestas.

Al tiu klaso apartenas ankaŭ la homoj, ekstere indulgemaj, kiuj, hejmaj tiranoj, igas sian familion kaj siajn subulojn suferi la pezon de ilia fiera despoteco, kvazaŭ por kompensi al si la ĝenecon, kiun ili trudas al si mem eksterhejme; ne kuraĝante montri aŭtoritatecon super fremduloj, kiuj remetus ilin en ilian lokon, ili volas almenaŭ fari sin timataj de tiuj, kiuj ne povas malcedi al ili; ilia vantemo ĝuas, povante diri: "Tie ĉi mi ordonas kaj estas obeata", ne atentante, ke ili povus aldoni pli prave: "kaj mi estas abomenata".

Ne sufiĉas, ke el la lipoj fluas lakto kaj mielo; se la koro ne partoprenas en tio, estas nur hipokriteco. Tiu, kies afableco kaj mildeco ne estas nur ŝajnaj, neniam kontraŭdiras sin; li estas la sama en la socio kaj inter intimuloj; cetere li scias, ke, se per ŝajnoj oni trompas la homojn, Dion neniu trompas. (*Lazaro*. Parizo, 1861.)

## La pacienco

7. La doloro estas beno, kiun Dio sendas al Siaj elektitoj; ne alfiktiĝu do, kiam vi suferas, sed kontraŭe,

laŭdu la ĉiopovan Dion, kiu markis vin per la doloro sur la tero, por la gloro en la ĉielo.

Estu paciencaj; pacienco estas ankaŭ karito, kaj vi devas praktiki la leĝon de karito instruita de la Kristo, la sendito de Dio. La karito, kiu konsistas el almozo donata al la malriĉuloj, estas la plej facila el la karitoj; sed estas alia multe pli peniga kaj sekve multe pli merita: *pardoni tiujn, kiujn Dio metis sur nian vojon, por ke ili estu instrumentoj de niaj suferoj kaj elprovu nian paciencon.*

La vivo estas malfacila, mi tion scias; ĝi estas kunmetita el mil neniaĵoj, kiuj estas pikoj de pingloj, sed kiuj fine vundas; sed estas necese rigardi unuflanke la devojn trudatajn al ni, kaj aliflanke la ricevatajn konsolojn kaj kompensojn: tiam ni vidos, ke la benoj estas pli multenombraj ol la doloroj. La ŝarĝo ŝajnas malpli peza, kiam oni rigardas supren, ol tiam, kiam oni klinas la frunton al la tero.

Kuraĝon, amikoj. La Kristo estas via modelo; li suferis pli, ol iu ajn el vi, kaj li havis nenion pentindan; vi, kontraŭe, devas elaĉeti vian pasintecon kaj fortigi vin por la estonteco. Estu do paciencaj; estu kristanoj; tiu ĉi vorto enfermas ĉion. (*Amika Spirito*. Le Havre, 1862.)

## Obeemo kaj rezignacio

8. La doktrino de Jesuo instruas ĉie la obeemon kaj rezignacion, du virtojn kunirantajn kun dolĉeco kaj tre viglajn, kvankam la homoj erare ilin konfuzas kun la negacio de la sento kaj de la volo. *La obeemo estas la konsento de la racio; la rezignacio estas la konsento de la koro*; ambaŭ estas agantaj fortoj, ĉar ili portas la ŝarĝon de la provoj, kiun la malprudenta ribelo igas la homon delasi. La malkuraĝulo ne povas esti rezignaciema, same kiel la fierulo kaj la egoisto ne povas esti

obeemaj. Jesuo estis la enkonrpiĝo de tiuj virtoj malŝatataj de materialistaj antikvuloj. Li venis en la momento, kiam la roma socio estis pereanta en la svenoj de la koruptado; li venis, por briligi en la sino de la senfortiĝinta homaro la venkojn de la sinofero kaj de la karna rezigno.

Ĉiu epoko estas do markita per la stampo de la virto aŭ de la malvirto, kiu devas ĝin savi aŭ pereigi. La virto de via generacio estas la intelekta aktiveco; ĝia malvirto estas la morala indiferenteco. Mi diras nur "aktiveco", ĉar la genio elstariĝas subite kaj eltrovas tute sola la horizontojn, kiujn la amaso nur poste vidos, dum la aktiveco estas kuniĝo de ĉies kloplodoj al celo malpli brila, tamen pruvo de intelekta nivelo de iu epoko. Submetiĝu al la impulso, kiun ni venas doni al viaj Spiritoj; obeu la grandan leĝon de la progreso, kiu estas la vorto de via generacio. Ve al la malagema Spirito, kiu ĉirkaŭbaras sian komprenpovon! ĉar ni, kiuj estas gvidantoj de la marŝanta homaro, ni frapos lin per vipo kaj subpremos lian ribeleman volon per la duobla agado de brido kaj sprono; ĉiu fiera kontraŭstaro pli aŭ malpli baldaŭ devos cedi; sed feliĉaj tiuj, kiuj estas dolĉaj, ĉar ili klinos mildan orelon al la instruoj. (*Lazaro*. Parizo, 1863.)

## Kolero

9. La fiero instigas vin al la supozo, ke vi valoras pli, ol kiom reale vi valoras; igas vin ne elteni komparon, kiu eble malaltigus vin; konsideri vin mem, kontraŭe, tiel super viaj fratoj, ĉu laŭ inteligenteco, ĉu laŭ socia pozicio, ĉu laŭ personaj kapabloj, ke eĉ la plej malgranda komparado vin incitas kaj ĉagrenas; kaj kio tiam okazas? vi fordonas vin al la kolero.

Serĉu la originon de tiuj atakoj de nedaŭra frenezeco, kiuj vin similigas al bruto, per la perdo de la

flegmo kaj prudento; serĉu, kaj vi preskaŭ ĉiam trovos kiel bazon la vunditan fieron. Ĉu ne la fiero igas vin forĵeti pravajn observojn, forpeli kun kolero la plej saĝajn konsilojn? Eĉ la malpaciencaj gestoj, kiujn kaŭzas ĉagrenoj ofte infanecaj, venas de la graveco, kiun oni atribuas al sia personeco, antaŭ kiu oni opinias, ke ĉio devas fleksiĝi.

En sia furiozeco, la kolerema homo atakas ĉion, la bestojn, la senvivajn objektojn, kiujn li frakasas, ĉar ili ne obeas lin. Ha! se en tiuj momentoj li povus malvarmsange vidi sin, li timus sin aŭ trovus sin tre ridinda! Li juĝu do laŭ tio la impreson, kiun li ja faras sur aliajn. Eĉ se ne pro respekto al si mem, li devus tamen penadi venki inklinon, kiu faras el li objekton de kompato.

Se li pripensus, ke la kolero neniom helpas, malutilas lian sanon, endanĝerigas eĉ lian vivon, li konstatus, ke li mem estas ĝia viktimo; sed precipe alia konsidero devus lin reteni, nome la penso, ke li malfeliĉigas siajn samrondanojn. Se li estas bonkora, ĉu ne estas por li motivo de konsciencriproĉo suferigi la homojn, kiujn li plej amas? Kaj kia profunda bedaŭro tio estus, se, dum koleratako, li farus ian agon, pri kiu li devus plori dum sia tuta vivo!

Resume, la kolero ne esceptas iujn kvalitojn de la koro; se ĝi malebligas la faradon de multe da bono kaj povas konduki al la farado de multe da malbono. Tio devas sufiĉi, por instigi la homon klopodi por ĝin bridi. La spiritiston cetere instigas al tio alia motivo, nome, ke la kolero estas kontraŭa al la kristanaj karito kaj humileco (*Protektanta Spirito*. Bordeaux, 1863.)

10. Laŭ la tre falsa ideo, ke li ne povas refari sian propran naturon, la homo opinias, ke li ne bezonas fari penojn por korekti sian mankojn, ĉe kiuj li volonte

plezuras aŭ kiuj postulas fortan persistadon, por esti elradikitaj; tial, ekzemple, la homo inklina al la kolero preskaŭ ĉiam senkulpigas sin, atribuante ĝin al sia temperamento; anstataŭ konfesi sin kulpa, li ĵetas la kulpon sur sian organismon, kaj tiel li akuzas Dion pri siaj propraj malbonagoj. Tio estas ankaŭ sekvo de la fiero, ekzistanta meze en ĉiuj homaj malperfektaĵoj.

Sen ia dubo, estas temperamentoj, kiuj pli bone ol aliaj taŭgas por perfortaj agoj, same kiel estas muskoloj pli elastaj, kiuj pli bone taŭgas por agoj de la forto; sed ne kredu, ke tie kuŝas la unua kaŭzo de la kolero, kaj estu konvinkitaj, ke pacama Spirito, eĉ se en korpo incitiĝema, estas ĉiam pacama; kaj ke perfortema Spirito, en malfortika korpo, ne estas tamen pli milda; okazas nur tio, ke la perfortemo prenas alian formon: ne disponante je organismo, kiu ĝin taŭge helpus ĉe perfortaj agoj, la kolero reteniĝas, dum en kontraŭa okazo ĝi plene elversiĝas.

La korpo ne havigas koleron al iu, ne havanta emon al kolero, tute same, kiel ĝi ne havigas la ceterajn malvirtojn. Ĉiaj virtoj kaj ĉiaj malvirtoj estas esence propraj al la Spirito; se ne estus tiel, kiaj estus la merito kaj la respondeco? Kriplulo ne povas fariĝi sendifekta, ĉar la Spirito havas nenion komunan kun la kripleco; sed li povas modifi tion, kio apartenas al la Spirito, kiam li havas por tio firman volon. Ĉu la observado ne montras al vi, spiritistoj, ĝis kie povas iri la potenco de la volo, per la aliformiĝoj vere miraklaj, kiujn vi vidas? Diru do, ke *la homo restas malvirta nur tial, ke li ja volas resti malvirta*; se ke tiu, kiu volas korekti sin, povas ĉiam tion fari; alimaniere la leĝo de la progreso ne ekzistus por la homo. (*Hahnemann*. Parizo, 1863.)

## ĈAPITRO X

## FELIĈAJ TIUJ, KIUJ ESTAS KOMPATEMAJ

Pardonu por ke Dio pardonu vin. Interkonsenti kun siaj kontraŭuloj. La ofero plej agrabla al Dio. La lignereto kaj la trabo en la okulo. Ne juĝu, por ke vi ne estu juĝata. Kiu estas senkulpa, tiu ĵetu la unuan ŝtonon. **Instruoj de la Spiritoj:** Pardonu je l' ofendoj. La indulgemo. Ĉu estas permesate admoni aliajn; rimarki la neperfektaĵojn de aliaj; diskonigi al malfortan flankon de aliulo?

### Pardonu, por ke Dio pardonu vin

1. *Feliĉaj estas la kompatemaj, ĉar ili ricevos kompaton.* (Mateo, 5:7.)

2. *Ĉar se vi pardonas al homoj iliajn kulpojn, via Patro ĉiela ankaŭ pardonos al vi. Sed se vi ne pardonas al homoj iliajn kulpojn, via Patro ankaŭ ne pardonos viajn kulpojn.* (Mateo,6:14-15.)

3. *Kaj se via frato pekos kontraŭ vi, iru kaj montru al li la kulpon inter vi kaj li sola. Se li aŭskultos vin, vi gajnos vian fraton. Tiam Petro venis kaj diris al li: Sinjoro, kiomfoje povu peki mia frato kontraŭ mi, kaj mi pardonu lin? ĝis sep fojoj? Jesuo diris al li: Mi ne diras al vi: Ĝis sep fojoj; sed: Ĝis sepdekoble sep fojoj.* (Mateo, 18:15, 21-22.)

4. La kompatemo estas alplenigaĵo de la mildeco; ĉar, kiu ne estas kompatema, tiu ne povas esti milda kaj

pacama; ĝi konsistas en la forgeso kaj pardono je l' ofendoj. La malamo kaj la venĝemo signas animon sen supereco kaj grandeco; la forgeso pri l' ofendoj estas kvalito de alte staranta animo, ŝvebanta super la atencoj, kiujn oni povas fari kontraŭ ĝi; unu estas ĉiam maltrankvila, suspektema, acidhumora; la alia estas trankvila, plena de indulgemo kaj karito.

Ve al tiu, kiu diras: Mi neniam pardonos, ĉar, se li ne estos kondamnita de la homoj, li nepre estos kondamnita de Dio; kun kia rajto li petos pardonon por siaj propraj kulpoj, se li mem ne pardonas la aliulajn? Jesuo instruas al ni, ke la kompatemo ne devas havi limojn, kiam li diras, ke oni pardonu sian fraton, ne sep fojojn, sed ĝis sepdekoble sep fojoj.

Sed estas du tre malsimilaj manieroj pardoni: la unua, alta, nobla, vere grandanima, sen ia kaŝita penso, kiu delikate sin detenas vundi la memamon kaj la sentemon de la kontraŭulo, eĉ se ĉi tiu lasta estas tute malprava; la dua, per kiu la ofendito, aŭ tiu, kiu sin kredas ofendita, trudas al la alia humiligajn kondiĉojn kaj sentigas la pezon de iu pardono, kiu kolerigas, anstataŭ trankviligi; se li aletendas sian manon, li tion faras ne kun bonvolemo, sed kun sinmontremo, por povi distrumpeti al ĉiuj: Vidu kiel grandanima mi estas! En tiaj cirkonstancoj, reamikiĝo sincera estas neebla. Ne, en tio ne ekzistas grandanimeco, sed maniero kontentigi la fieron. En ĉiuj disputoj, kiu montriĝas pli akordiĝema, kiu montras pli da sindonemo, da karito kaj da vera grandeco de animo, tiu ĉiam ricevas la simpation de senpartiaj personoj.

## Interkonsenti kun siaj kontraŭuloj

5. *Konsentu rapide kun via kontraŭulo, dum vi estas kun li sur la vojo, por ke la kontraŭulo ne transdonu vin al la juĝisto, kaj la juĝisto al la subulo, kaj por ke vi ne*

*estu ĵetita en malliberejon. Vere mi diras al vi, ke vi neniel eliros el tie, ĝis vi pagos la lastan kodranton.*(Mateo, 5: 25-26.)

6. En la praktikado de la pardono kaj ĝenerale en la farado de la bono, estas pli ol morala efiko: estas ankaŭ materia efiko. La morto, oni scias, ne liberigas nin de niaj malamikoj; la venĝemaj Spiritoj ofte persekutas en transtombo tiujn, kontraŭ kiuj ili konservas malamon; tial la proverbo, kiu tekstas: "Serpento post morto – veneno sen forto" , estas malvera, kiam aplikata pri la homo. La malica Spirito atendas, ke tiu, al kiu li deziras malbonon, estu enkatenita en sia korpo kaj tial malpli libera, por pli facile turmenti lin, por lin trafi ĉe liaj interesoj aŭ ĉe liaj plej karaj korinklinoj. En tiu fakto kuŝas la kaŭzo de la plimulto el la okazoj de obsedo, precipe el tiuj iel gravaj, kiaj la subjugado kaj la posedado. La obsedito kaj la posedito estas preskaŭ ĉiam viktimoj de venĝo, al kiu kredeble ili mem donis kaŭzon per sia konduto en antaŭa enkarniĝo. Dio permesas tion, por puni ilin pro la malbono, kiun ili mem faris, aŭ, se ili ne faris malbonon, pro ilia manko de indulgemo kaj de karito, ke ili ne pardonis ricevitajn ofendojn. El la vidpunkto de l' estonta trankvileco, gravas do, ke ĉiu riparu plej baldaŭ la maljustaĵojn, kiujn oni faris al sia proksimulo, pardonu siajn malamikojn, por estingi, antaŭ ol morti, ĉiujn kaŭzojn de malpaco, ĉiujn kaŭzojn de postmorta malamikeco; tiamaniere el sangsoifa malamiko, en tiu ĉi mondo, oni povas fari al si amikon en la alia; almenaŭ tiu, kiu tiel agas, tiras la bonan rajton en sian flankon, kaj Dio ne permesas, ke la pardoninto estu celo de venĝo. Kiam Jesuo admonas la homon paciĝi kiel eble plej baldaŭ kun sia kontraŭulo, li celas ne nur fini la malpacon dum la nuna ekzistado, sed eviti, ke la malpaco eterniĝu en estontaj ekzistadoj. Vi neniel eliros el tie, el la malliberejo, li

diras, ĝis vi pagos la lastan kodranton, tio estas, ĝis vi plene kvitiĝos al la dia justeco.

## La ofero plej agrabla al Dio

7. *Tial, se vi prezentas vian oferon ĉe l' altaro, kaj tie memoras, ke via frato havas ion kontraŭ vi, lasu tie vian oferon antaŭ la altaro, kaj foriru, unue paciĝu kun via frato, kaj poste venu kaj prezentu vian oferon.* (Mateo, 5:23-24.)

8. Kiam Jesuo diras: "Foriru, unue paciĝu kun via frato, kaj poste venu kaj prezentu vian oferon", li instruas, ke la ofero plej agrabla al la Sinjoro estas la ofero de la propra resento; ke antaŭ ol prezenti sin al Li, por esti pardonita, oni mem devas pardoni, kaj ke, se oni faris ian maljustaĵon al sia frato, estas necese ĝin ripari; nur tiam la ofero estos akceptita, ĉar ĝi venos el pura koro, liberigita de ĉia malbona penso. Li materiigis tiun instruon, ĉar la Judoj faradis materiajn oferojn; li devis konformigi siajn parolojn al iliaj kutimoj. La kristano ne faras materiajn donacojn, ĉar li malmateriigis la oferon; sed el tio la instruo ekhavis pli da forto. Li oferas sian animon al Dio, kaj tiu animo devas esti purigita; *enirante en la templon de la Sinjoro, li devas lasi ekstere ĉian senton de malamo kaj de malbonvolemo, ĉian malbonan penson kontraŭ sia frato;* nur tiam lia preĝo estos portata de l' anĝeloj al la piedoj de l' Eternulo. Jen, kion instruas Jesuo per tiu paroloj: Lasu vian oferon, antaŭ la altaro kaj unue iru paciĝi kun via frato, se vi volas plaĉi al la Sinjoro.

## La lignereto kaj la trabo en la okulo

9. *Kaj kial vi rigardas la lignereton en la okulo de via frato, kaj ne pripensas la trabon en via okulo? Kiel vi diros*

*al via frato: Lasu min eltiri la lignereton el via okulo; kaj jen la trabo en via propra okulo? Hipokritulo, eligu unue la trabon el via okulo, kaj tiam vi klare vidos, por eltiri la lignereton el la okulo de via frato.* (Mateo, 7:3-5)

10. Unu el la malsaĝaĵoj de la homaro estas vidi la mizeraĵon de aliulo, antaŭ ol vidi tiun, kiu estas en ni mem. Por juĝi sin mem, la homo devus povi rigardi en spegulo, iamaniere eliri eksteren de si mem, konsideri sin kiel alian personon, kaj demandi sin: Kion mi pensus, se mi vidus iun fari tion, kion mi faras? Sendube, nenio alia ol la fiero igas la homon kaŝi de si mem siajn proprajn malperfektaĵojn, ĉu moralajn, ĉu fizikajn. Tiu malbona kutimo estas tute kontraŭa al la karito, ĉar la vera karito estas modesta, simpla, indulgema; fiera karito estas sensensaĵo, ĉar tiuj du sentoj nuligas unu alian. Ĉu efektive, homo tiel vanta, ke li kredus la gravecon de sia personeco kaj la superecon de siaj kvalitoj, povus samtempe havi sufiĉe da abnegacio por fari elstara en alia la bonaĵon, kiu povus mallumigi lin, anstataŭ la malbonaĵon, kiu povus plialtigi lin, la juĝanton? Ĝuste tial, ke fiero estas la patro de multe da malvirtoj, ĝi estas ankaŭ la negacio de multe da virtoj; oni trovas ĝin en la fundo kaj kiel motivon de preskaŭ ĉiuj agoj. Tial Jesuo senĉese ĝin kontraŭbatalas kiel ĉefan baron al la progreso.

### Ne juĝu, por ke vi ne estu juĝata. Kiu estas senpeka, tiu ĵetu la unuan ŝtonon

11. *Ne juĝu, por ke vi ne estu juĝataj. Ĉar per kia juĝo vi juĝos, per tia vi estos juĝitaj; kaj per kia mezuro vi mezuros, per tia oni mezuros al vi.* (Mateo, 7:1-2)

12. *Kaj la skribistoj kaj fariseoj alkondukis virinon, kaptitan en adulto; kaj stariginte ŝin en la mezo, ili diris al*

*li: Majstro, ĉi tiu virino estas kaptita adultante, en la faro mem. En la leĝo Moseo ordonis al ni tiajn ŝtonmortigi; sed kion vi diras?*

*Kaj tion ili diris provante lin, por povi lin akuzi pri io. Sed Jesuo sin klinis, kaj per la fingro skribis sur la tero. Kiam ili ankoraŭ demandis lin, li leviĝis kaj diris al ili: Kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu sur ŝin ŝtonon. Kaj denove li sin klinis kaj skribis sur la tero. Sed aŭdinte tion, ili eliris unu post alia, komencante de la plej maljunaj kaj ĝis la lastaj; kaj restis Jesuo sola, kaj la virino staranta en la mezo. Kaj Jesuo leviĝis, kaj diris al ŝi: Virino, kie ili estas? ĉu neniu vin kondamnis? Kaj ŝi diris: Neniu, Sinjoro. Jesuo diris al ŝi: Ankaŭ mi vin ne kondamnas; iru, kaj de nun ne plu peku.* (Johano, 8:3-11.)

13. "Kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu sur ŝin ŝtonon", diris Jesuo. Tiu maksimo starigas por ni la indulgemo kiel devon, ĉar neniu persono estas, kiu ne bezonas indulgemon por si mem. Ĝi instruas al ni, ke ni ne devas juĝi la aliajn pli severe, ol ni juĝas nin mem, nek kondamni ĉe aliaj tion, pri kio ni absolvas nin mem. Antaŭ ol riproĉi iun, ni vidu, ĉu la sama riproĉo ne povas fali sur ni.

Riproĉo, ĵetita sur la konduton de alia, povas havi du celojn: bridi la malbonon, aŭ malŝatindigi la personon, kies agojn oni kritikas; ĉi tiu lasta celo neniam estas pardoninda, ĉar tie ekzistas nur malbondiremo kaj malbonvolemo. La unua povas esti laŭdinda kaj estas eĉ devo en iuj okazoj, ĉar el ĝi devas rezulti bono, kaj sen tio la malbono neniam estus subpremata en la socio; cetere, ĉu la homo ne devas helpi la progreson de sia similulo? Oni do ne prenu laŭ ĝia absoluta senco jenan principon: "Ne juĝu, por ke vi ne estu juĝata", ĉar la litero mortigas kaj la spirito vivigas.

Jesuo ne povus malpermesi, ke oni kandamnu ion malbonan, ĉar li mem donis al ni ekzemplon de tia

kondamno en plej energia parolmaniero; li volis diri, ke la aŭtoritateco de la riproĉo estas proporcia al la morala aŭtoritateco de tiu, kiu ĝin faris; fariĝi kulpa pri tio, kion oni kondamnas ĉe alia, estas rezigni tiun aŭtoritatecon, estas perdi la rajton korekti. Cetere la intima konscienco rifuzas ĉian respekton kaj memvolan submetiĝon al iu, kiu, ricevinte iun ajn povon, malrespektas la leĝojn kaj la principojn, kiujn li devas apliki. *En la okuloj de Dio ekzistas unu sola vera aŭtoritato, nome tiu, kuŝanta sur la ekzemplo, kiun ĝi donas pri la bono;* tio ankaŭ elfluas el la paroloj de Jesuo.

INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

## Pardono je l' ofendoj

14. Kiom da fojoj mi pardonu mian fraton? Pardonu lin ne sep fojojn, sed ĝis sepdekoble sep fojoj. Jen unu el tiuj paroloj de Jesuo, kiuj plej forte devas frapi vian intelekton kaj plej laŭte paroli al via koro. Komparu tiujn parolojn de kompatemo kun la preĝo tiel simpla, tiel mallonga, sed tiel granda laŭ siaj aspiroj, kiun Jesuo donis al siaj disĉiploj, kaj vi trovos ĉiam la saman penson. Jesuo, la modela justulo, respondas al Petro: Pardonu, sed sen iaj limoj; pardonu ĉiun ofendon tiom da fojoj, kiom ci ĝin ricevos, instruu al ciaj fratoj tiun forgeson pri si mem, kiu faras la homon nevundebla kontraŭ la atakoj, la malicaj agoj kaj la kalumnioj; estu dolĉa kaj humila laŭ koro, neniam mezurante cian indulgemon; faru fien tion, kion ci deziras, ke la ĉiela Patro faru por ci; ĉu Li ofte ne pardonas cin, kaj ĉu Li kalkulas kiom da fojoj Lia pardono venas, por forviŝi ciajn kulpojn?

Aŭskultu do tiun respondon de Jesuo, kaj, kiel Petro, apliku ĝin al vi mem; pardonu, estu indulgemaj, estu

karitemaj, grandanimaj, eĉ malŝparemaj pri via amo. Donu, ĉar la Sinjoro redonos al vi; pardonu, ĉar la Sinjoro pardonos al vi; malaltiĝu, ĉar la Sinjoro relevos vin; humiliĝu, ĉar la Sinjoro sidigos vin ĉe Sia dekstra flanko.

Iru, miaj tre amataj, studu kaj komentariu tiujn ĉi parolojn, kiujn mi adresas al vi en la nomo de tiu, kiu, el la supro de la ĉiela brilego, rigardas ĉiam al vi kaj daŭrigas amplene la sendankan taskon, komencitan antaŭ dek ok jarcentoj. Pardonu do viajn fratojn, kiel vi bezonas, ke ili pardonu vin. Se iliaj agoj estis al vi persone malutilaj, tio estas ankoraŭ unu motivo, por ke vi estu indulgemaj, ĉar la merito de la pardono estas proporcia al la graveco de la malbono; ne estus merito forgesi la maljustaĵojn de viaj fratoj, se tiuj estus nur malgravaj vundetoj.

Spiritistoj, neniam forgesu, ke tiel per vortoj, kiel per agoj, la pardono je l' ofendoj ne devas esti ia vana vorto. Se vi diras vin spiritistoj, estu vere tiaj; forgesu la malbonon faritan al vi, kaj nur pri unu afero pensu: pri la bono, kiun vi povas fari. Kiu ekiris tiun vojon, tiu eĉ per penso ne devas de ĝi deflankiĝi, ĉar ĉiu respondas por siaj pensoj, kiujn senmanke Dio konas. Zorgu do, ke viaj pensoj entenu nenian venĝosenton; Dio scias, kio loĝas en la fundo de ĉiu koro. *Feliĉa do tiu, kiu povas ĉiunokte ekdormi, dirante: Mi havas nenion kontraŭ mia proksimulo.* (*Simeono.* Bordeaux, 1862.)

15. Pardoni siajn malamikojn estas peti por si mem pardonon; pardoni siajn amikojn estas doni pruvon de amikeco al ili; pardoni la ofendojn estas montri pliboniĝon. Pardonu do, miaj amikoj, por ke Dio vin pardonu, ĉar, se vi estas malmolkoraj, postulemaj, neflekseblaj, se vi estas rigoraj eĉ kontraŭ malgrava ofendo, kial vi volas, ke Dio memoru, ke ĉiutage vi pli bezonas da indulgo? Ve al tiu, kiu diras: "Mi neniam pardonos",

ĉar li formulas sian propran kondamnon. Kiu scias cetere, ĉu, enprofundiĝante en vin mem, vi ne estis la ofendinto? Kiu scias, ĉu en tiu batalo, kiu komenciĝas per piko de pinglo kaj finiĝas per rompo, vi mem ne donis la unuan pikon? ĉu iu vundanta vorto ne elglitis el vi? ĉu vi uzis la tutan necesan moderon? Sendube via kontraŭulo estis malprava montrante sin tro ofendiĝema, sed tio estas ankoraŭ unu motivo, por ke vi estu indulgema kaj ne meritu la riproĉon, kiun vi faras al li. Ni supozu, ke vere vi estas la ofendito en iu cirkonstanco; tamen, kiu diras, ke vi ne venenigis la aferon per revenĝoj kaj ne degenerigis en seriozan malpacon ion, kio povus facile fali en forgeson? Se de vi dependis eviti la sekvojn de la fakto, kaj se vi tion ne faris, vi estas ja kulpa. Ni akceptu fine, ke vi rekonas nenion kiel riproĉindan en vi: en ĉi tiu okazo, vi ekhavos pli da merito, se vi montriĝos pardonema.

Sed estas du manieroj tre malsimilaj pardoni: la pardono el la lipoj kaj la pardono el la koro. Multaj personoj diras pri sia kontraŭulo: "Mi lin pardonas", dum interne ili sentas ian sekretan plezuron pro la malbono okazanta al li, kaj murmuras, ke li ricevas tion, kion li meritas. Kiom da personoj diras: "Mi pardonas kaj aldonas: sed mi neniam reamikiĝos kun li; mi volas neniam plu vidi lin." Ĉu tiu pardono estas laŭ la Evangelio? Ne; la vera pardono, la kristana pardono, ĵetas vualon sur la pasintecon; kaj nur tiu pardono estos kalkulita favore al vi, ĉar Dio ne kontentiĝas per ŝajnoj: Li sondas la fundon de la koroj kaj la plej sekretajn pensojn; oni ne sin trudas al Li per paroloj kaj vanaj ŝajnigoj. La forgeso plena kaj absoluta pri l' ofendoj estas esence propra al la grandaj animoj; la venĝemo estas ĉiam signo de malalteco kaj malsupereco. Ne forgesu, ke la vera pardono montriĝas pli bone per agoj ol per vortoj. (*Paŭlo*, la apostolo. Lyon, 1861.)

## La indulgemo

16. Spiritistoj, ni volas paroli al vi hodiaŭ pri l' indulgemo, pri tiu sento tiel dolĉa, tiel frateca, kiun ĉiu homo devas porti por siaj fratoj, sed kiun tre malmultaj uzas.

La indulgemo neniel vidas la neperfektaĵojn de aliulo, aŭ, se ĝi vidas ilin, ĝi evitas paroli pri ili, dis-konigi ilin; ĝi eĉ kaŝas ilin, por ke ili estu konataj nur de ĝi sola, kaj se la malbonvolemo ilin eltrovas, ĝi havas ĉiam pretan senkulpigon por ilin malgravigi, tio estas, akceptindan, seriozan senkulpigon, ne el tiuj, kiuj, ŝaj-nante malgravigi la kulpon, reliefigas ĉi tiun kun perfida intenco.

La indulgemo neniam okupiĝas pri la malbonaj agoj de aliulo, escepte por fari ian servon, kaj eĉ tiam ĝi zorgas, ke ĝi kiel eble malgravigu ilin. Ĝi ne faras frapan rimarkon, ne havas riproĉojn sur la lipoj, sed nur konsilojn, plej ofte vualitajn. Kiam vi ĵetas ian kritikon, kian konsekvencon oni eltiru el viaj paroloj? ke vi, la riproĉanto, ne farus tion, kion vi riproĉas, ke vi valoras pli ol la kulpulo. Ho homoj! kiam vi juĝos viajn proprajn korojn, viajn proprajn pensojn, viajn proprajn agojn, ne okupante vin pri viaj fratoj? Kiam vi malfer-mos viajn severajn okulojn nur sur vin mem?

Estu do severaj kontraŭ vi mem, indulgemaj por la aliaj. Pensu pri Tiu, kiu juĝas lastinstance, kiu vidas la sekretajn pensojn de ĉiu koro, kaj kiu, sekve, ofte pardonas kulpojn, kiujn vi riproĉas, aŭ kondamnas tion, kion vi indulgas, ĉar Li konas la motivojn de ĉiuj agoj. Pensu, ke vi, kiuj laŭte krias: "anatemo!", eble faris kulpojn pli gravajn.

Estu indulgemaj, miaj amikoj, ĉar la indulgemo altiras, kvietigas, relevas, dum la rigoro malkuraĝigas,

forpuŝas kaj kolerigas. (*Jozefo*, protektanta Spirito. Bordeaux, 1863.)

17. Estu indulgemaj por la kulpoj de aliulo, kiaj ajn ili estas; juĝu kun severeco nur viajn proprajn agojn, kaj la Sinjoro uzos indulgon por vi, samgrade kiel vi ĝin uzos por la aliaj.

Subtenu la fortulojn: admonu ilin al la persistado; fortikigu la malfortulojn, montrante al ili la bonecon de Dio, kiu konsideras eĉ la plej malgrandan penton; montru al ĉiuj la anĝelon de pento, kiu etendas sian blankan flugilon sur la kulpojn kaj kiu tiel vualas la homajn kulpojn antaŭ Tiu, kiu ne povas vidi malpuraĵon. Komprenu vi ĉiuj la senfinan kompatemon de via Patro, kaj neniam forgesu diri al Li per via penso kaj precipe per viaj agoj: "Pardonu al ni niajn ofendojn, kiel ni pardonas tiujn, kiuj ofendis nin." Komprenu bone la valoron de ĉi tiuj superbelaj paroloj; ne nur la litero tie estas admirinda, sed ankaŭ la instruo, kiun ili enhavas.

Kion vi petas de la Sinjoro, kiam vi petas Lian pardonon? Ĉu nur la forgeson pri viaj ofendoj? forgeson, kiu lasus vin en la nenieco, ĉar se Dio kontentiĝus forgesi viajn kulpojn, Li ne punus, *sed ankaŭ ne rekompencus.* La rekompenco ne povas esti premio por bono, kiun oni ne faris, kaj des malpli por malbono, kiun oni faris, eĉ se tiu malbono estas forgesita. Petante de Li pardonon por viaj malobeoj, vi petas la helpon de Lia graco por ne plu refali; la forton, por ekiri novan vojon, vojon de submetiĝo kaj de amo, kie vi povos aldoni al la pento la riparadon.

Kiam vi pardonas viajn fratojn, ne kontentiĝu etendante la vualon de la forgeso sur iliajn kulpojn; tiu vualo ofte estas tro travidebla por viaj okuloj; alportu al ili, samtempe kiel la pardonon, la amon; faru por ili tion, kion vi petus de via ĉiela Patro fari por vi. Anstataŭigu la koleron, kiu makulas, per la amo, kiu purigas. Prediku

per la ekzemplo tiun ageman, senlacan kariton, kiun Jesuo instruis al vi; prediku ĝin kiel li mem, videbla por la okuloj de la korpo, faris dum la tuta tempo, kiam li vivadis sur la tero, kaj kiel li ĝin predikas senĉese, kiam li jam ne estas videbla, escepte por la okuloj de la spirito. Sekvu tiun dian modelon; marŝu sur liaj postesignoj: tiuj postesignoj gvidos vin al la rifuĝejo, kie vi trovos ripozon post la penado. Kiel li, portu vi ĉiuj vian krucon kaj surgrimpu pene, sed kuraĝe, vian Kalvarion: sur ĝia supro estas la glorado. (*Johano*, episkopo en Bordeaux, 1862.)

18. Karaj amikoj, estu severaj por vi mem, indulgemaj por la malfortaĵoj de l' aliaj; tio ankaŭ estas praktikado de la sankta karito, kiun malmultaj personoj plenumas. Vi ĉiuj havas malbonajn inklinojn por venki, erarojn por korekti, kutimojn por modifi; vi ĉiuj havas ŝarĝon pli aŭ malpli pezan por demeti, antaŭ ol vi pene atingos la supron de la monto de la progreso. Kial do esti tiel klarvidaj por la proksimulo kaj tiel blindaj por vi mem? Kiam do vi ĉesos vidi en la okulo de via frato la lignereton, kiu lin ĝenas, ne atentante en la via la trabon, kiu vin blindigas kaj igas vin marŝi falo post falo? Kredu al viaj fratoj, la Spiritoj: ĉiu homo, tiel fiera, ke li opinias sin supera, laŭ virto kaj merito, ol siaj enkarniĝintaj fratoj, estas malsaĝa kaj kulpa, kaj Dio en la tago de Sia justeco lin punos. La vera karaktero de la karito estas la modesteco kaj la humileco, kiuj konsistas en tio, ke ĉiu vidu nur supraĵe la malvirtojn de aliaj kaj klopodu por elstarigi tion, kion ili havas bonan kaj virtan, ĉar, kvankam la koro de la homo estas abismo de korupteco, tamen ekzistas ĉiam en ĝiaj plej kaŝitaj faldoj la ĝermo de iuj bonaj sentoj, vivanta fajrero de la spirita esenco.

Spiritismo, konsolanta kaj beninda doktrino, feliĉaj tiuj, kiuj konas cin kaj profitas la edifajn instruojn de la

Spiritoj de la Sinjoro! Por tiuj la vojo estas lumigita kaj dum la tuta irado ili povas legi jenajn vortojn, kiuj montras al ili la rimedojn alveni al la celo: praktika karito, karito el la koro, karito por la proksimulo kiel por si mem; unuvorte, karito por ĉiuj kaj amo al Dio super ĉio, ĉar la amo al Dio, resumas ĉiujn devojn, kaj estas neeble reale ami Dion, ne praktikante la kariton, el kiu Li faris leĝon por ĉiuj kreitoj. (*Dufrête*, episkopo en Nevers. Bordeaux.)

### Ĉu estas permesate admoni aliajn; rimarkigi la neperfektaĵojn de aliaj; diskonigi la malfortan flankon de aliulo?

19. *Ĉar neniu estas perfekta, ĉu el tio sekvas, ke neniu rajtas admoni sian proksimulon?*

Certe ne, ĉar ĉiu el vi devas labori por la progreso de ĉiuj kaj precipe de tiuj, kies protekto estas konfidita al vi; sed oni devas admoni kun modereco, kun utila celo, kaj ne, kiel oni plej ofte faras, por la plezuro nigrigi. En ĉi tiu lasta okazo, la admono estas malicaĵo; en la unua, ĝi estas devo, kiun la karito ordonas plej zorge plenumi; cetere, la admonon, kiun oni ĵetas sur aliulon, oni samtempe ĵetu sur sin mem, demandante sin, ĉu oni ĝin ne meritas. (*Sankta Ludoviko.* Parizo, 1860.)

20. *Se oni ne diskonigas la malperfektaĵojn de aliaj homoj, ĉu estas riproĉinde ilin rimarki, se el tia rimarko la koncernataj personoj povas nenion profiti?*

Ĉio dependas de l' intenco; certe ne estas malpermesate vidi la malbonon, kiam malbono ekzistas; estus eĉ nekonsilinde vidi ĉie nur bonon: tia iluzio malhelpus la progreson. La eraro kuŝas en tio, ke la rimarko por

la proksimulo rezultigu malprofiton, senbezonan mis-kreditigon laŭ la ĝenerala opinio. Oni ankaŭ estus kulpa, tion farante nur por elverŝo de sento de malbonvolemo kaj de ĝojo trovi malvirtojn en aliaj. Estas tute alie, kiam oni ĵetas vualon sur la malbonon, por ĉi tiun kaŝi de la publiko, kaj ĝin rimarkas por sia persona profito, tio estas, por peni tion eviti, kion oni riproĉas en aliaj. Ĉu tia rimarko, unuvorte, ne estus utila al la moralisto? Kiel li povus pentri la malvirtojn de la homaro, se li ne studus la modelojn? (*Sankta Ludoviko.* Parizo, 1860.)

21. *Ĉu iaokaze estas utile malkaŝi ies malvirton?*

Tiu ĉi demando estas tre delikata kaj por ĝin respondi oni devas helpi al si per la karito bone komprenata. Se la malperfektaĵoj de iu persono malutilas nur al la persono mem, neniam estas utile diskonigi ilin; sed, se ili povas malutili al aliaj, estas necese preferi la intereson de la plej granda nombro, ol la intereson de unu sola. Laŭ la cirkonstancoj, senmaskigi hipokritecon kaj mensogon povas esti devo; ĉar pli bone estas, ke unu homo falu, ol ke pluraj fariĝu liaj trompitoj kaj viktimoj. En tia okazo estas necese pesi la sumon de la profitoj kaj de la malprofitoj. (*Sankta Ludoviko.* Parizo, 1860.)

## ĈAPITRO XI

## AMI SIAN PROKSIMULON KIEL SIN MEM

La plej granda ordono. Fari por la aliaj tion, kion ni volus, ke la aliaj faru por ni. Parabolo de la kreditoro kaj de la ŝuldantoj. Redonu al Cezaro tion, kio apartenas al Cezaro. **Instruoj de la Spiritoj:** La leĝo de amo. La egoismo. La fido kaj la karito. Karito al la krimuloj. Ĉu oni devas riski sian vivon por malbonfaranto?

### La plej granda ordono

1. *Sed la Fariseoj, aŭdinte, ke li silentigis la Sadukeojn, kune kolektiĝis. Kaj unu el ili, leĝisto, demandis lin, provante lin: Majstro, kiu estas la granda ordono en la leĝo? Kaj li diris al li: Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso. Ĉi tiu estas la granda kaj la unua ordono. Kaj dua estas simila al ĝi:* Amu vian proksimulon kiel vin mem. *De ĉi tiuj du ordonoj dependas la tuta leĝo kaj la profetoj.* (Mateo, 22:34-40.)

2. *Ĉion ajn do, kion vi deziras, ke la homoj faru al vi, vi ankaŭ faru al ili; ĉar ĉi tio estas la leĝo kaj la profetoj.* (Mateo, 7:12.)

*Kaj kiel vi volas, ke la homoj faru al vi, faru ankaŭ al ili tiel same.* (Luko, 6:31.)

3. *Tial la regno de la ĉielo similas al reĝo, kiu volis fari kalkulon kun siaj servistoj. Kaj kiam li komencis la kunkalkuladon, oni alkondukis al li unu, kiu estis ŝuldanto*

*por dek mil talantoj. Sed ĉar li ne havis, per kio pagi, lia sinjoro ordonis, ke estu venditaj li kaj lia edzino kaj liaj infanoj, kaj ĉio, kion li posedis, kaj ke estu pago. Tiam la servisto, falinte, kliniĝis antaŭ li, dirante: Sinjoro, paciencu pri mi, kaj mi pagos al vi ĉion. Kaj la sinjoro de tiu servisto, kortuŝite, liberigis lin kaj pardonis al li la ŝuldon. Sed elirinte, tiu servisto trovis kunserviston, kiu ŝuldis al li cent denarojn; kaj li kaptis kaj eksufokis lin, dirante: Pagu tion, kion vi ŝuldas. Kaj falinte antaŭ li, la kunservisto petegis lin, dirante: Paciencu pri mi, kaj mi pagos al vi. Sed li ne volis; sed foriris kaj ĵetis lin en malliberejon, ĝis li pagos tion, kio estas ŝuldata. Tiam la kunservistoj, vidinte tion, kio okazis, tre ĉagreniĝis; kaj veninte, rakontis al sia sinjoro ĉion, kio okazis. Tiam lia sinjoro, alvokinte lin, diris: Vi malbona servisto, mi pardonis al vi tiun tutan ŝuldon, ĉar vi petegis min; ĉu vi ankaŭ ne devis kompati vian kunserviston, kiel mi kompatis vin? Kaj lia sinjoro koleris, kaj transdonis lin al la turmentistoj, ĝis li pagos ĉion al li ŝuldatan. Tiel same mia ĉiela Patro faros al vi, se vi ne pardonas el viaj koroj, ĉiu al sia frato.* (Mateo, 18:23-35.)

4. "Ami sian proksimulo kiel sin mem; fari por la aliaj tion, kion ni volus, ke la aliaj faru por ni" estas la plej plena esprimo de la karito, ĉar ĝi resumas ĉiujn devojn de la homo al sia proksimulo. Ni ne povus havi pli sekuran gvidilon en tiu direkto, ol prenante kiel mezurilon de nia devo al aliulo tion, kion ni deziras por ni mem. Kun kia rajto ni postulus de niaj similuloj pli bonan konduton, pli da indulgemo, da bonvolemo kaj sindonemo, ol tiajn, kiajn ni havas por ili? La praktikado de tiuj maksimoj kondukos al la detruo de l' egoismo; kiam la homoj prenos ilin kiel regulon de sia konduto kaj bazon de siaj institucioj, ili komprenos la veran fratecon kaj faros, ke la paco kaj la justeco regu inter ili; ne plu estos malamoj kaj malkonsentoj, sed unueco, konkordo kaj reciproka bonvolemo.

## Redonu al Cezaro tion, kio apartenas al Cezaro

5. *Tiam iris la Fariseoj, kaj konsiliĝis, kiel ili povus impliki lin per interparolado. Kaj ili sendis al li siajn disĉiplojn kun la Herodanoj, por diri: Majstro, ni scias, ke vi estas verama, kaj instruas laŭ la vero la vojon de Dio, kaj ne zorgas pri iu ajn; ĉar vi ne favoras la personon de homoj. Diru do al ni, kiel ŝajnas al vi? Ĉu konvenas doni tributon al Cezaro, aŭ ne?*

*Sed Jesuo, sciante ilian ruzecon, diris: Kial vi min provas, hipokrituloj? Montru al mi la tributan moneron. Kaj ili alportis al li denaron. Kaj li diris al ili: Kies estas ĉi tiu bildo kaj la surskribaĵo? Ili diris al li: De Cezaro. Tiam li diris al ili:* Redonu do al Cezaro la propraĵon de Cezaro, kaj al Dio la propraĵon de Dio. *Kaj aŭdinte, ili miris, kaj lin lasis kaj foriris.* (Mateo, 22:15-22; Marko, 12:13-17.)

6. La demando prezentita al Jesuo havis kiel motivon la cirkonstancon, ke la Judoj, abomenante la tributon al ili truditan de la Romanoj, estis farintaj el la pago de tiu tributo religian aferon; granda partio estis starigita kontraŭ tia imposto; la pago de la tributo estis do por ili koleriga temo de la momento, kaj, se tiel ne estus, la demando farita al Jesuo: "Ĉu konvenas doni tributon al Cezaro, aŭ ne?" havus nenian sencon. Tiu demando estis kaptilo; ĉar, laŭ la respondo, ili esperis instigi kontraŭ li la roman aŭtoritaton, aŭ la skismajn Judojn. Sed "Jesuo, sciante ilian ruzecon", lerte sin elturnis el la malfacilaĵo, donante al ili lecionon de justeco per tio, ke al ĉiu estu donata, kio estas al li ŝuldata. (Vidu en la enkonduko de tiu ĉi verko la artikolon: *Impostistoj.*)

7. Ĉi tiu maksimo: "Redonu al Cezaro la propraĵon de Cezaro" ne devas esti komprenata en limiga kaj absoluta senco. Kiel ĉiuj instruoj de Jesuo, tie kuŝas ĝenerala

principo, resumita sub praktika, komunuza formo, kaj deduktita el aparta cirkonstanco. Tiu principo estas sekvo de tiu alia, laŭ kiu ni devas konduti kontraŭ la aliaj tiel same, kiel ni volus, ke la aliaj kondutu kontraŭ ni; ĝi kondamnas ĉian materian kaj moralan malprofiton, kiun oni povus fari al aliulo, ĉian atencon kontraŭ la rajtoj de aliaj; ĝi ordonas la respekton al ĉies rajtoj, kiel ĉiu deziras, ke oni respektu la liajn; ĝi etendiĝas eĉ al la plenumado de la devoj al la familio, al la socio, al la aŭtoritato, same kiel al la individuoj ĝenerale.

## INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

### La Leĝo de Amo

8. La amo resumas la tutan doktrinon de Jesuo, ĉar ĝi estas la plej altgrada sento, kaj la sentoj estas la instinktoj, levitaj al la nivelo de la plenumita progreso. Ĉe sia deirpunkto, la homo havas nur instinktojn; pli progresinta kaj koruptita, li havas nur sensaciojn; instruita kaj purigita, li jam havas sentojn; kaj la delikatega punkto de la sento estas la amo, ne la amo en la vulgara senco de la vorto, sed tiu interna suno, kiu centrigas kaj kunigas ĉe sia ardanta fokuso ĉiajn aspirojn kaj ĉiajn revelaciojn superhomajn. La leĝo de amo anstataŭigas la personecon per la kunfandiĝo de l' estuloj; ĝi nuligas la sociajn afliktojn. Feliĉa tiu, kiu, superante sian homecon, amas per larĝa amo siajn dolorfratojn! Feliĉa tiu, kiu amas, ĉar li ne konas angorojn de l' animo, nek de la korpo; liaj piedoj estas malpezaj, kaj li vivas kvazaŭ transportita ekster sin mem. Kiam Jesuo eldiris tiun dian vorton "amo", tiu vorto skuis la popolojn, kaj la martiroj, ekzaltite de espero, malsupreniris en la cirkon.

Spiritismo siavice venas eldiri duan vorton el la dia alfabeto; estu atentaj, ĉar tiu vorto levas la ŝtonon

de la tomboj malplenaj, kaj la *reenkarniĝo*, triumfante super la morto, revelacias al la homo duonblindigita lian intelektan heredan posedaĵon; jam ne al la turmentoj ĝi kondukas lin, sed al la konkero de lia memo, altigita kaj transfigurita. La sango elaĉetis la Spiriton, kaj la Spirito devas hodiaŭ elaĉeti la homon el la materio.

Mi diris, ke en sia komenco la homo havas nur instinktojn; do tiu, kies instinktoj regas lin, estas pli proksime de sia elirpunkto, ol de la celo. Por antaŭenpaŝi al la celo, la homo devas venki la instinktojn profite de la sentoj, tio estas, perfektigi ĉi tiujn lastajn, sufokante la latentajn ĝermojn de la materio. La instinktoj estas la ĝermado kaj la embrioj de la sento; ili portas en si la progreson, same kiel la glano kaŝgardas la kverkon; la malplej progresintaj estuloj estas tiuj, kiuj, nur iom post iom senvestiĝante de sia krizalido, restas sklavigitaj al siaj instinktoj. La Spirito devas esti kulturata kiel kampo; ĉia estonta riĉeco dependas de la nuna laboro, kaj pli, ol la surterajn bonojn, tiu laborado alportos al vi gloran altiĝon; kaj tiam, komprenante la leĝon de amo, kiu unuigas ĉiujn estulojn, vi ektrovos la trankvilajn plezurojn de l' animo, kiuj estas la antaŭĝuado de la ĉielaj ĝojoj. (*Lazaro*. Parizo, 1862.)

9. La amo estas el dia esenco, kaj ekde la unua ĝis la lasta, vi ĉiuj posedas en la fundo de la koro ian eron de tiu sankta fajro. Tiun fakton vi povis plurfoje konstati: la plej malnobla, la plej malŝatinda, la plej krima, havas al iu estulo aŭ iu objekto vivan, ardan estimon elprovitan kontraŭ ĉio, kio pretendus ĝin malgrandigi, kaj ne malofte plej grandiozan.

Al estulo aŭ objekto, mi diris, ĉar ekzistas inter vi individuoj, kiuj elspezas trezorojn da amo, je kiu ilia koro superabundas, por animaloj, plantoj kaj eĉ materiaj objektoj: speco de mizantropoj, plendantaj ĝenerale kon-

traŭ la homaro, kontraŭstarantaj la naturan inklinon de sia animo, kiu serĉas ĉirkaŭ si amon kaj simpation; ili malaltigas la leĝon de amo ĝis la stato de instinkto. Tamen, kion ajn ili faras, ili ne povas sufoki la vivantan ĝermon, kiun Dio metis en ilian koron ĉe ilia kreo; tiu ĝermo disvolviĝas kaj kreskas samtempe kun la moraleco kaj la intelekto, kaj, kvankam kelkfoje premite de l' egoismo, ĝi estas la fonto de sanktaj kaj dolĉaj virtoj, kiuj naskas la sincerajn kaj daŭrajn korinklinojn, kaj helpas la homon venki la krutan kaj sekan vojon de l' ekzistado.

Al iuj personoj la provo de la reenkarniĝo forte malplaĉas, en la senco, ke aliaj partoprenas en la amikaj simpatioj, pri kiuj ili estas ĵaluzaj. Kompatindaj fratoj! via amo faras vin egoistaj; via amo estas limigita en intima rondo el parencoj, aŭ amikoj, kaj ĉiuj aliaj estas al vi indiferentaj. Nu! por praktiki la leĝon de amo tiel, kiel Dio ĝin komprenas, vi devas iom post iom ami sendistinge ĉiujn viajn fratojn. La tasko estos longa kaj malfacila, sed ĝi estos elplenumita: Dio tion volas, kaj la leĝo de amo estas la unua kaj la plej grava regulo de via nova doktrino, ĉar ĝi estas la leĝo, kiu iam mortigos egoismon, kia ajn la formo, en kiu ĝi montriĝos; ĉar, krom la persona egoismo, estas ankaŭ la egoismo de familio, de kasto, de nacieco. Jesuo diris: "amu vian proksimulon kiel vin mem"; nu, kia estas la limo inter mi kaj la proksimulo? ĉu la familio, la sekto, la nacio? Ne, ĝi estas la tuta homaro. En la superaj mondoj la reciproka amo harmoniigas kaj direktas la progresintajn Spiritojn tie loĝantajn, kaj via planedo, destinita al proksima progreso, per sia socia transformiĝo, vidos siajn loĝantojn praktiki tiun subliman leĝon, refiguraĵon de Dio.

La efikoj de la leĝo de amo estas la morala pliboniĝo de la homa genro kaj la feliĉo dum la surtera vivo. La

plej ribelemaj kaj la plej malvirtaj korektos sin, vidante la profitojn el la praktikado de jena konsilo: Ne faru al la aliaj tion, kion vi ne volas, ke ĝi estu farata al vi, sed faru al ili, kontraŭe, ĉian bonon, kiun estos en via povo fari.

Ne kredu al la senfrukteco kaj malmoleco de la homa koro; ĝi cedas, kvankam kontraŭvole, al la vera amo; ĉi tiu estas magneto, al kiu la koro ne povas kontraŭstari, kaj la kontakto de tia amo vivigas kaj fekundigas ties ĝermojn, troviĝantajn, en latenta stato, en viaj koroj. La tero, restadejo por provado kaj ekzilo, estos tiam purigita per tiu dia fajro, kaj vi vidos praktikataj kariton, humilecon, paciencon, sindonemon, abnegacion, rezignacion, sinoferon, kiuj ĉiuj devenas de amo. Ne ĉesu do aŭdi tiujn vortojn de Johano, la Evangeliisto; vi scias, ke, kiam malsano kaj maljuneco devigis lin ne plu predikadi, li nur ripetadis ĉi tiujn dolĉajn vortojn: "Miaj infanoj, amu unuj la aliajn."

Karaj fratoj, profitu tiujn lecionojn; ilia praktikado estas malfacila, sed el ili la animo ĉerpas grandegan bonon. Kredu al mi, faru la subliman klopodon, kiun mi petas de vi : "Amu unuj aliajn", kaj baldaŭ vi vidos la teron transformita en Elizeon, kien la animoj de la justuloj venos ĝui ripozon. (*Fénelon*. Bordeaux, 1861.)

10. Miaj karaj kunlernantoj, la Spiritoj nun ĉeestantaj diras al vi per mia voĉo: "Multe amu, por esti multe amataj." Tiu ĉi penso estas tiel prava, ke vi en ĝi trovos ĉion, kio konsolas kaj mildigas la penojn de ĉiu tago; aŭ pli bone, praktikante tiun saĝan konsilon, vi tiel altiĝos super la materio, ke vi vin liberigos el la materio antaŭ via elkarniĝo. Disvolvante vian komprenon pri l' estonteco, la spiritismaj studoj havigas al vi jenan certecon: ke vi marŝas al Dio, vidante efektivigitaj ĉiujn promesojn, respondantajn al la aspiroj de

via animo; tial vi devas levi vin sufiĉe alte, por juĝi sen la baroj de la materio kaj por ne kondamni vian proksimulon, ne direktinte vian penson al Dio.

Ami signifas, en la profunda senco de la vorto, esti lojala, honesta, konscienca, por fari al la aliaj tion, kion oni volus por si mem; estas serĉi ĉirkaŭ si la intiman sencon de ĉiuj doloroj, kiuj subpremas viajn fratojn, por alporti al ili ian balzamon; estas rigardi la grandan homan familion kiel la sian, ĉar tiun familion vi retrovos post iom da tempo en mondoj pli progresintaj, kaj la Spiritoj, kiuj konsistigas ĝin, estas, kiel vi, filoj de Dio, destinitaj por altiĝi al la senlimo.

Tial vi ne povas rifuzi al viaj fratoj tion, kion Dio malavare donas al vi, ĉar viaflanke vi tre ĝojus, se viaj fratoj donus al vi tion, kion vi bezonas. Al ĉiuj suferoj eldiru parolon de espero kaj de apogo, por ke vi estu tute amo, tute justeco.

Kredu, ke ĉi tiu saĝa admono: "Multe amu por esti multe amataj" trabatos al si vojon; ĝi estas revolucia kaj sekvas vojon fiksan, neŝanĝeblan. Sed vi jam gajnis, vi, kiuj aŭskultas min; vi estas multege pli bonaj, ol vi estis antaŭ cent jaroj; vi tiom pliboniĝis, ke vi jam akceptas sen kontraŭdiro amason da novaj ideoj pri libereco kaj frateco, kiujn vi pasintatempe forpuŝus; nu, de nun post cent jaroj, vi akceptos kun sama facileco la ideojn, kiuj ankoraŭ ne povis penetri en vian cerbon.

Hodiaŭ, kiam la spiritisma movado faris tian grandan paŝon, vidu kiel rapide la ideoj de justeco kaj de renovigo, entenataj en la diktaĵoj de la Spiritoj, estas akceptataj de duono de l' intelektularo; tio okazas, ĉar tiuj ideoj respondas al ĉio, kio estas dia en vi; ĉar vi estas preparitaj per fekunda semado: la lastjarcenta semado, kiu enplantis en la socion la grandajn ideojn de progreso; kaj ĉar ĉiuj aferoj interĉeniĝas sub la sceptro de la Plejaltulo, iuj lecionoj, ricevitaj kaj ak-

ceptitaj, estos enfermitaj en tiu universala interŝanĝo de amo al la proksimulo; per ĝi la enkarniĝintaj Spiritoj, pli bone juĝante kaj sentante, etendos la manojn unuj al aliaj ĝis la ekstremaĵoj de via planedo; ili kolektiĝos, por interkompreniĝi kaj por ami unuj aliajn, por detrui ĉiajn maljustaĵojn, ĉiajn kaŭzojn de miskompreno inter la popoloj.

Granda koncepto pri renovigo per Spiritismo, tiel bone priskribita en *La Libro de la Spiritoj*, ci faros la grandan miraklon de la venonta jarcento, la miraklon de la harmoniigo de ĉiuj materiaj kaj spiritaj interesoj de la homoj, per la aplikado de ĉi tiu maksimo ĝuste komprenata: Multe amu por esti multe amataj. (*Sanson*, eksmembro de la Spiritisma Societo de Parizo, 1863.)

## La egoismo

11. Egoismo, tiu kancero de la homaro, devas malaperi de sur la tero, kies moralan progreson ĝi kontraŭas; estas rezervita al Spiritismo la tasko altigi la teron en la hierarĥio de la mondoj. Egoismo estas do celo, al kiu ĉiuj veraj kredantoj devas turni siajn armilojn, sian fortojn, sian kuraĝon; kuraĝon, mi diras, ĉar oni bezonas pli da kuraĝo por venki sin mem, ol por venki aliajn. Ĉiu do plej klopodu por ĝin kontraŭbatali en si mem, ĉar tiu monstro, formanĝanta ĉiujn intelektojn, tiu ido de la fiero, estas la fonto de ĉiaj surteraj suferoj. Ĝi estas la negacio de la karito, kaj sekve la plej granda baro al la feliĉo de la homoj.

Jesuo donis al vi la ekzemplon de la karito, kaj Poncio Pilato tiun de egoismo; ĉar, kiam la Justulo ekiras al la sanktaj haltejoj de sia martireco, Pilato lavas al si la manojn, dirante: Al mi tio ne gravas! Li kuraĝas diri al la Judoj: Tiu ĉi homo estas justa, kial do vi volas krucumi lin? kaj tamen li lasas konduki la Justulon al la turmento.

Nur al tiu antagonismo inter karito kaj egoismo, al la invado de tiu lepro en la homan koron, devas esti atribuita la fakto, ke Kristanismo ĝis nun ne povis elplenumi sian tutan mision. Vin, novajn apostolojn de la kredo, kiujn la superaj Spiritoj instruas, koncernas la tasko kaj la devo elradiki tiun malbonon, por doni al Kristanismo ĝian tutan forton kaj forigi de la vojo la dornarbetojn, kiuj embarasas la marŝon. Forpelu egoismon de sur la tero, por ke ĉi tiu povu leviĝi en la gradaro de la mondoj, ĉar jam estas tempo, ke la homaro prenu sian veston de maturulo, kaj por tio estas necese unue elpeli egoismon el viaj koroj. (*Emmanuel*. Parizo, 1861.)

12. Se la homoj amus unuj aliajn per vera amo, la karito estus pli bone praktikata; sed estas necese por tio, ke vi klopodu por vin liberigi de la kiraso, kiu kovras viajn korojn, por ke ĉi tiuj estu pli sentemaj por la suferoj de l' aliaj. La rigideco mortigas la bonajn sentojn; la Kristo neniun ajn malakceptis; kiu ajn sin turnadis al li, tiu ne estis malakceptata: la adulta virino, la krimulo, estis helpataj de li: li neniam timis, ke lia reputacio iel defalu pro tio. Kiam do vi lin prenos kiel modelon por ĉiuj viaj agoj? *Se la karito regus sur la tero, la maliculo ne plu mastrus; li hontplene forkurus; li sin kaŝus, ĉar li nenie sin sentus hejme*. Tiam la malbono malaperus; funde konvinkiĝu pri tio.

Komencu donante mem la ekzemplon; estu karitema por ĉiuj sendistinge; penu ne plu atenti la homojn, kiuj vin malŝate rigardas, kaj lasu al Dio la zorgon de la tuta justeco, ĉar Li ĉiutage, en Sia regno, faras apartigon inter bona grajno kaj lolo.

Egoismo estas la negacio de karito; nu sen karito ne ekzistos ripozo en la socio; mi diras plie: nenie kuŝas sekureco; kun egoismo kaj fiero, kiuj iras mano en mano, la vivo estos ĉiam konkurado, en kiu nepre venkos la plej lerta, kie la plej sanktaj amikrilatoj estos piedpre-

mataj, kie eĉ la sanktaj ligiloj de familio ne estos respektataj. (Pascal. Sens, 1862.)

## La fido kaj la karito

13. Antaŭ ne longe mi diris al vi, miaj karaj filoj, ke karito sen fido ne sufiĉas, por teni inter la homoj socian ordon, kapablan fari la homojn feliĉaj. Mi devus esti dirinta, ke karito ne estas ebla sen fido. Vere vi povos trovi malavaraĵojn eĉ fare de senreligiaj personoj, sed tiun severan kariton, kiu agas nur per abnegacio, per konstanta ofero de ĉiu egoisma intereso, nur la fido povas inspiri, ĉar nur ĝi ebligas al ni porti kuraĝe kaj persiste la krucon de la surtera vivo.

Jes, miaj infanoj, ĝuavida homo vane penas iluzii sin pri sia destino sur la tero, pretendante, ke al li estas permesate okupiĝi nur pri sia feliĉo. Certe, Dio kreis nin, por ke ni estu feliĉaj en la eterneco; tamen la surtera vivo devas servi nur por nia morala perfektiĝo, kiu estas atingita pli facile kun la helpo de organoj kaj de la materia mondo. Eĉ se oni ne atentus la ordinarajn sortoŝanĝojn de la vivo, la diverseco de viaj gustoj, de viaj inklinoj, de viaj bezonoj estas ankaŭ rimedo, por ke vi perfektiĝu, ekzerciĝante en la karito. Ĉar, nur koste de cedoj kaj de reciprokaj oferoj vi povas ja tenadi la harmonion inter tiel malsamaj elementoj.

Tamen vi estas pravaj asertante, ke la feliĉo estas destinita al la homo en tiu ĉi mondo, se li ĝin serĉas, ne ĉe la materiaj ĝuoj, sed ĉe la bono. La historio de la Kristanismo parolas pri martiroj, kiuj ĝoje paŝadis al la turmentoj; hodiaŭ, en via socio, por esti kristano la homo jam ne bezonas submetiĝi al la martireco, nek oferi sian vivon, sed necesa estas nur kaj simple la ofero de via egoismo, de via fiero kaj de via vantemo. Vi venkos, se la karito inspiros vin kaj la fido vin subtenos. (*Protektanta Spirito*. Krakovo, 1861.)

## Karito al la krimuloj

14. La vera karito estas unu el la plej sublimaj instruoj, kiujn Dio donis al la mondo. Inter la veraj disĉiploj de Lia doktrino devas regi perfekta frateco. Vi devas ami la malfeliĉulojn, la krimulojn, kiel kreitojn de Dio, al kiuj la pardono kaj la favoro estas konsentataj, se ili pentas, kiel ankaŭ al vi, por la kulpoj, kiujn vi faras kontraŭ Lia leĝo. Meditu, ke vi estas pli riproĉindaj, pli kulpaj, ol tiuj, al kiuj vi rifuzas pardonon kaj kompaton, ĉar plej ofte ili ne konis Dion kiel vi Lin konas, kaj el ili estos postulate malpli, ol el vi.

Ne juĝu, ho! neniel juĝu, miaj karaj amikoj, ĉar la juĝo, kiun vi eldiros, estos pli severe aplikata al vi, kaj vi bezonas indulgon por la pekoj, kiujn vi senĉese faras. Ĉu vi ne scias, ke multaj agoj estas krimoj en la okuloj de Dio, la pureco mem, kaj tamen tiujn la mondo ne rigardas kiel eĉ malgravajn kulpojn?

La vera karito ne konsistas nur en la almozo, kiun vi donas, nek ankaŭ en la konsolaj vortoj, kiujn vi tiam aldiras; ne, ne nur tion Dio postulas de vi. La sublima karito, instruita de Jesuo, konsistas ankaŭ en la bonvolemo, kiun vi en ĉiuj okazoj kaj pri ĉiuj aferoj uzos por via proksimulo. Vi povas praktiki tiun subliman virton por la bono de multaj homoj, bezonantaj nenian almozon, sed kiujn paroloj de amo, de konsolo, de kuraĝigo gvidos al la Sinjoro.

La tempo estas proksima, mi tion rediras, kiam la granda frateco reĝos sur tiu ĉi globo; kiam la leĝo de la Kristo regos la homojn: nur ĝi estos la brido kaj la espero, kaj kondukos la animojn al la feliĉaj loĝejoj. Amu do unuj aliajn kiel idoj de la sama Patro; neniel distingu inter la aliaj malfeliĉuloj, ĉar Dio volas, ke ĉiuj estu egalaj; neniun do malŝatu; Dio permesas, ke grandaj krimuloj estu inter vi, por ke ili estu por vi

kiel instruaĵo. Baldaŭ, kiam la homojn kondukos la veraj leĝoj de Dio, tiaj instruoj jam ne estos necesaj, kaj *ĉiuj Spiritoj malpuraj kaj ribelemaj estos forpuŝitaj en la malsuperajn mondojn, konformajn kun ties inklinoj.*

Al tiuj , pri kiuj mi parolas , vi ŝuldas la helpon de viaj preĝoj: tio estas la vera karito. Oni neniel devas diri pri krimulo: "Li estas fiulo; estas necese elpurigi la teron el tiaj homoj; la morto, kiun oni donas al li, estas nur tro milda por tiaspeca estulo." Ne, ne tiel vi devas paroli. Rigardu vian modelon, Jesuon; kion li dirus, se li vidus tian malfeliĉulon apud si? Jesuo kompatus lin; Jesuo konsiderus lin tre kompatinda malsanulo; li etendus la manon al tia homo. Vere vi ne povas tiel agi, sed vi povas almenaŭ preĝi por li, helpi lian Spiriton dum la malmultaj momentoj, kiujn li devas ankoraŭ pasigi sur la tero. La pento povos tuŝi lian koron, se vi preĝos kun fido. Li estas via proksimulo, same kiel la plej bona el la homoj; lia animo, devojiĝinta kaj ribelinta, estas kreita kiel la via, por perfektiĝi; helpu lin do eliri el la ŝlimo kaj preĝu por li. (*Elizabeta de Francujo*. Le Havre, 1862.)

## Ĉu oni devas riski sian vivon por malbonfaranto?

15. *Homo estas en danĝero de morto; por savi lin alia devas riski sian vivon; sed oni scias, ke tiu homo estas maliculo, kaj ke, se li saviĝos, li povos fari novajn krimojn. Ĉu tiu alia devas tamen riski sian vivon, por savi lin?*

Tiu demando estas tre grava kaj povas prezenti sin al la spirito tre nature. Mi respondas laŭ mia morala progreso, ĉar ni ne scias sufiĉe, por diri, ĉu oni devas riski sian vivon eĉ por malbonfaranto. La sindonemo estas blinda: oni helpas malamikon; oni devas do helpi ankaŭ malamikon de la socio, unuvorte malbonfaranton.

Ĉu vi kredas, ke oni tiam kuras por savi la malfeliĉulon nur de la morto? eble oni savas lin de lia tuta pasinta vivo. Efektive, pripensu, ke en tiuj rapidaj momentoj, kiuj reprezentas la lastajn minutojn de lia vivo, la perdita homo revenas al sia pasinta vivo, aŭ, pli precize, lia pasinta vivo stariĝas antaŭ li. Eble la morto alvenas tro frue al li; lia reenkarniĝo povos esti terura; antaŭensaltu do, homoj! vi, al kiuj spiritisma scienco portis lumon; antaŭensaltu, kaj forprenu lin de lia kondamno, kaj eble tiu homo, kiu mortus blasfemante kontraŭ vi, ĵetos sin en viajn brakojn. Tamen ne demandu, ĉu li tion faros aŭ ne, sed iru lin helpi, ĉar savante lin, vi obeas la voĉon de via koro, kiu diras al vi: "Ci povas lin savi, savu lin!" (*Lamennais*. Parizo, 1862)

ĈAPITRO XII

# AMU VIAJN MALAMIKOJN

Pagi por bono la malbonon. La elkarniĝintaj malamikoj. Se iu frapas al vi la dekstran vangon, turnu al li ankaŭ la alian. **Instruoj de la Spiritoj**: La venĝo. La duelo.

## Pagi per bono la malbonon

1. *Vi aŭdis, ke estas dirite: Amu vian proksimulon, kaj malamu vian malamikojn; sed mi diras al vi: Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj; por ke vi estu filoj de via Patro, kiu estas en la ĉielo; ĉar Li levas sian sunon sur la malbonulojn kaj la bonulojn, kaj sendas pluvon sur justulojn kaj maljustulojn. Ĉar se vi amas tiujn, kiuj amas vin, kian rekompencon vi havas? ĉu ne tion saman faras eĉ la impostistoj? Kaj se vi salutas nur sole viajn fratojn, kion ekstran vi faras? ĉu ne tion samam faras eĉ la nacianoj? Estu do perfektaj, kiel ankaŭ via ĉiela Patro estas perfekta*. ( Mateo, 5:43-48.)

*Ĉar mi diras al vi, ke se via justeco ne supero la justecon de la skribistoj kaj la Farizeoj, vi tute ne eniros en la regnon de la ĉielo*. (Mateo, 5:20)

2. *Kaj se vi amas tiujn, kiujn amas vin, kian dankon vi havas? ĉar eĉ la pekuloj amas tiujn, kiuj ilin amas. Kaj se vi bonfaras al viaj bonfarantoj, kian dankon vi havas? ĉar eĉ la pekuloj tiel same faras. Kaj se vi pruntas al tiuj, de kiuj vi esperas ricevi, kian dankon vi havas? eĉ pekuloj pruntas al pekuloj, por egale ricevi. Sed amu viajn*

*malamikojn, kaj bonfaru, kaj pruntedonu, pri neniu perdante esperon; kaj via rekompenco estos granda, kaj vi estos filoj de la Plejalta; ĉar Li estas bona al la nedankemuloj kaj malbonuloj. Estu kompatemaj, kiel via Patro estas kompatema.* (Luko, 6:32-36)

3. Se la amo al la proksimulo estas la principo de karito, ami siajn malamikojn estas la plej sublima apliko de tiu principo, ĉar la posedo de tiu virto estas unu el la plej grandaj venkoj kontraŭ egoismo kaj fiero.

Tamen oni ofte miskomprenas la sencon de la vorto *ami* en ĉi tiu okazo; Jesuo neniel pretendis, per tiuj vortoj, ke oni havu por siaj malamikoj tian dolĉan inklinon, kian oni havas por iu frato aŭ amiko; korinklino supozigas konfidon; nu, neniu povas konfidi iun, sciante, ke tiu deziras lian malfeliĉon; neniu povas fari al tiu persono amikajn korelverŝojn, sciante, ke la persono estas kapabla ilin misuzi; inter homoj, kiuj malfidas unuj je aliaj, ne povas okazi tiaj elmontroj de simpatio, kiaj ekzistas inter homoj, vivantaj en komuneco de pensoj; fine, neniu povas havi tian saman plezuron ĉe malamiko, kian ĉe amiko.

La malsameco de tiuj sentoj, laŭ la cirkonstancoj, rezultas el fizika leĝo: la leĝo de l' altiro de la similaj kaj de la repuŝo de la malsimilaj fluidoj; la penso malica disĵetas ian emanaĵojn (*), kies impreso estas peniga; la bonvolema penso ĉirkaŭvolvas nin per emanaĵo agra-

---

(*) Mi uzis la vorton "emanaĵo" tie ĉi kaj en aliaj lokoj, pri nevidebla fluo de simpatio aŭ antipatio, amo aŭ malamo, volupto k.s., eble simila al radiuma emanaĵo, fluo, kiun la vivantaj estuloj sendas senpere unu al alia kaj ricevas unu de alia. Kompreneble ankaŭ senkorpaj Spiritoj estas en tiu senco, vivantaj estuloj. Eble ekzistas en Esperanto pli taŭga vorto, kiun mi ne konas. En la originalo la vortoj **fluide kaj fluidique** estas uzataj en diversaj sencoj pro analogio, sed la logikemo de Esperanto ne permesas la saman liberecon de la franca lingvo. — **La tradukinto.**

bla; el tio la diferenco de la sensaco, kiujn oni spertas ĉe l' alproksimiĝo de iu amiko aŭ de iu malamiko. Ami siajn malamikojn povas do signifi nur, ke oni ne distingu inter malamikoj kaj amikoj; ĉi tiu regulo ŝajnas malfacila, eĉ ne plenumebla, nur tial ke oni erare kredas, ke ĝi ordonas asigni al amikoj kaj malamikoj la saman lokon en la koro. Se la malriĉeco de la homaj lingvoj devigas uzi la saman vorton por esprimi diversajn nuancojn de sentoj la racio devas fari ties diferencon laŭ la okazoj.

Ami siajn malamikojn neniel estas do porti por ili korinklinon, kiu ne estas en la naturo, ĉar la kontakto kun malamiko batigas nian koron en maniero tute alia, ol la kontakto kun amiko ; ĝi signifas, porti kontraŭ ili nenian malamon, resenton, deziron je venĝo; pardoni al ili *sen kaŝita penso kaj senkondiĉe* la malbonon, kiun ili faras al ni; neniel malhelpi la reamikiĝon; deziri al ili bonon, anstataŭ deziri malbonon; ĝoji, anstataŭ afliktiĝi pro la bono, kiu okazas al ili; entendi al ili helpeman manon en okazo de bezono; deteni sin, *ĉu per paroloj aŭ per agoj*, de ĉio, kio povas malutili al ili; ĝi estas fine pagi al ili ĉiam per bono la malbonon ricevitan, *sen intenco humiligi ilin*. Kiu tion faras , tiu plenumas la kondiĉojn de l' ordono: Amu viajn malamikojn.

4. Ami siajn malamikojn estas sensencaĵo por nekredanto; la homo, por kiu la nuna vivo estas ĉio, vidas en sia malamiko nur malutilan estulon, kiu ĝenas lian ripozon, kaj de kiu, li kredas, nur la morto povas lin liberigi: el tio la deziro je venĝo; nenian intereson li havas pardoni, krom por kontentigi sian fieron en la okuloj de la mondo; pardoni en iuj okazoj ŝajnas al li eĉ malfortaĵo ne inda de li; se li ne venĝas, li tamen konservas venĝemon kaj ian sekretan deziron malutii sian malamikon.

Por kredanto, precipe por spiritisto, la vidmaniero estas tute alia, ĉar li ĵetas sian rigardon en la pasintecon. kaj en la estontecon, inter kiuj la nuna vivo estas nur punkto; li scias, ke pro la destino mem de la tero li tie nepre renkontos malvirtajn, malicajn homojn; ke la malicaĵoj, lin ĉiam celantaj, estas parto de provoj, kiujn li devas suferi, kaj la alta vidpunkto, el kiu li rigardas, faras la sortobatojn malpli amaraj, egale ĉu ili venas de la homoj aŭ de l' aĵoj; *se li ne murmuras kontraŭ la provoj, des malpli li murmuru kontraŭ la homoj, ties instrumentoj;* se, anstataŭ plendi, li dankas Dion pro la provo, *li devas ankaŭ danki la manon, kiu donas al li okazon montri sian paciencon kaj rezignacion.* Tiu ĉi pensmaniero lin nature antaŭinklinigas al pardono; cetere li scias, ke ju pli noblanima li estas, des pli li grandiĝas en siaj propraj okuloj kaj des pli malproksime li staras de la malbonintencaj sagoj de sia malamiko.

La homo, kiu okupas altan rangon en la mondo, ne sentas sin ofendita de l' insultoj de tiu, kiun li rigardas kiel sian malsuperulon; tio sama estu dirita pri tiu, kiu en la morala mondo leviĝas super la materia homaro; li komprenas, ke malamo kaj venĝemo lin malnobligus kaj malaltigus; nu, por esti supera ol sia kontraŭulo, li devas havi animon pli grandan, pli noblan, pli indulgeman.

## La elkarniĝintaj malamikoj

5. La spiritisto havas ankoraŭ aliajn motivojn por indulgi al siaj malamikoj. Unue li scias, ke la malboneco ne estas ia konstanta stato de la homoj; ke ĝi estas esence propra al nedaŭra malperfekteco, kaj ke, same kiel infano korektas siajn mankojn, tiel maliculo iam komprenos siajn erarojn kaj fariĝos bona.

Li scias ankaŭ, ke la morto nur materie lin liberigas de lia malamiko, ĉar tiu ĉi povas persekuti lin per sia

malamo, eĉ post sia foriro de la tero; ke tiel la venĝo ne atingas sian celon; ke ĝi kontraŭe havas kiel efikon naski pli grandan inciton, kiu povas daŭri plu en sekvanta ekzistado. Estis rezervite al Spiritismo pruvi per la sperto kaj per la leĝo, laŭ kiu fariĝas la rilatoj inter la videbla kaj la nevidebla mondoj, ke la esprimo: *Estingi malamon per sango* estas fundamente falsa, kaj ke vero estas, ke sango nutras malamon eĉ post la tombo; sekve, doni efektivan pravon de ekzisto kaj praktikan utilecon ne nur al la pardono, sed ankaŭ al la sublima maksimo de la Kristo: *Amu viajn malamikojn.* Neniu koro estas tiel malvirtema, ke, eĉ senscie, ĝi ne estas tuŝita de bona konduto kontraŭ ĝi; per milda konduto, oni forigas almenaŭ ĉian pretekston por ia revenĝo; el malamiko oni povas ja fari al si amikon antaŭ aŭ post lia morto. Per malbona konduto oni incitas sian malamikon *kaj tiam ĉi tiu fariĝas instrumento, kiun la justeco de Dio uzas, por puni tiun, kiu ne pardonis.*

6. Oni povas do havi malamikojn, tiel inter la enkarniĝintoj, kiel inter la elkarniĝintoj; la malamikoj el la nevidebla mondo manifestas sian malicemon per obsedoj kaj subjugigo, kontraŭ kiuj baraktas tiom da personoj, kaj kiuj estas unu el la specoj de provoj de la vivo; tiuj provoj, kiel ĉiuj aliaj, helpas la progreson kaj devas esti akceptataj rezignacie kaj kiel konsekvenco de la malsupera naturo de la terglobo; se ne ekzistus malbonaj homoj sur la tero, ne troviĝus malbonaj Spiritoj ĉirkaŭ ĝi. Se do oni devas havi indulgemon kaj bonvolemon por la enkarniĝintaj malamikoj, oni samajn sentojn portu ankaŭ por tiuj liberigitaj el la karno.

Oni iam oferadis sangantajn viktimojn, por senkolerigi la inferajn diojn, kiuj estis neniuj aliaj, ol la malbonaj Spiritoj. Post la inferaj dioj venis la demonoj, kiuj estas la samo. Spiritismo venas pruvi, ke tiuj demonoj estas nenio krom la animoj de malicaj homoj,

ankoraŭ ne seniĝintaj je materiaj instinktoj; *ke oni ilin ne mildigas krom per ofero de sia malamo*, tio estas, *per Karito*; ke la karito havas kiel efikon ne nur malebligi al ili fari malbonon, sed ankaŭ rekonduki ilin al la vojo De la bono kaj kunhelpi ilian savon. Tial la maksimo: *Amu viajn malamikojn* ne limiĝas je la mallarĝa rondo De la tero kaj de la nuna vivo, sed ĝi estas parto de la granda leĝo de l' universala frateco.

## Se iu frapas al vi la dekstran vangon, turnu al li ankaŭ la alian

7. *Vi aŭdis, ke estas dirite: Okulon pro okulo, kaj denton pro dento; sed mi diras al vi: Ne rezistu al la malbono; sed al tiu, kiu frapas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian. Kaj se iu deziras procesi kontraŭ vi, por forpreni vian tunikon, lasu lin preni ankaŭ vian mantelon. Kaj se iu devigas vin iri unu mejlon, iru kun li du. Donu al tiu, kiu petas de vi; kaj ne deturnu vin de tiu, kiu deziras prunti de vi.* (Mateo, 5: 38-42)

8. La antaŭjuĝoj de la mondo pri tio, kion oni konvencie nomas honorsento, aperigas tiun malserenan ofendiĝemon, naskitan de la fiero kaj de l' ekzaltiĝo de la personeco, kiu igas la homon pagi ofendon per ofendo, vundo per vundo; tia konduto ŝajnas konforma al la justeco en la okuloj de homo, kies moralo ne leviĝas super la surteraj pasioj; tial la Mosea leĝo diris: okulon pro okulo, denton pro dento, leĝo en harmonio kun la tempo, kiam vivis Moseo. Venis la Kristo kaj diris: Pagu per bono la malbonon. Li diris plu: "Ne rezistu al la malbono: *sed al tiu, kiu frapas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian."* Al fierulo, tiu maksimo ŝajnas malkuraĝaĵo, ĉar li ne komprenas, ke estas pli granda kuraĝo elteni insulton, ol venĝi, kaj li tion ne komprenas, ĉar lia vidpovo ne atingas trans la nunan tempon. Tamen, ĉu oni prenu tiun maksimon laŭlitere? Ne; tiel same, kiel

tiun alian, kiu ordonas, ke oni elŝiru sian okulon, se ĉi tiu skandalas; pelita ĝis siaj lastaj konsekvencoj, tiu instruo donus kiel rezulton, ke oni kondamnu ĉian, eĉ laŭleĝan, malhelpon al la perforto, kaj ke oni lasu kampon libera al la maliculoj, kiuj havus do jam nenian motivon por timo. Se oni ne bridus iliajn perfortojn, baldaŭ ĉiuj bonuloj estus iliaj viktimoj. La instinkto de memkonservado, kiu estas leĝo de la naturo, admonas ĉiun ne volonte etendi sian kolon al la murdisto. Per tiuj paroloj do Jesuo ne malpermesas la defendon, sed *kondamnas la venĝon*. Dirante, ke oni turnu la alian vangon, kiam unu estas frapita, li diris, en alia formo, ke oni ne pagu la malbonon per malbono; ke la homo humile akceptu ĉion, kio utilas por lin malfierigi; ke estas pli glore al li esti frapita, ol frapi, elteni pacience maljustaĵon, ol fari mem ĝin; ke estas pli bone esti trompita, ol trompi, esti ruinigita, ol ruinigi la aliajn. Tio estas samtempe la kondamno de la duelo, kiu estas nur manifestiĝo de la fiero. Nur la fido al la estonta vivo kaj al la justeco de Dio, kiu neniam lasas senpune la malbonon, povas doni la forton, por pacience elteni la atencojn al niaj interesoj kaj al nia memamo; tial ni diras senĉese: direktu viajn rigardojn antaŭen; ju pli alte vi levos vin per la penso super la materia vivo, des malpli vin ofendos la surteraj aferoj.

## INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

### La venĝo

9. La venĝo estas unu el la lastaj restaĵoj de la barbaraj moroj , kiuj iom post iom forviŝiĝas el inter la homoj. Ĝi estas, kune kun la duelo, unu el la lastaj postesignoj de tiuj sovaĝaj moroj, sub kiuj baraktis la homaro ĉe la komenco de la kristana epoko. Tial la venĝo estas certa signo de la neprogresinta stato de

la homoj, kiuj ĝin praktikas, kaj de la Spiritoj, kiuj povas ankoraŭ inspiri ĝin. Do, miaj amikoj, tiu sento neniam devas vibrigi la koron de iu ajn, kiu diras kaj deklaras sin spiritisto. Venĝi estas, vi tion scias, tiel kontraŭa al tiu preskribo de la Kristo: "Pardonu viajn malamikojn!", ke tiu, rifuzas pardoni, ne nur ne estas spiritisto, sed ankaŭ ne estas kristano. La venĝo estas inspiro des pli pereiga, ĉar la falseco kaj la malnobleco estas ĝiaj konstantaj akompanantoj. Efektive, kiu forlasas sin al tiu fatala kaj blinda pasio, tiu preskaŭ neniam venĝas malkaŝe. Se li estas la pli forta, li ĵetas sin kiel rabobesto sur tiun, kiun li nomas sia malamiko, kiam la vido de tiu flamigas lian pasion, lian koleron kaj lian malamon. Sed plej ofte li kovras sin per hipokrita ŝajno, kaŝante en la fundo de sia koro la malbonajn sentojn, kiuj lin animas; li ekprenas malrektajn vojojn, sekvas en la ombro sian malamikon, kiu nenion suspektas, kaj atendas la taŭgan momenton, por sendanĝere frapi; li sin kaŝas de sia kontraŭulo kaj ĉi tiun senĉese spionas; li faras abomenajn kaptilojn kaj en oportuna momento verŝas venenon en lian kalikon. Kiam lia malamo ne iras ĝis tiaj ekstremoj, li atakas sian viktimon en ties honoro kaj korinklinoj; li ne hezitas eĉ antaŭ la kalumnio, kaj liaj perfidaj sugestoj, lerte dissemitaj per ĉiuj ventoj, iom post iom amasiĝas sur la vojo. Sekve, prezentante sin en la lokoj, kie pasis la venena blovado de la hipokritulo, la persekutato miras, tie trovante nur malvarmajn vizaĝojn, kie li antaŭe vidadis amikajn kaj bonvolemajn mienojn; li konsterniĝas, kiam la manoj, kiuj iam serĉadis la lian, nun rifuzas ĝin premi; fine li sentas sin neniigita, vidante, ke liaj plej karaj amikoj kaj parencoj deturniĝas de li kaj lin evitas. Ha! la fiulo, kiu tiel venĝas, estas centoble pli kulpa, ol tiu, kiu alfrontas sian malamikon kaj lin insultas rekte en la vizaĝon.

For do tiujn sovaĝajn kutimojn! For tiujn morojn de aliaj tempoj! Ĉiu spiritisto, kiu pretendus hodiaŭ havi la rajton venĝi, ne indus plu esti ano de la falango, kiu prenis kiel devizon: "*Ekster karito, nenia savo!*" Sed ne, mi ne povus reteni min ĉe la penso, ke iu membro de la granda spiritista familio iam kuraĝos atenti pri ricevita ofendo, krom por pardoni. (*Julio Olivier.* Parizo, 1862.)

## La malamo

10. Amu unuj aliajn, kaj vi estos feliĉaj. Prenu precipe kiel taskon ami tiujn, kiuj inspiras al vi indiferentecon, malamon kaj malŝaton. La Kristo, kiun vi devas fari via modelo, donis al vi ekzemplon de tiu sindonemo; misiisto de amo, li amis en tia grado, ke li fordonis sian sangon kaj sian vivon. La ofero, kiu vin devigas ami la homojn, kiuj vin insultas kaj persekutas, estas dolora; sed ĝuste ĝi lokas vin super ili; se vi ilin malamus, kiel ili malamas vin, vi ne valorus pli ol ili; tia amo estas la senmakula hostio, kiun vi oferas al Dio sur la altaro de viaj koroj, hostio de agrabla odoro kaj kies parfumo suprenflugas al Li. Kvankam la leĝo de amo ordonas, ke ĉiu amu sendistinge ĉiujn siajn fratojn, ĝi tamen ne kirasas la koron kontraŭ la malbonaj agoj; ĝi, kontraŭe, trudas la plej doloran provon, kaj mi tion ja scias, ĉar en mia lasta surtera ekzistado mi spertis tian torturon; sed Dio estas ĉie kaj punas en la nuna kaj en la alia vivo tiujn, kiuj malobeas la leĝon de amo. Ne forgesu, miaj karaj filoj, ke la amo proksimigas al Dio, kaj la malamo malproksimigas de Li. (*Fénelon.* Bordeaux, 1861.)

## La duelo

11. Vere granda estas nur la homo, kiu, konsiderante la vivon kiel vojaĝon, kiu kondukos lin al difinita

celo, preterlasas la malglataĵojn de la vojo; li neniam eĉ dum momento permesas al si deflankiĝi de la rekta vojo; lia rigardo estas konstante turnita al la celo, kaj do nemulte gravas al li, ke rubusujoj kaj dornoj minacas gratvundi lin; ili apenaŭ lin tuŝas, sed ne difektas, kaj li tamen daŭrigas sian iradon. Riski siajn vivtagojn, por venĝi ofendon, estas retroiro antaŭ la provoj de la vivo, estas ĉiam krimo en la okuloj de Dio; kaj se vi ne estus tiel trompitaj, kiel vi estas, de viaj antaŭjuĝoj, tio estus ridinda kaj grandega frenezaĵo en la okuloj de la homoj.

Estas krimo ĉe la hommortigo per duelo; via leĝaro mem ĝin rekonas; neniu rajtas, en ia ajn okazo, atenci kontraŭ la vivo de sia similulo; ĝi estas krimo en la okuloj de Dio, kiu starigis vian kondutregulon; en la duelo, pli ol en ĉio alia, vi estas juĝantoj en via propra afero. Memoru, ke vi estos pardonitaj nur tiel, kiel vi mem pardonos; per pardono vi alprokisimiĝas al Dio, ĉar pardonemo estas frato de potenco. Dum guto da homa sango, verŝita per mano de la homoj, fluos sur la tero, la vera regno de Dio ankoraŭ ne estos alveninta, tiu regno de pacigo kaj de amo, kiu por ĉiam forpelos de via planedo malamon, malkonkordon, militon. Tiam la vorto duelo ekzistos en via lingvo nur kiel malproksima, nepreciza rememoro pri iu fora pasinteco; la homoj konos inter si nenian alian antagonismon, ol la noblan konkuradon en la farado de la bono. (*Adolfo,* episkopo de Alger. Marmande, 1861.)

12. Sendube, la duelo en iuj okazoj povas esti pruvo de fizika kuraĝo, de malŝato je la vivo, sed ĝi estas neneigebla pruvo de morala malkuraĝeco, kia la memmortigo. La memmortiganto ne havas la kuraĝon alfronti la sortovicojn de la vivo: la duelanto ne havas la kuraĝon kontraŭstari la ofendojn. Ĉu la Kristo ne diris, ke estas pli honore kaj kuraĝe turni la maldekstran vangon al

tiu, kiu frapis al vi la dekstran, ol venĝi ofendon? Ĉu la Kristo ne diris al Petro en la ĝardeno de l' Olivarboj: "Remetu vian glavon en ĝian ingon, ĉar, kiu per glavo mortigos, tiu per glavo pereos"? Ĉu per tiuj vortoj Jesuo ne kondamnis por ĉiam la duelon? Efektive, miaj filoj, kio estas tiu kuraĝo, naskita de perfortema, sangavida temperamento, ekflamanta ĉe l' unua ofendo? Kie estas do la grandanimeco de tiu, kiu ĉe la plej malgranda ofendo, volas ĝin lavi en sango? Sed li tremu! ĉar ĉiam en la fundo de lia konscienco voĉo krios: Kain! Kain! kion ci faris el cia frato? Mi bezonis sangon por savi mian honoron, li diros al tiu voĉo; sed ĝi kontraŭrespondos al li: Ci volis savi ĝin antaŭ la homoj por kelkaj momentoj, kiuj restis al vi sur la tero, kaj ci ne ekpensis savi ĝin antaŭ Dio! Kompatinta frenezulo! kiom da sango do la Kristo petus de vi por ĉiuj ofendoj, kiujn li ricevis! Vi ne nur vundis lin per la dornoj kaj la lanco, vi ne nur lin alnajlis al malhonora kruco, sed ankaŭ, meze de sia agonio, li povis aŭdi la mokojn, per kiuj li estis superŝutita. Kian kompenson post tiom da ofendoj li petis de vi? La lasta krio de la ŝafido estis preĝo por liaj turmentantoj. Ho! kiel li, pardonu kaj preĝu por viaj ofendantoj.

Amikoj, rememoru jenan ordonon: "Amu unuj aliajn", kaj al bato de la malamo vi respondos per rideto, kaj al ofendo per pardono. La mondo sendube ekstaros furioza kaj nomos vin malkuraĝuloj; sed levu alten la kapon, kaj montru, ke via frunto ankaŭ ne timus esti kronita per dornoj, laŭ la ekzemplo de la Kristo, sed ke via mano ne volas esti kulpa pri murdo, laŭdire pravigita de ia honorŝajno, kiu estas ja nenio krom fiero kaj memamo. Ĉu, kreinte vin, Dio donis al vi la rajton de vivo kaj morto, unuj sur aliajn? Ne, Li donis tiun rajton nur al la naturo, por sin reformi kaj rekonstrui; sed al vi Li ne permesas, ke vi disponu eĉ je vi mem. Same kiel la memmortiginto, la duelinto estos markita

per sango ĉe sia prezento al Dio, kaj al ambaŭ la Suverena Juĝisto destinos akran, longan punon. Se Li minacis per Sia justeco tiun, kiu diros al sia frato *Raka,* kiom pli severa estos la puno je tiu, kiu aperos antaŭ Li kun la manoj ruĝaj de la sango de sia frato! (*Sankta Aŭgusteno*. Parizo, 1862.)

13. La duelo, kiel tio, iam nomata "juĝo de Dio", estas unu el tiuj barbaraj institucioj, kiuj regas ankoraŭ la socion. Kion vi tamen dirus, se vi vidus du antagonistojn enigitajn en bolantan akvon aŭ sumetatajn al kontakto de ardanta fero, por ke estu decidita ilia kverelo favore al tiu, kiu pli bone eltenus la provon? tiajn kutimojn vi konsiderus malsaĝaj. La duelo estas ankoraŭ pli malbona, ol ĉio tio. Por la lerta duelanto, ĝi estas murdo farita malvarmsange, kun plena antaŭdecido, ĉar li estas certa pri la frapo, kiun donos; por lia kontraŭulo, preskaŭ certa pri sia pereo pro siaj malforteco kaj mallerteco, ĝi estas memmortigo, farita kun la plej malvarma pripensado. Mi scias, ke oni ofte penas eviti tiun egale kriman alternativon, konfidante la decidon al la hazardo; sed ĉu tio ne estas ia reveno, sub alia formo, al la mezepoka "juĝo de Dio?" Kaj en tiu epoko la kulpo estis multege malpli granda; la esprimo mem *juĝo de Dio* tradukis fidon, ja naivan, tamen fidon al la justeco de Dio, kiu ne povus lasi senkulpulon perei, dum en la duelo la juĝanto estas la perforto, kaj ofte pereas la ofendito.

Ho, stulta memestino, malsaĝa vantamo kaj freneza fiero, kiam vi estos anstataŭita de la kristana karito, de l' amo al la proksimulo kaj de la humileco, pri kiuj Kristo donis ekzemplon kaj regulon? Nur tiam malaperos tiuj monstraj antaŭjuĝoj, kiuj ankoraŭ regas la homojn kaj kiujn la leĝoj estas senpovaj eviti, ĉar ne sufiĉas malpermesi la malbonon kaj preskribi la bonon: estas necese, ke la principo de la bono kaj la abomeno

al la malbono loĝu en la koro de la homo. (*Protektanta Spirito*. Bordeaux, 1861)

14. Kia oni juĝos min, vi ofte diras, se mi rifuzos la kontentigon, pri kiu mi estas petata, aŭ se mi ne postulos kontentigon de tiu, kiu ofendis min? La frenezuloj, kiaj vi, la malprogresintaj homoj riproĉos vin; sed tiuj, al kiuj lumigas la torĉo de intelekta kaj morala progreso, diros, ke vi agas laŭ la vera saĝeco. Iom pripensu; pro iu frivola aŭ tute ne ofenda vorto, dirita de unu el viaj fratoj, via fiero ofendiĝas, sentas sin vundita, vi respondas akre, kaj el tio naskiĝas provoko. Antaŭ ol veni al la decida moento, ĉu vi demandas vin, ĉu vi agas kiel kristano? kiajn kalkulojn vi ŝuldas al la socio senigante ĝin de unu el siaj membroj? Ĉu vi pensas pri la konsciencriproĉo pro tio, ke vi forprenas de virino ŝian edzon, de patrino ŝian filon, de infanoj ilian patron kaj subtenanton? Certe, kiu faris ofendon, tiu ŝuldas kontentigon; sed ĉu ne estas pli honore por li ĝin doni propravole, rekonante siajn erarojn, ol riski la vivon de tiu, kiu rajtas plendi? Pri la ofendito, mi konsentas, ke li kelkfoje ĝin rajtas plendi, ĉar li konsideras sin grave atingita, aŭ je sia persono aŭ je siaj karuloj, kiuj intime koncernas lin; ne nur la memamo estas ofendita, ankaŭ la koro estas vundita kaj suferas; sed ĉu ne estas stultaĵo riski sian vivon, ĵetante sin sur malŝatindulon kapablan al fiaĵoj, kaj cetere, se tiu ĉi estus mortigita, ĉu la ofendo — kia ajn ĝi estis — forviŝiĝus? Ĉu la sango disverŝita ne donas pli da famo al la fakto, kiu, se falsa, devas fali per si mem, kaj kiun, se ĝi estas vera, pli bone vualus silento? Restas do nur la kontentigo, kiu ofte jam de la nuna vivo naskas ŝirantajn ĉagrenojn. Kaj se iu estas la ofendito, kiu pereas, kie estas la kompenso?

Kiam la karito estas regulo de konduto de la homoj, ili konformigos siajn agojn kaj vortojn al tiu ĉi maksimo:

"Neniel faru al aliaj tion, kion vi ne volus, ke oni faru al vi"; tiam malaperos ĉiuj kaŭzoj de malkonsento kaj kun ili la kaŭzoj de dueloj kaj militoj, kiuj estos duelo de popolo kontraŭ popolo. (*Francisko Xavier.* Bordeaux, 1861.)

15. Monduma homo, homo feliĉa, kiu, pro malplaĉa vorto, pro ia negrava kaŭzo, riskas la vivon, kiun li ricevis de Dio, kaj riskas la vivon de sia similulo, kiu apartenas nur al Dio, estas centoble pli kulpa ol sendignulo, kiu, puŝate de l' avideco, kelkfoje de la bezono, enŝoviĝas en loĝejon por ŝteli, kion li soifas, kaj mortigas tiujn, kiuj kontraŭstaras lian planon. Tiu lasta preskaŭ ĉiam estas homo ne edukita kaj havanta nur malperfektajn nociojn pri bono kaj malbono, dum la duelanto apartenas preskaŭ ĉiam al la klera klaso; unu mortigas brute, la dua metode kaj ĝentile, kaj tial la socio senkulpigas lin. Mi eĉ aldiras, ke la duelanto estas senlime pli kulpa, ol la malfeliĉulo, kiu, cedante al sento de venĝemo, mortigas en momento de kolerego. La duelanto ne havas kiel senkulpigon la torenton de la pasio, ĉar inter la insulto kaj la kontentigo estas ĉiam tempo por pripensado; li agas do malvarme kaj kun antaŭdecidita plano; ĉion li studas kaj kalkulas, por pli certe mortigi sian kontraŭulon. Li ankaŭ ja riskas sian vivon, kaj tio rajtigas la duelon antaŭ la okuloj de la mondo, ĉar oni vidas en ĝi kuraĝon kaj malestimon je la propra vivo; sed, ĉu tiu estas ja kuraĝa, kiu estas certa pri sia lerteco? La duelo, restaĵo de la tempoj barbaraj, kiam la rajto de la plej forta faris la leĝon, malaperos kun pli ĝusta kompreno de la vera digno kaj laŭmezure kiel la homo havos pli vivan fidon al la estonta vivo. (*Aŭgusteno*. Bordeaux, 1861)

16. *Rimarko.* La dueloj fariĝas ĉiam pli maloftaj, kaj se oni de tempo al tempo ankoraŭ vidas tiajn

dolorajn ekzemplojn, iliaj nombro jam ne estas komparebla al tiu pasintatempa. Iam neniu viro eliris el sia domo ne antaŭvidante duelon, kaj tial li ĉiam antaŭpreparis sin por ĝi. Karakteriza signo de la moroj de tiuj tempoj kaj popoloj estis la kutimo kunporti ĉiam, videble aŭ kaŝite, atakajn kaj defendajn armilojn; la forigo de tiu uzado atestas la mildigon de la moroj, kaj estas interese sekvi ties gradiĝon ekde l' epoko, kiam la rajdistoj neniam rajdadis sen ferkovraĵoj kaj armitaj per lanco, ĝis la tempo, kiam simpla spado ĉe la zono estis pli ornamaĵo kaj akcesoraĵo de blazono, ol ataka armilo. Alia trajto de la moroj estas, ke iam la dueloj okazadis en la stratoj mem, antaŭ la popolamaso, kiu apartiĝis, por lasi kampon libera al la batalantoj, dum hodiaŭ ĉi tiuj sin kaŝas; nun la mortigo de homo estas grava, kortuŝa okazaĵo; iam oni neniel atentis al tio. Spiritismo forviŝos tiujn lastajn postesignojn de barbareco, enradikante en la homojn la spiriton de karito kaj de frateco.

ĈAPITRO XIII

# VIA MALDEKSTRA MANO NE SCIU, KION DONAS VIA DEKSTRA MANO

Fari la bonon sen parado. La kaŝitaj malfeliĉoj. La kodranto de la vidvino. Inviti la malriĉulojn kaj kriplulojn. Fari servon, ne atendante rekompencon. **Instruoj de la Spiritoj**: Materia karito kaj morala karito. La bonfarado. La kompato. Bonfaroj pagataj per maldanko. Ekskluziva bonfarado.

## Fari la bonon sen parado

1. *Gardu vin, ke vi ne faru vian justaĵon antaŭ homoj, por esti alrigardataj de ili; alie vi ne havas rekompencon ĉe via Patro, kiu estas en la ĉielo. — Tial, kiam vi donos almozon, ne sonigu trumpeton antaŭ vi, kiel faras la hipokrituloj en la sinagogoj kaj sur la stratoj, por havi gloron ĉe homoj. Vere mi diras al vi: Ili jam ricevas sian rekompencon. Sed kiam vi donas almozon,* ne lasu vian maldekstran manon scii, kion faras via dekstra*; por ke via almozo estu en sekreto; kaj via Patro, kiu vidas en sekreto, vin rekompencos*. (Mateo, 6:1-4).

2. *Kiam li malsupreniris de la monto, lin sekvis grandaj homamasoj. Kaj jen venis al li leprulo kaj adorkliniĝis al li, dirante: Sinjoro, se vi volas, vi povas min purigi. Kaj li etendis la manon kaj tuŝis lin, dirante: Mi volas, estu purigita. Kaj tuj lia lepro estis purigita. Kaj Jesuo diris al li:* Zorgu, ke vi diru al neniu. *Sed iru, montru vin al la pastro, kaj oferu la donon, kiun Moseo ordonis, por atesto al ili*. (Mateo, 8:1-4).

3. Fari la bonon sen parado estas granda merito; kaŝi la manon, kiu donas, estas ankoraŭ pli merite; tio estas nediskutebla signo de granda morala supereco; ĉar por vidi la aferojn de pli alte, ol la vulgarulo, oni devas ne konsideri la nunan vivon kaj identiĝi kun la estonta; unuvorte, loki sin super la homaro, por flanken meti la kontentecon, kiun portas la atesto de la homoj, kaj atendi la aprobon de Dio. Kiu ŝatas la aprobon de la homoj pli ol la aprobon de Dio, tiu pruvas, ke li havas pli da fido al la homoj, ol al Dio, kaj ke la nunan vivon li rigardas kiel pli valoran, ol la estontan, aŭ eĉ ke li ne kredas al la estonta vivo; se li diras la kontraŭon li kondutas kvazaŭ li ne kredus tion, kion li diras.

Kiom da homoj komplezas nur esperante, ke la ricevinto de ilia bonfaro ĉi tiun trumpetos! Kiom multaj, en la taglumo, donas grandaj sumojn, sed en la ombro ili ne donus eĉ monereton! Tial Jesuo diris: "Kiuj parade faras la bonon, tiuj jam ricevis sian rekompencon"; efektive, tiu, kiu serĉas sian propran gloradon sur la tero per la bono, kiun li faras, jam pagis al si mem; Dio ŝuldas al li jam nenion; restas al li ricevi nur la punon por sia fiero.

*Ne lasu vian maldekstran manon scii, kion faras via dekstra mano*, estas figuro, mirinde karakterizanta la modestan bonfaradon; sed se ekzistas la reala modesteco, ekzistas ankaŭ la modesteco laŭplane ludata; kelkaj personoj kaŝas la manon, kiu donas, sed zorgas ke ankoraŭ peceto da ĝi aperu, rigardante ĉirkaŭen por certiĝi, ĉu iu ne vidis lin kaŝi la manon. Nedigna parodio de la maksimoj de la Kristo! Se la fieraj bonfarantoj estas malŝatataj inter la homoj, kiel Dio juĝos pri ilia konduto! Ankaŭ tiuj jam ricevis sian rekompencon sur la tero. Oni vidis ilin; ili estas kontentaj, ke ili estas viditaj: jen ĉio, kion ili ricevos.

Kia estos la rekompenco de homo, kiu faras el siaj komplezoj sarĝon sur la ricevinto de lia helpo, kiu

iamaniere postulas de tiu montrojn de danko, kiu sentigas al tiu sian pozicion de ŝuldanto, reliefigante la prezon de siaj oferoj por la favorito? Ho! Por tiu eĉ la surtera rekompenco ne ekzistas, ĉar li ne ĝuas la dolĉan ĝojon aŭdi beni lian nomon, kaj tio estas unua puno por lia fiero; la larmoj, kiujn li forviŝas por kontentigo de sia vantamo, anstataŭ suprenflugi al la ĉielo, refalas sur la koron de l' afliktito kaj ulcerigas ĝin. El la bono, kiun li faras, venas al li neniom da profito, ĉar li ĝin bedaŭras, kaj ĉiu bonfaro bedaŭrata estas falsita, senvalora monero.

La ne paradanta bonfarado havas duoblan meriton: krom materia karito, ĝi estas ankaŭ morala karito; ĝi ne tuŝas la ofendiĝemon de la komplezito; ĝi akceptigas la bonfaron, ne vundante la memamon kaj gardante la homan dignon; nu, aliigi la servon en almozon, sekve de la maniero kiel oni ĝin faras, estas humiligi ĝian ricevanton, kaj ĉiam estas fiero kaj malicaĵo humiligi iun. La vera karito, kontraŭe, estas diskreta kaj lerta per tio, ke ĝi kaŝas la helpon kaj sin detenas eĉ de la plej simplaj ŝajnoj, kiuj eble vundus, ĉar ĉiu morala ofendo pligrandigas la suferon naskitan de la bezono; ĝi scias trovi dolĉajn kaj afablajn vortojn, kiuj senĝenigas la ŝuldanton antaŭ sia bonfarinto, dum la fiera karito lin subpremas. La vera nobleco atingas sian superbelecon, kiam la bonfarinto, inversigante la rolojn, trovas rimedon por ŝajnigi, ke li mem estas ŝuldanto de la persono, al kiu li servis. Jen kion signifas jenaj vortoj: Ne lasu vian maldekstran manon scii, kion faras via dekstra mano.

## La kaŝitaj malfeliĉoj

4. Ĉe la grandaj katastrofoj la karito emociiĝas kaj oni konstatas malavarajn impulsojn por la riparado de la ruinoj; sed, krom tiuj ĝeneralaj ruinoj, troviĝas

ankaŭ miloj da privataj, nerimarkitaj malfeliĉoj, ĉe personoj, kiuj senplende kuŝas sur mizera lito. Tiajn silentajn, kaŝitajn malfeliĉojn la vera noblanimeco scias trovi, ne atendante peton pri helpo.

Kiu estas tiu noblamiena sinjorino, zorge, sed simple vestita, akompanata de junulino en tiel modesta vesto? Ŝi eniras en malpuraspektan domon, kie sendube ŝi estas konata, ĉar ĉe la pordo oni ŝin salutas respekte. Kien ŝi iras? Ŝi supreniras ĝis la mansardo: tie kuŝas patrino ĉirkaŭita de siaj infanoj; ĉe ŝia alveno ĝojo brilas sur tiuj malgrasaj vizaĝoj; ŝi venas ja kvietigi ĉiujn tiujn dolorojn; ŝi alportas ĉion necesan, spicitan per dolĉaj kaj konsolaj vortoj al tiuj malfeliĉuloj, neprofesiaj almozpetantoj, kiuj, ne ruĝigante, akceptas la bonfaron. La patro estas en hospitalo, kaj dum tiu tempo la patrino ne sukcesas per sia laboro provizi sian familion per ĉio necesa. Dank′ al tiu bonkora sinjorino, tiuj kompatindaj infanoj ne suferos malvarmon nek malsaton; ili iros en la lernejon varme vestitaj, kaj ne sekiĝos la patrina sino, kiu nutras la plej junajn. Se unu el ili estas malsana, ŝi ŝparas al si neniajn materiajn zorgojn, kiujn tiu bezonas. De tie ŝi iras en la malsanulejon porti iajn dolĉaĵojn al la patro kaj trankviligi lin pri la sorto de la familio. Ĉe la angulo de la strato, ŝin atendas veturilo, vera magazeno de ĉio, kion ŝi destinas por siaj protektatoj, kiujn ŝi vizitas unu post alia; ŝi ne demandas pri ilia kredo, nek pri ilia opinio, ĉar ĉiujn homojn ŝi konsideras fratoj inter si kaj filoj de Dio. Fininte sian vizitadon, ŝi diras al si mem: Mi bone komencis mian tagon. Kiu estas ŝia nomo? Kie ŝi loĝas? Neniu scias; por la malfeliĉuloj ŝia nomo ne gravus; sed ŝi estas konsolanta anĝelo; kaj vespere koncerto de benoj por ŝi suprenflugas al la Kreanto: katolikoj, judoj, protestantoj, ĉiuj laŭdas ŝin.

Kial tia simpla vesto? Ŝi ne volas per lukso ofendi la mizeron. Kial ŝi igas sian filinon akompani ŝin? Por

instrui al la junulino, kiel oni devas praktiki la bonfaradon. Ŝia filino ankaŭ volas fari kariton, sed la patrino diras al ŝi: "Kion ci povas doni, mia filino, se ci nenion posedas? Se mi donos al ci ion, por ke ci ĝin transdonu al aliaj, kian meriton ci havos? Efektive, mi mem farus kariton kaj ci havus nenian meriton; tio ne estus justa. Kiam ni vizitas la malsanulojn, ci helpas al mi flegi ilin; nu doni flegadon estas doni ion. Ĉu tio ne ŝjanas al ci sufiĉa? nenio pli simpla; lernu fari utilajn laboraĵojn, kaj ci faros vestojn por tiuj infanoj; tiamaniere ci donos ion venantan de ci." Tiel, tiu vere kristana patrino edukas sian filinon por la praktikado de la virtoj instruitaj de la Kristo. Ĉu ŝi estas spiritistino? Tio ne gravas!

Hejme, ŝi estas monduma virino, ĉar ŝia pozicio tion postulas; sed oni ne scias, kion ŝi faras, ĉar ŝi volas nenian alian aprobon, ol tiun de Dio kaj de sia konscienco. Tamen unu tagon neantaŭvidita cirkonstanco kondukas al ŝia hejmo unu el ŝiaj protektatinoj, kiu alportas al ŝi laboraĵon; tiu virino ŝin tuj rekonas kaj volas danki sian bonfarantinon. "Silentu!" ŝi diras al la virino: "*al neniu tion diru*". Tiele instruadis Jesuo.

## La kodranto de la vidvino

5. *Kaj sidante kontraŭ la monkesto, li rimarkis, kiel la homoj enĵetas monerojn en la monkeston; kaj multaj riĉuloj enĵetis multon. — Kaj venis unu malriĉa vidvino, kaj enĵetis du leptojn, kiuj faras kodranton. — Kaj alvokinte al si siajn disĉiplojn, li diris al ili: Vere mi diras al vi, ke tiu malriĉa vidvino enĵetis pli ol ĉiuj ĵetantoj en la monkeston, ĉar ili ĉiuj enĵetis el sia abundo, sed ŝi el sia senhaveco ĵetis ĉion, kion ŝi havis, sian tutan vivrimedon.* (Marko, 12:41-44; Luko, 21: 1-4)

6. Multaj personoj bedaŭras, ke ili ne povas fari tiom da bono, kiom ili volus, pro manko de sufiĉaj

rimedoj, kaj ke, se ili deziras riĉecon, tio celas, ili diras, ĝin bone uzadi. La intenco estas laŭdinda, sendube, kaj povas esti tre sincera ĉe iuj; sed ĉu oni estas tre certa, ke tiu deziro ĉe ĉiuj enhavas nenian kaŝitan intereson? Ĉu al kelkaj, ja dezirantaj fari bonon al aliaj, ne plaĉas ĝin fari unue al si mem, permesi al si iom pli da ĝuoj, havigi al si iom da superfluaĵoj, kaj doni al la malriĉuloj nur la restaĵon? Tiu kaŝita penso, kiun tiuj eble vualas antaŭ si mem, sed kiun ili trovus en la fundo de sia koro, se ili volus elesplori ĝin, nuligas la meriton de l' intenco, ĉar la vere karitema homo pensas pri l' aliaj, antaŭ ol pensi pri si mem. La sublimeco de la karito, en tiu okazo, kuŝus en tio, ke la homo serĉu per sia laboro, per la uzado de siaj fortoj, de sia inteligento, de sia multforma talento, la rimedojn, kiujn li bezonas por efektivigi siajn malavarajn intencojn; tia estus la ofero plej agrabla al la Sinjoro. Bedaŭrinde, la plimulto revas pri la plej facilaj rimedoj riĉiĝi subite kaj senpene, kurante post ĥimerojn, kiaj la eltrovo de trezoroj, ia duba favora bonŝanco, ricevo de neatenditaj heredaĵoj, ktp. Kion pensi pri tiuj, kiuj esperas trovi, inter la Spiritoj, helpantoj, kiuj kun ili kunlaborus en tia serĉado? Certe ili ne konas, nek komprenas, la sanktan celon de Spiritismo, kaj des malpli la mision de la Spiritoj, al kiuj Dio permesas komunkiĝi kun la homoj; tial ili estas punataj per trompiĝoj. (*La Libro de la Mediumoj,* §§ 294 kaj 295).

La homoj, kies intenco havas nenian personan karakteron, devas konsoliĝi pri sia senpoveco fari tiom da bono, kiom ili volus, per la penso, ke la monereto de la malriĉulo, kiu donas senigante sin je la plej necesa pezas pli en la pesilo de Dio, ol la oro de la riĉulo, kiu donas senigante sin je io ajn. Sendube oni sentus sin plej feliĉa, se oni povus helpi la mizerulojn; sed se oni ne povas ĝui tian feliĉon, oni submetiĝu kaj limigu sin al tio, kion oni povas fari. Cetere, ĉu nur per oro

oni povas forviŝi larmojn, kaj ĉu oni restu senaga, se oni ne posedas oron? Kiu sincere volas esti utila al siaj fratoj, tiu trovas mil okazojn; li serĉu, kaj li trovos tiujn okazojn; se ne en ia maniero, li helpos en alia, ĉar neniu persono, plene ĝuanta siajn fakultojn, ne kapablas fari iun servon, doni iun konsolon, mildigi iun korpan aŭ moralan suferon, fari iun utilan klopodon; ĉu, manke de moni, ĉiu ne havas sian kapablon, sian tempon, sian ripozon, de kiuj li povas doni parton al sia proksimulo? Tie ankaŭ troviĝas la monereto de la malriĉulo, la kodranto de la vidvino.

## Inviti la malriĉulojn kaj la kriplulojn

7. *Kaj li diris al tiu, kiu lin invitis: Kiam vi faras tagmanĝon aŭ vespermanĝon, ne voku viajn amikojn, nek viajn fratojn, nek viajn parencojn, nek viajn riĉajn najbarojn, por ke ne okazu, ke ili ankaŭ invitos vin, kaj vi ricevos renkompencon. Sed kiam vi faras festenon, invitu malriĉulojn, kriplulojn, lamulojn, blindulojn; kaj vi estos feliĉa, ĉar ili ne povas rekompenci vin, sed vi rekompenciĝos en la releviĝo de la justuloj.*

*Kaj aŭdinte tion, unu el la kunsidantoj diris al li: Feliĉa estas tiu, kiu manĝos panon en la regno de Dio.* (Luko, 14:12-15).

8. "Kiam vi faras festenon, diris Jesuo, ne invitu viajn amikojn, sed la malriĉulojn kaj kriplulojn." Tiuj vortoj, absurdaj, se oni ilin prenas laŭlitere, estas sublimaj, se oni serĉas ilian spiriton. Jesuo ne povus intenci diri, ke anstataŭ siaj amikoj oni devas kunvenigi ĉe sia tablo la stratajn almozulojn; lia parolmaniero estis preskaŭ ĉiam figura, kaj por homoj, nekapablaj kompreni la delikatajn nuancojn de la pensado, fortaj bildoj estis necesaj, por produkti la efektojn de tranĉaj koloroj. La fundo de lia penso montriĝas en jenaj vortoj: "Vi estos feliĉa, ĉar ili ne povos rekom-

penci vin"; tio signifas, ke oni faru bonon ne celante repagon, sed por la sola plezuro fari ĝin. Por fari frapantan komparon, li diras: Invitu al viaj festenoj la malriĉulojn, ĉar vi scias, ke ili nenion povos redoni al vi; kaj kiel *festenojn* oni komprenu ne ĝustadirajn manĝojn, sed la partoprenon en la abundo, kiun oni ĝuas.

Tia admono povas tamen esti komprenata en pli laŭlitera senco. Kiom da personoj invitas al sia tablo nur tiujn, kiuj povas, kiel ili diras, fari al ili honoron, aŭ kiuj povas siavice inviti ilin! Aliaj, kontraŭe, trovas plezuron akceptante ĉe si malpli feliĉajn parencojn kaj amikojn; nu, kiu ja ne havas tiajn parencojn kaj amikojn malpli feliĉajn? Kelkfoje tio estas granda, kvankam tute ne ŝajna servo. Tiuj, kvankam ne alvokante blindulojn kaj kriplulojn, praktikas la maksimon de Jesuo, se nur ili tion faras pro bonvolemo, sen vantamo, kaj se ili scias kaŝi la bonfaron per sincera afableco.

## Instruoj de la Spiritoj

### Materia karito kaj morala karito

9. "Ni amu unuj aliajn kaj faru al aliaj tion, kion ni volus, ke ĝi estu farata al ni." La tuta religio, la tuta moralo troviĝas enfermitaj en tiuj du reguloj; se ili estus sekvataj sur la tero, vi ĉiuj estus feliĉaj: ne plu malamoj, ne plu malkonsentoj; mi diros ankoraŭ: ne plu malriĉeco, ĉar per la superfluo de la tablo de ĉiu riĉulo multaj malriĉuloj nutrus sin, kaj vi ne plu vidus, en la mallumaj kvartaloj, kie mi loĝis dum mia lasta enkarniĝo, malriĉajn virinojn, kiuj trenadis post si mizerajn infanojn, al kiuj ĉio mankis.

Riĉuloj! pensu iom pri tio; helpu, kiom vi povos, la malriĉulojn; donu, por ke Dio iam redonu al vi la bonon, kiun vi estos farintaj, por ke, kiam vi demetos

vian surteran envolvaĵon, aro da dankemaj Spiritoj vin akceptu ĉe la sojlo de mondo pli feliĉa.

Se vi povus kompreni la ĝojon, kiun mi spertis, retrovante en la Transtombo tiujn, kiujn mi komplezis en mia lasta ekzistado!. . .

Amu do vian proksimulon; amu lin kiel vin mem, ĉar vi scias nun tion ĉi: tiu malfeliĉulo, kiun vi forpelas, eble estis iam via frato, patro, amiko; kaj do, kia estos via ĉagreno, kiam vi rekonos lin en la mondo de la Spiritoj!

Mi deziras, ke vi komprenu bone, kio estas *la morala karito,* tiu karito, kiun ĉiu povas praktiki; ĝi *nenion materian kostas* kaj tamen ĝi estas la plej malfacila.

La morala karito konsistas en la reciproka tolerado, kaj tion vi plej malmulte faras en tiu malsupera mondo, kie vi estas enkarniĝintaj dum la nuna momento. Estas granda merito, kredu min, scii silenti, por lasi iun pli stultan paroli; tio estas ankaŭ unu el la specoj de karito. Scii esti surda, kiam malrespekta vorto elglitas el mokema buŝo; ne vidi la malestiman rideton, per kiu akceptas vin personoj, kiuj, ofte malprave, kredas sin pli altaj ol vi, dum en la spirita vivo, *la sola reala vivo,* kelkfoje ili estas ja malsuperaj; jen merito, ne laŭ la humileco, sed laŭ karito; ĉar ne atenti la malbonan konduton de aliulo estas morala karito.

Tamen tiu karito ne devas malhelpi la alian; sed precipe zorgu ne malŝate trakti vian similulon; rememoru ĉion, kion mi diris al vi: Neniam forgesu, ke malriĉulon, kiun vi forpelas, eble animas Spirito, kiu iam estis al vi tre kara kaj kiu, en tiu momento, staras pli malalte ol vi. Mi renkontis tie ĉi unu el viaj malriĉuloj, kiun mi kelkfoje povis bonŝance helpi kaj kiun, miavice, mi devas nun petegi pri helpo. Memoru, ke Jesuo diris, ke ni estas gefratoj, kaj pensu ĉiam pri tio, antaŭ ol

forpuŝi leprulon aŭ almozulon. Adiaŭ; pensu pri la suferantoj kaj preĝu. (*Fratino Rozalia*. Parizo, 1860).

10. Miaj amikoj, mi ĉiam aŭdas plurajn el vi diri: Kiel mi faru kariton, se mi mem ofte havas nenian porvivaĵon?

Kariton, miaj amikoj, oni faras en multaj manieroj; vi povas fari kariton per pensoj, per paroloj kaj per agoj. Per pensoj: preĝante por la forlasitaj kompatinduloj, kiuj mortis, eĉ ne vidinte la lumon; preĝo elkora konsolas ilin. Per paroloj: donante al viaj ĉiutagaj kunuloj bonajn konsilojn; diru al la homoj, kies humoron acidigis malespero kaj necesbezonoj kaj kiuj blasfemas kontraŭ la nomo de la Plejalta: "Mi estis kiel vi; mi suferis, mi estis malfeliĉa, sed mi kredis al Spiritismo, kaj vidu, nun mi estas feliĉa." Al la maljunuloj, kiuj diros al vi: " Tio estus senutila; mi troviĝas ĉe la fino de mia irado; mi mortos, kiel mi vivis", diru tamen: "Dio uzas por ni ĉiuj egalan justecon; memoru la laboristojn de la dek-unua horo." Al al infanoj jam malvirtigitaj de sia kunularo, sencele vagantaj kaj tuj falontaj, delogite de malbonaj tentoj, diru: "Dio vidas vin, miaj karaj etuloj", kaj senlace ripetu al ili tiujn dolĉajn vortojn, kiuj fine ĝermos en ilia juna intelekto, kaj anstataŭ fiuloj, vi faros el ili homojn. Tio ankaŭ estas karito.

Pluraj inter vi diras ankaŭ: "Ba! Ni estas tiom multaj sur la tero, ke Dio ne povas vidi nin ĉiujn." Aŭskultu bone tion ĉi, miaj amikoj: Kiam vi estas sur la supraĵo de monto, ĉu via rigardo ne ampleksas la miliardojn da sableroj kovrantaj la monton? Nu! same Dio vidas vin; Li lasas vian liberan volon agi, kiel vi lasas tiujn sablerojn iri laŭ la plaĉo de la vento, kiu ili disigas; la sola diferenco estas, ke Dio, per Sia senfina favorkoreco, metis en la fundon de via koro

vigle atentan gardostaranton, kiun vi nomas *konscienco*. Aŭskultu ĝin: ĝi donos al vi nur bonajn konsilojn. Kelkfoje vi malvigligas ĝin, kontraŭmetante al ĝi la senton de la malbono; tiam ĝi silentas; sed estu certaj, ke la kompatinda forlasito aŭdigos sian voĉon tuj, kiam vi permesos al ĝi percepti ian ombron da riproĉo. Aŭskultu ĝin, demandu ĝin, kaj ofte vi sentos vin konsolitaj per la ricevita konsilo.

Miaj amikoj, al ĉiu nova regimento la generalo donas novan standardon; al vi mi donas kiel devizon tiun ĉi maksimon de la Kristo: "Amu unuj aliajn." Praktiku tiun ĉi maksimon; kunvenu vi ĉiuj ĉirkaŭ tiu standardo, kaj el ĝi vi ricevos feliĉon kaj konsolon. (*Protektanta Spirito.* Lyon, 1860).

## La bonfarado

11. La bonfarado, miaj amikoj, donos al vi en tiu ĉi mondo la plej dolĉajn kaj la plej purajn ĝuojn, la ĝojojn de la koro, kiujn malkvietigas nek konsciencriproĉoj nek indiferenteco. Ho! Se vi povus kompreni ĉion grandan kaj dolĉan, kion enhavas la malavareco de la belaj animoj, tiu sento, kiu igas la homon rigardi alian tiel same, kiel li rigardas sin mem, kaj ĝoje demeti sian veston, por kovri sian fraton! Se vi povus, miaj amikoj, ne havi okupon pli dolĉan, ol fari aliajn feliĉaj! Kiaj estas la mondumaj festoj, kiujn vi povus kompari kun tiuj fariĝantaj, kiam, kiel reprezentantoj de Dio, vi portas ĝojon al mizeraj familioj, konantaj de la vivo nur suferojn kaj amaraĵojn; kiam vi vidas tiujn velkintajn vizaĝojn radii pro espero, ĉar, sen pano, tiuj malfeliĉuloj aŭdadis siajn infanojn, nesciantajn, ke vivi estas suferi, senĉese kriegi, en ploro, jenajn vortojn, kiuj enprofundiĝis, kiel akra ponardo, en la patrinan koron: Mi malsatas!. . . Ho! Komprenu, kiel agrablaj estas la

impresoj de tiu, kiu vidas renaskiĝi la ĝojon tie, kie antaŭ unu momento li vidis nur malesperon! Komprenu viajn devojn por viaj fratoj! Iru, iru renkonte al la malfeliĉuloj; iru helpi precipe la kaŝitan mizeron, ĉar tia estas la plej dolora. Iru, tre amataj, kaj tenu en via memoro jenajn vortojn de la Savanto: "Kiam vi vestas unu el tiu malgranduloj, sciu, ke vi tion faras al mi mem!" Karito! sublima vorto, kiu resumas ĉiun virtojn, ci estas la sola, kio kondukos la popolojn al la feliĉo; praktikante cin, ili kreos al si senfinajn ĝuojn por la estonteco, kaj dum ilia ekzilo sur la tero, ci estos ilia konsolo, la antaŭĝuado de la ĝojoj, kiujn ili iam spertos, kuniĝinte en la sino de amanta Dio. Ci, dia virto, havigis al mi la solajn momentojn da feliĉo, kiujn mi ĝuis sur la tero. Kredu, miaj enkarniĝintaj fratoj, la voĉon de amiko, kiu parolas kaj diras al vi: En la karito vi devas serĉi la pacon de la koro, la ĝojon de l' animo, la rimedon kontraŭ la afliktoj de la vivo. Ho! kiam vi eksentos la deziron akuzi Dion, ĵetu rigardon malsupren de vi; vidu kiom da mizeroj atendas mildigon; kiom da kompatindaj infanoj sen familio; kiom da maljunuloj, kiuj ne havas amikan manon, por ilin helpi kaj fermi iliajn okulojn, kiam la morto prenos ilin! Kiom da bono por fari! Ho! ne plendu; sed, kontraŭe, danku Dion, kaj plenmane malŝparu vian simpation, vian amon, vian monon al ĉiuj, kiuj, ne ricevinte la bonaĵojn de tiu ĉi mondo, konsumiĝas en sufero kaj en soleco. Vi rikoltos sur la tero tre dolĉajn ĝojojn, kaj poste. . . nur Dio scias, kio okazos! (*Adolfo*, episkopo de Alger. Bordeaux, 1861).

12. Estu bonaj kaj karitemaj: jen estas la ŝlosilo de la ĉielo, kiun vi tenas en viaj manoj; la tuta eterna feliĉo estas enfermita en ĉi tiu maksimo: Amu vin reciproke. La animo povas altiĝi en la spiritajn regionojn nur per sinofero por la proksimulo; ĝi trovas feliĉon kaj konsolon nur en la ekmovoj de la karito; estu bonaj,

subtenu viajn fratojn, flanke lasu tiun teruran kanceron, egoismon; kiam ĝi estos plenumita, tiu devo malfermos al vi la vojon al la eterna feliĉo. Cetere, kiu el vi ne sentis iam sian koron eksalti de ĝojo, sian internaĵon kvazaŭ krevi de raviteco ĉe la raporto pri ia bela sindono, pri ia vera karitaĵo? Se vi serĉus nur la plezuron, kiun donas bona ago, vi restus ĉiam sur la vojo de la spirita progreso. Ekzemploj ne mankas al vi; malofta estas nur volonto. Vidu la amason da bonaj homoj, kies memoron via historio pie konservas.

Ĉu la Kristo ne diris al vi ĉion, kio koncernas la kapablojn de karito kaj de amo? Kial oni flanke lasas liajn diajn instruojn? Kial oni fermas la orelon al liaj paroloj? Mi volus, ke oni donu pli da intereso, pli da fido al la evangeliaj legaĵoj; sed oni forlasas tiun libron, oni konsideras ĝin ia kolekto da vanaj vortoj, ia fermita letero; oni lasas en forgeso tiun mirindan kodon; viaj malfeliĉoj venas nur de tio, ke vi memvole forlasas tiun resumon de la diaj leĝoj. Legu do tiujn paĝojn, ardantajn de la sinofero de Jesuo, kaj meditu pri ili.

Homoj fortikaj, armu vin; homoj malfortaj, faru al vi armilojn el via mildeco, el via fido; estu pli konvinkaj, pli konstantaj en la disvastigado de via nova doktrino; nur kuraĝiĝon ni venis doni al vi, nur por stimuli vian fervoron kaj viajn virtojn Dio permesas al ni manifestiĝi al vi; sed, se oni volus, oni bezonus nur la helpon de Dio kaj sian propran volon; la spiritaj manifestiĝoj okazas nur por la fermitaj okuloj kaj la malmolaj koroj.

Karito estas la fundamenta virto, kiu devas subteni la tutan konstruaĵon de la surteraj virtoj; sen ĝi la aliaj ne ekzistas. Sen karito estas nenia espero pri pli bona sorto, nenia morala intereso, gvidanta nin; sen karito ne estas fido, ĉar fido estas nur radio, kiu briligas kariteman animon.

Karito estas la eterna ankro de la savo en ĉiuj globoj: ĝi estas la plej pura emanaĵo el la Kreanto mem; ĝi estas Lia propra virto, kiun Li donas al Sia kreito. Kiel ignori tiun superegan bonecon? Kun tiu penso, kiu koro estus tiel malvirta, ke ĝi subpremus kaj forpuŝus tiun tute dian senton? Kiu infano estus tiel malica, ke li ribelus kontraŭ tiu dolĉa kareso: la karito?

Mi ne kuraĝas paroli pri tio, kion mi faris, ĉar Spiritoj ankaŭ havas modestecon pri siaj laboroj; sed mi opinias, ke la laboro, komencita de mi, estas unu el tiuj, kiuj plej efike kunutilos al la mildigo de la vivo de viaj similuloj. Mi ofte vidas Spiritojn peti kiel mision daŭrigi mian taskon; mi vidas ilin poste kiel miajn dolĉajn kaj karajn fratinojn, en ilia pia kaj dia laborado; mi vidas ilin praktiki la virton, kiun mi rekomendas al vi, kun la tuta ĝojo, kiun donas ekzistado de sindonemo kaj sinofero; estas por mi granda feliĉo vidi, kiel ilia karaktero estas honesta, kiom ilia misio ilin honorigas kaj kiel amata kaj protektata ĝi estas. Virtaj homoj, homoj bonvolemaj kaj firmvolaj, unuiĝu, por daŭrigi grandskale la disvastigadon de la karito; vi trovos la rekompencon de tiu virto en ĝia praktikado mem; ĉiujn spiritajn ĝojon, senescepte, ĝi donas ekde la nuna vivo. Estu unuigitaj; amu unuj aliajn laŭ la instruoj de la Kristo. Tiel estu. (*Sankta Vincento de Paŭlo.* Parizo, 1858)

13. Mi estas nomata Cárita, mi sekvas la precipan vojon, kiu kondukas al Dio; akompanu min, ĉar mi konas la celon, al kiu vi ĉiuj devas iri.

Mi faris hodiaŭ matene mian kutiman rondiradon, kaj korpremite mi venas diri al vi: Ho! miaj amikoj, kiom da mizero, kiom da larmoj, kaj kiom vi devas fari por ilin ĉiujn forviŝi! Mi vane penis konsoli kompatindajn patrinojn, flustrante al ili en la orelojn: "Kuraĝon! bonaj

koroj zorgas pri vi; oni ne forlasos vin; paciencu! Dio estas tie ĉi; vi estas Liaj amataj, vi estas la elektitaj."

Ili ŝajnis aŭdi min kaj turnis al mia flanko grandajn delirajn okulojn; mi legis en iliaj vizaĝoj, ke iliaj korpoj, tiuj tiranoj de la Spirito, malsatas, kaj ke, se miaj paroloj iom trankviligis iliajn korojn, tamen ili ne plenigis la stomakojn. Mi ripetadis: "Kuraĝon! Kuraĝon!" Tiam kompatinda patrino ankoraŭ tre juna, kiu mamnutris infaneton, prenis ĝin en siajn brakojn kaj ĝin etendis al la malplena spaco, kvazaŭ por peti, ke mi protektu tiun malfeliĉan estuleton, kiu el sensuka mamo prenis nur nesufiĉan nutraĵon.

Aliloke mi vidis, miaj amikoj, kompatindajn maljunulojn sen laboro kaj baldaŭ sen rifuĝejo, baraktantajn en ĉiuj suferoj de la necesbezono, kaj, hontante pro sia mizero, ne kuraĝantajn – ili, kiuj neniam almozis – petegi karitan agon de la preterpasantoj. Prenite de kompato, mi, kiu nenion posedas, mi fariĝas almozulino por ili kaj iras ĉien stimulante la bonfaradon, blovante bonajn pensojn en la malavarajn kaj sentemajn korojn. Tial mi venas al vi, miaj amikoj, kaj diras: Tie kaj aliloke vivas malfeliĉuloj, kies pankesto estas malplena, en kies forno ne ardas fajro kaj kies liton ornamas nenia kovrilo. Mi ne diras, kion vi faru; mi lasas la iniciaton al viaj bonaj koroj; se mi diktus al vi regulon por via konduto, vi ne havus la meriton de via bona ago; mi nur diras al vi: Mi estas karito kaj mi etendas al vi la manon por viaj suferantaj fratoj.

Sed, se mi petas, mi ankaŭ donas, kaj mi donas multon; mi invitas vin al granda bankedo kaj liveras la arbon, el kiu vi ĉiuj satiĝos! Vidu, kiel bela ĝi estas, kiel ŝarĝita ĝi estas per floroj kaj fruktoj! Iru, iru, rikoltu, prenu ĉiujn fruktojn el tiu bela arbo, kies nomo estas bonfaremo. Al la punktoj, kie elkreskos la branĉoj, kiujn vi deŝiros, mi alligos ĉiujn bonajn agojn, kiujn vi

faros kaj mi portos tiun arbon al Dio, por ke Li ĝin reprovizu, ĉar la bonfaremo estas neelĉerpebla. Sekvu min do, miaj amikoj, por ke mi alkalkulu vin al tiuj, kiuj rekrutiĝas sub mia standardo; nenion timu; mi gvidos vin sur la vojo al la savo, ĉar mi estas *Karito.* (*Cárita,* martirigita en Romo. Lyon, 1861).

14. Estas pluraj manieroj fari kariton, kiun multaj konfuzas kun almozo; tamen estas inter ili granda diferenco. La almozo, miaj amikoj, kelkfoje estas utila, ĉar ĝi helpas la malriĉulojn; sed preskaŭ ĉiam ĝi estas humiliga, ne nur por la faranto, sed ankaŭ por la ricevanto. Kontraŭe, la karito ligas la bonfaranton al la helpato, kaj cetere ĝi vualiĝas en tiom da manieroj! Oni povas esti karitema, eĉ por siaj parencoj kaj siaj amikoj, se unuj indulgas al aliaj, se ĉiuj pardonas la reciprokajn kulpetojn, se ni evitas ofendi la memamon de iu ajn; vi, spiritistoj, per via konduto kontraŭ la homoj, ne pensantaj same kiel vi; kondukante la malplej klarvidajn al la kredo, ne vundante ilin, ne atakante iliajn konvinkojn, sed tre dolĉe altirante ilin al viaj kunvenoj, kie ili povos aŭdi nin, kaj kie ni ja scios trovi en la koroj la breĉon, tra kiu ni penetros. Jen unu el la flankoj de la karito.

Aŭskultu nun, kio estas karito por la malriĉuloj, tiuj nenion ricevintaj sur la tero, sed rekompencitaj de Dio, se ili sen murmuro akceptas siajn dolorojn; tio de vi dependas. Mi komprenigos mian penson per ekzenplo.

Plurfoje en la semajno mi vidas kunvenojn de diversaĝaj sinjorinoj; al ni, vi tion scias, ili ĉiuj estas fratinoj. Kion ili faras? Ili laboras rapide, rapide, kaj la fingrojn lerte movas; vidu ankaŭ, kiel gajaj estas la vizaĝoj kaj kiel harmonie batas la koroj! sed kia estas ilia celo? ili vidas alproksimiĝi la vintron, kiu estos kruela por la malriĉaj loĝejoj; la formikoj ne povis amasigi en la lasta somero la grajnon necesan al sia provizo, la

plimulto el la vestaĵoj estas garantie donita; la malriĉaj patrinoj maltrankviliĝas kaj ploras, pensante pri siaj infanetoj, kiuj dum la venonta vintro suferos malvarmon kaj malsaton! Sed paciencu, kompatindaj virinoj! Pri tio Dio inspiris aliajn pli favoritajn de la sorto, ol vi; ili kune laboras kaj preparas malgrandajn vestojn; poste, en unu el tiuj tagoj, kiam la neĝo estos kovrinta la teron kaj vi murmuros: "Dio ne estas justa" — via ordinara parolo, kiam vi suferas —, vi vidos veni al vi unu el la infanoj de tiuj bonkoraj laborantinoj, kiuj, nur por vi penante, fariĝis la laboristinoj por la malriĉuloj; kaj tiam via murmurado ŝanĝiĝos en benon, ĉar en la koro de la malfeliĉuloj amo sekvas tuj post malamon.

Ĉar tiuj laborantinoj berzonas kuraĝigon, mi vidas komunikiĝojn de bonaj Spiritoj, venantajn al ili el ĉiuj lokoj; la viroj, apartenantaj al tiu societo, alportas ankaŭ sian kunlaboradon, farante unu el tiuj laŭtlegadoj, kiuj tiel multe plaĉas; kaj ni, por rekompenci la fervoron de ĉiuj kaj de ĉiu aparte, ni promesas al tiuj diligentaj laboristinoj bonan klientaron, kiu pagos kontante per benoj, la sola mono, havanta kurson en la ĉielo; krom tio, mi asertas al ili, ne timante riskon, ke tia klientaro neniam trompos ilin. (*Cárita.* Lyon, 1861).

15. Miaj karaj amikoj, ĉiutage mi aŭdas inter vi: "Mi estas malriĉa, mi ne povas fari kariton", kaj ĉiutage mi vidas, ke mankas ĉe vi indulgemo por viaj similuloj; vi nenion pardonas al ili, kaj vi arbitre pretendas fariĝi juĝistoj, ofte severaj, ne demandante, ĉu vi estus kontentaj, se oni same kondutus kontraŭ vi. Ĉu ankaŭ indulgemo ne estas karito? Se vi ne povas fari alian kariton, ol la indulgenon, faru almenaŭ ĝin, sed faru ĝin granskale. Pri la materia karito, mi volas rakonti al vi historion el la transtombo.

Du homoj ĵus mortis. Dio iam diris: Dum tiuj du homoj vivados, oni metos en du apartaj sakojn ĉiun

el iliaj bonaj agoj, kaj ĉe ilia morto oni pesos tiujn sakojn. Kiam la du homoj venis al sia lasta horo, Dio ordonis, ke oni portu al Li la du sakojn. Unu estis dika, granda, plenŝtopita, kaj en ĝi sonoris la metalo, pleniganta ĝin; la dua estis treege malgranda, kaj tiel mizera, ke tra ĝi oni vidis la malmultajn cendojn, kiujn ĝi enhavis; kaj ĉiu el la homoj rekonis sian sakon: jen la mia, diris la unua; mi rekonas ĝin; mi estis riĉa kaj multe disdonis. Jen la mia, diris la alia; mi ĉiam estis malriĉa, ve! Mi havis preskaŭ nenion por doni. Sed, ho surprizo! Kiam oni metis la du sakojn sur la pesilon, la pli granda montriĝis malpeza, kaj la malgranda pezis tiel multe, ke la telero, sur kiu ĝi staris, tute malaltiĝis kontraŭ la alia. Tiam Dio diris al la riĉulo: Ci multe donis, estas vere, sed ci donis por sinmontrado kaj por vidi cian nomon en ĉiuj temploj de la fiero, kaj cetere, por doni, nenian mankon ci suferis; iru maldekstren kaj estu kontenta, ke ciaj almozoj ricevas iom da valoro. Poste, Li diris al la malriĉulo: Ci tre malmulte donis, mia amiko; sed ĉiu cendo, kiu estas sur tiu ĉi pesilo, reprezentas por ci seniĝon; ci ne donis almozon, sed faris kariton, kaj kio estas la plej bona, ci faris kariton nature, ne pensante, ĉu oni alkalkulos ĝin al viaj meritoj; ci estis indulgema; ci ne juĝis vian similulon, kontraŭe, ci senkulpigis liajn agojn: pasu dekstren kaj iru ricevi cian rekompencon. (*Protektanta Spirito.* Lyon. 1861).

16. Ĉu virino riĉa, feliĉa, kiu ne bezonas uzi sian tempon en mastrumado, ne povas dediĉi kelkajn horojn al la laboroj utilaj por siaj similuloj? Per la superfluo de siaj plezuroj, ŝi aĉetu ion por kovri la malfeliĉulojn tremantajn de frosto; ŝi faru, per siaj delikataj manoj, maldelikatajn, sed varmajn vestojn; ŝi helpu patrinon kovri sian naskotan infanon; se ŝia infano havos malplie kelkajn puntojn, la infano de la malriĉulino havos pli

da varmo. Labori por malriĉulo estas labori en la vinberejo de la Sinjoro.

Kaj ci, malriĉa laboristino, kiu ne havas superfluaĵojn, sed kiu volas, plena de amo al viaj fratoj, doni ankaŭ ion el la malmulto, kiun ci posedas, oferu kelkajn horojn de cia tago, de cia tempo, cia sola trezoro; faru tiujn elegantajn manlaboraĵojn, kiuj tentas la feliĉulojn; vendu la laboron de cia vespero kaj ci ankaŭ povos helpi ciajn fratojn; ci eble havos malplie kelkajn rubandojn, sed ci donos ŝuojn al iu nudpieda.

Kaj vi, virinoj dediĉitaj al Dio, laboru ankaŭ por Lia verko; sed viaj delikataj kaj altvaloraj laboraĵoj estu farataj ne nur por ornami viajn kapelojn, por altiri atenton al via lerteco kaj via pacienco; laboru, miaj filinoj, kaj la prezo de viaj ellaboraĵoj estu oferita al helpo je viaj fratoj per Dio; la malriĉuloj estas Liaj filoj tre amataj; labori por ili estas glori Lin. Estu por ili la providenco, kiu diras: "Al la birdoj de la ĉielo Dio donas nutraĵon". Oro kaj arĝento, teksataj per viaj fingroj, transformiĝu en vestojn kaj nutraĵojn, mankantajn al kelkaj homoj. Faru tion, kaj via laboro estos benita.

Kaj vi ĉiuj, kiuj povas produkti, donu; donu vian genion, donu viajn inspirojn, donu vian koron, kiun Dio benos. Poetoj, beletristoj, kiuj estas legataj nur de la mondumaj personoj, kontentigu ilian libertempon, sed la monon, kiun havigos al vi kelkaj el viaj verkoj, destinu al la helpo je la mizeruloj; pentristoj skulptistoj, artistoj ĉiaspecaj, via inteligento venu ankaŭ helpe de viaj fratoj; pro tio vi ne havos malpli da gloro, kaj estos kelkaj suferoj malplie.

Vi ĉiuj povas doni; al kiu ajn klaso vi apartenas, vi havas ion, kion vi povas dividi; kion ajn Dio donis al vi, de tio vi ŝuldas parton al iu, al kiu mankas la necesaĵoj de la vivo, ĉar en lia loko vi estus feliĉaj, se

alia dividus kun vi. Viaj trezoroj sur la tero iom malpliiĝos, sed viaj trezoroj en la ĉielo kreskos; en la ĉielo vi rikoltos la centoblon de via semado en tiu ĉi mondo. (*Johano*. Bordeaux, 1861).

## La kompato

17. La kompato estas la virto, kiu plej alproksimigas vin al la anĝeloj; ĝi estas la fratino de karito, kiu kondukas vin al Dio. Ha! lasu, ke vian koron tuŝu la malfeliĉoj, la suferoj de viaj similuloj; viaj larmoj estas balzamo, kiun vi verŝas sur iliajn vundojn, kaj kiam per dolĉa simpatio vi sukcesas redoni al ili esperon kaj rezignacion, kian ĉarmon vi ĝuas! Tiu ĉarmo vere havas ian amarecon, ĉar ĝi naskiĝas apud la malfeliĉo; sed kvankam ĝi ne havas la akrecon de la mondaj ĝuoj, ĝi ne alportas la korŝirajn elreviĝojn de la malpleneco, kiujn tiuj aliaj lasas post si; penetras ĝin ia dolĉeco, kiu ĝojigas la animon. La kompato, la tre funde sentata kompato, estas amo; amo estas sindonemo; sindonemo estas la forgeso pri si mem; kaj tiu forgeso, tiu abnegacio favore al la malfeliĉuloj, estas la virto en sia plej alta grado, la virto, kiun praktikadis dum sia tuta vivo la dia Mesio, kaj kiun li instruadis en sia doktrino, tiel sankta kaj sublima. Kiam tiu doktrino reakiros sian primitivan purecon, kiam ĝi estos akceptita de ĉiuj popoloj, ĝi faros feliĉa la teron, igante tie fine reĝi kondordon, pacon, amon.

La sento plej taŭga por vin progresigi, fleksante vian egoismon kaj vian fieron, preparante vian animon al humileco, al bonfarado kaj al amo al via proksimulo, estas la kompato; tiu kompato, kiu emociigas vin ĝis la fundo de la koro antaŭ la suferoj de viaj fratoj, kiu instigas vin etendi al ili helpan manon kaj fluigas al vi larmojn de simpatio. Neniam sufoku do en viaj koroj tiun ĉielan emocion, ne kondutu kiel la ŝtonkoraj egoistoj, kiuj

foriras de l' afliktitoj, ĉar la vido de ties mizero interrompus dum momento ilian ĝojan ekzistadon; timu resti indiferentaj, kiam vi povas esti utilaj. La trankvileco, aĉetita koste de kulpa indiferenteco, estas la trankvileco de la Maro Morta, kiu kaŝas en la fundo de siaj akvoj haladzan ŝlimon kaj putrecon.

Tamen la kompato neniel kaŭzas la konfuzon kaj la enuon, kiuj teruras egoiston! Sendube la animo sentas, ĉe la kontakto de aliula malfeliĉo kaj reenirante en sin mem, naturan konsterniĝon profundan, kiu vibrigas la tutan organismon kaj dolore ĉi tiun skuas. Sed granda estas la kompenso, kiam vi sukcesas doni kuraĝon kaj esperon al malfeliĉa frato, kiun tuŝas la premo de amika mano, kaj kies rigardo, malseka samtempe de emocio kaj de danko, sin turnas dolĉe al vi, antaŭ ol fiksiĝi sur la ĉielon por danki, ke ĝi sendis iun kun konsolo kaj protekto. La kompato estas la melankolia, sed ĉiela pioniro de la karito, de tiu ĉi unua el la virtoj, kies fratino ĝi estas kaj kies bonfarojn ĝi preparas kaj nobligas. (*Miĥael.* Bordeaux, 1862.)

## La orfoj

18. Miaj fratoj, amu la orfojn; se vi scius, kiel malgaje estas resti sola kaj forgesita, precipe en la infaneco! Dio permesas, ke ekzistu orfoj, por ke ni fariĝu iliaj gepatroj. Kia dia karito estas helpi malgrandan kreiton forlasitan, eviti, ke li suferu malsaton kaj malvarmon, direkti lian animon, por ke ĝi ne dekliniĝu en malvirton! Kiu etendas la manon al forlasita infano, tiu plaĉas al Dio, ĉar tiu komprenas kaj praktikas Lian leĝon. Pensu ankaŭ, ke ofte la infano, kiun vi helpas, estis al vi kara en alia enkarniĝo; se vi povus memori tiun tempon, vi jam ne farus kariton, sed plenumus devon. Do, miaj amikoj, ĉiu suferanta estulo estas via frato kaj rajtas vian kariton, ne tiun kariton, kiu vundas

la koron, ne tiun almozon, kiu bruligas la manon, sur kiun ĝi falas, ĉar viaj donetoj ofte estas tre amaraj! Kiel ofte ĉi tiuj estus rifuzitaj, se en la mansardo la malsaneco kaj nudeco ne atendus ilin! Donu afable, aldonu al la bonfaro la plej valoran el ĉiuj favoroj: bonan parolon, kareson, amikan rideton; detenu vin de tiu patrona tono, kiu turnas la pikilon en la sanganta koro, kaj pripensu, ke, farante la bonon, vi laboras por vi kaj viaj fratoj. (*Familiara Spirito,* Parizo, 1860.)

*19. Kion ni pensu pri la personoj, kiuj, ricevinte maldankon por siaj komplezoj, ne plu faras bonon pro timo renkonti aliajn sendankulojn?*

Tiuj personoj havas pli da egoismo ol da karito; ĉar, fari la bonon, nur por ricevi montrojn de danko, ne estas fari bonon abnegacie, kaj bono sen kaŝita intereso estas la sola plaĉa al Dio. Ili havas egoismon kaj ankaŭ fieron, ĉar ili plezuras ĉe la humileco de la ŝuldanto, kiu venas meti sian dankon al iliaj piedoj. Kiu serĉas sur la tero rekompencon por la bono, kiun li faras, tiu ne ricevos rekompencon en la ĉielo; sed Dio dece estimos tiun, kiu ĝin ne sopiras sur la tero.

Vi devas ĉiam helpi la malfortulojn, kvankam vi antaŭscias, ke la personoj, al kiuj vi faras bonon, vin ne dankos. Sciu, ke, se la persono, al kiu vi faras ian servon, ĉi tiun forgesas, Dio pli alkalkulos ĝin al viaj meritoj, ol se vin jam rekompencus la danko de via favorito. *Dio permesas, ke vi kelkfoje estu pagitaj per maldanko, por provi vian persiston en la farado de la bono.*

Kiu el vi, cetere, scias, ĉu tiu bonfaro, momente forgesita, iam ne donos bonajn fruktojn? Kontraŭe, estu certaj, ke ĝi estas semo, kiu ĝermos kun la kreskado de la tempo. Bedaŭrinde, vi nur vidas la nunecon; vi laboras por vi kaj ne celante la aliajn. La bonfaroj fine

moligas la plej hardiĝintajn korojn; ili povas esti forgesitaj sur la tero, sed, kiam la Spirito demetos sian karnan envolvaĵon, li memoros, kaj tiu memoro estos lia puno; tiam li bedaŭros sian nedankemon; li volos ripari sian kulpon, pagi sian ŝuldon en alia ekzistado, ofte eĉ akceptante vinvon de sindonado al sia bonfarinto. Tiel, sen ia konscio pri tio, vi estos kunlaborintaj por lia morala progreso, kaj poste vi rekonos la tutan verecon de jena maksimo: Bonfaro neniam estas perdita. Sed vi estos laborintaj ankaŭ por vi, ĉar vi havos la meriton, esti farintaj bonon abnegacie, ne lasinte, ke elreviĝoj senkuraĝigu vin.

Ha! miaj amikoj, se vi konus ĉiujn ligilojn, kiuj kunigas vian nunan vivon kun viaj antaŭaj ekzistadoj; se vi povus ampleksi la multegon da rilatoj, kiuj alproksimigas la estulojn unujn al aliaj, por la reciproka progreso, vi multe pli admirus la saĝecon kaj la bonecon de la Kreanto, kiu permesas al vi revivi, por alproksimiĝi al Li. (*Protektanta Gvidanto.* Sens, 1862.)

*20. Ĉu la bonfarado estas vere komprenata, se praktikata ekskluzive inter personoj de sama opinio, de sama kredo, aŭ de sama partio?*

Ne, ĝuste la spirito de sekto kaj de partio devas esti ekstermita, ĉar ĉiuj homoj estas fratoj. La vera kristano vidas nur fratojn en siaj similuloj, kaj antaŭ ol helpi iun en necesbezono, li ne demandas ties kredon nek opinion pri io ajn. Ĉu la kristano sekvus la instruon de Jesuo Kristo, kiu konsilis, ke oni amu eĉ siajn malamikojn, se li forpelus malfeliĉulon, ĉar tiu ĉi havas alian kredon? Li helpu do, ne demandante ties konsciencon, ĉar, se tiu estas malamiko de la religio, tia estas la rimedo igi lin ami ĝin; forpelante lin, oni igos lin malami la religion. (*Sankta Ludoviko.* Parizo, 1860.)

## ĈAPITRO XIV

# RESPEKTU VIAN PATRON KAJ VIAN PATRINON

Fila amo. Kiu estas mia patrino kaj kiuj estas miaj fratoj? Korpa parenceco kaj spirita parenceco. **Instruoj de la Spiritoj**: Maldankemo de l' infanoj kaj ligiloj de familio.

1. *Vi scias la ordonojn: Ne mortigu; Ne adultu; Ne ŝtelu; Ne parolu malveran ateston; Ne rabu;* Respektu vian patron kaj vian patrinon. (Marko, 10:19)

2. *Respektu vian patron kaj vian patrinon, por ke longe daŭru via vivo sur la tero, kiun la eternulo, via Dio, donas al vi*. (Eliro, 20:12.)

### Fila amo

3. La ordono "Respektu vian patron kaj vian patrinon" estas sekvo de la ĝenerala leĝo de karito kaj amo al la proksimulo, ĉar ne povas ami sian proksimulon la homo, kiu ne amas sian patron kaj sian patrinon; sed la vorto *respektu* enhavas ankoraŭ unu devon kontraŭ ili, nome la devon de fila amo. Dio volis montri per tio, ke al amo estas necese aldoni respekton, indulgon, submetiĝon kaj komplezemon, kio kuntrenas la devon pli severe plenumi por la gepatroj ĉion, kion karito ordonas por la proksimulo. Kompreneble, tiu devo rilatas ankaŭ la personojn, kiuj anstataŭas patron kaj patrinon kaj kiuj havas

tiom pli da merito, kiom malpli deviga estas ilia sindonemo. Dio ĉiam severe punas ĉian malobeon al tiu ordono.

Honori siajn gepatrojn estas ne nur respekti ilin, sed ankaŭ ilin helpi en necesbezono; havigi al ili ripozon en maljuneco; ĉirkaŭigi ilin per zorgoj, kiel ili faris al ni en nia infaneco.

Precipe al la gepatroj sen monrimedoj montriĝas la vera fila amo. Ĉu sekvas tiun ordonon la filoj, kiuj opinias, ke ili faras grandan servon, donante al siaj gepatroj nur la nepre necesajn rimedojn, por ke ĉi tiuj ne mortu pro malsato, dum al si mem ili nenion rifuzas? forpelante ilin en la plej mizerajn loketojn de la domo, nur por ilin ne forlasi sur la strato, dum al si mem ili rezervas ĉion plej bonan kaj plej komfortan? Ne tute malbone estas, kiam ili tion faras ne malvolonte kaj ne devigas la gepatrojn pagi por la tempo, kiun tiuj ankoraŭ vivos, per la ŝarĝo de la mastrumado! Ĉu do la gepatroj maljunaj kaj lacaj devas esti servistoj de la gefiloj junaj kaj fortaj? Ĉu ilia patrino marĉandis sian lakton, kiam ili estis en la lulilo? Ĉu ŝi domaĝis siajn sendormajn noktojn, kiam ili estis malsanaj, siajn paŝojn por havigi al ili tion, kion ili bezonis? Ne, ne nur la nepre necesajn aĵojn la filoj ŝuldas al siaj gepatroj malriĉaj; ili ŝuldas ankaŭ, tiom kiom ili povas, la bagatelajn agrablaĵojn de la superfluo, komplezemon, delikatajn zorgojn, kiuj estas nur la procentoj de tio, kion ili ricevis, pago de sankta ŝuldo. Nur tia fila amo plaĉas al Dio.

Ve al tiu, kiu forgesas sian ŝuldon al tiuj, kiuj subtenis lin en lia malforteco, kiuj kun la materia vivo donis al li la moralan vivon, kiuj ofte trudis al si seniĝojn, por certigi al siaj filoj komfortecon; ve al la sendankulo, ĉar li estos punita per maldanko kaj forlaso, vundita je siaj plej karaj inklinoj, *kelkfoje jam en la nuna vivo*, sed certe en alia ekzistado, kiam li suferos tion, kion li suferigis al aliaj.

Kelkaj gepatroj, vere, ne rekonas siajn devojn kaj ne estas por siaj filoj, kio ili devus esti; sed nur Dion, ne la filojn, koncernas puni ilin; al la filoj ne decas riproĉi siajn gepatrojn, ĉar eble ili mem meritis, ke tiel estu. Se karito starigas kiel leĝon pagi bonon por malbono, esti indulgema por la malperfektaĵoj de aliaj, ne klaĉi kontraŭ sia proksimulo, forgesi kaj pardoni la maljustaĵojn, ami eĉ siajn malamikojn, kiom pli grandaj estas tiuj devoj de filoj al siaj gepatroj! La filoj devas do preni, kiel regulon por sia konduto rilate al la gepatroj, ĉiujn ordonojn de Jesuo koncerne la proksimulon, bone teni en la menso, ke ĉiu riproĉinda ago kontraŭ aliaj estas ankoraŭ pli riproĉinda kontraŭ la gepatroj, kaj tio, kio povas esti nur kulpo en la unua okazo, povas esti konsiderata krimo en la dua, ĉar tiam krom manko de karito estas ankaŭ maldankemo.

4. Dio diris: "Respektu vian patron kaj vian patrinon, por ke longe daŭru via vivo sur la tero, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi." Kial Li promesas do kiel rekompencon la vivon sur la tero kaj ne la ĉielan vivon? La klarigo troviĝas en jenaj vortoj: "kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi", kiuj, forigitaj en la moderna formo de la Dekalogo (*), malklarigas ties sencon. Por kompreni tiun parolon, ni devas rememori la situacion kaj la ideojn de la Hebreoj en la epoko, kiam ĝi estis dirita. Ili ankoraŭ nenion sciis pri l' estonta vivo, kaj ilia komprenpovo ne ampleksis trans la enkorpan vivon; ilin devis do pli materiale tuŝi tio, kion ili vidis, ol tio, kion ili ne vidis. Tial Dio parolas en maniero pli komprenebla por ili, kaj, kvazaŭ al infanoj, donas al ili perspektivon, kiu povus kontentigi ilin. Ili tiam estis ankoraŭ en la

(*) **Dekalogo** estas la dek ordonoj de la Leĝo de Dio, ricevita de Moseo.— **La Tradukinto**

dezerto. La "tero", kiun Dio *donos* al ili estis la Promesita Lando, celo de iliaj aspiroj: ili nenion alian deziris, kaj Dio diris al ili, ke ili tie longe vivos, tio estas, ke ili ĝin posedos dum longa tempo, se ili obeos Liajn ordonojn.

Sed ĉe l' alveno de Jesuo iliaj ideoj estis pli elvolviĝintaj; la momento estis alveninta, por doni al ili pli delikatan nutraĵon, kaj li inicas ilin pri la spirita vivo, dirante: "Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo; tie, ne sur la tero, vi ricevos la rekompencon de viaj bonaj agoj." Per tiuj vortoj, la materia Promesita Lando transformiĝas en ĉielan patrujon; tial, kiam li admonas ilin al la plenumo de l' ordono: "Respektu vian patron kaj vian patrinon", jam ne la teron li promesas al ili, sed la ĉielon. (Ĉapitroj II kaj III.)

## Kiu estas mia patrino kaj kiuj estas miaj fratoj?

5. *Kaj li venis en domon. Kaj denove la homamaso kunvenis tiel, ke ili ne povis eĉ manĝi panon. Kaj liaj amikoj, aŭdinte tion, eliris, por kapti lin, ĉar ili diris: Li frenezas. — Kaj jen alvenis lia patrino kaj liaj fratoj, kaj starante ekstere, ili sendis al li, vokante lin. Kaj homamaso sidis ĉirkaŭ li; kaj oni diris al li: Jen via patrino kaj viaj fratoj ekstere vin serĉas. Kaj li respondis al ili, dirante:* Kiuj estas mia patrino kaj miaj fratoj? *Kaj ĉirkaŭrigardante tiujn, kiuj ronde ĉirkaŭ li sidis, li diris: Jen mia patrino kaj miaj fratoj! Ĉar kiu ajn faros la volon de Dio, tiu estas mia frato kaj mia fratino kaj mia patrino*. (Marko, 3:19-21 kaj 31-35)

6. Iuj paroloj ŝajnas strangaj en la buŝo de Jesuo kaj kontraŭaj al lia boneco kaj al lia neŝanĝebla bonvolemo por ĉiuj. La nekredantoj ne preterlasis la okazon, por fari el tio armilon, asertante, ke li kontraŭdiras sin mem. Nerefutebla fakto estas, ke lia doktrino havas

kiel esencan bazon, kiel angulan ŝtonon, la leĝon de amo kaj karito. Li ne povis do detrui unuflanke tion, kion li konstruis sur la alia flanko. El tio estas necese tiri la rigore logikan konsekvencon, ke, se iuj el liaj maksimoj estas kontraŭaj al tiu principo, la vortoj, atribuataj al li, estas do misaŭditaj aŭ miskomprenitaj, aŭ ne estas eldiritaj de li.

7. Oni prave miras, vidante en tiu cirkonstanco, ke Jesuo montras tiom da indiferenteco por siaj parencoj kaj iamaniere forneas sian patrinon.

Rilate al liaj fratoj, oni scias, ke ili neniam havis simpation por li; Spiritoj malmulte progresintaj, ili neniom komprenis lian mision; lia konduto, en iliaj okuloj, estis stranga, kaj liaj instruoj neniel tuŝis ilin, ĉar el ili neniu sekvis lin kiel disĉiplo. Eĉ ŝajnas, ke liaj fratoj ĝis ia grado partoprenis la antaŭjuĝojn de liaj malamikoj; certe estas, cetere, ke ili akceptis lin pli kiel iun fremdulon, ol kiel fraton, kiam li prezentis sin ĉe la familio; kaj Sankta Johano pozitive diras (7:5) : *"Ĉar liaj fratoj mem ne kredis al li."*

Koncerne lian patrinon, neniu povus nei ŝian amon al la filo; sed oni devas konsenti, ke, laŭŝajne, ankaŭ ŝi ne havis ian precizan ideon pri lia misio, ĉar neniu iam vidis ŝin sekvi liajn instruojn, nek atesti pri li, kiel faris Johano, la Baptisto; la patrina amo estis ĉe ŝi la reganta sento. Opinii, ke Jesuo forneis sian patrinon, estus ne rekoni lian karakteron: tian penson ne povus nutri tiu, kiu diris: *Respektu vian patron kaj vian patrinon*. Oni serĉu do alian sencon por liaj paroloj, preskaŭ ĉiam vualitaj sub alegoria formo.

Jesuo neniun okazon preterlasis, por doni ian instruon; li kaptis do tiun okazon, kiam alvenis lia familio, por precizigi la diferencon inter la korpa parenceco kaj la spirita parenceco.

## Korpa parenceco kaj spirita parenceco

8. La ligiloj de la sango ne starigas nepre la ligilojn inter la Spiritoj. La korpo devenas de la korpo, sed la Spirito ne devenas de la Spirito, ĉar la Spirito jam ekzistis, antaŭ ol la korpo fariĝis; la patro ne kreas la Spiriton de sia infano, sed nur liveras al li la korpan envolvaĵon; tamen li devas helpi ties intelektan kaj moralan kreskadon, por igi sian filon progresi.

La Spiritoj, kiuj enkarniĝas en unu saman familion, precipe ĉe proksimaj parencoj, plej ofte estas sin reciproke simpatiantaj Spiritoj, kunigitaj per antaŭaj rilatoj, kiuj manifestiĝas per inklino inter tiuj Spiritoj dum la surtera vivo; sed povas okazi, ke tiuj Spiritoj estas tute fremdaj unuj al aliaj, apartigitaj de antipatioj ankaŭ antaŭaj, kiuj montriĝas per ilia surtera antagonismo, kiu utilos al ili kiel provo. La veraj ligiloj de familio ne estas do tiuj de la sango, sed tiuj de la simpatio kaj de la komuneco de la pensoj, kiuj unuigas la Spiritojn *antaŭ, dum* kaj *post* ilia enkorpa vivo. El tio sekvas, ke du estuloj el malsamaj gepatroj povas esti fratoj per la sango; ili povas altiri unu al alia, serĉi unu alian, harmonie kunvivadi, dum du fratoj per la sango povas sin reciproke forpuŝi, kiel ni ĉiutage vidas; jen morala problemo, kiun nur Spiritismo povas solvi per la plureco de l' enkarniĝoj. (Ĉ. IV, § 13 .)

Ekzistas do du specoj de familioj: *la familioj laŭ la spiritaj ligiloj kaj la familioj laŭ la korpaj ligiloj*; la unuaj, daŭraj, fortikiĝas per la puriĝo kaj eterniĝas en la mondo de la Spiritoj, tra puraj migradoj de l' animo; la duaj, facilrompaj kiel la materio, estingiĝas kun la pasado de la tempo kaj ofte morale disiĝas jam dum la nuna vivo. Tion Jesuo volis komprenigi, dirante al siaj disĉiploj: Jen mia patrino kaj miaj fratoj, tio

estas, mia familio laŭ la ligiloj de la Spirito, ĉar, kiu ajn faras la volon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo, tiu estas mia frato, mia fratino kaj mia patrino.

La malamikeco de liaj fratoj estas tre klare esprimita en la raporto de Sankta Marko, ĉar, li diras, ili intencis, kapti lin, sub preteksto, ke li freneziĝis. Ĉe l' anonco pri ilia alveno, konante iliajn sentojn por li, Jesuo memkompreneble diris, parolante pri siaj disĉiploj, el spirita vidpunkto: "Jen miaj veraj fratoj"; ĉar lia patrino sin trovis kun liaj fratoj, li ĝeneraligis sian instruon; tio tamen neniel neprigas, ke li intencis diri, ke lia patrino laŭ la korpo estas por li nenio kiel Spirito, kaj ke li havas por ŝi nur indiferentecon; lia konduto, en aliaj cirkonstancoj, sufiĉe pruvis la kontraŭon.

## INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

### Maldankemo de l' infanoj kaj ligiloj de familio

9. La maldankemo estas unu el la plej naturaj fruktoj de l' egoismo; ĝi ĉiam indignigas la honestajn korojn; sed la maldankemo de l' infanoj kontraŭ siaj gepatroj havas pli abomenindan karakteron; pli speciale el tiu vidpunkto ni volas rigardi ĝin, por analizi ĝiajn kaŭzojn kaj efikojn. Tie ĉi, kiel ĉie, Spiritismo venas ĵeti lumon sur unu el la problemoj de la homa koro.

Forlasinte la teron, la Spirito kunportas la pasiojn aŭ la virtojn esence proprajn al lia naturo, kaj en la spaco li perfektiĝas plu aŭ restas senprogresa, ĝis li volos vidi la lumon. Iuj foriras do, kunportante sovaĝajn malamojn kaj nesatigitajn dezirojn je venĝo; sed al iuj, pli progresintajn ol aliaj, estas permesite duonvidi ian angulon de la vero; ili tiam rekonas la pereigajn efikojn de siaj pasioj kaj prenas bonajn decidojn. Ili komprenas, ke por veni al Dio ekzistas unu sola signal-

vorto: *karito*; nu, ne ekzistas karito sem forgeso je insultoj kaj ofendoj; ne ekzistas karito kun malamo en la koro kaj sen pardono.

Tiam, per grandega peno, ili rigardas tiujn, kiujn ili malamis sur la tero; sed ĉe tiu vido ilia malamikeco revekiĝas; ili ribelas antaŭ la penso pardoni, ankoraŭ pli ĉe la penso rezigni pri venĝo, kaj precipe ili ribelas ĉe la ideo ami tiujn, kiuj eble detruis ilian riĉecon, ilian honoron, ilian familion. Tamen la koro de tiuj malfeliĉuloj estas skuita; ili estas konsternitaj, ili flirtas kvazaŭ flago en la vento, skuataj de kontraŭaj sentoj; se la bona decido venkas, ili preĝas al Dio, petas la bonajn Spiritojn doni al ili forton en la plej danĝera momento de la provo.

Fine, post kelkaj jaroj da meditado kaj preĝoj, la Spirito profitas korpon, kiu estas preparata ĉe la familio de iu, kiun li abomenis, kaj petas de la Spiritoj, komisi ataj por transsendi superajn ordonojn, permeson plenumi sur la tero la destinon de tiu korpo ĵus formita. Kia estos lia konduto en tiu familio? Tio dependos de la pli aŭ malpli granda persistado de liaj bonaj decidoj. La senĉesa kontakto kun la estuloj, kiujn li malamis, estas terura provo, sub kiu li kelkfoje falas, se lia volo ne estas sufiĉe forta. Laŭ tio do, ĉu la bona aŭ malbona decido venkos lin, li estos amiko aŭ malamiko de tiuj, en kies medio li estis vokita vivadi. Tiel estas klarigataj tiuj instinktaj malinklinoj, kiujn oni rimarkas ĉe iuj infanoj kaj kiujn nenia antaŭa ago ŝajnas pravigi. Efektive, en tiu ekzistado nenio povis krei tian antipation; por ĝin kompreni, oni devas turni sian rigardon al la pasinteco.

Ho spiritistoj ! komprenu hodiaŭ la grandan rolon de la homaro; komprenu, ke, kiam vi produktas korpon, venas el la spaco animo por progresi kaj enkarniĝas en ĝin; sciu viajn devojn kaj uzu vian tutan amon, por alproksimigi tiun animon al Dio; tia estas la misio, kon-

fidita al vi, kaj kies rekompencon vi ricevos, se vi ĝin fidele plenumos. Viaj zorgoj, la edukado, kiun vi donos al ĝi, helpos ĝian perfektiĝon kaj ĝian estontan feliĉon. Pripensu, ke ĉiun patron kaj ĉiun patrinon Dio demandos: Kion vi faris el la infano, konfidita al via gardo? Se la infano restis senprogresa pro via kulpo, via puno estos vidi ĝin inter la suferantaj Spiritoj, ĉar nur de vi dependis ĝia feliĉigo. Tiam vi mem, turmentataj de konsciencriproĉoj, petos ripari vian kulpon; vi petos por vi mem kaj por ĝi novan enkarniĝon, dum kiu vi cirkaŭigos ĝin per pli seriozaj zorgoj, kaj ĝi, plena de danko, reciprokos vian sindonecon per sia amo.

Ne elpelu do la infanon, kiu, jam de tre frua aĝo, ankoraŭ en la lulilo, forpuŝas sian patrinon, nek tiun, kiu al vi pagas per maldanko; ne hazardo ĝin faris tia kaj ĝin donis al vi. Tie montriĝas malklara intuicio pri la pasinteco, el kiu vi povas konkludi, ke unu aŭ la alia jam multe malamis aŭ estis multe ofendita; ke unu aŭ la alia venis, por pardoni kaj kulpelaĉeti. Patrinoj ! ĉirkaŭprenu do la infanon, kiu faras al vi ĉagrenojn, kaj diru al vi mem: Unu el ni estas kulpa. Meritu la diajn ĝuojn, kiujn Dio alligas al la patrineco, instruante al tiu infano, ke ĝi estas sur la tero por perfektiĝi, por ami kaj beni. Sed, ve! multaj inter vi, anstataŭ forviŝi per edukado la malbonajn denaskajn principojn el antaŭaj ekzistadoj, nutras, plifortigas tiujn samajn principojn per kulpa malforteco aŭ senzorgeco, kaj, poste, via koro, vundita de la nedankemo de viaj infanoj, estos por vi, jam dum tiu ĉi vivo, la komenco de via puno.

La tasko ne estas tiel malfacila, kiel vi povus ĝin opinii; ĝi neniel postulas la mondan scion; ĉu klerulo, ĉu malklerulo povas plenumi ĝin, kaj Spiritismo faciligas tiun plenumon, konigante la kaŭzon de la malperfektaĵoj de la homa koro.

Jam em tre frua aĝo la infano manifestas la bonajn aŭ malbonajn instinktojn, kiujn ĝi kunportis el sia antaŭa ekzistado; tiujn instinktojn la gepatroj devas diligente studadi; ĉiuj malbonaĵoj originas el egoismo kaj fiero; observu do la plej malgrandajn signojn, kiuj montras la ĝermon de tiuj malvirtoj, kaj fervore penu ataki ilin, ne atendante, ĝis ili profunde enradikiĝos; faru kiel la bona ĝardenisto, kiu elsarkas la malbonajn burĝonojn, laŭmezure kiel li ekvidas ilin ekaperi sur la arbo. Se vi lasas egoismon kaj fieron elvolviĝi ne miru, ke poste vi ricevos maldankon kiel pagon. Kiam gepatroj faris ĉion, kion ili devis, por la morala progreso de siaj infanoj, se ili ne sukcesas, ili havas nenian riproĉon kontraŭ si mem, kaj ilia konscienco povas esti trankvila; sed pro la tre natura bedaŭro, kiun ili sentas pro la malsukceso de siaj penoj, Dio rezervas al ili grandan, tre grandan konsolon, ĉe la *certeco*, ke tio estas nur malfruiĝo, ke estos donite al ili kompletigi en alia ekzistado la komencitan verkon, kaj ke iam la maldanka infano rekompencos ilin per sia amo. (Ĉap. XIII, § 19.)

Dio ne donas provojn super la fortoj de tiu, kiu ilin petas; Li permesas nur la provojn, kiujn oni povas plenumi. Se oni ne sukesas, ne la ebleco mankis, sed la volo, ĉar kiom da homoj, anstataŭ rezisti al la pasioj, plezuras ĉe ili; al tiuj estas destinitaj plorado kaj grincado de dentoj en venontaj ekzistadoj; sed admiru la bonecon de Dio, kiu neniam fermas la pordon al la pento. Venos tago, kiam la kulpulo estos laca de suferado, kiam lia fiero estos fine subigita; tiam Dio malfermas Siajn patrajn brakojn al la erarinta filo, kiu ĵetas sin al Liaj piedoj. *La akraj provoj*, komprenu min bone, *estas preskaŭ ĉiam signo de fino de suferoj kaj de perfektiĝo de la Spirito, kiam ili estas akceptataj pro amo al Dio*. Tiu estas gravega momento, kaj precipe tiam estas nepre necese ne fiaski pro murmurado, se oni ne volas perdi la frukton kaj devi rekomenci. Anstataŭ plendi, danku

Dion pro l` okazo venki, kiun Li havigas al vi, por ke Li donu al vi la premion de via sukceso. Tiam, kiam, elirinte el la bolegado de la tera mondo, vi eniros en la mondon de la Spiritoj, vi estos aklamata kiel soldato, elirinta kun laŭroj el la bataltumulto.

El ĉiuj provoj la plej doloraj estas tiuj, kiuj atingas la koron; kiu kuraĝe eltenas la mizeron kaj la mankon de vivnecesaĵoj, tiu eble falas sub la pezo de la hejmaj ĉagrenoj, frapita de la maldanko de la siaj. Ho! tio estas korŝira turmento! Sed en tiuj cirkonstancoj, kio povas pli bone restarigi la moralan kuraĝon, ol la konado de la kaŭzoj de la malbono kaj la certeco, ke se ekzistas longedaŭraj animdoloroj, malesperoj ne estas eternaj, ĉar Dio ne povas voli, ke Lia kreito suferu ĉiam?

Kio pli konsola, pli kuraĝiga, ol la penso, ke dependas de la homo mem, de liaj propraj klopodoj, mallongigi sian suferadon, detruante en si la kaŭzon de la malbono? Sed por tio li devas ne alkroĉi sian rigardon al la tero, nek vidi unu solan ekzistadon: li altiĝu kaj ŝvebu en la senlima kampo de la pasinteco kaj de l' estonteco. Tiam la granda justeco de Dio elmontriĝas al vi, kaj vi pacience atendas, ĉar klariĝas tio, kio sur la tero ŝajnis al vi monstraĵoj; la vundojn, kiujn vi tie ricevas, vi jam konsideros kiel simplajn gratvundetojn. En tiu ekrigardo sur la tuton, la ligiloj de familio aperas en sia vera lumo; jam ne la malfortaj ligiloj de la materio kunigas la familianojn, sed la daŭraj ligiloj de la Spirito, kiuj fariĝas eternaj kaj pli solidaj per puriĝado, anstataŭ rompiĝi per la reenkarniĝo.

Formas familiojn la Spiritoj, kiujn la simileco de gustoj, la identeco de morala progreso kaj aminklino instigas al kolektiĝo. Tiuj samaj Spiritoj, en siaj surteraj migradoj, ŝercas unuj aliajn por grupiĝi, kiel ili faras en la spaco; el tio ekestas la familioj unuigitaj kaj homogenaj; kaj se, en siaj pilgrimadoj, ili estas

kelkatempe apartigitaj, ili retrovas unuj aliajn poste, feliĉaj pro siaj novaj progresoj. Sed, ĉar ili ne devas labori nur por si, Dio permesas, ke malpli progresintaj Spiritoj enkarniĝu inter ili, por tie ricevi konsilojn kaj bonajn ekzemplojn en la intereso de sia propra progreso. Kelkfoje tiuj malpli altnivelaj Spiritoj metas malordon en la rondon de tiuj pli progresintaj, sed tio estas, por ĉi tiuj lastaj, provo kaj tasko. Ricevu do ilin kiel fratojn; kuru helpe al ili, kaj poste, en la mondo de la Spiritoj, la familio ekĝojos pro la savo de dronantoj, kiuj siavice povos savi aliajn. (*Sankta Aŭgusteno*. Parizo, 1862)

Ĉapitro XV

# EKSTER KARITO, NENIA SAVO

Kio estas necesa, por esti savita. Parabolo de la bona Samariano. La plej granda ordono. Bezono de karito laŭ Sankta Paŭlo. Ekster la Eklezio, nenia savo. Ekster la vero, nenia savo. **Instruoj de la Spiritoj**: Ekster karito, nenia savo.

## Kio estas necesa, por esti savita. Parabolo de la bona Samariano

1. *Sed kiam la Filo de homo venos en sia gloro, kaj ĉiuj anĝeloj kun li, tiam li sidos sur la trono de sia gloro; kaj antaŭ li kolektiĝos ĉiuj nacioj, kaj li apartigos ilin unu de alia, kiel paŝtisto apartigas la ŝafojn for de la kaproj; kaj li starigos la ŝafojn dekstre de li kaj la kaprojn maldekstre. — Tiam diros la Reĝo al tiuj, kiuj staras dekstre de li: Venu, vi benataj de mia Patro, heredu la regnon preparitan por vi de post la komenco de la mondo; ĉar mi malsatis, kaj vi donis al mi manĝi; mi soifis, kaj vi donis al mi trinki; mi estis fremda, kaj vi gastigis min; nuda, kaj vi vestis min; mi malsanis, kaj vi vizitis min; mi estis en malliberejo, kaj vi venis al mi. — Tiam respondos al li la justuloj, dirante: Sinjoro, kiam ni vin vidis malsata, kaj vin satigis, aŭ soifanta, kaj trinkigis vin? Kaj kiam ni vidis vin fremda kaj gastigis vin? aŭ nuda, kaj vin vestis? Kaj kiam ni vidis vin malsana aŭ en malliberejo, kaj venis al vi? Kaj la Reĝo respondos kaj diros al ili: Vere mi diras al vi: Kiom vi faris al unu el ĉi tiuj miaj fratoj la plej malgrandaj, tiom vi faris al mi. — Tiam li diros al tiuj, kiuj*

*staras maldekstre: For de mi, vi malbenitaj, en la eternan fajron, kiu estas preparita por la diablo kaj liaj anĝeloj; ĉar mi malsatis, kaj vi ne donis al mi manĝi; mi soifis, kaj vi ne donis al mi trinki; mi estis fremda, kaj vi ne gastigis min; nuda, kaj vi ne vestis min; malsana kaj en malliberejo kaj vi ne vizitis min. Tiam ili ankaŭ respondos, dirante: Sinjoro, kiam ni vidis vin malsata, aŭ soifanta, aŭ fremda, aŭ nuda, aŭ malsana, aŭ en malliberejo, kaj ne servis al vi? - Tiam li respondos al ili, dirante: Vere mi diras al vi: Kiom vi ne faris al unu el ĉi tiuj la plej malgrandaj, tiom vi ne faris al mi. Kaj ĉi tiuj foriros en eternan punon, sed la justuloj en eternan vivon*. (Mateo, 25:31-46.)

2. *Kaj jen unu leĝisto stariĝis, kaj tentis lin, dirante: Majstro, kion mi faru por heredi eternan vivon? Kaj li diris al li: Kio estas skribita en la leĝo? kiel vi legas? Kaj li responde diris: Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta forto kaj per via tuta menso, kaj vian proksimulon kiel vin mem. - Kaj li diris al li: Vi prave respondis; tion faru, kaj vi vivos. Sed li, dezirante pravigi sin, diris al Jesuo: Kaj kiu estas mia proksimulo? - Jesuo respondis kaj diris: Unu homo malsupreniris de Jerusalem al Jeriĥo; kaj li falis en la manojn de rabistoj, kiuj lin senvestigis kaj batis, kaj foriris lasante lin duone senviva. Kaj laŭ okazo unu pastro malsupreniris la saman vojon; kaj lin vidinte, li preterpasis aliflanke. Kaj tiel same unu Levido, veninte al la loko kaj lin vidinte, preterpasis aliflanke. Sed unu Samariano, vojaĝante, alvenis tien, kie li estis, kaj lin ekvidinte, li kortuŝiĝis, kaj alproksimiĝis, kaj bandaĝis liajn vundojn, kaj surverŝis oleon kaj vinon; kaj li metis lin sur sian beston, kaj kondukis lin al gastejo, kaj zorgis pri li. Kaj la morgaŭan tagon li elprenis du denarojn kaj donis ilin al la gastejestro, kaj diris: Zorgu pri li, kaj kion pli vi elspezos, mi tion repagos al vi, kiam mi revenos. Kiu el tiuj tri, laŭ via opinio, sin montris proksimulo de tiu, kiu falis en la manojn de la rabistoj? Kaj li diris: Tiu, kiu faris al li kompaton. - Kaj Jesuo diris al li: Iru vi, kaj faru tion saman*. (Luko, 10:25-37.)

3. La tuta moralo de Jesuo resume konsistas en karito kaj en humileco, tio estas, en la du virtoj kontraŭaj al egoismo kaj fiero. En ĉiuj liaj instruoj li prezentas tiujn virtojn kiel la vojon al la eterna feliĉo: Feliĉaj, li diras, la malriĉaj en spirito, tio estas, la humilaj, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo; feliĉaj la kore puraj; feliĉaj la pacigantoj; feliĉaj la kompatemaj; amu vian proksimulon kiel vin mem; faru al aliaj tion, kion vi volus, ke oni faru al vi; amu viajn malamikojn; pardonu la ofendojn, se vi volas esti pardonataj; faru la bonon sen parado; juĝu vin mem, antaŭ ol juĝi aliajn. Humilecon kaj kariton li senĉese rekomendas kaj pri ili donas li mem ekzemplon; kontraŭ fiero kaj egoismo li senĉese batalas; sed li faras pli, ol rekomendi kariton, li prezentas ĝin klare kaj per precizaj vortoj, kiel nepran kondiĉon de l' estonta feliĉo.

En la bildo, kiun Jesuo pentris pri la lasta juĝo, kiel ĉe multaj aliaj aferoj, devas esti aparte konsiderata la figuro, la alegorio. Al homoj, kiaj tiuj, al kiuj li paroladis, ankoraŭ ne kapablaj kompreni la pure spiritajn demandojn, li devis prezenti figurojn materiajn, frapantajn kaj kapablajn impresi ilin. Por esti pli bone akceptata, li eĉ devis ne tro malproksimiĝi de la komunaj ideoj, laŭ la formo, rezervante ĉiam al la estonteco la veran interpreton de siaj paroloj kaj de la punktoj, pri kiuj li tiam ne povis doni precizajn klarigojn. Sed apud la akcesora parto de la figuro, troviĝas reganta ideo: la feliĉo, destinata al la justulo, kaj la malfeliĉo, atendanta la malbonulon.

En tiu superega juĝo, kiaj estas la konsideroj por la verdikto? sur kio sin apogas la akuzaĵo? Ĉu la juĝisto demandas, ĉu la juĝato plenumis tian aŭ alian formalaĵon, observis tiun aŭ tiun alian eksteran detalon? Tute ne; li informiĝas nur pri unu afero: la praktikado de la karito, kaj verdiktas jene: Vi, kiuj helpis viajn fratojn, iru

dekstren; vi, kiuj estis nehumanaj kontraŭ ili, iru maldekstren. Ĉu li demandas pri l' ortodokseco de la kredo? ĉu li distingas inter tiu, kiu kredas en unu maniero, kaj tiu, kiu kredas alimaniere? Ne; ĉar Jesuo lokas la Samarianon, rigardatan kiel herezulon, sed kiu havas amon al sia proksimulo, super la ortodoksulon, kiu kulpas pri nekaritemo. Jesuo do ne faras el la karito nur unu el la kondiĉoj por la savo, sed la solan kondiĉon; se aliaj kondiĉoj devus esti plenumitaj, li ilin mencius. Se li asignas al la karito la unuan lokon inter la virtoj, ĝi do implicite ampleksas ĉiujn aliajn: humilecon, mildecon, bonvolemon, indulgemon, justecon, ktp; kaj alia motivo kuŝas en tio, ke ĝi estas la absoluta malo de fiero kaj egoismo.

## La plej granda ordono

4. *Sed la Fariseoj, aŭdinte, ke li silentigis la Sadukeojn, kune kolektiĝis. Kaj unu el ili, leĝisto, demandis lin, provante lin: Majstro, kiu estas la granda ordono en la leĝo? — Kaj li diris al li: Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso. Ĉi tiu estas la granda kaj la unua ordono. Kaj dua estas simila al ĝi: Amu vian proksimulon kiel vi mem. De ĉi tiuj du ordonoj dependas la tuta leĝo kaj la profetoj.* (Mateo, 22:34-40.)

5. Karito kaj humileco, jen la sola vojo por la savo; egoismo kaj fiero, jen la vojo al la pereo. Tiu principo estas precize formulita per sekvantaj vortoj: "Amu Dion per via tuta animo kaj vian proksimulon kiel vi mem; *de ĉi tiuj du ordonoj dependas la tuta leĝo kaj la profetoj.*" Kaj, por ke ne estu dusenca interpreto de l' amo al Dio kaj al la proksimulo, li aldonis: "Kaj dua estas simila al ĝi: Amu vian proksimulon kiel vi mem", tio estas, oni ne povas vere ami Dion, ne amante sian proksimulon, nek ami sian proksimulon,

ne amante Dion; ĉio do, kion oni faras kontraŭ la proksimulo, estas farata kontraŭ Dio. Ĉar oni ne povas ami Dion, ne praktikante kariton al sia proksimulo, tial ĉiuj devoj de la homo resume troviĝas en jena maksimo: *Ekster karito, nenia savo.*

**Bezono de karito laŭ Sankta Paŭlo**

6. *Se mi parolus la lingvojn de homoj kaj anĝeloj, sed ne havus amon* (*) *mi fariĝus sonanta kupro aŭ tintanta cimbalo. Kaj se mi posedus la profetpovon, kaj komprenus ĉiujn misterojn kaj ĉian scion; kaj se mi havus ĉian fidon, tiel ke mi povus formovi montojn, sed ne havus amon, mi estus nenio. Kaj se mi disdonus mian tutan havon por nutri la malsatulojn, kaj se mi lasus mian korpon por forbrulo, sed ne havus amon, per tio mi neniom profitus. Amo longe suferas, kaj bonfaras; amo ne envias; amo ne fanfaronas, ne ŝveligas sin, ne kondutas nedece, ne celas por si mem, ne koleriĝas, ne pripensas malbonon, ne ĝojas pri maljusteco, sed kunĝojas kun vereco; ĉion toleras, ĉion kredas, ĉion esperas, ĉion eltenas. - Restas do nun fido, espero, amo, tiuj tri: kaj la plej granda el ili estas amo.* (I. Korintanoj, 13:1-7 kaj 13.)

7. Sankta Paŭlo tiel bone komprenis ĉi tiun grandan veron, ke li diras: *"Se mi parolus la lingvojn de la homoj kaj anĝeloj; se mi posedus la profetpovon, kaj komprenus ĉiujn misterojn; se mi havus ĉian fidon, tiel ke mi povus formovi montojn, sed ne havus amon, mi estus nenio. Restas do nun fido, espero, amo, tiuj tri: kaj la plej granda el ili estas amo."* Li do, sen ia dubo, lokas la kariton super eĉ la fidon; efektive la kariton ĉiuj povas

---

(*) La primitiva senco de Karito estas Amo; tial la fidela tradukto de la Biblio en Esperanto ne uzas la latinaĵon "karito" (de **carus, caritas**), sed ĉiam nur la vorton "amo". En la fino de tiu ĉi volumo ni presas parafrazon de tiu instruo de Sankta Paŭlo, en versoj de F. V. Lorenz. — **La Tradukinto.**

praktiki: kleraj kaj malkleraj, riĉaj kaj malriĉaj, kaj ĝi dependas de nenia privata kredo.

Li faras pli ol tion: li difinas la veran kariton; li montras ĝin, ne nur en la bonfarado, sed ankaŭ en la kolekto de ĉiuj kvalitoj de la koro, en la boneco kaj la bonvolemo por la proksimulo.

**Ekster la Eklezio, nenia savo. Ekster la vero, nenia savo.**

8. Dum la maksimo: *Ekster karito, nenia savo*, apogita sur universala principo, malfermas al ĉiuj filoj de Dio la enirejon al la superega feliĉo, la dogmo: *Ekster la Eklezio, nenia savo*, estas bazita, ne sur la fundamenta fido al Dio kaj kredo je la senmorteco de l' animo, fido komuna al ĉiuj religioj, sed *sur speciala fido al privataj dogmoj*; ĉi tiu lasta estas ekskluziva kaj absoluta; anstataŭ kunigi la filojn de Dio, ĝi disigas ilin; anstataŭ instigi ilin al amo por siaj fratoj, ĝi subtenas kaj aprobas la koleron inter la sektanoj de la diversaj kultoj, kiuj rigardas unuj aliajn kiel kondamnitojn por la eterna tempo, eĉ se tiuj estus parencoj kaj amikoj en tiu ĉi mondo; ĝi ne rekonas la grandan leĝon de l' egaleco antaŭ la tombo kaj apartigas la homojn inter si eĉ en la kampo de ilia ripozo. La maksimo: *Ekster karito, nenia savo*, estas konfirmo de la principo de egaleco antaŭ Dio kaj de la libereco de konscienco; kun tiu maksimo kiel regulo, ĉiuj homoj estas fratoj, kaj kia ajn estas ilia maniero adori la Kreanton, ili etendas la manon unuj al aliaj kaj preĝas unuj por la aliaj. Kun la dogmo: *Ekster la Eklezio, nenia savo*, ili sin reciproke anatemas kaj persekutas, vivas kiel malamikoj; la patro ne preĝas por la filo, nek la filo por la patro, nek la amiko por la amiko, ĉar ili juĝas unuj aliajn senrimede kondamnitaj al la infero. Tiu dogmo estas do fundamente kontraŭa al la instruoj de la Kristo kaj al la evangelia leĝo.

9. *Ekster la vero, nenia savo* estus ekvivalenta al: *Ekster la Eklezio, nenia savo*, kaj tute same ekskluziva, ĉar ekzistas nenia sekto, kiu ne pretendas havi la privilegion de la vero. Kiu homo povus flati al si, ke li posedas la tutan veron, se la sfero de la konoj grandiĝas senĉese kaj la ideoj reĝustiĝas ĉiutage? La absoluta vero estas propraĵo nur de la Spiritoj de la plej alta ordo, kaj la surtera homaro ne povus pretendi al ĝi, ĉar ĉion scii ne estas permesite al la homaro; ĉi tiu povas aspiri nur al ia vero relativa kaj proporcia al la homa progresado. Se Dio estus farinta el la posedo de l' absoluta vero la nepran kondiĉon de l' estonta feliĉo, Li eldonus verdikton de ĝenerala kondamno, dum la karito, eĉ en sia plej ampleksa signifo, povas esti praktikata de ĉiuj. Spiritismo, konforme kun la Evangelio, kaj akceptante, ke ĉiu povas esti savata, kiel ajn lia kredo, kondiĉe, ke li plenumu la leĝon de Dio, neniel diras: *Ekster Spiritismo, nenia savo*; kaj tial, ke ĝi ne pretendas instrui ankoraŭ la tutan veron, ĝi ne diras ankaŭ: *Ekster la vero, nenia savo*, maksimo, kiu disigas, anstataŭ kunigi, kaj eternigus la antagonismojn.

## INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

### Ekster karito, nenia savo

10. Miaj infanoj, en la maksimo: *Ekster karito, nenia savo*, estas entenataj la destinoj de la homoj sur la tero kaj en la ĉielo; sur la tero, ĉar en la ombro de tiu standaro ili vivos en paco; en la ĉielo, ĉar tiuj, kiuj ĝin praktikis, trovos gracon ĉe la Sinjoro. Tiu devizo estas la ĉiela torĉo, la luma kolono, kiu gvidas la homon tra la dezerto de la vivo al la Promesita Lando; ĝi brilas en la ĉielo kiel sankta aŭreolo sur la frunto de l' elektitoj, kaj sur la tero ĝi estas gravurita en la koro de tiuj, al kiuj Jesuo diros: Iru dekstren, vi, benitoj

de mia Patro. Vi rekonos ilin per la parfumo de karito, kiun ili divastigas ĉirkaŭ si. Nenio pli ĝuste esprimas la penson de Jesuo, nenio pli bone difinas la devojn de la homoj, ol tiu maksimo de dia naturo; Spiritismo ne povus pli trafe pruvi sian originon, ol donante tiun maksimon kiel regulon, ĉar tiu devizo estas ia refiguraĵo de la plej pura Kristanismo; kun tia gvidilo, la homo neniam devojiĝos. Diligentu do, miaj amikoj, por kompreni ĝian profundan sencon kaj ĝiajn konsekvencojn, por trovi mem ĉiujn ĝiajn aplikojn. Submetu ĉiujn viajn agojn al la kontrolo de la karito, kaj via konscienco respondos al vi; ĝi ne nur evitos, ke vi faru malbonon, sed ĝi igos vin fari bonon; ĉar ia negativa virto ne sufiĉas, estas necesa virto agema; por fari bonon, estas ĉiam necesa la agado de la volo; por ne fari malbonon, ofte sufiĉas inerteco kaj malzorgemo.

Miaj amikoj, danku Dion, ke Li permesis al vi ĝui la lumon de Spiritismo; ne tial, ke povas esti savataj nur la homoj, kiuj posedas tiun lumon, sed tial, ke ĝi helpas vin pli bone kompreni la instruojn de la Kristo kaj faras vin pli bonaj kristanoj. Klopodu do, por ke, vin vidante, oni diru, ke vera spiritisto kaj vera kristano estas unu sama homo, ĉar ĉiu, kiu praktikas kariton, estas disĉiploj de Jesuo, al kiu ajn sekto ili apartenas. (*Paŭlo*, apostolo. Parizo, 1860.)

ĈAPITRO XVI

# ONI NE POVAS SERVI DION KAJ MAMONON

Savo de la riĉuloj. Gardi sin kontraŭ avareco. Jesuo ĉe Zakĥeo. Parabolo de la malbona riĉulo. Parabolo de la talantoj. Providenca utileco de la riĉeco. Provoj de la riĉeco kaj de la mizero. Malegaleco de la riĉeco. **Instruoj de la Spiritoj**: La vera posedaĵo. Uzado de la riĉego. Seninteresiĝo pri la surteraj havaĵoj. Heredigo de la ricaĵoj.

## Savo de la riĉuloj

1. *Nenia servanto povas servi al du sinjoroj; ĉar aŭ li malamos unu kaj amos la alian, aŭ li aliĝos al unu kaj malestimos la alian. Vi ne povas servi al Dio kaj al Mamono!* (Luko, 16:13.)

2. *Kaj unu reganto demandis al li, dirante: Bona Majstro, kion mi faru por heredi eternan vivon? - Kaj Jesuo diris al li: Kial vi nomas min bona? neniu estas bona krom Unu, nome Dio. Vi scias la ordonojn: Ne adultu; Ne mortigu; Ne ŝtelu; Ne parolu malveran ateston; Respektu vian patron kaj vian patrinon. - Kaj li diris: Ĉion tion mi observis detempe de mia juneco. - Kaj Jesuo, aŭdinte, diris al li: Ankoraŭ unu mankon vi havas: vendu ĉion, kion vi posedas, kaj disdonu al malriĉuloj, kaj vi havos trezoron en la ĉielo; kaj venu, sekvu min.*

*Sed aŭdinte tion, li fariĝis tre malĝoja; ĉar li estis tre riĉa. - Kaj Jesuo, lin rigardante, diris: Kiel malfacile tiuj, kiuj havas riĉon, eniros en la regnon de Dio!* Ĉar estas pli

facile por kamelo iri tra trueton de kudrilo, ol por riĉulo eniri en la regnon de Dio (*). (Luko, 18:18-25.)

## Gardi sin kontraŭ la avareco

3. *Kaj unu el la homamaso diris al li: Majstro, diru al mia frato, ke li dividu kun mi la heredaĵon. Sed li diris al li: Ho viro, kiu starigis min super vi kiel juĝanton aŭ dividanton? Kaj li diris al ili: Zorgu, kaj gardu vin kontraŭ ĉia avideco, ĉar la vivo de homo ne konsistas en la abundeco de liaj posedaĵoj. Kaj li parolis al ili parabolon, dirante: La bieno de riĉulo donis abunde; kaj li konsideris, dirante: Kion mi faru, ĉar mi ne havas lokon, kie mi povas amasigi miajn fruktojn? Kaj li diris: Jen kion mi faros: mi disbatos miajn grenejojn kaj konstruos pli grandajn, kaj tie mi amasigos miajn grenojn kaj miajn posedaĵojn. Kaj mi diros al mia animo: Animo, vi havas multajn posedaĵojn, provizitajn por multaj jaroj; ripozu, manĝu, trinku, estu gaja. Sed Dio diris al li: Ho senprudentulo! ĉi tiun nokton oni postulos de vi vian animon; kies estos tio, kion vi preparis? Tia estas tiu, kiu kolektas por si trezoron, kaj ne estas riĉa rilate Dion.* (Luko, 12:13-21.)

## Jesuo ĉe Zakĥeo

4. *Kaj li eniris en Jeriĥon kaj ĝin trapasis. Kaj jen viro, nomata Zakĥeo; kaj li estis ĉefimpostisto, kaj li estis riĉa. Kaj li penis vidi Jesuon, kia homo li estas; kaj li ne povis pro la homamaso, ĉar li estis malgranda je staturo. Kaj antaŭkurinte antaŭen, li supreniris sur sikomorarbon, por lin vidi; ĉar li estis preterpasonta tie. - Kaj kiam Jesuo venis al la loko, li suprenrigardis, kaj diris al li: Zakĥeo, rapide malsupreniru, ĉar hodiaŭ mi devas loĝi en via domo.*

(*) Ĉi tiu tro kuraĝa figuro povas ŝajni iom afekta, ĉar oni ne vidas, kia rilato ekzistas inter kamelo kaj kudrilo. Ĝi venas de tio, ke en la hebrea lingvo la sama vorto signifas **kablo** kaj **kamelo**. En la traduko oni donis al ĝi ĉi tiun lastan sencon; kredeble Jesuo uzis tiun vorton laŭ ĝia unua senco; almenaŭ ĉi tiu estas pli natura.

*— Kaj li rapide malsupreniris, kaj akceptis lin ĝoje. Kaj vidinte, ĉiuj murmuris, dirante: Ĉe pekulo li eniris, por gasti. (*Vidu en la *Enkonduko* la artikolon IMPOSTISTOJ.*)*

*Kaj Zakĥeo, starante, diris al la Sinjoro: Jen duonon de miaj posedaĵoj, Sinjoro, mi donacas al la malriĉuloj; kaj se el iu mi maljuste eldevigis ion, mi redonas kvaroblon. — Kaj Jesuo diris al li: Hodiaŭ venis savo al ĉi tiu domo, ĉar li ankaŭ estas filo de Abraham. Ĉar la Filo de homo venis, por serĉi kaj savi la perditaĵon.* (Luko, 19:1-10.)

## Parabolo de la malbona riĉulo

*5. Estis unu riĉulo, kiu estis vestita per purpuro kaj bisino, kaj festis lukse ĉiutage; kaj apud lia pordego estis kuŝigita almozulo, nomata Lazaro, kiu havis ulcerojn, kaj deziris esti nutrata per la panpecetoj, kiuj falis de la tablo de la riĉulo; kaj eĉ venis la hundoj kaj lekis liajn ulcerojn. — Kaj la almozulo mortis, kaj li estis forportita de la anĝeloj sur la sinon de Abraham; la riĉulo ankaŭ mortis, kaj estis enterigita. — Kaj en Hades li levis siajn okulojn, estante en turmentoj, kaj vidis Abrahamon malproksime kaj Lazaron sur lia sino. Kaj li ekkriis, kaj diris: Patro Abraham, kompatu min, sendu Lazaron, por ke li trempu en akvon la pinton de sia fingro, por malvarmigi mian langon; ĉar mi tre suferas en tiu ĉi flamo.*

*Sed Abraham diris: Filo, memoru, ke dum via vivo vi ricevis viajn bonaĵojn, kaj Lazaro tiel same malbonaĵojn; sed nun li ricevas konsolon, kaj vi suferas. Kaj krom ĉio tio staras granda abismo inter ni kaj vi, tiel ke tiuj, kiuj volus iri de ĉi tie al vi, ne povas, kaj oni ne povas transiri de tie al ni.*

*Kaj li diris: Tial mi petas, patro, ke vi sendu lin al la domo de mia patro, ĉar mi havas kvin fratojn, por ke li atestu al ili, por ke ili ne venu ankaŭ en ĉi tiun lokon de turmento. - Sed Abraham diris: Ili havas Moseon kaj la profetojn; ili aŭskultu ilin. - Sed li diris: Ne, patro Abraham; sed se unu venos al ili el la mortintoj, ili pentos. — Kaj li diris al li: Se ili ne aŭskultas Moseon kaj la profet-*

*ojn, ili ne kredos, eĉ se iu leviĝus el la mortintoj.* (Luko, 16:19-31.)

## Parabolo de la talantoj (*)

*6. Ĉar tiel estas, kvazaŭ viro, forvojaĝonte, alvokis siajn servistojn, kaj komisiis al ili siajn posedaĵojn. Kaj al unu li donis kvin talantojn, al alia du, al alia unu; al ĉiu laŭ sia kapableco; kaj li tuj forvojaĝis. — Kaj tiu, kiu ricevis la kvin talantojn, iris kaj negocadis per ili, kaj gajnis pluajn kvin talantojn. Tiel same ankaŭ tiu, kiu ricevis la du, gajnis pluajn du. Sed tiu, kiu ricevis la unu, foriris kaj fosis en la tero, kaj kaŝis la monon de sia sinjoro. Kaj post longa tempo la sinjoro de tiuj servistoj venis, kaj faris kun ili kalkulon. Kaj tiu, kiu ricevis la kvin talantojn, venis kaj alportis pluajn kvin talantojn, dirante: Sinjoro, vi komisiis al mi kvin talantojn; jen mi gajnis pluajn kvin talantojn. Lia sinjoro diris al li: Bone, vi bona kaj fidela servisto; vi estis fidela pri malmultaj aferoj, mi starigos vin super multaj; envenu en la ĝojon de via sinjoro. — Kaj venis ankaŭ tiu, kiu ricevis la du talantojn, kaj diris: Sinjoro, vi komisiis al mi du talantojn; jen mi gajnis pluajn du talantojn. Lia sinjoro diris al li: Bone, vi bona kaj fidela servisto; vi estis fidela pri malmultaj aferoj, mi starigos vin super multaj; envenu en la ĝojon de via sinjoro. — Kaj venis ankaŭ tiu, kiu ricevis la unu talanton, kaj diris: Sinjoro, mi sciis, ke vi estas severa homo, rikoltanta, kie vi ne semis, kaj kolektanta, kie vi ne disŝutis; kaj mi timis, kaj foriris, kaj kaŝis vian talanton en la tero; jen vi havas vian propraĵon. — Sed lia sinjoro responde diris al li: Vi malbona kaj mallaborema servisto, vi sciis, ke mi rikoltas, kie mi ne semis, kaj kolektas, kie mi ne disŝutis; pro tio vi devus doni mian monon al la bankistoj, kaj alveninte, mi ricevus mian propraĵon kun procento. — Forprenu de li do la talanton, kaj donu ĝin al tiu, kiu havas la dek talantojn.*

---

(*) Kvankam la oficiala radiko estas **talent**, mi konservis la neologismon proponitan en la traduko de l' Evangelioj. — **La Tradukinto.**

*Ĉar al ĉiu, kiu havas, estos donite, kaj li havos abundegon; sed for de tiu, kiu ne havas, eĉ tio, kion li havas, estos prenita. Kaj elĵetu la senutilan serviston en la eksteran mallumon; tie estos la plorado kaj la grincado de dentoj.* (Mateo, 25:14-30.)

## Providenca utileco de la riĉeco. Provoj de la riĉeco kaj de la mizero

7. Se la riĉeco devus esti absoluta baro al la savo de la homoj, kiuj ĝin posedas, kiel oni povus konkludi el iuj paroloj de Jesuo, interpretataj laŭ la litero kaj ne laŭ la spirito, Dio, kiu ĝin donas, estus metinta en la manojn de kelkaj homoj ilon de senrimeda perdiĝo. Tian penson la racio forpuŝas. La riĉeco estas sendube tre glitiga provo, pli danĝera ol la mizero, pro siaj forlogoj, pro la tentoj, kiujn ĝi inspiras, kaj pro ĝia magia ensorĉo. Ĝi estas la superega instiganto de fiero, egoismo kaj voluptama vivo; ĝi estas la plej potenca ligilo, kiu alkroĉas la homon al la tero kaj deturnas liajn pensojn de la ĉielo. Ĝi donas tian kapturniĝon, ke la homo, kiu pasas de mizero al riĉeco, tuj forgesas sian antaŭan situacion, tiujn, kiuj dividis ĝin kun li, tiujn, kiuj lin helpis, kaj fariĝas nesentema, egoista kaj vantama. Sed el tio, ke la riĉeco malfaciligas la vojon, ne sekvas, ke ĝi malebligas la iradon kaj ke ĝi ne povas esti savrimedo por la homo, kiu ĝin scias uzadi, same kiel iuj venenoj povas rebonigi la sanon, se uzataj oportune kaj saĝe.

Kiam Jesuo diris al la junulo, kiu demandis lin pri la rimedoj por gajni la eternan vivon: "senigu je ĉiuj viaj havaĵoj kaj sekvu min", li ne intencis starigi kiel absolutan principon, ke ĉiu formetu siajn posedaĵojn, kaj ke la savon nur por tia prezo oni ricevas, sed nur montri, ke *la alligiteco al la surteraj bonaĵoj* estas malhelpo al la savo. Efektive, tiu junulo kredis sin

kvita, ĉar li observadis iujn ordonojn, kaj tamen retropaŝas antaŭ la penso forlasi siajn havaĵojn; lia deziro akiri la eternan vivon ne iras ĝis tia ofero.

La propono, kiun Jesuo faris al li, estis decida provo, por meti en lumon la fundon de la penso de la junulo; sendube, ĉi tiu eble estis rigardata de la socio kiel homo tute honesta; li al neniu faradis maljustaĵon, ne klaĉadis kontraŭ la proksimulo, ne estis vanta kaj fiera, respektis sian patron kaj sian patrinon; sed li ne nutris la veran kariton, ĉar lia virto ne iris ĝis la abnegacio. Jen, kion Jesuo volis elmontri; tio estis apliko de la principo: Ekster karito, nenia savo.

La sekvo de tiuj paroloj, prenitaj en sia rigora signifo, estus la ekstermo de la riĉeco, kiel io malutila al la estonta feliĉo kaj kiel fonto de multego da malbonaĵoj sur la tero; ĝi estus ankaŭ la kondamno de la laboro, kiu povas riĉigi; absurda sekvo, kiu rekondukus la homon al la sovaĝa vivo, kaj tial ĝi estus kontraŭdiro al la leĝo de progreso, kiu estas leĝo de Dio.

Se la riĉeco estas fonto de multaj malbonaĵoj, se ĝi instigas al tiom da malbonaj pasioj, se ĝi eĉ okazigas tiom da krimoj, ne ĝin ni kulpigu, sed la homon, kiu ĝin, kiel ĉiujn donacojn de Dio, misuzas; per la misuzo, li faras danĝera tion, kio povus esti plej utila al li. Tio estas sekvo de la malsupereco de la surtera mondo. Se la riĉeco devus naski nur malbonon, Dio ne metus ĝin sur la teron; estas devo de la homo eligi el gi la bonon. Se ĝi ne estas rekta elemento de la morala progreso, ĝi sendube estas potenca elemento de la progreso intelekta.

Efektive, la homo havas kiel mision labori por la materia plibonigo de la terglobo; ĉi tiun li devas plugebligi, sanigi, prepari, por ke ĝi iam akceptu la tutan loĝantaron, kiun ĝia vasteco povas surhavi; por nutri tiun logantaron senĉese kreskantan, estas necese pli-

grandigi la produktadon; se la produktado de unu lando estas nesufiĉa, estas necese serĉi ekster ties limoj. Tial la interrilatoj de la popoloj fariĝas bezono; por ke estu pli facilaj tiuj interrilatoj, estas necese detrui la materiajn barojn, kiuj apartigas la popolojn, (*) plirapidigi la interkomunikiĝojn. Por laboroj, kiuj estas verkoj de jarcentoj, la homo devis ĉerpi materialojn eĉ el la internaĵo de la tero; li serĉis en la scienco la rimedojn, por pli sekure kaj rapide plenumi tiujn laborojn; sed por fari tiajn laborojn, li bezonis rimedojn; la bezono igis lin krei la riĉecon, kiel ĝi igis lin eltrovi la sciencon. La aktiveco, kiun postulas tiaj laboroj, pligrandigas kaj elvolvigas lian intelekton; tiu intelekto, kiun li unue koncentras sur la kontentigon de siaj materiaj bezonoj, poste helpos lin kompreni la grandajn moralajn veraĵojn. Ĉar la riĉeco estas la unua rimedo por tiu kontentigo, tial sen ĝi ne fariĝos plu grandaj laboroj, ne plu agemo, stimulado, esploradoj; ja prave do la riĉeco estas konsiderata kiel elemento de progreso.

## Malegaleco de la riĉeco

8. La malegaleco de la riĉeco estas unu el tiuj problemoj, kiujn oni vane penas solvi, se oni konsideras nur la nunan vivon. La unua demando, kiu prezentiĝas, estas tiu ĉi: Kial ĉiuj homoj ne estas egale riĉaj? Ili ne estas tiaj pro tre simpla kaŭzo, *ĉar ili ne estas egale inteligentaj, agemai kaj laboremaj por akiri, nek sobraj kaj antaŭvidemaj por konservi*. Cetere estas punkto ma-

(*) La unua eldono de tiu ĉi libro aperis en aprilo de 1864, do 23 jarojn, antaŭ ol aperis Esperanto; tial Kardec ne menciis la lingvan baron, kies malapero estos plej granda helpo al kunlaborado de ĉiuj popoloj por komuna bono. Nun ni esperantistoj tion komprenas kaj klopodas, por nuligi la lingvajn barojn. — **La Tradukinto**.

tematike pruvita, ke la riĉeco egale dividita donus al ĉiu malgrandan kaj nesufiĉan parton; ke, supoze ke tiu divido estus farita, la ekvilibro baldaŭ rompiĝus pro la diverseco de karakteroj kaj de kapabloj; ke, se oni supozus ĝin ebla kaj daŭra, ĉiu apenaŭ havus vivrimedojn, kaj tio estus la nuligo de ĉiuj grandaj laboroj, kiuj helpas la progreson kaj la bonstaton de la homaro; ke, supoze ke ĝi donus al ĉiuj la necesaĵojn, ne plu estus la stimulilo, kiu puŝas al grandaj eltrovoj kaj al utilaj entreprenoj. Se Dio ĝin koncentris sur iujn punktojn, ĝi do disvastiĝu laŭ kvanto sufiĉa por ĉiu, laŭ ĉies bezonoj.

Konsentinte pri tio, oni demandas sin, kial Dio ĝin donas al personoj nekapablaj ĝin fruktigi por la bono de ĉiuj. Tie ankaŭ troviĝas pruvo de la saĝeco de Dio. Dotante la homon per la libera volo, Dio volis, ke la homo, per sia propra sperto, distingu inter bono kaj malbono, kaj ke la farado de bono rezultu de propraj klopodoj kaj volo. La homo devas esti kvazaŭ fatale kondukata nek al bono, nek al malbono, ĉar, se tiel estus, li estus nenio pli, ol ia pasiva kaj nepriresponda instrumento, kiaj la bestoj. La riĉeco estas rimedo por lin morale elprovi; sed tial, ke ĝi estas samtempe potenca rimedo de agado por la progreso, Dio ne volas, ke ĝi restu senfrukta longan tempon, kaj tial *Li ĝin senĉese alilokigas*. Ĉiu devas ĝin posedi, por ekzerciĝi en ĝia utiligo kaj montri la uzadon, kiun li scias fari el ĝi; sed, tial ke ekzistas la materiala neeblo, ke ĉiuj ĝin samtempe posedu; ke cetere, se ĉiuj ĝin havus, neniu laborus, kaj estus do kompromitita la pliboniĝo de la terglobo, *ĉiu ĝin posedu siavice*: kiu ĝin ne havas hodiaŭ, tiu jam ĝin havis aŭ havos en alia ekzistado, kaj tiu, kiu ĝin havas nun, eble ĝin jam ne havos morgaŭ. Estas riĉuloj kaj malriĉuloj, ĉar Dio estas justa kaj ĉiu devas siavice labori; malriĉeco estas por unuj provo de pacienco kaj rezignacio; riĉeco estas por aliaj provo de karito kaj abnegacio.

Oni prave bedaŭras la misuzadon, kiun iuj personoj faras el sia riĉeco, la malnoblegajn pasiojn, kiujn la avideco instigas, kaj oni demandas sin, ĉu Dio estis justa, donante riĉecon al tiaj personoj? Certe, se la homo havus unu solan ekzistadon, nenio pravigus tian dividon de la surteraj bonaĵoj; sed se, anstataŭ limigi sian vidon al la nuna vivo, oni konsideras la tuton de l' ekzistadoj, oni vidas, ke ĉiuj aferoj sin reciproke ekvilibras laŭ justeco. La malriĉulo jam ne havas do motivon por akuzi la Providencon, nek por envii la riĉulojn, kaj la riĉuloj jam ne havas motivon por fieri pro tio, kion ili posedas. Se ili misuzas siajn posedaĵojn, nek per dekretoj, nek per leĝoj oni evitos la malbonon; la leĝoj povas momente ŝanĝi la eksteraĵon, sed sanĝi la koron ili ne povas; tial ili estas efemeraj kaj ĉiam sekvataj de pli senbrida kontraŭagado. La fonto de la malbono kuŝas en egoismo kaj fiero; la ĉiaspecaj malbonuzoj ĉesos per si mem, kiam la homoj konformigos sian konduton al la leĝo de karito.

## INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

### La vera posedaĵo

9. La homo propre posedas nur tion, kion li povas kunporti el tiu ĉi mondo. Kion li trovas alvenante, kaj kion li lasas forirante, tion li uzas dum sia restado tie ĉi; sed, ĉar li devas ĉion ĉi forlasi, tial li de ĝi nur ĝuas profiton, ne realan posedon. Kion li posedas? Nenion, kion uzas la korpo; ĉion, kion uzas la animo: la inteligenton, la konojn, la moralajn kvalitojn; jen, kion li alportas kaj forportas, tio, kion neniu havas la povon forpreni de li, tio, kio utilos al li multe pli en la transtombo, ol en tiu ĉi mondo; dependas de li esti pli riĉa ĉe sia foriro, ol ĉe la alveno, ĉar de la bonaĵo, kiun li kolektis al si, dependas lia estonta pozicio. Kiam iu vojaĝas en mal-

proksiman landon, li preparas siajn pakaĵojn kun objektoj utilaj en tiu lando; li ne ŝarĝas sin per objektoj senutilaj dum la vojaĝo. Faru do la samon rilate al la estonta vivo, kaj provizu vin per ĉio, kio tiam povos esti utila.

Al vojaĝanto, veninta en gastejon, oni donas belan loĝejon, se li povas ĝin pagi; al iu, havanta malmulte, oni donas loĝejon malpli komfortan; tiu, nenion havanta, kuŝos sur pajlo. Same okazas al la homo, venanta en la mondon de la Spiritoj: lia loko tie estas difinita de lia havaĵo; sed ne per oro li ĝin pagas. Oni ne demandas lin: Kiom vi posedis sur la tero? kian rangon vi okupis? ĉu vi estis princo aŭ laboristo? Sed: Kion vi kunportas? Oni ne kalkulos la valoron de liaj havaĵoj nek de liaj titoloj, sed la sumon de liaj virtoj; nu, en tiu kalkulado, laboristo povas esti pli riĉa, ol princo. Vane li asertos, ke antaŭ ol sia foriro de sur la tero li pagis per oro sian eniron en la alian mondon; oni respondos al li: La lokojn tie ĉi oni ne aĉetas, sed gajnas per la bono, kiun oni faris; per la surtera mono vi povis aĉeti kampojn, domojn, palacojn; tie ĉi oni pagas ĉion per kvalitoj de la koro. Ĉu vi estas riĉa per tiuj kvalitoj? estu bonvena, kaj okupu la unuan lokon, kie ĉiuj feliĉoj vin atendas; ĉu vi estas malriĉa je ili? prenu la lastan lokon, kie vi estos traktata konforme al via havaĵo. (*Pascal*. Ĝenevo, 1860.)

10. La surteraj havaĵoj apartenas al Dio, kiu ilin disdonas laŭ Sia plaĉo, kaj la homo estas nur la fruktuzanto, la administranto pli aŭ malpli honesta kaj inteligenta de tiuj bonaĵoj. Ili estas tiel malmulte individua propraĵo de la homo, ke Dio ofte malsukcesigas ĉiajn antaŭvidojn; ofte riĉeco elglitas el la manoj de iu, kiu pensas, ke li ĝin posedas laŭ la plej forta rajto.

Eble vi diros, ke tio estas komprenebla, se nur ĝi rilatas al heredita havo, sed ne al havo akirita per laboro.

Sendube, legitima riĉeco estas nur tiu honeste akirita, ĉar *propraĵo estas laŭleĝe akirita nur tiam, kiam el ĝia ekposedo rezultas nenia malutilo al iu ajn*. Kalkulo estos postulita pri ĉiu monereto malbone gajnata, tio estas, malprofite por alia persono. Sed, tial ke iu ŝuldas sian riĉecon al si mem, ĉu, pli ol aliaj, li kunportus ĝin ĉe la morto? Ĉu ofte ne estas vanaj la zorgoj, kiujn li prenas, por lasi ĝin al siaj idoj? certe, ĉar, se Dio ne volas, ke ĝi apartenu al ili, nenio sukcesas kontraŭ Lia superega volo. Ĉu la homo povus dum sia vivo, trafe aŭ maltrafe uzadi sian riĉecon, senpune, devante prezenti kalkulraporton al neniu? Ne; permesante al li akiri ĝin, Dio volis rekompenci lin, dum tiu ĉi vivo, pro liaj penoj, kuraĝo, persistemo; sed, se li uzas ĝin nur por kontentigi siajn sentumojn aŭ sian fieron; se ĝi fariĝas falilo en liaj manoj, pli bone estus, se li ĝin ne havus; li perdas unuflanke tion, kion li gajnas aliflanke, kaj tiel nuligas la meriton de sia laboro; kiam li forlasos la teron, Dio diros al li, ke li jam ricevis sian rekompencon. (*M., protektanta Spirito*. Bruxelles, 1861.)

## Uzado de la riĉeco

11. Vi ne povas servi Dion kaj Mamonon; memoru bone ĉi tion, vi, kiujn la amo al la mono mastras, vi, kiuj vendus vian animon, por posedi trezorojn, ĉar ili povas levi vin super la aliajn homojn kaj doni al vi la ĝuojn de la pasioj; ne, vi ne povas servi Dion kaj Mamonon! Se do vi sentas vian animon potencata de l' avideco de la karno, rapidu forskui la jugon, kiu vin subpremas, ĉar Dio, justa kaj severa, diros al vi: Kion ci faris, malfidela administranto, el la bonaĵoj, kiujn mi konfidis al ci? Tiun potencan instigilon de la bonaj verkoj ci uzis por cia persona kontentigo.

Kia estas do la plej bona uzado de la riĉeco? serĉu en jenaj vortoj: "Amu unuj aliajn" la solvon de tiu

demando; en ili kuŝas la sekreto por la bona utiligo de la riĉaĵoj. Kiu estas animata de amo al la proksimulo, tiu trovas en ili, klare difinitan, sian kondutregulon; la utiligo de la riĉaĵoj, plej plaĉanta al Dio, estas karito; ne tiu malvarma, egoista karito, kiu konsistas en disdonado de superfluaĵoj de orumita ekzistado, sed tiu karito plena de amo, kiu serĉas la malfeliĉulon, kiu lin restarigas sen humiligo. Riĉulo, donu el cia superfluo; faru pli bone: donu iom el ciaj necesaĵoj, ĉar ciaj necesaĵoj estas mem superfluaj, sed donu saĝe. Ne forpelu la plendanton, pro timo, ke li trompos cin, sed iru al la fonto de la malbono; unue helpu, poste informiĝu, kaj vidu, ĉu la laboro, la konsiloj, la amo mem ne estos pli efikaj, ol cia almozo. Abunde disverŝu ĉirkaŭ cin amon al Dio, amon al la laboro, amon al la proksimulo. Investu cian kapitalon en entreprenon, kiu neniam trompos cin kaj donos al ci grandajn profitojn: en la bonajn agojn. La riĉeco de l' intelekto servu al ci same kiel la oro; disdonu ĉirkaŭ ci la trezorojn de l' instruado; disdonu inter ciaj fratoj la trezorojn de cia amo, kaj tiuj ĉi fruktos. (*Cheverus*. Bordeaux, 1861.)

12. Kiam mi konsideras la mallongecon de la vivo, mi estas dolore tuŝita de la senĉesa zorgado pri la materia vivofacileco, kiu estas via celo, dum vi alligas tiel malmulte da graveco kaj dediĉas neniom da tempo al via morala perfektiĝo, kiu devas interesi vin por eterne. Oni kredus, vidante vian aktivecon, ke en tio estas afero de la plej alta intereso por la homaro, kaj tamen ĝi preskaŭ ĉiam celas havigi al vi la eblon kontentigi vantamon kaj troigitajn bezonojn, aŭ fordoni vin al ekscesoj. Kiom da penoj, da zorgoj, da turmentoj oni kreas al si, kiom da sendormaj noktoj, por pligrandigi riĉecon ofte pli ol sufiĉan! Pro ekstrema blindeco, oni ne malofte vidas homojn, kiujn sklavigas senbrida amo al riĉeco kaj al ties ĝuoj, submetitaj al peniga laborado, trenantaj vivon laŭdire plenan de sinofero kaj de merito, kvazaŭ

ili laborus por aliaj kaj ne por si mem. Malsaĝuloj! vi kredas do reale, ke estos kalkulataj favore al vi la zorgoj kaj klopodoj, kies instigilo estas egoismo, avideco aŭ fiero, dum vi malzorgas vian estontecon, same kiel la devojn, kiujn la frata solidareco postulas de ĉiuj, kiuj ĝuas profitojn el la socia vivo! Vi pensis nur pri via korpo; ĝia bonfarto, ĝiaj plezuroj estis la sola celo de via egoista diligenteco; pro ĝi, kiu mortos, vi neglektis vian Spiriton, kiu vivos ĉiam. Tiamaniere, tiu mastro tiel dorlotita kaj karesita fariĝis via tirano; ĝi regas vian Spiriton, kiu fariĝis ĝia sklavo. Ĉu estas tiu la celo de l' ekzistado, kiun Dio donis al vi? (*Protektanta Spirito*. Krakovo, 1861.)

13. Ĉar la homo estas depongardanto, administranto de la havaĵoj, kiujn Dio metas en liajn manojn, tial estos postulitaj severaj kalkuloj pri l' uzado, kiun li faros el ili laŭ sia libera volo. La malbona uzado konsistas en ilia aplikado nur al persona kontentigo; kontraŭe, la uzado estas ĝusta ĉiam, kiam el ĝi rezultas iu ajn bono por aliaj; la merito estas proporcia al la ofero, kiun oni trudas al si. La bonfarado estas nur unu el la manieroj uzadi la riĉecon; ĝi helpas la nunan mizeron; ĝi satigas, ĝi gardas kontraŭ malvarmo kaj donas rifuĝejon al iu, kiu ne havas ĝin; sed devo ankaŭ nepra kaj same merita estas antaŭforigi la mizeron; jen la precipa misio de la grandaj riĉecoj, plenumata per la ĉiaspecaj laboroj, kiujn ili povas ebligi. Kaj eĉ se el tiaj laboroj la riĉuloj tirus justan profiton, la bono tamen ja ekzistus; ĉar la laboro plifortigas la intelekton kaj altigas la dignon de homo, kiu ĉiam fieras, povante diri, ke li perlaboras sian panon, dum, kontraŭe, la almozo humiligas kaj malnobligas. La riĉeco koncentrita en unu manon devas esti kiel fonto de viva akvo, kiu disverŝas fekundecon kaj komforton ĉirkaŭ sin. Ho vi, riĉuloj, kiuj ĝin uzos laŭ la planoj de la Sinjoro, via koro la unua sensoifiĝas ĉe tiu bonfarema fonto; vi havos

jam en tiu ĉi vivo neesprimeblajn ĝuojn de l' animo, anstataŭ la materiaj ĝuoj de l' egoisto, kiuj lasas malplenaĵon en la koro. Viaj nomoj estos benataj sur la tero, kaj kiam vi ĝin forlasos, la suverena Mastro aplikos al vi la parabolon de la talantoj: "Bona kaj fidela servisto, envenu en la ĝojon de via Sinjoro." En tiu parabolo, ĉu la servisto, kiu kaŝis en la tero la monon konfiditan al li, ne estas figuro de l' avaruloj, en kies manoj la riĉeco restis senfrukta? Tamen Jesuo parolas precipe pri almozoj nur tial, ke en tiu tempo kaj en la lando, kie li vivis, oni ne konis la laborojn, kiujn la artoj kaj industrio poste kreis kaj en kiujn la riĉeco povas esti utile investita por la ĝenerala bono. Al ĉiuj, kiuj povas doni, multe aŭ malmulte, mi diros do: Donu almozon, kiam ĝi estos bezona, sed kiel eble ŝanĝu almozon en salajron, por ke tiu, kiu ĝin ricevas, ne ruĝiĝu de honto. (*Fénelon*. Alger, 1860.)

## Seninteresiĝo pri la surteraj havaĵoj

14. Mi venas, miaj fratoj, miaj amikoj, alporti mian doneton, por helpi vin sentime marŝi sur la vojo de la pliboniĝo, en kiun vi eniris. Ni ŝuldas unuj al aliaj; nur per la sincera kaj frata unuiĝo inter la Spiritoj kaj la enkarniĝintoj la revirtiĝo estas ebla.

Via amo al la surteraj bonaĵoj estas unu el la plej fortaj baroj al via morala kaj spirita progreso; pro via alligiteco al tiuj havaĵoj, vi detruas viajn amkapablojn kaj ilin plene koncentras sur la materiajn aferojn. Estu sinceraj; ĉu la riĉeco donas senmiksan feliĉon? Kiam viaj monŝrankoj estas plenaj, ĉu ne estas ĉiam ia malpleno en la koro? Ĉu en la fundo de luksa florkorbo ne estas ĉiam kaŝita iu venena rampulo? Mi komprenas la ĝojon, ja tre justan, de la homo, kiu, per konstanta kaj honesta laboro, gajnis riĉecon; sed de tiu tre natura ĝojo, kiun

Dio aprobas, ĝis alligiteco, kiu nuligas ĉiujn aliajn sentojn kaj kiu paralizas la impulsojn de la koro, estas granda distanco; tia, kia inter hontinda avareco kaj troa malŝparemo, du malvirtoj, inter kiuj Dio metis kariton, sanktan kaj sanigan virton, kiu instruas la riĉulon doni sen parado, por ke la malriĉulo ricevu sen humiliĝo.

Ĉu la riĉecon vi ricevis de via familio, ĉu vi ĝin perlaboris, ion vi neniam forgesu, nome, ke ĉio venas de Dio, ĉio al Dio revenas. Nenio sur la tero apartenas al vi, eĉ ne via mizera korpo: la morto senigas vin je ĝi, same kiel je ĉiuj materiaj havaĵoj; vi estas depontenantoj, ne posedantoj, ne iluziiĝu pri tio; Dio pruntedonis al vi havaĵojn; vi devas redoni, kaj Li pruntedonas al vi kun la kondiĉo, ke almenaŭ la superfluaĵo estu destinita al tiuj, kiuj ne havas la necesaĵojn.

Unu el viaj amikoj pruntedonas al vi ioman sumon; eĉ se vi estas nemulte honesta, vi skrupule ĝin redonas kaj konservas al li dankon. Nu, jen la pozicio de ĉiu riĉa homo; Dio estas la ĉiela amiko, kiu pruntedonis al li riĉecon; Li deziras nenion pli, ol amon kaj dankon de la riĉulo, sed Li postulas, ke tiu ĉi siavice donu al la malriĉuloj, kiuj egalrajte estas Liaj filoj.

La havaĵo, kiun Dio konfidis al vi, naskas en viaj koroj ardan kaj frenezan avidecon; ĉu vi pripensas, kiam vi malmodere alligiĝas al riĉaĵo pereema kaj mallongedaŭra kiel vi mem, ke iam venos la tago, kiam vi devos doni detalan raporton al la Sinjoro pri tio, kio venas de Li? Ĉu vi forgesas, ke per la riĉeco vi estas investitaj en la sankta karaktero de komisiitoj por la karito sur la tero, por esti ĝiaj inteligentaj disdonantoj? Kiaj aliaj vi estas do, se vi uzas por via sola profito tion, kio estas konfidita al vi, krom malfidelaj depongardantoj? Kio rezultas el tiu memvola forgeso je viaj devoj? La nefleksebla, senkompata morto disŝiras la vualon, sub kiu vi kaŝis vin, kaj devigas vin prezenti kalkulojn al

tiu amiko mem, kiu komplezis al vi kaj kiu, en tiu momento, staras antaŭ vi en talaro de juĝisto.

Vane sur la tero vi penas iluzii vin mem, kolorigante per la nomo "virto" tion, kio ofte estas nur egoismo; vane vi nomas ŝparemo kaj antaŭvidemo tion, kio estas nur avideco kaj avareco, aŭ vi nomas malavareco tion, kio estas nur malŝparemo je via profito. Ekzemple, familiestro sin detenas de praktikado de karito, ŝparos, amasigos oron, por, li diras, lasi al siaj filoj plej multe da komforto kaj evitigi al ili fali en mizeron; tio estas tre prava kaj patreca, mi konsentas, kaj oni ne povas lin riproĉi; sed, ĉu estas ĉiam tiu sola instigilo, kiu lin gvidas? Ĉu ofte tio ne estas kompromiso, kiun li faras kun sia konscienco, por pravigi antaŭ siaj propraj okuloj kaj antaŭ la mondo sian personan alligitecon al la surteraj havaĵoj? Tamen ni konsentu, ke la patra amo estas lia sola instigilo; ĉu tio estas do motivo, por ke li forgesu siajn fratojn per Dio? Kiam li mem jam havas superfluon, ĉu li lasos siajn infanojn en mizero, se ili havos iomete malpli de tiu superfluo? Ĉu prefere tio ne estus doni al ili lecionon de egoismo kaj hardi iliajn korojn? Ĉu tio ne estus sufoki en ili la amon al la proksimulo? Patroj kaj patrinoj, vi forte eraras, se vi kredas, ke, tiel farante, vi pligrandigos la amon de viaj infanoj al vi; instruante al ili esti egoistaj por la aliaj, vi instruas ilin esti tiaj ankaŭ por vi.

Homon, kiu multe laboradis kaj kiu per la ŝvito de sia frunto amasigis havaĵojn, vi ofte aŭdas diri, ke de la mono perlaborita oni plej bone taksas la valoron: nenio pli ĝusta. Nu! tiu homo, kiu asertas, ke li konas la tutan valoron de la mono, faru kariton laŭ siaj rimedoj, kaj li havos pli da merito, ol tiu, kiu, naskita en abundeco, ne konas krudajn laciĝojn de la laboro. Sed kontraŭe, se tiu sama homo, kiu memoras siajn penojn, siajn laborojn, estas egoista, senkompata por la malriĉuloj, li estas

multe pli kulpa, ol la aliaj; ĉar, ju pli oni konas per si mem la dolorojn, kaŝitajn en la mizero, des pli oni devas klopodi, por mildigi la mizeron de l' aliaj.

Bedaŭrinde, en la homo, kiu posedas havaĵojn, ekzistas ĉiam alia sento tiel forta, kiel lia alligiteco al la riĉeco: tia sento estas la fiero. Ne malofte oni vidas novriĉulon konsterni malfeliĉulon, kiu petegas lian helpon, rakontante siajn laborojn kaj lertecon, anstataŭ helpi lin, kaj fine diri: "Faru tion, kion mi faris." Laŭ lia opinio, la boneco de Dio nenion kontribuis por lia riĉiĝo; nur al li apartenas la tuta merito, ke li estas riĉa; la fiero vindas liajn okulojn kaj ŝtopas liajn orelojn; li ne komprenas, malgraŭ siaj tutaj inteligento kaj lerteco, ke Dio povas lin renversi per unu sola vorto.

Malŝparegado de sia riĉeco ne estas seninteresiĝo pri la surteraj havaĵoj, sed nezorgemo kaj indiferenteco; kiel depongardanto de tiuj havaĵoj, la homo rajtas ilin nek disperdi, nek konfiski por sia profito; malŝparemo ne estas malavareco, sed ofte ia formo de egoismo; iu, kiu forĵetas sian oron plenmane, por kontentigi ian fantazion, ne donus eĉ unu monereton por fari servon. La seninteresiĝo pri la surteraj havaĵoj konsistas en tio, ke oni taksu la riĉecon laŭ ties ĝusta valoro, ke oni sciu uzi ĝin por la aliaj kaj ne por si sola, ke oni ne oferu al ĝi la interesojn de la estonta vivo, ke oni perdu ĝin senmurmure, se plaĉos al Dio ĝin forpreni. Se, pro neantaŭviditaj sortobatoj, vi fariĝos kiel Ijob, diru kiel li: "Sinjoro, Vi ĝin donis al mi, Vi ĝin forprenis: Via volo estu farita." Jen la vera seninteresiĝo. Unue estu obeemaj; fidu al Tiu, kiu, doninte kaj repreninte, povas redoni; brave kontraŭstaru la senkuraĝiĝon, la malesperon, kiuj paralizas vian forton; neniam forgesu, kiam Dio vin frapos, ke apud la plej grandan provon, Li ĉiam metas konsolon. Sed precipe pripensu, ke ekzistas

bonaĵoj senkompare pli altvaloraj, ol tiuj de sur la tero, kaj tiu penso helpos vin liberiĝi de ĉi tiuj lastaj. La malmulta valoro, kiun oni donas al io, faras ties perdon malpli sentebla. La homo, kiu alligas sin al la surteraj bonaĵoj, estas kiel infano, kiu vidas nur la nunan momenton; kiu ne alteniĝas al ili, tiu estas kiel maturulo, kiu vidas pli gravajn aferojn, ĉar li komprenas la profetajn parolojn de la Savanto: "Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo."

La Sinjoro neniel ordonas, ke oni seniĝu je siaj posedaĵoj, por fariĝi memvola almozpetanto, ĉar sekve oni estus ŝarĝo por la socio; tiel agi estus ne kompreni la seninteresiĝon pri la surteraj havaĵoj; tio estus alispeca egoismo; ĉar la homo do forskuus de si la respondecon, kiun la riĉeco trudas al sia posedanto. Dio donas ĝin al tiu, kiu ŝajnas al Li kapabla ĝin administri por profito de ĉiuj; la riĉulo havas mision, kiun li povas fari bela kaj profita por li mem; rifuzi la riĉecon, kiam Dio ĝin konsentas, estas rezigni la profiton de la bono, kiun oni povas fari, ĝin saĝe administrante. Scii sen ĝi vivadi, kiam oni ne havas ĝin, scii utile uzi ĝin, kiam oni ĝin havas, scii oferi ĝin, kiam tio estas necesa, estas agi laŭ la planoj de la Sinjoro. Tiu, al kiu venas bona riĉeco, kiel oni ĝin nomas en la mondo, diru: Mia Dio, Vi sendas al mi novan ŝarĝon, donu al mi la forton, por plenumi Vian sanktan volon.

Jen, miaj amikoj, tio, kion mi intencis instrui al vi pri la seninteresiĝo pri la surteraj bonaĵoj; mi resumas jene: Sciu kontentigi vin per malmulto. Se vi estas malriĉa, ne enviu la riĉulojn, ĉar riĉeco ne estas necesa al feliĉo; se vi estas riĉa, ne forgesu, ke tiuj havaĵoj estas nur konfiditaj al vi kaj ke vi devos pri ili prezenti kalkulojn, tute same, kiel se temus pri kuratoraj spezoj. Ne estu malfidela depontenanto, utiligante la riĉaĵojn nur por kontentigi vian fieron kaj vian voluptemon; ne

opiniu, ke vi rajtas uzi por vi sola tion, kio estas pruntedonitaĵo, ne donaco. Se vi ne scias redoni, vi ne plu havas la rajton peti, kaj memoru, ke tiu, kiu donas al la malriĉuloj, kvitiĝas de ŝuldo, kiun li havis ĉe Dio. (*Lacordaire*. Constantine, 1863.)

15. *Ĉu la principo, laŭ kiu la homo estas nur depontenanto de la riĉeco, kiun Dio permesas al li uzi dum sia vivo, forprenas de li la rajton postlasi ĝin al siaj idoj?*

La homo povas tute prave heredigi ĉe sia morto tion, kion li ĝuadis dum sia vivo, ĉar la sekvo de tiu rajto estas ĉiam subordigita al la volo de Dio, kiu povas, kiam Li volas, neebligi al la posteuloj ĝui la heredaĵon; tial oni vidas disfali riĉecon, kiu ŝajnis plej solida. La volo de la homo, por konservi sian riĉecon en manoj de sia idaro, estas senpova; sed tio ne prenas de li la rajton postlasi la pruntaĵon, kiun li ricevis, ĉar Dio ĝin forprenos, kiam Li tion juĝos oportuna. (*Sankta Ludoviko*. Parizo, 1860.)

## Ĉapitro XVII

# ESTU PERFEKTAJ

Karakteroj de la perfekteco. La virta homo. La bonaj spiritistoj. Parabolo de la semisto. **Instruoj de la Spiritoj:** La devo. La virto. Superuloj kaj malsuperuloj. La homo en la mondo. Zorgu la korpon kaj Spiriton.

### Karakteroj de la perfekteco

1. *Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj; por ke vi estu filoj de via Patro, kiu estas en la ĉielo; ĉar Li levas Sian sunon sur malbonulojn kaj bonulojn, kaj sendas pluvon sur la justulojn kaj maljustulojn. – Ĉar se vi amas tiujn, kiuj amas vin, kian rekompencon vi havas? Ĉu ne tion saman faras eĉ la impostistoj? Kaj se vi salutas nur sole viajn fratojn, kion ekstran vi faras? Ĉu ne tion saman faras eĉ la nacianoj? Estu do perfektaj, kiel ankaŭ via ĉiela Patro estas perfekta*. (Mateo, 5:44-48.)

2. Ĉar Dio posedas la senliman perfektecon pri ĉio, tiu maksimo: "Estu do perfektaj, kiel ankaŭ via ĉiela Patro estas perfekta", prenita laŭlitere, antaŭsupozus la eblecon, ke estos atingita la absoluta perfekteco. Se estus eble al la kreito esti tiel perfekta kiel la Kreinto, li fariĝus egala al Dio, kio ne estas akceptebla. Sed la homoj, al kiuj Jesuo parolis, neniel povus kompreni tian nuancon; tial li limigis sin prezenti al ili modelon kaj diri, ke ili klopodu por ĝin atingi.

Estas necese kompreni per tiuj vortoj la rilatan perfektecon, tiun, kiun la homaro povas atingi kaj kiu plej alproksimigas ĝin al Dio. En kio konsistas tia perfekteco? Jesuo klarigas: "Amu viajn malamikojn, faru bonon al tiuj, kiuj malamas vin, preĝu por viaj persekutantoj." Per tio li montras, ke la esenco de la perfekteco estas la karito en sia plej ampleksa signifo, ĉar ĝi kuntrenas la praktikadon de ĉiuj aliaj virtoj.

Efektive, se oni observos la rezultaton de ĉiuj malvirtoj, kaj eĉ de simplaj mankoj, oni rekonos, ke ĉiu el ili pli aŭ malpli profunde difektas la senton de karito, ĉar ĉiuj originas de la egoismo kaj fiero, kiuj estas negacio de la karito; ĉio, efektive, kio troekscitas la senton de la personeco , detruas aŭ almenaŭ tute certe malfortigas la elementojn de la vera karito, kiuj estas: bonvolemo, indulgemo, abnegacio kaj sinoferado. Ampleksante la amon al malamikoj kaj ne povante aliĝi al iu malvirto kontraŭa al la karito, la amo al la proksimulo estas ĉiam signo de pli aŭ malpli granda morala supereco; el tio rezultas, ke la grado de la perfekteco estas proporcia al la vasteco de tiu amo; tial Jesuo, doninte al siaj disĉiploj la plej superbelajn regulojn de la karito, diras al ili: "Estu do perfektaj, kiel via ĉiela Patro estas perfekta. "

## La virta homo

3. La vere virta homo estas tiu, kiu praktikas la leĝon de justeco, de amo kaj karito laŭ ties plej granda pureco. Se li konsultas sian konsciencon pri siaj propraj agoj, li demandas sin, ĉu li ne malobservis tiun leĝon; ĉu li ne faris ian malbonon; ĉu li faris ĉian bonon, *kian li povis;* ĉu li memvole preterlasis iun okazon esti utila; ĉu iu havas plendon kontraŭ li; fine, ĉu li faris al alia ĉion, kion li dezirus, ke oni faru al li.

Li fidas al Dio, al Lia boneco, al Lia justeco kaj al Lia saĝeco; li scias, ke nenio okazas sen permeso de Dio, kaj pri ĉio li submetiĝas al la volo de la Sinjoro.

Li fidas al la estonteco; tial li starigas la spiritajn bonaĵojn super la materiaj bonaĵoj.

Li scias, ke ĉiaj sortovicoj de la vivo, ĉiaj doloroj, ĉiaj elreviĝoj, estas provoj aŭ kulpelaĉetoj, kaj li akceptas ilin senmurmure.

La homo, posedita de la sento de karito kaj amo al sia proksimulo, faras la bonon pro la bono, ne esperante repagon; pagas per bono la malbonon, defendas la malfortan kontraŭ la forta kaj ĉiam oferas sian intereson al la justeco.

Li trovas sian kontentecon en la bonfaroj, kiujn li disdonas; en la servoj, kiujn li faras ; ĉe la homoj, kiujn li faras feliĉaj; en la larmoj, kiujn li forviŝas; en la konsoloj, kiujn li portas al afliktitoj. Lia unua ekmovo estas pensi pri l' aliaj, antaŭ ol pensi pri si mem, zorgi la intereson de aliaj, antaŭ ol sian propran. La egoisto, kontraŭe, kalkulas la profitojn kaj malprofitojn de ĉiu malavara ago.

La virta homo estas bonkora, humana kaj bonvolema por ĉiuj, sen escepto *de rasoj kaj de kredoj,* ĉar li vidas fratojn en ĉiuj homoj.

Li respektas de aliaj ĉiujn sincerajn konvinkojn, kaj ne ĵetas anatemon sur tiujn, kiuj ne pensas kiel li.

En ĉiaj cirkonstancoj karito estas lia gvidilo; li estas certa, ke la homo, kiu malutilas alian per malicaj vortoj, kiu ofendas ies sentojn per sia fiero aŭ malŝato, kiu ne retropaŝas antaŭ la ideo kaŭzi ian suferon, ian ĉagrenon eĉ plej malgrandan, kiam li povas ĝin evitigi al iu, deflankiĝas de la devo de amo al la proksimulo kaj ne meritas la kompaton de la Sinjoro.

Li ne nutras malamon, resenton aŭ venĝemon; laŭ la ekzemplo de Jesuo, li pardonas kaj forgesas la ofend-

ojn, kaj memoras nur la ricevitajn bonfarojn; ĉar li scias, ke li estos pardonita, kiel li mem estos pardoninta.

Li estas indulgema por la malperfektaĵoj de aliaj, ĉar li scias, ke li mem bezonas indulgon, kaj bone gardas en la menso jenan parolon de la Kristo: "Kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu sur ŝin ŝtonon. "

Li ne plezuras traserĉante aliulajn malkorektaĵojn, nek ilin metante en lumon. Se li devas tion fari, li ĉiam serĉas la bonan flankon, kiu povus malpligravigi la malbonon.

Li studas siajn proprajn malperfektaĵojn kaj senĉese klopodas por ilin kontraŭbatali. Ĉiujn penojn li faras por povi diri al si, ke en li estos morgaŭ io pli bona, ol en la hieraŭa tago.

Li ekpensas plivalorigi nek sian spiriton, nek siajn talentojn malprofite por alia; kontraŭe, li kaptas ĉiujn okazojn, por plej reliefigi la superajn kvalitojn de aliaj.

Li neniom fieras pro sia riĉeco, nek pro sia persona supereco, ĉar li scias, ke ĉio, kio estas donita al li, povas esti reprenita.

Li uzas, sed ne misuzas la bonaĵojn al li konfiditajn, ĉar li scias, ke ili estas deponitaĵo, pri kiu li devas prezenti kalkulraporton, kaj ke la plej malbona uzo, kiun li povas fari el ĝi, estas utiligi ĝin, por kontentigi siajn pasiojn.

Se la socia ordo metis aliajn homojn sub lian dependecon, li traktas ilin afable kaj bonvole, ĉar ili estas liaj egaluloj antaŭ Dio; li uzas sian aŭtoritaton, por levi ilian animon, ne por ilin frakasi per sia fiero; li sin detenas de ĉio, kio povus fari pli peniga ilian suban pozicion.

La subulo siaflanke komprenas la devojn de sia pozicio kaj penas ilin skrupule plenumi. (Ĉapitro XVII, § 9.)

La virta homo, fine, respektas ĉiujn rajtojn, kiujn la leĝoj de la naturo konsentis al liaj similuloj, same kiel li volas, ke la liaj estu respektataj.

Tie ĉi ne estas la listo de ĉiuj kvalitoj, kiuj distingas la virtan homon, sed, kiu penos posedi tiujn supre nomitajn, tiu estas sur la vojo, kiu kondukas al ĉiuj aliaj.

## La bonaj spiritistoj

4. Spiritismo bone komprenita, sed precipe bone sentata, nepre kondukas al la supre diritaj rezultatoj, kiuj karakterizas la veran spiritiston kiel la veran kristanon, ĉar ambaŭ estas la sama unu. Spiritismo kreas nenian novan moralon; ĝi nur faciligas al la homoj la komprenon kaj praktikadon de la moralo de la Kristo, solidan kaj klaran fidon inspirante al tiuj, kiuj dubas aŭ hezitas.

Sed multaj, kiuj kredas je la manifestiĝoj de Spiritoj, ne komprenas ties sekvojn, nek ties moralan gravecon, aŭ se ili komprenas tiujn faktojn, ili ĉi tiujn ne aplikas al si mem. Kia estas la kaŭzo de tio? Ĉu manko de precizeco en la doktrino? Ne, ĉar ĝi ne enhavas alegoriojn, nek figurojn, kiuj povus okazigi falsajn interpretojn; ĝia esenco mem estas la klareco, kaj el ĉi tiu venas ĝia potenco, ĉar ĝi trafas rekte la intelekton. Ĝi havas nenion misteran, kaj ĝiaj inicitoj posedas nenian sekreton, kaŝitan al la vulgarulo. Ĉu por ĝin kompreni estas do necesa neordinara inteligento? Ne, ĉar multaj homoj de rimarkinda kapableco ĝin ne komprenas, dum vulgaraj intelektoj, eĉ de junuloj ĵus elirintaj el la knabeco, kaptas kun mirinda ĝusteco ĝiajn plej delikatajn nuancojn. Tio okazas, ĉar la parto, por tiel diri, *materia* de la scienco postulas nur okulojn por observi, dum la *esenca* parto postulas ioman gradon da sentemeco, kiun oni povas nomi *la maturiĝo de l' morala sento*,

maturiĝo sendependa de l' aĝo kaj de la grado de instruiteco, ĉar ĝi estas propra al la nivelo de progreso, en aparta direkto, de l' enkarniĝinta Spirito.

Ĉe iuj, la ligiloj de la materio estas ankoraŭ tro obstinaj, por ebligi al la Spirito liberiĝi el la surteraj aferoj; la nebulo, ilin ĉirkaŭanta, kaŝas de ili la vidon je la senlimo; tial ili ne facile rompas kun siaj gustoj kaj kutimoj, ne komprenante, ke povas ekzisti io pli bona, ol tio, kion ili havas; la kredo je la Spiritoj estas por ili simpla fakto, sed ĝi malmulte aŭ neniel ŝanĝas iliajn instinktajn inklinojn; unuvorte, ili vidas nur lumradion, nesufiĉan por konduki ilin kaj por doni al ili potencan aspiron, kapablan venki iliajn inklinojn. Ili alteniĝas pli al la fenomenoj, ol al la moralo, kiu al ili ŝajnas banala kaj monotona; ili petas la Spiritojn senĉese ilin inici en novajn misterojn, ne demandante sin, ĉu ili mem fariĝis indaj penetri en la sekretojn de la Kreanto. Tiuj estas la neperfektaj spiritistoj, el kiuj kelkaj restas sur la vojo aŭ malproksimiĝas de siaj samkredanoj, ĉar ili retropaŝas antaŭ la devo reformi sin mem, aŭ ili rezervas sian simpation al tiuj, kiuj havas iliajn samajn malkorektaĵojn aŭ antaŭjuĝojn. Tamen la akcepto de la principo de la doktrino estas unua paŝo, kiu plifaciligos al ili la duan en alia ekzistado.

Kiun oni prave povas kvalifiki vera kaj sincera spiritisto, tiu troviĝas en pli alta grado da morala progreso; la Spirito regas pli plene la materion ĉe li kaj ĝuigas al li pli klaran percepton pri l' estonteco; la principoj de la doktrino ĉe li vibrigas fibrojn, kiuj restas inertaj ĉe l' unuaj; unuvorte, *li estas tuŝita je la koro*; tial lia fido estas neskuebla. Unu estas kiel la muzikisto, kiun emocias iuj akordoj, dum la aliaj aŭdas nur sonojn. *Oni rekonas la veran spiritiston laŭ ties morala transformiĝo, laŭ la klopodoj, kiujn li faras, por subigi siajn malbonajn inklinojn*; dum unu kontentiĝas per sia ĉir-

kaŭlimigita horizonto, la aliaj, kiu komprenas ion pli bonan, penas liberigi sin kaj ĉiam sukcesas, se nur li havas firman volon.

### Parabolo de la semisto

5. *En tiu tago Jesuo eliris el la domo kaj sidiĝis apud la maro. – Kaj kolektiĝis al li grandaj homamasoj, tiel ke li eniris en ŝipeton, kaj sidis; kaj la tuta homamaso staris sur la marbordo. Kaj li multe parolis al ili per paraboloj, dirante: Jen semisto eliris, por semi; kaj dum li semis, iuj semoj falis apud la vojo, kaj la birdoj venis kaj formanĝis ilin; kaj aliaj falis sur ŝtonajn lokojn, kie ili ne havis multe da tero; kaj tuj ili ekkreskis, ĉar ili ne havis profundecon de tero; kaj kiam la suno leviĝis, ili brulsekiĝis, kaj ĉar ili ne havis radikon, ili forvelkis. Kaj aliaj falis inter dornojn, kaj la dornoj kreskis kaj sufokis ilin; kaj aliaj falis sur la bonan teron, kaj donis frukton, jen centoble, jen sesdekoble, jen tridekoble. Kiu havas orelojn, tiu aŭdu.* (Mateo, 13:1-9.)

*Vi do aŭdu la parabolon de la semisto. Kiam iu aŭdas la vorton de la regno kaj ne komprenas ĝin, tiam venas la malbonulo, kaj forprenas tion, kio estas semita en lia koro. Ĉi tiu estas la ricevinta semon apud la vojo. Kaj tiu, kiu ricevis semon sur la ŝtonaj lokoj, estas tiu, kiu aŭdas la vorton kaj tuj kun ĝojo akceptas ĝin; sed li ne havas radikon en si, sed restas nur portempe, kaj kiam venas sufero aŭ persekuto pro la vorto, tuj li falpuŝiĝas. Kaj kiu ricevis semon inter la dornoj, estas tiu, kiu aŭdas la vorton; sed la zorgoj de la mondo kaj la trompo de riĉo sufokas la vorton, kaj li fariĝas senfrukta. Kaj kiu ricevis semon sur la bona tero, estas tiu, kiu aŭdas la vorton kaj komprenas ĝin; kaj tiu ja portas frukton, kaj donas, jen centoble, jen sesdekoble, jen tridekoble.* (Mateo, 13:18-23.)

6. La parabolo de la semisto perfekte esprimas la nuancojn de la maniero, kiel profiti el la instruoj de l' Evangelio. Efektive, kiom da personoj ekzistas, por kiuj

la Evangelio estas morta litero, simila al semo falinta sur rokon, ĉar ĝi produktas nenian frukton!

Ĝi trovas aplikon ne malpli ĝustan al diversaj kategorioj de spiritistoj. Ĉu ĝi ne estas aludo al tiuj, kiuj alligiĝas nur al la materiaj fenomenoj, kaj el ili nenian sekvon ĉerpas, ĉar ili tie vidas nur kuriozaĵon? ĉu ne al tiuj, kiuj serĉas nur la brilan flankon de la komunikaĵoj de la Spiritoj, pri kiuj ili interesiĝas nur tiom, kiom la ricevitaj paroloj kontentigas ilian imagadon, sed homoj, kiuj, aŭdinte la komunikojn, restas tiel malvarmaj kaj indiferentaj kiel antaŭe? kiuj la konsilojn trovas tre bonaj kaj admiras, sed aplikas nur al la aliaj kaj ne al si mem? fine, ĉu ne al tiuj, por kiuj la instruoj estas kiel semo, falinta sur bonan grundon kaj produktanta fruktojn?

## INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

### La devo

7. La devo estas morala ŝuldo de la homo, unue por si mem, poste por aliaj. La devo estas la leĝo de la vivo; ĝi troviĝas en la plej malgrandaj detaloj, same kiel en la plej altaj agoj. Mi volas paroli tie ĉi nur pri la morala devo, kaj ne pri la devo trudata de la profesioj.

En la sfero de la sentoj, la devo estas tre malfacile plenumebla, ĉar ĝi kontraŭas la allogojn de l' intereso kaj la koro; ĝiajn venkojn neniu atestas kaj ĝiajn fiaskojn la socio ne punas. La intima devo de la homo estas lasita al lia libera volo; la instigilo de la konscienco, tiu gardanto de l' interna honesteco, ĝin avertas kaj subtenas, sed ofte la konscienco estas senpova antaŭ la sofismoj de la pasio. Fidele observata, la devo de la koro altigas la homon; sed kiel precizigi tiun devon? Kie ĝi komenciĝas? kie ĝi finiĝas? *La devo komenciĝas ĝuste*

*ĉe la punkto, kie estas minacata la feliĉo aŭ la ripozo de la proksimulo; ĝi finiĝas ĉe la limo, kiun ni volus ne vidi transpaŝita kontraŭ ni mem.*

Dio kreis ĉiujn homojn egalaj por la doloro; grandaj aŭ malgrandaj, malkleraj aŭ kleraj, suferas pro la samaj kaŭzoj, por ke ĉiu klare juĝu la malbonon, kiun li povas fari. Tia kriterio ne validas pri la bono, kies diverseco de esprimoj estas senlima. *La egaleco antaŭ la doloro estas sublima antaŭvidemo de Dio, kiu volas, ke Liaj filoj, instruitaj per komuna sperto, ne faru malbonon pro nescio de ties efikoj.*

La devo estas la praktika resumo de ĉiuj moralaj teorioj; ĝi estas braveco de l' animo, kiu alfrontas la angorojn de la batalo; ĝi estas severa kaj fleksebla; preta kurbiĝi al la diversaj komplikaĵoj, ĝi restas nefleksebla antaŭ la tentoj. *La homo, kiu plenumas sian devon, amas Dion pli ol la kreitojn, kaj la kreitojn pli ol si mem*; li estas samtempe juĝisto kaj sklavo en sia propra afero.

La devo estas la plej bela floro de la racio; ĝi naskiĝas de la racio, kiel filo devenas de sia patrino. La homo devas ami la devon, ne tial, ke ĝi antaŭgardas lin kontraŭ la malbonaĵoj de la vivo, kiujn la homaro ne povas eviti, sed tial, ke ĝi havigas al la animo la energion necesan por ties elvolviĝo.

La devo grandiĝas kaj radias sub nova formo pli alta en ĉiu el la superaj stadioj de la homaro; neniam ĉesas la morala ŝuldo de la kreito al Dio; la homo devas speguli la virtojn de l' Eternulo, kiu ne akceptas simplan skizon, ĉar Li volas, ke la beleco de Lia verko brilegu antaŭ Li. (*Lazaro*. Parizo, 1863.)

## La virto

8. La virto, en sia plej alta grado, estas la tuto de ĉiuj esencaj kvalitoj, kiuj konsistigas la virtan homon.

Esti bona, karitema, laborema, sobra, modesta, tiaj estas la kvalitoj de la virta homo. Bedaŭrinde ili ofte estas akompanataj de moralaj neperfektaĵoj aŭ kriplaĵoj, kiuj ilin malbeligas kaj malgrandigas. Kiu paradas pro sia virto, tiu ne estas virta, ĉar al li mankas la ĉefa kvalito: la modesteco, kaj li havas la plej kontraŭan malvirton: la fieron. La virto vere inda je tiu nomo ne amas fanfaronadon; oni ĝin divenas, sed ĝi sin kaŝas en la ombron kaj evitas la admiradon de la vulgarularo. Sankta Vincento de Paŭlo estis virta; virtaj estis la digna paroĥestro de Ars kaj multaj aliaj, apenaŭ konataj de la mondo, sed tre konataj de Dio. Ĉiuj tiuj bonaj homoj ne sciis, ke ili estas virtaj; ili lasis sin peli de la fluo de siaj sanktaj inspiroj kaj faradis la bonon tute abnegacie kaj tute forgesante sin mem.

Al la virto tiel komprenata kaj praktikata mi admonas vin, miaj infanoj; al tiu virto vere kristana kaj vere laŭspiritisma mi konsilas, ke vi vin dediĉu; sed forpuŝu de via koroj ĉian penson pri fiero, vantamo aŭ memamo, kiuj makulas ĉiam la plej bonajn kvalitojn. Ne imitu la homon, kiu prezentas sin kiel modelon kaj distrumpetas siajn proprajn kvalitojn ĉe ĉiuj komplezemaj oreloj. Tiu virto, kiu tiel fanfaronas, ofte kaŝas amason da abomenaj mallojalaĵoj.

Principe, la homo, kiu altigas sin mem, kiu starigas statuon honore al sia propra virto, nuligas per tiu ago mem, la efektivan meriton, kiun li povas havi. Kion mi diros do pri tiu, kies tuta valoro estas ŝajnigi, kio li ne estas? Mi ja konsentas, ke la homo, kiu faras la bonon, sentas en la fundo de sia koro intiman kontentecon, sed se tiu kontenteco manifestiĝas, por rikolti laŭdojn, ĝi degeneras en memamon.

Ho vi ĉiuj, kiujn la spiritisma fido varmigas per siaj radioj kaj kiuj scias, kiel malproksime de la perfekteco la homo staras, neniam falu en tian eraron. La

virto estas graco, kiun mi deziras al ĉiuj sinceraj spiritistoj; tamen mi diros al ili: Pli bone malmultaj virtoj kun modesteco, ol multaj kun fiero. Ĝuste pro fiero sinsekvaj generacioj perdiĝis; nur per humileco la homaro iam elaĉetos siajn kulpojn. (*Francisko-Nikolao-Magdalena*. Parizo, 1863).

## Superuloj kaj malsuperuloj

9. La aŭtoritato, same kiel la riĉeco, estas delego, pri kiu devos raporti kalkulon la homo, kiu ĝin ricevis; ne pensu, ke ĝi estas donita al li, por krei al si la vantan plezuron ordonadi, nek, kiel malĝuste kredas la plejmulto el la surteraj potenculoj, kiel ia rajto, ia propraĵo. Efektive, Dio ofte pruvas, ke ĝi estas nek rajto, nek propraĵo, ĉar Li ĝin reprenas, kiam tio plaĉas al Li. Se la aŭtoritato estus privilegio esence propra al la persono, ĝi estus neforigebla. Neniu povas diri, ke io apartenas al li, kiam ĝi povas esti forprenita sen lia permeso. Dio donas la aŭtoritaton kiel *mision* aŭ kiel provon, kiam al Li plaĉas, kaj same ĝin reprenas.

Kiu ajn tenas aŭtoritaton, kiel ajn ampleksa ĝi estas, ekde la mastro super sia ĝis la suvereno super sia popolo, tiu ne devas forgesi, ke li respondas pri la bona aŭ malbona direktado, kiun li estos doninta al sia subuloj, kaj ke la kulpoj, kiujn tiuj ĉi povos fari, la malvirtoj, al kiuj ili estos trenitaj sekve de tiu direktado aŭ de *malbonaj ekzemploj*, refalos sur lin, same kiel li rikoltos la fruktojn de sia prizorgado, se li ilin gvidos al la bono. Ĉiu homo havas sur la tero mision, ĉu grandan, ĉu malgrandan; kia ajn ĝi estas, ĝi estas ĉiam donita por la bono; ĝin falsi pri ĝia esenco estas do malsukcesi ĉe ĝia plenumado.

Kiel Li demandas riĉulon: Kion ci faris el la riĉeco, kiu en ciaj manoj devus esti fonto disverŝanta

fekundecon ĉirkaŭen? tiel Dio demandos iun, kiu havas ian aŭtoritaton: kian uzadon ci faris el tiu aŭtoritato? Kian malbonon ci antaŭforigis? kian progreson ci ebligis? Mi donis al ci subulojn, ne por ke ci faru el ili sklavojn de cia volo, nek molajn ilojn de ciaj kapricoj aŭ de cia avideco; Mi faris cin forta kaj Mi konfidis al ci malfortulojn, por ke ci ilin subtenu kaj helpu suprenveni al Mi.

La superulo, kiu estas konvinkita pri la paroloj de la Kristo, malŝatas neniun el tiuj, kiuj troviĝas sub lia estreco, ĉar li scias, ke la sociaj distingoj neniom valoras antaŭ Dio. Spiritismo instruas al li, ke se ili obeas hodiaŭ, ili eble estris super li, aŭ povos estri poste, kaj ke tiam li estos traktata tiel same, kiel li mem traktis ilin.

Se la superulo havas devojn por plenumi, la malsuperulo siaflanke havas ne malpli sanktajn devojn. Se ĉi tiu lasta estas spiritisto, lia konscienco diros al li, des pli prave, ke li ne estas liberigita el siaj devoj, eĉ se la superulo ne plenumas la siajn, ĉar li scias, ke oni ne devas pagi malbonon por malbono, kaj ke la kulpoj de unuj ne pravigas kulpojn de aliaj. Se li suferas pro sia pozicio, li rekonas, ke sendube li meritas ĝin, ĉar eble li mem iam misuzis sian aŭtoritaton, kaj ke li devas senti siavice la ĝenojn, kiujn li trudis al aliaj. Se li estas devigata toleri tiun pozicion, ĉar li ne trovas alian pli bonan, Spiritismo instruas al li elteni ĝin kiel provon por sia humileco, necesan al lia progreso. Lia kredo direktas lian konduton kaj admonas lin agi tiel, kiel li volus, ke liaj subuloj agu kontraŭ li, se li estus ĉefo. Ĝuste pro tio, li pli skrupule plenumas siajn devojn, ĉar li komprenas, ke ĉia malzorgo en la laboro, konfidita al li, estas malprofito por tiu, kiu lin pagas kaj al kiu li ŝuldas sian tempon kaj siajn penojn; unuvorte, instigas lin devosento, naskita el lia kredo, kaj la certeco, ke ĉia deflankiĝo for de la rekta vojo estas ŝuldo, kiun li devos pagi pli aŭ malpli baldaŭ. (*Francisco-Nikolao-Magdalena, kardinalo Marlot.* Parizo, 1863).

## La homo en la mondo

10. Sento de pieco devas ĉiam regi la koron de tiuj, kiuj kunvenas sub la okuloj de la Sinjoro kaj petas helpon de la bonaj Spiritoj. Purigu do vian koron; ne lasu, ke en ĝi loĝu ia monduma aŭ frivola penso. Levu vian spiriton al tiuj, kiujn vi vokas, por ke, trovante en vi la taŭgan staton, ili povu ĵeti abunde en viajn korojn la semojn, kiuj tie ĝermus kaj donus fruktojn de karito kaj justeco.

Tamen ne kredu, ke, vin ĉiam instigante al preĝo kaj al mensa komunikiĝado kun ni, ni konsilas al vi mistikan vivadon, kiu vin tenus ekster la leĝoj de la socio, en kiu vi estas kondamnitaj vivi. Ne; vivu kiel la homoj de via epoko, kiel devas vivi la homoj; submetiĝu al la necesaĵoj, eĉ al la frivolaĵoj de via tempo, sed plenumu ilin kun sento de pureco, kiu ilin sanktigu.

Vi estas vokataj troviĝi en kontakto kun Spiritoj de malsamaj naturoj, de kontraŭaj karakteroj: vundu neniun el tiuj, kun kiuj vi rilatas. Estu gajaj, estu feliĉaj, sed tiu gajeco venu de trankvila konscienco, kaj tiu feliĉo estu la feliĉo de homo, kiu heredos la ĉielajn riĉaĵojn kaj kiu nur kalkulas la tagojn, kiuj lin alproksimigas al la ricevo de sia heredaĵo.

Virto ne konsistas en severa, funebra sintenado, en forstreko de plezuroj, kiujn viaj homaj kondiĉoj permesas al vi; sufiĉas, ke vi dediĉu ĉiujn agojn de la vivo al la Kreanto, kiu donis tiun vivon; sufiĉas, ke, kiam vi komencos aŭ finos ian laboron, vi altigu vian penson al tiu Kreanto kaj, kun ardanta animo, petu aŭ Lian protekton por sukcesi, aŭ Lian benon por la finita laboro. Ĉe io ajn, kion vi faras, pensu pri la Fonto de ĉio; neniam faru ion ne pensante pri Dio, por ke tiu penso purigu kaj sanktigu viajn agojn.

La tuta perfekteco, konsistas, kiel diris la Kristo, en la praktikado de l' absoluta karito; sed la devoj de la karito etendiĝas al ĉiuj sociaj pozicioj, ekde la plej malgranda ĝis la plej granda. La homo, kiu vivus izolite, ne povus praktiki kariton; nur en kontakto kun siaj similuloj, en la plej penigaj luktoj, li trovas okazojn esti karitema. Kiu izoliĝas, tiu memvole senigas sin je la plej pova rimedo de perfektiĝo; devante pensi nur pri si mem, li vivas kiel egoisto (Ĉap. V, p. 26).

Ne opiniu do, ke por vivi en konstanta komunikiĝado kun ni, por vivi sub la rigardo de la Sinjoro, vi devas porti punveston kaj kovri vin per cindro; ne, ne, ankoraŭfoje ne; estu feliĉaj laŭ la bezonoj de la homaro, sed en vian feliĉon neniam entrudiĝu ia penso, ia ago, kiu povus ofendi tiujn, kiuj vin amas kaj gvidas, aŭ vuali ties vizaĝojn. Dio estas amo kaj benas tiujn, kiuj sankte amas. *(Protektanta Spirito.* Bordeaux, 1863).

## Zorgu la korpon kaj la Spiriton

11. Ĉu la morala perfektco konsistas en turmentado de la korpo? Por solvi tiun demandon, mi apogas min sur elementaj principoj, kaj komencos pruvante la neceson zorgi la korpon, kiu, laŭ la alternoj de sano kaj malsano, influas tre grave la animon, kiun oni devas konsideri enkarcerigita en la karno. Por ke tiu enkarcerigito vivu, elverŝiĝu kaj havu eĉ la iluziojn de libereco, la korpo devas esti sana, vigla, kuraĝa. Ni faru komparon: Jen ili ambaŭ en perfekta stato; kion ili faru por konservi la ekvilibron inter siaj kapabloj kaj siaj bezonoj, ja tiel malsimilaj? Konflikto inter ambaŭ ŝajnas ja neevitebla, kaj malfacile trovebla la sekreto pri ilia reciproka kompenso. (*)

---

(*) En la tria eldono ne aperas, kiel en la unua de la originalo, la frazoj: **"Konflikto inter ambaŭ ŝajnas ja neevitebla,**

Tie ĉi staras du sistemoj unu fronte al la dua: tiu de l' asketoj, kiuj volas subpremi la korpon, kaj tiu de la materialistoj, kiuj volas malaltigi la animon: du perfortoj preskaŭ tiel malsaĝaj, unu kiel la dua. Ĉe la flanko de tiuj grandaj partioj svarmas la multenombra tribo de l' indiferentuloj, kiuj, sen konvinko kaj sen pasio, malvarme amas kaj ŝpareme ĝuas. Kie do la saĝeco? Kie la scienco de la vivo? Nenie; kaj tiu granda problemo restus tute nesolvita, se Spiritismo ne venus helpe de la esplorantoj, montrante al ili la interrilatojn ekzistantajn inter la korpo kaj la animo, kaj dirante, ke, ĉar korpo kaj animo estas necesaj unu al alia, oni devas zorgi ilin ambaŭ. Amu do vian animon, sed zorgu ankaŭ vian korpon, ties instrumenton; ne rekoni la bezonojn, indikatajn de la naturo mem, estas ne rekoni la leĝon de Dio. Ne punu la korpon pro kulpoj, kiujn via libera volo instigis ĝin fari, kaj pro kiuj ĝi tiel same respondas, kiel ĉevalo mallerte direktata respondus por akcidentoj, kiujn ĝi kaŭzas. Ĉu vi estus do pli perfektaj, se, martirigante la korpon, vi ne estus pro tio malpli egoistaj, fieraj, malkaritemaj? Ne, la perfekteco ne kuŝas tie; ĝi troviĝas tuta en la reformoj, kiujn vi trudos al via Spirito; fleksu ĝin, submetu ĝin, humiligu ĝin: jen la rimedo por fari ĝin obeema al la volo de Dio kaj la sola vojo, kondukanta al la perfekteco. (*Georgo, protektanta Spirito*. Parizo, 1863).(*)

---

**kaj malfacile trovebla la sekreto pri ilia reciproka kompenso**"; sed ni reĝustigas la tekston, ĉar al ni ŝajnas, ke la malapero de la periodo estis nur eraro dum preparado de la tria eldono. La logiko ja postulas ĝin. - **La Tradukinto**.

(*) Pri tiu sama temo — **Zorgu la korpon kaj la Spiriton** — ni presas en la fino de tiu ĉi volumo komunikaĵon de Jayme Braga, ricevitan en Rio de Janeiro, en 1946. — **La Tradukinto**.

ĈAPITRO XVIII

# MULTAJ VOKITAJ KAJ MALMULTAJ ELEKTITAJ

Parabolo de la edziĝa festo. La mallarĝa pordo. Ne ĉiuj, kiuj diras: Sinjoro! Sinjoro! Eniros em la regnon de la ĉielo. Oni postulos multon de tiu, kiun multon ricevis. **Instruoj de la Spiritoj**: Oni donos al tiu, kiu havas. Oni ekkonas la Kristanon laŭ liaj verkoj.

## Parabolo de l' edziĝa festo

1. *Kaj respondante Jesuo denove parolis al ili para-bole , dirante:*

*La regno de la ĉielo similas al unu reĝo kiu faris edz-iĝan feston por sia filo, kaj sendis siajn sklavojn, por voki la invititojn al la edziĝa festo; kaj ili ne volis veni. Poste li sendis aliajn sklavojn, dirante: Diru al la invititoj: Jen mi preparis la manĝon; miaj bovoj kaj miaj grasigitaj brutoj estas buĉitaj, kaj ĉio estas preta; venu al la edziĝa festo. Sed ili malatentis, kaj foriris, unu al sia bieno, alia al sia komercado; kaj la ceteraj, kaptinte liajn sklavojn, perfortis kaj mortigis ilin. Kaj la reĝo koleris; kaj sendinte siajn ar-meojn, li pereigis tiujn mortigintojn kaj bruligis ilian urbon. Tiam li diris al siaj sklavoj: La edziĝa festo esta preta, sed la invititoj ne estis indaj. Iru do al la disirejoj de la vojoj, kaj ĉiujn, kiujn vi trovos, invitu al la edziĝa festo. Kaj tiuj sklavoj, elirinte sur la vojojn, kunvenigis ĉiujn, kiujn ili trov-is, malbonajn kaj bonajn, kaj la edziĝa festo pleniĝis de gastoj. Sed la reĝo, enveninte por rigardi la gastojn, tie vidis viron, kiu ne sur si edziĝofestan veston; kaj li diris*

*al li: Amiko, kiel vi envenis ĉi tien, ne havante edziĝofestan veston? Kaj li silentadis. Tiam la reĝo diris al siaj servantoj: Ligu lin mane kaj piede, kaj elĵetu lin en la eksteran mallumon; tie estos la plorado kaj la grincado de dentoj. Ĉar multaj estas vokitaj, sed malmultaj estas elektitaj.* (Mateo, 22:1-14)

2. Nekredanto ridas ĉe tiu ĉi parabolo, kiu al li ŝajnas infane naiva, ĉar li ne komprenas, ke oni povas prezenti tiom da malfacilaĵoj por alesti al festo, kaj ankoraŭ malpli, ke la invititoj pelis sian kontraŭstaron ĝis buĉado de la senditoj de la dommastro. "La paraboloj, li diras, sendube estas figuroj, sed, malgraŭ tio, ili ne transpaŝu la limojn de la verŝajno."

Oni povas diri la samon pri ĉiaj alegorioj, pri la fabloj plej lertaj, se oni ne senigas ilin je ilia envolvaĵo, por trovi la kaŝitan sencon. Jesuo ĉerpis la siajn el la plej vulgaraj kutimoj de la vivo, kaj alkonformigis ilin al la moroj kaj karaktero de la popolo, al kiu li parolis; la plimulto el ili celis penetrigi en la popolamason la ideon pri la spirita vivo; ilia senco ŝajnas ofte ne komprenebla nur tial, ke oni ne rigardas ilin el ĉi tiu vidpunkto.

En tiu ĉi parabolo, Jesuo komparas la regnon de la ĉielo, kie ĉio estas ĝojo kaj feliĉo, kun festo. Kiel la unuajn invititojn, li aludas la Hebreojn, kiuj la unuaj estis vokitaj de Dio al la konado de Lia leĝo. La senditoj de la mastro estas la profetoj, kiuj venis admoni ilin sekvi la vojon de la vera feliĉo, sed la paroloj de la profetoj estis apenaŭ aŭskultataj; iliaj admonoj estis forlasataj; pluraj estis eĉ mortigitaj, kiel la servistoj en la parabolo. La invititoj, kiuj ekskuzis sin pretekstante, ke li devas zorgi siajn kampojn kaj negocojn, simbolas la mondumajn personojn, kiuj, absorbite de la surteraj okupoj, estas indiferentaj pri la ĉielaj aferoj.

Estis ordinara kredo ĉe la tiamaj Judoj, ke ilia nacio nepre superregos ĉiujn ceterajn. Ĉu Dio ja ne promesis al Abraham, ke ties posteularo kovros la tutan teron? Sed kiel ĉiam, prenante la formon por la penso, ili kredis je efektiva kaj materia mastrado.

Antaŭ la veno de la Kristo, kun escepto de la Hebreoj, ĉiuj popoloj estis idolanoj kaj politeistoj. Se kelkaj homoj superaj ol la vulgaruloj elpensis la ideon pri la dia unueco, tiu ideo daŭradis tamen en stato de privata sistemo kaj nenie estis akceptita kiel fundamenta veraĵo, krom de kelkaj inicitoj, kiuj kaŝis siajn konojn sub mistera vualo ne trapenetrebla por la popolamaso. La Hebreoj la unuaj publike praktikadis la monoteismon; al ili Dio donis Sian leĝon, unue pere de Moseo, poste pere de Jesuo; el tiu malgranda fokuso eliris la lumo, destinita disvastiĝi tra la tuta mondo, disbati la idolanismon kaj doni al Abraham *spiritan* posteularon "tiel multenombran kiel la steloj de la firmamento". Sed la Judoj, tute flanken metinte la idolanismon, preterlasis la moralan leĝon kaj alkroĉiĝis al la plej facila parto, nome, la praktikado de la ekstera kulto. La malbono estis en sia ekstremeco; la nacio sklavigita estis disŝirita en bandojn, dividita en sektojn; la nekredemo mem estis penetrinta eĉ en la sanktejon. Tiam aperis Jesuo, sendita por revoki la popolon al la observado de la leĝo kaj por malfermi al ili novajn horizontojn al la estonta vivo; *unuaj* invititoj al la granda bankedo de l' universala kredo, ili tamen forpuŝis la parolon de la ĉiela Mesio kaj mortigis lin; tiel ili perdis la fruktojn, kiujn ili povus rikolti el sia privilegio.

Tamen estus majuste akuzi la tutan popolon pro tiu stato de l' aferoj; la Fariseoj kaj Sadukeoj havis la precipan respondecon por la pereo de la nacio, pro la fiereco kaj fanatikeco de l' unuaj kaj la nekredemo de l' aliaj. Ĉefe ilin Jesuo komparas kun la invititoj, ri-

fuzintaj partopreni en la edziĝofesto; poste li aldonas: "Vidinte tion, la Mastro invitigis ĉiujn, kiuj troviĝis en la disirejoj de la vojoj, malbonajn kaj bonajn"; li intencis diri per tio, ke la parolo estis predikota al ĉiuj aliaj popoloj, nekredantoj kaj idolanoj, kaj ĉi tiuj, ĝin akceptinte, estos allasataj en la feston, anstataŭ la unuaj invititoj.

Sed ne sufiĉas, ke iu estas invitita; eĉ ke li estas laŭnome kristano, nek ke li sidas ĉe la tablo, por partopreni en la ĉiela bankedo; antaŭ ĉio li devas nepre surhavi la edziĝofestan veston, tio estas havi purecon de koro kaj observi la leĝon laŭ ĝia spirito; nu, tiu leĝo enteniĝas tute en ĉi tiuj vortoj: *Ekster karito, nenia savo*. Sed inter ĉiuj, kiuj aŭdas la dian parolon, kiom malmultaj ĝin konservas kaj profitas! Kiom malmultaj fariĝas indaj eniri en la regnon de la ĉieloj! Tial Jesuo diris: *Multaj estas vokitaj, sed malmultaj estas elektitaj.*

## La mallarĝa pordo

3. *Eniru tra la mallarĝa pordo, ĉar larĝa estas la pordego kaj vasta estas la vojo kondukanta al la pereo, kaj multaj tra ĝi eniras. — Ĉar mallarĝa estas la pordo kaj malvastigita estas la vojo al la vivo, kaj malmultaj ĝin trovas.* (Mateo, 7:13-14. )

4. *Kaj iu diris al li: Sinjoro, ĉu malmultaj estas la savataj? Kaj li diris al ili: Strebu eniri tra la mallarĝa pordo; ĉar multaj, mi diras al vi, deziros eniri kaj ne povos. Kiam la domomastro leviĝos kaj ŝlosos la pordon, kaj vi komencos stari ekstere kaj frapi sur la pordon, dirante: Sinjoro, malfermu al ni; kaj li respondos kaj diros al vi: Mi ne scias, de kie vi estas; tiam vi ekparolos: Ni manĝis kaj trinkis antaŭ vi , kaj sur niaj stratoj vi instruadis; kaj li parolos, kaj diros al vi: Mi ne scias, de kie vi estas; foriru de mi, ĉiuj farantoj de maljusteco. Tie estos la plorado kaj la grin-*

*cado de dentoj, kiam vi vidos Abrahamon kaj Isaakon kaj Jakobon kaj ĉiujn profetojn em la regno de Dio, kaj vin mem forpelitaj eksteren. Kaj oni venos el oriento kaj el okcidento, kaj el nordo kaj el sudo, kaj sidiĝos en la regno de Dio. Kaj jen estas lastaj, kiuj estos unuaj; kaj estas unuaj, kiuj estos lastaj.* (Luko, 13:23-30. )

5. La pordo de la pereo estas larĝa, ĉar la malbonaj pasioj estas multenombraj, kaj la vojo de la malbono estas irejo de la plimulto el la homoj. La pordo de la savo estas mallarĝa, ĉar la homo, volante ĝin trapasi, devas fari grandan penon por venki siajn malbonajn inklinojn, kaj malmultaj ĝin rezignacie faras; tio estas aldono al la maksimo: Multaj estas vokitaj sed malmultaj estas elektitaj.

Tia estas la stato de la surtera homaro, ĉar la tero estas mondo por kulpelaĉeto kaj la malbono do tie regas; kiam la tero estos transformita, la vojo de la bono estos laŭirata de la plej multaj. Oni do devas kompreni tiujn vortojn en relativa, kaj ne en absoluta senco. Se tia devus esti la normala stato de la homaro, Dio mem destinus al pereo la grandegan plimulton el Siaj kreitoj; tiu supozo estas neakceptebla, ĉar oni rekonas, ke Dio estas plene justa kaj bona.

Sed pri kiaj malbonagoj tiu homaro povus kulpi, por meriti tian malfeliĉan sorton, en siaj estanteco kaj estonteco, se ĝi tuta estus ekzilita sur la teron, kaj se la animo ne estus havinta aliajn ekzistadojn? Kial tiom da malhelpoj semitaj sur ĝia vojo? Kial tiu pordo tiel mallarĝa, kiun nur malmultegaj sukcesas trapasi, se la sorto de l' animo estus por ĉiam difinita post la morto? Tial, akceptante la unuecon de l' ekzistado, la homo senĉese kontraŭas sin mem kaj la justecon de Dio. Laŭ la antaŭekzisto de l' animo kaj laŭ la plureco de la mondoj la horizonto plilarĝiĝas; lumon ricevas la mal-

helaj punktoj de la kredo; la nuna tempo kaj la venonta estas solidaraj kun la pasinta; nur tiel oni povas kompreni la tutan profundecon, la tutan verecon kaj la plenan saĝecon de la maksimoj de la Kristo.

## Ne ĉiuj, kiuj diras: Sinjoro! Sinjoro! eniros en la regnon de la ĉielo

6. *Ne ĉiu, kiu diras al mi: Sinjoro, Sinjoro, eniros en la regnon de la ĉielo; sed tiu, kiu plenumas la volon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo. Multaj diros al mi en tiu tago: Sinjoro, Sinjoro, ĉu ni ne profetis en via nomo, kaj en via nomo elpelis demonojn, kaj en via nomo faris multajn potencaĵojn? Kaj tiam mi konfesos al ili: Mi neniam konis vin; foriĝu de mi, vi farantoj de maljusteco*. (Mateo, 7: 21-23. )

7. *Tial ĉiu, kiu aŭdas ĉi tiujn miajn parolojn kaj plenumas ilin, estos komparata al saĝa viro, kiu konstruis sian domon sur roko; kaj falis pluvo, kaj venis inundoj, kaj blovis ventoj, kaj albatis tiun domon, kaj ĝi ne falis; ĉar ĝi estis fondita sur roko. Kaj ĉiu, kiu aŭdas miajn parolojn kaj ne plenumas ilin, estos komparata al viro malsaĝa, kiu konstruis sian domon sur la sablo; kaj falis pluvo, kaj venis inundoj, kaj blovis ventoj, kaj sin ĵetis sur tiun domon, kaj ĝi falis; kaj granda estis ĝia falo.* (Mateo, 7:24-27)

8. *Tial, kiu malobservos unu el ĉi tiuj plej malgrandaj ordonoj kaj tiel instruos homojn, tiu estos nomata la plej malgranda en la regno de la ĉielo; sed kiu faros ilin kaj instruos, tiu estos nomata granda en la regno de la ĉielo.* (Mateo, 5:19. )

9. Ĉiuj, kiuj konfesas la mision de Jesuo, diras: Sinjoro! Sinjoro! Sed, kion helpas nomi lin Majstro aŭ Sinjoro, se oni ne sekvas liajn instruojn? Ĉu estas krist-

anoj tiuj, kiuj honoras lin per eksteraj agoj de pieco kaj samtempe nutras fieron, egoismon, avidecon kaj ĉiujn siajn pasiojn? Ĉu estas liaj disĉiploj tiuj, kiuj pasigas la tagojn en preĝado kaj ne sin montras pli bonaj, pli karitemaj, pli pardonemaj por siaj similuloj? Ne, ĉar, same kiel la Fariseoj, ili havas preĝon sur la lipoj, ne en la koro. Per la formo, ili povas sin trudi al la homoj, sed ne al Dio. Vane diros ili al Jesuo: "Sinjoro, ni profetis, tio estas, instruis en via nomo; ni elpelis demonojn en via nomo; ni trinkis kaj manĝis kun vi"; li respondos: "Mi ne konas vin; foriru de mi, farantoj de maljustaĵoj, vi, kiuj malkonfirmis viajn parolojn per viaj agoj, kiuj kalumnias vian proksimulon, kiuj prirabas vidvinojn kaj adultas; foriru de mi, vi, kies koroj ellasas malamon kaj galon, vi, kiuj elverŝas la sangon de viaj fratoj en mia nomo, vi, kiuj elfluigas larmojn, anstataŭ ilin forviŝi. Por vi estos plorado kaj grincado de dentoj, ĉar la regno de Dio estas destinita por la mildaj, humilaj kaj karitemaj. Ne esperu fleksi la justecon de la Sinjoro per la multeco de viaj paroloj kaj de viaj surgenuiĝoj; la sola vojo al vi malfermita, por ke vi trovu gracon antaŭ Li, estas la sincera praktikado de la leĝo de amo kaj karito."

La paroloj de Jesuo estas eternaj, ĉar ili estas la vero. Ili estas ne nur la promeso de la ĉiela vivo, sed ankaŭ la garantio de la paco, de la trankvileco kaj de la staremo pri l' aferoj de la surtera vivo; tial ĉiuj institucioj humanaj, politikaj, sociaj kaj religiaj, sin apogantaj sur tiuj paroloj, estas firmaj, kiel domo konstruita sur roko; la homoj konservos ilin, ĉar en tiuj institucioj ili trovos sian feliĉon; kontraŭe, la institucioj, atencantaj la parolon de Jesuo, estas kiel domo konstruita sur sablo: la vento de la revolucioj kaj la rivero de la progreso ilin forportos kun si.

## Oni postulos multon de tiu, kiu multon ricevis

10. *Kaj tiu servisto, kiu sciis la volon de sia sinjoro, kaj nenion pretigis, nek faris laŭ lia volo, suferos multajn batojn; sed tiu, kiu ne sciis, kaj laŭ siaj agoj meritis batojn, suferos malmultajn batojn. Kaj al kiu multo estas donita, el tiu estos multo postulata; kaj al kiu oni multon komisiis, el tiu oni des pli multon postulos.* (Luko, 12: 47-48)

11. *Kaj Jesuo diris: Por juĝo mi venis en ĉi tiun mondon, por ke la nevidantoj vidu, kaj ke la vidantoj fariĝu blindaj. Kaj tion aŭdis tiuj el la Fariseoj, kiuj estis kun li; kaj ili diris al li: ĉu ni ankaŭ estas blindaj? Jesuo diris al ili: Se vi estus blindaj, vi ne havus pekon; sed nun vi diras: Ni vidas; via peko do restas.* (Johano, 9: 39-41. )

12. Precipe ĉe l' instruado de la Spiritoj tiuj maksimoj trovas sian aplikon. Kiu ajn konas la instruojn de la Kristo, tiu kulpas, se li ne praktikas ilin; sed la Evangelio, enhavanta tiujn instruojn, estas disvastigata nur ĉe la kristanaj sektoj, kaj eĉ tie kiom da homoj ne legas ĝin, kaj inter tiuj, kiuj legas, kiom da homoj ne komprenas ĝin! El tio rezultas, ke la paroloj mem de Jesuo restas perditaj por la plimulto el la homoj.

La instruado de la Spiritoj, reproduktanta tiujn maksimojn en diversaj formoj, ilin disvolvanta kaj komentarianta por fari ilin kompreneblaj por ĉiuj, havas jenan trajton: ĝi ne estas ĉirkaŭlimigita; ĉiu ajn homo, klera aŭ malklera, kredanta aŭ nekredanta, kristana aŭ ne, povas ĝin ricevi, ĉar la Spiritoj ĉie komunikiĝas. Neniu persono, kiu, ĉu rekte aŭ pere de alia, ĝin ricevas, povas preteksti nescion; li povas ekskuzi sin nek pro manko de instruo, nek pro malklareco de l' alegoria senco. Kiu do ne profitas tiujn instruojn por sia plibon-iĝo, kiu admiras ilin kiel interesajn kaj kuriozajn aferojn, ne sentante tuŝita sian koron, kiu ne estas malpli van-

tama, malpli fiera, malpli egoista, malpli alligita al la materiaj havaĵoj, nek pli bonkora por sia proksimulo, tiu estas des pli kulpa, ĉar je pli da rimedoj li disponas por koni la veron.

La mediumoj, kiuj ricevas bonajn komunikaĵojn, estas ankoraŭ pli riproĉindaj, se ili persistas en malbono, ĉar ofte ili skribas sian propran kondamnon, kaj ĉar, se ili ne estus blindigitaj de fiero, ili komprenus, ke la Spiritoj turnas sin ĝuste al ili. Sed, anstataŭ preni por si la lecionojn, kiujn ili mem aŭ aliaj skribas, ilia sola penso estas apliki tiujn lecionojn al aliaj, kaj tiel ili konfirmas jenajn vortojn de Jesuo: "Kial vi rigardas lignereton en la okulo de via frato, kaj ne pripensas la trabon en via okulo?" (Ĉap. 7, § 9.)

Per ĉi tiu sentenco: "Se vi estus blindaj, vi ne havus pekon", Jesuo intencis diri, ke la kulpeco estas proporcia al ĉies klereco; nu, la Fariseoj, kiuj arogis al si esti, kaj ja estis, la plej klera parto de la nacio, estis pli riproĉindaj antaŭ la okuloj de Dio, ol la malklera popolo. La samo okazas hodiaŭ.

De la spiritistoj estos do multo postulata, ĉar ili ricevas multon, sed, aliflanke, al tiuj, profitintaj la instruojn, multo estos donata.

La unua penso de ĉiu sincera spiritisto devas, antaŭ ĉio, peni scii, ĉu en la konsiloj de la Spiritoj estas io, kio povus koncerni lin.

Spiritismo venas plimultigi la nombron de la vokitoj; per la fido, kiun ĝi donas, ĝi plimultigos ankaŭ la nombron de l' *elektitoj.*

## INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

### Oni donos al tiu, kiu havas

13. *Kaj la disĉiploj venis, kaj diris al li: Kial vi parolas al ili per paraboloj? Kaj li respondis kaj diris al ili:*

*Al vi estas donite scii la misterojn de la regno de la ĉielo, sed al ili ne estas donite. Ĉar kiu ajn havas, al tiu estos donite, kaj li havos abundon; sed kiu ajn ne havas, for de tiu estos prenita eĉ tio, kion li havas. Tial mi parolas al ili per paraboloj; ĉar vidante, ili ne rimarkas, kaj aŭdante, ili ne aŭdas nek komprenas. Kaj por ili plenumiĝas tiu profetaĵo de Jesaja, kiu diras:*

*Aŭdante, vi aŭdos, sed ne komprenos;*
*Kaj vidante, vi vidos, sed ne rimarkos.* (Mateo, 13: 10-14.)

14. *Kaj li diris al ili: Atentu, kion vi aŭdas; per kia mezuro vi mezuras, laŭ tiu sama oni mezuros al vi, kaj eĉ faros aldonon. Ĉar al tiu, kiu havas, estos donite; sed for de tiu, kiu ne havas, estos prenita eĉ tio, kion li havas.* (Marko, 4: 24-25. )

15. "Oni donas al tiu, kiu jam havas, kaj oni prenas for de tiu, kiu ne havas"; meditu pri ĉi tiuj grandaj instruoj, kiuj ofte ŝajnis al vi paradoksaj. Tiu, kiu ricevis, estas tiu, kiu posedas la sencon de la dia parolo; li ricevis nur tial, ke li penis fariĝi inda je ĝi, kaj la Sinjoro, per Sia elkora amo, kuraĝigas la klopodojn por la bono. Konstantaj, persistaj klopodoj altiras la gracojn de la Sinjoro; ili estas ia magneto, veniganta al si gradan pliboniĝadon, abundajn gracojn, kiuj fortigas vin, por surgrimpi la sanktan monton, sur kies supro estas ripozo post laboro.

"Oni forprenas de tiu, kiu nenion aŭ malmulton havas"; prenu tion ĉi kiel figuran antitezon. Dio ne reprenas de Siaj kreitoj la bonon, kiun Li favorkore donis al ili. Blindaj kaj surdaj homoj! malfermu viajn intelektojn kaj viajn korojn; vidu per via Spirito; komprenu per via animo, kaj ne interpretu en maniero tiel maldelikata kaj maljusta la parolojn de tiu, kiu igis brili antaŭ viaj okuloj la justecon de la Sinjoro. Ne Dio reprenas de la homo, kiu malmulton ricevis, sed nur la

Spirito mem, kiu, pro malŝparo kaj malzorgo, ne scias konservi tion, kion li havas, kaj fruktigi per flegado la semon falintan en lian koron.

Kiu ne kulturas la kampon, kiun la laboro de lia patro preparis por li kaj kiun li heredis, tiu vidas la kampon kovriĝi per parazitaj herboj. Ĉu lia patro prenas for de li la rikoltojn, kiujn li ne volis prepari? Se li lasis la grajnojn, destinitajn produkti sur tiu kampo, putri pro manko de zorgo, ĉu li akuzu sian patron pro tio, ke la grajnoj nenion produktas? Ne, ne; anstataŭ akuzi tiun, kiu ĉion preparis por li, ke tiu reprenas siajn donacojn, li kulpigu la veran aŭtoron de sia mizero, kaj tiam, pentante kaj dezirante agi, li kuraĝe eklaboru; li tranĉu la sendankan grundon per klopodado de sia volo; li ĝin plugu ĝis la profundo, helpate de la pento kaj de l' espero; li tien ĵetu plenfide la semojn, kiujn li elektis kiel bonajn el inter la malbonaj; li ĝin surverŝu per siaj amo kaj karito, kaj Dio, la amanta kaj karitema Dio, donos al tiu, kiu jam ricevis. Tiam li vidos siajn penojn kronitaj de sukceso, kaj unu grajnon produkti cent, kaj alian mil. Kuraĝon, plugistoj; prenu viajn erpilojn kaj plugilojn; plugu viajn korojn; elsarku el vi la difekteman lolon; semu la bonan grajnon, kiun la Sinjoro konfidas al vi, kaj la roso de l' amo donigos fruktojn de karito. (*Amika Spirito*. Bordeaux, 1862. )

## Oni ekkonas la kristanon laŭ liaj verkoj

16. "Ne ĉiu, kiu diras al mi: Sinjoro, Sinjoro, eniros en la regnon de la ĉielo; sed tiu, kiu plenumas la volon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo."

Aŭskultu ĉi tiun parolon de la Majstro, vi ĉiuj, kiuj malakceptas la spiritisman doktrinon, kvazaŭ ĝi estus demona verko. Malfermu viajn orelojn, ĉar alvenis la momento por aŭdi.

Ĉu sufiĉas vesti la livreon de la Sinjoro por esti fidela servisto? Ĉu sufiĉas diri: "Mi estas kristano", por sekvi la Kriston? Serĉu la verajn kristanojn, kaj vi ilin ekkonos laŭ iliaj verkoj. "Bona arbo ne povas porti malbonajn fruktojn, nek malbona arbo doni bonajn fruktojn." "Ĉiu arbo, kiu ne portas bonajn fruktojn, estas dehakata kaj ĵetata en la fajron." Jen la paroloj de la Majstro; disĉiploj de la Kristo, komprenu ilin bone. Kiajn fruktojn portu la arbo de Kristanismo, potenca arbo, kies densaj branĉoj kovras per sia ombro parton de la mondo, sed ankoraŭ ne ŝirmanta ĉiujn, kiuj devas kolektiĝi ĉirkaŭ ĝi? La fruktoj de l' arbo de la vivo estas fruktoj de vivo, espero kaj fido. Kristanismo jam de pluraj jarcentoj predikas ĉiam tiujn diajn virtojn; ĝi penas disdoni siajn fruktojn, sed kiom malmultaj ilin rikoltas! La arbo estas ĉiam bona, sed la ĝardenistoj estas malbonaj. Ili volis konformigi ĝin al sia ideo; ili volis modeligi ĝin laŭ siaj bezonoj; ili ĝin tranĉis, malgrandigis, stumpigis; ĝiaj sensukaj branĉoj ne portas malbonajn fruktojn, ĉar ili jam fruktojn ne donas. La soifanta vojiranto, kiu haltas en ĝia ombro por serĉi frukton de espero, kapablan rehavigi al li forton kaj kuraĝon, vidas nur mizerajn branĉojn, kiuj antaŭsentigas uraganon. Vane li petas pri la frukto de vivo la arbon de vivo: ĝiaj velkintaj folioj defalas; la mano de la homo tiel multe ilin tuŝadis, ke ĝi bruligis ilin!

Malfermu do viajn orelojn kaj viajn korojn, miaj tre amataj! Flegu tiun arbon de vivo, kies fruktoj donas eternan vivon. Kiu plantis ĝin, tiu admonas vin flegi ĝin amplene, ĉar vi iam vidos ĝin abunde porti siajn diajn fruktojn. Konservu ĝin tia, kia la Kristo ĝin donis al vi: ne stumpigu ĝin; ĝia vastega ombro volas etendiĝi sur la universon: ne tranĉu ĝiajn branĉojn. Ĝiaj bongustaj fruktoj abunde falas, por nutri la soifantan vojiranton, kiu aspiras al sia celo; ne kolektu

tiujn fruktojn, por ilin enmagazenigi kaj lasi putri, por ke ili utilu al neniu. "Estas multaj vokitoj kaj malmultaj elektitoj"; ĉar ekzistas multaj akaparistoj de la pano de la vivo, kiaj ekzistas de la materia pano. Ne alkalkulu vin al tiaj homoj; la arbo, portanta bonajn fruktojn, devas disdoni ilin al ĉiuj. Iru do serĉi la soifantojn; gvidu ilin sun la branĉojn de l' arbo kaj dividu kun ili la rifuĝon, kiun ĝi proponas al vi. — "Oni ne rikoltas vinberojn el dornarbetoj". Miaj fratoj, foriru do de tiuj, kiuj vokas vin, por prezenti al vi la rubusujojn de la vojo, kaj sekvu tiujn, kiuj gvidas vin al la ombro de l' arbo de vivo.

La dia Savanto, la modela justulo, diris, kaj liaj paroloj ne forpasos: "Ne ĉiu, kiu diras al mi: Sinjoro, Sinjoro, eniros en la regnon de la ĉielo, sed nur tiuj, kiuj faras la volon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo."

La Mastro de la beno vin benu; la Dio de lumo vin prilumu; la arbo de la vivo abunde disdonu al vi siajn fruktojn! Kredu kaj preĝu! (*Simeon*, Bordeaux, 1863. )

ĈAPITRO XIX

# LA FIDO TRANSLOKAS MONTOJN

Potenco de la fido. La religia fido. Kondiĉoj de la neskuebla fido. Parabolo de la forvelkinta figarbo. **Instruoj de la Spiritoj**: La fido, patrino de l' espero kaj de la karito. La dia fido kaj la homa fido.

## Potenco de la fido

1. *Kaj kiam ili venis al la homamaso, venis al li viro, genufleksante antaŭ li, kaj dirante: Sinjoro, kompatu mian filon, ĉar li frenezas kaj forte suferas; ĉar ofte li falas en la fajron kaj ofte en akvon. Kaj mi venigis lin al viaj disĉiploj, kaj ili ne povis lin sanigi. Kaj Jesuo responde diris: Ho senfida kaj perversa generacio, ĝis kiam mi estos kun vi? ĝis kiam mi toleros vin? venigu lin al mi ĉi tien. Kaj Jesuo severe admonis lin; kaj la demono eliris el li, kaj la knabo resaniĝis en tiu sama horo. Tiam la disĉiploj, veninte al Jesuo aparte, diris: Pro kio ni ne povis elpeli ĝin? Kaj li respondis al ili: Pro la malgrandeco de via fido; ĉar vere mi diras al vi:* Se vi havas fidon, kiel semero de sinapo, vi diros al ĉi tiu monto: Translokiĝu tien de ĉi tie, kaj ĝi translokiĝos*; kaj nenio estos neebla por vi*. (Mateo, 17:14-20.)

2. En propra senco, estas certe, ke la fido al la propraj fortoj kapabligas la homon plenumi materiajn aferojn, kiajn li ne sukcesas fari, se li dubas pri si mem; sed tie ĉi oni devas kompreni tiujn parolojn nur en

morala senco. La montoj, kiujn la fido translokas, estas la malfacilaĵoj, la kontraŭstaro, la malbonvolemo, kiujn oni renkontas ĉe la homoj, eĉ tiam, kiam temas pri la plej bonaj aferoj. Antaŭjuĝoj de la rutino, materiala intereso, egoismo, blindeco de la fanatikeco, fieraj pasioj, estas ja montoj, barantaj la vojon al iu ajn, kiu laboras por la progreso de la homaro. Fortika fido donas persistemon, energion kaj rimedojn, por venki la barojn, ĉe la malgrandaj, same kiel ĉe la grandaj aferoj; la ŝanceliĝanta fido naskas la necertecon, la hezitadon, el kiu profitas la homoj, kiujn oni volas kontraŭbatali; ĝi ne serĉas la rimedojn, por venki, ĉar ĝi ne kredas sian venkon.

3. En alia senco oni nomas fido la sendubecon pri la plenumiĝo de iu afero, la certecon pri la trafo al difinita celo. Ĝi havigas ian mensklarecon, kiu ebligas vidi, en penso, la celon, kiun oni deziras atingi, kaj la rimedojn por tien alveni, en tia maniero, ke tiu, kiu ĝin posedas, marŝas, por tiel diri, per firmaj paŝoj. En ambaŭ okazoj ĝi povas fari la homon kapabla por grandaj aferoj.

La fido sincera kaj vera estas ĉiam trankvila; ĝi donas paciencon, kiu scias atendi, ĉar, apogante sin sur la intelekto kaj la kompreno pri l' aferoj, ĝis estas certa, ke ĝi atingos sian celon; la dubanta fido sentas sian propran malfortecon; kiam ĝin instigas ia intereso, ĝi furioziĝas kaj kredas, ke perforto povas anstataŭi la mankantan forton. La trankvileco en la lukto estas ĉiam signo de forto kaj konfido; kontraŭe, la perforto estas pruvo de malforteco kaj dubo pri si mem.

4. Estas necese ne konfuzi fidon kun tromemfido. La vera fido estas alligita al humileco; kiu ĝin posedas, tiu pli fidas al Dio, ol al si mem, ĉar li scias, ke, simpla

instrumento de la Dia volo, li nenion povas sen Dio; tial la bonaj Spiritoj venas helpi lin. La tromemfido estas malpli fido ol fiero, kaj fiero estas ĉiam pli malpli baldaŭ punata per elreviĝoj kaj malsukcesoj.

5. La povo de la fido elmontriĝas, en rekta kaj speciala maniero, ĉe la magnetisma agado; per ĝi la homo agas sur la fluidaĵon, universalan aganton; li modifas la kvalitojn de tiu fluidaĵo kaj donas al ĉi tiu ian impulson, por tiel diri, nekontraŭstareblan. Tial la homo, kiu, al granda natura emanpovo aldonas ardan fidon, kapablas per sia sola volo, direktata al la bono, fari tiujn strangajn fenomenojn de resanigo kaj aliajn, kiuj iam estis rigardataj kiel mirakloj kaj kiuj estas tamen nur sekvoj de natura leĝo. Jen, kial Jesuo diris al siaj apostoloj: vi ne resanigis lin nur tial, ke vi ne havas fidon.

## La religia fido. Kondiĉoj de la neskuebla fido

6. El religia vidpunkto, "fido" estas la kredo je specialaj dogmoj, kiuj formas la diversajn religiojn; ĉiuj religioj havas siajn apartajn sanktajn dogmojn. En tiu senco, la fido povas esti *rezonata* aŭ *blinda*. La blinda fido nenion ekzamenas, akceptas sen ia kontrolo tiel la falsajn, kiel la verajn asertojn, kaj ĉe ĉiu paŝo kolizias kun la evidenteco kaj la racio; troigite, ĝi naskas *fanatikecon*. Se la fido baziĝas sur eraro, pli malpli baldaŭ ĝi disruiniĝas; la fido, havanta kiel fundamenton la veron, estas la sola, kiu certigas la estontecon, ĉar ĝi neniel povas timi la progreson de la homa sciado, konsiderante, ke tio, *kio estas vera en mallumo, estas tia ankaŭ en plena lumo*. Ĉiu religio arogas al si ekskluzivan posedon de la vero; *rekomendi blindan fidon je difinita dogmo estas konfesi propran nekapablon pruvi sian pravecon.*

7. Oni ordinare diras, ke *fido ne povas esti preskribata*, kaj tial multaj personoj diras, ke ili ne kulpas pri sia manko de fido. Sendube, la fido ne estas io preskribebla, kaj, des malpli, io *trudebla*. Ne, ĝi ne estas io preskribebla, sed akirebla, kaj al neniu homo ĝia posedo estas malpermesata, eĉ inter la plej malakceptemaj. Ni parolas pri la fundamentaj spiritaj veraĵoj, ne pri ia aŭ ia alia aparta kredo. La devo de la renkontiĝo ne koncernas la fidon, sed la homojn, kaj, se ĉi tiuj ĝin sincere serĉos, ili ĝin nepre trovos. Estu certaj do, ke tiuj, kiuj diras: "Nenion alian ni pli multe dezirus ol kredi, sed ni ne povas", tion diras el la lipoj, ne el la koro, ĉar tion dirante, ili fermas al si la orelojn. Tamen ĉirkaŭ ili pruvoj abundas; kial ili rifuzas vidi tiujn pruvojn? Iuj, pro malŝato; aliaj, pro timo, ke ili devos ŝanĝi siajn kutimojn; la plimulto, pro fiero, kiu malkonsentas rekoni ian superan potencon, ĉar tiam ili devus kliniĝi antaŭ ĝi.

Ĉe iuj personoj la fido ŝajnas iamaniere kunnaskita; fajrero sufiĉas por ĝin elvolvi. Tia kapablo facile asimili la spiritajn veraĵojn estas evidenta signo de antaŭa progreso; ĉe aliaj, kontraŭe, tiuj veraĵoj nur malfacile penetras, signo ne malpli evidenta de nemulte progresinta naturo. La unuaj jam kredis kaj komprenis; ili kunportas, *renaskiĝante*, la intuicion pri tio, kion ili sciis: ilia edukado estas elfarita; la duaj devas ĉion lerni: ilia edukado estas farota; sed ĝi ja fariĝos, kaj se ĝi ne estos plenfinita dum ĉi tiu ekzistado, ĝi estos en alia.

La kontraŭstaro de la nekredanto, ni konsentu, ofte dependas malpli de li, ol de la maniero, kiel la aferoj estas prezentataj al li. La fido bezonas ian bazon, kaj tiu bazo estas la perfekta kompreno de tio, je kio oni devas kredi; por kredi ne sufiĉas *vidi*, precipe estas necese *kompreni*. La blinda fido jam ne akordas kun

tiu ĉi jarcento [*]; kaj tio estas des pli vera, ĉar nenio krom la dogmo de la blinda fido naskas hodiaŭ la plej grandan nombron da nekredantoj, ĉar ĝi volas trudi sin kaj postulas la rezignon je unu el la plej valoraj rajtoj de la homo: rezonado kaj libera volo. Precipe kontraŭ tiu fido staras la nekredanto, kaj pri ĝi estas prave diri, ke fidon oni ne preskribas; ne akceptante pruvojn, ĝi lasas en la spirito ion neprecizan, kio naskos dubon. La rezonata fido, apogante sin sur la faktoj kaj la logiko, lasas post si nenion malklaran; oni kredas, ĉar oni estas certa, kaj oni estas certa nur tiam, kiam oni komprenas; jen, kial ĝi ne malfortiĝas; ĉar *neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro*.

Al tiu rezultato kondukas Spiritismo, kaj tial ĝi venkas nekredemon ĉiam, kiam ĝi ne renkontas sisteman kontraŭstaron kun ia kaŝita intereso.

## Parabolo de la forvelkinta figarbo

8. *Kaj la morgaŭan tagon, post ilia eliro el Betania, li malsatis. Kaj vidinte el malproksime figarbon havantan foliojn, li aliris, por trovi, se eble, ion sur ĝi; kaj veninte al ĝi, li trovis nenion krom folioj, ĉar la tempo de figoj ankoraŭ ne venis. Kaj responde li diris al ĝi: Neniu por ĉiam manĝu frukton el vi. Kaj aŭdis la disĉiploj.*

*Kaj matene, preterpasante, ili vidis la figarbon forvelkinta de la radikoj. Kaj rememorinte, Petro diris al li: Rabeno, jen forvelkis la figarbo, kiun vi malbenis. Kaj responde Jesuo diris al ili: Havu fidon al Dio. Vere mi diras al vi: Se iu diros al ĉi tiu monto: Estu formovita kaj ĵetita en la maron, kaj ne dubos en sia koro, sed kredos, ke okazos tio, kion li diras, tiu ĝin havos.* (Marko, 11:12-14 kaj 20-23.)

---

[*] La XIX jarcento, kiam vivis Allan Kardec. — **La Trad.**

9. La forvelkinta figarbo estas simbolo de la personoj, kiuj nur ŝajnigas inklinon al bonfaro, sed kiuj vere nenian bonon praktikas; ili estas oratoroj, kies parolo havas pli da brilo ol da solideco kaj havas simplan supraĵan briltegon: ĝi plaĉas al la orelo, sed ĝin esplorante, oni trovas en ĝi nenion substancan por la koro; aŭdinte ilian parolon, oni demandas sin, kian profiton ĝi portis.

Ĝi estas ankaŭ la emblemo de ĉiuj personoj, kiuj, havante rimedojn por esti utilaj, tamen ne estas tiaj; kaj simbolo de ĉiuj utopioj, de ĉiuj vantaj sistemoj, de ĉiuj doktrinoj sen solida bazo. Plej ofte mankas la vera fido, la fido fekunda, la fido, kiu skuas la fibrojn de la koro, unuvorte la fido formovanta montojn. Tiuj estas arboj, kiuj havas foliojn, sed ne fruktojn; tial Jesuo kondamnas ilin al senfrukteco, ĉar venos tago, kiam ili forvelkos ĝis la radikoj; tio estas, ĉiuj sistemoj, ĉiuj doktrinoj, kiuj portos nenian bonon al la homaro, falos en la nenion; ĉiuj homoj memvole senutilaj, ĉar ili ne utiligis siajn kunnaskitajn rimedojn, estos traktataj kiel la forvelkinta figarbo.

10. La mediumoj estas la interpretantoj de la Spiritoj; ili pruntedonas la materiajn organojn, mankantajn al la Spiritoj, por ke ĉi tiuj transdonu al ni siajn instruojn; tial ili estas naturdotitaj per kapabloj por tiu celo. En la nunaj tempoj de socia renovigo la mediumoj havas specialan mision; ili estas arboj, destinitaj doni spiritan nutraĵon al siaj fratoj; ili troviĝas ĉie, en ĉiuj landoj, en ĉiuj sociaj klasoj, inter riĉaj kaj malriĉaj, ĉe grandaj kaj malgrandaj, por ke nenie ekzistu sendotuloj, kaj por pruvi al la homoj, ke *ĉiuj estas vokataj*. Sed, se ili deturnas de ĝia providenca celo la altvaloran kapablon al ili donitan, se ili ĝin uzas por aferoj frivolaj aŭ malutilaj, se ili ĝin metas en la servon de materiaj interesoj, se anstataŭ sanigaj ili donas

malsanigajn fruktojn, se ili rifuzas fari ĝin utila al aliaj, se ili ne ĉerpas el ĝi profitojn por sia propra pliboniĝo, tiam ili similas la senfruktan figarbon; Dio deprenos de ili kapablon, kiu fariĝis senutila en iliaj manoj: la semon, kiun ili ne scias fruktigi, kaj lasos ilin esti turmentataj de malbonaj Spiritoj.

## INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

### La fido, kiel patrino de l' espero kaj de la karito

11. Por esti fruktodona, la fido devas esti aktiva; ĝi ne devas rigidiĝi. Patrino de ĉiuj virtoj, kondukantaj al Dio, ĝi devas atente prigardi la elvolviĝon de la filinoj, kiujn ĝi naskas.

Espero kaj karito estas sekvoj de fido; tiuj tri virtoj estas nedisigebla triopo. Ĉu ne la fido havigas la esperon, ke estos plenumitaj la promesoj de la Sinjoro? ĉar se vi ne havas fidon, kion vi atendas? Ĉu ne la fido donas amon? ĉar, se vi ne havas fidon, kian dankon vi havas kaj, sekve, kian amon?

Supera inspiro de Dio, la fido vekas ĉiujn noblajn instinktojn, kiuj kondukas la homon al la bono; ĝi estas la bazo de la sinkorektigo. Estas necese do, ke tiu bazo estu fortika kaj daŭra, ĉar, se ia eĉ malgranda dubo ĝin ŝancelos, kio fariĝos el la domo, kiun vi konstruos sur ĝi? Konstruu do tiun domon sur neskueblaj fundamentoj; via fido estu pli forta, ol la sofismoj kaj mokoj de nekredantoj, ĉar fido, kiu ne alfrontas la mokojn de la homoj, ne estas vera fido.

Sincera fido estas entuziasmiga kaj facile komunikebla; ĝi komunikiĝas al la homoj, kiuj ne havis ĝin aŭ eĉ ne volis ĝin havi; ĝi trovas konvinkajn parolojn, kiuj trafas la animon, dum la ŝajna fido havas nur belsonajn parolojn, kiuj lasas la aŭskultantojn malvarmaj

kaj indiferentaj. Prediku per la ekzemplo de via fido, por el ĝi doni iom al la homoj; prediku per la ekzemplo de viaj agoj, por vidigi al la homoj la meriton de la fido; prediku per via firma espero, por ke la homoj konstatu la fidon, kiu faras la homon forta kaj preta alfronti ĉiajn alternaĵojn de la vivo.

Havu do fidon je ĉio, kion ĝi havas belan kaj bonan, laŭ ĝia pureco, laŭ ĝia racieco. Ne akceptu la fidon sen kontrolo, blindan filinon de la blindeco. Amu Dion, sed sciu, kial vi Lin amas; kredu al Liaj promesoj, sed sciu, kial vi kredas; sekvu niajn konsilojn, sed komprenu la celon, kiun ni montras al vi, kaj la rimedojn, kiujn ni alportas al vi, por ke vi ĝin atingu. Kredu kaj esperu, neniam malfortiĝante: la mirakloj estas verkoj de la fido. (*Jozefo*, Protektanta Spirito. Bordeaux, 1862.)

## La dia fido kaj la homa fido

12. La fido estas en la homo denaska sento pri liaj estontaj destinoj; ĝi estas la konscio, kiun li havas pri la vastegaj kapabloj, kies ĝermo estas deponita en li, unue en latenta stato, kaj kiujn li devas elvolvi kaj grandigi per agado de sia volo.

Ĝis nun la fido estas komprenata nur el la religia flanko, ĉar la Kristo ĝin rekomendis kiel potencan levilon kaj oni vidas en li nur ĉefon de religio. Sed la Kristo, kiu faris materiajn miraklojn, montris per tiuj samaj mirakloj, al kio kapablas homo, havanta fidon, tio estas la *firman decidon voli*, kaj la certecon, ke tiu volo povas ja plenumiĝi. Ĉu ankaŭ la apostoloj, laŭ la ekzemplo de la Majstro, ne faris miraklojn? Nu, kio alia estis tiuj mirakloj, ol naturaj efikoj, kies kaŭzo estis nekonata de la tiamaj homoj, sed kiuj hodiaŭ estas grandparte klarigitaj kaj baldaŭ plene komprenitaj per la studado de Spiritismo kaj magnetismo?

La fido estas homa aŭ dia, laŭ tio, ĉu la homo aplikas siajn kapablojn al surteraj bezonoj aŭ al siaj ĉielaj kaj estontaj aspiroj. Genia homo, kiu celas la efektivigon de granda entrepreno, sukcesas, se li havas fidon, ĉar li sentas en si, ke li povas kaj devas sukcesi, kaj tiu certeco donas al li grandegan forton. Virta homo, kiu, kredante je sia ĉiela estonteco, volas plenigi sian vivon per noblaj kaj belaj agoj, ĉerpas el sia fido, el la certeco pri la feliĉo, lin atendanta, la necesan forton, kaj ankaŭ ĉi tie plenumiĝas mirakloj de karito, de sindonemo kaj de abnegacio. Fine, kun fido neniaj malbonaj inklinoj ekzistas, kiujn oni ne sukcesas venki.

La magnetismo estas unu el la plej grandaj pruvoj de la povo de l' aganta fido; per nenia alia rimedo, krom per la fido, ĝi resanigas kaj okazigas la strangajn fenomenojn, iam prenatajn por mirakloj.

Mi ripetas: la fido estas *homa* kaj *dia*; se ĉiuj enkarniĝintoj estus vere konvinkitaj pri la forto, kiun ili kunportas, kaj se ili volus meti sian volon je la servo al tiu forto, ili estus kapablaj plenumi tion, kion ĝis nun ili nomas mirakloj kaj kio tamen estas nur disvolviĝo de la homaj kapabloj. (*Protektanta Spirito*. Parizo, 1863.)

## ĈAPITRO XX

# LA LABORISTOJ DE LA LASTA HORO

**Instruoj de la Spiritoj**: La lastaj estos unuaj. Misio de la Spiritistoj. La laboristoj de la Sinjoro.

1. *Ĉar la regno de la ĉielo similas al domomastro, kiu eliris frumatene, por dungi laboristojn por sia vinberĝardeno. Kaj kontraktinte kun la laboristoj po unu denaro por la tago, li ilin sendis en sian vinberejojn. Kaj elirinte ĉirkaŭ la tria horo, li vidis aliajn starantajn senokupe sur la placo; kaj li diris al ili: Vi ankaŭ iru en la vinberejojn, kaj kiom estas justa, tiom mi donos al vi. Kaj ili iris. Denove elirinte ĉirkaŭ la sesa horo kaj la naŭa, li agis simile. Kaj elirinte ĉirkaŭ la dek-unua horo, li trovis aliajn starantajn; kaj li diris al ili: Kial vi staras ĉi tie senokupe la tutan tagon? Ili diris al li: Ĉar neniu nin dungis. Li diris al ili: Vi ankaŭ iru en la vinberejojn. Kaj kiam vesperiĝis, la sinjoro de la vinberejo diris al sia administranto: Alvoku la laboristojn kaj donu al ili la salajron, komencante de la lastaj ĝis la unuaj. Kaj venis tiuj, kiuj estis dungitaj ĉirkaŭ la dek-unua horo, kaj ili ricevis po unu denaro. Kaj kiam la unuaj venis, ili supozis, ke ili ricevos pli; kaj ili ankaŭ ricevis po unu denaro. Kaj tion ricevinte ili murmuris kontraŭ la domomastro, dirante: Tiuj lastaj laboris nur unu horon, kaj vi faris ilin egalaj kun ni, kiuj elportis la ŝarĝon de la tago kaj la varmegon. Sed li responde diris al unu el ili: Amiko, mi ne faras al vi maljustaĵon; ĉu vi ne kontraktis kun mi po unu denaro? Prenu do la vian kaj foriru; mi volas doni al ĉi tiu lasta tiel same, kiel al vi. Ĉu ne estas*

*permesate al mi, fari kun la mia tion, kion mi volas? Aŭ ĉu via okulo estas malbona tial, ke mi estas bona? Tiel la lastaj estos unuaj, kaj la unuaj estos lastaj.* (Mateo, 20:1-16. Vidu ankaŭ: "Parabolo de l' edziĝa festo", ĉap. XVIII, § 1.)

INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

## La lastaj estos unuaj

2. La laboristoj de la lasta horo havas rajton al la salajro, sed estas necese, ke lia bonvolo estu teninta lin je la dispono de la mastro, kiu devis lin dungi, kaj ke tiu malfruo ne estu frukto de lia maldiligenteco aŭ malbonvolo. Li rajtas la salajron, ĉar ekde la tagiĝo, li senpacience atendis tiun, kiu, fine, vokis lin al la laboro; li estis laborema, kaj al li mankis nur laboro.

Sed, se li estus rifuzinta la laboron en ĉiu horo de la tago; se li estus dirinta: "Ni paciencu, la ripozo plaĉas al mi; kiam sonos la lasta horo, jen la okazo, por pensi pri la salajro de la tago; ĉu mi ĝenu min pro mastro, kiun mi ne konas, kiun mi ne amas; ju pli malfrue, des pli bone!", tiu, miaj amikoj, ricevus ne salajron de laboristo, sed de la mallaboremo.

Kio okazos do al tiu, kiu, anstataŭ resti simple neaktiva, uzis por kulpaj agoj la horojn difinitajn por la taglaboro; kiu blasfemis kontraŭ Dio, verŝis sangon de siaj fratoj, ĵetis malordon en la familiojn, ruinigis homojn konfidintajn al li, ekspluatis aliulan naivecon; kiu, fine, satiĝis per ĉiaj malvirtoj de la homaro? kio okazos al tiu? Ĉu sufiĉos al li diri en la lasta horo: "Sinjoro, mi misuzis mian tempon; prenu min ĝis la fino de la tago, por ke mi faru iom, kvankam tre malmulte, de mia tasko, kaj donu al mi la saljron de la bonvolema laboristo"? Ne, tute ne; la mastro diros al li: "Mi havas nun nenian laboron por ci; ci disperdis cian tempon; ci

forgesis, kion ci lernis, ci ne povas plu labori en mia vinberĝardeno. Rekomencu do lerni, kaj kiam ci estos pli bone preparita, revenu al mi, mi malfermos al ci mian vastan kampon, kaj ci povos tie labori en iu ajn horo de la tago."

Bonaj spiritistoj, miaj tre amataj, vi ĉiuj estas laboristoj de la lasta horo. Tre fiera estus tiu, kiu dirus: "Mi komencis la laboron ĉe tagiĝo kaj ĝin finos nur ĉe la sunsubiro." Vi ĉiuj venis, kiam vokitaj, iuj iom pli frue, iuj iom pli malfrue, en enkarniĝon, kies katenon vi trenas; sed ekde kiom da jarcentoj la mastro vin vokadis por sia vinberejo kaj vi ne volis tien eniri! Nun, jen la momento ricevi la salajron; uzu bone tiun ĉi restantan horon, kaj neniam forgesu, ke via ekzistado, kiom ajn longa ĝi povas ŝajni al vi, estas nur preterfluganta momento en la supermezureco de la tempoj, kiuj formas por vi la eternecon. (*Constantin*, Protektanta Spirito. Bordeaux, 1863.)

3. Jesuo amis la simplecon de la simboloj, kaj, laŭ lia energia parolo, la laboristoj, venintaj en la unua horo, estas Moseo, la profetoj kaj ĉiuj iniciatintoj, kiuj distingigis la stadiojn de la progreso kaj kiujn, tra la jarcentoj, sekvis la apostoloj, la martiroj, la Patroj de l' Eklezio, la scientistoj, la filozofoj kaj, fine, la spiritistoj. Ĉi tiuj, laste venintaj, estas anoncitaj kaj antaŭviditaj ekde l' aŭroro de la Mesio, kaj ricevos la saman rekompencon; kion mi diras? pli altan rekompencon. Postveninte, la spirististoj profitas la intelektajn laborojn de siaj antaŭuloj, ĉar la homo devas heredi de la homo, kaj iliaj laboroj kaj ties rezultatoj estas kolektivaj: Dio benas la solidarecon. Cetere multaj inter ili revivas hodiaŭ aŭ revivos morgaŭ, por fini iun laboron iam komencitan; pli ol unu patriarko, pli ol unu profeto, oli ol unu disĉiplo de la Kristo, pli ol unu propagandanto

de la kristana kredo troviĝas inter ili, sed nun ili estas pli kleraj, pli progresintaj, kaj laboras, jam ne ĉe la bazo, sed ĉe la kapitelo de la konstruaĵo; ilia salajro estos do proporcia al la merito de la laboro.

La reenkarniĝo, tiu bela dogmo, eternigas kaj precizigas la spiritan devenon. Vokate raporti pri sia surtera komisio, la Spirito komprenas la kontinuecon de la tasko interrompita, sed ĉiam reprenata; li vidas sentas, ke li kaptis preterpase la penson de siaj antaŭuloj; li reeniras en la arenon, maturita per la sperto, por progresi plu; kaj ĉiuj, laboristoj de l' unua kaj de la lasta horo, kun okuloj klarigitaj pri la profunda justeco de Dio, ne plu murmuras, sed adoras.

Jen unu el la veraj sencoj de tiu parabolo, kiu enhavas, same kiel ĉiuj, kiujn Jesuo adresis al la popolo, la ĝermon de l' estonteco, kaj ankaŭ, sub ĉiuj formoj, sub ĉiuj figuroj, la elmontron de la mirinda unueco, kiu ligas ĉiujn nunajn estulojn al la pasinteco kaj al la estonteco. (*Henriko Heine*. Parizo, 1863.)

## Misio de la spiristitoj

4. Ĉu vi ne aŭdas jam la muĝadon de l' uragano, kiu forblovos la malnovan mondon kaj enabismigos en la nenion la tutaĵon de la surteraj maljustaĵoj? Ha! gloru la Sinjoron, vi, kiuj metis vian fidon en Lian suverenan justecon kaj kiuj, novaj apostoloj de la fido revelaciita per la superaj profetaj voĉoj, iras prediki la novan dogmon de la *reenkarniĝo* kaj de la hierarkia gradigo de la Spiritoj, laŭ tio, ĉu ili bone aŭ malbone plenumis siajn misiojn kaj eltenis la surterajn provojn.

Ne plu tremu! la langoj el fajro estas super viaj kapoj. Ho veraj adeptoj de Spiritismo, vi estas la elektitoj de Dio! Iru kaj prediku la dian parolon. La horo venis, kiam vi devas oferi al ĝia propagando viajn kutim-

ojn, viajn laborojn, viajn frivolajn okupojn. Iru kaj prediku; la Spiritoj de supre estas kun vi. Certe vi parolos al homoj, kiuj ne volos aŭskulti la voĉon de Dio, ĉar tiu voĉo ilin senĉese admonas al abnegacio; vi predikos neprofitemon al la avaruloj, moderecon al la diboĉuloj, indulgemon al la hejmaj tiranoj kaj al la despotoj; perditaj paroloj, mi scias; sed ne gravas! Vi devas surverŝi per via ŝvito la kampon, kie vi semos, ĉar ĝi fruktodonos kaj produktos nur sub ripetataj frapoj de l' evangeliaj ŝovelilo kaj plugilo. Iru kaj prediku!

Ho, vi ĉiuj, bonfidaj homoj, konsciantaj vian malsuperecon antaŭ la mondoj disŝutitaj en la senlima spaco, iru por sankta milito kontraŭ maljusteco kaj krimo. Iru kaj renversu tiun kulton al la ora bovido, ĉiam pli kaj pli disvastiĝantan. Iru, Dio kondukas vin! Simplaj kaj nekleraj homoj, viaj langoj estos malligitaj kaj vi parolos kiel neniu oratoro parolas. Iru kaj prediku, ĉar la atentaj popolamasoj ricevos kun ĝojo viajn parolojn de konsolo, de frateco, de espero kaj de paco.

Ne gravas la insidoj, kiuj estos ĵetataj sur vian vojon! nur lupoj falos en kaptilojn por lupoj, ĉar la paŝtisto scios defendi siajn ŝafojn kontraŭ la sangavidaj buĉistoj.

Iru, homoj grandaj antaŭ Dio, kiuj, pli feliĉaj, ol Sankta Tomaso, kredas, ne petante vidi, kaj akceptas la faktojn de la mediumeco, eĉ se vi mem ne sukcesis ricevi ilin; iru, la Spirito de Dio kondukas vin.

Marŝu do antaŭen, falango, imponanta pro cia fido! la grandaj batalionoj de nekredantoj fordisiĝos antaŭ ci, kiel la matena nebulo ĉe l' unuaj radioj de la leviĝanta suno.

Fido estas la virto, delokiganta montojn, Jesuo diris al vi; sed pli pezaj, ol la plej pezaj montoj, kuŝas en la koro de la homoj la malpureco kaj ĉiuj malvirtoj naskitaj de la malpureco. Iru do, plenaj de kuraĝo, formovi tiun

monton da maljustaĵoj, kiujn la estontaj generacioj devos koni nur kiel legendon, same kiel vi konas nur tre malprecize la periodon antaŭ la idolana civilizacio.

Ja, moralaj kaj filozofiaj renversegoj estas eksplodontaj en ĉiuj punktoj de la terglobo; la horo alproksimiĝas, kiam la dia lumo aperos sur du mondoj. (*Erasto*, ĝardanĝelo de la mediumo. Parizo, 1863.) (*)

## La laboristoj de la Sinjoro

5. Alproksimiĝas la tempo, kiam realiĝos la aferoj, antaŭdiritaj por la transformiĝo de la homaro; feliĉaj estos tiuj, kiuj estos laborintaj sur la kampo de la Sinjoro kun abnegacio kaj sen alia motivo ol karito! Iliaj labortagoj estos pagitaj centoble pli, ol kiom ili esperis.

---

(*) En la tria franca eldono tiu komunikaĵo ne estas subskribita, sed en la unua eldono ĝi estas subskribita de Erasto, kaj havas pli longan tekston, kies daŭrigo estas jena:

"Iru do kaj portu la dian parolon: al la grandaj, kiuj ĝin malŝatos, al la kleraj, kiuj postulos pruvojn, al la malgrandaj kaj simplaj, kiuj ĝin akceptos; ĉar precipe inter la martiroj de la laboro, de tiu surtera provado, vi trovos fervoron kaj fidon, Iru: ĉi tiuj ricevos kun himnoj de danko kaj laŭdoj al Dio la sanktan konsolon, kiun vi portos al ili, kaj ili mallevos la frunton, dankante Lin pro la surteraj afliktoj al ili destinitaj.

"Via falango armu sin do per decidemo kaj kuraĝo! Ek al la laboro! la plugilo estas preta; la tero atendas; plugu!

"Iru kaj danku Dion pro la glora tasko, kiun Li konfidis al vi; sed atentu, ke inter la vokitoj al Spiritismo multaj devojiĝis; rigardu do vian vojon kaj sekvu la veron.

"**Demando**. — Se multaj, vokitaj al Spiritismo, devojiĝis, per kiu signo ni ekkonos tiujn, kiuj estas sur la bona vojo?

"**Respondo**. — Vi ekkonos ilin laŭ la principoj de la vera karito, kiun ili instruos kaj praktikos. Vi ekkonos ilin laŭ la nombro da afliktitoj, al kiuj ili portos konsolon; vi ekkonos ilin laŭ ilia amo al la proksimulo, laŭ ilia abnegacio, laŭ ilia persona altruismo; vi ekkonos ilin, fine, pro la venko de iliaj principoj, ĉar Dio volas la venkon de Sia leĝo; kiuj sekvas Lian leĝon, tiuj estas Liaj elektitoj kaj Li donos al ili venkon; sed Li detruos tiujn, kiuj falsas la spiriton de tiu leĝo kaj faras ĝin ŝtupo por kontentigi siajn vantamon kaj ambicion."— **La Tradukinto**.

Feliĉaj estos tiuj, kiuj diris al siaj fratoj: "Fratoj, ni kune laboradu kaj ni kunigu niajn klopodojn, por ke la mastro, alveninte, trovu finita la laboron"; ĉar la mastro diros al ili: "Venu al mi, vi, kiuj estas bonaj servantoj, vi, kiuj silentigis viajn ĵaluzojn akj viajn malpacojn, por ke el tio ne venu malutilo en la verkon!" Sed ve al tiuj, kiuj pro siaj malkonsentoj malfruigis la horon de la rikolto; ĉar la ventego venos kaj ilin forportos la ciklono! Ili krios: "Pardonu! Pardonu!" Sed la Sinjoro diros al ili: "Kial vi petas pardonon, vi, kiuj subpremis la malfortulon, anstataŭ lin subteni? Kial vi petas pardonon, vi, kiuj serĉis vian rekompencon en la ĝojoj de la tero kaj en la kontentigo de via fiero? Vi jam ricevis vian rekompencon, kia vi ĝin volis; ne petu pli: la ĉielaj rekompencoj estas destinataj por tiuj, kiuj ne petis la surterajn rekompencon."

Dio faras en la nuna momento la denombradon de Siaj fidelaj servantoj kaj jam markis per Sia fingro tiujn, kies sindonemo estas nur ŝajna, por ke ili ne uzurpu la salajron de la kuraĝaj servantoj, ĉar nur al la homoj, kiuj ne hezitas ĉe sia tasko, Li konfidos la plej malfacilajn postenojn en la granda laboro de rebonigo per Spiritismo. Tiam plenumiĝos tiu ĉi parolo; La unuaj estos lastaj, kaj la lastaj estos unuaj en la regno de la ĉielo!" (*La Spirito de Vero*. Parizo, 1862.)

ĈAPITRO XXI

# ESTOS FALSAJ KRISTOJ KAJ FALSAJ PROFETOJ

Oni konas la arbon laŭ la frukto. Misio de la Profetoj. La miregindaĵoj de la falsaj profetoj. Ne kredu al ĉiu Spirito. **Instruoj de la Spiritoj**: La falsaj profetoj. Karakterizaĵoj de la vera Profeto. La falsaj profetoj en la vaganteco. Jeremia kaj la falsaj profetoj.

## Oni konas la arbon laŭ la frukto

1. *Ĉar ne ekzistas bona arbo, kiu donas putran frukton; nek putra arbo, kiu donas bonan frukton. Ĉar ĉiu arbo estas konata per sia propra frukto. Ĉar el dornarbetoj oni ne kolektas figojn, nek el rubusujo oni rikoltas vinberojn. Bona homo el la bona trezorejo de sia koro liveras bonon, kaj malbona homo el la malbona trezorejo liveras malbonon; ĉar el la abundo de la koro parolas lia buŝo*. (Luko, 6:43-45.)

2. *Gardu vin kontraŭ la falsaj profetoj, kiu venas al vi em ŝafaj feloj, sed interne estas rabemaj lupoj. Per iliaj fruktoj vi konos ilin.* Ĉu el dornarbetoj oni kolektas vinberrojn, aŭ el kardoj figojn? *Tiel ĉiu bona arbo donas bonajn fruktojn, sed putra arbo donas malbonajn fruktojn.* Bona arbo ne povas doni malbonajn fruktojn, nek putra arbo doni bonajn fruktojn. *Ĉiu arbo, kiu ne donas bonan frukton, estas dehakata kaj ĵetata en fajron. Tial per iliaj fruktoj vi konos ilin*. (Mateo, 7:15-20.)

3. *Gardu vin, ke neniu vin forlogu. Ĉar multaj venos en mia nomo, dirante: Mi estas la Kristo; kaj ili forlogos multajn.*

*Kaj multaj falsaj profetoj leviĝos, kaj forlogos multajn. Kaj pro la multobligo de la maljusteco, la amo de la plimulto malvarmiĝos. Sed kiu persistos ĝis la fino, tiu estos savita.*

*Tiam se iu diros al vi: Jen ĉi tie la Kristo, aŭ: Tie; ne kredu; ĉar leviĝos falsaj kristoj kaj falsaj profetoj kaj faros grandajn signojn kaj miraklojn, tiel ke ili forlogus, se eble, eĉ la elektitojn*. (Mateo, 24:4, 5, 11, 12, 13, 23 kaj 24.)

## Misio de la profetoj

4. Oni vulgare atribuas al la profetoj la kapablon diveni la estontecon, kaj tial la vortoj *profetaĵo* kaj *antaŭdiraĵo* fariĝis sinonimaj. En la evangelia senco, la vorto *profeto* havas pli vastan signifon; estas tiel nomata ĉiu sendito de Dio, kun misio instrui la homojn kaj revelacii al ili kaŝitajn aferojn kaj misterojn de la spirita vivo. Iu homo povas do esti profeto kaj ne fari antaŭdirojn; tia komprenis tiun vorton la Judoj en la tempo de Jesuo; tial, kiam ĉi tiu estis kondukita antaŭ la ĉefpastron Kajafas, la Skribistoj kaj la Plejaĝuloj, en kunsido, kraĉis al li sur la vizaĝon, lin pugnofrapis kaj vangobatis, dirante: "Kristo, profetu, kiu cin frapis." Tamen okazis, ke iuj profetoj havis antaŭscion pri l' estonteco, aŭ per intuicio, aŭ per providenca revelacio, por averti la homojn, kaj, ĉar plenumiĝis tiuj antaŭdiroj, la kapablo antaŭdiri la estontecon estis rigardata kiel unu el la karakterizaĵoj de la profeteco.

## La miregindaĵoj de la falsaj profetoj

5. "Leviĝos falsaj kristoj kaj falsaj profetoj kaj faros grandajn signojn kaj miraklojn, tiel ke ili forlogus,

se eble, eĉ la elektitojn." Tiuj paroloj donas la veran sencon de la vorto "miregindaĵo". Laŭ la teologia signifo, la "signoj" kaj mirakloj estas esceptaj fenomenoj, ekster la leĝoj de la naturo. Ĉar la leĝoj de la naturo estas verko ekskluziva de Dio, Li povas sendube nuligi tiujn leĝojn, se tio plaĉas al Li; sed la simpla komuna saĝo diras, ke Li ne povus esti doninta al malsuperaj kaj malvirtaj estuloj povon egalan al la Lia, kaj des malpli la rajton malfari tion, kion Li faris. Ne estas eble, ke Jesuo konfirmis tian principon. Se do, laŭ la senco, kiun oni asignas al tiuj vortoj, la Spirito de malbono havas la povon fari miraklojn tiajn, kiuj trompus eĉ la elektitojn, el tio rezultus, ke li povus fari tion, kion Dio faras, kaj la "signoj" kaj mirakloj ne estas privilegio ekskluziva de la senditoj de Dio kaj nenion pruvas, ĉar nenio distingas la miraklojn de la sanktuloj je la mirakloj de la demono. Oni devas do serĉi pli racian sencon por tiuj paroloj.

Ĉiun fenomenon, kies kaŭzo estas nekonata, la neklera vulgarularo rigardas kiel ion supernaturan, miregigan aŭ miraklan; sed, trovinte ties kaŭzon, oni konstatas, ke la fenomeno, kiel ajn eksterordinara ĝi ŝajnas, estas nenio alia, ol la apliko de iu natura leĝo. Tiel la rondo de la supernaturaj faktoj mallarĝiĝas, laŭmezure kiel la rondo de la scienco kreskas. En ĉiuj tempoj kelkaj homoj ekspluatis, profite por sia ambicio, por siaj interesoj kaj por sia avideco je superregado, iujn sciojn, kiujn ili posedis, por havigi al si la prestiĝon de povo laŭdire superhoma aŭ de supoze dia misio. Tiaj estas la falsaj kristoj kaj la falsaj profetoj; la divastiĝo de la konoj estingas ilian influon, kaj tial ilia nombro malgrandiĝas, laŭmezure kiel la homoj kleriĝas. La fakto realigi tion, kion iuj personoj konsideras mirakloj, neniel estas signo de ia dia misio, ĉar tio povas rezulti el scioj, kiujn ĉiu povas akiri, aŭ de specialaj organismaj kapabloj, kiujn

la plej maldigna povas posedi, same kiel la plej digna. La veran profeton oni ekkonas laŭ signoj pli seriozaj kaj ekskluzive moralaj.

## Ne kredu al ĉiu Spirito

6. *Amataj, kredu ne al ĉuj spirito, sed provu la spiritojn, ĉu ili estas el Dio; ĉar multaj falsaj profetoj eliris en la mondon*. (La Unua Epistolo Ĝenerala de Johano, 4:1)

7. La spiritismaj fenomenoj, anstataŭ tio, ke ili kreditigus la falsajn profetojn, kiel iuj ordinare diras, donas al tiuj la lastan baton. Ne petu do de Spiritismo miraklojn kaj mirindaĵojn, ĉar ĝi formale deklaras, ke ĝi neniel okazigas ilin. Same kiel la fiziko, la ĥemio, la astronomio, la geologio eltrovis la leĝojn de la materia mondo, Spiritismo evidentigas aliajn nekonatajn leĝojn, la leĝojn, kiuj kontrolas la interrilatojn de la korpa kaj spirita mondoj kaj kiuj, same kiel tiuj sciencaj — iliaj pli maljunaj fratinoj — estas ja ankaŭ leĝoj naturaj. Klarigante ian klason da fenomenoj ĝis hodiaŭ ne kompreneblaj, Spiritismo detruas la restaĵon el la regno de la mirindaĵoj. Kiu estus do tentata ekspluati tiujn fenomenojn por sia profito, ŝajnigante, ke li estas mesio de Dio, tiu ne povus longe trouzi la aliulan kredemon kaj estus baldaŭ senmaskigita. Cetere, kiel jam dirite, tiuj fenomenoj solaj nenion pruvas: la misio pruviĝas per moralaj efikoj, kiujn ne estas donite al ĉiu ajn okazigi. Tio estas unu el la rezultatoj de la disvastiĝo de la spiritisma scienco; esplorante la kaŭzon de iuj fenomenoj, ĝi levas la vualon de sur multaj misteroj. Nur la homojn, kiuj preferas mallumon ol lumon, interesas kontraŭbatali ĝin; sed la vero estas kiel la Suno: ĝi disfandas la plej densajn nebulojn.

Spiritismo malkaŝas alian, multe pli danĝeran, kategorion de falsaj kristoj kaj falsaj profetoj, kiuj troviĝas ne inter la homoj, sed inter la elkarniĝintoj: tiaj estas la Spiritoj trompemaj, hipokritaj, fieraj kaj pseŭdo-kleraj, kiuj de la tero pasis al la vaganteco kaj ornamiĝas per respektindaj nomoj, penante, sub tia masko, ke estu akceptataj ofte la plej strangaj kaj absurdaj ideoj. Antaŭ ol la permediumaj rilatoj estis konataj, ili agadis en maniero malpli videbla, per inspirado, per senkonsciaj mediumoj. La nombro da Spiritoj, kiuj en diversaj epokoj, sed precipe en tiuj ĉi lastaj tempoj, prezentis sin kiel iuj el la antikvaj profetoj, kiel la Kristo, kiel Maria, patrino de Jesuo, aŭ eĉ kiel Dio, estas granda. Sankta Johano avertas nin kontraŭ ili, dirante: "Amataj, kredu ne al ĉiu spirito, sed provu la spiritojn, ĉu ili estas el Dio; ĉar multaj falsaj profetoj eliris en la mondon." Spiritismo donas al ni rimedojn por provi ilin, klarigante la signojn, laŭ kiuj oni ekkonas la bonajn Spiritojn; tiuj signoj *estas ĉiam moralaj, neniam materiaj* (*).

Precipe al la maniero distingi inter bonaj kaj malbonaj Spiritoj oni povas apliki jenajn parolojn de Jesuo: "Oni konas la arbon laŭ ĝiaj fruktoj; bona arbo ne povas produkti malbonajn fruktojn, kaj malbona arbo ne povas produkti bonajn fruktojn." Oni juĝas la Spiritojn laŭ la kvalito de iliaj verkoj, same kiel oni juĝas arbon laŭ la kvalito de ĝiaj fruktoj.

## INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

### La falsaj profetoj

Se oni diras al vi: "La Kristo estas tie ĉi", ne iru tien, sed, kontraŭe, gardu vin, ĉar falsaj profetoj

(*) Por distingi la Spiritojn, vidu en **"La Libro de la Mediumoj"** ĉ. 24 kaj sekvantajn.

estos multenombraj. Ĉu vi ne vidas, ke la folioj de la figarbo ekblankiĝas; ĉu vi ne vidas, ke ĝiaj multenombraj burĝonoj atendas la epokon de florado, kaj ĉu la Kristo ne diris al vi: Oni ekkonas la arbon laŭ ĝiaj fruktoj? Se do la fruktoj estas amaraj, konstatu, ke la arbo estas malbona; sed, se ili estas dolĉaj kaj sanigaj, diru: Nenio pura povas veni el malbona fonto.

Tiel vi juĝu, miaj fratoj, ekzamenante la verkojn. Se la homoj, deklarantaj, ke ili ricevis dian povon, montras signojn de ia alta misio, tio estas, se ili posedas en plej alta grado la kristanajn kaj eternajn virtojn: kariton, amon, indulgemon, la bonecon, kiu pacigas ĉiujn korojn; se, por apogi siajn parolojn, ili aldonas faktojn, vi do povos diri: Ĉi tiuj estas ja senditoj de Dio.

Sed malfidu la mielajn vortojn, malfidu la Skribistojn kaj Fariseojn, kiuj en longaj roboj, preĝas sur la publikaj lokoj. Malfidu tiujn, kiuj arogas al si la monopolon de la vero!

Ne, ne, la Kristo ne troviĝas ĉe tiaj homoj, ĉar tiuj, kiujn li sendas, por disvastigi lian sanktan doktrinon kaj revirtigi lian popolon, estas, super ĉio, laŭ la ekzemplo de la Majstro, dolĉaj kaj humilaj laŭ koro; tiuj, kiuj devas per siaj ekzemploj kaj konsiloj savi la homaron, glitantan al pereo kaj vagantan sur tordaj vojoj, estos, precipe, modestaj kaj humilaj. De ĉio, kio montras eĉ atomon da fiero, forkuru, kvazaŭ de infekta lepro, kiu putrigas ĉion, kion ĝi tuŝas. Memoru, ke *ĉiu homo portas sur sia frunto, kaj precipe en siaj agoj, la stampon de sia grandeco aŭ malsupereco*.

Iru do, miaj karaj infanoj, marŝu sen hezitoj, sen kaŝitaj pensoj, sur la benata vojo, kiun vi ekprenis. Iru, iru ĉiam sentime; kuraĝe forigu ĉion, kio povus bari vian marŝon al la eterna celo. Vojaĝantoj, dum tre mallonga tempo vi restos ankoraŭ en la mallumo kaj en la doloroj de la provado, se vi malfermos viajn korojn

al tiu dolĉa doktrino, kiu venas konigi al vi la eternajn leĝojn kaj kontentigi ĉiujn aspirojn de via animo al la nekonataĵo. De nun vi povas korpigi tiujn eterecajn elfojn, kiujn vi ofte vidis preterpasantaj en viaj sonĝoj, kaj kiuj, efemeraj, povis nur ĉarmi vian Spiriton, sed nenion diris al via koro. Nun, miaj amataj, la morto malaperis kaj cedis sian lokon al la lumradia anĝelo, kiun vi konas, al la anĝelo de la revido kaj de la rekuniĝo! Nun, vi, kiuj bone plenumis la taskon komisiitan al vi de la Kreanto, vi nenion pli havas por timi de Lia justeco, ĉar Li estas patro kaj ĉiam pardonas Siajn devojiĝintajn infanojn, kiuj petas favorkorecon. Plue do antaŭeniru senĉese; via devizo estu la devizo de la progreso, de la kontinua progreso en ĉio, ĝis vi fine atingos la feliĉan limon, kie vin atendas viaj amikoj, venintaj pli frue ol vi. (*Ludoviko*. Bordeaux, 1861.)

## Karakterizaĵoj de la vera profeto

9. *Malfidu la falsajn profetojn.* Tiu admono estas utila en ĉiuj tempoj, sed precipe en la momentoj de transiro de unu stato en alian, kiel nun okazas al la homaro, ĉar tiam amaso da ambiciuloj kaj da intrigantoj elpaŝas kiel reformantoj kaj mesioj. Kontraŭ tiuj trompistoj oni devas sin teni en gardo, kaj estas devo de ĉiu honesta homo senmaskigi ilin. Vi sendube demandos, kiel ekkoni ilin; jen iliaj signoj:

La komandon de armeo oni konfidas nur al lerta generalo, kapabla ĝin direkti; ĉu vi kredas do, ke Dio estus malpli prudenta ol la homoj? Estu certaj, ke Li konfidas gravajn misiojn nur al tiuj, kiujn Li scias kapablaj ilin plenumi, ĉar grandaj misioj estas pezaj ŝarĝoj, kiuj subpremus homon tro malfortan por ilin porti. Kiel en ĉiuj aferoj, la instruanto devas scii pli ol la lernanto; por la morala kaj intelekta progresigoj de la

homaro estas bezonaj homoj superaj laŭ intelekto kaj moralo. Tial ĉiam enkarniĝas por tiu celo nur tre progresintaj Spiritoj, jam elprovitaj en antaŭaj ekzistadoj; ĉar, se ili ne estas superaj al la medio, en kiu ili devas agi, ilia agado estos nula.

En vido de tio, vi certe konkludos, ke la vera misiisto de Dio devas pravigi per sia supereco, per siaj virtoj, per sia grandeco, per la rezultato kaj la moraliga influo de siaj laboroj la mision, kiun li arogas al si. Ĉerpu ankaŭ ĉi tiun konsekvencon, ke, se li, pro sia karaktero, pro siaj virtoj, pro sia intelekto, staras malpli alte ol la rolo, kiun li asignas al si, aŭ ol la persono, sub kies nomo li sin ŝirmas, li estas nur histriono malaltranga, kiu ne scias eĉ kopii sian modelon.

Alia konsidero estas, ke la plimulto el la veraj misiistoj de Dio ne ekkonas sin mem kiel misiistojn; ili plenumas tion, al kio ili estas vokitaj, dank'al sia genio helpata de la kaŝita potenco, kiu ilin inspiras kaj direktas sen ilia scio, sed sen ia antaŭstarigita plano. Unuvorte, *la veraj profetoj manifestiĝas per siaj agoj: oni divenas ilin; dum la falsaj profetoj pozas senditojn de Dio*; la unua estas humila kaj modesta; la dua estas fiera kaj tro memfida, parolas arogante kaj, kiel ĉiuj mensogantoj, ŝajnas ĉiam timanta ne esti kredata.

Multaj tiaj trompistoj prezentas sin kvazaŭ la apostoloj de la Kristo, aliaj kvazaŭ la Kristo mem, kaj — kio estas hontinda por la homaro — ili ĉiam trovadis personojn, kiuj bonafide kredis iliajn maldecaĵojn. Tre simpla konsidero tamen devus malfermi la okulojn al la plej blinda, nome ke, se la Kristo reenkarniĝus sur la tero, li venus kun sia tuta povo kaj ĉiuj siaj virtoj, escepte se oni akceptus la absurdon, ke li degeneris; nu, same kiel, se vi forigus eĉ unu solan el la atributoj de Dio, vi jam ne havus Dion, tiel, se vi deprenos unu solan el la virtoj de la Kristo, vi jam ne havos la Kriston. Ĉu la

homoj, kiuj prezentiĝas kiel la Kristo, havas ĉiujn ties virtojn? Jen la demando; rigardu; esploru iliajn pensojn kaj iliajn agojn, kaj vi rekonos, ke al ili mankas precipe la kvalitoj distingantaj la Kriston: la humileco kaj la karito, dum ili havas abunde tion, kion li ne havis: avidecon kaj fieron. Cetere rimarku, ke en la nuna momento, kaj en diversaj landoj, ekzistas pluraj supozitaj Kristoj, same kiel pluraj ŝajnaj Elijaj, Sanktaj Johanoj aŭ Sanktaj Petroj, kaj ke kompreneble ili ĉiuj ne povas esti veraj. Estu certaj, ke tiaj estas homoj, kiuj ekspluatas la kredemecon de aliaj kaj trovas komforte vivi per la kostopago de siaj aŭskultantoj.

Malfidu do la falsajn profetojn, precipe en tempo de renovigado, ĉar multaj trompistoj anoncas sin kiel senditojn de Dio; ili penas, sur la tero, kontentigi sian vantamon; sed terura justeco atendas ilin, pri tio vi povas esti certaj. (*Erasto*. Parizo, 1862.)

## La falsaj profetoj en la vaganteco

10. La falsaj profetoj ne troviĝas nur inter la enkarniĝintoj; ili troviĝas ankaŭ, kaj pli multenombre, inter la fieraj Spiritoj, kiuj ŝajnigante amon kaj kariton, semas malkonkordon kaj malhelpas la laboron por la liberigo de la homaro, barante la vojon per siaj absurdaj sistemoj, kiujn ili akceptigas per siaj mediumoj; kaj por pli efike sorĉi la personojn, kiujn ili volas trompi, por havigi al siaj teorioj pli grandan gravecon, ili senskrupule ornamas sin per nomoj, kiujn la homoj nur respektplene elparolas.

Neniu krom ili mem semas la fermenton de antagonismo inter la grupojn, instigas ĉi tiujn apartiĝi unuj de l' aliaj kaj malfide sin reciproke rigardi. Nur tio sufiĉus por senmaskigi ilin; ĉar, tiel agante, ili mem

plej formale malkonfirmas sian pretendon. Blindaj estas do la homoj, kiuj lasas sin kapti en tian mallertan insidon.

Sed estas multaj aliaj rimedoj por ekkoni ilin. La Spiritoj de l' ordo, pri kiu ili diras, ke ili apartenas al ĝi, devas esti ne nur tre bonaj, sed ankaŭ eminente raciaj. Nu, pasigu iliajn sistemojn tra la kribilo de la racio kaj de la komuna saĝo, kaj vidu, kio restas el tiaj sistemoj. Konsentu do kun mi ke, ĉiufoje, kiam iu Spirito receptas kiel kuracilon kontraŭ la malbonaĵoj de la homaro, aŭ kiel rimedojn por ties transformiĝo, aferojn utopiajn kaj ne efektivigeblajn, infanecajn kaj ridindajn aranĝojn; kiam li formulas ian sistemon kontraŭan al la plej vulgaraj konoj de la scienco, tiu povas esti nur malklera kaj mensogema Spirito.

Aliflanke, konvinkiĝu, ke, se la vero ne ĉiam estas ŝatata de l' individuoj, ĉiam ĝin ŝatas la komuna saĝo de l' amasoj, kaj ankaŭ tio estas ia kriterio. Se du principoj kontraŭdiras unu alian, vi trovos la mezuron de ilia propra valoro vidante, kiu el ambaŭ renkontas pli da eĥoj kaj da simpatioj. Efektive *estus mallogike opinii, ke ia doktrino, kies nombro da membroj malgrandiĝas, estus pli vera ol tiu, kiu vidas senĉese kreskadi la nombron de siaj adeptoj.* Volante, ke la vero venu al ĉiuj, Dio ne enfermas ĝin en limigita rondo; Li ĝin aperigas en malsamaj punktoj, por ke ĉie la lumo estu ĉe la flanko de la mallumo.

Forpelu senkompate ĉiujn tiujn Spiritojn, kiuj prezentas sin kiel ekskluzivaj konsilantoj kaj predikas la dividon kaj la izoliĝon. Ili estas preskaŭ ĉiam vantamaj kaj nebonaj Spiritoj, kiuj penas trudi sin al kredemaj homoj, malavarante troajn laŭdojn al ĉi tiuj, por ilin sorĉi kaj konservi sub sia regado. Ordinare ili estas Spiritoj avidaj je povo kaj kiuj, estinte publikaj aŭ

privataj despotoj dum la vivo, volas ankoraŭ viktimojn, por tirani post la morto. Entute, *malfidu la komunikaĵojn, kiuj portas ian mistikan kaj strangan karakteron, aŭ kiuj ordonas ceremoniojn kaj ekstravagancajn agojn;* en tiaj okazoj, ĉiam ekzistas prava motivo por suspekto.

Aliflanke, estu certaj, ke, kiam iu veraĵo devas esti konigita al la homaro, ĝi estas, por tiel diri, samtempe komunikata en ĉiuj seriozaj grupoj, disponantaj je seriozaj mediumoj, kaj ne en iuj, kun escepto de aliaj. Nenia mediumo estas perfekta, se li estas obsedita, kaj ekzistas evidenta obsedo, kiam iu mediumo kapablas ricevi komunikaĵojn nur de iu difinita Spirito, kiel ajn alta la pozicio, kiun ĉi tiu pretendas. Sekve, ĉiu mediumo, ĉiu grupo, kiuj juĝas sin privilegiitaj per komunikaĵoj, kiujn nur ili povas ricevi, kaj kiuj, aliflanke, submetas sin al agoj, tuŝantaj la limon de superstiĉo, sendube estas sub obsedo el la plej klare karakterizitaj, precipe se la superreganta Spirito pavas kun nomo, kiun ni ĉiuj, Spiritoj kaj enkarniĝintoj, devas honori kaj respekti, kaj ne permesi, ke ĝi estu kompromitita sur ĉiu paŝo.

Estas nediskuteble, ke, metante en la fandujon de la racio kaj de la logiko ĉiujn temojn kaj ĉiujn komunikaĵojn de la Spiritoj, oni facile forĵetos ĉion absurdan kaj eraran. Iu mediumo povas esti sorĉata, iu grupo povas esti trompata; sed la severa kontrolo, farata de aliaj grupoj, la akirita scio, la alta morala aŭtoritateco de la direktantoj de grupoj kaj la komunikaĵoj, ricevitaj per la precipaj mediumoj kaj portantaj la sigelon de logiko kaj aŭtentikeco de la plej bonaj Spiritoj, rapide juĝos laŭmerite tiujn mensogajn kaj ruzajn diktaĵojn, devenantajn de bando da malicaj, trompemaj Spiritoj. (*Erasto,* disĉiplo de Paŭlo, Parizo, 1862.)

(Vidu en la Enkonduko la paragrafon: II. *Universala kontrolo de l' instruado de la Spiritoj.* — Ankaŭ *"La Libro de la Mediumoj", ĉap. XXIII, Pri la obsedo.)*

## Jeremia kaj la falsaj profetoj

11. *Tiele diras la Eternulo Cebaot: Ne aŭskultu la vortojn de la profetoj, kiuj profetas al vi; ili trompas vin; ili predikas vizion de sia koro, sed ne el la buŝo de la Eternulo. Ili diras al Miaj malŝatantoj: La Eternulo diris, ke al vi estos paco; kaj al ĉiu, kiu sekvas la obstinecon de sia koro, ili diras: Ne trafos vin malfeliĉo. Sed kiu staris en la konsilo de la Eternulo, kaj vidis kaj aŭdis Lian vorton? kiu aŭdis Lian vorton kaj komprenis? — Mi ne sendis tiujn profetojn, sed ili mem kuris; Mi nenion diris al ili, tamen ili profetas. — Mi aŭdas, kion diras la profetoj, kiuj en Mia nomo profetas malveraĵon; ili diras: Mi sonĝis, mi sonĝis. Kiel longe tio daŭros en la koro de la profetoj, kiuj profetas malveraĵon, profetas la trompaĵon de sia koro? — Se ĉi tiu popolo aŭ profeto aŭ pastro demandos vin, dirante: Kia estas la ŝarĝo de la Eternulo? tiam diru al ili koncerne la ŝarĝon: Mi forlasos vin, diras la Eternulo.* (Jeremia, 23:16, 17, 18, 21, 25, 26 kaj 33.)

Pri tiu teksto de la profeto Jeremia mi volas paroli kun vi, miaj amikoj. Dio, parolante per la buŝo de tiu profeto, diris: "Ili predikas vizion de sia koro." Tiuj ĉi vortoj klare montras, ke jam en tiu epoko la ĉarlatanoj kaj la ekzaltitoj misuzis sian naturan kapablon profeti kaj ĝin ekspluatis. Ili trompis do la simplan kaj preskaŭ ĉiam blindan fidon de la popolo, antaŭdirante *por mono* bonajn kaj agrablajn aferojn. Tiu speco de trompado estis tre disvastigita ĉe la juda nacio, kaj estas facile kompreni, ke la kompatinda popolo, en sia neklereco, neniel kapablis distingi la bonajn de la malbonaj kaj estis ĉiam pli aŭ malpli trompata de tiuj laŭdiraj profetoj, kiuj estis nur trompistoj kaj fanatikuloj. Nenio estas pli signifa ol jenaj vortoj: "Mi ne sendis tiujn profetojn, sed ili mem kuris; mi nenion diris al ili, tamen ili profetas." Poste Dio diras: "Mi aŭdas, kion diras la profetoj, kiuj en Mia nomo profetas malveraĵon; ili diras:

"Mi sonĝis, mi sonĝis"; Li montris tiel unu el la rimedoj, kiujn ili uzadis por ekspluati la konfidon, kiun oni havis al ili. La popolo, ĉiam kredema, neniel pensis malakcepti la verecon de iliaj sonĝoj aŭ de iliaj vizioj; ĝi trovis tion tre natura kaj ĉiam invitadis siajn profetojn paroli.

Post la paroloj de la profeto, aŭskultu la saĝajn konsilojn de l' apostolo Sankta Johano per jenaj vortoj: "Ne kredu al ĉiu Spirito, sed provu, ĉu la Spiritoj estas el Dio", ĉar el la nevideblaj estuloj ankaŭ iuj plezuras per trompo, kiam ili trovas okazon por tio. La trompitoj, kompreneble, estas la mediumoj, kiuj ne esta sufiĉe singardaj. Sendube tie staras unu el la plej grandaj rifoj, ĉe kiuj multaj pereas, precipe se ili estas novicoj en Spiritismo. Tio estas por ili provado, kiun ili povas venki nur per tre granda singardo. Antaŭ ĉio lernu do distingi la bonajn kaj la malbonajn Spiritojn, por ne fariĝi mem falsaj profetoj. (*Luoz,* protektanta Spirito. Karlsruhe, 1861.)

ĈAPITRO XXII

# NE DISIGU TION, KION DIO KUNIGIS

Nerompebleco de l' edziĝo. Eksedziĝo.

## Nerompebleco de l' edziĝo

1. *Kaj venis al li Fariseoj, provante lin, kaj dirante: Ĉu estas permesate forsendi sian edzinon pro ĉia kaŭzo? Kaj responde li diris: Ĉu vi ne legis, ke en la komenco la Kreinto faris ilin vira kaj virina, kaj diris: Tial viro forlasos sian patron kaj sian patrinon, kaj aliĝos al sia edzino; kaj ili estos unu karno? Sekve ili estas ne du, sed unu karno. Kion do Dio kunigis, tion homo ne disigu. Ili diris al li: Kial do Moseo ordonis doni eksedzigan leteron, kaj forsendi ŝin? Li diris al ili: Moseo, pro la malmoleco de via koro, permesis al vi forsendi viajn edzinojn; sed ne estis tiel de la komenco. Sed mi diras al vi: Kiu forsendos sian edzinon krom pro malĉasteco, kaj edziĝos kun alia, tiu adultas; kaj kiu edziĝas kun la forsenditino, tiu adultas.* (Mateo, 19:3-9. )

2. Nur tio, kio venas de Dio, estas neŝanĝebla; ĉiu verko de homoj spertas ŝanĝojn. La leĝoj de la naturo estas la samaj en ĉiuj tempoj kaj en ĉiuj landoj; sed la homaj leĝoj varias laŭ la tempoj, la lokoj kaj la progreso de l' intelekto. En la edziĝo, estas propre dia nur la kuniĝo de seksoj, por anstataŭado de l' estuloj, kiuj mortas; sed la kondiĉoj, laŭ kiuj fariĝas tiu kuniĝo,

estas tiel homaj, ke en la tuta mondo ne estas du landoj, eĉ en la kristana civilizacio, kie tiuj kondiĉoj estas absolute la samaj, kaj estas neniu lando, kie ili ne ŝanĝiĝis kun la kreskado de la tempo. El tio rezultas, ke laŭ la civila leĝo, kio estas konforma al ĉi tiu en iu lando aŭ iu epoko, tio estas rigardata kiel adulto en alia lando aŭ alia tempo; kaj tiel okazas, ĉar la civila leĝo havas kiel celon kontroli la interesojn de la familioj, kaj tiuj interesoj varias laŭ la moroj kaj la lokaj bezonoj; tiel ekzemple, en iuj landoj nur la religia edziĝo estas laŭleĝa, en aliaj la du edziĝoj estas necesaj, fine en aliaj la civila edziĝo sola sufiĉas.

3. Sed en la kuniĝo de la seksoj, krom la materia dia leĝo, komuna al ĉiuj vivantaj estuloj, ekzistas alia dia leĝo, neŝanĝebla kiel ĉiuj leĝoj de Dio, ekskluzive morala, nome la leĝo de amo. Dio volis, ke la estuloj kuniĝu, ne nur per la ligiloj de la karno, sed ankaŭ per la ligiloj de l' animo, por ke la reciproka amo de la geedzoj transiru al ties infanoj, kaj ke du, anstataŭ unu, amu, zorgu kaj progresigu la naskitojn. Ĉu en la ordinaraj kondiĉoj de l' edziĝo estas kalkulata tiu leĝo de amo? Neniel; oni konsideras ne la amon de du estuloj, kiujn reciproka sento altiras unu al la alia, ĉar plej ofte tiu amo disrompiĝas. Oni ne serĉas la kontentigon de la koro, sed de la fiero, de la vantamo, de l' avideco, unuvorte, de ĉiuj materiaj interesoj; kiam ĉio akordas kun tiuj interesoj, oni diras, ke la edziĝo estas konvena, kaj kiam la sorto favoris la monujojn, oni diras, ke ĝi favoras ankaŭ la kuniĝon de la gejunuloj, kaj do ke ĉi tiuj estos nepre feliĉaj.

Sed nek la civila leĝo, nek la devoj, per kiuj ĝi ŝarĝas la kontraktantojn, povas anstataŭi la leĝon de amo, se tiu ĉi leĝo ne decidas pri l' unuiĝo. El tio rezultas ofte, ke *tiuj, kiujn forto kunigis, disiĝas per si mem*; ke la ĵuro, eldirita apud la altaro, estas trompa ĵuro,

se eldirita kvazaŭ banala formulo; el tio naskiĝas la malfeliĉaj unuiĝoj, kiuj fine fariĝas krimaj, duobla malfeliĉo, kiun oni evitus, se en la kondiĉoj por la edziĝo oni ne forlasus la solan, kio ĝin pravigas antaŭ Dio: la leĝon de amo. Kiam Dio diris: "Vi estos nur unu karno", kaj kiam Jesuo diris: "Vi ne disigu tion, kion Dio kunigis", tion oni devas kompreni pri l' unuiĝoj laŭ la neŝanĝebla leĝo de Dio, kaj ne laŭ la ŝanĝema leĝo de la homoj.

4. Ĉu la civila leĝo estas do superflua kaj oni devus reveni al la edziĝoj laŭ la naturo? Certe ne; la civila leĝo havas kiel celon kontroli la sociajn rilatojn kaj la interesojn de la familioj, laŭ la postuloj de la civilizacio; jen, kial ĝi estas utila, necesa, sed variema; ĝi devas estis antaŭzorgema, ĉar civilizita homo ne povos vivi kiel sovaĝulo; sed nenio, absolute nenio konstraŭtaras al tio, ke ĝi estu konsekvenco de la leĝo de Dio; la malhelpoj al la plenumo de la dia leĝo originas de l' antaujuĝoj, kaj ne de la civila leĝo. Tiuj antaŭjuĝoj, kvankam ankoraŭ tre vivaj, jam perdis multon de sia povo ĉe kleraj popoloj; ili malaperos laŭ la morala progreso, kiu fine malfermos la okulojn al la homoj, por ke ili vidu la sennombrajn malbonaĵojn, kulpojn, eĉ krimojn, rezultantajn el la unuiĝoj faritaj, celante nur la materiajn interesojn; kaj iam oni demandos, ĉu estas pli humane, pli kariteme, pli morale kunforĝi unu al la alia du estulojn, kiuj ne povas vivi kune, ol redoni al ili la liberecon; ĉu la perspektivo de ia nerompebla kateno ne plimultigas la nombron da malregulaj unuiĝoj.

## Eksedziĝo

5. La eksedziĝo estas homa leĝo, celanta disigi laŭleĝe tion, kio estas laŭfakte disigita; ĝi neniel kontraŭas la leĝon de Dio, ĉar ĝi nur korektas tion, kion la

homoj faris, kaj estas aplikebla nur al la okazoj, kiam la leĝo de Dio ne estas konsiderita; se ĝi kontraŭus al tiu ĉi leĝo, la Eklezio mem estus devigita rigardi kiel maljustajn juĝantojn tiujn el siaj ĉefoj, kiuj, per sia propra aŭtoritato kaj en la nomo de la religio, ĉe pluraj okazoj, decidis la eksedziĝon; kaj tiam fariĝus duobla maljustaĵo, ĉar tia decido celis nur materiajn interesojn, ne la kontentigon de la leĝo de amo.

Sed Jesuo mem ne sankciis la absolutan nerompeblecon de l' edziĝo. Ĉu li ne diris: "Moseo, pro la malmoleco de via koro, permesis al vi forsendi viajn edzinojn"? Tio signifas, ke, jam en la tempo de Moseo, ĉar la reciproka amo ne estis la sola kaŭzo de l' edziĝo, la disiĝo povis fariĝi necesa. Sed, li aldonas: "ne estis tiel de la komenco"; tio estas, en la origino de la homaro, kiam la homoj ankoraŭ ne estis malvirtiĝintaj pro egoismo kaj fiero kaj vivadis laŭ la leĝo de Dio, la unuiĝoj, fonditaj sur simpatio, kaj ne sur vantamo, ne okazigis la disiĝon.

Li iras pli malproksimen: li precize difinas la okazon, kiam edzino povas esti forsendata, nome ĉe adulto; nu, adulto ne ekzistas tie, kie regas reciproka kaj sincera amo. Vere li malpermesas al ĉiu viro edziĝi kun forsendita virino, sed oni devas konsideri la morojn kaj la karakteron de la homoj de lia tempo. La Mosea leĝo en tiu okazo ordonis ŝtonmortigon; volante forviŝi barbaran moron, li bezonis tamen starigi ian punon, kaj li ĝin trovis en senhonorigo, kiun kaŭzus la malpermeso je dua edziniĝo. Ĝi estis iamaniere civila leĝo, kiu anstataŭis alian civilan leĝon, sed kiu, kiel ĉiuj leĝoj tiaspecaj, devus submetiĝi al la provilo de la tempo.

ĈAPITRO XXIII

# STRANGA MORALO

Kiu ne malamas sian patron kaj sian patrinon. Forlasi sian patron, sian patrinon kaj siajn infanojn. Lasu al la mortintoj la zorgon enterigi siajn mortintojn. Mi ne venis alporti la pacon, sed la disigon.

## Kiu ne malamas sian patron kaj sian patrinon

1. *Kaj grandaj homamasoj iris kun li, kaj li sin turnis, kaj diris al ili: Se iu venas al mi, kaj ne malamas sian patron kaj sian patrinon kaj sian edzinon kaj siajn infanojn kaj fratojn kaj fratinojn, kaj eĉ ankaŭ sian vivon, li ne povas esti mia disĉiplo. Kiu ne portas sian krucon kaj ne sekvas min, tiu ne povas esti mia disĉiplo. Kiu do el vi ne forlasos ĉiujn siajn posedaĵojn, tiu ne povas esti mia disĉiplo*. (Luko, 14: 25-27 kaj 33)

2. *Kiu amas patron aŭ patrinon pli ol min, tiu ne estas inda je mi; kaj kiu amas filon aŭ filinon pli ol min, tiu ne estas inda je mi*. (Mateo, 10: 37).

3. Iuj vortoj, cetere tre maloftaj, atribuataj al la Kristo, tiel strange kontrastas lian kutiman parolmanieron, ke oni instinkte forpuŝas ilian laŭliteran sencon, sed pro tio la superbeleco de lia doktrino neniom perdas. Liaj vortoj estis skribitaj post lia morto, ĉar, efektive, neniu el la Evengelioj estis redaktita dum la vivo de la Kristo; oni pravas do kredante, ke en tiaj okazoj, kia

ĉi tiu, la fundo de lia penso ne estas tute ĝuste esprimita, aŭ, kio ne estas malpli probabla, ke la origina senco suferis ian ŝanĝon, pasante de unu lingvo en alian. Sufiĉis, ke iu eraro estis farita unu fojon, por tio, ke ĝi estis ripetata de la kopiintoj, kiel ofte okazas al la historiaj faktoj.

La vorto *malamas*, en jena frazo de Sankta Luko: *Se iu venas al mi kaj ne malamas sian patron kaj sian patrinon,* troviĝas en tia okazo; neniu ekpensus atribui ĝin al Jesuo; estus do superflue ĝin diskuti, kaj des malpli peni pravigi ĝin. Unue estus necese scii, ĉu li eldiris ĝin, kaj, se jes, scii, ĉu en la lingvo, en kiu li esprimis sin, tiu vorto havis la saman valoron, kian ĝi havas en la nia. En la jena peco de l' Evangelio laŭ Sankta Johano: "Kiu *malamas* sian vivon en tiu ĉi mondo, tiu konservos ĝin por la eterna vivo", estas certe, ke la diskutata vorto ne esprimas la saman ideon, kian ni alligas al ĝi.

La hebrea lingvo ne estis riĉa kaj havis multajn vortojn plursencajn. Tia, ekzemple, la vorto, uzita en Genezo, kiu esprimas la fazojn de la mondkreado: ĝi estis uzata, ne nur por iu ajn periodo da tempo, sed ankaŭ por la ĝustadira taga rondiro de la tero: tial, poste, ĝi estis tradukita per la vorto *tago*, kaj naskiĝis la kredo, ke la mondo estas farita en sesoble dudek kvar horoj. Tia ankaŭ la vorto, kiun oni uzadis por esprimi *kamelo* kaj *kablo*, ĉar la kabloj estis farataj el haroj de kamelo, kaj kiu estis tradukita per *kamelo* en la alegorio pri la trueto de kudrilo. (Ĉap. XVI, § 2. ) (*)

---

(*) **Non odit** em la latina lingvo, **kaï** aŭ **miseï** em greka, ne signifas **malami**, sed **malpli ami.** Kion esprimas la greka verbo **miseï,** tion la hebrea verbo, kiun Jesuo certe uzis, diras ankoraŭ pli bone; ĝi signifas ne nur **malami,** sed ankaŭ **malpli ami, ne ami same, ne ami iun tiel kiel alian.** Em la siria dialekto, kiun laŭdire Jesuo uzadis plej ofte, tiu signifo estas pli rimarkebla. Ĝuste em ĉi tiu senco estas dirite em "Genezo" (29:30-31):

Cetere oni devas konsideri la kutimojn kaj la karakteron de la popoloj, kiuj influas la propran spiriton de iliaj lingvoj; sen tiu kono la vera senco de iuj vortoj perdiĝas; pasante de unu lingvo en alian, la sama vorto ricevas pli aŭ malpli da energio; ĝi povas esti insulto aŭ blasfemo en unu lingvo, kaj sensignifa en alia, laŭ la ideo, kiun ĝi vekas; en la sama lingvo iuj vortoj perdas sian valoron post kelkaj jarcentoj; tial iu traduko severe laŭvorta ne ĉiam esprimas perfekte la penson, kaj, por esti preciza, oni devas kelkafoje uzi, ne la ĝuste respondajn, sed egalvalorajn vortojn, aŭ ĉirkaŭfrazojn.

Tiuj ĉi rimarkoj trovas sian apartan aplikon en la interpretado de la Sanktaj Skriboj kaj precipe de l' Evangelioj. Se ni ne konsideras la medion, kie Jesuo vivadis, ni povas erari pri la valoro de iuj esprimoj kaj de iuj faktoj, pro la kutimo, kiun ni havas, identigi la aliajn personojn kun ni mem. Ĉiamaniere, ni devas do eviti la modernan sencon, atribuatan al la vorto *malami*, ĉar tiu senco estas kontraŭa al la spirito de l' instruado de Jesuo. (Vidu ankaŭ en la ĉapitro XIV, §§ 5 kaj sekvantajn.)

## Forlasi sian patron, sian patrinon kaj siajn infanojn

4. *Kaj ĉiu, kiu forlasis domojn aŭ fratojn aŭ fratinojn aŭ patron aŭ patrinon aŭ infanojn aŭ kampojn pro mia*

---

"Kaj Jakob envenis ankaŭ al Raĥel, kaj li **amis Raĥelon**, pli ol Lean, kaj li servis ĉe li ankoraŭ aliajn sep jarojn. – Kiam la Eternulo vidis, ke Lea estas **malamata. . . "** Estas evidente, ke la vera senco estas **malpli amata;** kaj tiel oni devas traduki. En pluraj aliaj tekstoj hebreaj, kaj precipe siriaj, tiu sama verbo estas uzata em la senco de **ne ami iun tiel, kiel alian;** estus do sensenĉaĵo traduki ĝin per **malami,** kiu havas alian bone difinitan sencon. La teksto de Sankta Mateo, cetere, tute solvas la malfacilaĵon. (**Rimarko de Pezzani. )**

*nomo, ricevos multoble kaj heredos eternan vivon.* (Mateo, 19: 29)

5. *Kaj Petro diris: Jen ni forlasis niajn propraĵojn, kaj sekvis vin. Kaj li diris al ili: Vere mi diras al vi: Estas neniu, kiu forlasis domon aŭ edzinon aŭ fratojn aŭ gepatrojn aŭ infanojn pro la regno de Dio, kaj kiu ne ricevos multoble en ĉi tiu tempo, kaj en la venonta mondo vivon eternan.* ( Luko, 18: 28-30)

6. *Kaj ankoraŭ alia diris: mi vin sekvos, Sinjoro; sed unue permesu al mi adiaŭi tiujn, kiuj estas en mia domo. Sed Jesuo diris al li: Neniu, metinte sian manon al la plugilo kaj rigardante malantaŭen, taŭgas por la regno de Dio.* (Luko, 9: 61-62)

Ne diskutante pri vortoj, tie ĉi oni devas serĉi la penson, kiu evidente estis jena: "La interesoj de l' estonta vivo pli gravas, ol ĉiaj interesoj kaj ĉiaj konsideroj de la homoj", ĉar tiu ĉi penso estas konsenta kun la esenco de la doktrino de Jesuo, dum la ideo de forlaso de sia familio estus malkonfeso de tiu doktrino.

Cetere, ĉu ni ne havas, sub la okuloj, ekzemplon de aplikado de tiuj maksimoj en la ofero de l' interesoj kaj de la familiaj ligiloj por la patrujo? Ĉu oni riproĉas iun, ke li forlasas sian patron, sian patrinon, siajn fratojn, sian edzinon, siajn infanojn, por marŝi defende de sia lando? Kontraŭe, ĉu oni ne kalkulas kiel meriton, ke li sin forŝiras de la hejma dolĉa komforto, de l' amikaj ĉirkaŭprenoj, por plenumi devon? Ekzistas do iuj devoj, kiuj superas aliajn devojn. Ĉu la leĝo ne trudas al junulino la devon forlasi siajn gepatrojn, por sekvi sian edzon? En la mondo svarmas okazoj, kiam la plej doloraj disiĝoj estas necesaj; sed la amo ne rompiĝas pro tiu; aparteco ne malgrandigas la respekton, nek la prizorgadon, kiujn ŝuldas filo al siaj gepatroj, kaj ankaŭ ne la koralligitecon de gepatroj al siaj filoj. Oni vidas

do, ke, eĉ se akceptitaj laŭvorte, escepte de la vorto *malami*, tiuj vortoj ne estas la neigo de l' instruo, kiu ordonas honori sian patron kaj sian patrinon, nek de la sento de patra amo, kaj des pli prave, se oni prenas ilin laŭ la spirito. Tiuj vortoj celis per hiperbolo montri, kiel grava estas por la homo zorgi pri sia estonta vivo. Cetere ili certe estis malpli tranĉaj ĉe popolo kaj en epoko, kiam, pro la kutimoj, la ligiloj de familio estis malpli fortikaj, ol ĉe civilizacio morale pli progresinta; tiuj ligiloj, pli malfortaj ĉe primitivaj popoloj, streĉiĝas laŭ la elvolviĝo de la sentokapablo kaj de la morala sento. La disiĝo mem estas necesa ankaŭ al la progreso; la familioj estas kiel la rasoj; ili degeneras, se ili kunmiksiĝas, se ili ne estas engreftataj unuj en aliajn; tiu estas natura leĝo en la intereso, tiel de la morala, kiel de la materiala progreso.

La aferoj estas rigardataj tie ĉi nur el surtera vidpunkto; Spiritismo igas nin vidi de pli alte, montrante, ke la veraj ligiloj de amo estas tiuj de la spirito, kaj ne tiuj de la korpo; ke la spiritaj ligiloj ne rompiĝas, ĉu per la disiĝo, ĉu per la morto mem de la korpo; ke ili plifortiĝas en la spirita vivo per la puriĝo de la Spirito: konsola vero, el kiu la homo ĉerpas grandan forton, por elteni la alternaĵojn de la vivo. (Ĉ. IV, § 18; ĉ. XIV, § 8. ).

## Lasu al la mortintoj la zorgon enterigi siajn mortintojn

7. *Kaj li diris al alia: Sekvu min. Sed li diris: Sinjoro, permesu al mi unue iri kaj enterigi mian patron. Sed li diris al li: Lasu la mortintojn enterigi siajn mortintojn; sed vi iru kaj proklamu la regnon de Dio.* (Luko, 9: 59-60).

8. Kion povas signifi ĉi tiuj vortoj: "Lasu la mortintojn enterigi siajn mortintojn?" La antaŭaj konsideroj

montras unue, ke ili ne povas, en la cirkonstancoj, kiam ili estis eldiritaj, esprimi riproĉon al tiu, kiu rigardis kiel devon de fila amo iri enterigi sian patron; sed ili enhavas profundan sencon, kiun nur pli plena konado de la spirita vivo povis komprenigi.

Efektive, la spirita vivo estas la vera vivo; ĝi estas la normala vivo de la Spirito; lia ekzistado sur la tero estas nur provizora kaj pasema; ĝi estas kvazaŭa morto, se komparata kun la brilo kaj aktiveco de la spirita vivo. La korpo esta nenio krom maldelikata vesto, provizore teganta la Spiriton, vera kateno, alkroĉanta lin al la tera servutejo, el kiu li sentas sin feliĉa liberiĝante. La respekto al la mortintoj ne koncernas propre la materion, sed, pro memoro, la forestantan Spiriton; tiu respekto estas simila al tiu, kiun oni havas por la objektoj apartenintaj al li, kiujn li tuŝis kaj kiujn konservas, kiel relikvojn, la personoj koralligitaj al la mortinto. Tiu homo ne povis tion kompreni per si mem; Jesuo instruas al li, dirante: Ne maltrankviliĝu pro la korpo, sed preferinde zorgu la Spiriton; iru instrui la homojn pri la regno de Dio; iru diri al la homoj, ke ilia patrujo estas ne la tero, sed la ĉielo, ĉar nur en la ĉielo estas la vera vivo.

## Mi ne venis alporti la pacon, sed la disigon

9. *Ne supozu, ke mi venis, por enkonduki pacon sur la teron; mi venis, por enkonduki ne pacon, sed glavon. Ĉar mi venis, por kontraŭmeti viron kontraŭ lian patron, kaj filinon kontraŭ ŝian patrinon, kaj bofilinon kontraŭ ŝian bopatrinon; kaj la domanoj de homo estos liaj malamikoj.* (Mateo, 10: 34-36).

10. *Mi alvenis, por ĵeti fajron sur la teron; kaj kion mi volas, se jam ĝi ekbrulis? Sed mi havas bapton, per kiu esti baptita; kaj kiel mi premiĝas, ĝis ĝi estos plenumita!*

*Ĉu vi supozas, ke mi alvenis, por doni pacon sur la tero? Mi diras al vi: Ne, sed pli vere disigon, ĉar de nun estos kvin el unu domo disigitaj, tri kontraŭ du, kaj du kontraŭ tri. Estos disigitaj patro kontraŭ filo, kaj filo kontraŭ patro; patrino kontraŭ filino, kaj filino kontraŭ patrino; bopatrino kontraŭ bofilino, kaj bofilino kontraŭ bopatrino.* (Luko, 12: 49-53).

11. Ĉu vere Jesuo mem, la personigo de la dolĉeco kaj de la boneco, li, kiu ne ĉesis prekidi amon al la proksimulo, ja diris: "Mi venis por enkonduki ne pacon, sed glavon; mi venis por kontraŭmeti viron kontraŭ lian patron, edzon kontraŭ lian edzinon; mi venis por ĵeti fajron sur la teron, kaj mi premiĝas ĝis la tero ekbrulos"? Ĉu tiuj ĉi vortoj ne kontraŭas evidente al liaj instruoj? Ĉu ne estas blasfemo atribui al li la parolon de konkeranto sangavida kaj detruema? Ne, ne estas blasfemo nek kontraŭdiro en tiuj vortoj, ĉar efektive li ilin eldiris, kaj ili atestas lian altan saĝecon; nur la formo iel dubasenca ne precize esprimas lian penson, kaj tial ilia vera senco ne estas ĝuste kaptita. Prenite laŭlitere, tiuj vortoj inklinus ŝanĝi lian ekskluzive pacan mision en mision de konfuzo kaj malkonsento, absurda konsekvenco, kiun la komuna saĝo forpuŝas, ĉar Jesuo ne povus kontraŭdiri sin mem. (Ĉ. XIV, § 6. )

12. Ĉia nova ideo nepre renkontas kontraŭstaron, kaj neniu el ili stariĝas sen bataloj; nu, en tia okazo, la kontraŭstaro estas ĉiam proporcia al la graveco de l' *antaŭviditaj rezultatoj, ĉar, ju pli granda ĝi estas, des pli da interesoj ĝi ofendas.* Se ĝi estas evidente falsa, se oni ĝin juĝas senkonsekvenca, neniu ekscitiĝas; oni lasas ĝin pasi, ĉar oni scias, ke al ĝi mankas vivipovo. Sed se ĝi estas vera, se ĝi ripozas sur solida bazo, se oni ekvidas por ĝi estontecon, ia sekreta antaŭsento avertas la antagonistojn, ke ĝi estas danĝero por ili

kaj por la stato de aferoj, kies konservado interesas ilin; tial ili atakas ĝin kaj ĝiajn partianojn.

La mezuro de la graveco kaj de la rezultatoj de iu nova ideo troviĝas do en la ekscitado, kiun ĝi kaŭzas ĉe sia apero, en la forto de la kontraŭstaro, kiun ĝi naskas, kaj en la grado kaj persistemo de la kolero de ĝiaj kontraŭuloj.

13. Jesuo venis proklami doktrinon, kiu subfosis je la bazo la ekspluatadon, per kiu vivis la Fariseoj, la Skribistoj kaj la pastroj de lia tempo; tial ili mortigis lin, kredante, ke ili mortigos la ideon per la mortigo de la homo; sed la ideo postvivis, ĉar ĝi estis vera; ĝi kreskis, ĉar ĝi estis en la planoj de Dio, kaj, ŝprucinte en nekonata urbeto de Judujo, ĝi iris fiksi sian flagon en la ĉefurbo mem de l' idolana mondo, antaŭ siaj plej kruelaj malamikoj; antaŭ tiuj, kiuj havis plej grandan intereson ĝin kontraŭbatali, ĉar ĝi renversis iliajn centjarajn kredojn, al kiuj multaj el ili estis ligitaj multe pli pro intereso, ol pro konvinko. Tial la plej teruraj luktoj atendis tie la apostolojn; la viktimoj estis nekalkuleblaj, sed la ideo ĉiam grandiĝis kaj fine venkis, ĉar, kiel vero, ĝi estis supera ol ĉiuj antaŭaj veroj.

14. Estas rimarkinde, ke la Kristanismo naskiĝis, kiam la idolanismo agoniis, baraktante kontraŭ la lumo de la racio. La idolanismo estis ankoraŭ praktikata nur pro nura formalaĵo, sed la kredo estis jam malaperinta, nur persona intereso subtenis ĝin. Nu, la intereso estas obstina; ĝi neniam cedas antaŭ la evidenteco; ĝi koleriĝas des pli forte, ju pli nediskuteblaj kaj pli klare pruvantaj ĝian eraron estas la argumentoj, kiujn oni kontraŭmetas al ĝi; ĝi ja scias, ke ĝi eraras, sed tio ĝin ne ŝancelas, ĉar la vera fido ne troviĝas en ĝia animo; kion ĝi plej timas, tio estas lumo, kiu malfermas la okulojn

al blinduloj; kaj tial ĝi alkroĉiĝas al la eraro kaj ĉi tiun defendas.

Ĉu ankaŭ Sokrato ne instruadis doktrinon iamaniere analogan al tiu de la Kristo? Kial do lia doktrino ne sukcesis en tiu epoko, ĉe unu el la plej inteligentaj popoloj de la tero? Tial, ke la tempo ne estis alveninta; li semis sur teron ne plugitan; la idolanismo ankoraŭ ne estis *eluzita*. La Kristo ricevis sian providencan mision en la oportuna tempo. Estas vere, ke multo mankis al la tiutempaj homoj, por ke ili staru sur la alta nivelo de la kristanaj ideoj; sed estis ĉe ili pli ĝenerala kapablo asimili tiujn ideojn; ĉar oni jam eksentis la malplenon, kiun la vulgaraj kredoj lasis en la animo. Sokrato kaj Platono malfermis la vojon kaj antaŭinklinigis la spiritojn. (Vidu, en la Enkonduko, paragrafon IV, *Sokrato kaj Platono, pioniroj de la kristana ideo kaj de Spiritismo.*)

15. Bedaŭrinde la adeptoj de la nova doktrino ne interkonsentis pri l' interpretado de la paroloj de la Majstro, plej ofte vualitaj sub alegorioj kaj figuroj; el tio naskiĝis, jam de la komenco, la multenombraj sektoj, el kiuj ĉiu arogis al si la ekskluzivan posedon de la vero, kaj kiuj dum dek ok jarcentoj ankoraŭ ne povis akordiĝi. Forgesinte la plej gravan el la diaj ordonoj, tiun, el kiu Jesuo faris la bazangulan ŝtonon de sia konstruaĵo kaj la nepran kondiĉon de savo: la kariton, la fratecon kaj la amon al la proksimulo, tiuj sektoj sin reciproke anatemis kaj furiozis unuj kontraŭ aliaj; la pli fortaj frakasis la pli malfortajn kaj ĉi tiujn sufokis en sango, en torturoj, en la flamoj de la punbrulejoj. Venkinte la idolanismon, la kristanoj anstataŭ persekutatoj fariĝis persekutantoj; kun fajro kaj glavo ili marŝis, por starigi la krucon de la Senmakula Ŝafido en la du mondoj. Konstatita estas la fakto, ke religiaj militoj estis la plej kruelaj, ke ili faris pli da viktimoj, ol la politikaj

militoj, kaj en neniu alia estas faritaj tiom da kruelaĵoj kaj barbaraĵoj.

Ĉu kulpa estas la doktrino de la Kristo? Certe ne, ĉar ĝi formale kondamnas ĉian perforton. Cŭ li iam diris al siaj disĉiploj: Iru, mortigu, amase buĉadu, bruligu tiujn, kiuj ne same kredas kiel vi? Ne; li diris al ili la kontraŭon: Ĉiuj homoj estas fratoj, kaj Dio estas suverene favorkora; amu vian proksimulon; amu viajn malamikojn; faru la bonon al viaj persekutantoj. Li diris plu: Kiu mortigos per glavo, tiu pereos per glavo. La respondeco ne estas do de la doktrino de Jesuo, sed de tiuj, kiuj ĝin false interpretis kaj faris el ĝi instrumenton por kontentigo de pasioj; de tiuj, kiuj miskomprenis jenan parolon: "Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo. "

En sia profunda saĝeco, Jesuo antaŭvidis, kio okazos; sed tiuj okazoj estis neeviteblaj, ĉar ili estis esence propraj al la malsupereco de la homa naturo, kiu ne povus subite transformiĝi. La Kristianismo devis ja travivi tiun longan kaj kruelan provadon de dek ok jarcentoj, por montri sian tutan potencon; ĉar, malgraŭ la tuta malbono farita en ĝia nomo, ĝi alvenis pura; neniam oni kulpigis ĝin; la mallaŭdoj falis ĉiam sur tiujn, kiuj misuzis ĝin; ĉe ĉiu ago de netoleremo, oni ĉiam diris: Se la Kristianismo estus pli bone komprenata kaj pli bone praktikata, tio ne okazus.

16. Kiam Jesuo diris: "Ne supozu, ke mi venis, por enkonduki pacon, sed glavon", lia penso estis tiu ĉi:

"Ne supozu, ke nia doktrino stariĝos pace; ĝi kondukos al multmortaj bataloj, havantaj kiel pretekston mian nomon, ĉar la homoj min ne komprenos, aŭ ne volos kompreni; la fratoj, disigitaj per siaj kredoj, eltiros la glavon unu kontraŭ alia, kaj malkonkordo regos inter la membroj de unu sama familio, ne havantaj la saman kredon. Mi venis ĵeti fajron sur la teron por elsarki el

ĝi erarojn kaj antaŭjuĝojn, same kiel oni bruligas kampon, por detrui ĝiajn malutilajn herbojn, kaj urĝas al mi, ke ĝi brulu, por ke la purigo fariĝu plej frue, ĉar el tiu konflikto la vero elvenos kiel triumfinto; post la milito venos la paco; post malamo de la partioj sekvos la universala frateco; post mallumo de la fanatikeco, la lumo de la klarvida kredo. Kiam la kampo estos preparita, tiam mi sendos al vi *la Konsolanton, la Spiriton de Vero, kiu venos restarigi ĉiujn aferojn*, tio estas, kiu komprenigante la veran sencon de miaj paroloj, kiujn tiam la plej sagacaj homoj povos kompreni, metos finon al la fratmortiga lukto, disiganta la filojn de Dio. Fine, lacaj de sencela batalado, kiu kuntrenas nur aflikton kaj portas konfuzon en la sinon de la familioj, la homoj vidos, kie estas iliaj veraj interesoj en tiu ĉi mondo kaj en la alia; ili vidos, sur kiu flanko troviĝas la amikoj kaj la malamikoj de ilia trankvileco. Tiam ĉiuj kolektiĝos sub la sama standardo: la standardo de la karito, kaj la aferoj estos restarigitaj sur la tero laŭ la vero kaj la principoj, kiujn mi instruis al vi. "

17. Spiritismo venas plenumi en la antaŭvidita tempo la promesojn de la Kristo; tamen, ĝi ne povas fari tion, ne detruante la ekscesojn; same kiel Jesuo, ĝi renkontas ĉe siaj paŝoj fieron, egoismon, ambicion, avidecon, blindan fanatikecon, kiuj ĉirkaŭitaj en siaj lastaj reduktoj, provas bari al ĝi la vojon kaj estigas al ĝi malhelpojn kaj persekutojn; ankaŭ ĝi devas do batali; sed la tempo de la luktoj kaj de la sangavidaj persekutoj forpasis; la luktoj, kiujn ĝi devos suferi, estas nur moralaj, kaj ilia fino estas proksima; la unuaj daŭradis jarcentojn: la nunaj daŭros nur kelkajn jarojn, ĉar la lumo, anstataŭ eliri el unu sola fokuso, ŝprucas el ĉiuj punktoj de la globo kaj pli rapide malfermos la okulojn al la blinduloj.

18. Tiujn vortojn de Jesuo oni devas do kompreni rilate al la koleroj, pri kiuj li antaŭvidis, ke lia doktrino ilin kaŭzos, al la nedaŭraj konfliktoj, kiujn ĝi naskos, al la luktoj, kiujn la doktrino tenos antaŭ ol solidiĝi, kiel okazis al la Hebreoj, antaŭ ol ili eniris en la Promesitan Landon, kaj ne kiel ian planon, kiun li faris, por dissemi konfuzon kaj malkonkordon. La malbono venos de la homoj, ne de li. Li similis kuraciston, kiu venas por kuraci, sed kies medikamentoj okazigas sanigan krizon, atakante la infektajn fluidaĵojn de la paciento.

ĈAPITRO XXIV

# NE METU LA LAMPON SUB LA GREN-MEZURILON

La lampo sub la grenmezurilo. Kial Jesuo parolas per paroboloj. Ne iru sur vojon de Nacianoj. Ne la sanuloj bezonas kuraciston. Kuraĝo de la kredo. Porti sian krucon. Kiu volas savi sian animon, tiu ĝin perdos.

## La lampo sub la grenmezurilo. Kial Jesuo parolas per paraboloj

1. *Kiam oni bruligas lampon, oni metas ĝin ne sub grenmezurilon, sed sur la lampingon; kaj ĝi lumas sur ĉiujn, kiuj estas en la domo*. (Mateo, 5:15)

2. *Kaj ekbruliginte lampon, oni ne kovras ĝin per vazo, aŭ forŝovas ĝin sub liton; sed metas ĝin sur lampingon, por ke la enirantoj povu vidi la lumon. Ĉar estas kaŝita nenio, kio ne malkaŝiĝos; kaj ne estas io sekreta, kio ne koniĝos kaj klare elmontriĝos.* (Luko, 8:16-17)

3. *Kaj la disĉiploj venis, kaj diris al li: Kial vi parolas al ili per paraboloj? Kaj li respondis kaj diris al ili: Al vi estas donite scii la misterojn de la regno de la ĉielo, sed al ili ne estas donite.* [(*)] *Ĉar kiu ajn havas, al tiu estos donite, kaj li havos abundon; sed kiu ajn ne havas, for de*

[(*)] En la franca originalo mankas la paragrafo 12. — **La Tradukinto.**

*tiu estos prenita eĉ tio, kion li havas. Tial mi parolas al ili per paraboloj; ĉar vidante, ili ne rimarkas, kaj aŭdante, ili ne aŭdas nek komprenas. Kaj por ili plenumiĝis tiu profetaĵo de Jesaja, kiu diras: — Aŭdante, vi aŭdos, sed ne komprenos; kaj vidante, vi vidos, sed ne rimarkos; ĉar la koro de tiu popolo grasiĝis, kaj iliaj oreloj aŭdas malklare, kaj siajn okulojn ili fermis; por ke ili ne vidu per siaj okuloj, kaj ne aŭdu per siaj oreloj, kaj ne komprenu per sia koro, kaj ne konvertiĝu, kaj Mi ne sanigu ilin.* (Mateo, 13: 10 - 15)

4. Oni miras, aŭdante Jesuon diri, ke oni ne metu la lumon sub la grenmezurilon, dum li senĉese kaŝas la sencon de siaj paroloj sub la vualo de alegorio, kiu ne povas esti komprenata de ĉiuj. Li klarigas sian penson, dirante al siaj apostoloj: "Mi parolas al ili per paraboloj, ĉar ili ne kapablas kompreni iujn aferojn; ili vidas, rigardas, aŭdas kaj ne komprenas; diri ĉion al ili estus senutile por la momento; sed al vi mi diras, ĉar al vi estas donite kompreni tiujn misterojn." Li kondutis al la popolo same, kiel oni traktas la infanojn, kies ideoj ankoraŭ ne estas elvolviĝintaj. Per tio li montras la veran sencon de la maksimo: "Oni metu la lampon ne sub la grenmezurilon, sed sur la lampingon, por ke ĉiuj enirantoj povu vidi ĝin." Tiu maksimo ne signifas, ke oni facilanime diskonigu ĉiajn aferojn; ĉiu instruo devas esti proporcia al la inteligento de tiu, al kiu oni ĝin donas, ĉar kelkajn personojn tro viva lumo duonblindigas, ilin ne prilumante.

Okazas al la homoj ĝenerale tiel, kiel al ĉiu aparta individuo; la generacioj havas sian infanecon, sian junecon kaj sian maturan aĝon; ĉiu afero devas veni siatempe, kaj la grajno semita ekster la oportuna sezono ne fruktodonas. Sed kion la prudento ordonas silenti dumtempe, tio pli malpli baldaŭ estos nepre malkaŝita, ĉar, atinginte ioman gradon da progreso, la homoj per si mem serĉas la vivan lumon; la mallumo pezas sur

ili. Ĉar Dio donis al ili intelekton, por kompreni kaj direkti sin tra l' aferoj de la tero kaj de la ĉielo, tial ili penas rezonadi pri sia kredo; kaj tiam oni devas ne meti la lampon sub la grenmezurilon, ĉar *sen la lumo de la racio, la kredo malfortiĝas.* (Ĉap. XIX, § 7)

5. Se do, per Sia antaŭvidanta saĝeco, la Providenco nur iom post iom konigas la veraĵojn, Li ilin malkaŝas ĉiam laŭgrade, kiel la homaro estas matura por ilin ricevi; Li konservas ilin ne sub grenmezurilo, sed en provizejo; sed la homoj, kiuj posedas tiujn veraĵojn, plej ofte kaŝas ilin antaŭ la vulgarularo, nur celante regi ĉi tiun; ĝustadire, tiuj solaj metas la veran lumon sub la grenmezurilon. Tial ĉiuj religioj havis siajn misterojn, kies ekzamenon ili malpermesis; sed dum tiuj religioj restadis malantaŭe, la scienco kaj la intelekto marŝis kaj deŝiris la misteran vualon; atingite sian plenaĝecon, la vulgarulo volis penetri en la fundon de l' aferoj kaj tiam elpuŝis el sia kredo tion, kio estas kontraŭa al la observado.

Absolutaj sekretoj povas ekzisti neniaj, kaj Jesuo pravas dirante, ke estas nenio sekreta, kio ne estos malkrovita. Ĉio, kio estas kaŝita, estos iam eltrovita, kaj kion la homo ne povas ankoraŭ kompreni sur la tero, tio estos iom post iom senvualigita al li en pli progresintaj mondoj kaj kiam li puriĝos; sur la tero li estas ankoraŭ en nebulo.

6. Oni demandas sin mem, kian profiton la popolo povis tiri el tiu amaso da paraboloj, kies senco restis antaŭ ĝi kaŝita? Estas rimarkinde, ke Jesuo esprimis per paraboloj sian penson nur pri la partoj iel absktrataj de sia doktrino; sed, farinte el la karito por la proksimulo kaj el la humileco la neprajn kondiĉojn de la savo, ĉio, kion li diris pri tio, estas tute klara, difinita kaj sen

dubasenceco. Tiel devis esti, ĉar ĝi estis la kondutregulo, kiun ĉiuj devis kompreni, por povi observi ĝin; tio estis la esenca punkto por la neklera popolamaso, al kiu li limigis sian instruon je la sekvantaj vortoj: "Jen, kio devas esti farata, por gajni la regnon de la ĉielo." Pri l' aliaj partoj li disvolvis sian penson nur al siaj dis-ĉiploj; ĉar ĉi tiuj estis pli progresintaj morale kaj intelekte, Jesuo povis inici ilin en pli abstraktajn veraĵojn; tial li diris: *Kiu ajn havas, al tiu estos donite, kaj li havos abundon.* (Ĉap. XVIII, § 15.)

Tamen eĉ al siaj apostoloj li neprecize klarigis multajn punktojn, kies plena kompreno estis prokrastita ĝis postaj tempoj. Ĝuste tiuj punktoj naskis tiajn diversajn interpretojn, ĝis la momento, kiam unuflanke la scienco kaj aliflanke Spiritismo eltrovis novajn naturajn leĝojn, kiuj klarigis la veran sencon de tiuj punktoj.

7. Spiritismo hodiaŭ ĵetas lumon sur multegon da malhelaj punktoj; tamen ĝi ne prilumas trafe-maltrafe. La Spiritoj agas en siaj instruoj kun mirinda singardo; nur iom post iom kaj sinsekve ili ektraktis da diversajn partojn, nun konatajn, de la doktrino, kaj tiel la ceteraj partoj estos konigitaj, kiam venos la momento por ties eltiro el la ombro. Se ili ĝin komplete prezentus ekde la komenco, ĝi estus komprenebla nur por malgranda nombro; ĝi eĉ timigus tiujn, kiuj ne estis preparitaj por ĝi, kaj tio malhelpus ĝian disvastigon. Tamen, se la Spirtioj ankoraŭ ne ĉion klare eldiras, tio ne signifas, ke en la doktrino ekzistas misteroj rezervitaj al privilegiuloj, nek ke ili metas la lampon sub la grenmezurilon, sed ke ĉiu afero devas veni en sia oportuna tempo. Ili lasas al ĉiu ideo la tempon por maturiĝi kaj disvastiĝi, antaŭ ol prezenti alian, kaj *al la okazaĵoj la tempon, por prepari la akcepton de tiu nova ideo.*

## Ne iru sur vojon de nacianoj

8. *Ĉi tiujn dek du (*la apostolojn*) Jesuo forsendis, kaj ordonis al ili, dirante: Ne iru sur vojon de nacianoj, kaj ne eniru en urbon de Samarianoj; sed iru prefere al la perditaj ŝafoj de la domo de Izrael. Kaj dum vi iros, prediku, dirante: La regno de la ĉielo alproksimiĝis*. (Mateo, 10:5-7.)

9. Jesuo pruvas en multaj okazoj, ke iliaj celoj ne estis ĉirkaŭlimigitaj al la Juda popolo, sed ampleksas la tutan homaron. Se do li diras al siaj apostoloj, ke ili ne iru al la Idolanoj, el tio ne sekvas, ke li malŝatus ties konvertiĝon, kio estus neniel karita konsilo; tiel li ordonis, ĉar la Judoj, kiuj kredis je l' unueco de Dio kaj atendis la Mesion, estis preparitaj, per la leĝo de Moseo kaj per la profetoj, por akcepti lian parolon. Ĉe l' Idolanoj eĉ la bazo mem mankis, ĉio estis farota, kaj la apostoloj ankoraŭ ne estis sufiĉe preparitaj por tia peza tasko; tial li diris al ili: "Iru prefere al la perditaj ŝafoj de la domo de Izrael; tio estas, iru semi en jam plugebligitan grundon; li ja sciis, ke la konvertiĝo de la Nacianoj venos siatempe; poste, efektive, la apostoloj iris starigi la krucon en la centro mem de la Idolanismo.

10. Tiujn parolojn oni povas apliki ankaŭ al la adeptoj kaj propagandistoj de Spiritismo. La sistemaj nekredantoj, la obstinaj mokantoj, la kontraŭuloj kun personaj interesoj rilatas al la spiritistoj same, kiel la ili serĉu do unue prozelitojn inter la bonvolemaj personoj, kiuj deziras la lumon, en kiuj sin trovas fekunda ĝermo, kaj kies nombro estas granda, ne perdante tempon kun homoj, kiuj rifuzas vidi kaj aŭdi, kaj pro fiero des pli firme kontraŭstaras, ju pli ŝatinta ŝajnas ilia

konvertiĝo. Pli bone estas malfermi la okulojn al cent blinduloj, kiuj deziras klare vidi, ol al unu sola, kiu plezuras en mallumo, ĉar tiel oni multe plinombrigas la subtenantojn de l‘ afero. Lasi la aliajn trankvilaj ne estas indiferenteco, sed bona politiko; ilia vico venos, kiam ili estos superregataj de la ĝenerala opinio kaj aŭdos la saman aferon senĉese ripetata ĉirkaŭe; tiam ili kredos, ke ili memvole akceptis la ideon, kaj ne sub la premo de iu individuo. Cetere kelkaj ideoj similas semojn: ili ne povas ĝermi antaŭ la oportuna sezono, kaj nur sur preparita grundo ili ĝermas; tial estas preferinde atendi favoran tempon kaj unue kulturi tiujn jam ĝermantajn, por ne abortigi la aliajn pro troa instigado.

En la tempo de Jesuo, pro la malvastaj kaj materialaj ideoj de l' epoko, ĉiu afero estis ĉirkaŭlimigita kaj okupis apartan lokon; la domo de Izrael estis malgranda popolo; la Nacianoj estis malgrandaj popoloj, ĝin ĉirkaŭantaj; hodiaŭ la ideoj universaliĝas kaj malmateriiĝas. La nova lumo estas privilegio de neniu nacio; kontraŭ ĝi staras neniaj baroj; ĝi havas sian fokuson ĉie kaj ĉiuj homoj estas fratoj. Tiel ankaŭ la Nacianoj jam ne estas iu popolo, sed opinio, kiun oni trovas ĉie kaj kiun la vero iom post iom venkas, kiel Kristanismo venkis la idolanismon.

## Ne la sanuloj bezonas kuraciston, sed la malsanuloj

11. *Kaj dum li sidis ĉe manĝo en la domo, jen multaj impostistoj kaj pekuloj venis kaj sidis tie kun Jesuo kaj liaj disĉiploj. Kaj vidinte tion, la Fariseoj diris al liaj disĉiploj: Kial via instruisto manĝas kun impostistoj kaj pekuloj? Kaj aŭdinte tion, li diris: Ne la sanuloj bezonas kuraciston, sed la malsanuloj.* ( Mateo, 9: 10-12)

12. Jesuo alproksimiĝis precipe al la homoj malriĉaj kaj nefavoritaj de la sorto, ĉar ĉi tiuj plej multe bezonas konsolojn; al la mildaj kaj konfidantaj blinduloj, ĉar ĉi tiuj petas vidkapablon, kaj ne al la fieruloj, kiuj pretendas posedi la tutan lumon kaj nenion bezoni. (Vidu en la Enkonduko la artikolojn *Impostistoj, Pordistoj.*)

Tiu parolo, same kiel tiom da aliaj, trovas sian ĝustan aplikon en Spiritismo. Oni ofte miras, ke mediumeco estas donata al personoj nedignaj, kapablaj ĝin uzi por la malbono; ŝajnas, ke tia altvalora kapablo devus aparteni ekskluzive al la plej meritaj.

Ni diru unue, ke la mediumeco dependas de l' organisma strukturo, kiun ĉiu homo povas posedi, same kiel la kapabloj vidi, aŭdi, paroli. Ĉiujn siajn kapablojn senescepte la homo povas misuzi, dank' al sia libera volo, kaj se Dio donus, ekzemple, la parolon nur al tiuj, kiuj ne kapablas diri malbonajn aferojn, ekzistus pli da multaj, ol da parolkapablaj homoj. Dio donis kapablojn al la homo kaj lasas ĉi tiun libera ilin uzi; sed Li ĉiam punas tiun, kiu ilin misuzas.

Se la povo komunikuĝi kun la Spiritoj estus konsentata nur al la plej dignaj, kiu kuraĝus pretendi ĝin? Cetere, kie la limo de la digno aŭ de la maldigno? La mediumeco estas donata sendistinge, por ke la Spiritoj povu porti lumon en ĉiujn rangojn, en ĉiujn klasojn de la socio, tiel al malriĉulo, kiel al riĉulo; al la saĝaj, por fortikigi ilin ĉe la bono, al la malvirtaj por ilin korekti. Ĉu tiuj ĉi lastaj ne estas la malsanuloj, bezonantaj kuraciston? Kial Dio, kiu ne volas la morton de la pekulo, rifuzus al ĉi tiu la helpon, kiu povas eltiri la homon el la ŝlimejo? La bonaj Spiritoj venas do helpe al la pekulo, kaj iliaj konsiloj, kiujn li ricevas, multe pli vive impresas lin, ol se li ilin ricevus tra nerektaj vojoj. Dio, per Sia boneco, por ŝpari al li la

penon iri malproksimen serĉi la lumon, ĝin metas en lian manon; ĉu li ne estas multe pli kulpa, se li ĝin ne rigardas? Ĉu li povos senkulpiĝi pretekstante nescion, kiam li mem skribis, vidis per siaj okuloj, aŭdis per siaj oreloj, kaj eldiras el sia propra buŝo sian kondamnon? Se li ne profitas, tiam li estos punita per la perdo aŭ difektiĝo de sia kapablo, kiun la malbonaj Spiritoj ekuzas, por lin obsedi kaj trompi, krom per la realaj afliktoj, per kiuj Dio frapas Siajn malindajn servantojn kaj la korojn malmoliĝintajn pro fiero kaj egoismo.

La mediumeco ne signifas nepre kutimajn rilatojn kun superaj Spiritoj; ĝi estas simpla *kapableco*, por servi kiel instrumento pli aŭ malpli fleksebla al la Spiritoj ĝenerale. La bona mediumo ne estas do tiu, per kiu la Spiritoj facile komunikiĝas, sed tiu, kun kiu simpatias la bonaj Spiritoj kaj nur de tiuj ĉi estas helpata. Nur laŭ ĉi tiu senco la eminenteco de la moralaj kvalitoj estas ĉiopova super la mediumeco.

## Kuraĝo de la kredo

13. *Ĉiun do, kiu konfesos min antaŭ la homoj, mi ankaŭ konfesos antaŭ mia Patro, kiu estas en la ĉielo. Sed kiu malkonfesos min antaŭ homoj, tiun mi ankaŭ malkonfesos antaŭ mia Patro, kiu estas en la ĉielo*. (Mateo, 10:32-33)

14. *Ĉar kiu hontos pri mi kaj pri miaj paroloj, pri tiu hontos la Filo de homo, kiam li venos en sia gloro, kaj la gloro de la Patro kaj de la sanktaj anĝeloj.* (Luko, 9:26.)

15. La kuraĝo de la propra opinio estis ĉiam ŝatata de la homoj, ĉar estas merito alfronti danĝerojn, persekutojn, kontraŭdirojn, eĉ simplajn sarkasmojn, al kiuj preskaŭ ĉiam elmetas sin ĉiu, kiu ne timas konfesi ideojn ne komunajn al la publiko. Pri tio, same kiel pri ĉio,

la merito estas proporcia al la cirkonstancoj kaj al la graveco de la rezultato. Estas ĉiam malforteco retroiri antaŭ sekvoj de sia opinio kaj ĉi tiun malkonfesi, sed estas okazoj, kiam tio estas malkuraĝo tiel granda, kiel fuĝi en la momento de la batalo.

Jesuo riproĉas tiun malkuraĝon el la speciala vidpunkto de sia doktrino, dirante, ke, se iu hontos pri liaj paroloj, li ankaŭ hontos pri tiu; ke li malkonfesos tiun, kiu malkonfesos lin; ke, kiu konfesos lin antaŭ homoj, tiun li konfesos antaŭ sia Patro, kiu estas en la ĉielo; alivorte: *kiuj timos konfesi sin disĉiploj de la vero, tiuj ne indas esti akceptataj en la regnon de la vero.* Ili perdos la bonaĵojn de sia kredo, ĉar ĝi estas egoista kredo, kiun ili konservas por si mem, sed kiun ili kaŝas pro timo, ke ĝi portus al ili malprofiton en tiu ĉi mondo; tiuj, kontraŭe, kiuj, metante la veron super siajn materialajn interesojn, ĝin malkaŝe proklamas, laboras samtempe por sia kaj por la estonteco de aliaj.

16. Tion saman ni diras pri l' adeptoj de Spiritismo; ĉar ilia doktrino estas nenio alia, ol la disvolviĝado kaj aplikado de l' Evangelia doktrino, tial al ili ankaŭ aplikiĝas la paroloj de la Kristo. Ili semas sur la tero tion, kion ili rikoltos en la spirita vivo; en ĉi tiu lasta ili rikoltos la fruktojn de sia kuraĝo aŭ de sia malforteco.

### Porti sian krucon. Kiu volos savi sian animon, tiu ĝin perdos

17. *Feliĉaj vi estas, kiam oni vin malamos kaj vin izolos kaj vin riproĉos, kaj elĵetos vian nomon kiel malbonan, pro la Filo de homo. Ĝoju en tiu tago, kaj pro ĝojo saltu, ĉar jen via rekompenco estas granda en la ĉielo; ĉar tiel same faris iliaj patroj kontraŭ la profetoj.* (Luko, 6: 22-23.)

18. *Kaj alvokinte al si la homamason kun siaj disĉipl-oj, li diris al ili: Se iu volas veni post mi, li abnegaciu sin, kaj levu sian krucon, kaj sekvu min. Ĉar kiu volos savi sian animon, tiu ĝin perdos; kaj kiu perdos sian animon pro mi kaj pro la evangelio, tiu ĝin savos. Ĉar kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon kaj perdus sian animon?* (Marko, 8: 34-36; Luko, 9: 23-25; Mateo, 10: 38-39; Johano, 12: 25-26.)

19. Ĝoju, diras Jesuo, kiam la homoj vin malamos kaj vin persekutos pro mi, ĉar vi estos rekompencataj en la ĉielo. Tiujn vortojn oni povas jene traduki: Estu feliĉaj, kiam la homoj, pro sia malbonvolo kontraŭ vi, liveros al vi okazon pruvi la sincerecon de via kredo, ĉar la malbono, kiun ili faras al vi, rezultigos vian profiton. Bedaŭru do ilian blindecon, kaj ne malbenu ilin.

Poste li aldonas: "Kiu volos sekvi min, tiu portu sian krucon", tio estas, li kuraĝe eltenu la ĉagrenojn, kiujn lia kredo portos al li; ĉar, kiu volos savi sian vivon kaj siajn havaĵojn, forlasante min, tiu perdos la favoraĵojn de la regno de la ĉielo, dum tiuj, kiuj ĉion perdos en tiu ĉi mondo, eĉ la vivon, por la venko de la vero, ricevos la premion de sia kuraĝo, de sia per-sistemo kaj de sia abnegacio en la estonta vivo; sed al tiuj, kiuj oferas la ĉielajn bonaĵojn por la surteraj ĝuoj, Dio diras: Vi jam ricevis vian rekompencon.

ĈAPITRO XXV

# SERĈU, KAJ VI TROVOS

Helpu cin mem, la ĉielo cin helpos. Rigardu la birdojn de la ĉielo. Ne afliktiĝu por posedi oron.

## Helpu cin mem, la ĉielo cin helpos

1. *Petu, kaj estos donite al vi;* serĉu, kaj vi trovos; *frapu, kaj estos malfermite al vi; car ĉiu petanto ricevas, kaj la serĉanto trovas, kaj al la frapanto estos malfermite. Plue, kiu homo el vi, kies filo de li petos panon, donos al li ŝtonon; aŭ se li petos fiŝon, donos al li serpenton? Se do vi, estante malbonaj, scias doni bonajn donacojn al viaj filoj, kiom pli certe via Patro, kiu estas en la ĉielo, donos bonaĵojn al tiuj, kiuj petas de Li?* (Mateo, 7:7-11.)

2. El la surtera vidpunkto, la maksimo: *Serĉu, kaj vi trovos,* estas analoga al tiu ĉi: *Helpu cin mem, kaj la ĉielo cin helpos.* Tio estas la principo de la *leĝo de laboro,* kaj sekve de la *leĝo de progreso,* ĉar la progreso estas filo de la laboro, ĉar la laboro ekscitas la aktivecon de l' intelekto.

En la infaneco de la homaro, la homo uzas sian intelekton nur por serĉi nutraĵon, rimedojn por ŝirmi sin kontraŭ veteraj ŝanĝiĝoj kaj por defendi sin kontraŭ malamikoj; sed al li Dio donis plie ion, kion la besto ne posedas, nome: la senĉesan deziron je io pli

bona; tiu deziro pelas lin al la serĉado de rimedoj, por plibonigi sian situacion, kaj instigas lin al eltrovoj, al elpensoj, al la perfektigo de la scienco, ĉar la scienco ja havigas tion, kio mankas al li. Per liaj esploroj lia intelekto kreskas, lia moralo puriĝas; la bezonojn de la korpo sekvas la bezonoj de la spirito; post la materia nutraĵo, li bezonas la spiritan nutraĵon, kaj tiel la homo pasas de la sovaĝeco al la civilizacio.

Sed la progreso, plenumata de ĉiu homo individue, dum la vivo, estas tre malgranda, eĉ nerimarkebla ĉe granda nombro da homoj; kiamaniere do la homaro povus progresi sen antaŭekzistado kaj reekzistado de l' animo? Se la animoj ĉiutage forirus por ne plu reveni, la homaro renoviĝus do senĉese per la primitivaj elementoj, havante ĉion por fari, ĉion por lerni; ne estus do klarigeble, kial la homo estus pli progresinta hodiaŭ, ol en la unuaj aĝoj de la mondo, ĉar ĉe ĉiu naskiĝo la tuta intelekta laboro devus ĉiam denove komenciĝi. Kontraŭe, revenante kun sia jama progreso, kaj ĉiufoje akirante ion plian, la animo pasas iom post iom de la barbareco al la *materiala civilizacio,* kaj de ĉi tiu al *la civilizacio morala.* (Vidu Ĉap. IV, § 17.)

3. Se Dio sendevigus la homon de la korpa laboro, la membroj de la homo atrofiiĝus; se de l' intelekta laboro, la homa spirito restus en sia infaneco, en stato de besta instinkto. Tial Dio trudis al la homo laboron, kiel ion necesan, kaj diris al li: *Serĉu, kaj ci trovos; laboru, kaj ci produktos;* tiamaniere ci estos filo de ciaj verkoj, ci havos la meriton, ke ci estas ilia aŭtoro, kaj ci estos rekompencita laŭ tio, kion ci faris.

4. Aplikante ĉi tiun principon, la Spiritoj ne alkuras mem ŝpari al la homo la laboron de l' esploroj, alportante al li eltrovaĵojn kaj elpensaĵojn plene faritajn kaj pret-

ajn por uzado, en tia maniero, ke li nur devus preni tion, kion oni enmetus en lian manon, sen la peno klini sin por kapti, aŭ eĉ pripensi. Se estus tiel, la plej mallaborema povus riĉiĝi, la plej malklera povus senpene fariĝi klerulo, kaj ambaŭ opinius sin meritaj pri tio, kion ili efektive ne faris. Ne, *la Spiritoj ne venas liberigi la homon de la leĝo de laboro, sed nur montri al li la celon, kiun li devas atingi, kaj la vojon, kiu tien kondukas, dirante al li: Marŝu, kaj ci alvenos.* Ci trovos ŝtonojn sub ciaj piedoj; rigardu, kaj ilin forigu mem; ni donos al ci la necesan forton, se ci volas ĝin uzi. *(La Libro de la Mediumoj,* ĉap. XXVI, § 291 kaj sekvantaj.)

5. El la morala vidpunkto, tiuj paroloj de Jesuo signifas: Petu la lumon, kiu heligus vian vojon, kaj ĝi estos donita al vi; petu forton por malcedi al la malbono, kaj vi ĝin havos; petu helpon de la bonaj Spiritoj, kaj ili venos akompani vin, kaj, kiel la anĝelo de Tobija, ili servos al vi kiel gvidantoj; petu bonajn konsilojn, kaj tiuj ne estos al vi rifuzitaj; frapu nian pordon, ĝi estos al vi malfermita; sed petu sincere, kun fido kaj fervoro; prezentu vin kun humileco, ne kun aroganta mieno, alie vi estos forlasitaj al viaj propraj fortoj, kaj viaj faloj estos la puno por via fiero.

Tia estas la senco de tiuj vortoj: Serĉu, kaj vi trovos; frapu, kaj estos al vi malfermite.

## Rigardu la birdojn de la ĉielo

6. *Ne provizu al vi trezorojn sur la tero, kie tineo kaj rusto konsumas, kaj kie ŝtelistoj trafosas kaj ŝtelas; sed provizu trezorojn en la ĉielo, kie nek tineo nek rusto konsumas, kaj kie ŝtelistoj nek trafosas nek ŝtelas; ĉar kie estas via trezoro, tie estos ankaŭ via koro.*

*Tial mi diras al vi: Ne zorgu pri via vivo, kion vi manĝu, aŭ kion vi trinku; nek pri via korpo, kion vi surmetu. Ĉu la vivo ne estas pli ol nutraĵo, kaj la korpo pli ol vestaĵo?*

*Rigardu la birdojn de la ĉielo, ke ili ne semas, nek rikoltas, nek kolektas en grenejojn, kaj via Patro ĉiela ilin nutras. Ĉu vi ne multe pli valoras ol ili? Kaj kiu el vi per zorgado povas aldoni unu ulnon al sia staturo?*

*Kaj kial vi zorgas pri vestaĵo? Pripensu la liliojn de la kampo, kiel ili kreskas; ili ne laboras, nek ŝpinas; tamen ni diras al vi, ke eĉ Salomono en sia tuta gloro ne estis ornamita, kiel unu el ĉi tiuj. Sed se Dio tiel vestas la kampan herbaĵon, kiu ekzistas hodiaŭ, kaj morgaŭ estas ĵetata en fornon, kiom pli certe Li vestos vin, ho malgrandfiduloj?*

*Tial ne zorgu, dirante: Kion ni manĝu? aŭ: Kion ni trinku? aŭ: Kion ni surmetu? Ĉar pri ĉio tio serĉas la nacianoj; ĉar via Patro ĉiela scias, ke vi bezonas ĉion tion.*

*Sed celu unue Lian regnon kaj Lian justecon, kaj ĉio tio estos aldonita al vi. Tial ne zorgu pri la morgaŭa tago, ĉar la morgaŭa tago zorgas pri si mem.* Sufiĉa por la tago estas ĝia propra malbono. (Mateo, 6:19-21 kaj 25-34.)

7. Prenite laŭlitere, tiuj ĉi vortoj estus deadmono de ĉia antaŭvidemo, de ĉia laboro kaj, sekve, de ĉia progreso. Laŭ tia principo, la homo limigus sin je ia pasiva atendado; liaj korpaj kaj intelektaj fortoj restus neaktivaj; se li farus el tia kondiĉo sian normalan vivon sur la tero, li neniam estus elirinta el la primitiva stato, kaj se li farus el ĝi sian nunan leĝon, li estus devigita al nenio, krom vivi senfare. La penso de Jesuo ne povus esti tia, ĉar ĝi estus kontraŭa al tio, kion li diradis ĉe aliaj okazoj, eĉ al la leĝoj de la naturo. Dio kreis la homon sen vestoj kaj sen ŝirmejo, sed donis al li intelekton, por ke la homo mem ilin fabriku. (Ĉ. XIV, § 6; ĉ. XXV, § 2.)

En tiuj vortoj oni devas do vidi nur poezian alegorion de la Providenco, kiu neniam forlasas la homojn, fidantajn al Li, sed Li volas, ke ili siaflanke laboru. Se Li ne ĉiam venas kun materiala helpo, Li tamen inspiras

la ideojn, per kiuj ili trovus la rimedojn, por eliri el sia embaraso. (Ĉ. XXVII, § 8.)

Dio konas niajn bezonojn kaj provizas laŭnecese; sed la homo, nekontentigebla pri siaj deziroj, ne ĉiam scias kontentiĝi per tio, kion li havas; la necesaĵo ne sufiĉas al li, li bezonas la superfluaĵon; tiam la Providenco lasas lin al si mem; ofte la homo estas malfeliĉa pro sia kulpo mem kaj pro tio, ke li ne aŭskultis la voĉon, kiu avertis lin per lia konscienco; tiam Dio lasas lin suferi la sekvojn, por ke lia malobservo utilu al li estonte kiel leciono. (Ĉ. V, § 4.)

8. La tero produktos sufiĉe por nutri siajn loĝantojn, kiam la homoj scios administri ĝiajn produktaĵojn laŭ la leĝoj de justeco, de karito kaj de amo al la proksimulo. Kiam la frateco regos inter la popoloj, kiel inter la provincoj de unu sama imperio, la momenta superfluaĵo de unu loko provizos la momentan nesufiĉan kvanton de alia, kaj ĉiu havos la necesan. Tiam la riĉulo estos rigardata kvazaŭ homo, posedanta multe da semoj; se li dissemos ilin, ili produktos centoble por li kaj por aliaj; sed se li sola manĝos tiujn semojn kaj malŝparegos kaj perdos la ceterajn, kiujn li ne manĝis, ili nenion produktos kaj ne estos abundo por ĉiuj; se li enfermos ilin en sia grenejo, la vermoj ilin manĝos; tial Jesuo diris: Ne provizu al vi trezorojn sur la tero, ĉar ili pereas, sed provizu al vi trezorojn en la ĉielo, ĉar tiuj estas eternaj. Alivorte, ne donu al la havaĵoj materialaj atenton pli grandan, ol al la spiritaj bonaĵoj, kaj sciu oferi la unuajn por la utilo de la duaj. (Ĉ. XVI, §§ 7 kaj sekvantaj.)

Ne per leĝoj oni dekretas kariton kaj fratecon; se ĉi tiuj ne estas en la koro, egoismo ilin ĉiam sufokos; igi tiujn virtojn penetri en la korojn, jen la tasko de Spiritismo.

## Ne afliktiĝu por posedi oron

9. *Ne provizu oron nek arĝenton nek kupron en viajn zonojn, nek saketon por vojaĝo, nek du tunikojn, nek ŝuojn, nek bastonon; ĉar la laboranto meritas sian nutraĵon.*

10. *Kaj en iu ajn urbo aŭ vilaĝo, en kiun vi eniros, demandu, kiu tie estas inda; kaj loĝu ie, ĝis vi foriros. Kaj venante en la domon, salutu ĝin. Kaj se la domo estas inda, via paco venu sur ĝin; sed se ĝi ne estas inda, via paco revenu al vi. Kaj se iu ne akceptos vin, nek aŭskultos viajn vortojn, tiam forirante el tiu domo aŭ el tiu urbo, deskuu la polvon de viaj piedoj. Vere mi diras al vi: Pli elporteble estos por la lando de Sodom kaj Gomora en la tago de juĝado, ol por tiu urbo.* (Mateo, 10:9-15.)

11. En tiu tempo, nenion strangan havis tiuj ĉi paroloj, kiujn Jesuo diris al siaj apostoloj, kiam li sendis ilin je l' unua fojo por anonci la Bonan Novaĵon; tiuj vortoj estis konformaj al la patriarkaj moroj en Oriento, kie la vojaĝanto estis ĉiam akceptata en la tendon. Sed tiam la vojaĝantoj estis maloftaj; ĉe la modernaj popoloj la kresko de la cirkulado devis krei kutimojn novajn; kutimojn de l' antikva tempo oni trovas nur en malproksimaj regionoj, kien la granda movado ankoraŭ ne penetris; se Jesuo revenus hodiaŭ, li ne povus diri al siaj apostoloj: Vojiru sen provizaĵoj. Krom la ĝusta senco, tiuj paroloj havas ankaŭ moralan sencon tre profundan. Per ili Jesuo instruis siajn disĉiplojn konfidi al la Providenco; cetere, nenion havante, ili ne povus tenti la avidecon de la homoj, kiuj ilin akceptus; tio estis rimedo, por distingi la karitemajn de l' egoistaj; tial li diris: "Demandu, kiu estas inda vin gastigi", tio estas, kiu estas sufiĉe humana, por doni gastigon al vojaĝanto, havanta nenion por pagi, ĉar tiuj estas indaj aŭdi viajn parolojn; laŭ ilia karitemo vi ekkonos ilin.

Pri tiuj, kiuj ne volos ilin akcepti, nek ilin aŭskulti, ĉu li konsilis al siaj apostoloj tiujn malbeni, sin trudi, uzi perforton kaj ĝenon por ties konverto? Ne; tute simple kaj pure, ke ili iru aliloken kaj serĉu pli bonvolemajn homojn.

Tion saman konsilas Spiritismo al siaj adeptoj: Neniun konsciencon perfortu; neniun devigu lasi sian kredon, por adopti la vian; ne anatemu tiujn, kiuj ne pensas same, kiel vi; akceptu tiujn, kiuj venas al vi, kaj lasu pace tiujn, kiuj vin forpelas. Memoru la parolojn de la Kristo: iam oni perforte prenadis la ĉielon, nun oni envenas per mildeco. (Ĉ. IV, §§ 10 kaj 11.)

## ĈAPITRO XXVI

# DONACE VI RICEVIS, DONACE VI DONU

Kapablo sanigi. Pagataj preĝoj. Vendistoj elpelitaj el la templo. Senpaga mediumeco.

### Kapablo sanigi

1. *Malsanulojn sanigu, mortintojn levu, leprulojn purigu, demonojn elpelu:* donace vi ricevis, donace vi donu. (Mateo, 10:8.)

2. "Donace vi ricevis, donace vi donu", diris Jesuo al siaj disĉiploj; per tiu maksimo li ordonas, ke ni ne devigu alian pagi al ni ion, por kio ni mem nenion pagis; nu, kion la disĉiploj senpage ricevis, tio estis la kapablo sanigi malsanulojn kaj elpeli demonojn, tio estas, la malbonajn Spiritojn; tiun kapablon ili senpage ricevis de Dio, por mildigi la sorton de la suferantoj kaj por helpi la disvastigon de la kredo; Jesuo do rekomendis al ili ne fari el tia kapablo ian komercon, negocon aŭ vivrimedon.

### Pagataj preĝoj

3. *Kaj dum la popolo aŭskultis, li diris al siaj disĉiploj: Gardu vin kontraŭ la skribistoj, kiuj amas promenadi en roboj kaj amas salutojn sur la placoj, kaj ĉefseĝojn en la sinagogoj, kaj ĉeflokojn en la festenoj; kaj* kiuj formanĝas domojn de vidvinoj, kaj por preteksto longe preĝas. *Ĉi tiuj*

*ricevos pli severan kondamnon.* (Luko, 20:45-47; Marko, 12:38-40; Mateo, 23-14.)

4. Jesuo diris ankaŭ: Igu neniun pagi vin por viaj preĝoj; ne faru kiel la skribistoj, *"kiuj formanĝas domojn de vidvinoj, kaj por preteksto longe preĝas"*, tio estas, kiuj akaparas la riĉaĵojn. La preĝo estas ago de karitemo, impeto de la koro; postuli de alian pagon por preĝo, kiun por li oni turnas al Dio, estas fariĝi salajrata peranto; la preĝo fariĝas do ia formulo, kies longo estas proporcia al la alportata sumo. Nu, el la jenaj du aferoj unu estas certa: aŭ Dio mezuras, aŭ ne mezuras, Siajn gracojn laŭ la nombro de la paroloj; se multaj vortoj estas necesaj, kion helpas malmultaj aŭ preskaŭ neniaj al tiu, kiu ne povas pagi? tio estas manko de karito; se unu sola vorto sufiĉas, la ceteraj estas senutilaj; kial do postuli pagon por ili? tio estas malhonestaĵo.

Dio ne vendas la bonaĵojn, kiujn Li konsentas. Kial do iu, kiu ne estas eĉ la disdonanto de tiuj favoroj, kiu ne povas garantii ties ricevon, postulu pagon por peto, kiu eble nenion rezultigos? Dio ne povus kondiĉigi konsenton de pardono, de bono aŭ de justaĵo, kiun oni petas de Lia favorkoreco, al ioma sumo da mono; alie, se la sumo ne estus pagita, aŭ se ĝi estus nesufiĉa, la justeco, la boneco kaj la pardonemo de Dio sin detenus de agado. La racio, la komuna saĝo, la logiko diras, ke Dio, la absoluta perfekteco, ne povus delegi al Siaj neperfektaj kreitoj la rajton tarifi Liajn verdiktojn. La justeco de Dio similas la Sunon: Ĝi ekzistas por ĉiuj, ĉu malriĉaj aŭ riĉaj. Se oni konsideras malmorale negoci pri favoroj de surtera suvereno, ĉu estus do morale vendi la gracojn de la Suvereno de l' Universo?

La pagataj preĝoj havas alian malbonaĵon: kiu aĉetas ilin, tiu plej ofte opinias, ke li ne havas mem la

devon preĝi, ĉar juĝas sin kvita, donante sian monon. Oni scias, ke la Spiritoj estas tuŝataj de la fervoro de tiu, kiu interesiĝas pri ili; kia povas esti la fervoro de homo, kiu komisias al alia preĝi anstataŭ li, kontraŭ pago? kia la fervoro de tiu alia, kiam li delegas sian mandaton aŭ iu tria, tiu ĉi al iu kvara ktp? Ĉu tio ne estas redukti la efikon de la preĝo al la valoro de kursohava mono?

## Vendistoj elpelitaj el la templo

5. *Kaj ili venis en Jerusalemon; kaj enirinte en la templon, li komencis elpeli la vendantojn kaj la aĉetantojn en la templo, kaj renversis la tablojn de la monŝanĝistoj kaj la seĝojn de la vendantoj de kolomboj; kaj ne permesis, ke oni portu ian vazon tra la templo. Kaj li instruis, kaj diris al ili: Ĉu ne estas skribite: Mia domo estas nomata domo de preĝo por ĉiuj popoloj? Sed vi faris ĝin kaverno de rabistoj. Kaj la ĉefpastroj kaj skribistoj aŭdis tion, kaj serĉis, kiamaniere pereigi lin; ĉar ili timis lin, ĉar la tuta homamaso miregis pro lia instruado.* (Marko, 11:15-18; Mateo, 21:12-13.)

6. Jesuo elpelis la vendantojn el la templo; per tia gesto li do kondamnis la negocadon de la sanktaj aferoj *sub ia ajn formo*. Dio ne vendas Sian benon, nek Sian pardonon, nek la eniron en la regnon de la ĉielo; la homo ne havas do la rajton postuli pagon por ili.

## Senpaga mediumeco

7. La modernaj mediumoj — ĉar ankaŭ la apostoloj havis mediumecon — same ricevis senpage de Dio ian specialan kapablon, nome la kapablon esti interpretantoj de la Spiritoj, por la instruado al la homoj, por montri al ĉi tiuj la vojon de la bono kaj ilin gvidi al la kredo, kaj ne por vendi al la homoj vortojn ne aparten-

antajn al ili, mediumoj, ĉar tiuj vortoj ne estas produktaĵo de *konceptado, de esploroj, nek de persona laboro de tiaj perantoj.* Dio volas, ke la lumo venu al ĉiuj; Li ne volas, ke la plej malriĉa ĝin ne ricevu kaj povu diri: "Mi ne havas kredon, ĉar mi ne povis pagi por ĝi; mi ne havis la konsolon ricevi kuraĝigojn kaj montrojn de amo de tiuj, kiujn mi priploras, ĉar mi estas malriĉa." Jen kial la mediumeco estas nenies privilegio kaj troviĝas ĉie; fari ĝin io pagata estus do ĝin deturni de ĝia providenca celo.

8. Kiu konas la kondiĉojn, en kiuj la bonaj Spiritoj komunikiĝas, ilian abomenon al ĉia egoisma intereso, kaj scias, kiel malmulte sufiĉas, por ke ili foriru, tiu neniel povas akcepti, ke la superaj Spiritoj estas al la dispono de iu ajn, kiu ilin vokus por ia prezo po kunsido; la simpla komuna saĝo forpuŝas tian penson. Ĉu ne estas ankaŭ sakrilegio voki por mono la estulojn, kiujn ni respektas aŭ kiuj estas al ni karaj? Sendube oni povas tiamaniere ricevi manifestiĝojn, sed kiu povus garantii ilian sincerecon? La Spiritoj frivolaj, mensogemaj, petolaj kaj la multego da malsuperaj Spiritoj, neniel skrupulaj, ĉiam venas kaj estas pretaj respondi, kion oni demandas, tute ne zorgante pri la vero. Kiu volas do seriozajn respondojn, tiu devas unue serioze peti ilin, poste informiĝi pri la speco de simpatioj de la mediumo por la estuloj de la spirita mondo; nu, la unua kondiĉo, por havigi al si la bonvolemon de la bonaj Spiritoj, estas la humileco, la sindonemo, la abnegacio, la plej absoluta *morala kaj materiala* sinforgeso.

9. Krom la morala demando prezentiĝas ne malpli grava fakta afero, dependanta de la naturo mem de la priparolata kapablo. La serioza mediumeco ne povas esti kaj neniam estos ia profesio, ne nur, ĉar ĝi morale senkreditiĝus kaj baldaŭ identiĝus kun tiu de l' "antaŭ-

diristoj de la sorto", sed ankaŭ tial, ke materia baro tion kontraŭstaras; efektive, ĝi estas kapablo esence ŝanĝema, nedaŭra kaj varia, je kies konstanteco neniu do povas kalkuli. Por ekspluatisto ĝi estus, sekve, tute necerta fonto de enspezoj, kiu povus manki al li en la momento, kiam li ĝin plej bezonus. Tute alia afero estas talento akirita per lernado kaj laboro kaj kiu, pro tio mem, estas propraĵo, el kiu oni kompreneble rajtas tiri profiton. Sed la mediumeco ne estas ia arto, nek ia talento, kaj tial ĝi ne povas fariĝi profesio; ĝi ne ekzistas sen kunlaborado de la Spiritoj; se Spiritoj mankas, jam ne estas mediumeco; la kapablo povas daŭri, sed ĝia ekzercado estas nuligita; tial, nenia mediumo en la mondo povas garantii la okazigon de ia spirita fenomeno en difinita momento. Ekspluati la mediumecon estas do disponi pri io, kion oni efektive ne posedas; aserti la kontraŭon estas trompi tiun, kiu pagas; cetere ne pri *si mem* la ekspluatisto disponas; li starigas prezon por la kunlaborado de la Spiritoj, de l' animoj de la mortintoj; tia penso naskas instinktan senton de abomeno. Ĝuste tiu negocado, degenerinta en ekscesan kutimon, ekspluatata de ĉarlatanoj, de malkleraj, de kredemaj kaj de superstiĉaj homoj, motivis la malpermeson de Moseo. La moderna Spiritismo, kompreninte la seriozan flankon de l' afero kaj per la diskreditado, en kiun ĝi faligis tian ekspluatadon, levis la mediumecon ĝis la rango de misio. (Vidu *"La Libro de la Mediumoj"*, ĉ. XXVIII; ankaŭ *"La Ĉielo kaj la Infero"*, ĉ. XII.)

10. Mediumeco estas io sankta, kion oni devas sankte, religie praktikadi. Ekzistas speco de mediumeco, postulanta en ankoraŭ pli absoluta maniero tiun kondiĉon, nome la kuraca mediumeco. La medicina doktoro donas la frukton de siaj studoj, kiujn li ofte faris koste de penigaj oferoj; la magnetizisto donas siajn proprajn emanaĵojn, ofte eĉ sian sanon: ili povas postuli por tio

prezon; la sanigiva mediumo transdonas la sanigan emanaĵon de la bonaj Spiritoj: tiun li ne rajtas vendi. Jesuo kaj la apostoloj, kvankam malriĉaj, nenian pagon petis de la homoj, kiujn ili resanigadis.

Kiu do ne havas porvivon, tiu serĉu rimedon iel ajn, ne per mediumeco; se necese, li dediĉu al ĝi nur la tempon, je kiu li povas materiale disponi. La Spiritoj alte taksos liajn sindonemon kaj oferemon, sed, kontraŭe, forlasas la homojn, kiuj esperas fari el ili ŝtupon por sia altigo.

ĈAPITRO XXVII

# PETU, KAJ VI RICEVOS

Kvalitoj de la preĝo. Efikeco de la preĝo. Agado de la preĝo. Transsendo de la penso. Kompreneblaj preĝoj. Pri la preĝo por la mortintoj kaj la suferantaj Spiritoj. **Instruoj de la Spiritoj:** Maniero preĝi. Feliĉo, kiun la preĝo alportas.

## Kvalitoj de la preĝo.

1. *Kiam vi preĝas, ne estu kiel la hipokrituloj; ĉar ili amas preĝi, starante en la sinagogoj kaj ĉe la anguloj de la stratoj, aŭ montri sin al homoj. Vere mi diras al vi: Ili jam ricevas sian rekompencon. Sed vi, kiam vi preĝas, eniru en vian ĉambreton, kaj ŝlosinte vian pordon, preĝu al via Patro, kiu estas en sekreto; kaj via Patro, kiu vidas en sekreto, vin rekompencos. Kaj dum via preĝado ne vante ripetadu, kiel la nacianoj; ĉar ili supozas, ke ili estos aŭskultitaj pro sia multvorteco. Ne estu similaj al ili; ĉar via Patro scias, kion vi bezonas, antaŭ ol vi petas de Li.* (Mateo, 6:5-8).

2. *Kaj kiam vi staras preĝante, pardonu, se vi havas ion kontraŭ iu; por ke ankaŭ via Patro, kiu estas en la ĉielo, pardonu al vi viajn erarojn. Sed se vi ne pardonos, ankaŭ via Patro, kiu estas en la ĉielo, ne pardonos viajn erarojn.* (Marko, 11:25-26).

3. *Kaj li parolis la jenan parabolon, ankaŭ por iuj, kiuj fidis al si, ke ili estas justuloj, kaj malestimis la ceterajn:*

*Du homoj supreniris en la templon, por preĝi: unu estis Fariseo, kaj la alia estis impostisto. La Fariseo, starante, preĝis kun si jene: Ho Dio, mi vin dankas, ke mi ne estas kiel la ceteraj homoj, rabemaj, maljustaj, adultemaj, nek eĉ kiel ĉi tiu impostisto. Mi fastas dufoje en semajno; mi donas dekonaĵon el ĉio, kion mi akiras. Sed la impostisto, starante malproksime, ne volis eĉ levi la okulojn al la ĉielo, sed batadis sian bruston, dirante: Ho Dio, estu favora al mi pekulo. Mi diras al vi: Ĉi tiu malsupreniris al sia domo, pravigita pli ol tiu; ĉar ĉiu, kiu sin altigas, estos humiligita; sed kiu sin humiligas, tiu estos altigita.* (Luko, 18: 9-14.)

4. La kvalitoj de la preĝo tie estas klare difinitaj de Jesuo: kiam vi preĝas, li diras, ne elmontriĝu publike, sed preĝu en sekreto; ne ŝajnigu, kvazaŭ vi multe preĝas, ĉar ne pro la multeco, sed pro la sincereco de la vortoj, vi estos aŭskultitaj; antaŭ ol preĝi, se vi havas ion kontraŭ iu, pardonu lin, ĉar preĝo ne povas plaĉi al Dio, se ĝi ne venas el koro, purigita de ĉia sento kontraŭ la karito; fine, preĝu humile, kiel la impostisto, kaj ne fiere, kiel la fariseo; ekzamenu viajn kulpojn kaj ne viajn bonajn kvalitojn, kaj se vi komparas vin kun aliaj, serĉu tion malbonan, kio estas en vi. (Ĉ. X, §§ 7 kaj 8).

## Efikeco de la preĝo

5. *Pro tio mi diras al vi: Kion ajn vi petos, preĝante, kredu, ke vi tion jam ricevis, kaj vi ĝin havos.* (Marko, 11:24).

6. Kelkaj personoj neas la efikecon de la preĝo, sin bazante sur la principo, ke, ĉar Dio konas niajn bezonojn, tial estas superflue ilin prezenti al Li. Tiuj personoj aldonas, ke ĉiujn aferojn en la universo interĉenas eternaj leĝoj kaj, sekve, ke niaj petoj ne povas ŝanĝi la dekretojn de Dio.

Sen ia dubo ekzistas naturaj kaj neŝanĝeblaj leĝoj, kiujn Dio ne povas nuligi laŭ la kaprico de ĉiu homo; sed de tio ĝis la kredo, ke ĉiuj cirkonstancoj de la vivo estas submetitaj al la fatalo, estas granda distanco. Se estus tiel, la homo estus nenio krom ia pasiva instrumento, sen libera volo kaj sen iniciativo. En ĉi tiu hipotezo, restus al li nur klini sian kapon sub la batoj de l' okazaĵoj, ne penante ilin eviti; li ne devus esti serĉinta ian rimedon por deturni la fulmon. Li ne ricevis de Dio prudenton kaj intelekton por ilin ne uzi, volon por ne voli, agemon por sidi neaktive. La homo estas libera agi en unu direkto aŭ en alia, kaj tial liaj agoj havas por li mem kaj por aliaj sekvojn konformajn al tio, kion li faras aŭ ne faras; per lia iniciativo fariĝos do okazoj, kiuj havas nenion komunan kun la fatalo kaj kiuj ne detruas la harmonion de l' universaj leĝoj, same kiel la trorapideco aŭ la malrapideco de montrilo de horloĝo ne nuligas la movadoleĝon, laŭ kiu estas konstruita ties mecanismo. Dio povas do cedi al iaj petoj, ne nuligante la nevariemon de la leĝoj, laŭ kiuj estas regata la tuto, ĉar Lia cedo restas ĉiam subordigita al Lia volo.

7. Estus mallogike konkludi el jena maksimo: "Kion ajn vi petos per la preĝo, tio estos donita al vi", ke sufiĉas peti por ricevi, kaj maljuste estus akuzi la Providencon, se Li ne plenumas ĉian peton, ĉar Li pli ĝuste ol ni scias, kio estas por nia bono. Tiel agas saĝa patro, kiu rifuzas al sia filo ion kontraŭan al ties intereso. Ordinare la homo vidas nur la nunan tempon; nu, se la sufero estas utila al estonta feliĉo de la homo, Dio lasos lin suferi, same kiel la kirurgo lasas pacienton suferi de operacio, kiu rehavigos al tiu la sanon.

Kion Dio donas al la homo, se ĉi tiu turnas sin al Li kun fido, tio estas kuraĝo, pacienco kaj rezignacio. Li konsentas ankaŭ la rimedojn, por ke la homo malimplikiĝu mem el embarasoj per ideoj inspiritaj de la bonaj

Spiritoj: tiel, Dio lasas al la homo la meriton de ties propra konduto. Li helpas tiujn, kiuj helpas sin mem, laŭ la maksimo: "Helpu cin, la ĉielo cin helpos", kaj ne tiujn, kiuj ĉion atendas de fremda helpo, ne uzante siajn proprajn kapablojn; sed plej ofte la homo preferus esti helpata per miraklo, farante nenian penon. (Ĉ, XXV, §§ 1 kaj sekvantaj.).

8. Ni prenu ekzemplon. Homo estas perdita en dezerto; li suferas teruran soifon; li svenas kaj falas sur la teron; li petegas Dion pri helpo, kaj atendas; sed neniu anĝelo venas alporti al li ion por trinki. Tamen bona Spirito *inspiras* al li la penson leviĝi kaj laŭiri unu el la vojetoj antaŭ li; tiam per ia mekanika ekmovo, streĉante ĉiujn siajn fortojn, li stariĝas kaj hazarde marŝas. Alveninte al altaĵo, li ekvidas malproksime rivereton; ĉe tio, li reprenas kuraĝon. Se li havas fidon, li ekkrios: "Dankon, Dio mia, pro la penso, kiun Vi inspiris al mi, kaj pro la forto, kiun Vi donis al mi." Se li ne havas fidon, li diros: "Kian bonan penson *mi mem havis!* Kian *bonan ŝancon* mi havis, preninte la dekstran, anstataŭ la maldekstra vojeto: la hazardo ja bonege servas al ni kelkfoje! Kiel feliĉa mi opinias min pro *mia* braveco kaj pro tio, ke mi ne senkuraĝiĝis!"

Sed, oni diros, kial la bona Spirito ne klare diris al la homo: "Sekvu tiun ĉi vojeton, kaj ĉe ties ekstremo vi trovos, kion vi bezonas?" Kial la Spirito ne montriĝis al li, por lin gvidi kaj subteni en lia senhelpeco? Tiamaniere la Spirito estus konvinkinta lin pri la helpo de la Providenco. Unue, la Spirito tiel kondutis, por instrui al la homo helpi sin mem kaj uzi siajn proprajn fortojn; due, per la necerteco, Dio elprovas la fidon al Li kaj la submetiĝon al Lia volo. Tiu homo estis en la situacio de infano, kiu falis kaj kiu, se ĝi ekvidas iun, krias kaj atendas, ĝis tiu ĝin levos; sed, se ĝi vidas neniun, ĝi klopodas kaj ekstaras mem.

Se la anĝelo, kiu akompanis Tobijan, dirus al li: "Mi estas sendita de Dio, por gvidi cin dum cia vojaĝo kaj por antaŭrigardi cin kontraŭ ĉia danĝero", Tobija havus nenian meriton; fidante nur al sia kunulo, li eĉ ne bezonus pensi; tial la anĝelo malkaŝis sian identecon nur ĉe la reveno.

## Agado de la preĝo. Transsendo de la penso.

9. La preĝo estas alvoko; per ĝi la homo ekrilatas, per la penso, kun la estulo, al kiu li sin turnas. Ĝia celo povas esti peto, danko aŭ laŭdo. Oni povas peti por si mem aŭ por alia, por la vivantoj aŭ por la mortintoj. La preĝoj, adresataj al Dio, estas aŭskultataj de la Spiritoj, komisiitaj por plenumi Lian volon; la preĝoj adresataj al la bonaj Spiritoj estas transportataj al Dio. Kiam oni preĝas al estuloj aliaj ol Dio, oni turnas sin al simplaj perantoj aŭ propetantoj, ĉar nenio povas fariĝi sen la volo de Dio.

10. Spiritismo komprenigas la agadon de la preĝo, klarigante la manieron de transsendo de la penso, ĉu la estulo, al kiu ni preĝas, kontentigas nian vokon, ĉu nia penso nur atingas lin. Por kompreni, kio okazas en tiu momento, ni devas prezenti al ni ĉiujn enkarniĝintajn kaj elkarniĝintajn estulojn entenataj en la universa fluidaĵo, kiu plenigas la spacon, same kiel sur la tero nin tute ĉirkaŭas la atmosfero. Tiu fluidaĵo ricevas de la volo ioman impulson; ĝi estas la kondukilo de la penso, same kiel la aero estas konkukilo de la sono, kun tiu diferenco, ke la vibroj de l' aero estas ĉirkaŭlimigitaj, dum la vibroj de l' universa fluidaĵo disetendiĝas senfine. Kiam do la penso estas direktata al iu ajn estulo, sur la tero aŭ en la spaco, de enkarniĝinto al elkarniĝinto, aŭ inverse, de unu al la alia ekestas ia fluidaĵa fluo, kiu

transportas la penson, same kiel la aero transigas la sonon. (*)

La energio de la fluo estas proporcia al la energio de la penso kaj de la volo. Tiel la preĝo, direktata al la Spiritoj, estas aŭdata de ĉi tiuj, kie ajn ili troviĝas; tiel la Spiritoj komunikiĝas inter si, ili sendas al ni siajn inspirojn, telepatiaj interrilatoj efektiviĝas inter enkarniĝintoj.

Tiu ĉi klarigo koncernas precipe la homojn, kiuj ne komprenas la utilecon de la preĝo pure mistika; ĝi ne celas materialigi la preĝon, sed komprenigi ties efikon, montrante, ke la preĝo povas rekte kaj efektive agi; tiu agado tamen estas ĉiam subordigita al la volo de Dio, la superega juĝanto, la sola kapabla fari ĝin efika.

11. Per la preĝo, la homo vokas al si la helpon de la bonaj Spiritoj, kiuj venas subteni lin en liaj bonaj decidoj kaj inspiri al li bonajn pensojn; li tiel akiras la moralan forton, kiun li bezonas, por venki la malfacilaĵojn kaj por repreni la rektan vojon, se li dekliniĝis; per ĝi li povas ankaŭ deturni de si la malbonaĵojn, kiujn li altirus al si per sia propra kulpo. Ekzemple: homo vidas sian sanon ruinigita pro ekscesoj, al kiuj li sin fordonis, kaj trenas ĝis la fino de siaj tagoj vivon de suferoj; ĉu li rajtas lamenti, se li ne sukcesas resaniĝi? Ne, ĉar li povus trovi en la preĝo forton kontraŭ la tentoj.

12. Se oni dividos la malbonaĵojn de la vivo en du klasojn, el kiuj la unua konsistos el la malbonaĵojn, kiujn la homo ne povas eviti, kaj la dua el la ĉagrenoj, kies

(*) Se la Aŭtoro verkus ĉi tiun libron en nia tempo, eble li komparus tiun transsendon de la penso kun radiofoniaj komunikaĵoj. La afero nun estas multe pli facile komprenebla ol antaŭ 100 jaroj, kiam li skribis ĉi tiun verkon. – **La Tradukinto**

unua kaŭzo estas li mem pro siaj senzorgeco kaj ekscesoj (Ĉap. V, § 4), oni vidos, ke la dua klaso estas multe pli granda ol la unua. Estas do evidente, ke la homo estas la aŭtoro de la plimulto el siaj afliktoj, kaj ke li povus ilin ŝpari al si, agante ĉiam saĝe kaj prudente.

Ne malpli evidente estas, ke tiuj malfeliĉoj estas rezultato de nia malobeo al la leĝoj de Dio, kaj ke se ni severe sekvus tiujn leĝojn, ni estus tute feliĉaj. Se ni ne transpaŝus la limon de la neceseco en la kontentigo de niaj bezonoj, ni ne spertus la malsanojn, kiuj estas sekvoj de la ekscesoj, nek la suferojn, kuntrenatajn de tiuj malsanoj; se ni limigus nian ambicion, ni ne timus la ruinon; se ni ne volus supreniri pli alten, ol kiom ni povas, ni ne timus falon; se ni estus humilaj, ni ne suferus la elreviĝojn de la disbato de nia fiero; se ni praktikadus la leĝon de karito, ni ne estus klaĉemaj, enviemaj, ĵaluzaj, kaj ni evitus disputojn kaj malkonkordojn; se al neniu ni farus malbonon, ni ne timus venĝojn, ktp.

Ni konsentu, ke la homo nenion povas fari kontraŭ la aliklasaj malbonaĵoj; ke ĉiu preĝo estas senefika, por ke li ilin evitu: ĉu li ne estas ja tre feliĉa, ke li liberiĝas de ĉiuj malbonaĵoj naskitaj de lia konduto mem? Nu, pri tiuj ĉi la agado de la preĝo estas facile komprenebla, ĉar ĝi havas kiel efikon voki la edifan inspiron de la bonaj Spiritoj, peti de ili forton por kontraŭstari al la malbonaj pensoj, kies plenumiĝo povas esti al ni pereiga. En ĉi tiu okazo, *ilia klopodo ne celas, ĝustadire, deturni de ni la malbonaĵon, sed al ni mem evitigi la penson, kiu povas altiri la malbonaĵon; ili neniel malhelpas la plenumon de la dekretoj de Dio, nek rompas la validecon de la naturaj leĝoj; ili nur detenas nin de malobeo je tiuj leĝoj, gvidante nian liberan volon,* sed tion ili faras sen nia scio, en neperceptebla maniero, por ne kateni nian volon. La

homo troviĝas tiam en la situacio de iu, kiu petas bonajn konsilojn kaj ilin praktikas, sed kiu estas ĉiam libera sekvi, aŭ ne, la konsilojn; Dio volas, ke tiel estu, por ke la homo havu la respondecon por siaj agoj kaj la meriton de l' elekto inter bono kaj malbono. Jen tio, kion la homo estas ĉiam certa ricevi, se li petas fervore, kaj precipe al kio oni povas apliki jenajn vortojn: "Petu, kaj vi ricevos."

Eĉ se la efikeco de la preĝo estus reduktita ĝis tia grado, ĉu ĝi ne donus grandegan rezultaton? Estis destinite al Spiritismo pruvi al ni la agmanieron de la preĝo, per la malkaŝo de la rilatoj inter la korpa kaj la spirita mondoj. Sed ĝiaj efikoj ne limiĝas nur je tio.

Ĉiuj Spiritoj ĝin rekomendas; malakcepti la preĝon estas ne rekoni la bonecon de Dio; estas rifuzi al si mem la helpon de la Spiritoj, kaj al aliaj la bonon, kiun oni povas fari al ili.

13. Cedante al peto adresita al Li, Dio ofte celas rekompenci la intencon, la sindonemon kaj la fidon de la preĝanto; jen kial la preĝo de virtulo havas pli da merito en la okuloj de Dio kaj ĉiam pli da efikeco, ĉar malvirta kaj malica homo ne povas preĝi kun tiaj fervoro kaj fido, kiajn donas nur la vera pieco. El la koro de egoisto, de iu, kiu preĝas nur el la lipoj, povus eliri nur *paroloj,* ne la impetoj de karito, kiuj al la preĝo donas ĝian tutan povon. Oni tiel klare komprenas tion, ke, per instinkta movo, oni prefere rekomendas sin al la preĝoj de la personoj, kies konduton oni opinias plaĉa al Dio, ĉar tiuj personoj estas pli volonte aŭskultataj.

14. Ĉar la preĝo plenumas agon kvazaŭ magnetisman, oni povus tial kredi, ke ĝia efikeco dependas de l' emanpotenco; sed ne estas tiel. Per tia magnetisma influo super la homoj, la Spiritoj, kiam necese, helpas

la nesufiĉan povon de la preĝanto, aŭ agante rekte *en lia nomo*, aŭ donante al li momente esceptan forton, kiam ili opinias lin inda je tiu favoro, aŭ kiam la afero povas esti utila.

La homo, kiu ne konsideras sin sufiĉe bona, por havi favoran influon, sin ne detenu preĝi por alia, pro la penso, ke li ne indas aŭskulton. La konscio pri la propra malsupereco estas montro de humileco ĉiam agrabla al Dio, kiu taksas laŭmerite la kariteman intencon, kiu animas la homon. Ties fervoro kaj fido je Dio estas unua paŝo al lia reboniĝo, kiun la bonaj Spiritoj ĝojas stimuli. Forpuŝata estas nur la preĝo de *fierulo, kiu fidas sian povon kaj siajn meritojn kaj kiu opinias, ke li povas superforti la volon de l' Eternulo.*

15. La povo de la preĝo kuŝas en la penso; paroloj, loko, momento ne gravas. Oni povas do preĝi ie kaj iam ajn, sola aŭ kune kun aliaj. La influo de loko kaj tempo dependas de la cirkonstancoj, kiuj povas favori la enpensiĝon. *La preĝo en kuneco plenumas pli povan agadon tiam, kiam ĉiuj preĝantoj elkore ligiĝas al sama penso kaj al sama celo,* ĉar fariĝas, kvazaŭ multaj krius samtempe kaj unisone. Sed, kion helpas, ke granda nombro da personoj kolektiĝas por preĝi, se ĉiu agas izole kaj individue? Cent homoj kunigitaj povas preĝi kiel egoistoj, dum du aŭ tri, unuigitaj en komuna aspiro, preĝas kiel veraj fratoj per Dio, kaj ilia preĝo havos pli da povo, ol tiu de la cent aliaj. (Ĉ. XXVIII, §§ 4 kaj 5).

## Kompreneblaj preĝoj

*16. Se do mi ne scios la signifon de la voĉo, mi estos rilate la parolanton, barbaro, kaj la parolanto estos por mi barbaro. — Ĉar se mi preĝas per lingvo, mia spirito preĝas, sed mia intelekto estas senfrukta. — Alie, se vi benas spirite, kiamaniere tiu, kiu okupas la lokon de la malklerulo,*

*diros Amen ĉe via dankesprimo? ĉar li ne scias, kion vi diras. — Ĉar vi ja bone dankesprimas, sed la alia ne estas edifata.* (Paŭlo, I. Korintanoj, 14:11, 14, l6, l7.)

17. La preĝo havas valoron nur laŭ la penso, kiun oni alligas al ĝi; nu, ne estas eble alligi penson al io, kion oni ne komprenas, ĉar, kion oni ne komprenas, tio ne povas tuŝi la koron. Por la granda plimulto, la preĝoj, en lingvo, kiun la aŭdantaro ne komprenas, estas nur amaso da vortoj, nenion dirantaj al la spirito. Por ke la preĝo tuŝu la koron, ĉiu vorto devas veki ian ideon, sed, se oni ne komprenas la vorton, nenian ideon ĝi povas naski. Oni ĝin diras kiel simplan formulon, kiu estas pli aŭ malpli efika, laŭ la nombro de la ripetoj; multaj preĝas pro devo, kelkaj eĉ pro konformeco al la moro; tial ili kredas sin kvitaj, preĝinte difinitan nombron da fojoj kaj laŭ tia aŭ alia ordo. Dio legas en la fundo de la koroj; Li vidas la penson kaj la sincerecon. Opinii, ke Li estas pli sentema por la formo ol por la fundo, estas malaltigi Lin. (Ĉ. XXVIII, § 2.)

## Pri la preĝo por la mortintoj kaj la suferantoj Spiritoj

18. La suferantaj Spiritoj petas preĝon; ĝi estas utila al ili, ĉar, konstatante, ke oni pri ili pensas, ili sentas sin malpli forlasitaj, malpli malfeliĉaj. Sed la preĝo faras sur ilin pli rektan agadon: ĝi relevas ilian kuraĝon, instigas en ili la deziron altiĝi per pento kaj repago, kaj eble ĝi deturnas de la malbono ilian penson; en tiu ĉi senco ĝi povas ne nur mildigi, sed ankaŭ malplidaŭrigi iliajn suferojn. (Vidu en *La Ĉielo kaj la Infero,* 2an parton: Ekzemplojn.).

19. Iuj personoj ne konsentas pri la preĝo por la mortintoj, ĉar, laŭ ilia kredo, la animo havas unu nuran

alternativon, nome, esti savita aŭ kondaminita al eternaj suferoj; en ambaŭ okazoj la preĝo estas do senutila. Ne diskutante la valoron de tia opinio, ni konsentu por momento pri la realeco de l' eternaj suferoj pro nepardonindaj kulpoj kaj ke niaj preĝoj estas senpovaj, por meti finon al tiuj suferoj. Ni demandas, ĉu en tiu hipotezo estas logike, kariteme kaj kristane rifuzi la preĝon por la kondamnitoj? Kiom ajn senpovaj por liberigi ilin, ĉu niaj preĝoj ne estus por tiuj malfeliĉaj Spiritoj montro de kompato, kapabla mildigi iliajn suferojn? Sur la tero, kiam iu estas kondamnita al dumviva punlaboro, eĉ tiam, se ekzistas nenia espero, ke estos konsentita al li pardono, ĉu estas malpermesite al iu karitema persono helpi lin treni siajn katenojn, por ĉi tiujn malplipezigi? Kiam iu estas trafita de nekuracebla malsano, ĉu oni lin forlasu sen ia malakrigo de liaj doloroj, nur tial, ke neniom da espero oni havas por lia resaniĝo? Ĉu oni devas forlasi lin sen ia konsolo? Ekpensu, ke inter la kondaminitoj povas troviĝi persono, kiu estis al vi kara, iu amiko, eble patro, patrino aŭ filo: ĉar, laŭ via opinio, li ne povas esperi pardonon, ĉu tial vi rifuzus al li glason da akvo, por kvietigi lian soifon? ian balzamon, por sekigi liajn vundojn? ĉu vi ne farus por li tion, kion vi farus por dumviva kondamnito? ĉu vi ne donus al li ateston de amo, de konsolo? Sendube, ĉar tiel vi kondutus kies kristano. Kredo, kiu ŝtonigas la koron, ne povas harmonii kun la kredo je iu Dio, kiu lokas en la unua rango de la devoj la amon al la proksimulo.

La neeterneco de la suferoj ne neprigas la malkonfirmon de puno dumtempa, ĉar Dio, per Sia justeco, ne povas intermiksi bonon kaj malbonon; nu, nei en tiu okazo la efikecon de la preĝo estus nei la efikecon de la konsolo, de la kuraĝigoj kaj de la bonaj konsiloj; estus nei la forton, kiun ni ĉerpas el la morala helpo de la homoj, kiuj volas nian bonon.

20. Aliaj sin bazas sur pli verŝajna motivo: la nefleksebleco de la diaj dekretoj. Dio, ili diras, ne povas ŝanĝi Siajn decidojn laŭ peto de Siaj kreitoj; alie, nenio estus fiksa en la mondo. La homo nenion do havus por peti de Dio, sed devus nur submetiĝi kaj adori Lin.

En ĉi tiu rezonado montriĝas falsa apliko de la neŝanĝebleco de la dia leĝo, aŭ pli bone, nescio pri la leĝo koncerne la estontan punon. Tiun leĝon malkaŝas la Spiritoj de la Sinjoro, hodiaŭ, kiam la homo estas matura por kompreni, kio en la kredo estas konforma aŭ kontraŭ al la diaj atributoj.

Laŭ la dogmoj de l' absoluta eterneco de la suferoj, ne estas konsiderataj favore al la kulpulo ties konsciencriproĉoj kaj pento; por li ĉia deziro je pliboniĝo estas senutila: li estas kondamnita restadi por eterne ĉe la malbono. Se li estas kondamnita por difinita tempo, la puno ĉesos tuj, kiam tiu tempo forpasos; sed kiu diras, ke li tiam ekhavos pli bonajn sentojn? Kiu diras, ke laŭ la ekzemplo de multaj kondamnitoj de sur la tero, ĉe ilia eliro el la malliberejo, li ne estos tiel malbona, kiel antaŭe? En la unua okazo, oni konservus en la doloro de la puno homon revenintan al la bono; en la dua okazo, oni pardonus tiun, kiu restas kulpa. La leĝo de Dio estas pli antaŭvidema; ĉiam justa, senpartia kaj favorkora, ĝi fiksas nenian daŭron por la puno, kia ajn ĉi tiu estas; ĝi resume konsistas en la jeno:

21. "La homo suferas ĉiam la konsekvencon de siaj "kulpoj: nenia malobeo je la leĝo de Dio restas ne"punita.

"La severeco de la puno estas proporcia al la graveco "de la kulpo.

"La daŭro de la puno pro ia ajn kulpo estas *nedi"finita; ĝi dependas de la pento de la kulpulo kaj de ties "reveno al bono;* la puno daŭras tiel longe kiel la obstin-

"nado en malbono; ĝi estus eterna, se la obstinado estus "eterna; ĝi estas mallongedaŭra, se la pento rapidas.

"Tuj kiam la kulpulo petas kompaton, Dio aŭdas "kaj sendas al li la esperon. Sed la simpla bedaŭro pro "la farita malbono ne sufiĉas: repago estas necesa; tial la "kulpulo estas submetata al aliaj provoj, en kiuj li povas, "ĉiam per sia volo, fari la bonon, por repagi la mal-"bonon, kiun li kaŭzis.

"Tiel la homo estas konstante la arbitracianto de "sia propra sorto; koncernas lin mem mallongigi aŭ sen-"lime daŭrigi sian turmenton; lia feliĉo, aŭ malfeliĉo, "dependas de lia volo fari bonon."

Tia estas la leĝo, leĝo *neŝanĝebla* kaj konforma al la boneco kaj la justeco de Dio.

La kulpa kaj malfeliĉa Spirito ĉiam povas do savi sin mem: la leĝo de Dio diras, sub kia kondiĉo li povas tion fari. Kio plej ofte mankas al li, tio estas volo, forto, kuraĝo; se, per niaj preĝoj, ni inspiras al li tiun volon, ni subtenas kaj kuraĝigas lin; se, per niaj konsiloj, ni al li donas la lumon, kiun li bezonas, *anstataŭ peti Dion rompi Sian leĝon, ni fariĝas instrumentoj por la plenumo de Lia Leĝo de amo kaj karito,* en kiu Li permesas al ni partopreni, por ke ni donu mem pruvon de karito. (Vidu en *La Ĉielo kaj la Infero,* unuan parton, ĉ. IV, VII, VIII.).

INSTRUOJ DE LA SPIRITOJ

## Maniero preĝi

22. La unua devo de ĉiu homa kreito, la unua ago, kiu devas signi lian revenon al la aktiva ĉiutaga vivo, estas la preĝo. Preskaŭ ĉiuj vi preĝas, sed kiom mal-multaj scias preĝi! Kiom interesas al la Sinjoro la frazoj, kiujn vi sekvigas unujn post aliaj mekanike, pro la kutimo, plenumante devon, kiu pezas sur vi, kiel ĉiu devo?

La preĝo de la kristano, de la *Spiritisto,* al kiu ajn kulto li apartenas, devas esti farata tuj, de kiam la Spirito reprenis la jugon de la karno; ĝi devas humile leviĝi el la profundo de la koro al la piedoj de la Dia Majesto, en impeto de dankemo pro la bonfaroj ricevitaj ĝis tiu tago, pro la forpasinta nokto, dum kiu estis al vi permesite, kvankam sen via scio, reveni al viaj amikoj, al viaj gvidantoj, por ĉerpi ĉe ilia kontakto pli da forto kaj da persistemo. Ĝi devas humile altiĝi al la piedoj de la Sinjoro, por al Li rekomendi vian malfortecon, peti de Li apogon, indulgon, favorkorecon. Ĝi devas flugi el la profundo de la koro, ĉar via animo devas supreniri al la Kreanto, transfiguriĝi kiel Jesuo sur la monto Tabor, por tien veni blanka kaj radianta de espero kaj amo.

Via preĝo devas enhavi peton de la gracoj, kiujn vi bezonas, sed kiujn vi efektive bezonas. Senutile estus do peti la Sinjoron mallongigi viajn provojn, doni al vi ĝojojn kaj riĉecon; petu de Li konsenti al vi pli altvalorajn bonaĵojn, kiaj estas pacienco, rezignacio kaj fido. Ne diru, kiel kelkaj el vi: "Neniom valoras preĝi, ĉar Dio ne aŭskultas min." Kion vi plej ofte petas de Dio? Ĉu vi iam ekpensis peti de Li vian moralan pliboniĝon: Ho! ne, tre malofte. Vi prefere ekpensas peti de Li *la sukceson en viaj surteraj entreprenoj,* kaj vi ekkrias: "Dio ne okupiĝas pri ni; se Li atentus nin, ne fariĝus tiom da maljustaĵoj." Malsaĝaj! sendankaj! Se vi irus ĝis la fundo de via konscienco, vi tie preskaŭ ĉiam trovus la elirpunkton de viaj malfeliĉoj, pri kiuj vi plendas; petu do, antaŭ ĉio, vian pliboniĝon, kaj vi vidos, kia torento da gracoj kaj konsoloj verŝiĝos sur vin. (Ĉ. V, § 4.)

Vi devas senĉese preĝadi, ne bezonante por tio retiriĝi en vian preĝoĉambron aŭ surgenuiĝi en la publikaj lokoj. La dumtaga preĝado estas la plenumo de viaj devoj, escepte de neniu, kiaj ajn ili estas. Ĉu ne estas ago de amo al la Sinjoro helpi viajn fratojn en iu

bezono, morala aŭ fizika? Ĉu ne estas ago de dankemo levi vian penson al Li, kiam io feliĉa okazas al vi, kiam iu akcidento estas evitita, kiam iu ĉagreno apenaŭ tuŝas vin, se vi diras per la penso: *Estu glorata, mia Patro!?* Ĉu ne estas ago de pento humiliĝi antaŭ la suverena Juĝanto, kiam vi sentas, ke vi pekis kaj, eĉ nur per rapida penso, vi al Li diras: *Pardonu min, Dio mia, ĉar mi pekis* (pro fiero, pro egoismo aŭ pro manko de karito); *donu al mi forton, pro ne refali, kaj kuraĝon, por kompensi mian eraron?*

Tio estas sendenpenda de la kutimaj matenaj kaj vesperaj preĝoj, kiel ankaŭ de la ekleziaj festotagoj; kiel vi vidas, la preĝo povas esti farata en iu ajn momento, trudante nenian interrompon de la laboro; kontraŭe, la preĝo sanktigas ĝin. Estu tute certaj, ke unu sola el tiuj pensoj, elirintaj el la koro, estas pli favore aŭskultata de via ĉiela Patro, ol la longaj preĝoj diritaj pro kutimo, ofte sen ia difinita kaŭzo, kaj al kiuj nur *la kutima horo vin maŝine vokas.* (*V. Monod*. Bordeaux, 1862.)

## Feliĉo, kiun la preĝo alportas

23. Venu, vi, kiuj volas kredi: la ĉielaj Spiritoj alkuras, por anonci al vi grandajn aferojn; Dio, miaj infanoj, malfermas Siajn trezorojn, por doni al vi bonfarojn. Nekredemaj homoj! se vi scius, kiel la fido bonfaras al la koro kaj kondukas la animon al pento kaj la preĝo! La preĝo! ho! kiel kortuŝaj estas la paroloj el la buŝo en momento de preĝado! La preĝo estas la dia roso, mildiganta la tro fortan varmon de la pasioj; unuenaskita filino de la fido, ĝi gvidas nin sur la vojeton, kiu kondukas al Dio. En via enpensiĝo kaj en soleco, vi estas kun Dio; Li jam ne estas mistero: Li senvualigas Sin al vi. Apostoloj de la pensado, tio por vi estas la vivo, via animo disiĝas de la materio kaj flugas en tiujn

mondojn senlimajn kaj eterajn, kiun la kompatindaj homoj ne konas.

Marŝu, marŝu sur la vojo de la preĝo, kaj vi aŭdos la voĉon de l' anĝeloj. Kia harmonio! Tie jam ne estas la konfuza bruo kaj la malagordaj sonoj de la tero; tie estas la liroj de la ĉefanĝeloj; tie estas la dolĉaj kaj mildaj voĉoj de la serafoj, pli delikataj ol la matenaj ventetoj, ludantaj en la foliaroj de viaj grandaj arbaroj. Meze en kiaj ĉarmoj vi marŝos! viaj lingvoj ne povos difini tiun feliĉon, ĉar ĝi eniras tra ĉiuj poroj, ĉar la fonto, el kiu oni trinkas dum preĝado, estas vivdona kaj refreŝiga! Dolĉaj voĉoj, ravaj parfumoj, kiujn la animo aŭdas kaj ĝue gustumas, flugante per la preĝo en tiujn nekonatajn kaj loĝatajn sferojn!

Ne miksite kun karnaj deziroj, ĉiaj aspiroj estas diaj.

Vi ankaŭ preĝu, kiel preĝis la Kristo, portante sian krucon al Golgota aŭ Kalvario: portu vian krucon, kaj vi sentos la dolĉajn emo ciojn, kiuj trapasis lian animon, kvankam ŝarĝita per malhonoriga kruco; li iris al la morto, sed por vivi la ĉielan vivon en la hejmo de sia Patro. *(Sankta Aŭgusteno*. Parizo, 1861.)

ĈAPITRO XXVIII

# KOLEKTO DA SPIRITISTAJ PREĜOJ

## Antaŭparolo

1. La Spiritoj ĉiam diradas: "La formo estas nenio, la penso esta ĉio. Ĉiu el vi preĝu laŭ siaj konvinkoj kaj en la maniero, kiu plej tuŝas lin aŭ ŝin; bona penso valoras pli ol multenombraj paroloj, en kiuj la koro neniel partoprenas."

La Spiritoj ordonas nenian absolutan formulon de preĝoj; kiam ili donas formulojn, ili celas fiksi la ideojn kaj precipe atentigi pri iuj principoj de la doktrino spiritisma. Tiuj formuloj celas ankaŭ helpi la personojn, kiuj estas en embaraso por esprimi siajn ideojn, ĉar estas personoj, kiuj ne kredas, ke ili efektive preĝis, se iliaj pensoj ne estis formulitaj.

La kolekto da preĝoj en tiu ĉi ĉapitro estas elekto, farita el inter la preĝoj diktitaj de la Spiritoj en pluraj cirkonstancoj; ili eble ja diktis aliajn per malsamaj vortoj, taŭgaj por difinitaj ideoj aŭ apartaj okazoj, sed la formo ne gravas, se la fundamenta penso estas la sama. La celo de la preĝo estas levi nian animon al Dio; la diverseco de la formuloj nenian diferencon devas krei inter la homoj, kiuj kredas al Li, kaj des malpli inter la adeptoj de Spiritismo, ĉar Dio akceptas ĉiajn preĝojn, se nur ili estas sinceraj. Oni do ne konsideru tiun ĉi kolekton kiel absolutan formularon, sed nur kiel ekzemplon de la instruoj de la Spiritoj. Ili estas apliko de la principoj de la evangelia moralo komentariita en tiu ĉi libro, alplenigaĵo al la diktaĵoj de la

Spiritoj pri la devoj al Dio kaj al la proksimulo, en kiu estas rememorigataj la principoj de la doktrino.

Spiritismo rekonas kiel bonajn la preĝojn de ĉiaj kultoj, kiam ili estas dirataj el la koro kaj ne el la lipoj; nenian ĝi trudas, nenian ĝi malaprobas; Dio estas tro granda, laŭ Spiritismo, por forpuŝi la voĉon, kiu petegas de Li aŭ kantas al Li laŭdojn tial, ke ĝi tion faras en unu maniero kaj ne en alia. *Kiu ajn anatemus la preĝojn, kiuj ne estas en lia formularo, tiu pruvus, ke li ne konas la grandecon de Dio*. Kredi, ke Dio nur akceptas difinitan formulon, estas atribui al Li la malgrandecon kaj pasiojn de la homaro.

Esenca kondiĉo de la preĝo, laŭ Sankta Paŭlo, estas, ke ĝi estu komprenebla, por ke ĝi povu paroli al la spirito; por tio ne sufiĉas, ke ĝi estu dirata en lingvo komprenata de la preĝanto; estas preĝoj en vulgara lingvo, kiuj ne diras multe pli al la penso, ol se ili estus en fremda lingvo, kaj kiuj tial ne iras en la koron; la malmultaj ideoj, kiujn ili enhavas estas ofte sufokitaj de la superabundeco de vortoj kaj la mistikeco de la lingvo.

La precipaj kvalitoj de la preĝo estas klareco, simpleco kaj koncizeco, sen frazaro senutila kaj laŭtaj epitetoj, kiuj estas nur falsbrila ornamaĵo; ĉiu vorto devas trafi sian celon, veki ideon, skui koran fibron; unuvorte, *ĝi devas pripensigi;* nur laŭ ĉi tiu kondiĉo la preĝo povas trafi sian celon, alimaniere *ĝi estas nur bruo*. Vidu, kun kia mieno de distreco kaj fluegeco plej ofte ili estas dirataj; oni vidas la lipojn moviĝantajn; sed, laŭ la esprimo de la fizionomio, laŭ la sono mem de la voĉo, oni konstatas en ili ian agon maŝinecan, pure eksteran, por kiu la animo restas indiferenta.

La preĝoj, kunigitaj en tiu ĉi kolekto, estas dividitaj en kvin kategoriojn: 1-e. Ĝeneralaj preĝoj; 2-e. Preĝoj por la preĝanto mem; 3-e. Preĝoj por la vivantoj; 4-e. Preĝoj por la mortintoj; 5-e. Specialaj preĝoj por malsanuloj kaj obseditoj.

Por la celo turni pli speciale la atenton al la temo de ĉiu preĝo kaj pli bone komprenigi ties amplekson, ni antaŭigis ĉiujn per la koncerna instruo, per ia prezento de motivoj, sub la titolo *Antaŭparolo.*

# I. ĜENERALAJ PREĜOJ

## La Sinjora preĝo = Patro Nia

2. *Antaŭparolo.* La Spiritoj rekomendis loki la Patron Nian kiel kapon de tiu ĉi kolekto, ne nur kiel preĝon, sed ankaŭ kiel simbolon. El ĉiuj preĝoj, ili donas al ĉi tiu la unuan rangon, aŭ tial, ke ĝi venas de Jesuo mem (Sankta Mateo, 6:9-13), aŭ tial, ke ĝi povas anstataŭi ĉiujn aliajn, laŭ la penso, kiun oni al ĝi alligas. Ĝi estas la plej perfekta modelo de koncizeco, vera majstroverko de sublimeco laŭ sia simpleco. Efektive, sub la plej malvasta formo, ĝi resumas ĉiujn devojn de la homo al Dio, al si mem kaj al la proksimulo; ĝi enhavas deklaron de fido, agon de adorado kaj de submetiĝo, peton de ĉio necesa al la vivo kaj la principon de karito. Ĝin diri intence al iu estas peti por li tion, kion oni petus por si.

Tamen tial, ke ĝi mem estas tre mallonga, la profunda senco enfermita en la kelkaj vortoj, kiuj ĝin konsistigas, ne estas kaptata de la plimulto el la homoj; tial oni ĝin ordinare diras ne direktante la penson al la aplikado de ĉiu el ĝiaj partoj; oni ĝin eldiras kiel formulon, kies efikeco estas proporcia al la nombro da fojoj de ĝia ripetado; nu, tiu nombro estas preskaŭ ĉiam unu el la kabalaj nombroj, *tri, sep* aŭ *naŭ*, eltiritaj el la antikva superstiĉa kredo al la efikeco de la nombroj, uzata en la magiaĵoj.

Por anstataŭi la malplenon, kiun la koncizeco de tiu preĝo lasas en la menso, laŭ konsilo kaj kun la helpo de la bonaj Spiritoj, al ĉiu frazo estas aldonita komentario, kiu elvolvas ĝian sencon kaj montras ĝiajn aplikojn. Laŭ la cirkonstancoj kaj la disponebla tempo, oni povas do diri la Patron Nian *simpla* aŭ *komentariita*.

### 3. **Preĝo.**

I. *Patro nia, kiu estas en la ĉielo, Via nomo estu sanktigita!*

Ni kredas al Vi, Sinjoro, ĉar ĉio elmontras Vian povon kaj Vian bonecon. La harmonio de la universo atestas saĝon, prudenton kaj antaŭvidemon, kiuj superas ĉiujn homajn kapablojn; la nomo de iu Estulo suverene granda kaj saĝa estas enskribita en ĉiuj verkoj de la kreitaĵaro, ekde la trunketo de herbo kaj la plej malgranda insekto ĝis la astroj, moviĝantaj en la spaco; ĉie ni vidas la pruvon de patra prizorgemo; tial estas blinda tiu, kiu ne rekonas Vin en Viaj verkoj, fiera tiu, kiu Vin ne gloras, kaj maldankema tiu, kiu ne esprimas al Vi sian ŝuldon por Viaj favoroj.

II. *Venu Via regno!*

Sinjoro, Vi donis al la homoj leĝojn plenajn de saĝo, kiuj farus ilian feliĉon, se ili observadus tiujn leĝojn. Kun tiuj leĝoj ili igus la pacon kaj la justecon regi ĉe ili; ili helpus sin reciproke, anstataŭ malutili unuj al aliaj, kiel ili faras; la fortulo subtenus la malfortulon, anstataŭ lin subpremi; ili evitus la malbonaĵojn, kiujn naskas la maljustaĵoj kaj ĉiaspecaj ekscesoj. Ĉiaj suferoj sur la tero venas de la malobeo al Viaj leĝoj, ĉar ĉiu malobeo havas siajn fatalajn sekvojn.

Al la bruto Vi donis la instinkton, kiu signas la limon de tio necesa al ĝi, kaj ĝi aŭtomate konformiĝas; sed al la homo, krom tiu instinkto, Vi donis ankaŭ intelekton kaj racion; Vi donis al li ankaŭ la liberecon obei aŭ malobei tiujn el Viaj leĝoj, kiuj lin rekte koncernas, tio estas, la liberecon elekti inter la bono kaj la malbono, por ke li havu la meriton kaj la repondecon por siaj agoj.

Neniu povas preteksti nescion pri Viaj leĝoj, ĉar, per patra prizorgemo, Vi volis, ke tiuj leĝoj estu engravuritaj en ĉies konscienco, sendistinge de kultoj aŭ de nacioj: kiuj ilin malobeas, tiuj Vin ne rekonas.

Venos tago, kiam, laŭ Via promeso, ĉiuj plenumos Viajn leĝojn; tiam la nekredemo estos malaperinta; ĉiuj Vin rekonos kiel la Suverenan Mastron de ĉiuj aferoj, kaj la regado de Viaj leĝoj starigos Vian regnon sur la tero.

Bonvolu, Sinjoro, fruigi tiun alvenon, donante al la homoj la necesan lumon, kiu konduku ilin sur la vojon de la vero.

III. *Plenumiĝu Via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero!*

Se la submetiĝo estas devo de la filo al la patro, de la malsuperulo al sia superulo, kies des pli granda estas la devo de submetiĝo de la kreito al sia Kreinto! Fari Vian volon, Sinjoro, estas observi Viajn leĝojn kaj sen murmuroj submetiĝi al la diaj dekretoj; la homo submetiĝos al ili, kiam li komprenos, ke Vi estas la fonto de ĉia saĝo, kaj ke sen Vi li nenion kapablas; tiam li faros Vian volon sur la tero, kiel la elektitoj en la ĉielo.

IV. *Nian panon ĉiutagan, donu al ni hodiaŭ.*

Donu al ni la nutraĵon, kiu subtenus la fortojn de la korpo; donu al ni ankaŭ la spiritan nutraĵon por la elvolviĝo de nia Spirito.

La bruto trovas sian nutraĵon, sed la homo ŝuldas ĝin al sia agemeco kaj al la rimedoj de sia intelekto, ĉar Vi kreis lin libera.

Vi diris al li: "En la ŝvito de via vizaĝo vi manĝados panon"; per tio Vi trudis al li la devon de laboro, por

ke li ekzercu sian intelekton per la serĉado de rimedoj, por prizorgi siajn bezonojn kaj sian bonstaton, unuj per materia laboro, aliaj per intelekta laboro; sen la laboro li restus senprogresa kaj ne povus aspiri al la feliĉo de la superaj Spiritoj.

Vi helpas la bonvolan homon, kiu fidas al Vi por la necesaj aĵoj, sed ne tiun, al kiu plaĉas la mallaboremo kaj ĉion volus ricevi sen penoj, nek tiun, kiu serĉas la superfluaĵon. (Ĉap. XXV.)

Kiom da homoj pereas pro sia propra kulpo, pro sia malzorgemo, pro sia neantaŭvidemo aŭ por sia ambicio, kaj tial, ke ili ne volis kontentiĝi per tio, kion Vi donis al ili! Tiuj estas la farintoj de sia propra malfeliĉo kaj ne havas la rajton plendi, ĉar ili estas punataj de sia propra peko. Sed eĉ tiujn Vi ne forlasas, ĉar Vi estas senlime favorkora; Vi etendas al ili helpeman manon, tuj kiam, kiel la erarinta filo, ili sincere revenas al Vi. (Ĉap. V, § 4.)

Antaŭ ol plendi kontraŭ nia sorto, ni demandu, ĉu ĝi ne estas nia verko; ĉe ĉiu malfeliĉo, kiu okazas al ni, ni demandu nin mem, ĉu ne dependis de ni eviti ĝin; sed ni diru ankaŭ, ke Dio donis al ni intelekton, por ke ni eliru mem el la ŝlimejo, kaj dependas de ni uzi tiun intelekton.

Tial, ke la leĝo de laboro estas la kondiĉo de la homo sur la tero, donu al ni kuraĝon kaj fortojn por plenumi ĝin; donu al ni ankaŭ prudenton, antaŭzorgemon kaj moderecon, por ke ni ne perdu la frukton de la laboro.

Donu al ni do, Sinjoro, nian ĉiutagan panon, tio estas, la rimedojn por akiri per la laboro la aĵojn necesajn al la vivo, ĉar neniu havas la rajton peti ion superfluan.

Se la laboro estas al ni ne ebla, ni fidas al Via dia providenco.

Se apartenas al Viaj planoj submeti nin al la plej severaj provoj, malgraŭ niaj klopodoj, ni akceptos ilin kiel justan elaĉeton de la kulpoj, kiujn ni eble faris en la nuna vivo aŭ en iu antaŭa, ĉar Vi estas justa; ni scias, ke ne estas punoj ne meritítaj, kaj ke Vi neniam punas sen ia kaŭzo.

Gardu nin, ho mia Dio, kontraŭ la sento de envio kontraŭ la homoj, kiuj posedas, kion ni ne havas, eĉ kontraŭ tiuj, kiuj havas superflue, dum al ni mankas la necesaĵoj. Pardonu ilin, se ili forgesas la leĝon de karito kaj amo al la proksimulo, kiun Vi instruis al ili. (Ĉap. XVI, § 8.)

Forigu ankaŭ de nia spirito la penson nei Vian justecon, kiam ni vidas la properon de la malbonulo kaj la malfeliĉon, kiu premas la bonulon. Nun ni scias, dank' al la novaj konigoj, kiujn Vi konsentis al ni, ke Via justeco ĉiam plenumiĝas kaj al neniu mankas; ke la materiala prospero de la malbonulo estas tiel mallonggedaŭra kiel lia korpa ekzistado, kaj ke ĝi havos terurajn sekvojn, dum la ĝojo, destinita al tiu, kiu suferas kun rezignacio, estas eterna. (Ĉap. V, §§ 7, 9, 12, 18.)

V. *Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj. = Pardonu al ni niajn ofendojn, kiel ankaŭ ni pardonas tiujn, kiuj nin ofendis.*

Ĉia malobeo al Via leĝoj, Sinjoro, estas ofendo al Vi, kaj ŝuldo farita, kiun pli malpli baldaŭ ni devos pagi. Ni petas de Via senlima favorkoreco la pardonon de niaj ŝuldoj, kun la promeso klopodi, por ne fari novajn. Vi faris por ni el la karito difinitan leĝon; sed karito ne konsistas nur en la helpo al nia similulo en la bezono; ĝi estas ankaŭ la forgeso kaj la pardono de la ofendoj. Per kia rajto petus ni Vian indulgon, se ni mem ne indulgus la homojn, pri kiuj ni plendas?

Donu al ni, ho mia Dio, la forton por sufoki en nia animo ĉian venĝemon, ĉian malamon kaj ĉian koleron; *konsentu, ke la morto ne surprizu nin kun deziro je venĝo en la koro.* Se al Vi plaĉas repreni nin ankoraŭ hodiaŭ de sur la tero, konsentu, ke ni povu prezentiĝi al Vi puraj de ĉia malamo, laŭ la ekzemplo de la Kristo, kies lastaj paroloj estis pardonpeto por liaj turmentantoj. (Ĉap. X.)

La persekutoj, kiujn la malbonuloj igas nin suferi, estas parto de niaj surteraj provoj; ni devas ilin akcepti sen murmuro, kiel ĉiujn aliajn provojn, kaj ne malbeni tiujn, kiun per siaj malicaĵoj preparas nian vojon al la eterna feliĉo, ĉar Vi diris al ni per la buŝo de Jesuo: "Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutataj pro justeco, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo!" Ni benu do la manon, kiu nin frapas kaj humiligas, ĉar la kontuzoj sur la korpo fortigas nian animon, kaj ni estos altigitaj pro nia humiliĝo. (Ĉap. XII, § 4.)

Glorata estu Via nomo, Sinjoro, ĉar Vi al ni instruis, ke nia sorto ne estas senrimede fiksita post la morto; ke ni trovos en aliaj ekzistadoj la rimedojn por elaĉeti kaj pagi niajn pasintajn kulpojn, por plenumi en nova vivo tion, kion ni ne povas fari en la nuna por nia progreso. (Ĉap. IV; ĉap V, § 5.)

Tiel klariĝas ĉiuj ŝajnaj anomalioj de la vivo; lumo estas ĵetata sur nian pasintecon kaj nian estontecon, kiel signo de Via suverena justeco kaj de Via senlima boneco.

VI. *Kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono.* (*)

---

(*) La originala franca teksto diras: "Ne forlasu nin en tento, sed liberigu nin de la malbono", kaj la Aŭtoro skribas la jenan noton: "Iuj tradukoj diras: **Ne konduku nin en tenton** (et ne nos inducas in tentationem); tiu esprimo igus pensi, ke la tento venas de Dio, ke Li memvole pelas la homojn al la malbono,

Donu al ni, Sinjoro, la forton por malcedi al la sugestoj de la malbonaj Spiritoj, kiuj provus deturni nin de la vojo de la bono, inspirante al ni malbonajn pensojn.

Sed ni mem estas malperfektaj Spiritoj, enkarniĝintaj sur tiu ĉi tero por elaĉeti kulpon kaj plibonigi nin. La unua kaŭzo de la malbono estas en ni, kaj la malbonaj Spiritoj nur profitas niajn malvirtajn inklinojn, ĉe kiuj ili tenas nin por nin tenti.

Ĉia malperfektaĵo estas pordo malfermita al ilia influo; tial ili estas senpovaj kaj rezignas ĉian provon kontraŭ la perfektaj estuloj. Ĉio, kion ni povus fari por eviti ilin, estu senutila, se ni ne kontraŭstarus al ili per neskuebla volo por la bono kaj absoluta rezigno pri la malbono. Nur kontraŭ ni mem do ni devas direkti niajn klopodojn, kaj tiam la malbonaj Spiritoj foriras mem, ĉar la malbono ilin altiras, dum la bono ilin forpelas. (Vidu malsupre: Preĝoj por la obseditoj.)

Sinjoro, subtenu nin en nia malforteco; inspiru al ni per la voĉo de niaj Gardanĝeloj kaj de la bonaj Spiritoj la volon korekti nin pri niaj malperfektaĵoj, por fermi al la malpuraj Spiritoj la pordojn de nia animo. (Vidu malsupre: § 11.)

La malbono ne estas Via verko, Sinjoro, ĉar la fonto de la tuta bono nenion malbonan povas krei; ni mem ĝin kreas per malobeo al Viaj leĝoj kaj per malbona uzo, kiun ni faras el la libereco, kiun Vi donis al ni.

---

blasfema penso, kiu similigus Dion al Satano, kaj kiu ne povus esti en la menso de Jesuo. Tia penso estas konforma al la vulgara doktrino pri la rolo de la demonoj. (Vidu en **La Ĉielo kaj la Infero** ĉap X: "La Demonoj".)

La tradukinto en Esperanton tradukis neniun frazon el la Biblio, sed nur fidele kopiis el la ekzistanta eldono; tial la frazo estas kopiita el la Evangelio laŭ Santa Mateo, 6:13. La eldono de la Biblio en Esperanto estas tre respektinda kaj la tradukinto ne kuraĝas ŝangi konscie ĝian tekston. – **La Tradudinto.**

Kiam la homoj plenumos Viajn leĝojn, la malbono malaperos de sur la tero, kiel ĝi jam malaperis el la mondoj pli progresintaj.

Por neniu la malbono estas io nepre bezona, kaj ĝi ŝajnas nekontraŭstarebla nur al tiuj, kiuj plezuras en ĝi. Se ni havas la volon fari ĝin, ni povas ankaŭ havi la volon fari la bonon; tial, ho mia Dio, ni petas de Vi kaj de la bonaj Spiritoj la helpon por kontraŭstaro al la tento.

VII. *Tiel estu.*

Bonvolu, Sinjoro, ke niaj deziroj plenumiĝu! Sed ni kliniĝas antaŭ Via senlima saĝo. En ĉiuj aferoj, kiujn ni ne povas kompreni, estu farate laŭ Via sankta volo, kaj ne laŭ la nia, ĉar Vi volas nur nian bonon kaj, pli ĝuste ol ni, Vi scias, kio estas al ni utila.

Ni adresas al Vi tiun ĉi preĝon, ho mia Dio, por ni mem; ni adresas ĝin al Vi ankaŭ por ĉiuj suferantaj animoj, enkarniĝintaj kaj elkarniĝintaj, por niaj amikoj kaj niaj malamikoj, por ĉiuj, kiuj petas nian helpon, kaj aparte por N...

Por ĉiuj ni petegas Vian favorkorecon kaj Vian benon.

NOTO. Oni povas tie ĉi formuli tion, por kio oni dankas Dion, kaj tion, kion oni petas por si mem, aŭ por alia. (Vidu malsupre la preĝojn n-rojn 26, 27.)

## SPIRITISTAJ KUNVENOJ

4. *Kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili.* (Mateo, 18:20.)

5. *Antaŭparolo.* Kunveno en nome de Jesuo ne signifas, ke sufiĉas, se ĝi estas ia materiala kolekto; estas necese, ke la personoj spirite kunsidu, kun komuneco de intencoj kaj de pensoj por la bono; tiam Jesuo

troviĝas en la kunveno, li aŭ la puraj Spiritoj, reprezentantaj lin. Spiritismo komprenigas al ni, kiel la Spiritoj povas esti inter ni. Ili ĉeestas kun sia fluidaĵa aŭ spirita korpo, kaj kun la aspekto, kiu igus nin rekoni ilin, se ili fariĝus videblaj. Ju pli alte ili staras en la hierarkio, des pli granda estas ilia povo de disradiado; tial ili posedas la kapablon de ĉieesto kaj povas troviĝi samtempe en pluraj lokoj: por tio sufiĉas radio de ilia penso.

Per tiuj paroloj, Jesuo volis montri la povon de la unuiĝo kaj de la frateco; ne la pli aŭ malpli granda nombro altiras lin, ĉar, anstataŭ du aŭ tri personoj, li povus diri dek aŭ dudek, sed la sento de karito, kiu animas ilin, unuj favore al la aliaj; nu, por tio sufiĉas du. Sed se el tiuj du personoj preĝas ĉiu siamaniere, kvankam ili sin turnas al Jesuo, inter ili ne estas komuneco de la pensoj, precipe se ilin ne instigas sento de bonvolemo reciproka; se ili eĉ vidas unu alian per malbona okulo, kun malamo, envio aŭ ĵaluzo, la fluidecaj fluoj de iliaj pensoj forpuŝas unu alian anstataŭ unuiĝi per komuna impeto de simpatio, kaj tiam *ili neniel estas kunvenintaj en la nomo de Jesuo;* Jesuo estas nur la *preteksto* de la kunveno, sed ne ĝia vera motivo. (Ĉap. XXVII, § 9.)

Tio neniel signifas, ke li estas surda al la voĉo de unu sola persono; li ne diris: "Mi venos al iu ajn, kiu vokos min" tial, ke li super ĉio postulas la amon al la proksimulo, kaj tiun amon povas pli konvinke pruvi pluraj personaj, ol unu sola, ĉar tiam forestas ĉia persona sento; el tio sekvas, ke, se en grandnombra kunveno nur du aŭ tri personoj elkore unuiĝas per la sento de vera karito, dum la aliaj izoliĝas kaj koncentriĝas en egoistaj aŭ mondumaj pensoj, li estos kun la unuaj, sed ne kun la aliaj. Ne la samtempeco de la paroloj, de la kantoj aŭ de la eksteraj agoj, formas do la kunvenon en la nomo de Jesuo, sed la komuneco de la pensoj konformaj al

la spirito de karito personigita en Jesuo. (Ĉap. X, §§ 7 kaj 8; ĉap. XXVII, §§ 2, 3, 4.)

Tia devas esti la karaktero de la seriozaj spiritistaj kunvenoj, en kiuj oni sincere volas la kunlaboradon de la bonaj Spiritoj.

6. **Preĝo**. *(En la komenco de la kunveno.)*

— Ni petegas Vin, Sinjoro Dio Ĉiopova, sendi al ni bonajn Spiritojn por nin helpi, forigi tiujn, kiuj povus nin konduki al eraro, kaj doni al ni la lumon necesan por distingi la veron de la trompo.

Forpuŝu ankaŭ la malicajn Spiritojn, enkarniĝintajn aŭ elkarniĝintajn, kiuj provus ĵeti la malkonkordon inter ni kaj deturni nin de la karito kaj de l' amo al la proksimulo. Se kelkaj el ili volus enveni tien ĉi, zorgu, ke ili en la koron de neniu el ni trovu eniron.

Bonaj Spiritoj, kiuj bonvoleme venas instrui nin, faru nin obeemaj al viaj konsiloj; deturnu de ni ĉian penson pri egoismo, fiero, envio kaj ĵaluzo; inspiru al ni indulgemon kaj bonvolemon por niaj similuloj, ĉeestantaj aŭ forestantaj, amikaj aŭ malamikaj: ebligu fine, ke per la sentoj, kiuj animas nin, ni rekonu vian superan influon.

Donu al la mediumoj, kiujn vi elektos, por transdoni al ni viajn instruojn, la konscion pri la sankteco de la komisio al ili konfidota kaj pri la graveco de la ago, kiun ili estos plenumontaj, por ke ili havu la fervoron kaj piecon necesajn.

Se en la kunveno estas personoj altiritaj de alia sento, ol la bono, malfermu iliajn okulojn kaj pardonu al ili, kiel ni pardonas ilin, se ili venas kun malicaj intencoj.

Ni petas speciale la Spiriton de N..., nia spirita gvidanto, ke li helpu kaj prigardu nin.

7. *(En la fino de la kunveno.)*

— Ni dankas la bonajn Spiritojn, kiuj bonvolis veni komunikiĝi kun ni; ni petegas, ke ili helpu nin praktiki la instruojn donitajn kaj permesu, ke, elirante el tie ĉi, ĉiu el ni sentu sin fortigita por la praktikado de la bono kaj de l' amo al la proksimulo.

Ni deziras ankaŭ, ke tiuj instruoj estu utilaj al la suferantaj Spiritoj, malkleraj aŭ malvirtaj, kiuj ĉeestis tiun ĉi kunvenon, kaj por ili ni petegas la favorkorecon de Dio.

## Por la mediumoj

8. *Kaj en la lasta tempo, diras Dio, Mi elverŝos Mian spiriton sur ĉiun karnon; kaj viaj filoj kaj viaj filinoj profetos, kaj viaj junuloj havos viziojn, kaj maljunuloj havos sonĝojn; kaj eĉ sur Miajn sklavojn kaj Miajn sklavinojn en tiu tempo Mi elverŝos Mian spiriton, kaj ili profetos.* (La Agoj, 2:17, 18.) (*)

9. *Antaŭparolo.* La Sinjoro volis, ke la lumo fariĝu por ĉiuj homoj kaj penetru ĉien per la voĉo de la Spiritoj, por ke ĉiu povu havi la pruvon pri la senmorteco; ĝuste por ĉi tiu celo la Spiritoj manifestiĝas hodiaŭ sur ĉiuj punktoj de la tero, kaj la mediumeco, kiu aperas ĉe personoj de ĉiuj aĝoj kaj de ĉiuj sociaj pozicioj, ĉe la viroj kaj ĉe la virinoj, ĉe la infanoj kaj ĉe la mal-

(*) Tiu peco el Agoj estas citaĵo el la libro de Joel, 2:28-29: **"Post tio Mi elverŝos Mian spiriton sur ĉiun karnon; viaj filoj kaj viaj filinoj profetos, viaj maljunuloj havos sonĝojn, viaj junuloj havos viziojn. Eĉ sur la sklavojn kaj sur la sklavinojn Mi en tiu tempo elverŝos Mian spiriton."**

Mi represas la tekston de Joel, laŭ la traduko de D-ro Zamenhof, ĉar ne temas pri la sklavoj kaj sklavinoj de Dio, kiel ŝajnas el la transskribaĵo, sed pri ĉiuj homoj, "eĉ la sklavoj kaj sklavinoj." La profeta antaŭdiro nun plenumiĝas en la tuta mondo: mediumoj aperas en ĉiuj klasoj — ne nur ĉe la pastroj — ĉu virseksaj, ĉu virinseksaj. — **La Tradukinto**.

junuloj, estas unu el la signoj de la alveno de la tempo anoncita.

Por la konado de l' aferoj de la videbla mondo kaj malkovro de la sekretoj de la materia naturo, Dio donis al la homo la vidpovon de la korpo, la sentumojn kaj specialajn instrumentojn; per teleskopo la homo penetrigas sian rigardon en la profundaĵojn de la spaco, kaj per mikroskopo li eltrovis la mondon de la tre malgrandaj organismoj. Por penetri en la nevideblan mondon, la homo ricevis de Dio la mediumecon.

La mediumoj estas la interpretistoj, komisiitaj por transdoni al la homoj la instruojn de la Spiritoj; aŭ alivorte, *ili estas la materiaj organoj, per kiuj la Spiritoj esprimas sin en maniero komprenebla por la homoj.* Ilia misio estas sankta, ĉar ĝi havas la celon malfermi la horizontojn de l' eterna vivo.

La Spiritoj venas instrui la homon pri liaj estontaj destinoj, por lin konduki al la vojo de la bono, sed ne por ŝparigi al li la materialan laboron, kiun li devas plenumi sur la tero por sia progreso, nek por favori liajn ambicion kaj avidecon. Jen io, de kio la mediumoj devas esti bone penetritaj, por ne misuzi sian kapablon. *Kiu komprenas precize la gravecon de komisio ricevita*, tiu plenumas ĝin religie; lia konscienco riproĉus al li kiel sakrilegion fari amuzon aŭ distron, *por si aŭ por aliaj*, el kapablo al li donita por tia serioza celo, kiu ekrilatigas lin kun la transtombaj estuloj.

Kial interpretistoj de la instruado de la Spiritoj, la mediumoj devas ludi tre gravan rolon en la morala transformiĝo, kiu efektiviĝas; la servoj, kiujn ili povas fari, estas proporciaj al la direkto, kiun ili donas al sia kapablo, ĉar kiuj estas sur malbona vojo, tiuj estas pli malutilaj ol utilaj por Spiritismo; pro la malbonaj impresoj, kiujn ili kaŭzas, ili malfruigas pli ol unu konvertiĝon. Tial estos de ili postulata kalkulo pri l' uzado,

kiun ili estos farintaj el kapablo, al ili donita por la bono de iliaj similuloj.

La mediumo, kiu volas konservi la ĉeeston de la bonaj Spiritoj, devas labori por sia propra pliboniĝo; kiu volas vidi sian kapablon grandiĝi kaj elvolviĝi, tiu devas mem morale grandiĝi kaj sin deteni de ĉio, kio povus deturni ĝin de ĝia providenca celo.

Se kelkfoje la bonaj Spiritoj uzas malperfektajn instrumentojn, tiel ili agas por doni bonajn konsilojn kaj peni konduki ilin al la bono; sed se ili trovas korojn malmoliĝintajn, kaj iliaj konsiloj ne estas aŭskultataj, ili foriras, kaj tiam la malbonaj trovas la kampon libera. (Ĉap. XXIV, §§ 11 kaj 12.)

La sperto pruvas, ke ĉe tiuj mediumoj, kiuj ne profitas la bonajn konsilojn, kiujn ili ricevas de la bonaj Spiritoj, la komunikaĵoj, montrinte ioman brilon dum kelka tempo, degeneras iom post iom, kaj fine falas en la eraron, la babiladon kaj la ridindecon, sendiskutan signon de la foriĝo de la bonaj Spiritoj.

Havigi al si la helpon de la bonaj Spiritoj, eviti la petolemajn kaj mensogemajn Spiritojn, tia estas la celo de la konstantaj klopodoj de ĉiuj seriozaj mediumoj; sen tio la mediumeco estas vana kapablo, kiu povas eĉ fariĝi pereiga por tiu, kiu ĝin posedas, ĉar ĝi povas degeneri en danĝeran obsedon.

La mediumo, kiu komprenas sian devon, anstataŭ fieri pro kapablo, kiu ne apartenas al li, ĉar ĝi povas esti reprenata el li, atribuas al Dio la bonajn aferojn, kiujn li ricevas. Se la komunikaĵoj per li ricevataj meritas laŭdojn, li ne vantiĝas, ĉar li scias, ke ili estas sendependaj de lia persona merito, kaj li dankas Dion pro la permeso, ke la bonaj Spiritoj venis manifestiĝi per li. Se ili okazigas malfavoran kritikon, li ne ofendiĝas, ĉar ili ne estas verko de lia propra Spirito; li diras al si, ke li ne estis bona instrumento kaj ne posedas ĉiujn

kvalitojn necesajn, por malebligi la enmiksiĝon de malbonaj Spiritoj; tial li penas akiri tiujn kvalitojn, kaj petas per la preĝo la forton, kiu al li mankas.

10. *Preĝo.* Ĉiopovanta Dio, permesu al la bonaj Spiritoj helpi min en la komunikiĝo, kiun mi petas. Gardu min de la vanta pretendo opinii, ke mi estas ŝirmita kontraŭ la malbonaj Spiritoj; de la fiero, kiu povus erarigi min pri la valoro de tio, kion mi ricevas; de ĉia sento kontraŭa al la karito por la aliaj mediumoj. Se mi estos kondukita en eraron, inspiru al iu la penson admoni min, kaj al mi la humilecon, kiu igos min akcepti kun danko la kritikon, kaj preni por mi mem kaj ne por la aliaj la konsilojn, kiujn la bonaj Spiritoj bonvolos dikti al mi.

Se mi estos tentata malbonuzi en iu ajn maniero la kapablon, kiun Vi donacis al mi, aŭ fieri pro ĝi, mi petegas, ke Vi reprenu ĝin de mi prefere, ol permesi, ke ĝi estu deklinita de sia providenca celo, kiu estas la bono de ĉiuj kaj mia propra progreso.

## PREĜOJ POR LA PREĜANTO MEM

### Al la gardanĝeloj kaj al la protektantaj spiritoj

11. *Antaŭparolo.* Ni ĉiuj havas bonan Spiriton, kiu estas dediĉita al ni ekde nia naskiĝo kaj kiu prenis nin sub sian protekton. Li plenumas ĉe ni la mision de patro apud sia infano: la mision konduki nin sur la vojo de la bono kaj de la progreso tra la provoj de la vivado. Li estas feliĉa, kiam ni respondas al lia prizorgado; li suferas, kiam li vidas nin perei.

Lia nomo ne gravas por ni, ĉar eble li ne havas nomon konatan sur la tero; ni do vokas lin kiel nian Gardanĝelon, nian bonan genion; ni povas eĉ voki lin laŭ

la nomo de iu supera Spirito, por kiu ni sentas apartan simpation.

Krom nia Gardanĝelo, kiu estas ĉiam iu supera Spirito, ni havas ankaŭ protektantajn Spiritojn, kiuj ne estas tiel altaj, sed ne estas malpli bonaj kaj bonvolemaj; tiuj estas aŭ parencoj, aŭ amikoj, aŭ kelkfoje personoj, kiujn ni ne konis en nia nuna ekzistado. Ili helpas nin per siaj konsiloj, kaj ofte per enmiksiĝo en agojn de nia vivo.

La simpatiantaj Spiritoj estas tiuj, kiuj alligiĝas al ni pro ia simileco de gustoj kaj de inklinoj; ili estas bonaj aŭ malbonaj, laŭ la naturo de l' inklinoj, kiuj altiras ilin al ni.

La delogantaj Spiritoj penas deturni nin de la vojo de la bono suflorante al ni malbonajn pensojn. Ili profitas ĉiujn niajn malfortajn flankojn, kvazaŭ ĉi tiuj estus malfermitaj pordoj, permesantaj al ili eniri en nian animon. Iuj el ili obstinege atakas nin, kvazaŭ rabobirdo sian viktimon, sed ili *foriĝas, kiam ili konstatas sian senpovecon por lukti kontraŭ nia volo.*

Dio donis al ni ĉefan kaj superan gvidanton, kiu estas nia Gandanĝelo, kaj helpajn gvidantojn, kiuj estas niaj protektantaj kaj familiaraj Spiritoj; sed estas eraro opinii, ke ni *nepre* havas malbonan genion, starantan ĉe ni por kontraŭpezi la bonajn influojn. La malicaj Spiritoj venas *memvole*, laŭ la allogo trovata en ni pro niaj malvirtoj aŭ nia nezorgo sekvi la inspirojn de la bonaj Spiritoj; ni mem do altiras ilin. El tio rezultas, ke neniam ni estas sen la helpo de la bonaj Spiritoj, kaj ke dependas de ni eviti la malbonajn. Pro siaj malvirtoj, la homo estas la unua kaŭzo de la ĉagrenoj, kiujn li suferas, kaj tial plej ofte li mem estas sia malbona genio. (Ĉap. V, § 4.)

La preĝo al la Gardanĝeloj kaj al la protektantaj Spiritoj devas havi kiel celon petegi ilian intervenon

apud Dio, peti de ili la forton por malcedi al la malbonaj sugestioj kaj ilian helpon ĉe l' alternaĵoj de la vivo.

12. *Preĝo.* Saĝaj kaj bonvolemaj Spiritoj, senditoj de Dio, kies misio estas helpi la homojn kaj konduki ilin al la bona vojo, subtenu min en la provoj de la nuna vivo; donu al mi la forton por suferi ilin sen murmuro; deturnu de mi la malbonajn pensojn kaj ne permesu, ke mi enlasu en mian animon iun malican Spiriton, kiu provus konduki min al la malbono. Klarigu mian konsciencon pri miaj malvirtoj kaj levu de sur miaj okuloj la vualon de la fiero, kiu povus malebligi al mi vidi kaj konfesi ilin al mi mem.

Precipe vi, N..., mia Gardanĝelo, kiu aparte prizorgas min, kaj vi ĉiuj, protektantaj Spiritoj, kiu interesiĝas pri mi, faru min inda je via bonvolemo. Vi konas miajn bezonojn: ili estu kontentigitaj ĉiam laŭ la volo de Dio.

13. *(Alia).* Mia Dio, permesu al la bonaj Spiritoj, kiuj estas ĉirkaŭ mi, min helpi, kiam mi estas en sufero, kaj subteni min, se mi ŝanceliĝas. Konsentu, Sinjoro, ke ili inspiru al mi fidon, esperon kaj kariton; ke ili estu mia apogo, espero kaj pruvo de Via favorkoreco; konsentu fine, ke mi trovu apud ili la forton, kiu mankas al mi en la provoj de la vivo, kaj, por malcedi al la sugestoj de la malbono, la fidon, kiu savas, kaj la amon, kiu konsolas.

14. *(Alia).* Amataj Spiritoj, Gardanĝeloj, al kiuj Dio per Sia senlima favorkoreco permesas prigardi la homojn, estu niaj protektantoj en la provoj de la surtera vivado. Donu al ni forton, kuraĝon kaj rezignacion; inspiru al ni ĉion bonan, detenu nin sur la deklivo de la malbono; via dolĉa influo penetru nian animon; igu

nin senti, ke sindonema amiko estas apud ni, ke li vidas niajn suferojn kaj partoprenas en niaj ĝojoj.

Kaj vi, mia bona Gandanĝelo, ne forlasu min; mi bezonas vian tutan protekton, por elteni kun fido kaj amo la provojn, kiujn al Dio plaĉos sendi al mi.

## Por forigi malbonajn Spiritojn

15. *Ve al vi, skribistoj kaj Fariseoj, hipokrituloj! ĉar vi purigas la eksteron de la kaliko kaj de la plado; sed interne ili estas plenaj de rabado kaj malmodereco. Vi blinda Fariseo! purigu unue la internon de la kaliko kaj de la plado, por ke ilia ekstero ankaŭ fariĝu pura. — Ve al vi, skribistoj kaj Fariseoj, hipokrituloj! ĉar vi similas al tomboj blankigitaj, kiuj ekstere ŝajnas belaj, sed interne estas plenaj de ostoj de mortintoj kaj de ĉia malpureco. Tiel ankaŭ vi ekstere ŝajnas justaj antaŭ homoj, sed interne vi estas plenaj de hipokriteco kaj maljusteco.* (Mateo, 23:25-28.)

16. *Antaŭparolo.* La malicaj Spiritoj iras nur tien, kie ili trovas ian eblon kontentigi sian malicecon; por forigi ilin, ne sufiĉas peti, eĉ ne ordoni: ni devas forpeli de ni tion, kio altiras ilin. La malbonaj Spiritoj flaras la vundojn de l' animo, same kiel la muŝoj flaras la vundojn de la korpo; same kiel vi purigas la korpon por eviti la parazitaron, tiel lavu de ĝiaj malpuraĵoj la animon por eviti la malbonajn Spiritojn. Ĉar ni vivas en mondo, kie svarmas tiaj Spiritoj, tial la bonaj kvalitoj de la koro ne ĉiam fiaskigas iliajn atakojn; tamen tiuj kvalitoj havigas al ni forton por malcedi al ili.

17. *Preĝo.* En la nomo de Dio Ĉiopova, la malbonaj Spiritoj foriĝu de mi, kaj la bonaj ŝirmu min kontraŭ ili!

Malicaj Spiritoj, kiu inspiras al la homoj malbonajn pensojn; trompemaj kaj mensogemaj Spiritoj, kiuj trom-

pas la homojn; mokemaj Spiritoj, kiuj amuziĝas pri la kredemo de la homoj, mi vin forpuŝas per ĉiuj fortoj de mia animo kaj fermas la orelojn al viaj sugestoj; sed mi petegas por vi la favorkorecon de Dio.

Bonaj Spiritoj, kiuj volontas min helpi, donu al mi forton por malcedi al la influo de la malbonaj Spiritoj, kaj la lumon, kiun mi bezonas, por ne esti viktimo de iliaj ruzaĵoj. Antaŭgardu min de la fiero kaj de la tromemfido; elsarku el mia koro la ĵaluzemon, la malamon, la malbonvolemon kaj ĉian senton kontraŭan al la karito, kiuj estas pordoj malfermitaj al la Spiritoj de la malbono.

## Por peti korektiĝon de malvirto

18. *Antaŭparolo.* Niaj malbonaj instinktoj estas rezulto de malperfekteco de nia propra Spirito, kaj ne de nia korpo, kontraŭe la homo sin fortirus de ĉia respondeco. Nia pliboniĝo dependas de ni, ĉar ĉiu homo, en la uzrajto de siaj kapabloj, havas pri ĉiuj aferoj la liberecon fari aŭ ne fari, por fari la bonon, al li sufiĉas nur la volo.(Ĉap.XV, §10; ĉap.XIX, §12)

19. *Preĝo.* Vi donis al mi, ho mia Dio, la prudenton por distingi inter la bonon kaj malbonon; nu, de la momento, kiam mi rekonas, ke io estas malbona, mi estas kulpa, se mi ne penas rezisti al ĝi.

Liberigu min de la fiero, kiu povus malebligi al mi vidi miajn erarojn, kaj de la malbonaj Spiritoj, kiuj povas instigi min obstini.

El inter miaj malperfektaĵoj, mi konfesas, ke mi estas precipe inklina al ..., kaj mi ne rezistas al tia inklino nur tial, ke mi kutimiĝis cedi al ĝi.

Vi ne kreis min kulpa, ĉar Vi estas justa, sed Vi kreis min kun egala kapableco por la bono kaj la malbono; se mi sekvis la malbonan vojon, tio estas efiko

de mia libera volo. Sed tial, ke mi havis la liberecon fari la malbonon, mi havas ankaŭ la liberecon fari la bonon, sekve mi havas la liberecon ŝanĝi mian vojon.

Miaj nuntempaj malvirtoj estas restaĵo el la neperfektaĵoj konservitaj el miaj antaŭaj ekzistadoj; tio estas mia origina peko, de kiu mi povas liberiĝi per mia volo kaj kun la helpo de la bonaj Spiritoj.

Bonaj Spiritoj, kiuj protektas min, kaj precipe vi, mia Gardanĝelo, donu al mi forton por malcedi al la malbonaj sugestoj kaj por eliri kiel venkinto el la lukto.

La malvirtoj estas baroj, kiuj apartigas nin de Dio, kaj ĉiu malvirto venkita estas paŝo farita sur la vojo de la progreso, kiu nin alproksimigas al Li.

La Sinjoro, per Sia senlima favorkoreco, bonvolis doni al mi la nunan ekzistadon, por ke ĝi utilu al mia progreso; bonaj Spiritoj, helpu min uzi ĝin kun profito, por ke ĝi ne estu perdita kaj por ke, kiam al Dio plaĉos repreni ĝin de mi, mi eliru pli bona, ol mi eniris (Ĉap.V, § 5; ĉap.XVII, § 3.)

## Por peti forton kontraŭ tento

20. *Antaŭparolo.* Ĉia malbona penso povas origini el du fontoj: aŭ la malperfekteco mem de nia animo, aŭ ia pereiga influo, aganta sur ĝin; en tiu ĉi lasta okazo, ĝi estas ĉiam signo de malforteco, kiu faras nin taŭgaj por ricevi la influon, kaj sekve signo de malperfekteco de nia propra animo ; tial, iu, kiu falas, ne povas atribui sian kulpon al la influo de iu fremda Spirito, ĉar *tiu Spirito ne instigus la homon al la malbono, se li taksus la personon nealirebla por delogo.*

Kiam en ni aperas iu malbona penso, ni povas do imagi ian malican Spiriton, kiu instigas nin al la malbono kaj al kiu ni estas tute egale tiel liberaj cedi aŭ malcedi, kiel

se la instigoj venus de vivanta persono. Ni devas samtempe imagi, ke nia Gardanĝelo, aŭ protektanta Spirito, siaflanke, kontraŭstaras en ni al la malbona influo kaj atendas kun angoro *la decidon, kiun ni estas prenontaj.* Nia hezito ĉe la praktikado de malbono estas la voĉo de la bona Spirito, kiu manifestiĝas per la konscienco.

Oni ekkonas malbonan penson laŭ tio, ke ĝi deflankiĝas de la karito, kiu estas la bazo de ĉiu vera moralo; ke ĝi havas kiel principon la fieron, la vantamon aŭ la egoismon; ke ĝia efektivigo povas kaŭzi iun ajn malutilon al alia; kiam, fine, ĝi instigas nin fari al aliaj tion, kion ni ne volus, ke oni faru al ni. (Ĉap.XXVIII, § 15; ĉap. XV, § 10)

21. *Preĝo.* Dio Ĉiopova, ne lasu min fali en la tenton, kiun mi havas peki. Bonvolemaj Spiritoj, kiuj min protektas, deturnu de mi tiun malbonan penson, kaj donu al mi forton por rezisti al la sugesto de la malbono. Se mi falas, mi devos elaĉeti mian kulpon en tiu ĉi vivo aŭ en alia, ĉar mi estas libera elekti.

## Dankpreĝo pro venko kontraŭ tento

22. *Antaŭparolo.* Kiu malcedis al tento, tiu ŝuldas sian venkon al la helpo de la bonaj Spiritoj, kies voĉon li aŭkultis. Li devas tion danki al Dio kaj al sia Gardanĝelo.

23. *Preĝo.* Mia Dio, mi dankas Vin, ke Vi permesis al mi eliri kun venko el la lukto, kiun mi ĵus havis kontraŭ la malbono; permesu, ke tiu venko donu al mi forton por malcedi ĉe novaj tentoj.

Kaj vin, mia Gardanĝelo, mi dankas por la helpo, kiun vi donis al mi. Mia submetiĝo al viaj konsiloj povu denove havigi al mi vian protekton!

## **Por peti konsilon**

24. *Antaŭparolo.* Kiam ni hezitas pri tio, ĉu fari aŭ ne fari ion, ni devas, antaŭ ĉio, proponi al ni mem la jenajn demandojn:

1-e. Ĉu la ago, pri kies efektivigo mi hezitas, povas porti ian malutilon al iu alia?

2-e. Ĉu ĝi povas esti utila al iu?

3-e. Se iu farus tion al mi, ĉu mi estus kontenta?

Se la ago interesas nur nin mem, ni devas pesi la sumon da personaj profitoj kaj malprofitoj, kiuj povas el ĝi rezulti.

Se ĝi interesas alian personon, sed, utilante al unu, ĝi eble portos malutilon al alia, oni devas ankaŭ pesi la sumon de la bono kaj de la malbono, por agi aŭ ne agi.

Fine, eĉ pri la plej bonaj aferoj, estas ankoraŭ necese konsideri la oportunecon kaj la flankajn cirkonstancojn, ĉar io tre bona per si mem povas rezulti malbone en mallertaj manoj, se ĝi ne estas kondukita kun prudento kaj singardemo. Antaŭ ol komenci, oni devas konsulti siajn fortojn kaj rimedojn por plenumado.

En ĉiaj okazoj, oni povas ĉiam peti la helpon de la protektantaj Spiritoj, memorante jenan saĝan maksimon: Se vi dubas, ne agu. (Ĉap. XXVIII, § 38.)

25. *Preĝo.* En la nomo de Dio Ĉiopova, bonaj Spiritoj, kiuj min protektas, inspiru al mi la plej bonan decidon en la necerteco, en kiu mi troviĝas. Direktu mian penson al la bono, kaj deturnu la influon de tiuj, kiuj provus devojigi min.

## En la afliktoj de la vivo

26. *Antaŭparolo.* Ni povas peti de Dio surteran favorojn, kaj Li povas ilin al ni doni, kiam ili havas utilan kaj seriozan celon; sed tial, ke ni juĝas la utilecon de l' aferoj el nia vidpunkto, kaj nia vido estas limigita en la nuntempo, ni ne ĉiam vidas la malbonan flankon de tio, kion ni deziras. Dio, kiu vidas pli ĝuste ol ni kaj deziras nur nian bonon, povas do ne kontentigi nin, kiel patro rifuzas al sia infano tion, kio povas malutili al ĝi. Se tio, kion ni petas, ne estas al ni donata, ni ne devas senkuraĝiĝi; kontraŭe, estas necese pensi, ke la malhavo de tio, kion ni deziras, estas trudata al ni kiel provo aŭ kiel kulpelaĉeto, kaj ke nia rekompenco estos proporcia al la rezignacio, kun kiu ni eltenos la provon. (Ĉapitro XXVII, § 6; ĉap. II, §§ 5, 6, 7.)

27. *Preĝo.* Dio Ĉiopova, kiu vidas niajn afliktojn, konsentu favore aŭskulti la peton, kiun mi faras al Vi en tiu ĉi momento. Se mia peto estas malprudenta, pardonu ĝin al mi; se ĝi estas justa kaj utila en Viaj okuloj, la bonaj Spiritoj, kiuj plenumas Vian volon, venu al mia helpo por ĝia plenumiĝo.

Kio ajn okazos, mia Dio, plenumiĝu Via volo. Se miaj deziroj ne estas aŭskultataj, tiel estas, ĉar Vi decidis elprovi min, kaj mi submetiĝas sen murmuro. Konsentu, ke mi ne senkuraĝiĝu kaj ke mia fido kaj mia rezignacio ne ŝanceliĝu.

*(Formuli sian peton.)*

## Dankpreĝo pro ricevita favoro

28. *Antaŭparolo.* Oni devas konsideri feliĉaj okazoj ne nur tiujn tre gravajn; la plej malgrandaj laŭ la ŝajno ofte estas la plej influaj sur nian destinon. La homo facile forgesas la bonon kaj prefere memoras la afliktojn. Se ni notus tago post tago la bonfarojn, kies objekto

ni estas, ne petinte ilin, ni ofte mirus, ke ni ricevis tiom multajn, kiuj elviŝiĝis el nia memoro, kaj sentus honton pro nia maldankemo.

Ĉiuvespere, levante nian animon al Dio, ni devas rememori en ni mem la favorojn, kiujn Li faris al ni dum la tago kaj danki pro ili. Precipe en la sama momento, kiam ni sentas la efikon de Lia boneco kaj de Lia protekto, per spontanea movo ni devas atesti al Li nian dankemon; por tio sufiĉas penso, rememoranta la bonfaron: ne estas necese deturni nin de nia laboro.

La bonfaroj de Dio ne konsistas nur en materiaj aferoj; Lin oni devas danki ankaŭ por la bonaj ideoj, la feliĉaj inspiroj al ni venintaj. Dum fierulo atribuas ilin al sia propra merito, kaj nekredanto atribuas ilin al la hazardo, tiu, kiu havas fidon, dankas ilin al Dio kaj al la bonaj Spiritoj. Por tio, longaj frazoj estas senutilaj: "*Dankon, mia Dio, pro la bona penso al mi inspirita*" diras pli ol multaj paroloj. La spontanea impeto, kiu igas nin danki Dion pro ĉio bona, kio okazas al ni, atestas dankemon kaj humilecon, kiuj altiras al ni la simpation de la bonaj Spiritoj. (Ĉap. XXVII, §§ 7 kaj 8.)

29. *Preĝo.* Dio senlime bona, Via nomo estu glorata pro la bonfaroj, kiujn Vi konsentis al mi; mi ne estus inda je ili, se mi ilin atribuus al la hazardo de l' okazantaĵoj aŭ al mia propra merito.

Al vi, bonaj Spiritoj, kiuj estas la plenumantoj de la voloj de Dio, kaj precipe al vi, mia Gardanĝelo, mi dankas. Deturnu de mi la penson fieri pro tiuj bonfaroj kaj uzadi ilin por alia celo, ol por la bono.

Al vi mi aparte dankas pro ...

## Preĝo de submetiĝo kaj rezignacio

30. *Antaŭparolo.* Kiam motivo de aflikto venas al ni, se ni serĉas ĝian kaŭzon, ni ofte konstatas, ke ĝi estas

sekvo de nia malprudento aŭ neantaŭzorgemo, aŭ de ia antaŭa ago; en tiu okazo, ni devas plendi nur kontraŭ ni mem. Se la kaŭzo de iu malfeliĉo estas sendependa de io, kion ni mem faris, ĝi estas provo por la nuna vivo aŭ kulpelaĉeto de pasinta ekzistado, kaj, en ĉi tiu lasta okazo, la speco de la elaĉeto povas konatigi al ni la specon de la kulpo, ĉar ni estas ĉiam punataj laŭ la farita peko. (Ĉap. V, §§ 4, 6, kaj sekv.)

En tio, kio nin afliktas, ordinare ni nur vidas la nunan malbonaĵon, sed ne la postajn favorajn sekvojn, kiujn la aflikto povas alporti. La bono ofte estas sekvo de mallongedaŭra malbono, same kiel la resaniĝo de malsanulo estas rezultato de dolorigaj rimedoj, kiujn oni uzas por ĝin atingi. En ĉiuj okazoj ni devas submetiĝi al la volo de Dio, elteni kun kuraĝo la ĉagrenojn de la vivo, se ni volas, ke ili estu de Li prenataj en kalkulon kaj ke jena parolo de la Kristo estu aplikata al ni: "Feliĉaj tiuj, kiuj suferas". (Ĉap. V, § 18.)

31. *Preĝo.* Mia Dio, Vi estas suverene justa; ĉiu sufero sur la tero devas do havi sian kaŭzon kaj sian utilecon. Mi akceptas la aflikton, kiun mi ĵus suferis, kiel elaĉeton de pasintatempaj kulpoj kaj provon por la estonteco.

Bonaj Spiritoj, kiuj protektas min, donu al mi forton por elteni ĝin senmurmure; permesu, ke ĝi estu por mi utila averto; ke ĝi pligrandigu mian sperton; ke ĝi venku en mi fieron, ambicion, stultan vantamon kaj egoismon, kaj ke ĝi kontribuu ankaŭ al mia progreso.

32. *(Alia).* Mi sentas, mia Dio, bezonon preĝi al Vi, por ke Vi donu al mi forton, por elteni la provojn kiujn al Vi plaĉis sendi al mi. Permesu, ke la lumo fariĝu sufiĉe viva en mia spirito, por ke mi komprenu la tutan amplekson de amo, kiu min afliktas, ĉar ĝi volas min

savi. Mi submetiĝas kun rezignacio, ho mia Dio; sed, ve! La kreito estas tiel malforta, ke, se Vi ne subtenos min, mi timas perei. Ne forlasu min, Sinjoro, ĉar sen Vi mi nenion povas.

33. *(Alia).* Mi levis mian rigardon al Ci, ho Eternulo, kaj mi sentas min fortigita. Ci estas mia forto, ne forlasu min; ho mia Dio! Mi estas frakasita sub la pezo de miaj maljustaĵoj! helpu min; Ci konas la malfortecon de mia karno, kaj Ci ne deturnas Ciajn okulojn for de mi! mi estas konsumata de arda soifo; ŝprucigu la fonton de vivanta akvo, kaj mi estos sensoifigita. Mia buŝo malfermiĝu, nur por kanti Ciajn laŭdojn kaj ne por murmuri kontraŭ la afliktoj de mia vivo. Mi estas malforta, Sinjoro, sed Cia amo subtenos min.

Ho Eternulo! nur Ci estas granda, nur Ci estas la fino kaj la celo de mia vivo. Cia nomo estu glorata, se Ci min frapas, ĉar Ci estas la Mastro kaj mi la malfidela servanto; mi klinos mian frunton sen plendo, ĉar nur Ci estas granda, nur Ci estas la celo.

## En minacanta danĝero

34. *Antaŭparolo.* Per la danĝeroj, kiujn ni travivas, Dio atentigas nin pri nia malforteco kaj la rompebleco de nia ekzistado. Li montras al ni, ke nia vivo estas en Liaj manoj kaj ke ĝi pendas de fadeno, kiu povas rompiĝi en la momento, kiam ni tion tute ne atendas. Pri tio neniu havas privilegion, ĉar la granduloj kaj la malgranduloj estas submetataj al la samaj kondiĉoj.

Se oni ekzamenas la specon kaj la sekvojn de la danĝero, oni vidas, ke plej ofte tiuj sekvoj, se ili efektiviĝus, estus puno pro kulpo farita aŭ pro *malplenumo de iu devo*.

35. *Preĝo.* Dio Ĉiopova, kaj vi mia Gardanĝelo, helpu min! Se mi devas perei, plenumiĝu la volo de Dio.

Se mi estas savota, la resto de mia vivo estu elaĉeto de la malbono, kiun mi faris kaj pri kiu mi pentas.

## Dankpreĝo post forsavo de danĝero

36. *Antaŭparolo*. Per la danĝero, kiun ni travivis, Dio montras al ni, ke ni povas tre baldaŭ esti vokitaj, por prezenti niajn kalkulojn pri l' uzado, kiun ni faris el la vivo; Li tiel avertas nin zorgi nin mem kaj nin korekti.

37. *Preĝo*. Mia Dio, kaj vi, mia Gardanĝelo, mi dankas Vin por la helpo, kiun Vi sendis al mi en la danĝero, kiu min minacis. Tiu danĝero estu por mi averto kaj klarigu al mi pri la kulpoj, kiuj altiris ĝin al mi. Mi komprenas, Sinjoro, ke mia vivo estas en Viaj manoj, kaj ke Vi povas ĝin repreni de mi, kiam tio al Vi plaĉos. Inspiru al mi, pere de la bonaj Spiritoj, kiuj min helpas, la intencon uzi utile la tempon, kiun Vi ankoraŭ donos al mi sur la tero.

Mia Gardanĝelo, subtenu min en la decido, kiun mi prenas, elaĉeti miajn kulpojn kaj fari ĉiun bonon, kiu estos en mia povo, por ke mi venu ŝarĝita de malpli da malperfektaĵoj en la mondon de la Spiritoj, kiam al Dio plaĉos voki min tien.

## En la momento ekdormi

38. *Antaŭparolo*. La dormo estas la ripozo de la korpo, sed la Spirito ne bezonas ripozon. Dum la sent-umoj malvigliĝas, la animo parte liberiĝas el la materio kaj uzas siajn kapablojn de Spirito. La dormo estas donita al la homo por riparo de la korpaj fortoj kaj por reakiro de moralaj fortoj. Dum la korpo reakiras la elementojn, kiujn ĝi perdis per la agado dum la mal-dormo, la Spirito iras revigliĝi ĉe aliaj Spiritoj; li

ĉerpas el tio, kion li vidas, el tio, kion li aŭdas kaj el la konsiloj, kiujn oni donas al li, ideojn, kiujn li retrovas ĉe la vekiĝo en stato de intuicio; la dormo estas la dumtempa reveno de l' ekzilito en sian veran patrujon; dormanto estas malliberulo, momente reakirinta la liberecon.

Sed okazas, kiel ĉe malvirta malliberulo, ke la Spirito ne ĉiam profitas tiun momenton da libereco por sia progreso; se li havas malbonajn instinktojn, anstataŭ serĉi la societon de la bonaj Spiritoj, li serĉas la rondon de siaj similuloj, kaj iras viziti lokojn, kie li povas libere konduti laŭ siaj inklinoj.

Kiu estas konvinkita pri tiu vero, tiu levu sian penson en la momento, kiam li sentas alproksimiĝon de la dormo; petu la konsilojn de la bonaj Spiritoj kaj de tiuj, kies memoro estas al li kara, por ke ili venu kolektiĝi al li dum la mallonga tempo, kiu estas al li donata, kaj ĉe la vekiĝo li sentos pli da forto kontraŭ la malbono, pli da kuraĝo kontraŭ la malprospero.

39. *Preĝo.* Mia animo estas vidiĝonta dum momento kun aliaj Spiritoj. La bonuloj venu helpi min per siaj konsiloj. Mia Gardanĝelo, permesu, ke ĉe mia vekiĝo mi konservu daŭran kaj utilan impreson de tiuj konsiloj.

## Kiam oni antaŭvidas proksima sian morton

40. *Antaŭparolo.* La fido al la estonteco, la altiĝo de la penso dum la vivo al estontaj destinoj, helpas la rapidan liberiĝon de la Spirito, malfortigante la ligilojn, kiuj katenas ĝin al la korpo, kaj ofte, antaŭ ol la korpa vivo estingiĝos, la animo, senpacienca, jam ekflugas al la senlimo. Kontraŭe, ĉe la homo, kiu koncentrigas ĉiujn siajn pensojn sur la materiajn aferojn, tiuj ligiloj estas

persistemaj, *la disiĝo estas peniga kaj dolora*, kaj la vekiĝo en la transtomba mondo estas plena de konfuzo kaj angoro.

41. *Preĝo*. Mia Dio, mi kredas al Vi kaj al Via senlima boneco; tial mi ne povas kredi, ke Vi donis al la homo intelekton, kiu ebligas al li koni Vin, kaj aspiron al la estonteco, por lin ĵeti en la nenion.

Mi kredas, ke mia korpo estas nur la pereema envolvaĵo de mia animo kaj ke, kiam ĝi estos ĉesinta vivi, mi vekiĝos en la mondo de la Spiritoj.

Dio Ĉiopova, mi sentas, ke rompiĝas la ligiloj, kiuj kunigas mian animon kun mia korpo, kaj baldaŭ mi devos prezenti kalkulojn pri l' uzado farita el la vivo, kiun mi lasas.

Mi estas ricevonta la sekvojn de la bono kaj de malbono, kiujn mi faris; tie ne plu estas iluzioj, nenia artifiko estas plu ebla; mia tuta pasinteco estas elvolviĝonta antaŭ mi, kaj mi estos juĝita laŭ miaj agoj.

Neniun el la surteraj bonaĵoj mi kunportos; honoroj, riĉaĵoj, kontentigo de la vantamo kaj de la fiero, ĉio, fine, apartenanta al la korpo, restos sur la tero; nenion el ĉio ĉi iros kun mi, kaj nenio el ĉio tio donos al mi la plej malgrandan helpon en la mondo de la Spiritoj. Mi kunportos kun mi nur tion, kio apartenas al la animo, tio estas, la bonajn kaj malbonajn kvalitojn, kiuj estos taksitaj en la pesilo de severa justeco, kaj mi estos juĝita kun tiom pli da severeco, kiom pli da okazoj mia pozicio sur la tero donis al mi por la bono, kiun mi ne faris. (Ĉap. XVI, § 9.)

Favorkora Dio, mia pento venu al Vi! Plaĉu al Vi etendi al mi Vian indulgon.

Se al Vi plaĉos plilongigi mian ekzistadon, la restonta tempo estu uzata por ripari tiom, kiom al mi estos

eble, la malbonon, kiun mi faris. Se mia horo sonis senrimede, mi kunportas la konsolantan penson, ke estos al mi permesite elaĉeti miajn kulpojn en novaj provoj, por iam meriti la feliĉon de l' elektitoj.

Se al mi ne estas permesite tuj ĝui tiun senmiksan feliĉon, kiu estas premio nur de la perfekta justulo, mi scias, ke la espero ne estos disde mi por ĉiam forprenita, kaj ke, kun laboro, mi alvenos al la celo pli malpli baldaŭ laŭ miaj klopodoj.

Mi scias, ke bonaj Spiritoj kaj mia Gardanĝelo estas apud mi por ricevi min; baldaŭ mi vidos ilin, kiel ili min vidas. Mi scias, ke mi retrovos tiujn, kiujn mi amis sur la tero, *se mi tion meritas*, kaj ke tiuj, kiujn mi lasos sur la tero, venos retrovi min, por ke ni ĉiuj estu iam kune por ĉiam, kaj ke dum la atendado mi povos veni kaj viziti ilin.

Mi scias ankaŭ, ke mi retrovos tiujn, kiujn mi ofendis; volu ili pardoni al mi tion, kion ili havas kontraŭ mi kiel riproĉindaĵon: mian fieron, mian malmildecon, miajn maljustajn agojn, por ke ilia ĉeesto ne frakasu min de honto!

Mi pardonas tiujn, kiuj faris al mi malbonon sur la tero; mi ne portas malamon kontraŭ ili, kaj mi petegas Dion pardoni ilin.

Sinjoro, donu al mi forton por lasi sen bedaŭro la maldelikatajn ĝojojn de tiu ĉi mondo, kiuj neniom valoras kompare kun la puraj ĝojoj de la mondo, kien mi estas enironta. Tie, por la justulo, ne plu estas turmentoj, ne plu suferoj, ne plu ĉagrenoj; nur la kulpulo suferas, sed al li restas la espero.

Bonaj Spiritoj, kaj vi, mia Gardanĝelo, ne lasu min peki en ĉi tiu lasta momento; igu la dian lumon brili antaŭ miaj okuloj, por refortigi mian fidon, se ĝi ŝanceliĝos.

NOTO. Vidu malsupre la paragrafon V: Preĝoj por la malsanuloj kaj la obseditoj.

## III. PREĜOJ POR ALIAJ

### Por afliktito

42. *Antaŭparolo* Se estas en la intereso de la afliktito, ke lia provo daŭru plu, ĝi ne estos mallongigita pro nia peto; sed estus malpieco senkuraĝiĝi tial, ke la peto ne estas aŭskultata; cetere, se la provo ne ĉesos, oni povas esperi, ke ia konsolo mildigos ties amarecon. Kio estas vere utila por iu, kiu estas en sufero, tio estas la kuraĝo kaj la rezignacio, sen kiuj liaj suferoj estas senutilaj por li, ĉar li estos devigita rekomenci la provon. Sekve, precipe al tiu celo oni devas direkti niajn klopodojn, aŭ vokante la bonajn Spiritojn por lin helpi, aŭ revigligante la animon de l' afliktito per konsiloj kaj kuraĝigo, aŭ, fine, helpante lin materiale, se tio estas ebla. En ĉi tiu okazo, la preĝo povas havi ankaŭ rektan efikon, direktante al la persono emanaĵon kun la celo fortigi lian animon. (Ĉap.V, §§ 5 kaj 27; ĉap. XXVII, §§ 6 kaj 10.)

43. *Preĝo*. Mia Dio, kies boneco estas senlima, volontu mildigi la amarecon de la situacio de N..., se tia estas Via volo.

Bonaj Spiritoj, en la nomo de Dio Ĉiopova, mi petegas vin helpi lin en liaj afliktoj. Se, en lia intereso, la afliktoj ne povas esti ŝparataj al li, igu lin kompreni, ke ili estas necesaj al lia progreso. Donu al li konfidon al Dio kaj al la estonteco, kiuj faros al li malpli amaraj la afliktojn. Donu al li ankaŭ la forton por ne perei pro malespero, kiu perdigus por li la fruktojn de la sufero kaj farus ankoraŭ pli peniga lian estontan situacion. Konduku mian penson al li, kaj povu ĝi subteni lian kuraĝon.

## Dankpreĝo pro bonfaro ricevita de alia

44. *Antaŭparolo*. Kiu ne estas regata de l' egoismo, tiu ĝojas pro la bonaĵo, kiu okazas al sia proksimulo, eĉ tiam, kiam li ne petis ĝin per preĝo.

45. *Preĝo*. Mia Dio, estu glorata pro la feliĉo, kiu okazis al N...

Bonaj Spiritoj, permesu, ke li tie vidu efikon de la boneco de Dio. Se la bonaĵo, kiu okazas al li, estas provo, inspiru lin, por ke li uzu ĝin por la bono kaj ne fieru pro ĝi, por ke tiu bonaĵo ne fariĝu malutila al li en la estonteco.

Vi, mia bona Genio, kiu min protektas kaj deziras mian feliĉon, evitigu al mi ĉian senton de envio aŭ de ĵaluzo.

## Por niaj malamikoj kaj por tiuj, kiuj deziras al ni malbonon

46. *Antaŭparolo*. Jesuo diris: *Amu viajn malamikojn*. Tiu maksimo estas la supro de la kristana karitemo; sed per tio Jesuo neniel opinias, ke ni devas havi por niaj malamikoj tian saman korinklinon, kian ni havas por niaj amikoj; per tiuj paroloj li diras al ni, ke ni forgesu la ofendojn, ni pardonu al ili la malbonon, kiun ili faras al ni, ni pagu al ili la malbonon per bono. Krom la merito, kiu tio estas en la okuloj de Dio, tio montras al la okuloj de la homoj la veran superecon. (Ĉap.XII, §§ 3 kaj 4.)

47. *Preĝo*. Mia Dio, mi pardonas al N.... la malbonon, kiun li al mi faris kaj tiun, kiun li volis al mi fari, tiel kiel mi deziras, ke Vi al mi pardonu kaj li mem al mi pardonu la kulpojn, kiujn mi eble faris. Se Vi metis lin sur mian vojon kiel provon, Via volo plenumiĝu.

Deturno de mi, ho mia Dio, la ideon malbeni lin kaj ĉian deziron malican kontraŭ li. Permesu, ke mi nenian ĝojon sentu pro la malfeliĉoj, kiuj povos okazi al li, nek ian ĉagrenon pro la bonaĵoj, kiuj povos esti al li donataj, por ke mia animo ne malpuriĝu per pensoj neindaj je kristano.

Povu Via boneco, Sinjoro, etendiĝi super lin kaj gvidi lin al pli bonaj sentoj pri mi!

Bonaj Spiritoj, inspiru al mi forgeson pri la malbono kaj memoron pri la bono. La malamo, venĝemo, deziro repagi al li malbonon per malbono neniel eniru en mian koron, ĉar malamo kaj venĝemo estas propraj nur al la malbonaj Spiritoj, ĉu en la karno, ĉu ekster la karno! Kontraŭe, mi estu preta aletendi al li fratan manon, doni al li bonon por malbono, kaj veni helpi lin, se tio estas en mia povo!

Mi deziras, por provi la sincerecon de miaj paroloj, ke estu al mi donata okazo esti al li utila; sed precipe gardu min, ho mia Dio, ke mi ne faru tion pro fiero aŭ parado, lin malaltigante per humiliga grandanimeco, kio perdigus al mi la frukton de mia ago, ĉar tiam mi meritus, ke estu al mi aplikitaj jenaj paroloj de Jesuo: *Vi jam ricevis vian rekompencon*. ( Ĉap. XIII, §§ 1 kaj sekv.)

## Dankpreĝo pro bono konsentita al niaj malamikoj

48. *Antaŭparolo*. Neniel deziri malbonon al la malamikoj estas nur duona karitemo; la vera karitemo volas, ke ni deziru al ili bonon kaj ke ni estu feliĉaj pro la bono, kiun ili ricevas. (Ĉap. XII, §§ 7 kaj 8.)

49. *Preĝo*. Mia Dio, laŭ Via justeco, al Vi plaĉis ĝojigi la koron de N.... Mi dankas tion al Vi pro li, malgraŭ la malbono, kiun li al mi faris aŭ penis fari. Se li tion profitus por humiligi min, mi tion akceptus kiel provon por mia karito.

Bonaj Spiritoj, kiuj min protektas, ne permesu, ke mi ekpensu ian ĉagrenon pro tio; deturnu de mi la envion kaj ĵaluzon, kiuj malaltigas; kontraŭe, inspiru al mi la grandanimecon, kiu altigas. La humiligo estas en la malbono kaj ne en la bono, kaj ni scias, ke pli malpli baldaŭ justeco estos farita al ĉiu laŭ liaj agoj.

## Preĝo por la malamikoj de Spiritismo

50. *Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili satiĝos.*

*Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutitaj pro justeco, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo. Feliĉaj estas vi, kiam oni vin riproĉos kaj persejutos kaj false vin kalumnios pro mi. Ĝoju kaj raviĝu, ĉar via rekompenco estos granda en la ĉielo; ĉar tiel oni persekutis la profetojn, kiuj estis antaŭ vi.* (Mateo, 5:6, 10-12.)

*Kaj ne timu tiujn, kiuj mortigas la korpon, sed ne povas mortigi la animon; sed prefere timu tiun, kiu povas pereigi kaj animon kaj korpon en Gehena.* ( Mateo, 10:28.)

51. *Antaŭparolo*. El ĉiuj liberoj, la plej netuŝebla estas la libero pensi, kiu ampleksas ankaŭ la liberon de konscienco. Anatemi tiujn, kiuj ne pensas kiel ni, estas postuli tiun liberon por si kaj ĝin rifuzi al aliaj, estas malobei la unuan ordonon de Jesuo: kariton kaj amon al la proksimulo. Persekuti homojn pro ilia kredo estas atenci kontraŭ la plej sankta rajto, kiun ĉiu homo havas: kredi, kiel al li plaĉas, kaj adori Dion, kiel li komprenas la Sinjoron. Trudi al ili eksterajn agojn similajn al la niaj, estas montri, ke oni atentas pli al la formoj ol al la fundo, al la ŝajnoj ol al la konvinko. La devigita malkonfeso neniam donis fidon: ĝi povas fari nur hipokritulojn; ĝi estas trouzo de materia forto, kiu ne pruvas la veron; *la vero estas certa pri si mem: ĝi konvinkas, sed ne persekutas, ĉar ĝi ne bezonas persekuti*.

Spiritismo estas opinio, kredo; eĉ se ĝi estus religio, kial oni ne havus la liberecon deklari sin spiritisto, same kiel oni havas la liberecon diri sin katoliko, judo aŭ protestanto, partiano de tia aŭ tia alia filozofia doktrino, de tia aŭ tia alia ekonomia sistemo? Tiu kredo estas aŭ falsa aŭ vera; se ĝi estas falsa, ĝi falos per si mem, ĉar la eraro ne povas venki la veron, kiam fariĝas lumo en la intelektoj; se ĝi estas vera, nenia persekutado faros ĝin falsa.

*La persekutado estas la bapto de ĉiu nova ideo granda kaj justa;* ĝi kreskas laŭ la grandeco kaj la graveco de l' ideo. La furiozeco kaj la kolero de la malamikoj de l' ideo estas proporciaj al la timo, kiun ĝi inspiras al ili. Tial Kristanismo estis iam persekutata kaj Spiritismo estas nun persekutata, tamen kun tiu diferenco, ke Kristanismo estis persekutata de l' Idolanoj, dum Spiritismo estas persekutata de la Kristanoj. La tempo de la sangverŝantaj persekutadoj estas forpasinta, tio estas vera, sed se oni ne plu mortigas la korpon, oni torturas la animon; oni ĝin atakas eĉ je ĝiaj plej intimaj sentoj, je ĝiaj plej karaj korligiloj; oni disigas la familiojn, oni instigas patrinon kontraŭ filinon, edzinon kontraŭ edzon; oni atakas eĉ la korpon je ties bezonoj materiaj, forprenante de la homo la perlaboron de sia ĉiutaga pano, por lin venki per malsato. (Cap. XXIII, §§ 9 kaj sekv.)

Spiritistoj, ne afliktiĝu pro la frapoj, kiujn oni donas al vi, ĉar ili pruvas, ke vi estas kun la vero; alie, oni lasus vin trankvilaj, oni ne frapus vin. Tio estas provo por via fido, ĉar laŭ via kuraĝo, via rezignacio, via persistemo, Dio ekkonos vin inter Siaj fidelaj servantoj, kiujn Li nun nombras, por doni al ĉiu la parton, kiu al ĉiu apartenas pro ĉies verkoj.

Laŭ la ekzemplo de l' unuaj Kristanoj, estu fieraj porti vian krucon. Kredu al la parolo de la Kristo, kiu

diris. "Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutitaj pro justeco, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo. Ne timu tiujn, kiuj mortigas la korpon, sed ne povas mortigi la animon." Li diris ankaŭ: "Amu viajn malamikojn, faru bonon al tiu, kiu faras al vi malbonon, kaj preĝu por tiuj, kiuj persekutas vin". Montru, ke vi estas liaj veraj disĉiploj kaj ke via doktrino estas bona, ĉar vi faras tion, kion li diris kaj mem faris.

La persekutado ne longe daŭros; atendu do pacience la ektagiĝon, ĉar la matena stelo jam montriĝas en la horizonto. (Ĉap.XXIV, §§ 13 kaj sekv.)

52. *Preĝo*. Sinjoro, per la buŝo de Jesuo, Via Mesio, Vi diris al ni: "Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutitaj pro justeco; pardonu viajn malamikojn; preĝu por tiuj, kiuj vin persekutas"; kaj li mem montris al ni la vojon, preĝante por siaj turmentantoj.

Laŭ lia ekzemplo, mia Dio, ni petas Vian favorkorecon por tiuj, kiuj ne konas Viajn diajn instruojn, la solajn, kiuj povas certigi la pacon en tiu ĉi mondo kaj en la alia. Kiel la Kristo, ni diras al Vi: "Pardonu ilin, mia Patro, ĉar ili ne scias, kion ili faras."

Donu al ni forton por elteni kun pacienco kaj rezignacio, kiel provojn por nia fido kaj nia humileco, iliajn mokojn, iliajn insultojn, iliajn kalumniojn kaj persekutojn; deturnu de ni ĉian penson de revenĝo, ĉar la horo de Via justeco sonos por ĉiuj, kaj ni ĝin atendas, submetiĝante al Via sankta volo.

## Preĝo por ĵusnaskita infano

53. *Antaŭparolo*. La Spiritoj atingas la perfektecon nur travivinte la provojn de l' enkorpa vivo; tiuj, kiuj estas en vaganteco, atendas, ĝis Dio permesos al ili repreni ekzistadon, kiu havigos al ili rimedon por progresi, aŭ

per elaĉeto de pasintaj kulpoj pere de suferoj, al kiuj ili estas submetataj, aŭ plenumante mision utilan al la homaro. Iliaj progreso kaj estonta feliĉo estas proporciaj al la maniero, kiel ili uzas la tempon, kiun ili estas pasontaj sur la tero. La tasko, gvidi iliajn unuajn paŝojn kaj direkti ilin al la bono, estas komisiita al la gepatroj, kiuj respondos antaŭ Dio por la maniero, kiel ili plenumis sian devon. Por faciligi la plenumon de tiu tasko, Dio faris el la gepatra amo kaj el la fila amo leĝon de la naturo, leĝo, kiu neniam estas senpune malobeata.

54. *Preĝo.* (Fare de la gepatroj.) Spirito, kiu enkarniĝis en la korpon de nia infano, estu bonvena ĉe ni. Dio Ĉiopova, kiu lin sendis, estu glorata.

Li estas deponitaĵo, al ni konfidita kaj pri kiu ni devos iam prezenti kalkulon. Se li apartenas al la nova generacio de la bonaj Spiritoj, kiuj devas loĝi sur la tero, dankon, ho mia Dio, por tiu favoro! Se li estas malperfekta animo, nia devo estas helpi ilian progreson sur la vojo de la bono per niaj konsiloj kaj ekzemploj; se li falos en la malbonon pro nia kulpo, ni estos respondecaj antaŭ Vi, ĉar ni ne estos plenumintaj nian mision koncerne lin.

Sinjoro, subtenu nin en nia tasko, kaj donu al ni forton kaj volon por ĝin plenumi. Se ĉi tiu infano devas esti objekto de provoj por ni, estu farata Via volo!

Bonaj Spiritoj, kiuj venis prezidi lian naskiĝon kaj devas akompani lin dum la vivo, ne forlasu lin. Forigu de li la malbonajn Spiritojn, kiuj provus konduki lin al la malbono; donu al li forton, por malcedi al iliaj sugestoj, kaj kuraĝon por suferi kun pacienco kaj rezignacio la provojn, kiuj lin atendas sur la tero. (Ĉap. XIV, § 9.)

55. *(Alia).* Mia Dio, Vi konfidis al mi la sorton de unu el Viaj Spiritoj; permesu, Sinjoro, ke mi estu inda

je la tasko al mi donita; donu al mi Vian protekton; lumigu mian intelekton, por ke mi povu baldaŭ vidi la inklinojn de tiu, kiun mi devas prepari por eniri en Vian pacon.

56. *(Alia).* Tre bona Dio, ĉar al Ci plaĉis permesi al la Spirito de tiu ĉi infano veni, por denove sperti la surterajn provojn destinitajn progresigi lin, donu al li la lumon, por ke li lernu koni, ami kaj adori Cin. Per Cia Ĉiopoveco konsentu, ke tiu ĉi animo revirtiĝu en la fonto de Ciaj diaj instruoj; ke , sub la protekto de ĝia Gandanĝelo, ĝia intelekto kresku, elvolviĝu kaj aspiru ĉiam pli kaj pli alproksimiĝi al Ci; ke la scienco de Spiritismo estu la brila lumo, gvidanta lin tra la rifoj de la vivo; fine, ke li sciu taksi la tutan amplekson de Cia amo, kiu elprovas nin por nin purigi.

Sinjoro, ĵetu patran rigardon sur la familion, al kiu Ci konfidis tiun ĉi animon; povu ĝi kompreni la gravecon de sia misio, kaj ĝermigi en tiu ĉi infano bonajn semojn ĝis la tempo, kiam li povos, per siaj propraj aspiroj, leviĝi al Ci.

Bonvolu, ho mia Dio, aŭskulti tiun ĉi humilan preĝon en la nomo kaj pro la meritoj de tiu, kiu diris: "Lasu la infanojn veni al mi; ne malhelpu ilin, ĉar el tiaj estas la regno de Dio."

## Por agonianto

57. *Antaŭparolo.* La agonio esta la komenco de la disiĝo de l' animo je la korpo; oni povas diri, ke en tiu momento la homo havas unu piedon en tiu ĉi mondo kaj la duan jam en la alia mondo. Tiu transiro kelkfoje estas peniga por tiuj, kiuj estas tre alligitaj al la materio kaj vivis pli por la bonaĵoj de tiu ĉi mondo, ol de la alia, aŭ kies konscienco estas skuata de bedaŭroj kaj de riproĉoj;

por tiuj, kontraŭe, kies pensoj leviĝis al la senlimo kaj estas liberigitaj el la materio, la ligiloj pli facile rompiĝas kaj la lastaj momentoj estas neniel doloraj; la animo tiam estas ligita al la korpo nur per fadeno, dum en la unua okazo, ĝi havas profundajn radikojn; en ĉiuj okazoj la preĝo forte influas sur la faradon de la disiĝo. (Vidu, malsupre: Preĝoj por la malsanuloj. *La Ĉielo kaj la Infero,* 2-a parto, ĉ. I, *La Transiro.*)

58. *Preĝo.* Dio potenca kaj favorkora, jen animo, kiu lasas sian surteran envolvaĵon, por reveni en la mondon de la Spiritoj, ĝian veran patrujon; povu ĝi tien eniri en paco kaj Via favorkoreco etendiĝi sur ĝin.

Bonaj Spiritoj, kiuj akompanis ĝin sur la tero, ne forlasu ĝin en ĉi tiu lasta momento; donu al ĝi forton, por elteni la lastajn suferojn, kiujn ĝi devas havi tie ĉi por sia estonta progreso; inspiru ĝin, por ke ĝi dediĉu al la pento pro sia kulpoj la lastajn ekbrilojn de intelekto, al ĝi restantajn, aŭ kiuj povas al ĝi momente reveni.

Gvidu mian penson, por ke ĝi faru malpli peniga la laboron de la disiĝo, kaj ĝi portu en lian animon, en la momento, kiam ĉi tiu lasas la teron, la konsolojn de l' espero.

## IV. PREĜOJ POR TIUJ, KIUJ JAM NE ESTAS SUR LA TERO

### Por ĵusmortinto

59. *Antaŭparolo.* La preĝoj por la Spiritoj, ĵus forlasintaj la teron, ne havas kiel celon nur doni al ili ateston de simpatio; tiuj preĝoj havas ankaŭ kiel efikon helpi ilian liberiĝon kaj sekve mallongigi la konfuzon, kiu ĉiam venas post la disiĝo, kaj fari pli trankvila la

vekiĝon. Sed ankaŭ tiam, kiel en ĉiu alia cirkonstanco, la efikeco estas en la sincereco de la penso, kaj ne en la abundeco de paroloj, eldirataj pli aŭ malpli parade kaj en kiuj, plej ofte, la koro ne partoprenas.

La preĝoj, elirantaj el la koro, resonas ĉirkaŭ la Spirito, kies ideoj estas ankoraŭ konfuzaj, kiel amikaj voĉoj, venantaj eltiri lin el la dormo. (Ĉap. XXVII, § 10.)

60. *Preĝo.* Dio Ciopova, Via favorkoreco etendiĝu sur la animon de N..., kiun Vi ĵus revokis al Vi. La provoj, kiujn li (aŭ ŝi) havis sur la tero, povu esti al li (aŭ ŝi) kalkulitaj, kaj povu niaj preĝoj mildigi kaj mallongigi la penojn, kiujn eble li (aŭ ŝi) ankoraŭ havas kiel Spirito!

Bonaj Spiritoj, kiuj venis ricevi lin, kaj precipe vi, lia Gardanĝelo, estu ĉe li kaj helpu lin liberiĝi el la materio; donu al li lumon kaj konscion pri si mem, por eltiri lin el la konfuzo, kiu sekvas la transiron de l' en-korpa vivo al la spirita vivo. Inspiru al li penton pro l' eraroj, kiujn li eble faris, kaj deziron, ke al li estu permesite repagi ilin, por plirapidigi sian progreson en direkto al feliĉa eterna vivo.

N..., vi ĵus reeniris en la mondon de la Spiritoj, kaj tamen vi estas tie ĉi inter ni; vi vidas kaj aŭdas nin, ĉar diferenco inter vi kaj ni estas nur la pereema korpo, kiun vi ĵus forlasis kaj kiu baldaŭ fariĝos polvo.

Vi forlasis la maldelikatan envolvaĵon ŝanĝeman kaj morteman, kaj vi konservis nur la eterecan envolvaĵon nepereeman kaj neatingeblan por la suferoj. Se vi ne plu vivas per la korpo, vi vivas la vivon de la Spiritoj, kaj tia vivo ne konas la sortobatojn, kiuj afliktas la homaron.

Vi jam ne havas la vualon, kiu kaŝas antaŭ niaj okuloj la belaĵojn de l' estonta vivo; de nun vi povos

rigardadi novajn mirindaĵojn, dum ni estas ankoraŭ tenataj en la mallumo.

Vi povas traflugi la spacon kaj viziti la mondojn libere, dum ni pene rampas sur la tero, kie nin katenas nia materia korpo, simila por ni al peza ŝarĝo.

La horizonto de la senlimo estas etendiĝonta antaŭ vi, kaj antaŭ tiom da grandaĵoj vi komprenos la vanecon de niaj surteraj deziroj, de niaj mondaj ambicioj kaj de la frivolaj ĝojoj, el kiuj la homoj faras siajn ĝuojn.

La morto por la homoj estas nur materia disiĝo dum kelkaj momentoj. El la ekzilejo, kie nin tenas ankoraŭ la volo de Dio kaj la devoj, kiujn koncernas nin plenumi sur la tero, ni sekvos vin per la penso ĝis la momento, kiam estos al ni permesite rekuniĝi kun vi, same kiel vi jam rekuniĝis kun tiuj, kiuj liberiĝis pli frue ol vi.

Se ni ne povas iri al vi, vi povas veni al ni. Venu do inter tiujn, kiuj vin amas kaj kiujn vi amis; subtenu ilin en la provoj de la vivo; prigardu tiujn, kiuj estas al vi karaj; protektu ilin laŭ via povo kaj mildigu iliajn ĉagrenojn per la penso, ke vi estas pli feliĉa nun, kaj per la konsola certeco, ke ili kaj vi kolektiĝos en pli feliĉa mondo.

En la mondo, kie vi estas, ĉiuj surteraj resentoj devas estingiĝi. Povu vi, por via estonta feliĉo, tie de nun esti neatingebla por malbonaj resentoj! Pardonu do tiujn, kiuj eble estis malpravaj kontraŭ vi, kiel vin pardonas tiuj, kiujn vi eble ofendis.

NOTO. Oni povas aldoni al tiu preĝo, kiu aplikiĝas al ĉiuj, kelkajn apartajn vortojn laŭ privataj cirkonstancoj de familio aŭ de amikeco kaj laŭ la situacio de la mortinto.

Se la mortinto estas infano, Spiritismo instruas al ni, ke li neniel estas ĵuskreita Spirito, sed ke li jam vivis kaj eble estas tre progresinta. Se lia lasta ekzistado estis mallonga, ĝi estis nur kompletigaĵo de provo, aŭ devis esti provo por la gepatroj.

61. *(Alia).*[*] Sinjoro Ĉiopova, via favorkoreco etendiĝu sur niajn gefratojn, kiuj ĵus forlasis la teron! Via lumo estu en iliaj okuloj! Elirigu ilin el la mallumo; malfermu iliajn okulojn kaj iliajn orelojn! Viaj bonaj Spiritoj ĉirkaŭu ilin kaj igu ilin aŭdi parolojn de paco kaj espero!

Sinjoro, kvankam ni estas senindaj, ni kuraĝas petegi Vian favorkoran indulgon por tiu el niaj gefratoj, kiu estas ĵus revokita el la ekzilo; permesu, ke lia reveno estu la reveno de l' erarinta filo. Forgesu, ho mia Dio, la erarojn, kiujn li eble faris, kaj memoru nur la bonon, de li eble faritan. Via justeco estas neŝanĝebla, ni tion scias, sed Via amo estas senlima; ni Vin petegas, plimildigu Vian justecon per tiu fonto de boneco, kiu elfluas el Vi.

Lumo fariĝu por vi, mia frato, kiu ĵus lasis la teron! la bonaj Spiritoj de la Sinjoro alproksimiĝu al vi, ĉirkaŭu vin kaj helpu vin forskui la terajn katenojn! Komprenu kaj vidu la grandecon de nia Mastro; submetiĝu sen murmuro al Lia justeco, sed neniam malesperu pri Lia favorkoreco. Frato! Serioza rememoro pri via pasinteco malfermu al vi la pordojn de l' estonteco, komprenigante al vi la kulpojn, kiujn vi lasis malantaŭ vi, kaj la laboron, kiun vi devas fari por ilin repagi! Dio vin pardonu, kaj la bonaj Spiritoj subtenu kaj kuraĝigu vin! Via fratoj de sur la tero preĝos por vi kaj petas, ke vi preĝu por ili.

## Por la personoj, kiujn oni amas

62. *Antaŭparolo.* Kiel terura estas la ideo pri la neniiĝo! Kiel kompatindaj estas la personoj, kiuj kredas,

---

[*] Tiu ĉi prego estis diktita al mediumo en Bordeaux (legu: bordo'), en la momento, kiam preterpasis antaŭ liaj fenestroj la enteriga akompanantaro de nekonato.

ke la voĉo de amiko, priploranta sian amikon, perdiĝas en la malpleno kaj neniun eĥon trovas, kiu respondus al li! Neniam konis la purajn kaj sanktajn amojn tiuj personoj, kiuj opinias, ke ĉio mortas kun la korpo; ke la genio, kiu heligis la mondon per sia vasta intelekto, estas nur materia kombino, kiu estingiĝas por ĉiam kiel blovo; ke el la plej kara estulo, el patro, el patrino aŭ el adorata infano, restas nur iom da polvo, kiun la tempo disflugigas por ĉiam!

Ĉu bonkora homo povas resti malvarma ĉe tiu penso? Ĉu la ideo pri absoluta neniiĝo ne glaciigas lin de teruro kaj ne igas lin almenaŭ deziri, ke ne estu tiel? Se ĝis la hodiaŭa tago la racio ne sufiĉis por disbati liajn dubojn, jen Spiritismo, kiu venas forviŝi ĉian necertecon pri l' estonteco per la materialaj pruvoj, kiujn ĝi donas pri la postvivado de l' animo kaj la ekzistado en la transtomba mondo. Tial, ĉie tiuj pruvoj estas ricevataj kun ĝojo; fido al Dio renaskiĝas, ĉar de nun la homo scias, ke la surtera vivo estas nur rapida migrado, celanta pli bonan vivon; ke liaj ĉi-tieaj laboroj ne estas perditaj por li, kaj ke la plej sanktaj korligiloj ne estas rompitaj sen espero. (Ĉap. IV, § 18; ĉapitro V, § 21.)

63. *Preĝo.* Bonvolu, ho mia Dio, ricevi kun favoro la preĝon, kiun mi faras al Vi por la Spirito de N...; ekvidigu al li Vian lumon kaj faciligu al li la vojon al la eterna feliĉo. Permesu, ke la bonaj Spiritoj portu al li miajn parolojn kaj mian penson.

Ci, kiu estis al mi kara en tiu ĉi mondo, aŭskultu mian voĉon, kiu vokas cin por doni al ci novan ateston de mia amo. Dio permesis, ke ci estis la unua liberigita; mi ne povus plendi sen egoismo, ĉar tio estus deziri por ci la penojn kaj suferojn de la vivo. Mi atendas do kun

rezignacio la momenton de nia rekuniĝo en la mondo pli feliĉa, kien ci iris pli frue ol mi.

Mi scias, ke nia disiĝo estas nur momenta, kaj ke, eĉ se ĝi al mi ŝajnas longa, ĝia daŭro forviŝiĝas antaŭ la eterneco de feliĉo, kiun Dio promesas al Siaj elektitoj. Ke Lia boneco gardu min, por ke mi faru nenion, kio povus malfruigi tiun deziratan momenton, kaj ke Li ŝparu al mi ankaŭ la doloron ne retrovi cin ĉe mia eliro el la surtera sklaveco.

Ho! Kiel dolĉa kaj konsola estas la certeco, ke inter ni estas nur materia vualo, kiu kaŝas cin de mia vido, ke ci povas esti tie ĉi, apud mi, vidi kaj aŭdi min kiel antaŭe kaj eĉ pli bone ol iam; ke ci ne forgesas min, same kiel mi ne foresas cin; ke niajn pensoj ne ĉesas kunfandiĝi, kaj ke la cia sekvas kaj subtenas min ĉiam.

La paco de la Sinjoro estu kun ci.

## Por suferantaj animoj, kiuj petas preĝojn

64. *Antaŭparolo.* Por kompreni la helpon, kiun la preĝo alportas al la suferantaj Spiritoj, oni devas rememori ĝian agmanieron, jam klarigitan. (Ĉ. XXVII, §§ 9, 18 kaj sekvantaj.) Kiu estas konvinkita pri tiu vero, tiu preĝas kun pli da fervoro, ĉar li estas certa, ke li ne vane preĝas.

65. *Preĝo.* Dio pardonema kaj favorkora, Via boneco etendiĝu sur ĉiujn Spiritoj, kiuj rekomendas sin al niaj preĝoj, kaj precipe sur la animon de N...

Bonaj Spiritoj, kiuj okupiĝas ekskluzive pri la bono, propetu kun mi por helpi ilin. Igu brili antaŭ iliaj okuloj radion da espero, kaj igu ilin klare kompreni siajn neperfektaĵojn, kiuj tenas ilin for de la loĝejo de la feliĉuloj. Malfermu ilian koron al la pento kaj al la deziro puriĝi kaj rapidigi sian progreson. Komprenigu al ili,

ke, per siaj penoj, ili povas mallongigi la tempon de siaj provoj.

Dio, per Sia boneco, donu al ili forton por persisti en siaj bonaj decidoj!

Povu tiuj ĉi bonvolemaj paroloj mildigi iliajn suferojn, montrante al ili, ke sur la tero ekzistas estuloj, kiuj kompatas ilin kaj deziras ilian feliĉon.

66. *(Alia).* Ni petegas Vin, Sinjoro, disversŭ la gracojn de Via amo kaj de Via favorkoreco sur ĉiujn, kiuj suferas, ĉu en la spaco kiel vagantaj Spiritoj, ĉu inter ni kiel enkarniĝintaj Spiritoj. Estu indulgema al niaj malfortaĵoj. Vi faris nin eraremaj, sed Vi donis al ni forton por kontraŭstari al la malbono kaj ĝin venki. Via favorkoreco entendiĝu sur ĉiujn, kiuj ne povis rezisti al siaj malbonaj inklinoj kaj treniĝas ankoraŭ sur malbona vojo. Viaj bonaj Spiritoj ĉirkaŭu ilin; Via lumo brilu antaŭ iliaj okuloj, kaj altirate de ĝia viviga varmo, ili venu humilaj, pentemaj kaj submetiĝemaj, adorkliniĝi ĉe Viaj piedoj.

Ni petegas Vin ankaŭ, favorkora Patro, por tiuj el niaj fratoj, kiuj ne havis forton por elteni siajn surterajn provojn. Vi donis al ni ŝarĝon, Sinjoro, kaj ni devas demeti ĝin nur ĉe Viaj piedoj; sed nia malforteco estas granda kaj kelkfoje mankas al ni kuraĝo dum la vojirado. Indulgu tiujn maldiligentajn servantojn, kiuj forlasis la laboron antaŭ la horo; Via justeco indulgu ilin kaj permesu al Viaj bonaj Spiritoj alporti al ili helpon, konsolon kaj esperon je l' estonteco. La perspektivo de pardono fortigas la animon; montru ĝin, Sinjoro, al la kulpuloj, kiuj malesperas, kaj, subtenate de tiu espero, ili ĉerpos fortojn el la grandeco mem de siaj kulpoj kaj suferoj, por elaĉeti sian pasintecon kaj prepari sin por konkeri la estontecon.

## Por mortinta malamiko

67. *Antaŭparolo.* La karito por niaj malamikoj devas sekvi ilin post la tombo. Estas necese pripensi, ke la malbono, kiun ili faris al ni, estis por ni provo, kiu certe estis utila al nia progreso, se ni sciis profiti ĝin. Ĝi eble estis al ni pli utila ol la pure materiaj afliktoj tial, ke krom la kuraĝo kaj la rezignacio ĝi permesis al ni praktiki kariton kaj forgeson je l' ofendoj. (Ĉap. X, § 6; ĉap. XII §§ 5 kaj 6.)

68. *Preĝo.* Sinjoro, al Vi plaĉis revoki la animon de N... antaŭ ol la mian. Mi pardonas al li la malbonon, kiun li al mi faris, kaj la malbonajn intencojn, kiujn li havis kontraŭ mi; li povu tion bedaŭri, nun, kiam li jam ne havas la iluziojn de tiu ĉi mondo.

Mia Dio, Via favorkoreco etendiĝu sur lin, kaj forigu de mi la penson ĝoji pro lia morto. Se kontraŭ li mi agis malprave, li pardonu min, kiel mi forgesas liajn agojn kontraŭ mi.

## Por krimulo

69. *Antaŭparolo.* Se la efikeco de la preĝoj estus proporcia al ilia longeco, la plej longaj devus esti rezervataj por la plej kulpaj, ĉar ili bezonas pli ol tiuj, kiuj sankte vivadis. Rifuzi ilin al la krimuloj estas ne plenumi la kariton kaj ne rekoni la favorkorecon de Dio; kredi, ke ili estas senutilaj, ĉar tiu homo faris tian aŭ tian alian eraron, estas antaŭjuĝi la justecon de la Plejaltulo. (Ĉap. XI, § 14.)

70. *Preĝo.* Sinjoro, favorkora Dio, ne forpuŝu de Vi tiun krimulon, kiu ĵus lasis la teron; la justecon de la homoj eble frapis lin, sed ĝi ne liberigis lin de la Via, se lia koro ne estas tuŝita de riproĉoj.

Fortiru de li la okulvindaĵon, kiu kaŝas de li la gravecon de liaj kulpoj; povu lia pento trovi favorkorecon ĉe Vi kaj malpezigi la suferojn de lia animo! Povu ankaŭ niaj preĝoj kaj la helpo de la bonaj Spiritoj havigi al li esperon kaj konsolon, inspiri al li la deziron ripari siajn malicaĵojn en nova ekzistado, por ke li ne pereu en siaj novaj luktoj!

Sinjoro, kompatu lin!

## Por sinmortiginto

71. *Antaŭparolo.* La homo neniam havas la rajton disponi pri sia propra vivo, ĉar nur al Dio apartenas la rajto eltiri lin el la surtera sklaveco, kiam Dio juĝas oportune. Tamen la dia justeco povas mildigi sian rigoron konsidere al cirkonstancoj, sed ĝi uzas sian tutan severecon kontraŭ tiu, kiu volis ne submeti sin al la provoj de la vivo. La sinmortiginto similas malliberulon, kiu forkuras el sia karcero, antaŭ ol finiĝis lia puno; kiam rekaptita, li estas tenata pli severe. Tiel okazas al la sinmortiginto, kiu kredas, ke li liberiĝas el la nunaj suferoj kaj implikiĝas en pli grandajn malfeliĉojn. (Ĉap. V, §§ 14 kaj sekv.)

72. *Preĝo.* Ni scias, ho mia Dio, la sorton destinitan al tiuj, kiuj malobeas Viajn leĝojn, memvole mallongigante siajn vivtagojn; sed ni scias ankaŭ, ke Via favorkoreco estas senlima: bonvolu etendi ĝin sur la animon de N... Povu niaj preĝoj kaj Via kompatemo mildigi la amarecon de la suferoj, kiujn li trapasas, ĉar li ne havis kuraĝon, por atendi la finon de siaj provoj!

Bonaj Spiritoj, kies misio estas helpi la malfeliĉulojn, prenu lin sub vian protekton: inspiru al li bedaŭron pro sia kulpo, kaj via helpo donu al li forton, por elteni kun pli da rezignacio la novajn provojn, kiujn li

estas suferanta por ripari sian eraron. Forigu de li la malicajn Spiritojn, kiuj povus denove lin konduki al la malbono kaj plilongigi liajn suferojn, igante lin perdi la frukton de siaj estontaj provoj.

Al vi, kies malfeliĉo estas la temo de niaj preĝoj, ni deziras, ke povu nia kompato mildigi vian amarecon kaj naski en vi la esperon pri estonteco pli feliĉa! Tia estonteco estas en via manoj; fidu al la boneco de Dio, kies brakoj estas ĉiam malfermitaj al ĉiuj pentantoj kaj restas fermitaj nur al la malmolaj koroj.

## Por la pentantaj spiritoj

73. *Antaŭparolo.* Estus maljuste meti en la kategorion de malbonaj Spiritoj la suferantajn kaj pentantajn Spiritojn, kiuj petas preĝojn; tiuj eble estis iam malbonaj, sed ili jam ne estas tiaj de la momento, kiam ili rekonas siajn kulpojn kaj ili bedaŭras: ili estas nur malfeliĉaj; kelkaj eĉ ekĝuas iom da feliĉo.

74. *Preĝo.* Favorkora Dio, kiu akceptas la sinceran penton de la pekinto enkarniĝinta aŭ elkarniĝinta, jen Spirito, kiu plezuris ĉe la malbono, sed kiu rekonas siajn erarojn kaj eniras en la bonan vojon; bonvolu, ho mia Dio, ricevi lin kiel erarintan filon kaj pardoni lin.

Bonaj Spiritoj, kies voĉon li ne rekonis, de nun li volas aŭskulti vin; permesu al li ekvidi la feliĉon de l' elektitoj de la Sinjoro, por ke li persistu en la deziro purigi sin por ĝin atingi; subtenu lin en liaj bonaj decidoj kaj donu al li forton, por rezisti al la malbonaj instinktoj.

Spirito de N..., ni gratulas vin pro via ŝanĝo kaj ni dankas la bonajn Spiritojn, kiuj helpis vin!

Al vi iam plaĉis fari la malbonon, nur tial, ke vi ne komprenis kiel dolĉa estas la plezuro fari la bonon; vi sentis vin tro malalta, por esperi tian plezuron. Sed de

la momento, kiam vi metis la piedon sur la bonan vojon, nova lumo fariĝis por vi; vi komencis gustumi nekonatan feliĉon, kaj la espero eniris en vian koron. Tion vi ekhavis, ĉar Dio ĉiam aŭskultas la preĝon de la pekinto pentanta; Li forpuŝas neniun, kiu venas al Li.

Por plene reeniri en Lian gracon, de nun klopodu ne nur por ne fari plu la malbonon, sed por fari la bonon; tiam vi estos kontentiginta la justecon de Dio; ĉiu bona ago forviŝos unu el viaj pasintaj kulpoj.

La unua paŝo estas farita; de nun, ju pli vi marŝos, des pli facila kaj agrabla ŝajnos al vi la vojo. Persistu do, kaj iam vi havos la gloron esti alkalkulata al la bonaj kaj feliĉaj Spiritoj.

## Por la harditaj spiritoj

75. *Antaŭparolo.* La malbonaj Spiritoj estas tiuj, kiujn la pento ankoraŭ ne tuŝis; kiuj plezuras ĉe la malbono kaj nenian bedaŭron eksentas pro ĝi; kiuj estas sensentaj pri la riproĉoj, forpuŝas la preĝon kaj ofte blasfemas la nomon de Dio. Tiuj hardiĝintaj animoj post la morto venĝas al la homoj la suferojn, kiujn ili elportis, kaj persekutas per sia malamo tiujn, kiujn ili malamis dum la vivo, aŭ per obsedo aŭ per iu ajn pereiga influo. (Ĉap. X, § 6; ĉap. XII, §§ 5 kaj 6.)

De malicaj Spiritoj estas du kategorioj tre distingeblaj; tiuj, kiuj estas senkaŝe malbonaj, kaj la hipokritaj. La unuaj estas multe pli facile rekondukeblaj al la bono, ol la duaj; plej ofte ili estas krudaj kaj maldelikataj karakteroj, kiajn oni vidas ankaŭ ĉe la homoj; ili faradas la malbonon pli per instinkto ol laŭ kalkulo, kaj ne penas kredigi, ke ili estas pli bonaj ol ili estas; sed en ili estas latenta ĝermo, kiun oni devas elvolvi, kaj preskaŭ ĉiam oni sukcesas en tio per persistemo, per firmeco kunigita kun bonvolemo, per konsiloj, rezonadoj

kaj preĝoj. Per mediumo, ilia malfacileco skribi la nomon de Dio, estas signo de instinkta timo, de intima voĉo de la konscienco, kiu diras al ili, ke ili ni indas ĝin fari; tiam ili staras sur la sojlo de la konvertiĝo, kaj oni povas ĉion esperi de ili: sufiĉas trovi la vundeblan punkton de ilia koro.

La hipokritaj Spiritoj estas preskaŭ ĉiam tre inteligentaj, sed en la koro ili havas neniun senteman fibron; nenio tuŝas ilin; ili ŝajnigas ĉiujn bonajn sentojn por kapti konfidon, kaj estas feliĉaj trovante stultulojn, kiu akceptas ilin kiel sanktajn Spiritojn kaj kiujn ili povas regi laŭ sia plaĉo. La nomo de Dio, anstataŭ inspiri al ili eĉ la plej malgrandan timon, servas al ili kiel masko, por kovri iliajn hontindaĵojn. En la nevidebla, same kiel en la videbla mondo, la hipokritaj estas la plej danĝeraj estuloj, ĉar ili agadas en la ombro kaj oni ne malfidas ilin. Ili havas nur ŝajnon de fido, sed neniel sinceran fidon.

76. *Preĝo.* Sinjoro, konsentu ĵeti bonvolan rigardon sur la malperfektajn Spiritojn, kiuj estas ankoraŭ en la mallumo de la nescio kaj Vin ne rekonas, kaj precipe sur la Spiriton de N...

Bonaj Spiritoj, helpu nin komprenigi al li, ke kondukante la homojn al la malbono, ilin obsedante aŭ turmentante, li plilongigas siajn proprajn suferojn; penu, ke la ekzemplo de la feliĉo, kiun vi ĝuadas, estu kuraĝigo por li.

Spirito, kiu plezuras ankoraŭ en la malbono, vi ĵus aŭdis la preĝon, kiun ni faras por vi; ĝi devas pruvi al vi, ke ni deziras fari al vi la bonon, kvankam vi faras la malbonon.

Vi estas malfeliĉa, ĉar estas neeble esti feliĉa farante la malbonon; kial do resti en turmento, kiam nur de vi dependas liberiĝi de ĝi? Rigardu la bonajn Spiritojn,

kiuj ĉirkaŭas vin; vidu, kiel feliĉaj ili estas kaj ĉu ne estus al vi pli agrable ĝuadi la saman feliĉon.

Vi diras, ke tio ne estas al vi ebla; sed nenio estas neebla al tiu, kiu volas, ĉar Dio donis al vi, same kiel al ĉiuj Liaj kreitoj, la liberecon elekti inter la bono kaj la malbono, tio estas inter la feliĉo kaj la malfeliĉo, kaj neniu estas kondamnita fari la malbonon. Se vi havas volon fari ĝin, vi povas havi ankaŭ volon fari la bonon kaj esti feliĉa.

Turnu vian rigardon al Dio; levu vin unu solan momenton al Li per la penso, kaj radio de Lia dia lumo venos prilumi vin. Diru kun mi tiujn ĉi simplajn vortojn: *Mia Dio, mi pentas, pardonu min.* Provu penti kaj fari la bonon anstataŭ la malbono, kaj vi vidos, ke tuj Lia favorkoreco etendiĝos sur vin kaj ke nekonata feliĉo venos anstataŭi la angorojn, kiujn vi suferas.

Kiam vi estos farinta la unuan paŝon sur la bona vojo, la restanta marŝo ŝajnos al vi facila. Tiam vi komprenos, kiom da tempo perdis via feliĉo pro via kulpo; sed ridanta estonteco plena de espero malfermiĝos antaŭ vi kaj igos vin forgesi vian mizeran pasintecon, plenan de konfuzo kaj de moralaj turmentoj, kiuj estus por vi la infero, se ili devus eterne daŭri. Venos tago, kiam tiuj turmentoj estos tiel neelporteblaj, ke je iu ajn kosto vi volos ĉesigi ilin; sed ju pli longe vi ĝin prokrastos, des pli malfacile tio fariĝos.

Ne kredu, ke vi restos ĉiam en la stato, en kiu vi staras; ne, tio estas neebla; vi havas antaŭ vi du perspektivojn: aŭ suferi multe pli ol vi suferas nun, aŭ esti feliĉa, kiaj estas la bonaj Spiritoj ĉirkaŭ vi; la unua estas neevitebla, se vi persistos en via obstineco; simpla peno de via volo sufiĉas, por tiri vin de la malbona vojo, kie vi estas. Rapidu do, ĉar ĉiu tago de malfruiĝo estas tago perdita por via feliĉo.

Bonaj Spiritoj, penu, ke ĉi tiuj paroloj trafu tiun animon ankoraŭ ne sufiĉe progresintan, por ke ili helpu ĝin alproksimiĝi al Dio. Ni petas vin pri tio en la nomo de Jesuo Kristo, kiu havis tiel grandan povon super la malbonaj Spiritoj.

## V. POR LA MALSANULOJ KAJ OBSEDITOJ

### Por la malsanuloj

77. *Antaŭparolo.* La malsanoj estas parto de la provoj kaj sortoŝangoj de la surtera vivado; ili estas esence propraj al la maldelikateco de nia materia naturo kaj al la malsupereco de la mondo, en kiu ni vivas. La pasioj kaj ĉiuspecaj ekscesoj semas en ni la ĝermojn malsanigajn, ofte heredajn. En la mondoj, materie aŭ morale pli progresintaj ol la nia, la homa organismo, pli purigita kaj malpli materia, ne estas elmetida al tiom da malsanoj, kaj la korpo ne estas silente konsumata de la fajro de la pasioj. (ĉap. III, § 9.) Ni devas do rezignacii kaj suferi la kondiĉojn de la medio, kien nin metas nia malsupereco, ĝis fine ni meritos alian. Tio ne devas malhelpi, dum la atendado, ke ni faru tion, kio dependas de ni, por plibonigi nian nunan situacion; sed se, malgraŭ niaj klopodoj, ni ne povas sukcesi, Spiritismo instruas al ni elteni kun rezignacio niajn dumtempajn malfeliĉojn.

Se Dio ne volus, ke la korpaj suferoj estu forigataj aŭ mildigataj en iuj okazoj, Li ne metus kuracigajn rimendojn al nia dispono. Lia antaŭvidema zorgado pri tio, en akordo kun la instinkto de memkonservado, montras, ke estas nia devo serĉi kaj apliki la kuracajn rimedojn.

Krom la ordinara medikamentado, ellaborata de la scienco, la magnetismo konigis al ni la povon de la

agado de la emanaĵoj; poste Spiritismo malkaŝis al ni alian forton en *la sanigiva mediumeco* kaj la influon de la preĝo.

(Vidu poste la noton pri la kuraca mediumeco.)

78. **Preĝo**. (*Fare de la malsanulo*) - Sinjoro, Vi estas la perfekta justeco; la malsanon, kiun al Vi plaĉis sendi al mi certe mi meritis, ĉar Vi neniam afliktas sen kaŭzo. Por mia resaniĝo mi tute fidas al Via senlima favorkoreco; se al Vi plaĉas redoni al mi la sanon, Via sankta nomo estu glorata; se, kontraŭe, mi devas ankoraŭ suferi, ĝi estu glorata; mi submetiĝas sen murmuro al Viaj saĝaj dekretoj, ĉar ĉio, kion Vi faras, povas havi kiel celon nur la bonon de Viaj kreitoj.

Permesu, ho mia Dio, ke ĉi tiu malsano estu por mi utila averto kaj instigu min zorgi pri mi mem; mi ĝin akceptas kiel elaĉeton de la pasinteco kaj kiel provon por mia fido kaj mia submetiĝo al Via sankta volo.

(Vidu la preĝon n-ro 40.)

79. **Preĝo**. (*Por la malsanulo*) - Mia Dio, Viaj decidoj estas nepenetrebalaj, kaj en Via saĝeco Vi decidis aflikti N... per la malsano. Ĵetu, mi Vin petegas, kompatan rigardon sur liajn suferojn, kaj bonvolu ĉesigi ilin.

Bonaj Spiritoj, adjutantoj de la Ĉiopova, helpu, mi vin petegas, mian deziron mildigi la suferadon de N...; direktu mian penson, por ke ĝi iru verŝi sanigan balzamon sur lian korpon kaj konsolon en lian animon.

Inspiru al li paciencon kaj submetiĝon al la volo de Dio; donu al li forton, por elteni siajn dolorojn kun kristana rezignacio, por ke li ne perdu la frukton de ĉi tiu provo.

(Vidu la preĝon n-ro 57.)

80. **Preĝo.** (*Fare de la sanigiva mediumo*) – Mia Dio, se Vi konsentas uzi min, kvankam mi estas tute seninda, mi povos forpeli tiun ĉi malsanon, se tia estas Via volo, ĉar mi havas fidon al Vi; sed sen Vi mi nenion povas. Permesu al la bonaj Spiritoj saturi min per sia saniga emanaĵo, por ke mi transigu ĝin al tiu ĉi malsanulo, kaj deturnu de mi ĉian penson pri fiero kaj egoismo, kiu povus malpurigi la sanigan emanaĵon.

## Por la obseditoj

81. *Antaŭparolo*. Obsedo estas la persista agado de malbona Spirito sur iun homon. Ĝi prezentas tre malsamajn karakterojn, ekde la simpla morala influo, sen eksteraj senteblaj signoj, ĝis plena malordo de l' organismo kaj de la mensaj kapabloj. Ĝi konfuzas ĉiujn mediumajn kapablojn; en la perskriba mediumeco ĝi manifestiĝas per la obstineco de unu sola Spirito, kiu komunikiĝas esceptante ĉiujn aliajn.

La malbonaj Spiritoj svarmas ĉirkaŭ la tero, sekve de la morala malsupereco de ĝiaj loĝantoj. Ilia malica agado estas unu el la plagoj, kiuj turmentas la homaron sur la tero. La obsedo, same kiel la malsanoj kaj ĉiuj ĉagrenoj de la vivo, devas esti do rigardata kiel provo aŭ kiel elaĉeto, kaj tiel akceptata. Same kiel la malsanoj estas rezultato de korpaj malperfektaĵoj, kiuj faras la korpon atingebla por la eksteraj pereigaj influoj, la obsedo rezultas ĉiam de morala malperfekteco, kiu ebligas la influon de malbona Spirito. Al fizika kaŭzo oni kontraŭmetas fizikan forton; al morala kaŭzo estas necese kontraŭstari per morala forto. Por eviti la malsanojn, oni fortikigas la korpon; por sin ŝirmi kontraŭ la obsedo, oni devas fortikigi la animon; tial la obsedito bezonas

labori por sia propra pliboniĝo, kio ofte sufiĉas por liberigi lin de l' obsedanto, sen helpo de fremdaj personoj. Tiu kelpo fariĝas necesa, kiam la obsedo degeneras en subjugigon aŭ en plenposedon, ĉar tiam la turmentato iafoje perdas siajn energion kaj liberan volon.

La obsedo estas preskaŭ ĉiam venĝo de iu Spirito, kaj plej ofte havas sian fonton en la rilatoj de l' obsedanto kun la obsedito en antaŭa ekzistado. (Ĉap. X, § 6; ĉap. XII, §§ 5 kaj 6.)

En la okazoj de grava obsedo, la obsedito estas kvazaŭ envolvita kaj saturita de danĝera fluidaĵo, kiu nuligas la agadon de la bonaj emanaĵoj kaj ilin forpuŝas. Estas necese liberigi lin de tiuj emanaĵoj; nu, malbona emanaĵo ne povas esti forpuŝata de alia malbona emanaĵo. Per agado simila al la agado de sanigiva mediumo en la okazoj de malsano, estas necese forpeli la malbonan emanaĵon per helpo de pli bona emanaĵo, kiu iamaniere havas la efikon de kontraŭaganto. Tia estas la agado mekanika, sed ĝi ne sufiĉas; estas necese ankaŭ kaj precipe *agi sur la inteligentan estulon*, al kiu oni devas havi la rajton paroli kun aŭtoritateco, kiun havas nur la morala supereco; ju pli granda la morala supereco, des pli granda la aŭtoritateco.

Tio tamen ne estas ĉio; por certigi la liberigon, oni devas admoni la malican Spiriton rezigni siajn malbonajn projektojn; estas necese aperigi en li la penton kaj la deziron je bono, per instruoj lerte direktataj, en privataj spiritismaj kunsidoj, celantaj lian moralan edukon; tiam oni povas ricevi la duoblan ĝojon liberigi enkarniĝinton kaj konverti malperfektan Spiriton.

La tasko fariĝas pli facila, kiam la obsedito, komprenante sian situacion, kunhelpas per sia volo kaj preĝado; ne estas same, kiam la persono, ensorĉite de la trompema Spirito, iluziiĝas pri la kvalitoj de tiu, kiu lin mastras, kaj plezuras en la eraro, en kiu tenas lin

la obsedanto; ĉar tiam, anstataŭ helpi, li forpuŝas ĉian helpon. Tiu estas la okazo de fascinado, ĉiam treege pli malfacile kuracebla, ol la plej tirana subjugigo. (*La Libro de la Mediumoj*, ĉ. XXIII.)

En ĉiuj okazoj de obsedo, la preĝo estas la plej pova helpilo kontraŭ la obsedanta Spirito.

82. **Preĝo.** (*Fare de la obsedito*) - Mia Dio, permesu al la bonaj Spiritoj liberigi min de la malbonfaranta Spirito, kiu alligiĝis al mi. Se ĝi estas venĝo, kiun li faras pro malbonaĵoj, kiujn mi iam faris al li, Vi tion permesas, mia Dio, por puno, kaj mi suferas la sekvon de mia kulpo. Povu mia pento meriti Vian pardonon kaj mian liberigon! Sed, kia ajn estas lia motivo, mi petegas por li Vian favorkorecon; bonvolu faciligi al li la vojon de la progreso, kiu deturnos lin de la penso fari la malbonon. Povu mi, miaflanke, pagante al li per bono la malbonon, instigi lin al pli puraj sentoj.

Sed mi scias ankaŭ, ho mia Dio, ke nur mia malperfekteco faras min atingebla por la influoj de la malperfektaj Spiritoj. Donu al mi la lumon necesan por rekoni miajn malkorektaĵojn; kontraŭbatalu en mi precipe la fieron, kiu min blindigas pri miaj kulpoj.

Kiel granda devas esti mia senindeco, ke malica estulo povas min mastri!

Permesu, ho mia Dio, ke ĉi tiu frapo kontraŭ mia vantamo servu al mi kiel leciono por la estoteco; ke ĝi fortigu mian decidon purigi min per la farado de la bono, per la praktikado de la karito kaj de la humileco, por ke mi kontraŭmetu de nun baron al la malbonaj influoj.

Sinjoro, donu al mi forton por elteni ĉi tiun provon kun pacienco kaj rezignacio; mi komprenas, ke, kiel ĉiuj aliaj provoj, ĝi devas helpi mian progreson, se mi ne perdos ĝian frukton per murmuroj, ĉar ĝi donas al mi

okazon montri submetiĝon kaj praktikadi kariton al malfeliĉa frato, pardonante al li la malbonon, kiun li faris al mi. (Ĉap. XII, §§ 5 kaj 6; ĉap. XXVIII, §§15 kaj sekv., 46, 47.)

83. **Preĝo.** (*Por la obsedito*) - Dio Ĉiopova, bonvolu doni al mi la povon liberigi N...n de la Spirito, kiu lin obsedas; se estas en Viaj decidoj ĉesigi ĉi tiun provon, donu al mi la gracon paroli al tiu Spirito kun aŭtoritato.

Bonaj Spiritoj, kiuj helpas min, kaj vi, lia Gardanĝelo, donu al mi vian kunlaboradon; helpu min liberigi lin de la malpura fluidaĵo, kiu lin envolvas.

En nomo de Dio Ĉiopova, mi petas la malbonfarantan Spiriton, kiu lin turmentas, foriri.

84. **Preĝo**. (*Por la obsedanta Spirito*) - Dio senlime bona, mi petegas Vian kompaton por la Spirito, kiu obsedas N...n; igu lin ekvidi la dian lumon, por ke li vidu la falsan vojon, sur kiu li iras. Bonaj Spiritoj, helpu min komprenigi al li, ke li ĉion perdos farante la malbonon, kaj ĉion gajnos farante la bonon.

Spirito, kiu plezuras turmentante N...n, aŭskultu min, ĉar mi al vi parolas en la nomo de Dio.

Se vi volas pripensi, vi komprenos, ke la malbono ne povas venki la bonon, kaj ke vi ne povas esti pli forta ol Dio kaj la bonaj Spiritoj.

Ili povus gardi N...n kontraŭ viaj atakoj; ili tion ne faris nur tial, ke li (aŭ ŝi) devis suferi provon. Sed kiam tiu provo estos finita, ili forigos vian tutan povon kontraŭ li; la malbono, kiun vi estos farinta al li, anstataŭ malutili al li, estos profita al lia progreso kaj faros lin pli feliĉa; via malboneco estos uzita kaj reagos kontraŭ vin.

Dio, kiu estas ĉiopova, kaj la superaj Spiritoj, Liaj delegitoj, pli potencaj ol vi, povos ĉesigi tiun obsedon, kiam

ili volos, kaj via obstineco rompiĝos antaŭ tiu superega aŭtoritato. Sed ĝuste tial, ke Dio estas bona, Li volas lasi al vi la meriton ĉesigi ĝin per via propra volo. Ĝi estas oportuno al vi donata, se vi ne profitos ĝin, vi suferos la bedaŭrindajn sekvojn de via rifuzo; grandaj punoj kaj krudaj suferoj vin atendas; vi estos devigita petegi ilian kompaton kaj la preĝojn de via viktimo, kiu jam vin pardonas kaj preĝas por vi; tio estas granda merito en la okuloj de Dio kaj rapidigos lian liberigon.

Pripensu do dum estas ankoraŭ oportuna tempo, ĉar la justeco de Dio pezos sur vi, kiel sur ĉiuj ribelemaj Spiritoj. Pripensu, ke la malbono, kiun vi faras en la nuna momento, nepre havos finon, dum, se vi persistos en via necedemo, viaj suferoj senĉese kreskados.

Kiam vi estis sur la tero, ĉu vi ne trovus stulte oferi grandan bonon por malgranda momenta kontentiĝo? Same okazas nun, kiam vi estas Spirito. Kion vi profitas el tio, kion vi faras? La bedaŭrindan plezuron turmenti iun; tio tamen ne malhelpas, ke vi estu malfeliĉa, kion ajn vi povas diri, kaj vin ankoraŭ pli malfeliĉigos.

Krom tio, vidu, kion vi perdas; rigardu la bonajn Spiritojn, kiuj vin ĉirkaŭas, kaj diru, ĉu ilia sorto ne estas preferinda, ol la via? La feliĉo, kiun ili ĝuas, apartenos al vi, kiam vi volos. Kion vi bezonas por tio? Petegi Dion kaj fari la bonon anstataŭ la malbono. Mi scias, ke vi ne povas transformiĝi subite; sed Dio ne postulas ion neeblan; Li deziras nur volonton. Klopodu do, kaj ni helpos vin. Kondutu tiel, ke baldaŭ ni povu diri por vi la preĝon por la pentantaj Spiritoj (§ 73) kaj ne plu konsideri vin unu el la malbonaj Spiritoj, ĝis vi povos esti alkalkulita al la bonaj Spiritoj. (Vidu ankaŭ, supre, § 75: "Preĝo por la harditaj Spiritoj".)

*Rimarko*. La kuracado de la gravaj obsedoj postulas fortan paciencon, persistemon kaj sindonemon; ĝi postulas

ankaŭ takton kaj lertecon, por gvidi al la bono Spiritojn ofte malicajn, nesentemajn kaj ruzajn, ĉar el ili estas tiuj ekstreme ribelaj; plej ofte, oni devas gvidi sin laŭ la cirkonstancoj; sed, kia ajn estas la karaktero de la Spirito, pruvita fakto estas, ke oni neniel sukcesas per trudo kaj minaco; ĉiu influo kuŝas en la morala supereco. Alia veraĵo, konfirmita ne nur de la sperto, sed ankaŭ de la logiko, *estas la absoluta senefikeco de l' ekzorcizoj, formuloj, sakramentaj paroloj, amuletoj, talismanoj, eksteraj agoj aŭ iaj ajn materiaj signoj.*

Longe daŭranta obsedo povas okazigi patologiajn perturbojn kaj ofte postulas samtempan aŭ sinsekvan kuracadon aŭ magnetisman aŭ medicinan, por la resanigo de l' organismo. Kiam estas detruita la kaŭzo, restas kontraŭbatali la efikojn. (Vidu en *La Libro de la Mediumoj*, ĉ. XXIII: Pri la obsedo. — *Revue Spirite*, Februaro kaj Marto 1864; Aprilo 1865: ekzemplojn de kuracado de obsedoj.)

# ALDONO I

Mi deziras hodiaŭ pritrakti la devojn de la homo al la materio kaj al la Spirito. Estus por tio necese distingi inter materio kaj Spirito; inter maldelikata parto de la homaro kaj lia parto dia; inter la argileca stato de la planedo kaj la etero de la ĉielaj regionoj; inter la malheleco de la pasema potencado de la mallumo kaj la brileco de l' eterna regado de la lumo.

Vere, oni konstatas frapan kontraston, plenan kontraŭecon , ĉe la transirado de unu en alian staton; tamen, same kiel malaj ekstremoj estas proksimaj, tiuj niveloj, tiel malproksimaj unu de la dua, tiuj ŝtupoj - unu, la komenca, alia, la fina - de la longega ŝtuparo ie kontaktiĝas. Ĉi tiu kontakto estas evidenta ĉe la homo, kiu havas ambaŭ naturojn: tiun de la Tero kaj tiun de la Ĉielo.

Kaj, same kiel tagiĝo estas grada, tia, ke oni ne povas diri, kiam la nokto finiĝas kaj komenciĝas la tago; kaj, ankaŭ, same kiel vesperiĝas kaj falas la vualo de la nokto, dum ankoraŭ estas hele, kvankam la suno jam troviĝas sub la horizonto, en tia maniero, ke oni ne povas precize difini limon inter la du fazoj, tiel evoluas ĉiuj estuloj kaj sin iom post iom modifas la homo interne de si mem, ne nur dum unu ekzistado, sed ankaŭ tra sia tuta eterna vivo.

Ŝtono estas senanima, kaj anĝelo estas nemateria; inter tiuj ekstremoj staras, kiel transirpunkto, la anim-

hava estulo; sed tiu punkto etendiĝas por nekalkulebla tempo, sin pene trenante sur vojo plena de ŝtonoj kaj de kardoj, portante sian pezon propran, kiu ŝajnas al li fremda pezo, kvazaŭ intencanta lin subpremi kaj haltigi meze de la irado. Tiel estas, ĉar la Naturo ne faras saltojn kaj al la homo estas destinita tiu periodo de transiĝo en la serio de la kreitaĵoj.

Li rekonu en si tiun korpiĝon de plej malsamaj elementoj, en konstata konflikto, en neeviteblaj, interfrapiĝoj, elementoj tamen bezonantaj harmonie vivi, same kiel la plej diversaj instrumentoj de orkestro – unuj dolĉaj, aliaj akresonaj, ĉi tiuj lulantaj, tiuj tondraj, formas, malgraŭ tio, tutaĵon, kiu ilin ĉiujn bezonas por traduki la senton. Malaperu unu el ili, kaj perdiĝos la efekto. Ne supera estas la violono, kiu tremas, ploras kaj dormigas, nek malŝatinda estas la tamburo, kiu rulsonas, vibrigas kaj skuas.

Ankaŭ la lumo, sur bildo de lerta artisto, ne povas malhavi la ombron, kiu ĝin reliefigas; kaj kiom da bildoj estas belaj kaj admirataj, ĝuste pro la grandioza efekto de ia ombro en modesta angulo de la pejzaĝo! El tio tute ne sekvas, ke la ombro, laŭ absoluta senco, estas samvalora kiel la lumo: vere estas ja, ke la beleco de la bildo kuŝas en la kontrasto, en la "ombrolumo", kia ĝin nomas la pentristoj.

Ĉielo tre blua, sed sennuba, estus enuiga; iu nubo, ombranta la horizonton, kontraŭe, elstarigas la sunon mem. Oni laŭdas la disradiantan sunon, sed, aliflanke, oni forkuras de ĝia varmego; oni serĉas en dezerto la ombron amikan de izola duno.

Sed la vivo estas propraĵo de la lumo, kaj ĝuste pro tio la Sinjoro kreis lumon ĉe l' unua momento; la ombro estas la rifuĝejo de la forgeso, la ripozejo de la laboro, la ŝirmejo por la natura tempo inter du lumfazoj;

ĝi estas la morto dum momentoj, la dormo de la mortintajaĵoj.

La Sinjoro konsentis do al ni la mirindecon de la kontrastoj, por ke ni elektu la ĉarmojn de ĉiu fazo: ricevi lumon aŭ droni en ombro, labori aŭ esti sentaŭgaj, progresi aŭ brutiĝi. Donis al ni la Plejpotenca la rajton observi kaj preni el tio, kion Li al ni proponas; sed Li samtempe ŝarĝis nin per devoj al ni mem kaj al la medio, kie ni vivas: per devoj esence propraj al la materio, kiun ni kuntrenas kvazaŭ ion fremdan, per devoj ne forigeblaj de la Spirito, kia ĉiu el ni estas. Tiajn devojn neeble estus eviti, ne nur pro tio, ĉar ili estas apartenaĵoj de la homa vivo, sed ankaŭ, ĉar ili reprezentas la pagon por la konsentintaj rajtoj. Se ni ilin ne rekonas, la Naturo ja scias, ke ili ekzistas; se ni ilin forgesas, ili sin trudas al nia memoro; se ni povas de ili malimplikiĝi, jen ili staras kvazaŭ nedetruebla murego, retenanta niajn paŝojn.

Sed la homo ne plendu kontraŭ tia fera leĝo, kiun li ne povas malobei. Li vidu, ke la Naturo mem estas nenio krom leĝo kaj do, ke ĉio certe havas limojn kaj renkontas kontraŭaĵojn, ricevas trudojn kaj kondiĉojn, submetiĝas al obeo kaj servuto. Li tenu en menso sian celon; li havigu al si la rimedojn por tien veni; li ne faru al si embarason el la ŝtonoj renkontataj sur la vojo; li ne distriĝu, dum irado, pro la falsa brilo de diamantŝajnaj vitraĵoj; li ne koleru pro la dornoj lin vundantaj, sed prefere li lin simple eltiru kaj forskuu, kiel aferojn ne kapablajn lin haltigi, ĉar senvaloraj antaŭ li mem.

Se li aŭdas kanton de birdo, kiu lin ravas, li haltu dum momento, por admiri la verkon de la Kreinto; sed li ne forgesu la celon de sia irado, kie li certe aŭdos pli dolĉajn laŭdojn al la Granda Arkitekto. Li dediĉu al la materio tian atenton, kian ĝi meritas. Li ĝin ne malŝatu,

ĉar ankaŭ ĝi estas parto de la Granda Tuto, frukto de la ĝardeno de la Superega Ĝardenisto. De ĝi li ne disiĝu, nek, des malpli, ĝin li ne malbenu, ĉar neebla estas tiu disiĝo kaj blasfemo la anatemado je la Naturo.

La homo havas do devojn al la materio, ne nur al la materio de l' aĵoj lin ĉirkaŭantaj, sed ankaŭ al sia propra, per kiu li estas dumtempe vestita, Al ĉiuj estuloj kaj estaĵoj li turnu sian atenton; li ŝuldas bonvolon por la malsuperaj, respekton por la superaj. Vivante en materia planedo, li estas submetida al la materio, kaj ĉio, lin ĉirkaŭanta, estas ja materio.

Ne materiaj certe ne estas aliaj mondoj, en kiuj la homo devas sinsekve loĝi: tio estas demando nur pri grado de krudeco de ties strukturo. La surtera homo jam altiĝis ekde la barbareco ĝis la civilizacio; lia intelekto jam elvolviĝis kaj atingas iom pli malproksimen, ol en sia primitiva stato; li jam forlasis la kavernon, kie regis mallumo, por suriri monton, sur kies supro li spiras puran aeron kaj fortikigas siajn pulmojn per sunbanoj, Tiel, li konstatis, ke la materio bezonas flegadon kaj ke, per ĉi tiu flegado, lia menso estis prilumita; pli facile li trafas pli forajn horizontojn, pli bone li komprenas la kaŭzon de l' aferoj, pli grandan plezuron li trovas en la vivo, kvankam katenita al la materia grundo.

Kiu ajn do la estulo, kiu evolucias direkte al la plej alta ŝtupo, kaj kie ajn li staras en la senfina hierarkio, li devas ĉiam atenti la materion, naturan kompletigaĵon de la forto lin animanta. Sed tiun forton mem ĉiu devas prizorgi. Dio metis nin en la mondon, por ke ni vivu en socio, nutrante nin per pano, kreante la neceson je reciproka helpo, sur la kampo de la materio; kaj por tio Li donis al ni forton, ne por ke ni ĝin servigu ekskluzive al la materio, sed por pligrandigo de tiu forto mem.

Senpeza fluidaĵo, tiu forto devas nutri sin per senpeza elemento. Energio, ĝi devas ĉerpi nutraĵon el alia energio. La materio estas tro maldelikata, ke ĝi taŭgus kiel tia nutraĵo. Tiu forto devas supreniri al regionoj, kie sin trovas da Superega Fonto. Ĝi devas peti helpon de tiuj, kiuj ne lasas estingiĝi la sanktan fajron, ne per ligno, kiu brulus en fajrejo, kiu varmigus la frostiĝintan sangon, sed per fluidaĵo, kiu penetrus kaj vigligus la subtilan teksaĵon de l' animo kaj ties veston mem — la korpon.

Ekzistas do spiritaj devoj en ĉiuj anguloj de l' Universo. Tiuj celas la harmonion de la tuto kaj tiel ili donas la neesprimeblan efekton de l' orkestro. Ĉi tiu ne konsistas nur el instrumentoj, kiuj, inertaj, nenion povus rezultigi, se ne estus la penado de la homo; ĝi ne estas, ankaŭ, la disĵetado de sonoj, eĉ se tiuj ĉi ĝuste alkonformiĝus inter si. Ravas nin, ne la fizika fenomeno, sed la interna vibrado; kaj, ni povus diri, ne la sono mem, sed ĝia eĥo, resaltanta sur la kordoj de l' animo. Jen, kio estas nomata spirita laboro, kiu estas devo, kia la laboro materiala; ambaŭ interplektiĝas kaj reciproke kompletiĝas. Kaj, kiel laboro, tiu estas devo; devo, kiun la homo preterkonscie plenumas, kvankam li neas ĝian fonton, malgraŭ tio, ke li asertas, kun obstina negativemo, ke la vibrado ne transpasas la limojn de la materio kaj do, ke tiu vibrado perdiĝas en la materio.

Sed ne. Se la vibrado estingiĝus en la sino de la materio, ĝi ne efikus, kiel dezirinde. La kordo, kiu vibras, kvietiĝas, kiam ĉesas la impulso; en tiu ekscita stato, la kordo transigas tiun staton en la ĉirkaŭaĵon kaj nenion rezervas por si mem: ĝi revenas al sia unua stato. Ne tion ni vidas ĉe la homo. La spirito mem estas ekscitita kaj vibras, sed poste li troviĝas en pli bonaj kondiĉoj por ekscitiĝo. Li rafinas siajn kapablojn,

fariĝas pli sentema, evoluas. Siavice, ĉiam pli disvastiĝas lia sfero de agado; li ampleksas ĉirkaŭ si pli grandan spacon kaj, tial, li prenas sur sin pli grandan respondecon en la medio, kie li nun agas. Li venkas barojn, iam nesupereblajn; sed, ĝuste pro tio, li devas esti ankoraŭ pli prudenta, sekve de sia pli grava devo. La pligrandigita amplekso de lia kampo estas por li ŝarĝo, facila per si mem, sed malfacila pro lia respondeco por ĝiaj efikoj. Multe estos al li demandite kaj postulite, pro la multo, kiun li ricevis kaj atingis.

Kompare kun tiaj devoj, la devoj materiaj praktike nenion signifas. La korpo senvaloriĝas antaŭ la spirito, kiel lumo de kandelo nuliĝas en la lumo de la suno. Ni tamen plenumu unujn kaj aliajn, flanken metante neniun el ili. Erarus, kiel ofte okazas, iu, kiu sin donus ekskluzive al unu el tiuj klasoj. Ĉu oni rigardas nur la materion, ĉu oni kulturas nur la spiriton, oni tute same kulpas.

Ĉiu el vi, surteraj homoj, estas Spirito jungita al la materio. La unua estas sufiĉe forta, por zorgi la duan kaj sin mem. Konservante ĝin, la homo ne nur konservas sin mem, sed ankaŭ li daŭrigas plu sian progresadon.

Li danku la Plejpotencan, kiu per ĉi tiu maldelikata medio instigas lin al la supro, ne, ĝustadire, ĝin malzorgante, sed, kontraŭe, zorgante tiun medion, kiel ŝtupon de l' evoluado, kiun li aspiras. La kabanon, kia estas la malvasta medio, kie li vivas, li devas plibonigi por sia propra komforto; li ne lasu ĝin disfali sub la batoj de la ventegoj kaj pro malplenumo de tiu nepra devo. Se tio okazos, li devos konstrui novan kabanon, ĝis li povos starigi mirindan palacon, kie li vivos komforte, kiel li indas. Sed li rigardu aliajn ĉirkaŭajn dometojn; li vidu, ĉu ili ankaŭ bezonas novajn trabojn kaj pli purajn litojn; li kunhelpu, por ke la pejzaĝo estu ridanta kamparo,

ne ia pestiga loko, kie febro forkonsumas la vivon de homoj sen protekto kaj espero.

Li plenumu siajn devojn al la Spirito, prenante kiel bazon siajn devojn al la materio; kaj li ĉiumomente gloru la nomon de la Sinjoro, kiu lin tiel saĝe alvokas al la harmonio de l' Universo. (Jayme Braga, Rio de Janeiro, 1946.)

# ALDONO II

## KRISTANA AMO

PAŬLO
(I. Korintanoj, 13:1-7)

*Se, parolante la lingvojn de l' homoj*
*kaj de l' anĝeloj, mi veron atestus,*
*sed sen amsento, mi kvazaŭ metalo*
*estus sonanta nur vane, aŭ estus*
*kvazaŭ sensente tintanta cimbalo;*

*Se mi posedus kapablon profeti,*
*ĉiujn misterojn, sciencojn konpovus,*
*kaj se mi fidon tielan je Dio*
*havus, ke montojn per ĝi mi formovus,*
*tamen sen Amo mi estus nenio.*

*Mian havaĵon donante, se multajn*
*homojn de mort' per malsato mi savus;*
*se mi, ke brulu ĝi, eĉ ne hezitus*
*doni la korpon, sed Amon ne havus,*
*tio al mi ja neniom profitus.*

*Amo bonfaras sen serĉi profiton,*
*sin ne ŝeveligas, neniam koleras,*
*fari malbonon neniam intencas,*
*ne fanfaronas, sen plendi suferas;*
*ĝi ne envias, nur bonon pripensas.*

*Amo kondutas laŭ decaj kutimoj,*
*ĉion konfide eltenas, toleras,*
*ĉiam la juston kaj veron obeas,*
*firme ĝi kredas je Di' kaj esperas.*
*Amo kristana neniam pereas.*

El la greka originalo parafrazis F. V. Lorenz.